Janko Veselinoviĉo
(Јанко Веселиновић)

# HAJDUKO STANKO



Serbia Esperanto-Ligo
Удружење есперантиста Србије

Удружење научних и стручних преводилаца Србије
Reprezentativno udruženje u kulturi

Janko Veseloviĉo
(Јанко Веселиновић)

# HAJDUKO STANKO

SERIO de serba literaturo

*Tradukis*
Jovano Zarkoviĉo
Ĵivanko Novakovo

*Provlegis*
Gabányi Zoltán

*Наслов оригинала*
ХАЈДУК СТАНКО

*Издавач*
Удружење научних и стручних преводилаца Србије

*За издавача*
Драгић Вукићевић

*Уредник*
др Милош Д. Ђурић

*Дизајн и прелом*
ЈП „Службени гласник“

*Тираж*
50

ISBN
978-86-917873-4-9

Година издања
2024

Janko Veseloviĉo
(Јанко Веселиновић)

# HAJDUKO STANKO

Beogrado, 2024

## ANTAŬPAROLO

Janko Veselinoviĉo (Janko Veselinović 1862–1905), la serba verkisto, naskiĝis en la Maĉva vilaĝo Nigromarĉa Bieno (Crnobarski salaš). Li finis gimnazion en la urbo Ŝabaco (Šabac); laŭ la postulo de lia patro kiu estis ortodoksa pastro, li ekstudis teologion, sed ĝin ne finis, poste komencis studi pedagogion sed pro sia avantureca animo ankaŭ ĝin ne finis. Tamen dum pluraj jaroj laboris kiel instruisto en elementaj lernejoj en diversaj vilaĝoj kaj urbetoj serbaj; finfine translokiĝis al Beogrado kie li fariĝis sekretario en la Ŝtata Presejo. Pro la diboĉa kaj boema vivo lia sano estis grave detruita: li malsaniĝis je tuberkulozo kaj mortis la 26-an de Junio 1905.

Janko Veselinoviĉo lasis gravan spuron en la serba literaturo dum ĝia periodo de nacia romantismo. Li verkis du romanojn, (eĉ kvar li komencis sed ne finverkis ilin), du teatraĵojn kaj multnombrajn rakontojn kolektitaj en deko da rakontaraj libroj, kaj tiel fariĝis unu el plej fekundaj tiutempaj serbaj literaturistoj.

La plej grava parto de lia literatura kreado estis ligita al la serba vilaĝo kaj al ĝia patriarĥa vivstilo kiun li forte idealigis. Tial la tiamaj kaj la nuntempaj serbaj literaturaj historiistoj kaj kritikistoj prave lin nomis „idealisto de la patriarĥato kaj poeto de la vilaĝa vivo“.

Romanon „Hajduko Stanko“ li verkis kaj publikigis en 1896. Ĝi estas la historia romano en kiu estis priskribita heroeco de la serba popolo fine de la 18-a kaj komence de la 19-a jarcento kaj ilia konstanta liberiga batalo kontraŭ la turka okupado.

Krom la priskriboj de la tiamaj vilaĝaj vivo, kutimoj, religiaj ritoj kaj menicioj de kelkaj historiaj personoj, en la romano oni sekvas la amrakonton inter la ĉefrolulo Stanko kaj bela vilaĝa knabino Jelica. La esenco de la romantemo estas akra konflikto inter du bonegaj amikoj, fakte plejamikoj (Stanko kaj Lazaro) ĝuste pro la knabino. La kverelo, poste la amika perfido far Lazaro, forpelis Stankon el la naskiĝvilaĝo; li decidis aliĝi al hajdukoj kiuj tiutempe estis nuraj batalantoj kiuj gerile ĉieloke atakadis la turkojn. En la romano estas priskribita la Unua Serba Leviĝo kontraŭ la turkoj (1804–1813), kaj ties gravaj serbaj batalaj venkoj, poste ankaŭ la mallongdaŭra refondiĝo

de la serba ŝtato sub la gvido de la Supera Gvidanto de la Leviĝo – Karaĝorĝo (Georgo Petroviĉo Karaĝorĝo, 1770–1818).

Kvankam Veselinoviĉo naskiĝis kaj vivis en la – jam plej parte – liberigita Serbio (en 1867, post la paca interkonsento inter la turka imperiestro kaj la serba princo Mikaelo, la lasta turka veziro Ali paŝao kun siaj garnizonoj definitive forlasis Beogradon kaj Serbion; en 1878. post la Berlina kongreso, Serbio fariĝis sendependa Princlando kaj de 1882 – la Reĝlando), la heroa kontraŭturka Leviĝo en 1804, kiu komencis ĝuste en Maĉvo, estis dum postaj multaj jaroj, granda memorfonto kiu inspiris multajn serbajn artistojn (verkistojn, pentristojn, aktorojn) precipe tiujn devenantaj de Maĉvo inter kiuj troviĝis ankaŭ la verkisto.

Nacia romantismo en la dua duono kaj fine de la 19a jarcento kulminis: la ideo por la tutserba unuiĝo iĝis nacia celo. Unuigi ĉiujn „serbajn gentojn" precipe tiujn en Bosnio kaj Hercegovino estis ne nur vivanta ideo de romantikuloj, sed praktike fariĝis oficiala ŝtata politiko. Turka imperio ankoraŭ regis en Balkano, precipe en la hodiaŭa Makedonio kaj en la sudaj partoj de la nuntempa Serbio, kaj ĝis 1878. ankaŭ en la tuta Bosnio kaj Hercegovino. Tial laŭ la postuloj de la tiama publika opinio en Serbio, „la sankta celo" starigita al la serboj kaj al la serba ŝtata ekstera politiko kaj ĝia diplomatio, estis definitiva liberiĝo de ĉiuj partoj de la okupita Balkano en kiuj vivas etnaj serboj.

Tial oni renkontas en la romano nekredeblan malamon kontraŭ la turkoj ĝenerale, kiu al la hodiaŭa moderna leganto povus ŝajni ŝovinisma kaj eĉ rasisma. Sed oni devas scii ke temas pri la periodo de preskaŭ kvinjarcenta sklaviĝo de la serba popolo, periodo de grandaj krimaj kruelaĵoj faritaj de la turkaj okupintoj, kio kaŭzis ne nur armilan reziston, sed ankaŭ altnivelan nacian romantismon, siaspecan etnan eŭforion, tipan ne nur dum la periodo de la Unua serba kontraŭturka Leviĝo, sed ankaŭ pli poste, en la tempo en kiu vivis Veselinoviĉo. Same estas kiam temas pri lia grandigo kaj idealigo de la simpla vilaĝa vivo kaj la verkista deziro plue gardi kaj konservi la patriarĥajn rilatojn en la tiama serba socio kiel proprajn, naciajn identigilojn.

En sia romano Veselinoviĉo plensukcese alligis la tiamajn historiajn heroojn kun la literaturfikciaj, tre lerte li organizis la unuiĝon de la historiaj faktoj kun tiuj literaturaj; tiel kaj la fikcio kaj la verkisto mem, „postvivis" la puran historian kronikon. Tion ĉi povis fari nur granda talento. Ĝin Janko Veselinoviĉo abunde havis. Per sia fajreca patriotismo li fariĝis ankaŭ la „proza poeto de liber(iĝ)o" kaj tio estis la magneta kampo kiu, dum jam pli ol unu jarcento, ligis la legantojn al lia romano.

Zlatoje Martinov

# ENHAVO


ANTAŬPAROLO ........................................................................................5

**LA UNUA PARTO: RIBELANTO ........................................................11**

1. NIGRA MARĈO........................................................................13
2. SUBESTRO .............................................................................18
3. PLEJAMIKOJ..........................................................................24
4. EN RONDODANCO .................................................................28
5. KRIMULO ..............................................................................34
6. TRANSFORMIĜO ..................................................................38
7. INTRIGO ...............................................................................44
8. EL KLARA ĈIELO TONDRO EKBATIS .......................................50
9. TERURA ĴURPROMESO...........................................................55
10. DISIĜO..................................................................................59
11. KAMELO ..............................................................................63
12. MONTAJ REĜOJ.....................................................................67
13. LA UNUA BATALO..................................................................75
14. LA MALBENITA DOMO ...........................................................79

**LA DUA PARTO: VENĜANTO .........................................................87**

1. ARANEO ...............................................................................89
2. JELICA..................................................................................94
3. LEĈJO (LEPORĈJO)................................................................99
4. PERSEKUTO ........................................................................105
5. SIMO KATIĈO......................................................................110
6. PIRO AGAS .........................................................................115
7. DIVIDIĜO............................................................................120
8. OBSTINECO ........................................................................125
9. SVATADO............................................................................130
10. BENO DIA ...........................................................................138
11. SENVUALIGO .......................................................................144
12. ROMPIĜO ...........................................................................150

13. TERURAJ SONĜOJ....................160
14. NOVA VILAĜESTRO....................166
15. DU PATROJ....................170
16. LA UNUA RENKONTIĜO....................175
17. UMADO....................179
18. MARTIRO....................185
19. KOMENCIĜAS VENĜO....................189
20. VENĜANTOJ....................200
21. PARAŜNICO....................205
22. BATALETO....................211
23. TIMEMULO....................217
24. KORO KONTENTAS....................221
25. BATALO EN FARMBIENO....................227

**LA TRIA PARTO: SENMORTULO....................231**
1. RIBELO....................233
2. HEJMO, HO HEJMO....................237
3. BATALO SUR MIŜARO....................243
4. „HO, PACON”....................251
5. EDZIĜFESTO....................258
6. ORDINARA EVENTO....................262
7. LUCERNO ESTINGIĜAS....................266
8. PEZNUBA ĈIELO....................271
9. FATALA BATALO....................277
10. RIFUĜKAMPO....................283
11. IOM DA SERENO....................291
12. 1813.a JARO....................295
13. RAVNJO....................298
14. INVADO....................302
15. KRUELA BATALO....................308
16. TERURO....................313
17.TITANOJ....................319

POSTPAROLO....................325
NOTOJ....................327

AL LA HEROO DE NIA EPOKO

al la elstara serbo NIKOLAO TESLO

La deknaŭa jarcento plektas al Vi la glorkronon.Permesu ankaŭ al mi enplekti en ĝin floreton el nia kamparo, floreton simplan, sed aspergitan per sango, rosumitan per larmoj de niaj antauŭloj.Ĝia odoro memorigu Vin pri patrujo Via, memorigu Vin pri la korkonkeraj rakontoj pri heroeco kaj sinofero, per kiuj Via serba patrino en Via infanaĝo fervorigis vin.

Akceptu ĝin, vi serbo, tiel plenkore, kiel al Vi plenkore mi ĝin proponas!

Via admireganto

JANKO M. VESELINOVIĈO

Indulgu, ho sanktaj ombroj, ke mi maltrankviligas ostojn viajn!... Pardonu ke mi nomojn viajn uzas – mi ja ilin uzos nur bonmemore!...Ĉar la plej sankta kaliko, kiu verŝiĝis sur la altaron de la patrujo serba – estis brustoj viaj; la sango via, kiu tiam verŝiĝis, estas ankaŭ nun bendona por la serbaro...Priverŝis vi per sango, kaj priŝutis vi per ostoj, ĉiun pecon de la tero, sur kiu el la sango kaj ostoj elkreskis abundaĵo, kiu okulojn niajn ĉielen levas!...

Dankon al vi, kaj.... indulgu!...

Mi ja rakontos pri vi tiel, kiel al mi kamaradoj kaj filoj viaj rakontis; mi beligos agojn viajn, samkiel knabino beligas la florkronon Johantagan; mi glorigos vin, samkiel vin guzloj glorigas; mi diskonigos agojn viajn kaj bravaĵojn viajn tra la mondo, samkiel ilin ankaŭ nun diskonigas la malkvieta kaj ondoabunda rivero Drino!... Memorkandelo via ne estingiĝu; nomoj viaj estu malforgesataj ĝis malapero de la gento serba!...

# LA UNUA PARTO: RIBELANTO

# 1. NIGRA MARĈO

Ne estas en Serbujo ebenejo pli granda ol Maĉvo. Ĝi etendiĝas de Miŝaro ĝis Drino, kaj de la plej alta Cera montopinto – Vidojevico, ĝis la rivero Savao...Tiu spaco egalas dekdu horojn da irado. Oni povas tutan tagon iri tra Maĉvo, vidante eĉ ne unu monteton; ĉio estas plata kiel telero. Laciĝas rigardo de vojiranto vidante ĉiam la samon: plugkampon, paŝtejon, plugkampon, paŝtejon, kaj nenion plu. Sed kiam la vojiranto envilaĝiĝas, li vidas dometon apud dometo; ĉe la domo brutejojn, malantaŭ la brutejoj – puton, malantaŭ la puto – fruktarbojn...Komence tio lin gajigis; tamen, iompostiome, tiu unuformeco lin tedas, li klinas la kapon kaj iĝas malbonhumora…

Tia estas Maĉvo nuntempe. Tamen, malgraŭ ĉio ĉi, Maĉvo belas, belegas!...Maĉvo estas dotoriĉa knabino. Ĉio, kion oni enĵetas en ties nigran internaĵon, elkreskas fruktabunda. Belaj estas Maĉvaj verdiĝintaj kampoj, sed Maĉvo ankoraŭ pli belas oriĝinte per oreca kormaro. Maĉvo estas kiel fremdulino, ne ĉiu povas Maĉvon plenkompreni!...Kiu volas koni Maĉvajn ĉarmojn kaj belojn, tiu devas vivi en Maĉvo. Al tiu Maĉvo vidigas sian sinon, donas sian amemon...Sed kiu spertis Maĉvon, tiu Maĉvon ne forlasos facile, aŭ, se devas tion fari, tiu Maĉvon neniam forgesos.

En la epoko, kiam okazis la evento pri kiu mi rakontas, Maĉvo aspektis alie. Anstataŭ plugkampoj kaj paŝtejoj tie estis densa arbaro. Kverko ĉe kverko, arbusto ĉe arbusto – densejoj abundegaj, nepenetreblaj. Sed en tiu praa arbaro troviĝis ankaŭ kelkaj maldensejoj, plugitaj kaj prisemitaj. Tie, sur maldensejo, videblis dometo kun ejoj por tenado de domaj bezonaĵoj. Ĉirkaŭ ĉiu dometo estis farita fruktarbejo – prunarba aŭ pomarba.

Tiuj dometoj estis tre simplaj, sufiĉaj nur por ŝirmi la kapon de pluvo kaj veteraĉo.Ili estis konstruitaj ĉi-tiel: unue oni kvadrate enbatas kvar fostojn. Post tio oni la teritorion ĉirkaŭplektas per vergoj, formante malfermaĵojn por pordo kaj por truo kiu servas kiel fenestreto, post kio la vergaron oni kotkovras, por ke vento ne trablovu la dometon. Desupre oni ĝin kovras per pajlofaskaro aŭ per arboŝelo.

Tiaj dometoj havis nur unu tegmentitan ejon.En ĝia mezo estas granda fajrejo, kie je ĉiu tempo brulas fajro.Ĉirkaŭ la fajro sidas domanoj; ĉe la fajrejo ili vespermanĝas kaj interparolas – tie ili ankaŭ ripozigas sian lacan korpon. Tiu ejo estis nomata „domo“. Pro tio en Maĉvo ankaŭ nuntempe la ejo kie brulas fajro nomiĝas „domo“.

Ekzistis ankaŭ pli enviindaj domoj. Tio estis domoj de kooperaj familioj.Ili distingiĝis per siaj altaj tegmentoj el ŝindo, kaj kovrita fumtubo; la domoj de pli orgojlaj familioj havis ankaŭ krucon troviĝantan rande de la firsto. Ankoraŭ ĉiam ekzistas bone konservitaj restaĵoj de tiuj domoj. En ilia interno troviĝis ankaŭ aliaj ejoj, ne nur la „domo“, ekzemple: la ĉambro de familiestro, manĝaĵejo ktp.

Malgraŭ ke tiuj dometoj laŭ sia eksteraĵo aspektis malriĉaj, tamen en ĉiu el ili svarmis kiel en abelujo.En ĉiu eĉ la plej malgranda dometaĉo troviĝis manĝaĵo, sufiĉa por la tuta familio, kaj ankaŭ semotaĵoj kaj laktaĵoj; sur stangoj super la fajrejo pendis grandaj lardaĵoj...La tieaj homoj estis diligentaj kaj agemaj – ne estas mirinde ke ili estis bonhavaj...

Jen, tia estis Maĉvo.

☆

Nigra Marĉo troviĝas en la nordokcidenta parto de Maĉvo, ĝuste ĉe la kurbiĝo, kie la rivero Drino enfluas la riveron Savaon. Tio estis malnova vilaĝo. Onidire ĝi iam nomiĝis „Jordano“. Tie, en Drina riverbrako, kiu nomiĝis Staraĝo, kiu fluis supre de la vilaĝo, dronis knabino, solfilino, kiu kun patrino alvenis Jordanon por gasti tie. Oni parolas ke la patrino lamentis tiel malĝoje, ke eĉ ne unu aŭdinto povis forgesi ŝiajn plorkantojn. En iu lamentkanto ŝi la riverbrakon nomis „Nigra Marĉo“, kaj la la ĉirkaŭaj vilaĝoj ekuzis tiun nomon ankaŭ por Jordano.

Cetere, tiu nomo estas preskaŭ konvena. La vilaĝo estas de ĉiuj flankoj ĉirkaŭita per marĉoj, ankaŭ en la mezo ĝi estas retsimile marĉoriĉa; se oni pri io ajn povas diri „dio ĝin gardas“, tion oni povas diri pri Nigra Marĉo. Tamen, malgraŭ tiomaj ŝlimejoj, la sanon de Nigramarĉanoj oni ne povas mallaŭdi.

Iuj historiistoj asertas ke tie estis episkopejo, unu el ok episkopejoj, kiujn establis la reĝo Miluteno Nemanjiĉo.

Nuntempe tiu vilaĝo estas granda kaj planstrata. Ĝi havas pli ol tricent impostatojn; sed en tiu epoko tie troviĝis apenaŭ kvindek domoj.Tamen, tiuj homoj, kvankam ne monhavaj, estis bravaj!

Nigra Marĉo havis sian vilaĝestron kaj sian popon.

Joĉjo Juriŝiĉo delonge estas vilaĝestro de Nigra Marĉo.Antaŭuloj liaj tie loĝiĝis antaŭlonge, pro tio lian domon oni konsideris aŭtoktona. Kaj avo kaj patro lia mortis kiel vilaĝestroj, tial ankaŭ li esperis la samon. Jam tridek jarojn li estis vilaĝestro de Nigra Marĉo. Li ĉiun domon konis kiel la propran,

ĉiun familiestron li konis kiel sin mem. Sian devon li ne konsideris ŝarĝo, sed honoro. Li fieris, ĉar li estis kapo de tiuj honestaj homoj, kiuj neniam faras ion ajn, kio estus peko antaŭ Dio, aŭ honto antaŭ la homoj. Simplanima, malsevera, senbrua, purkonscienca kiel infano, li facile kalkulis siajn vivotagojn, serene atendis la momenton, kiam li forlasos sian domon, plenan kiel abelujo, sian posteularon, konservitan kaj netuŝitan de malsano aŭ morto, siajn amikojn kaj kamaradojn, forironte en eternejon, respektata kaj estimata.

La popo Milojo ĉiam penis popi honeste. Li ofte ripetis la sentencon, pro kiu li fieris:

– Antaŭ mia Breviaro ĉiuj devas riverenci.

Vere admirinda estis lia Breviaro!...

Kiu suferas febron, malarion, al tiu la popo Milojo diras „la grandan" preĝon – kaj la febro ĉesas, eĉ se temas pri pesto!...Okazadis, ke oni venigas al li malsanulojn, suferantajn „La malsanon" (epilepsion). Ekzemple, foje, oni venigis al li homon el Banusa Kampo, ligitan, ĉar li rabiiĝis. La popo ordonis ke oni malligu lin.

– Ni maldevas, ho popo! – diris homoj.

La popo alpaŝis la malsanulon, alrigardis lin en la okulojn, ekkaresis lian kapon, kaj malligis lin.

Post tio li eklegis la „Teruran preĝon".

Terure estas aŭskulti la „Teruran preĝon"; ĝi estas ankoraŭ pli terura kiam ĝin legas la popo Milojo...Ankaŭ la malsanulo ektimis, li tremis kiel aŭtuna folio...

La popo al li legis, legadis... Kiam la popo finlegis, li proksimigis al la malsanulo krucon, kaj diris al li krucsigni kaj kisi la krucon.

– Mi estas lacega!

– Ĉu vi volas iom dormeti? – demandis lin la popo.

– Jes, mi volas – diris li.

La popo irigis lin al sia kuŝejo, kaj diris al li enlitiĝi.Li dormis sufiĉe longe; vekiĝinte li tute kviete proksimiĝas al la mano de la popo, kaj diris:

– Dankon, unue al Dio, kaj poste al vi!...

Li foriris kun la aliaj homoj hejmen, kvieta kiel ŝafido.

Ankaŭ libroj de la popo estis mirindaj!...Ne kiel la aliaj libroj, kiuj neniom helpas – li ja havis malnovajn, „Kosovajn" librojn, en kiuj ĉiu litero estas skribita per sankta mano, en kiuj la paĝoj estis faritaj ne el papero, sed el ledo.En tiuj libroj troviĝas preĝoj kontraŭ ajna malbono kaj tento... El tiuj libroj la popo legis funebran preĝon al „nesanktoleitaj" frenezuloj, post kio eĉ ne unu el ili lupiĝis!...Kaj vere – dum lia popado en Nigra Marĉo aperis eĉ ne unu lupiĝinto.

Tio estas vero, frato mia, li ja scipovis preĝi al Dio!...Ĉu vi aŭdis min, ho bravulido!Kiamla serbopreĝas, eĉ la plej malica ciganino plenumus lian

preĝpeton, do estas kompreneble ke lian preĝon plenumas la bona Dio, la patro de ni ĉiuj!...Ĉiuj jeskredas, ke lia preĝo estos elaŭdita.Li ne nur legas kaj sonigas vortojn – oni ja klare aŭdas kiel koro lia sonas, ĉar li sin tutdonas al la preĝo... Kiam li, serboekpreĝas, oni povus forporti ĉion kio troviĝas antaŭ li, oni povus domon lian bruligi – li la kapon ne alturnus!...

Tamen,li ne estis nur popo. Li estis homo, de la kapo ĝis piedoj, li estis homo saĝa.Ĉio kion li diris – estis malvana.Dum la vivo li elbuŝigis eĉ ne unu malprudentan vorton.Ankaŭ ŝerco lia estis plezuriga; oni sentas ke ĝi mildigas la animon kiel delikata venteto.Konsilojn li donadis serioze, kaj riproĉojn – milde...Veron, kaj nur veron parolante...

Liaj konsiloj ankaŭ pro lia maljunaĝo trovis reeĥon en la animoj de liaj paroĥanoj.Li estis okdekjara maljunulo, sana kaj vigla.La vizaĝo – purpura kiel pomo, la haroj grizaj kiel ŝaffelo. Liaj klaraj okuloj spegulis prudenton, kaj liaj movoj – fortan kaj firman volon.

Pri li oni ĉiam diradis:

– Li scias kion faras!

Kaj tio estis vero. Li ne estis ulo scienca, sed li estis vera homo el sia epoko, plena da natura freŝeco kaj senerara opinio pri ĉio; li estis unu el la homoj, kiuj kreis nian popolan saĝon, niajn proverbojn...

Kaj jen, tiuj du homoj estis ĉefuloj en Nigra Marĉo. Ili donis ekzemplon por ĉiuj. En ĉiu laboro ili dominis.La vilaĝestro Joĉjo nenion faris sen interkonsento kun la popo, kaj la popo nenion sen interkonsento kun aliaj homoj. Tial li tre ofte ilin kunvokadis kaj konsultiĝis kun ili.

Tie estis ankaŭ multaj aliaj saĝaj homoj!...Tia estis Alekso Aleksiĉo, kaj Ivano Maraĵĝiĉo, kaj Simo Ŝokĉaniĉo, kaj Jevto Popoviĉo, kaj multaj aliaj honestaj familiestroj.

Ekzemple – oni devis plenumi iun vilaĝan laboron.La vilaĝestro Joĉjo tion tuj sciigas al la popo, la popo venigas kelkajn familiestrojn, kaj interkonsiliĝas kun ili pri ĉio.Kiam la interkonsentado estas finita, tiam oĉjo Simo, alvokisto, invitas la familiestrojn en juĝejon, kiu estis konstruita meze de la vilaĝo.

Post malmulta tempo oni povis vidi homojn, venantaj al la juĝejo; iuj de unu, aliaj de la alia flanko.Junulojn oni tie ne vidis: videblis nur grizaj harplektaĵoj. Ĉiuj survestis purajn tolaĵojn, surŝultrigis drapajn senmanikajn kovriletojn, aŭ grandajn hartufajn kovrilojn.Sur la kapoj bele ruĝis fezoj, kiel se ili irus al preĝejo. Malofte oni povis vidi barbon: ĉiuj estas razitaj; malofte oni povas vidi homojn kun pipo, ĉar tiutempe oni malofte fumis.Barbon portis kaj tabakon fumis nur homoj kiujn trafis misfato, kies filo forpasis, aŭ okazis io simila...

Ili kviete kaj serioze alpaŝis kaj salutis unu la alian. Post tio ĉiuj sidiĝis kaj interparolis.Interparoloj iliaj estas saĝaj, la ŝercoj – decaj. Neniam kverelaĉoj

kaj spitado, neniam kriado kaj malsilento, pri insultado oni eĉ pensi ne povis. Tiutempe oni eĉ ne sciis pri ĝi, pri insultoSe iu estis tre kolera, tiu insulte menciis „animon“, „kapsikon“, „ŝoson ĉagrenan“, „sangon patrinan“ de insultato ktp.; sed tio estis tre malofte.Dum pluraj jaroj eĉ ne unu insulto estis aŭdita...

Kaj jen, la vilaĝestro kun la popo eliras el la juĝejo. Ĉiuj tuj ekstaras kaj alproksimiĝas.

– Mi alvokis vin, frato miaj, por ke ni interkonsentu pri grava afero – ekparolas la vilaĝestro.

Post tio li diras kio estas „grava“, kaj daŭrigas:

– Ĝuste pri tio mi interparolis kun la popo kaj Ivano; do, ni opinias ke plej bone estus fari jenon...Kion vi opinias, fratoj miaj?...

– Estu tiel, Joĉjo! – diras plejaĝuloj.

– Akceptende! – diras kamparanoj.

– Ĉu ĉiuj samopinias?

– Jes!... ĉiuj!...

– Do bone, frato miaj!Nun vi scias kion ni konkludis. Kaj tiu decido de ĉi tiu momento estas leĝo por la tuta vilaĝo.

La familiestroj revenis hejmen, kaj donis al pli junaj domanoj laŭajn ordonojn.Dank al tio, ĉiuj en la vilaĝo, de la vilaĝestro ĝis la paŝtisto, sciis la leĝon!...

Ili vivis konkorde.Tio estis nek vilaĝo, nek municipo, tio estis komuna domo.Dum festeno – festenas ĉiuj vilaĝanoj; dum malfesteno – ankaŭ ĝi estas tutvilaĝa. Ĉiuj estis invitatoj.Oni ne demandis ĉu oni estas riĉa aŭ malriĉa, sed ĉu oni estas Nigramarĉano. Ilia konkordo jam proverbiĝis.La aliaj vilaĝoj estis enviantaj, kaj ili fieris.

Tamen, tiu fiero enhavis ankaŭ vanton.Ili tre fieris pri sia konkordo, tamen ili estis ne nur dignaj kaj fieraj antaŭ aliaj vilaĝoj, sed ankaŭ ŝatis mokriproĉi kaj vortpiki aliajn; ili eĉ donadis al aliaj moknomojn....Kaj tiu kromnomoj estis tre spritaj!...Se iu ricevis kromnomon de Nigramarĉano, tiu nomo estis absolute konvena, kvazaŭ la homo naskiĝis kun tiu nomo.

Eĉ la furioza Marko Ŝtitaraco timis tion.De Sovljako ĝis Nigra Marĉo oni piediras duonhoron; sed Marko Ŝtitaraco de Sovljako ĝis Nigra Marĉo tri fojojn malvolvas kaj revolvas ŝalon ĉirkaŭ la kapo, timante ke Nigramarĉanoj primokos lin!...

La malordinaraj gepatroj havas ankaŭ malordinarajn infanojn.Ankaŭ nuntempe mia koro ĝoje ekdancis, kiam mi vidas junulojn kiuj vetluktas, vetsaltas kaj vetĵetas ŝtonojn...Tio iam sendube estis bela, ĉar la juna generacio en Nigra Marĉo nur tiujn, nur tiajn ludojn ludis...Junaj knabinoj vetpenis kiel eble pli da silko fari, pli bele ŝpini kaj teksi, pli originale ŝtrumpojn plekti...

## 2. SUBESTRO

Ekzistas proverbo: „Du bonoj ne samtempas!" La vivo vere estis bela. Tian vivon oni povus vivi eĉ du jarcentojn, tamen ĉiam aperas io, kio ĝin obstrukcas, kio igas ĝin maldelica. Nigramarĉanoj vere vivus longe kaj bele, sed fojfoje okazis ke vespere iusubite venas al onia pordo, tondrante per raspa voĉego:

– Ho subulo!

– Mi aŭdis, ho bona agao! – respondas la povrulo, antaŭtimante tion, kio povas okazaĉi.

– Donu manĝi!

– Tuj, tuj, ho agao! – krias la povrulo, kaj saltas, ankoraŭ senŝua, por malfermi la pordon al la neinvitita gasto.

La turko pezmiene eniras la domon kaj ĉirkaŭrigardas arogante kaj kolerege.

– Kuiru, avino, maizkaĉon!

– Tuj, agao, tuj!

Oni tuj blovinstigas fajron, kaj faras por la turko maizkaĉon. La turko sidiĝas ĉe la fajrejo kaj prenas ĉibukon... Li ekfumas, kaj rigardas foren, senesprime...Subite, kvazaŭ rememorinte ion, la turko formetas la opankojn desur la piedoj:

– Ek– diras li – subulo, promenigu miajn opankojn!

Kaj la familiestro, nudkapa, alpaŝas humile, enmanigas la opankajn ŝnurojn, kaj trenas la opankojn tra la korto...Tio nomiĝas „promenigo de opankoj". Li trenas ilin ĝis kiam la turko indulge diras:

– Sufiĉe!

Ega humiligo, sed oni devas elteni!...Kiel oni povas tion elteni?... Oni ja devas!...

Sed kial?

Ĉar en la vilaĝo vivis subestro.

Kiu estas tiu subestro?

Mi klarigos.

Turkoj en Beogrado malfideliĝis al sia sultano, mortigis la paŝaon beogradan, konkeris la Beogradan urbon, ili volis ekregi Serbujon, kiu tiutempe nomiĝis „Beograda paŝaejo".

Tiujn turkojn oni nomis „perfortuloj".

Ili agis laŭplane.Tion pruvis ankaŭ la fakto ke ili en ĉiujn urbojn en Serbujo sammomente instalis siajn homojn, kiuj je ilia nomo komencis estri la distriktojn (subdepartamentojn).Tiujn distriktestrojn oni nomis „subperfortuloj".

Sed por ke la ordonoj de perfortuloj kaj subperfortuloj estu plenumataj kiel eble pli certe kaj rapide, la subperfortuloj en ĉiun vilaĝon instalis „subestron".

Tiam ĉio iris glate.Tiuj perfortuloj obeis nur unu postulon – subpremi ĉiun kontraŭanton.Ajna kontraŭstaro kaŭzis senkapigon!...Kaj jen, ĉiuj kredis ke la plej sankta devo estas reverenci kaj plenumadi ĉiun dezireton de ĉiu ulo kiu blankan tukon volvis ĉirkau sia kapo.Tiamaniere ili akiradis siajn amikojn. La kompatindaj serboj povis nur riverencadi kaj kliniĝadi.

La potenco de la subestro estis granda. Li povis senvivigi homon senpune! Al kiu plendi? Ne ekzistis diferenco inter la subestro, lia ĝendarmo, kaj perfortulo.En tia situacio oni povis nur levi la okulojn al la ĉielo; sed Dio ne rapidis!...

Ekzistis vojo inter Raĉo kaj Ŝabaco.Tio estis ordinara traarbara vojo: renversitaj arbustoj, densejo senarbigita nur tiom, kiom sufiĉis por ke oni povu trairi.Tiu vojo troviĝis nordflanke, tuj super la vilaĝo. Tie troviĝis ankaŭ apudvoja tranoktejo.En ĝi loĝis la subestro de Nihgra Marĉo kun siaj ĝendarmoj.

Li nomiĝis Suljo. Lian familian nomon sciis neniu – nek tiam, nek nun. mTamen, de nigramarĉanoj li ricevis kromnomon laŭ unu el liaj pasioj.Li, kiel urso, pasie amis pirojn; se sur arbo troviĝis nur unu piro, kiun li ne povas faligi, li ĝin konstante rigardis kaj kraĉetis. Pro tio nigramarĉanoj lin kromnomis „Piro".Tiun lian nomon ili uzis dum interparolo, ĉiufoje kiam temis pri li – pro tio ankaŭ ni nomos lin tiel.

Mi devas diri ankaŭ ke li sciis ke oni lin nomas tiel; de tempo al tempo ankaŭ li mem nomis sin tiel.

Li estis ne tute ordinara turko. La nigramarĉanoj konis turkojn kiel furiozajn kaj arogantajn homojn.Piro ne estis tia.

Oni povus diri ke li estas pli agrabla ol malagrabla, pli milda ol kruela, pli senbrua ol eksplodema.Li ne evitadis homojn, male, li klopodis troviĝi inter ili.Pri ĉio li zorgis.Se iu estis malgaja, ankaŭ Piro malgajis, okuloj liaj tuj estis plorpretaj!...Li scipovis ĉien enŝoviĝi; li ĉion volis scii, li penis en Nigra Marĉo scii ĉiun bagatelaĵon...Li sciis la nomon de ĉiu nigramarĉano; li konis ĉiun junulon, li iris en ĉiujn vilaĝajn domojn, vizitadis ĉiun rondodancadon

de gejunuloj, babilis kaj ŝercis tie...Unuvorte: li penis ajnamaniere amikiĝi kun la nigramarĉanoj.

Tamen, ŝajnis ke tio ne eblas. La homoj restis senemociaj al li. Estis io en tiu agrabla vizaĝo kio malagrable tuŝis la homojn.Tio estas liaj okuloj, tre mirigaj okuloj: jen bluaj, jen verdaj, jen brilaj, jen malklaraj, sed ofte ankaŭ sangaj. Ili rigardas iel malordinare, kiam oni aŭskultas liajn vortojn oni pensas ion, sed kiam oni rigardas liajn okulojn – oni ne plu pensas la samon.

Jen, parte temas pri tio, sed la homojn repuŝadis ankaŭ la fakto, ke li estas turko. La popo diris:

– Mi preferus ke li estu vera turko!...

Ĉi tiel li estas pli danĝera.Li estis kiel bela aspido: kolorriĉa, sed venenplena. Kial li flatas min?... Li estas turko, kaj mi estas serbo, do ni ne povas deziri bonon unu al la alia!... Kie estas lia vivo, tie estas mia morto; kie al mi estas bone, tie al li estas malbone!

Kaj tiuj vortoj de la popo forpuŝis homojn de Piro...

Tagnokte Piro pensis pri la kialo de tio. Kiu ulo obstrukcas lian planon?... Sed li nenion sukcesis ekscii... Li suspektis pri la popo Milojo, sed ne estis certa...

Li ja vere estis homo malbona, homo kiun kverelo vigligis, kiun alies malfeliĉo – feliĉigis.

Foje li ekiris en vilaĝon kiu ne troviĝis malproksime. Li pensodrone iris sur pado; sub liaj piedoj kraktetis sekaj branĉetoj, kaj susuris forfalintaj folioj.

Sur la pado li renkontiĝis kun Marinko Marinkoviĉo. Ekvidinte lin, Marinko depadiĝis, kaj atendis lin kun profunda klino. Piro ĝentile salutis lin.

– Dio vin favoru, ho honesta sinjoro!

La voĉo de Marinko eksonoris agrable. Piro haltis kaj alrigardis la homon, kiu alpaŝis kaj kisis liajn baskon kaj manon, tenante siajn manoj sur la brusto, kaj mallevis la kapon...

Mi devas diri kiu estas Marinko.

Li estas kamparano.Li plugis kaj fosis, dank al tio li vivtenis sin; same vivis ankaŭ liaj antaŭuloj. Patro lia almigris en Nigran Marĉon el Obarsko, el Bosnio, sed baldaŭ forpasis. Marinko, estante viro, komencis mastrumi, sed tre malsukcese, ĉar li estis maldiligenta. Li ne ŝatis kuri kaj kotiĝi. Li preferus ke la ĉielo pluvigu panon en lian buŝon. Evitante laboron, li ofte sencelumis ĉirkaŭ la juĝejo kaj tranoktejo.Por li la plej granda plezuro estis bonvenigi kaj adiaŭi turkojn.Laŭ lia opinio ĝuste al ili Dio donacis veran vivon.Kiam ili interparolis, li ĉiam kiel hundo kaŭre atendis, aŭskultante iliajn „saĝajn" interparolojn... Kiam ili estis forirantaj, li, feliĉosenta, helpe tenis piedingon de bejo aŭ agao, por ke tiu pli facile surĉevaliĝu...

Kun la buŝo plena da laŭdoj, li post ilia foriro kolekatadis tabakajn ardaĵojn, kiujn ili skuis el siaj pipoj, kaj poste fumis tion...

Li laboris nur kiam li devis, sed kombinis la pensojn eĉ kiam estis tempo por dormi. Planojn li forĝis ĉiam.Liaj deziroj estis pli grandaj ol la deziroj de caro...Li havis akrevidajn okulojn, kiuj ĉion rimarkas; ankau memoro lia estis bonega. Tre ofte, kiel senfara hundo, li pasumis tra la vilaĝo, kaj ĉirkaŭ ĝi. Li ĉiam sciis kion iu ajn faras; li sciis kiu knabo kun kiu knabino umas; li sciis kiom da kuleroj estas en ĉiu domo; li sciis kiu virino estas graveda; li sciis... ĉion. Neniu konis Nigran Marĉon kiel li, neniu konis, eĉ laŭnome, la bubaron vilaĝan kiel li. La brutojn, kaj kiu kiom da brutoj havas... ĉion!Li ĉion sciis.

Piro lin konis. Tamen, konkurantaj parencaj animoj malamas unu la alian. Ankaŭ Piro lin ne amis. Tamen, ĉar la voĉo de Marinko eksonoris agrable, li haltis por momento, kaj kiam Marinko kisis lian baskon kaj manon, li komplete haltis.

– Kien vi ekiris? – demandis li.

– En la arbaron, honesta sinjoro.

Piro rigardas Marinkon, kliniĝintan kvazaŭkaduke.

– Mi volas ion demandi, Marinko!

– Bonvolu, sinjoro.

– Kial la senkreduloj estas tiaj?... Tio estas nekredebla – ju pli bone mi kondutas al ili, des pli malbone ili kondutas al mi.

– Honesta sinjoro, – diris Marinko – la respondo estas evidenta.

– Ĉu iu kaŝe instigas ilin konduti tiel?

– Tio estas la nura versimila supozo!...

– Kiu do estas tiu?

– La homo, al kiu vi kondutas plej homece. Vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton!

– Ĉu la popo?

– Li!

– Ĉu ankaŭ la vilaĝestro?

– Ankaŭ li!...

– Kion do ili diras?

– Multon ili diras!... Ili evidente estas trodorlotitaj!...Ili diras ke vi kaĵolas por pli facile elsuĉi ĉion el ili... Ili diras ke via homeca konduto al la popolo estas abomena mensogo!... Ili diras: li estas turko, kaj ĉiu turko estas malamiko de la serboj!... Ili diras...

– Ĉu ĉion tion diras la popo?

– Kaj la popo, kaj la vilaĝestro, kaj... ĉiuj!...

– Iru kun mi – diris Piro.

Li revenis. Marinko postiris lin.La turko estis kolerega. Al li malplaĉis ke oni tiel rapide travidis lin.Li ja preparis belajn planojn, pri kiuj li pensis tagnokte; sed nun li vidis ke liaj planoj disflugis kiel sapvezikoj...

Ili silente alvenis la tranoktejon.La turko irigis Marinkon en sian senmeblan ejon, kie troviĝis nur unu divano kaj kelkaj surmuraj armiloj. Al Marinko tiu ejo ekŝajnis brila, kvazaŭ cara... Profunda interena ĝojo saturis lian tutan korpon kiam Piro diris:

– Sidiĝu ĉi tien, apud min, bona homo!

– Mi ja povas stari, honesta sinjoro!

– Sidiĝu, Maĉjo, sidiĝu!... Prenu tabakon. Vi ja fumas, se mi bone memoras, ĉu?

Marinko levis la kapon, sed rektiĝis nur duone; alpaŝinte la divanon, li sidiĝis nur per malgranda parteto de sia korpo – kaj fiksirgardis la turkon.

Tiu vizaĝo estis tiel milda, tiel plaĉa, ke ĝi similis al la vizaĝo de sanktulo. Marinko senintence ekvortis:

– Bona mia sinjoro!...

Kaj li sincere, profundanime, malbenis kaj la popon, kaj la vilaĝestron, kaj la nigramarĉanojn, ĉar ili ofendas ĉi tian homon!

La turko enmanigis al li saketon da tabako, kiun Marinko akceptis kun la plej granda respekto, preskaŭ tiel, kiel en preĝejo oni akceptas la sanktan hostion.

– He, Maĉjo mia, kara frato mia!... Mi ne adekvatas por ĉi tiu vilaĝo. Ĉi tie devus esti ne mi, sed Mujo el Bogatiĉo!

– Vi estas bona homo, sinjoro! Sed mi opinias, ke vi devus esti iom pli rigora.

– Tamen, kiel fari tion! – la turko komencis afekti.

– Mi unue minacetus la popon!... Li estas la unua kiu devus sperti kia vi estas! – diris Marinko.

– Ne, ne, ne!... Sangon mi ne volas!... Mi deziras agi homece!

– Tamen, kara sinjoro, vane estas ĵeti grajnojn al blinda kokino!

– Mi ne volas sangon!... Mi deziras ke la homoj komprenu, ke mi ne estas ilia malamiko!... Mi deziras havi fratajn rilatojn kun ĉi tiuj homoj!...

Marinko kompatis la turkon.

Ambaŭ silentis longe. La turko ŝvebigis fumojn el sia longa ĉibuko, dum lia rigardo pigre sekvis la fumrondaĵojn... Abrupte li demandis:

– Ĉu la popo kaj vilaĝestro vivas en akordo?

– Kiel fratoj.

– Ĉu oni povus malamikigi ilin?

Marinko silentis certan tempon.

– N... ne povus!... Neniu povus malamikigi ilin!... Mi konas Nigran Marĉon pli bone ol propran domon – en Nigra Marĉo ne ekzistas homo, kiu povus ilin malamikigi! – diris li pensodrone.

– Tio estus tre bone! – diris Piro. – Estus tre bone se ili malamikiĝus, por ke mi povu reamikigi ilin!... Tiamaniere oni komprenus ke mi homas!...

La lipharoj de Marinko, kvazaŭ ridetus. Li ekrigardis Piron rekte en la okulojn... Ĉi tiu rimarkis tion.

– Nu? – demandis li ĝoje.

– Ho, honesta sinjoro, ne demandu! Lasu min agi!... Mi nun bone komprenas kion vi deziras!... Ĉio estos farita, vi povos interpacigi ne nur du homojn sed la tutan Nigran Marĉon!...

– Marinko! Frato! Homo!... Se vi tion faros, vi estos mia frato!... Mi faros vin la plej honorata homo!... Ĉu vi volas tabakon?... Jen! Donu tabakujon!... Bone!... Ĉu vi bezonas monon?... Suljo havas ĉion, kion vi deziras, kaj ĉio estas via!... Jen! Prenu!...

Piro eksaltis. Liaj okuloj brilas kiel braĝo, vizaĝo lia ridetis ĝojradie.

Ankaŭ Marinko leviĝis.

– Dankon al vi, honesta sinjoro!...Vi estos kontenta, kiam mi finfaros tion. Sed ne por mono. Vian amon oni ne povas pagi!

– Iru, Marinko, iru!... Sukceson!

Marinko denove salute mantuŝis la vizaĝon, kaj eliris el la ejo.

Tutan tagon li vagis sencele. Pensosvarmo saturis lian cerbon.Li deziris ke tio, kion li faros, estu farita kiel eble plej bone.Antaŭ li horizontis brila estonteco. Li amikos kun la plej gravaj bejoj... Ne ekzistos turko kiu ne scios lian nomon. Neniu preteriros, ne demandante pri li. Preteriros bejoj... paŝaoj... eble eĉ la honesta veziro mem, kaj ĉiuj mencios lian nomon...

Kaj Piro?

Ankaŭ li sonĝis brilajn sonĝojn. Li ne povis kviete kuŝi. Brusto lia ŝvelis, la koro dancis pro ĝojo.

– Kverelosla duopo – flustras li – kaj mi estos tie por eksciti la ardaĵojn. Mi altiros unu flankon, kaj tiu flanko gajnos... Unu falos, la alia saltos... unu havas amikojn, la alia havas amikojn – kaj ankaŭ la amikoj malamikiĝos...

Li jam kvazaŭvidas tiun tohuvabohuon. Li jam sentas la grandan ĝojon kian sentas laboristo, vidante ke lia laboro progresas; la ĝojon pro kiu vangoj kvazaŭbrulas, pro kiu la koro dancas, kaj... ĝojon kiu estas nerekompencebla...

Li nek manĝis nek trinkis. Nur vespere li alportigis akvon, kaj tralavis la buŝon, kiu amariĝispro multega tabakumado ...

## 3. PLEJAMIKOJ

Alekso Aleksiĉo kaj Ivano Maraĵĝiĉo estis najbaroj. Ili estis unuauloj inter la kamparanoj. Ili estis bonaj amikoj en sia junaĝo, kaj restis kunuloj ankaŭ en maljunaĝo, kiam ili jam estis mastroj en siaj domoj. Samkiel iliaj domoj ĉiam rigardis unu al la alia, tiel ankaŭ ili neniam kverelis.

Ambaŭ domoj estis homoplenaj kaj riĉabundaj. Deĉiame ili helpadis unu al la alia dum kamplaboroj. Dumrikolte ili ĉiam laboris kune. Ivano ne volis eĉ unu gluton da brando fortrinki sen Alekso, kaj ankaŭ Alekso tion ne volis sen li. Se oni festenis en la domo de Alekso, Ivano estis festenestro, kaj se oni festenis en la domo de Ivano, festenestro estis Alekso. Ĝojon kaj malĝojon, bonon kaj malbonon – ili ĉion dividis.

Ili gardis unu la alian, kaj ankaŭ iliaj infanoj gardis unu la alian. Ivano havis tri filojn kaj unu filinon, Alekso – nur kvar filojn. Okazis ke Stanko de Alekso estis samaĝulo de Lazaro de Ivano.

Ili kreskis en amo – kaj amikis; ili kreskis en bono – kaj adoltiĝis fortaj, sveltaj kaj belstaturaj.La gepatroj fieris pri ili!...

Stanko estis nigrahara, Lazaro – rufa; Stanko milda kiel lakto patrina – Lazaro impeta kiel printempa herbeto; Stanko dorlotema kiel malgranda ŝafido – Lazaro eksplodema; Stanko preteraŭdis kaj facile pardonadis ofendojn, sed Lazaro apenaŭ povis toleri eĉ sian patron.

Tamen ili amikis.Unu la alian ili nomis „plejamiko“.

Ili estis la plej bonaj knaboj en Nigra Marĉo.

Kiu faligis Lazaron, tiu ne faligus Stankon; kiu saltvenkis Stankon, ne venkus Lazaron; kiu ŝtonĵete venkis Lazaron, ne venkus Stankon; cetere, ĉiuj nigramarĉanoj sciis ke Stanko estas la plej bona celisto.

Tamen... diablo scias!... Okazis fatalaĵo!... Ambaŭ kvazaŭfratoj enamiĝis al la sama knabino!...

Tio estis Jelica Seviĉo. Glorinda knabino! Tio estis vera beleco, ne beleco de nobelino, sed beleco de bravulino. Ekzistas ja popolkanto pri „la staturo knaba, kaj rigardo knabina“. Okulo ŝia povus monton flamigi. Se ŝi surdorsigus

kvar knabojn kiel kvar faskojn, ŝi povus porti ilin tra la vilaĝo!... !... Koncerne ŝiajn brodaĵojn – pri ili ĉiuj parolis. Ŝi ne nur brodis, ŝi elpensadis ĉiam pli novajn ornamajn belaĵojn, pro kio antaŭ komenco de brodado en la domo de Seviĉo kolektiĝadis virinoj kaj knabinoj por imiti ŝiajn brodaĵojn ...

Du knaboj, sed unu knabino! Tio certe ne estas bone!... Tie nepre elkoviĝos nedezirindaĵo!...

Kaj en rondodanco, kaj post rondodanco, Stanko kaj Lazaro ĉiam estis ĉe Jelica. Ŝi priatentis ambaŭ knabojn. Ambaŭ devenas de bonaj domoj, ambaŭ estas bonaj knaboj... ŝi ne sciis kiun elekti!... Sed tamen, la nigraj okuloj de Stanko konkeris ŝin. Enamiĝis la knabino al la okuloj, ilia brilo irigis ŝian cerbon promeni... Ŝi komencis pli eme rigardi Stankon ol Lazaron...

Verdire, tion ŝi diris al neniu, sed Lazaro tion rimarkis. Tion ŝi ja ne povis kaŝi de observema okulo!... Ŝi povis kunpremi la koron, kaŝi la sentojn, sed la okuloj estas perfidaj...Rigardo onia senintence fiksas tiun, kiun oni amas; la vangoj kvazaŭbrulas, kvankam oni tion ne konscias... La koro trembatis kaj puŝetis ŝin antaŭen... al li!...

Sed kiam Lazaro komprenis tion, en li io taŭziĝis... Li ĝis tiam amis Stankon pli ol ambaŭ fratojn; sed post tio Stanko komencis veki en li malsimpation. Ju pli Stanko estis kune kun Jelica, des pli Lazaro malamis lin.Kiam Stanko komencis ankaŭ ŝerci – Lazaro definitive ekmalamis lin ... Li evitadis Stankon; li penegis eĉ ombron de Stanko ne surpaŝi; sed kiam li tamen devis ekparoli kun Stanko, li parolis malvole, koleris senkaŭze. Stanko ne plu estis lia plejamiko, sed porĉiama malamiko...

Stanko tion ne rimarkis. Li fakte nenion povis rimarki. Liaj okuloj estis fermitaj por ĉio, krom por Jelica. Li vidis nur ŝin, ŝian longan, brunan hararon, ŝiajn verdegrizajn okulojn, ŝian purpuran vizaĝon... Ŝi estis lia revo kaj realo, li nur pri ŝi pensis...

Tagoj estis pasantaj... Kiel krimulo kaŝanta sian krimon, tiel Stanko estis kaŝanta sian amon. Li ne permesis ke eĉ unu lumero falu sur lian animon kaj vidigu liajn sentojn...Li ja pensis ke neniu scias pri tio! Sed li sentis ke li devas al iu konfidenci; li devis havi iun, kun kiu li povus paroli pri tio – por malturmenti sian animon.

Kaj li decidis ĉion diri al Lazaro.

Foje, ĝuste dum Elijtago, je tagmanĝtempo, li renkontis Lazaron en arbaro.

– Plejamiko! – ekkriis li.

La vizaĝo de Lazaro ŝanĝiĝis, sed li ne povis ne reagi. Li respondis.

– Diohelpe, kien vi iras?

– En arbaron!

– Mi volas diri ion al vi!

Lazaro haltis.

Li alpaŝis kaj post kutima saluto, diris:

– Mi longe meditis ĉu diri al vi, sed finfine mi konkludis – se mi ne diros al vi, mi al neniu povos diri.

– Kion do? – demandis Lazaro malvole.

Stanko ĉion diris malkaŝe.Li vidigis sian animon kaj koron klare kaj senbare, eĉ petis mencii tion al lia bofratino Mara, esperante ke ŝi ĉion diros al la patrino!...

– Mi hontas, plejamiko!... Mi hontas, je Dio. Mi ne povus tion diri, eĉ se mi estus buĉota!... Sed vi povas!... Kaj tiam, plejamiko, se la kompatema Dio tion permesos – vi ja estos mia nuptofrato!... Ni ja interkonsentis pri tio!...

La vizaĝo de Lazaro ŝanĝiĝadis. La morte nigra tero sub liaj piedoj brulis...

– Ĉu vi faros tion, plejamiko?...

Lazaro ion elmurmuris tra la dentoj, forturniĝis kaj ekiris.

– Atendu iomete, ni priparolu! – diris Stanko.

– Mi devas doni furaĝon al la brutaro!

– Bone do! Sed en rondodanco ni renkontiĝos!

Lazaro jam estis for. Kiel se fulmoj skurĝus lin... Spiro lia intermitis. Li sentis ke la cerbo lin forlasas, mallumo kovris liajn okulojn. La anima profundo dolore kriis, la koro kvazaŭ saltus el lia brusto... Li tiumomente kapablus sturmi tutan taĉmenton.

Elpost arbusto alaperis homo. Ĉar suferego vibris en li, Lazaro la homon preskaŭ ne vidis, kaj ne rekonis.

Tiu homo estis Marinko.

Li alproksimiĝis.

– Laĉjo, parenĉjo, – diris li ridetante – kion vi faras?

– Nenion, oĉjo-Marinko, – diris Lazaro, penante ŝajnigi trankvilecon.

– Kial vi tiel malbonhumoriĝis, kvazaŭ ĉiuj viaj samdomanoj estus senigitaj je la vivo?

– Kiu, ĉu mi? – demandis Lazaro, ekridonte. Marinko okulfiksis lin.

– Ho... ne parolu malveron, filĉjo!... Ĝuste vi... Ĉu eble iu knabinjo vekis vian inklinon?...

– Ne! – diris Lazaro, forturnante la okulojn.

– Ha!... ha!... ha!... Mi ja scias!... Jelica de Miloŝo!... Lazaro klinis la kapon, silentante.

– Sed ankaŭ via plejamiko amindumas ŝin, ĉu ne? La sango de Lazaro ekbolis...

– Je Dio, filĉjo, ne permesu al li elseligi vin!... Preterlasi ŝin estus peko!

La tempiaj vejnoj de Lazaro jam ekŝvelis.

– Kvazaŭ li estus pli bona ol vi!... Laŭ riĉaĵo– ne estas, laŭ beleco – ne estas, laŭ la staturo – ne estas!... Kial ĝuste li prenu ŝin?...

Larmoj aperis en la okuloj de Lazaro. La ruzegulo vidis tion, kaj kiel hundo kiu flartrovis spuron, ankaŭ li tuj daŭrigis la ĉasadon.Li vidis ke li tuŝis la plej vundeblan lokon de Lazaro.

– Je Dio, jes!... Kial ĉiam esti cedanto!... Ĵurvorte, mi ne rezignus! Se temus pri io alia, bone... Tamen, tio estus vivdetrua decido!... Memorfiksu, vivdetrua decido!

– Kion do mi faru? – demandis Lazaro, vidante ke Marinko ĉion scias.

– Mi farus ĉion, nur por ke ŝi ne estu lia! He, filĉjo mia!... Vi ankoraŭ estas juna kaj naiva, nenion vi scias!... Ĉu vi scias kion mi, la grizharulo, farus?

– Kion do?

– Mi... mi mortigus lin!...

La okuloj de Lazaro ekfulmis... Marinko trafis la ĝustan lokon.

Liaj akrevidaj okuloj perceptis tion.

– Ĉu mortigus? – demandis Lazaro.

– Mortigus!

– Kion pri tribunalo?

– Ĉio alia estus facila, se li ne estus ĉi tie! Tamen, por la filo de Ivano Maraĵĝiĉo tio estas ankoraŭ pli facile!... Do, iĝu trankvila!... Vi estas ankoraŭ juna, filĉjo mia!... Tion farus mi, la oldaĝa; sed vi nur ekvivis, vi ne faru tion!... Tio ja estas malgravaĵo: nur knabino!... Brila knabo, kun brila patro, el brila domo... vi povas por ĉiu via fingro trovi alian ineton!... Adiaŭ, Laĉjo, filĉjo, adiaŭ! – diris Marinko.

Li aprobe frapetis la ŝultron de Lazaro, forturniĝis kaj foriris malrapidpaŝe. Animo lia ridetis.

– Lazaro estas preta! – elflustris li. – Mi flamigis la ardaĵon... okazos incendio!... Post longa atendado!... Aŭ li mortigos Stankon, aŭ – se li tion ne faros– Stanko mortigos lin! Tion mi sciegas!... Lazaro estas luktamulo, Stanko – bravulo.Tio estos batalo de du povuloj!... La kara Suljo ne plu povos diri: vi fumas mian tabakon vane!... Nun li iĝos egala al Dio, li povas fari ĉion, kion li volas!...

Kontentoplena Marinko foriris tra arbejo.

# 4. EN RONDODANCO

Fajrero saltis tre oportune: ĝuste tiam kaj ĝuste tien, kien ĝi devis fali. Ĝis tiu momento Lazaro ŝanceliĝis; nun li estis decidplena... Antaŭ tre longa tempo, dum la unuaj ĵaluzhoroj, tiu penso aperadis en li, sed li mem repuŝadis kaj sufokadis ĝin. Tamen, ju pli li sufokadis ĝin, des pli forte ĝi eruptis, sturmis lian koron, luktis kun li tutajn tagnoktojn.Tie estis la infanaĝo, kaj zorgo, kaj amo de iliaj gepatroj, kaj la dolĉaj kaj ĉarmaj rememoroj. Terurege estis decidiĝi al tiu ago, des pli terure, ĉar Lazaro ĝis tiam ne aŭdis ke io simila okazis...

Sed nun, kiam la maljuna homo diris al li ĝuste tion, kion lia kaŝpenso konstante flustras, nun al li ekŝajnis ke li rajtas tion fari!...Kial li devus zorgi pri Stanko!... Stanko, kiu ja estas tiu Stanko? Se li estus kamarado, kompano, se li estus vera plejamiko, li ne provokus, kiel provokis ĉi-matene: „Plejamiko, vi estos mia nuptofrato; tiel ni ja interkonsentis!"... Ekbolis torente lia junula sango...

– Li ne estos nuptofrato! – preskaŭ muĝis Lazaro. – Li ne estos nuptofrato, sed malamikaĉo!...Ankaŭ mi estos lia malamikaĉo!... – Mi fortranĉados karnopecojn de lia korpo, kaj manĝos ilin krudaj!... Eĉ se li estus la plej granda potenculo, por mi li estas nenio!....Mi lin faligos... dispremaĉos!...

Ne sciante kion faras, Lazaro demetis la ĉapon kaj ekis paŝi. La varma Elijtaga suno estis traboranta densajn foliojn, ĝiaj helaj radioj faladis jenjene sur la teron. Li brulis eĉ sen la suna varmo. Rankoro kaj aflikto bruligis fajron en lia brusto, tiu fajro forcindrigis ĉion, kio estis bela kaj nobla en tiu brusto...

Longe li vagis. Li sentis nek malsaton nek soifon. La vespera suno jam estis antaŭkrepuska kiam li venis al rondodancejo, kie li intencis trovi Stankon kaj malpaciĝi kun li.

Stanko jam estis tie kun Jelica. Li entuziasme gajis... Paradizo anĝeligas la homon, kaj Stanko, en la paradizo de sia animo, estis vera anĝelo. Se oni petus lin doni ion ajn, Stanko tion donus.Se oni iun insultus – Stanko defendus lin. Se oni dirus, ke ekzistas malbonaj homoj, li argumentus, ke ili ne ekzistas!... Se oni dirus al li ke iu pensas pri mortigo, li rigardus mire, nekredeme; li demandus: ĉu ekzistas homoj kiuj intence volas mortigi alian homon?...

Gejunuloj komencis ludi, vetsaltante.

Lazaro direktiĝis al Stanko.

– Atendu iomete, Laĉjo! – diris Stanko Juriŝiĉo. – Saltvenku Ŝokĉaniĉon, je via baptonomo!... Ŝokĉaniĉo fieraĉe furias, ĉar neniu povis saltvenki lin!...

– Mi ne povas – diris Lazaro. – Ĉu neniu alia povas?...

– Mi vokis la samnomulon, sed li estas tie kun Jelica... Lazaro ekpaŭtis. Certan tempon li silentis, ŝanceliĝante, kaj poste diris:

– Bone!... Mi saltvenkos!...

Li alpaŝis la marklinion, svingigis du-tri fojojn la brakojn – kaj transsaltis la linion.

– Ho!... Peĉjo!... – tumultis la knabaro. – Ek, treu!...

Peĉjo saltvenkis Lazaron.

Lazaro eksaltis kaj saltvenkis lin. Peĉjo denove alkuris la linion.Komenciĝis vetsaltado.

Tamen, ili baldaŭ egaliĝis.Neniu inter ili povis saltvenki...Ĉiuj ŝtoniĝis kaj okulis kio okazas. Ankaŭ knabinoj alvenis; eĉ la paradiza kvieto de Stanko malaperis.

– Vi ne povas, Peĉjo, ne povas! – diris Juriŝiĉo fiere.

– Sed vi ne povas salti eĉ ĝis tie!

– Tro malproksime estas tio! – diris iuj. – Salti senkure – tio estas tro!

– Pli longe povas neniu! – diris Lazaro.

– Mi saltos unu futon pli! – ekkriis Stanko Aleksiĉo.

– Ĉu vere? – ekkriis la knabaro. Lazaro streĉis ambaŭ orelojn.

– Ni rigardu! – ekkriis knabinoj.

Stanko alpaŝis kaj haltis je la marklinio. Li du fojojn svingigis la brakojn, leviĝis kiel per flugiloj, kaj transsaltis unu futon pli.

– Ho-0! – eksonis krio.

Ĉiuj senescepte ekrigardis al Stanko kun respekto; Jelica kaŝrigardis tiamaniere, ke vejnoj sur la frunto kaj tempioj de Lazaro, kiu tion rimarkis, pufiĝis.

– Formoviĝu! – ekkriis li.

– Aha! Atendu Lazaron – ekkriis gejunuloj foriĝante. Lazaro alpaŝis la marklinion. Ĉiuj haltis senspire. Lazaro saltis sur la linion.

– Li sukcesis!... Ek, nun, Stanko!... Stanko estis serena kiel primavera tago. Li ekridetis kaj diris:

– Mi povas ankoraŭ unu futon!... Mi estas facila kiel vento!...

Sen ia ajn fortostreĉo li saltis tutan futon post la linio.

Lazaro kvazaŭ perdus kontrolon...

Li streĉis ĉiujn siajn fortojn, sed ne povis transsalti. Li saltis du fojojn samlonge, sed la trian fojon – malpli.

– Cedu, Lazaro, vi ne povas! – ekkriis la knabaro.

– Ĉi tiu salto ne estis laŭregula. Li estas transpaŝinta la marklinion! – diris Lazaro malice.

– Mi ne faris tion, plejamiko! – diris Stanko.

– Vi faris!... Vi faris tion!...

– Mi ne faris!... Tamen, por ke vi konvinkiĝu, mi saltos ankoraŭ unu futon pli!

– Rezignu! – diris Lazaro.

– Fratoj!... ne permesu al mi mensogi!... Mi transsaltos ankoraŭ unu futon! – ekkriis Stanko.

– Do, atendu! – diris Lazaro.

Li alpaŝis la linion. Tie li mezuris unu futon, elingigis sabron, metis la kontraŭklingan flankon sur la teron, kaj la klingon turnis supren.

– Saltu! – diris li, retiriĝante de la linio, dum okuloj liaj estis elverŝantaj inferan malamon... La knabaro reagis.

– Ne tiel! – ekkriis oni de ĉiuj flankoj.

– Estu tiel! – diris Stanko decidvoĉe, kaj alpaŝis la marklinion.

– Atentu, ĉu mi staras je la marklino?

Ĉiuj senescepte haltis. Jelica, kvazaŭ diveninte la intencon de Lazaro, iĝis morte blanka...

Stanko ĵetiĝis kaj transsaltis la sabron...

De ĉiuj flankoj audiĝis favorkrioj, ĉiuj kvazaŭ reviviĝus... Ĉiuj senescepte saltis kaj ariĝis ĉirkaŭ Stanko.Li ekrigardis al Jelica, kies vizaĝo malrapide denove iĝis flamruĝa... en ŝiaj okuloj li vidis ĝojegon, kiu por li gravis pli ol ĉiuj laŭdoj...

– Vi saltvenkis, nun ni vetluktu! – diris Lazaro.

– Ĉu mi kontraŭ vi?! – demandis Stanko mire, ĉar ili du neniam vetluktis. – Sed kial?

– Ni vidu kiu estas pli bona luktulo!

– Rezignu ja! – diris Stanko.

– Ĉu mi genupetu?! – replikis Lazaro. Eĉ rigardo lia estis defia. Stanko ekkoleris.

– Kio okazas kun vi, plejamiko? – demandis li. En lia voĉo sonis riproĉo.

– Ĉesu jam! Ĉu vi kuraĝas – aŭ malkuraĝas?! – ekkriis Lazaro. Liaj okulblankoj iĝis sangruĝaj pro malico.

– Nu, bone... se vi volas tiel! – diris Stanko, mirante kial Lazaro insistaĉas...

Ili ekluktis ...

Korpbatalis ili sur maldensejo...Du grandeguloj, du luktuloj, du la plej bonaj knaboj en la vilaĝo vidigis sian forton... Ĉiuj senescepte fiksis siajn okulojn al ili...

Ili korpbatalis... Ambaŭ estis same fortaj. Ambaŭ regis kaj forton, kaj lerton; ambaŭ sekvis ĉiun movon de la kontraŭulo...

– Ili ne povas faligi unu la alian! – diris Ŝokĉaniĉo.

– Faligos Stanko!

– Ne faligos!

– Faligos!

– Ne faligos! Ili falos ambaŭ kune – diris Popoviĉo.

Stanko ridetis, Lazaro ekŝvitegis.

– Faligos Stanko – Lazaro senfortiĝas! – diris Ivankoviĉo.

Aŭdinte tion Lazaro plenforte premegis Stankon... Tamen, Stanko sin gardis tiel lerte, ke tion rigardi estis ĝuinde... Li kvazaŭ divenus ĉiun penson de Lazaro...

Lazaro komprenis ke li povas fari nenion, nek per forto, nek per lerto, tial li uzis ruzecon, batis la kruron de Stanko, kiu pro tio mispaŝis.

– Plejamiko, – diris Stanko – ni ja luktas honeste!... Se mi volus lukti tiel, mi vin delonge faligus!...

– Mi luktas ĉi tiel! – diris Lazaro kolerege.

Per la dekstra piedo li batis la maldekstran piedon de Stanko, kaj tutforte puŝis lin maldekstren, por faligi lin... Tamen – sensukcese. Stanko jam atendis tiun agon. Lia maldekstra kruro, kiun Lazaro volis formovi, restis firme sur la tero... Li kviete atendis ke Lazaro kliniĝu al lia maldekstra brako, kaj tiam subite forĵetis lin... Lazaro elfalis el liaj brakoj kiel ŝtipo, kaj renversiĝis sur la novalon, dum Stanko restis senmova...

Aperis ĉielarko. Tio, kion Stanko estis farinta, estis bravaĵo. Ĉiuj senescepte, kaj viroj kaj inoj, alkuris kaj elverŝis laŭdojn...

Lazaro leviĝis. Li hontis antaŭ la geknabaro. Li sentis, ke kaj justeco kaj la geknabaro subtenis Stankon. Li vidis ĉiujn gaje kurantaj kaj etendantaj la manojn al Stanko... Li vidis ankaŭ la ĝojan rigardon de Jelica: ankaŭ ŝi ĝojis ke Stanko faligis lin!...

Pro tio liaj vejnoj pufiĝis... Io furioza, io potenca komencis tremigi lian koron, kvazaŭ penante elŝiri ĝin!...

Li rapidmove prenis la ĉapon, kiu estis falinta desur lia kapo, kaj forkuris...

Post momenteto li estis en bosko...

Li kuregis freneze, furioza, venensenta. Per la dentoj li kaptis sian dekstran manon, komencis mordi ĝin, sed doloron li ne sentis... La „demonaj" larmoj ekfontis el liaj okuloj... tiumomente li estis preta fari ion ajn...

Iu dedorse frapis lian ŝultron... Li turniĝis. Malantaŭ li staris Marinko:

– Ĉu knaboj ploras? – demandis Marinko mokriproĉe.Lazaro kapneis.

– He, filĉjo mia!... Estas vero kion oni diras: forpasis la tempo kiam patrinoj naskadis virojn!... Kia degenero... vi ploras!...

Tio estis kvazaŭ oni ekscititan hundon tra barilo per bastono incitus... Lazaro nur alrigardis Marinkon per harstariga rigardo, kaj ekkuregis kiel rabobesto...

Post momento li revenis. En la mano li tenis pafpretan pistolon... Li kuregis direkte al la rondodanco...

– Ne rapidu!... kaŝiru!... Oni vidos vin! – kriis Marinko, kaptante lian ĉemizmanikon. – Jen, vidu, kiel Stanko fanfaronas!... Rigardu, rigardu, kiel li ion flustras al ŝi !...vidu, vidu, vidu, kiel ŝi ridetas!... sendube li rakontas al ŝi pri sia bravago kaj pri via honto!... jen, kiel li kliniĝas al ŝi!... Malrapidu... malrapidu!... Jen, ĉe la nigra kverko!... Ili preteriros vin je tuŝdistanco...

Li treniĝis de arbo al arbo kiel aspido...Li jam estis ne homo – sed rabobesto...

La rondodanco, gaja rondodanco, granda kiel ĝardenejo, volviĝis kiel flamo pro vento: jen ĉi tien, jen alien... Muzikisto, spiromanka, ŝvita, haltis antaŭ Ivankoviĉo, muzikante surloke, dum Ivankoviĉo viglis per la kruroj, kiuj kvazaŭ estus senostaj.

Subite la monto eksonis orelrompe.

– Ho, Jelica!... Dancu nun!...

La lastan silabon dampis pistolpafo, kiu resonis tra la bosko... Stanko stumblis kaj falis sur la dekstran genuon...

Jelica ekkrietis kaj levis la manojn supren, dum ĉiuj aliaj kvazaŭ ŝtoniĝus...

Ekregis plensilento...Aŭdiĝis nur kraketado de sekaj branĉoj en arbdensejo...

Kelkajn momentojn daŭris tomba silento... Stanko Juriŝiĉo la unua rekonsciiĝis.Li alkuris sian samnomulon.

– Samnomulo!... Samnomulo!... – ekkriis li, kaj kaptis lamanon de Stanko.

– Mi aŭdas! – respondis Stanko.

Ĉu vi estas viva!...

– Jes – diris Stanko kaj, kroĉiĝinte al lia mano, malrapide leviĝis.Tamen, li ŝanceliĝis.Ĉiuj rekonsciiĝis kaj ĉirkaŭis ilin.

– Ĉu vi estas vundita?

– Mi ne scias.

– Ĉu vin io doloras?

– Nenio... Sed antaŭ miaj okuloj ruĝas ringoj, tial mi nenion vidas...

– Tamen, kiu pafis, ho homoj? – demandis Ivankoviĉo.

– Lazaro! – ekkriis kelkaj. Stanko frotis la okulojn...

Kiam li rekonsciiĝis kaj komencis videti, li sidiĝis.

– Tamen, diru, homoj, kio ja okazis! – diris li.

Juriŝiĉo rakontis ĉion.

– Mi ne povas kompreni kial li tion faris!... Mi tion tute ne atendis!... Subite ĉio mallumiĝis!... Mi eĉ ne aŭdis la pafon!...

– Ĉu iu scias kion trafis la pafkuglo ? – ekkriis Ŝokĉaniĉo.

– Kion! – ektumultis ĉiuj.

– La ĉapon, jen!...

Li etendis al ili la ĉapon.

Stanko ne estis koncentrita, tial li ankoraŭ ne konsciis kian danĝeron li travivis.Indiferentege li enŝovadis fingron en la truojn, kiujn la pafkuglo faris en lia ĉapo... Li sentis nur vertiĝeton...

La knabaro koleris.

– Li volis mortigi Stankon, ĉar Stanko saltvenkis kaj faligis lin!...Hontende!... – kriis Stanko Jurišiĉo. – Do, ankaŭ mi devis pafi al li, ĉar li min saltvenkis!...

– Ho ne – kriis Ŝokĉaniĉo. – Tiamaniere ni nekropoligus la tutan Nigran Marĉon!...

Dum la gejenuloj tiel koleris, la suno jam hastis al sia krepusko. Arboombroj estis grandegaj; eĉ la homa ombro jam estis granda kiel arbusto... De Drino brizis freŝa venteto.

– Noktiĝas!... Ĉu ni iru hejmen? – ekkriis iu.

– Ni iru! – diris kelkaj.

– Jes, ni iru!

Ĉiuj komencis disiri arete.

Ankaŭ Stanko leviĝis, prenis Jelican ĉe mano, kaj ekiris malrapidpaŝe... Li sentis lacon kaj fortomankon... Li ankoraŭ ne povis rekonsciiĝi, koncentriĝi kaj kompreni ĉion kio okazis...Lian menson estis konfuzanta io, kvazaŭ elprofunda tondrado.

– Ho, frato mia! – diris li mallaŭte, kvazaŭ parolante al si mem.

Jelica elflustris!

– Ĉu li vere volis mortigi vin?

Stanko levis la ŝultrojn.

– Tion li faris pro mi!

Kiel se iu vangofrapus lin, Stanko ektremis kaj alrigardis ŝin gape, per harstariga rigardo:

– Ĉu pro vi?!

– Pro mi! Ĉu vi ne scias?... Vin li delonge malamas...

Stanko subite komprenis ĉion... Li ĉion rememoris; rememoris, ke Lazaro evitadis lin; rememoris ties ekkrion: – Ho, Jelica!... Dancu nun!...

Kaj en lia animo io ekbolis... Io stranga, io terura... ... Io kion li, ĝis tiam, neniam sentis...

## 5. KRIMULO

Tuj kiam la pistolo ekpafis, tuj kiam li vidis Stankon ŝanceliĝanta kaj falanta – Lazaro abrupte turniĝis, ĵetis la pistolon, komencis fuĝi...Li kuris plenforte, li kuregis kvazaŭ demonoj pelus lin...

Li aŭdis ke branĉoj kraketas malantaŭ li, tial al li ekŝajnis ke oni lin persekutas. Li estis forgesinta, ke apud li estis Marinko... Al li ŝajnis ke la tuta vilaĝo sturme postkuras lin. Retrorigardi li ne aŭdacis, timante ke oni lin atingos, ke la kapturno malrapidigos lin!...Strečinte ĉiujn fortojn, li kuregis... Kien?... Li nek sciis, nek pensis pri tio. Li volis fuĝi, kaŝiĝi, eĉ en inferon, al li estis grave nur trovi kaŝejon... Li transsaltadis dornarbustojn, ŝtipojn, ĉion kio estis sur lia vojo, ĉar li rigardis nek kien li iras, nek al kio frapiĝas lia kapo.

Tamen, lia forto estis velkanta. Lia spirado estis pli kaj pli mallonga, la paŝoj pli kaj pli kurtaj... Kaj fine, falinte vizaĝaltere, li kovris la vizaĝon per la manoj...Li dampis sian aŭdsenton, sufokis la spiron, decidoplena, ĉar kio estis – tio estis!...

Sango ŝturmis lian kapon, kaj lia konscio dum momento obskuriĝis, kvazaŭ pro mallonga komateto...

Baldaŭ li rekonsciiĝis. Fortomanka, li fiksaŭskultis, sed aŭdis nek bruadon nek tumulton, tial li levis la kapon... Li levis ĝin iom pli alte, ĉirkaŭrigardante tra la vespera krepusko... Absolute neniu estis tie... Sentante senzorgiĝon, li leviĝis kaj eksidis...

Tamen, laco lia estis tre granda. La manoj, per kiuj li apogiĝis sur la teron, tremis; ĉiu muskolo en lia korpo dancis... Sango abrupte fluegis tra liaj vejnoj, kiel monta rojo en kiun altorentas akvo; li plene sentis ke kelkloke ĝi densiĝis kaj haltis pro potenca lavango... Kruroj liaj komencis agaci, la plandoj – ŝveli; en kapo lia tondris, kaj ambaŭ oreloj siblis kiel du sibliloj.

Li denove langvore surteriĝis kaj okulfermis...

Sed tio ne estis sonĝo... Li kvazaŭ estus en duondormo, en kiu li aŭdis kaj malgrandan grilon kiu ĉirpas super lia kapo, kaj susureton kiun verdlacerto dum suna ekkrepusko faras, kaptante muŝojn kaj insektetojn, kaj pepon de

malgranda birdeto pepanta dum la tuta tago; sed lia menso ne estis koncentrita... Ĉion ĉi tion li aŭdis, ĉion ĉi tion li sciis... sed li ne povis mediti pri io ajn...

Tamen, iompostiome, tiu susureto kaj tiu ĉirpado, ensonĝigis lin tute, apartigis lin de ĉio alia – tiam ekdormis kaj lia korpo kaj lia animo...

Longe li tiel kuŝis... Lin vekis bleko de gufo kiu troviĝis sur arbo, super li.

Li levis la kapon kaj komencis ĉirkaurigardi... Tio ne estis lia domo...

Kie li troviĝas?...

Li komencis froti la frunton, ungi la kapon. Pene li klopodis rememori kie li troviĝas... Ĉi tio estis arbaro, sed kion li faras en la arbaro?...

Malrapide, tre malrapide li komencis rekonsciiĝi... Li estis rememoranta... kaj li rememoris ĉion okazintan, li rememoris ankaŭ tion, kion li faris...

Dum mallonga tempo li fikspensis pri tiu ago... Li mense vidis Stankon: senzorge dancanta apud Jelica, ion flustranta al ŝia orelo, ridetanta; post tio, kiel li kaŝatendis Stankon, kiel pistolpafis...

Konsciencriproĉo lin ne turmentis...Male, li eĉ sentis revenĝan ĝuon, mense vidante Stankon falanta...

– Li meritis tion! – pensis Lazaro. – Li ja volis forpreni mian Jelican... Jes, la fiaĉulo, pro tio oni perdas la vivon!...Kia arogantulo, li eĉ proponis al mi esti nuptoeskortanto!...Strangaĉulo!... Mi faris kion mi devis fari, nun liaj nuptoeskortantoj estu malvarmaj aspidoj sub la tero; mi prenos Jelican eĉ sen lia nuptoeskorto!...

Li estis kvietega... li estis plene kontenta, kiel se li farus bonan agon...

Jelica!... La bela knabino!... Ŝi ja estos lia!... La ekzistantan obstaklon li forigis; nun en Nigra Marĉo pli bona ol li neniu estas!...

Li mense vidis Jelican ridetanta al li... Li vidis la paĉjon svatanta ŝin, la popon Milojon geedziganta ilin... Koro lia ĝojiĝis, dancis, dancadis en la brusto...

Dum la dolĉa ekzalto li forgesis kie li estas, kion li faris, kion li nun faras...

Abrupte io ekkrakegis super li, io resonis en lia animo kiel ĉiela tondro; io lin konsternis kaj mirtimigis, io interrompis tiun belan fadenon de liaj revoj... Al li ekŝajnis ke la mondo renversiĝas.

Tio estis gufo sur kverko super li!... Ĝi flirtigis la flugilojn, preterflugis tuj antaŭ lia vizaĝo, pro kio li sentis venton de ĝiaj flugiloj...

Li estis eksaltinta, sed nun li staris kiel ŝtoniĝinta...Kaj tremanta kiel folieto...

Tio rekonsciigis lin... Forvaporiĝis liaj dolĉaj revoj. Li komprenis ke li estas nur sinkaŝanto kaj nenio plu...

Terura penso, timiga kiel hantulo, aperis en lia cerbo.

– Tamen, se mi ne mortigis Stankon!...Se li restis viva, kie mi kaŝiĝos tiam?...

Li sentis ke la tero sub liaj piedoj hulas... Sed li kontraŭstaris tiun penson.

– Mi mortigis lin! Mortigis! – Mi trafe celis!... La pafkuglo trafis lian kapon!... Li ŝanceliĝis kaj falis. Tion mi vidis propraokule!

Sed tamen, tamen!... Emerĝis dubo: li ne estis certa ke Stanko falis!...

Denove li streĉis la menson por rememori la tutan okazaĵon...

– Stanko ŝanceliĝis... ŝanceliĝis... mi vidis tion!... Mi ja celis la kapon... kapmezon!... Se li ŝanceliĝis, li ankaŭ falis!... Lia kapo ne estas el ŝtono, li falis!... Jes, li falis!...

Tiel Lazaro konvinkadis sin ke Stanko falis...

Tamen la konvinkado ne estas konvinkiĝo... Io interne flustris al li:

– Viva li estas, viva!... Eble li ĉi-nokte ankoraŭ vagas tra la arbejo, serĉante vin!...

La haroj hirtiĝis sur la kapo de Lazaro... Terura timo venkis lin...

Io eksusuris malantaŭe...Lian korpon saturis timtremo... Spirado lia interrompiĝis, li streĉis la orelojn, sed aŭdis nenion!...

Li rigardis supren... la ĉielon surŝutis steloj; sonĝeme palpebrumantaj steloj rigardis lin malvarme kaj moke, kiel okuloj de ŝtelobservanto, kiu trovis kulpinton, sed ŝajnigas ne vidi lin...Tamen, la kulpinto kvazaŭ legus tiun rigardon, dirantan: mi konas vin, mi vidas vin!... Tio estas vi... vi ne povas fuĝi!...

La steloj plenigis lin per timo...

Kaj denove – sonosena silento... Kaj la folieto senmovas, kaj la birdo silentas, kaj ĉio ekmutis, nur el la arbara profundejo fojfoje eksonis voĉo...Tamen, tiu voĉo estas nek homa, nek besta... tio estas voĉo el nokta obskurejo: profunda kaj tenebra, kaj nedifinita kaj potenca, kaj mistera; voĉo gajiganta, sed ankaŭ sveniganta la pensojn, glaciiganta la sangon; voĉo mortiga, sed ankaŭ edifanta – depende de la animstato...

Ankaŭ la monto timigis lin.La monto, en kiun li fuĝis!...La timo lin kaptis meze de arbetejo, en kiun homa piedo eble neniam enpaŝis.

Li sentis sin sola, forlasita kaj de Dio, kaj de homoj. Sola, meze de vivabunda naturo: kun ĉielo – senĉiela, kun Dio – sendia, kun tioma gepatra kaj frata amo – senama!Neniu estas apud li, neniu ĉirkaŭ li, neniu super li – nur la timo...Nur la timo iĝis lia trudamiko.

Lazaro komencis fuĝi de tiu amiko...

Li kuris, kuregis. Sed abrupte haltis.

Al li ekŝajnis ke li vidis fajron, fajron grandan, kiel se brulus domo. Li haltis tremante, malvarma ŝvito ekfluis sur liaj tempioj kaj vizaĝo...

La fajro estis granda, brila; ĝi estis traboranta densan arbaron... la flamo flagris pli kaj pli alten... Kaj li sentis varmon de tiu flamo...

Iompostiome la fajro komencis velki, super la arboj leviĝis luno, iomete stumpa – post plenluno – sed tamen granda kaj brila.

Unuafoje, tiun nokton, li sentis malstreĉiĝon ... La luno prilumis la arbaron, li kvazaŭ sentus senŝarĝiĝon.Li oftofte haltadis por trovi tretvojeton, sur kiu li povus iri.Kaj post mallonga erarvagado li ĝin trovis.

Trovis, kaj sentis animtrankviliĝon...Li estis certa, ke tiu tretvojeto kondukos lin al ĉarvojo. Tio gajigis lin. Li ja volis adiaŭi ĉi tiun senhoman arbejon! La homoj ne estas tiel teruraj!La timo estas malplenejo, kaj en malplenejo oni sentas ke ankaŭ la brusto estasmalplena...

Li komencis paŝegi...

Tamen... li abrupte haltis...

Kelkajn paŝojn antaŭ li komencis kraketi branĉoj, kiel se iu irus tie. Li levis la kapon kaj ekvidis antaŭ si homon...

Se li vidus lupon aŭ urson, li sentus sin pli bone...

Lia unua penso estis: Stanko. La ombro, kiu estis malrapide proksimiĝanta, ekŝajnis al li Stanko. Li kvazaŭ vidus ankaŭ fulgan tubon, direktitan rekte al brusto lia...

La tutan nokton li estis preskaŭmorta, sed nun li mortis!...Li pro timo ŝtoniĝis, kaj renversiĝis sur la teron kiel trunko, kies radikojn oni forhakis... La okulojn li fermis por nenion vidi...

Al li ekŝajnis ke iu alpaŝis kaj kliniĝis super li; glacia mano kaptis lian kolon kaj premis...Li sentis ke tiu mano pli kaj pli premas lin: ke la malvarmaj fingroj eniĝas pli kaj pli en la rondaĵon de lia kolo. Spirado lia perdiĝis. Kaj... li senkonsciiĝis...

## 6. TRANSFORMIĜO

Gvidante Jelican, tenante firme ŝian manon, Stanko eliris sur vojon.Tie li haltis, fiksrigardis la okulojn de Jelica, kaj diris:

– Iru hejmen.

– Bone – diris ŝi obeeme, kaj eltiris sian manon el la lia.

– Tamen... haltu!...

Ŝi haltis.

– Nu, Jelica!... Diru al mi la veron: ĉu vi amas min aŭ lin? Ŝia vizaĝo roziĝis; ŝi mallevis la kapon.

– Vi scias – elflustris ŝi.

– Pri li – ĉu vi indiferentas?

– Indiferentas...

– Ĉu absolute?

– Absolute.

– Kaj... ĉu li ne estas grava al vi? – Kaj... ĉu al vi nenion signifas?

– Nenion!...

– Bone, iru nun!

Ŝi deturnis sin, kaj foriris malrapidpaŝe.

Li malgaje rigardis post ŝin...Ju pli ŝi malproksimiĝis, des pli malgaja li estis... Kiam ŝi fine tute malaperis forde liaj okuloj, Stanko jam ekpentis, kaj volis ekkrii al ŝi.

Tamen li subpremis tiun deziron.

En lia kapo ankoraŭ tondris, ankoraŭ ruĝaj ringoj flugis antaŭ liaj okuloj. Animon lian tiranis peza ŝarĝo, kiu tielpeze premis lian korpon, ke li ne povis iri.

Tial li treniĝis kaj stumbliris kvazaŭ draŝita. Ĉiuj liaj pensoj estis nedifinitaj kaj konfuzaj. Li ankoraŭ ne povis kompreni kio okazis, des malpli li povis pensi pri tio.Penso lia penis elŝiriĝi el la konfuzejo, sed la penso estis tiel implika kaj komplika, tiel premegita de pigra malfervoro, keĝieĉ ekmoviĝi ne povis inter la muroj de la malvasta kranio...

La suno jam estis krepuska. Ĉirkaŭ lia kapo zo-sonis kuloj; de ĉiuj flankoj aŭdiĝis pepado... En tiu belejo la suno estis senhaste malleviĝanta, malaperanta subire, en la bela flamruĝo kiu ĉiutage estas alia...

Tamen Stanko, kiu ĉiam observis la suneliron kaj sunsubiron, kiu dronadis en fantaziejon tuj kiam insektoj ĉirkaŭ li komencis zo-soni– unuafoje ne kontemplis tion.

Li iris malvigle kaj pigre... Tiel li alvenis hejmen.

Agemaj homoj frue vespermanĝas, frue kuŝiĝas, por morgaŭ pli frue ellitiĝi.

Lia patro, kiu nenion sciis pri la evento, renkontis lin riproĉe:

– Ĉiam same! Vi neniam venas hejmen kiel viaj aliaj, bonaj fratoj!... Vin mi ĉiam devas atendi!... Stanko klinis la kapon, silentante.

– La knabaro!... La knabaro!... Malinduloj!... Ili nur al knabinoj gapas idote!...Mi eĉ ne scias kiaj estas la nunaj knabinoj! Kial neniu diras al ili: iru, jam, hejmen! – kriis la maljunulo. – Ĉiuj malvirtiĝis!... En la vilaĝo oni eĉ ne unu bonan knabon povas trovi!...Manjo!...Ĉu ĉio estas preta!...

– Estas, bopaĉjo! – respondis la bofilino.

La maljunulo leviĝetis sur sia loko, prenis vakskandelon kiu estis gluita ĉe muro, kaj flamigis ĝin. Manjo alportis braĝon en argila incensujo. Li prenis incensgrajnon desur breto, algluis la kandeleton al la muro, forblovis cindrerojn desur la braĝo kaj surmetis la grajnon. Kiam leviĝis blueta odorfumo la maljunulo krucsignis.

– En la nomo de la patro, de la filo kaj de la spirito, amen!...

Tiam li komencis incensi, unue la kandelon, poste sin, kaj samhejmanojn, laŭ la ordo kaj estreco... Post tio komenciĝispreĝo, dum kiu la maljunulo invitis ĉiujn diservantojn havigi al la domo kaj al la domanaro sanon kaj malmankon...Li petis eĉ „bonajn“ kaj „malbonajn“ spiritojn: la bonajn – helpi, kaj la malbonajn – foriĝi de lia domo...Longe daŭris tiu lia preĝo; multa tempo pasis antaŭ ol la maljunulo faris la lastan brustklinon, metinte la krucon sur sin. Post tio li deturniĝis.

– Je via sano estu la preĝo! – diris li milde kaj gaje, kiel se ne estus ĵus kriinta.

La junaj domanoj kisocele alpaŝis la manon de la patro kaj de la patrino, post kio ĉiuj lokiĝis vespermanĝi.

Dum la vespermanĝo ili havis ordinaran, familiaran interparolon. Ili parolis pri draŝado, kiu estis komenciĝonta morgaŭ.

– Je Dio, infanoj, rapidu. Ĉi-aŭtune ni havas multe da laboro... Ni, ni ankaŭ devas edzigi ĉi tiun ...Kaj li montris per la mano Stankon.

– Je Dio, la temp esta – diris Petra, la patrino de Stanko.

Stanko mallevis la kapon.

– Kompreneble, la temp esta!... Mi kaj Ivano atendas ke niaj filoj jam komencu ĝojplori!... Vere, se ni ne edzigos ilin ĉi-aŭtune, ili muĝos kiel virbovoj!

Ĉiuj ĉirkaŭ la manĝotablo ekridis – krom Stanko. Li nur nun ĉion komprenis, nur nun li perceptis kion Lazaro volis fari kontraŭ li. Lazaro ja pafis al li, Lazaro volis mortigi lin!...

– Sed mi ne scias kiun frenezulinon mia frenezulo elektis?... Ivano diris al mi ke lia filo elektis la Seviĉidinon.

Stanko misglutis. Kiel se iu kaptus lian koron kaj elŝirus ĝin, tian doloron li sentis.

Li eksaltis kaj forkuris eksteren.

– Hej, vidu lin! – ridis la maljunulo. – Li kvazaŭhontas, kvankam li sendube impetus edziĝi!... Bone, bone!... He-hehe-he!... Li ja frenezumas, ĉu ne, panjo?...

– Ha-ha-ha-ha! – ridis la patrino. – Li ja estas juna, li hontas!... Venu, vespermanĝu, kara!

– Lasu ja vespermanĝon!... Nun li nenion gustumos, eĉ se tie estus caraj frandaĵoj!... Ha-ha-ha-ha! – ridis la maljunulo.

– Sed vi, kara mia, tro pikas lin! – diris Petra riproĉe. – Jen, la infano eĉ ne finmanĝis!...

– Silentu ja, maljunulino!... Lasu lin! Ankaŭ vi ne ĉiam vespermanĝis!... Juneco ja estas tia, li ne estas malsata!

Sed dum ili ridis, Stanko suferis pro siaj suferoj!

Lian preskaŭ infanan koron subite venenis ĵaluzo, ega, furioza, terura ĵaluzo...Lazaro volis lin mortigi, por forigi lin desur sia vojo!...

Antaŭ liaj okuloj aperis terura bildo: Li vidis sin morta... El lia kapo ŝprucis sango kaj cerbo ... La patro, patrino, fratoj, bofilinoj, nevoj, nevinoj – ĉiuj veas kaj lamentas... Lin oni mallevas en tombon... Ĉirkaŭ lia vizaĝo rampas malvarmaj serpentaĉoj... Sed dume… Lazaro ridetas al Jelica; la patro de Lazaro ŝin svatas, ŝi ekiras... Ili alpaŝas altaron...

Li ekhurlis kiel vundita rabobesto... En lia animo io disflagris... Tio estis kolerego...Ĝi grandiĝis rapide kiel fermentaĵo, kaj... plenigis lin tutan... Kaj lia animo, kaj lia koro, kaj... ĉiu korpero lia ekfuriozis kontraŭ Lazaro...

Se Lazaro tion dirus al li, se li mem rimarkus ion ajn – li ĉion pardonus. Tamen... Lazaro volis mortigi lin nur por ke li ne edziĝu kun Jelica. En la okuloj de Stanko tiu peko estis pli granda ol iu ajn alia peko... Se Lazaro farus ajnan malicaĵon kontraŭ li, se Lazaro forrabus absolute ĉion kion Stanko havis – ankaŭ tion li pardonus al Lazaro. Li rememorus infanaĝon, junaĝon, kamaradecon, fratecan amon, kaj... li pardonus al Lazaro!...

Sed Lazaro deziras Jelican. Lazaro agas insidaĉe!... Lazaro eĉ volis mortigi lin!...

Nu... tion li ne povas pardoni al Lazaro!

Li sentis malamon, fortegan, teruran malamon kontraŭ Lazaro... La malamo estis granda. Li ne nur volis mortigi Lazaron, li volis Lazaron neniigi, ke eĉ ne unu skvamo de Lazaro restu!...

Tiu malamo komencis transformi lin. Stanko sentis ke li iĝas alia, tute alia homo...

Estas vero kion oni diras, ke en la homo troviĝas ĉio: kaj bono kaj malbono; ambaŭ ĝermoj troviĝas en li. Kiun oni pli stimulas, tiu kreskas kaj konkeras.

Se Lazaro ne stimulus la malbonan ĝermon en la animo de Stanko, ĝi restus en li kvieta kiel ŝafido, dormanta, ĝi tie malkreskus kaj komplete formortus... Stanko estus bonulo, kvieta, malkruda, modesta; li estus mildega, respektus pliaĝulojn, amus malpliaĝulojn; li vivus pace kun la najbaroj; evitus konfliktojn kontraŭ ili; petus, petegus eĉ homojn malpli bonajn ol li eviti juĝaferojn, ne procesi kontraŭ li... Por konservi pacon li cedadus, eĉ se havus damaĝon... Unuvorte, li estus paca vilaĝano: la donadus al Dio la propraĵon de Dio, li donadus al cezaro la propraĵon de cezaro, li donadus al bejo la propraĵon de bejo, li neniam, eĉ per ununura vorteto, kontraŭstarus.

Tamen, tuŝita estis la ĝermo de malbono. Kaj ĝi estas kiel pulvobarelo. En tiun barelon Lazaro ĵetis fajreron, kaj la pulvo eksplodis...

Nun tio estis nehaltebla!... La brusto de Stanko iĝis vulkano kiu elĵetadis ĉion, sed ricevadis nenion. Neniaj kialoj jam povis ŝanĝi lin; nenio en la mondo povus malhelpi lin mortigi Lazaron...

Li estis homo el sia epoko.Hieraŭ patrina filĉjo, hodiaŭ rabema linko; hieraŭ paca kamparano, hodiaŭ granda vojevodo!... Ĉiujn decidojn li estis faranta dum nur unu momento. Li riskos sian vivon, sed li devas venki...Li ne retrorigardis la pasintecon, ne pensis pri la estonteco – antaŭ liaj okuloj troviĝis nur la estanteco. Kaj ĝi parolis al li:

– Mortigu Lazaron!...

– Jes, mi mortigos lin... kiel muŝon!... Mi ekblovos, kaj li tuj malaperos!... Nun por mi li estas malpli granda ol formiko, pli facila ol lanugo!

Li ekrigardis al la ĉielo, kaj komencis ĵuri al Dio, al la steloj kaj al la blua ĉielo, ke Lazaron li mortigos...

Li paŝis maltrankvile tra la fruktbosko; venteto estis malvarmiganta lian varman frunton ĉar li puŝis la ĉapon sur la nukon.

– Jes!... Vi mortigos lin, sed kien vi iros post tio?... Ĉu vi scias: la mortiginto estas mortigoto? – flustris ia voĉo al li.

Li rekonsciiĝis. Tio estas vero. Se li mortigos Lazaron, oni mortigos lin. Kaj tiukaze, Jelica tamen ne estos lia.

Tio lin konsternis kaj preskaŭ hezitigis... Ĉu li rezignu Jelican? Sed kiel tiukaze travivi la tagojn ĝis la morto?...

Jes, sed kiel lasi Lazaron? Ĉu ne puni lin pro lia peko?... Ĉar Lazaro sendube – se li restos viva – denove insidaĉe provos senvivigi lin?...

La animo doloris lin... Nenio estas pli nigra ol lia vivo, pensis li. Kaj rigardante estontecon, li vidis nur suferon kaj dubojn.

Li kvazaŭstarus sur la rando de abismo, nenion povante decidi.

– Mi mortigu lin!...

– Sed kien vi iros post tio?...

– En la monton! – abruptis la ideo. – Jes, en la monton!... Kiam mi estos tie, tiam neniu kuraĝos tuŝi Jelican!... Ŝi povos esti nur mia!...

– Tamen, kion pri la patro, kion pri la patrino?...

Li alrigardis al la dompordo, kiu estas malfermita. Hela flamo prilumis iliajn vizaĝojn, ili ridas kaj interparolas.

Kiu povus lasi ilin?... Ĉu li povas mortigi ilin en ilia grizaĝo?... Ĉu antaŭ ilia maljunaĝo li amarigu iliajn tagojn?... Ĉu li tiamaniere danku por ilia bonfarado kaj flegado?...

Krom tio, la bonaj fratoj kaj bofilinoj, la amemaj infanetoj – genevoj – kiujn li sur sia genuo lulis, la serenaj kaj gajaj tagoj, ŝercoplenaj labortagoj, la belaj festotagoj, la rondodanco, la junularaj vesperamuzoj, la kamaradoj... Ĉion, ĉu li rezignu ĉion?...

Vigla flamo brulis en lia animo... La koro lin doloris kiam li memoris tiun kvietan kaj trankvilan vivon... Ŝvito surverŝis lian frunton... Li staris kiel ŝtoniĝinta antaŭ tiu sankta vidaĵo de la hejmo....

Tiu vidaĵo, la viva vidaĵo, kvazaŭ allogus lin, kvazaŭ parolus al li:Venu al ni! Dolĉa estas la vivo en via domo!... Dolĉa estas la patrina mano; mildaj estas la skoldoj de la maljuna paĉjo!... Venu al ni! Vi ricevos ĉion, kion via animo ekdeziros.Ankaŭ Jelican ni venigos al vi!... Nur tiam vi sentos kiel varma estas amo ŝia... Nenie vi ja trovos pli plaĉan loketon por vi!...

Tiam liaj larmoj ekfluis, li etendis la manojn, kaj ekiris brakumi la trezoron de ĉi tiu mondo...

Sed tiam, abrupte, apud ĉi tiu bela vidaĵo aperis ankaŭ la rufa kapo de Lazaro.

Io varmega, io hida traflagris lian forton... Li ekstridis, ekstridis kiel aspido sub ŝtono...Kaj ĉion kio al li estis kara kaj plaĉa, ankaŭ ĉi tiun belan vidaĵon, li ĵetis en fajron – kaj cindrigis...

Restis io terura en lia brusto, io faŭkanta kiel drako nesatigebla – restis la venĝendo...

Lazaro kaj li ne povas vivi sub la sama ĉielo, unu el ili devas morti! Li decidis iri en la monton, sed unue li devas mortigi Lazaron...

Tio estis stranga! De tiu momento li iĝis alia homo. Jam neniu povis ŝanĝigi lian intencon. Ĝi estis kvazaŭ en ŝtonon ĉizita... Patro, patrino, fratoj,

infanoj, Jelica... ĉio restas sur sia loko, sed la morto de Lazaro estas pli grava ol ĉio alia... Al li ŝajnis, ke li ne povos vivi, ke li ne povos spiri, se Lazaro spiros!...

Pugniginte la manojn, li ĵetis teruran rigardon al la domo de la patro de Lazaro.

– Ve al vi, maljuna Ivano – ekhurlis li. – Ve al vi, tegmento, kiu protektis la kapon de la krimulo!... De via domo, Ivano, restos nur kromobjektoj, kaj pri domanoj viaj ekzistos nur timiga historio!... Se mi ne faros tion, Sinjoro voĉon mian ne aŭdu, la morgaŭa suno ne varmigu min!...

## 7. INTRIGO

Lazaro ne eraris. Tio vere estis homo. Tamen, tio ne estis Stanko, sed Marinko…

La subestro estis enpensiĝinta, kiam oni sciigis al li ke alvenis Marinko. Li ordonis ke oni enlasu lin. Sur la vizaĝo de Marinko videblis ke io okazis.

– Kio okazis, Maĉjo?

– Okazis bona afero, kara agao!

– Nu, kio estas bona?

Marinko rakontis al li la tutan okazaĵon, sed li kredis ke Stanko mortis. La turko aŭskultis kontente. Kiam Marinko finrakontis, la subestro demandis:

– Nu, kion vi planas nun?

– Mi planas sukceson, ho honesta sinjoro. Nun vi devas subteni Lazaron... Kaj tiam Ivano Maraĵĝiĉo iĝos via!... Se Ivano estos kun vi, la tuta Nigra Marĉo interkverelos.Vi deziris pacigadi nigramarĉanojn – via deziro estas plenumita.

– Sed kie estas Laĉjo?

– Je Dio, kara agao, mi tion ne scias. Li fuĝis en arbaron.

– Nu, fraĉjo mia, vi devos lin trovi!

– Konsentite, mi trovos lin! Kompreneble mi trovos! Se vi volas, mi trovos lin, eĉ se li kaŝiĝus en netrovejon!

– Ho, bone, bone!... Iru, trovu lin!... Ĉu vi volas tabakon?...

– Nu... se Dio tion volas...

– Jes, Dio tion volas, jes!... Suljo havas ĉion kion vi bezonas!... Jen, prenu!...

Li tuj donis al Marinko tutan plenmanon da tabako.

Marinko plenigis tabakujon, ekbruligis la pipon, kaj direktiĝis en arbaron...

Li pasumis tra arbejo; jam lacega pro longa irado, li estis sidiĝonta por ripozi, kiam li ekvidis Lazaron. Li ekiris, estis ekkrionta lian nomon, sed Lazaro falis...

Lazaro!... Laĉjo!... laŭtis Marinko.

Sed Lazaro estis senkonsciiĝinta pro ega timo, tial li ne aŭdis la kriadon deMarinko, kiu metis sin sur unu genuon, kaj levetis la kapon de Lazaro.

– Laĉjo!.. Lazaĉjo!... – Laĉjo!..

Lazaro estis reakiranta la konscion.Pro timo li ne rekonis la voĉon de Marinko, kaj tial ne aŭdacis malfermi la okulojn.Marinko senĉese krivokis...

Rekonsciiĝinte, Lazaro tuj rekonis lian voĉon,kaj malfermis la okulojn:

– Kio okazis? Kiu estas tie?...

– Tio estas mi, Lazaĉjo, frato mia, tio estas mi.

– Ho, tio estas vi, oĉjo Marinko?

– Mi, filo, mi.

– Kion vi faras ĉi tie?

– Mi serĉas vin!

– Ĉu vin sendis miaj samfamilianoj?...

– Ne. La subestro ordonis ke mi trovu vin ajnamaniere ...

Lazaro sentis timotiklojn.... Li ĵus liberiĝis de unu zorgo, sed jam aperis alia!...Kion la subestro volas de li?... Eble li vere mortigis Stankon, eble tial la subestro volas lin mankateni kaj irigi al kadio?...

Kaj... al li ekŝajnis ke li jam estas katenita, kaj... juĝistoj jam pritraktas lian sorton... Li kvazaŭ vidus tablon, sur la tablo lignobotelon kaj du glasojn, kaj la kadion alpaŝanta, verŝanta en la glasojn likvaĵon el lignobotelo, kaj diranta al la patro de Stanko: „Trinku por la mortinto!---“

Ĉi tiu terura bildo ŝtonigis lin.

– Ek! – vokis lin Marinko.

– Atendu! ... Kial la subestro alvokas min?

Marinko estis stranga homo!... Kvankam li bone sciis kion la subestro deziras, li tamen preferis diri eĉ ne unu vorton.Li pensis: nur la subestro rajtas ĝojigi Lazaron. Tial li diris:

– Mi ne scias.

– Ĉu li nenion diris al vi?

– Nenion.

– Lo, oĉjo Maĉjo...

– Kion?

– Mi ne aŭdacas iri!

– Vi devas!... La subestro diris ke mi venigu vin!

– Diru ke vi ne trovis min.

– Kion?!... Ĉu mi mensogu!... Ĉu la subestron mi mensogu!... Ĉu vi freneziĝis?!... Iru!...

Per sia rigardo li igis Lazaron leviĝi. Lazaro iris, sed genutreme. Li volis forkuri, sed ne povis; krom tio, li sciis ke li ne povas fuĝi de Marinko.Marinko

kurus post li ĝis la lasta spiro. Li ja estis terura homo. Se la turko dirus al li ligi propran filon – li ligus la filon kiel malamikon, eĉ se pro tio lia koro agonius...

Tial Lazaro iris kiel buĉota ŝafo...

Li denove turniĝis al Marinko:

– Diru, oĉjo Maĉjo?

– Kion, filĉjo?

– Kial vi ne forlasas min?

– Ĉu vi freneziĝis, je Dio?... Mi ne faros tion, iru!

– Mia paĉjo havas monon!... Petu kiom vi volas, sed ne irigu min tien!...

Marinko rigardis lin per besteca rigardo, ekridonte.

– Monon!...Monon!...Kion mi faru kun mono? Ĉu stultuloj bezonas monon?... Mi ne bezonas ĝin! Kion mi bezonas, tion al mi donas mia Piro, Dio donu al li sanon!...Li ja ĉiam kondutas al mi en bela maniero... Jes, mi submetiĝas al lia volo. Kion fari: kontraŭ homo fiera Dio estas severa!... Kial vi ne estis trankvila?... Vi ja ne farus problemojn al la maljuna oĉjo Marinko, kiu pro vi devis ĉi-nokte pasumi tra la arbaro...

– Tamen, ĉu vi ne komprenas, sentaŭgulo maljunaĉa, ke temas pri mia kapo? – elĝemis Lazaro.

Marinko komencis rikani:

– Verdire, infano, ĝuste pri la kapo, jes!... Kial mi zorgu pri via kapo, mi gardas la mian!... Se mi nun vin lasus, kien mi irus post tio?... Ĉu vi opinias ke Piro ne ekscius tion?...

– Petu ĉion kion vi volas! – elĝemis Lazaro denove, kaj komencis tordi la manojn.

– Mi volas nenion! Kial mi volu? Mi estas homo maljuna. Piro pli fidas al mi, pli ol al ĉiuj siaj ĝendarmoj. Se la homo kredas al mi, ĉu estus honeste – respondu, do – ĉu estus honeste ke mi mensogu al li?!...

Ĝuste en tiu momento ili eliris sur la vojon. Lazaro vidis ke ili troviĝas proksime de la tranoktejo...

Li streĉis ĉiujn siajn fortojn, kaj ekkuris fuĝe... Tamen, Marinko atingis lin, kaj kaptis je la kolo.

– Pli sukcese vi fuĝus de fulmo, ol de mi! – diris li, kaj alrigardis Lazaron per harstariga rigardo...

Lazaro submetis sin al sia sorto...

Ili alvenis antaŭ la tranoktejon... Marinko lasis Lazaron eniri la unua. Lazaro perdis la forton. Sen helpo de Marinko li ne povus transpaŝi la sojlon.

Fajruja flamo estis lumiganta la tranoktejon.La tranoktejestro kaj ĝendarmoj, kiuj servis subestron, dormis ĉirkaŭ fajro. Marinko vekis unu ĝendarmon, kaj diris al li sciigi la subestron, ke Marinko trovis kaj venigis la homon.

La ĝendarmo alpaŝis la pordon, sed tuj kiam li malfermis ĝin, el la ĉambro aŭdiĝis la voĉo de la subestro:

– Ĉu alvenis Marinko!

– Alvenis... Kaj venigis iun.

– Li venu ĉi tien.

Marinko prenis la manon de Lazaro kaj kondukis lin en la ejon.

Lazaro komplete perdis la konscion.Li jam ne sciis kion faras. Li iris, ĉar Marinko lin tiris.Se Marinko ne irigus Lazaron, Lazaro restus stari kiel ŝtoniĝinta.

– Ho... jen, Marinko!... Vi, nur vi!... Sen vi – nenio! – diris Piro.

– Mi nur obeas al superulo! – diris Marinko kisante lian baskon.

– Bone... bone!... Eliru kaj ripozu! Marinko salute mantuŝis la vizaĝon, kaj eliris.

Lazaro aŭdis ĉi tiun interparolon, sed al li estis tutegale. Lia anima laco estis tiom forta, ke li jam ne povis konscii kio okazas.

Kiam Marinko eliris, Piro leviĝis desur la divano, alpaŝis Lazaron, ekrigardis en liajnokulojn, kaj diris milde:

– Ne sentu timon... Ne timu!...

Lazaro streĉis la okulojn jen en unu, jen en aliadirekto. Li ne povis kredi ke la subestro parolas tiujn vortojn. Ĉu en la ĉambro estis ankoraŭ iu homo?... Li komencis ĉirkaŭgapi...

– Ne timu!... Ne timu!... – diris Piro, denove milde. – Tamen, vi eraris.

Ĉi tiuj varmaj kaj mildaj vortoj, post tioma penego kaj tioma timo, falis kvazaŭ surardan feron... La koro de Lazaro ekbategis abrupte, kvazaŭ volante sufoki lin...Larmoj lin surverŝis, li komencis plorsingulti...

– Pardonu!... Pardonu!... Lazaro genufleksis antaŭ li.

– Mi ne volis!... Tio okazis abrupte!... Mi mem ne scias kial mi faris tion!... Mi sentis ke mi devas mortigi lin! Aŭ lin, aŭ sin!... Mi ne povis toleri, ke li saltas pli bone ol mi! Krom tio – li faligis min!... Krom tio, koro mia krevis en mil pecojn, kiam mi vidas kiel Jelica lin rigardas!... He, tio okazis, mi perdis kontrolon!... Mi devis mortigi lin!...

– Tamen, vi ne mortigis lin! – diris la subestro. Lazaron kvazaŭ iu vangofrapus.

– Neeble! – diris li, kaj gape alrigardis Piron.

Vi ne mortigis lin!

– Tamen, li... falis!

La turko frapis la manplatojn. Ĉe la pordo aperis ĝendarmo.

– Ĉu Meĉjo estas ĉi tie?

– Estas!...

– Li venu.

Meĉjo eniras la ejon.

– Kiam vi vidis la bubon de Alekso?

– Antaŭ unu horo. Mi vidis lin en fruktejo apud la domo. Lazaro mallevis la kapon, kvazaŭ la sankta Arkianĝelo klingus lin.

– Iru, Meĉjo.

Meĉjo eliris.

Ambaŭ eksilentis. La turko komencis paŝi tra la ĉambro. Li subfleksis la barbon, mordetas ĝin, evidentis ke li pripensas ion gravan. Finfine li diris:

– Do, vi lin ne mortigis, ne mortigis!... Tamen, kion vi diros al la homoj, kial vi pafis al li?...

– Mi diros: ĉar mi malamas lin!

– Nu, tio ne estas saĝa...

– Mi efektive malamas lin!

– Tion mi scias... Ha! Nu, diru al mi, ĉu via paĉjo havas monon?

– Havas.

– Ĉu vi scias kie troviĝas lia mono?

– Mi scias. En la malnova kromdomo, en kesto.

– Ĉu ĝi estas ŝlosita?

– Estas.

– Ĉu ankaŭ Stanko sciis pri tiu mono?

– Sciis!...

– Ĉu via paĉjo sciis ke Stanko scias?

– Sciis!... Niaj domoj estas kiel unu domo. Ni nenion kaŝas de iliaj domanoj.

– Jen, ĉu vi nun komprenas! – diris Piro, kaj okulfiksis Lazaron...

Lazaro komencis diveni.

– Nun kaŝiru hejmen... Iru rekte en la kromdomon, rompu la keston, prenu la monon kaj kaŝu ĝin ien ajn!... Morgaŭ diru ke vi pafis al Stanko ĉar li priŝtelis vin!... Ĉu vi komprenis!...

La lipharoj de Lazaro kvazaŭ ridetus. Piro ne nur pardonis lin, sed eĉ rekomendas al li, kiel pravigi sin antaŭ la homoj!...Krom ĉio alia, li eĉ faros Stankon ŝtelisto... Li levis la kapon, kaj diris:

– Jes, mi komprenis.

– Ĉu vi vidas – diris Piro – kiel mi zorgas pri vi!...

– Mi vidas, kaj... dankon al vi!

– Tamen, vi devas obei al mi, aŭ...

– Mi obeos al vi kiel al la patro, pli ol al la patro!...

– Bone, bone!... Mi ĝuste tion volas! – diris Piro, kaj frapis la manplatojn.

Ĝendarmo vidigis la kapon tra la pordo.

– Diru al Marinko ke li venu.

Marinko eniris, parolante jam ĉe la pordo:

– Mi sidiĝis iomete, mi fumis, je via sano, ho honesta sinjoro...Mi ankaŭ trinketis brandeton...

– Bone, bone, Marinko!... Vi estas mia kunulo, trinku!... Marinko distiris vizaĝmuskolojn, ridĝojante ĉar la subestro lin tiel dorlotas.

– Dankon al vi! – diris li.

– Tamen, lo, Marinko!

– Kion do?

Morgaŭ ĉe la juĝejo vi diros, ke vi hieraŭ vidis Stankon elirinta el la malnova Miraĵĝiĉa kromdomo, kaŝiĝanta por ke neniu lin vidu... Ĉu vi encerbigis?...

– Jes, ne maltrankviliĝu! Se vi tion volas, mi ne nur mensogos, sed eĉ ĵuros!

– Tamen, atentu mensogante!... Ne permesu ke ili komprenu ke vi mensogas!

– Vi ne devas instrui min pri tio! Tion mi delonge ellernis!...Kiam mi komencas mensogi, mi mem kredas ke mi parolas veron!

– He, jen, bone! – ekridis Piro. – Nun iru kun Lazaro al lia domo, la infano ne estu sola.

– Bone, sinjoro, mi faros tion!... Ek, Laĉjo!.. Ek, parencĉjo!..

Ambaŭ esprimis adiaŭon, fingrotuŝante la vizaĝon, kaj eliris el la ejo.

– Bonan nokton, sinjoro!

– Bonan nokton!...

La turko restis sola.

Li ekbruligis ĉibukon, kaj transiris la ejon kelkajn fojojn, glatumante la barbon.

– Ho, jen, tio estas bona! Tio valoras pli ol sklavo en prizono!... Jen, mi sukcese, senĝene-senpene, enŝovis braĝojn en ambaŭ domojn... Se ili nun malamikiĝos, eĉ liaj prapranepoj ne repaciĝos!... Ha-ha-haha!... Ankaŭ la vilaĝanaro pro ili konfliktos!... Veron diris Marinko, tiam nigramarĉanoj venos al mi, por ke mi interpacigu ilin!... Ilin helpos la ne fuŝpopo, sed Suljo, aŭ, kiel ili min kromnomas, Piro... Mi tiam povos laŭvole malmodesti en Nigra Marĉo!... Ni tiam vidos, ĉu pli valoras mi aŭ Uso el Bogatiĉo, kiun ili ade laŭdas!...

Kontentoplena, li fale kuŝiĝis sur divanon, elblovante densajn nubojn de fumo... En tiuj bluecaj fumringoj li vidis belegajn kaj ĉarmajn bildojn, vidis siajn belajn esperojn realigitaj...

Ĉibuko elfalis el lia mano, kaj en la ejo aŭdiĝis delikata ronkado...

## 8. EL KLARA ĈIELO TONDRO EKBATIS

Elkrepuskiĝis la 21-a de julio. La mateno promesis tre varman tagon. La unuaj sunradioj preskaŭ rostis tra pura aero.

La vilaĝestro Joĉjo frue leviĝis, lavis sin, preĝis al Dio, kaj laŭ sia malnova kutimo, eliris al abelbredejo.

En la domo regis viglado. La junuloj hastis, pretiĝante plenumi la laboron, kiun al ili donis la grizhara familiestro.Tie estis ankaŭ oĉjo Simo – la alvokisto. Li alvenis por aŭdi ĉu la vilaĝestro ion ordonos al li. La profundaĝulo sidas kviete, kaj ankoraŭ pli kviete albuŝigas lignoboteleton kiun juna domano alportis. Li estis certa ke tiutage li ne multe hastos. Kial li kuru? La homoj laboras, ĉiuj penas dum la sunaj tagoj draŝi kaj forporti en grenejon la produktojn de sia klopodo kaj ŝvitumo...

Sed tiam en la korto subite aperis Ivano Miraĵĝiĉo. Li estis pala kiel malvivulo. Alveninte, li tuj demandis kie estas la familiestro. Kiam oni diris al li ke la familiestro estas apud abelbredejo, Ivano ekrapidis tien.

Al Simo ŝajnis strange ke Ivano tiel konfuziĝis, sed li ankoraŭ pli ekmiris, vidinte ke ankaŭ la vilaĝestro revenas el abelbredejo same pala.

– Simo! – diris la vilaĝestro rapide.

– Mi auskultas vin!

Simo saltis kiel ŝafo.

– Rapidu, rapidegu, venigu la popon!

Simo vidis ke okazis io serioza, tial li ekrapidis, kiom liaj maljunaj kruroj povis, plenumi la ordonon de la vilaĝestro.

Joĉjo irigis Ivanon en sian ejon.

– Tamen... ĉu vi tion diras serioze?

– Serioze.

– Ĉu tio estas vero, pro Dio?!...

– Se iu tion dirus al mi, mi ne kredus... sed la kesto estas rompita, kaj ĉio malaperis!...

– Kiom da mono estis tie??

– Precize ducent dukatoj!...

– Ducent dukatoj!... Hi!... Ĉu vi suspektas iun?

Ivano eksilentis. Li mallevis la kapon pensodrone...

La vilaĝestro estis paŝanta tra la ejo. Por li tio ja estis ne nur miriga, sed ankaŭ hororiga... Tridek jarojn li estis vilaĝestro, sed ion tian li nek vidis, nek aŭdis. Pensodrone li memoris ĉiun familiestron kaj ties samdomanojn, sed li ne aŭdacis, eĉ dum sekundo, suspekti iun ajn... Ĉiuj vilaĝanoj estis homoj honoraj kaj honestaj, ĉiuj vilaĝanoj estis uloj bonaj kaj valoraj.

– Tamen?... Ĉu vi havis gastojn dum la lastaj tagoj?

– Mi ne havis!...

– Ĉu turkoj vizitis vin?

– Ne vizitis. Absolute neniu enpaŝis mian korton jam tutan monaton...

Joĉjo denove ekpaŝis... Li ne sciis kion pensi... Mensostreĉe li frapis la manojn, kaj senespere komencis paroli:

Ŝtelo!...Ŝtelo en Nigra Marĉo!... Homo prirabita en Nigra Marĉo!...Tio okazis ĝuste kiam la vilaĝestro estas Joĉjo Juriŝiĉo!... Ho, Sinjoro!... ĉu tio eblas?... Kion nun diros al ni alivilaĝanoj?...Mi ja scias!... Ili diros al mi: ne fanfaronu!... estu pli reala... Ĝuste en via Nigra Marĉo oni rompis monkeston, forportis ducent dukatojn!... Kiel elteni ĉi tiun honton?... Kaj tio okazis en mia grizaĝo!... Ho, Sinjoro!... Kial vi ne foprenis mian vivon hieraŭ, ke ĉi tiun teruraĵon mi ne ĝisvivu!...

Li komencis tremi pro hororo... Larmoj inundis lian vizaĝon...

Tiumomente eniris la popo.

– Bonan matenon!...

– Malbona ĝi estas, mia popo! – diris Joĉjo.

– Kio okazis, Joĉjo?

– Ŝtelo!

– Ŝtelo?! – demandis la konsternita popo. – Ĉe kiu... kie?...

– Ĉe mi – diris Ivano.

La vilaĝestro apenaŭ sukcesis ekparoli. La popo eksciis ke malaperis mono de Ivano.

Kiam la vilaĝestro finrakontis, la popo turniĝis al Ivano.

– Kiun vi suspektas? – demandis li. Ivano denove mallevis la kapon.

– Ĉu vi ne scias kiu faris tion? – redemandis la popo.

– Ĝuste tio estas afliktiga, kara popo! ..... Ne temas nur pri suspekto...

– Kiu do? – diris unuvoĉe kaj la popo kaj la vilaĝestro.

– Lin vidis mia Lazaro... Hieraŭ Lazaro eĉ pafis al li...

Ambaŭ eksaltis. Jaм hieraŭ dum vespermanĝo ili aŭdis kio okazis dum la rondodancado. Ambaŭ abrupte ekkriis:

– Ĉu Stanko?!

– Stanko – diris Ivano.

– Tamen, ĉu Stanko de Alekso? – demandis la vilaĝestro.

– Li persone! – diris Ivano. – Mia kolerulo – ankaŭ mi ja estas tia – vidis lin hieraŭ, ĝuste kiam li eliris el la kromdomo. „Mi ekmiris“, diris li, „kion Stanko faras en la kromdomo. Mi eniris por vidi ĉu tie estas iu el la domanoj. Sed tie mi vidis – keston rompitan, malplenan... Mi ekkoleris, rapidmove prenis la pistolon, kaj ekkuris post li...“

– Ivano! – diris la popo. – Ne peku!...

– Nu, popo, tio estas vero!...

– Sed mi aŭdis – interrompis lin la popo – ke Lazaro pafis al li pro la filino de Seviĉo...

– Kredu, popo, ke tio ne estas vero!

La popo eksilentis, trairis la ĉambron unu fojon, kaj diris, kvazaŭ por si mem:

– Se oni dirus al mi: Stanko mortigis homon, mi kredus; sed – Stanko priŝtelis – mi ne kredas!... Post tio li turniĝis al la vilaĝestro:

– Ĉu vi alvokis la vilaĝanojn?

– Ne.

– Voku!...

La vilaĝestro eliris, ordonis al Simo alvoki la vilaĝanojn, kaj revenis en la ĉambron.

– Kion ni faros nun? – demandis li la popon.

– Mi ankoraŭ ne scias... Ni iru en la juĝejon, tie ni interparolos. Ĉiuj tri kun mallevitaj kapoj ekiris al la juĝejo...

Antaŭ ol pasis kompleta horo, Simo jam estis kunvokinta la familiestrojn. Homoj alvenis, hastante, demandante unu la alian kial la vilaĝestro alvokas ilin dumtiel bela labortago.

Alekso Aleksiĉo alvenis preskaŭ lasta. La homoj rigardis lin silente. Ĉiuj vilaĝanoj sciis kio okazis hieraŭ.Tamen, Alekso ankoraŭ nenion aŭdis: Stanko ne diris al li, kaj Alekso kun neniu renkontiĝis.Kiel homo kun pura konscienco, li estis serena kaj parolema. La homoj miregis; iuj eĉ rimarkis reproĉe:

– Kia malmola koro, pro Dio, fratoj miaj!...

Povra Alekso!... Li eĉ sonĝi ne povis, kio okazos al li.

Subite ekregis plensilento...El la juĝejo eliris la popo Milojo, vilaĝestro Joĉjo kaj Ivano.

La vilaĝestro estis serioza. Tiun tagon la kamparanoj unuafoje ne vidis lian serenan frunton kaj rideton. Kaj la serenecon kaj la rideton anstataŭis mornaj brovoj kaj ŝvelintaj vejnoj sur la tempioj.

– Frato miaj! – ekparolis li. – Mi alvokis vin por sciigi, ke io terura en nia vilaĝo okazis, io kio nin hontigis kaj kompromitis antaŭ la tuta mondo...

Lia voĉo tremis...

Ĉiuj ĉeestantoj gape rigardis al li... La homoj neniam vidis lin tia.

– Frato miaj! – diris li denove. – Tridek jarojn mi, laŭ via volo, estas estro de Nigra Marĉo. Dum tridek jaroj de mia estrado ĉi tia kondamnindaĵo ne okazis!... Hieraŭ, fratoj miaj, en nia vilaĝo okazis ŝtelo!...

Io trafluis la profundaĝulojn. Aŭdiĝis abelsimila voĉĥaoso. El tiu voĉĥaoso apenaŭ aŭdiĝis unu voĉo:

– Kiu estas la priŝtelito?

– Nu! – diris la vilaĝestro. – Ivano, rakontu mem al la homoj kio okazis al vi.

Li kaptis la manon de Ivano, kaj irigis lin antaŭen.

Ivano komencis rakonti: ke en la malnova kromdomo, en kesto, li havis ducent dukatojn, ke iu alvenis, rompis la keston, kaj forportis la monon...

La homoj komencis malame insulti la ŝteliston, demandante:

– Tamen, kiu faris tion?

Marinko Marinkoviĉo leviĝis kaj emfaze diris:

– Ho vilaĝestro Joĉjo, ho popo, ho vi, fratojmiaj!... Verdire, Ivano Maraĵĝiĉo min ĉiam mallaŭdas, nomas min turka flataĉulo, uzas diversajn nomaĉojn, tamen, se la situacio estas tia, mi diros kion mi scias, kion mi vidis propraokule, ĉar se mi tion ne dirus – tio estus peko kontraŭ Dio!...

Ĉiuj senescepte ekrigardis al Marinko. Li ektusis, kaj diris:

– Kion Ivano diris – tio estas vero... Fakte, ĉu ĝuste tiom da mono malaperis – tion mi ne scias; sed mi scias ke li estas priŝtelita, ĉar mi propraokule vidis la ŝteliston...

– Kiu estas tiu? Kiu estas tiu? – ektondris de ĉiuj flankoj.

– Atendu, mi diros!... Jen kiel tio okazis! Hieraŭ, posttagmeze, mi estis revenanta el arbaro. Mi estis portinta tien furaĝon al la brutaro... Kiam mi estis apud la domo de Ivano, mi vidis Stankon de Alekso eliranta el la malnova kromdomo de Ivano.

– Silentu, vi turkaĉo! – ekkrietis Alekso kaj ekimpetis al li, sed homoj lin haltigis.

– Atendu, Alekso, frato, ke mi rakontu kion mi vidis! – diris Marinko kviete, kaj ekrigardis al li per cinika rigardo. – Mi pro tio havas nenian utilon, sed ankaŭ mi devos morti, frato mia ... Do, mi vidis tion... sed negrave!... Mi sciis, ke li estas plejamiko de Lazaro, ke Ivano estas plejamiko de Alekso... kial tio estu stranga, ili kvazaŭ vivus en unu domo?!...Tamen, jen malfeliĉo!... Mi vidis ke Stanko ŝteliras... ke li iras malantaŭ arboj, ke retrorigardas por vidi ĉu...

– Mensogulo!... Mensogulo, flataĉulo turka! – ŝrikis Alekso.

– ... iu rimarkis lin – kontinuis Marinko kviete, ne atentante la kriadon de Alekso. – Kiam mi tion vidis, mi kaŭriĝis malantaŭ arbusto, kaj komencis

observi lin... Li treniĝis de arbo al arbo, ĝis kiam li alvenis sian korton; post tio li subite transkuris ĝin, alvenis ĝis ĉevalstalo, komencis palpfosi en sterkaĵo... kaj direktiĝis al la rondodancejo... Mi rezonis: estas interese vidi kion li palpfosis!... Tiumomente Lazaro preterkuris kun pistolo en la mano. Mi rapidis por atingi lin, sed mi ne povis atingi la bravulon!... Tiam mi aŭdis pafon... Tion mi, frato miaj, vidis per ĉi tiuj miaj maljunaj okuloj; mi pretas ĵuri en iu ajn monaĥejo ke estis ĝuste tiel.

– Vi ja mensogas, friponaĉo turka! – ekblekis Alekso, kaj deŝiriĝis de homoj kiuj lin tenis. – Vi mem elpensis ĉion!...

– Atendu, Alekso, – diris la vilaĝestro. – Li rakontas kion li vidis Ni nun iru al via domo. Tie ni komprenos ĉu Marinko parolas veron.

– Ek, vilaĝestro!... Ek, popo!... Ek, fratoj!... Vi ĉiuj min bone konas!... Kune kun vi mi kreskis kaj maturiĝis!... Vi ĉiuj bone konas ankaŭ miajn infanojn!... Vi konis ilin plej bone Ivĉjo, malnova amikĉjo mia!... Ĝuste en via domo ili viriĝis!... Ĉiuj vilaĝanoj scias ke ili estas bonaj kampuloj!... Ili ne estas maldiligentuloj, kiel tiu, kiu klaĉas pri mia domo!...Ek, fratoj!...

Ĉiuj ekiris al lia domo...

## 9. TERURA ĴURPROMESO

La homoj rigardis la afliktaspektan Alekson, sentante kompaton...Ankaŭ Ivano estis deprimita.Li bedaŭris, ke li ne diris unue al Alekso kio okazis...

Ili alvenis al lia domo. Alekso iris antaŭ ĉiuj. Lia Petra eliris antaŭ la homojn, ridetante, kiel bona mastrino, vidante gastojn sur sia sojlo. Tamen ŝia rideto baldaŭ estingiĝis, kiam ŝi ekvidis la pezmienajn vizaĝojn.

Alekso diris al ŝi:

– Endomiĝu!

Ŝi obeis kaj foriris.

La homoj direktiĝis al la ĉevalejo. Marinko eliris antaŭen, dironte:

– Jen, vilaĝestro, jen, popo!... Li estis ĉi tie, fosanta ion. Kaj mi malantaŭ tiu arbusto rigardis...

Li montris arbuston kontraŭflanke.

Sur sterkaĵo videblis postsignoj de fosado. Sur la loko de fosado la sterkaĵo ankoraŭ estis malseka. Tie estis dika juglanda ombro, pro kio sunradioj ne povis penetri kaj sekigi la sterkaĵon.

– Simo, – diris la vilaĝestro Joĉjo serioze – kontrolu la lokon.

Per bastono li montris la malsekejon.

Simo kliniĝis kaj komencis palpfosi.

Glacia ŝvito aperis sur la frunto de Alekso. Koro lia angoris pro antaŭsento, kiu ĝuste tiam aperis...

Kvindek familiestroj staris palaj kaj senvortaj antaŭ tiu vidaĵo... Ĉiuj kvindek koroj subtenis Alekson: ĉiuj deziris ke nenio estu trovita!...

Simo palpfosis. Lia mano trovis ion en la sterkaĵo; rubando kroĉiĝis al lia fingro. Li ektiris ĝin...

Tio estis ruĝa, silka saketo kun silka rubando...

Simo suprenlevis ĝin...

Ĉiuj ĉeestantoj konsterniĝis... ili ne kredis al la propraj okuloj. La popo Milojo alpaŝis por manpalpi ĝin.

– Ĉu tio estas ĝi? – demandis la vilaĝestro raŭke.

– Jes – diris Ivano.

La vilaĝestro prenis la saketon de Simo, elnombris la monon kaj diris:

– Ducent.

– Ĝuste – konfirmis Ivano.

Ĉiuj alrigardis Alekson.

Li staris pala, rigida kiel statuo.

Kiel se cent varmegaj pafkugloj kaj mil akraj ponardoj trapikus lian malfeliĉan patran koron...

– Se vi ŝtonegon renversus, pli da bono vi farus, ol kiam vi naskigis lin! – ekkriis vilaĝestro rigore. Alekson rekonsciigis ĉi tiuj riproĉplenaj vortoj.

– Ho ve, maljunaĝo mia! – ekĝemis la povrulo.

– Kie estas tiu via malmoralulo? – demandis la vilaĝestro sombre. Alekso manmontris al la draŝejo, kiu ne estis malproksime.

– Simo, alvoku lin!

Simo foriris. La homoj estis starantaj senvorte, kun mallevitaj kapoj. Al ili estis malfacile rigardi la homon kiu antaŭ ili tordiĝas kiel vermo...

Petra eldomiĝis. Ŝi nenion sciis pri ĉio ĉi. Al ŝi nur ŝajnis strange ke tie staras tiom da homoj.

– Kial vi ne sidiĝas, homoj!... Venu ĉi tien, jen manĝotablo!... Sidiĝu, almenaŭ glaseton eldrinku...

Tamen ŝin konsternis la palaj vizaĝoj. Malbona antaŭsento konkeris ŝin, kiam ŝi ekvidis ke ŝia filo Stanko kun Simo hastas ĉi tien... Ŝi haltis por vidi, por aŭdi kio okazas...

Stanko alvenis. Li vidis la amason da homoj, vidis la rigorajn vizaĝojn de la popo kaj vilaĝestro, vidis siajn konsternitajn gepatrojn, kaj ankaŭ lia vilaĝo ŝanĝiĝis...

– Do, diru! – demandis la vilaĝestro.

– Kion, oĉjo Joĉjo.

– Ĉu vi konas ĉi tiun saketon? Li proksimigis ĝin al Stanko. Stanko atente observis ĝin, kaj kviete diris:

– Ne, mi ne konas.

– Mensogulo! – ekŝrikis la vilaĝestro.

Stanko ektremis kaj ĉirkaŭrigardis. La morozaj vizaĝoj silentis, la rigidaj okuloj esploris lin kiel la okuloj de hantuloj...Li alrigardis la vilaĝestron.

– Mi ne mensogas, oĉjo Joĉjo, kial mi mensogu?

– Ĉu ne vi ŝtelis ĉi tion?

– Ŝtelis?... De kiu, ve?...

– Kial vi prokrastumas?... Li ŝajnigas nescion!... Ĉu ne vi ĉi tiun monon ŝtelis el la kromdomo de Ivano, ĉu ne vi enfosis ĝin ĉi tie, en la sterkon?... Ĉu Lazaro de Ivano ne pro tio hieraŭ pafis al vi?...

Kiam oni menciis la nomon de Lazaro, la haroj sur la kapo de Stanko stariĝis. Antaŭ liaj okuloj reviviĝis la hieraŭa tago, li revidis ĉion kio okazis... kaj nenion respondis.

– Do? – demandis la vilaĝestro.

Stanko silentis.

– Respondu ja!

Stanko denove silentis...

– Simo! – ordonis la vilaĝestro. – Ligu lin!...

Ambaŭ oreloj de Stanko fulminis... Liaj okuloj ekflamis fajre... Li alrigardis unue la vilaĝestron, poste la aliajn. Rigardo lia ĉiujn alforĝis al la loko kie ili estis starantaj.

– Atendu iomete, oĉjo Joĉjo, atendu! – diris li akre. Rapidpaŝe, kiel cervo, li forkuris en la domon... Post kelkaj momentoj li revenis plene armita: pistolo kaj jatagano ĉe la zono, kaj en la mano – pafilo kun dekorita kolbo.

– Al kiu jam tedis la vivo, tiu min ligu! – diris li rigore.

Neniu ekmoviĝis. Tio ne plu estis Stanko, tio estis juna giganto, forta kiel tondro, makabra kiel sabro... En liaj okuloj brilis fulmoj.

– Oĉjo Joĉjo!... Mi ne ŝtelprenis la monon, mi ĝin eĉ ne vidis, mi ĵuras per Dio!

Post tio li turniĝis al Ivano. Tiu konfuziĝis, genuoj liaj ektremis.

– Ivano Maraĵĝiĉo! Ĝis hieraŭ mi vin nomis oĉjo, sed de hieraŭ vi ne estas mia parenco!... Kiu havas demonan filon kiel vi, tiu ne povas esti mia parenco!... Salutu vian filon Lazaron, kaj diru al li: Stanko Aleksiĉo scias ke la ŝtelo estas lia fiaranĝo!... Hieraŭ li volis mortigi min, sed al li Dio ne permesis tion!... Hodiaŭ li tion ne plu povos fari!... Salutu lin kaj diru al li, ke de ĉi tiu momento, dum sekva jardeko, lia vivo apartenas al mi!...Se li kaŝiĝos ien ajn en la mondo, se li kaŝiĝos en la teron, en la ĉielon – mi trovos lin!... Mi ne kvietiĝos ĝis kiam mi lian kapon tri fojojn batruligos.Mi ĵuras per la ĉiela lumilo kiu nin varmigas, mi ĵuras per ĉi tiu sankta signo!...

Kaj li krucosignis ...

Liaj vortoj glaciigis ĉies korojn... Post tio, alpaŝinte la gepatrojn, li demetis la ĉapon:

– Paĉjo! Panjo!... Dankon al vi por via vartado kaj nutrado!...

– Sed kien vi iras, filo?...

Stanko galhumore ekridis.

– Kien mi iras?... Tien, patrinjo, tien!... Mi iras tien, kien iras ĉiuj povruloj, al kiuj aroganteco aŭ potenco homa ne permesas vivi inter la homoj – en la monton, patrinjo!...

– Ne faru tion, filo! – diris malespere la patrino, kaj etendis la manojn por haltigi lin.

– Mi devas, panjo! Ĉi tie ne estas loko por mi!... Ĉu vi ne vidis ke ili volis ligi min!... Dum mi vivas, neniu min ligos!... Adiaŭ!

Li kisis ŝiajn tremamajn manojn, kaptis mezon de la pafilo, kaj foriris malrapidpaŝe, ne retrorigardante... Ĉiuj rigardas kaj vidis ke li enboskiĝis, sed neniu provis haltigi lin.

La vilaĝestro Joĉjo fiksrigardis Alekson. Post tio, ekrigardinte la homojn, li diris:

– Ni iru for de ĉi tie!...Ĉi tiu domo estas malbenita!...

Sen adiaŭo ĉiuj turnis la dorsojn al la domo, kiun ili ĝis tiam respektis.

## 10. DISIĜO

Stanko komence iris malrapide, sed kolerego superregis lin. Ju pli la kolerego estis furioza, des pli liaj paŝoj estis grandaj... Komence li sentis malĝojon, li eĉ ekplorus, se tie ne estus tiom da homoj... Tamen, la kolerego estingis liajn larmojn...

– Ĉu mi estas ŝtelisto? – kriis liu laŭte. – Ĉu mi estas ŝtelisto, mi kiu eĉ pajleron fremdan ne tuŝis?... Ĉu ŝtelisto estas mi, kiu eĉ paneron fremdan ne prenis?... Sed kiu diris tion?... Ĉu li?!... Ĉu povas esti ke mi tiom da jaroj dorlotis serpenton sur mia brusto?... Ĝi enpikis al mi la denton!... Tio doloras!...

Hieraŭ... Ĝis hieraŭa tago li kredis ke Lazaro estas la plej honesta homo en la mondo, ke li ne havos pli bonan amikon. Sed hieraŭ... Lazaro pafis al li; ĉar tiu pafo estis nesukcesa, Lazaro subfosis lian domon, ofendis lian grizharan patron...

Do, kia estas Lazaro?

Lazaro estas homo, kiu lin plej multe mensogis, homo kiu intencis forrabi lian unuan, junulan ĝojon; ne nur tion, Lazaro volis ankau mortigi lin; Lazaro estas homo, kiu, por realigi siajn intencojn, pretis humiligi kaj lin kaj lian familion...

Jen kia estas Lazaro.

Do, kio Lazaro estas?

Malamiko... Malamiko, kies kapon oni devas disrompi, samkiel la kapon de aspido... Ne!... Malamiko, kiun oni devas unue turmenti per ankoraŭ neaŭditaj turmentoj, malamiko kiu devas trasenti sian krimon...

Tamen, per kiaj turmentoj... Stanko ne sciis... Ĉio, kion li povis rememori, ĉio al li ŝajnis tre milda kompare kun la fiago de Lazaro...

– Li devos tion senti!... Lin pli dolorigu liaj pekoj, ol turmentoj per kiuj mi povus lin turmenti!... Lia propra sango devas ribeli kontraŭ li!... Mi devas elpensi punon, kiu mortigus lian animon!...

Tiel, kuregante tra la arbaro, Stanko laciĝis. Ankaŭ liaj streĉitaj kaj incititaj nervoj lacegiĝis...

Kadavre laca, ŝvitanta, Stanko malleviĝis sub kverkon... Li jam ne povis ekmoviĝi...Unu sunradio falis sur lian manon, li sentis ke ĝi bruligas lin, sed li ne formovis la manon, kvankam tio estis netolerebla...

Pensoj liaj saltadis de unu al alia afero, papilisimile: ektuŝetis lin, kaj forflirtis...Ĉio al li ŝajnis negrava.Li aŭdas grilon, sed nur ekpensis: ĉirpas grilo...Io frapetis super li „Nu... tio estas pego", ekpensis li, kaj – tio estis ĉio... Li rigardis ĝin, sed ne pensis pri ĝi... Li rigardis ĉion, sed pensis pri nenio!...

La suno estis pli kaj pli kliniĝanta okcidenten.La varmego estis cedanta... Li sentis ke malvarma zefiro blovetas fortodone...Sulkoj sur lia frunto estis malaperantaj... Superla monto li rigardis ruĝan okcidenton, kiu heligata per flamruĝo, kvazaŭ ridetus...

Li leviĝis. La unua penso de Stanko estis ke li devas adiaŭi Jelican. Li sentis, ke li devas renkontiĝi kun ŝi.Li devas diri al ŝi ke estas mensogo ĉio, kion en la vilaĝo oni hodiaŭ aŭdigis pri li, kaj pri lia domo.Ankaŭ multon alian li devas diri al ŝi...

Tial li ekiris al la domo de Seviĉo.

Li iris malrapide; nur proksimiĝinte al la fruktejo li ekrapidis, ĉar en la fruktejo li ekvidis Jelican elgregiganta bovidojn.

Li alpaŝis barilon kaj alvokis ŝin,sed kiam ŝi alpaŝis, li ne plu povis paroli!... Tiom da pensoj, tiom da sentoj... kiujn li ne povis vortigi!...

Tamen li sentis ke li devas ion diri al ŝi. Tial li diris:

– Ĉu vi elgregigas bovidojn?

– Jes.

– Kiom da „vintrulinoj" vi havos? – (Bovinoj, melkataj dum vintro.)

– Kvin.

– Sufiĉe...

Post tio li eksilentis:Li ne sciis kion ankoraŭdiri. Ankaŭ ŝi sentis la samon. Ŝi aŭdis ĉion kio okazis hodiaŭ...

Pasis kelkaj silentaj momentoj... Ambaŭ estis tre deprimitaj. Tiam ŝi diris, montrante la pafilon kun ornamita kolbo en lia mano:

– Ĉu kun ĝi?...

– Jes, kun ĝi.

– Tion ja faris li!

– Li.

– Mi sciis. Tuj kiam la paĉjo diris ke ili trovis la saketon, mi komprenis ke nur li povis ĝin enfosi...

– Sed kion diras la paĉjo?

– Nenion.

– Ĉu ankaŭ li pensas ke mi estas ŝtelisto?

– Ankaŭ li.

– Ĉu ankaŭ vi pensas tion?

– Mi ne pensas tion! Mi kredas ke vi estas la plej bona kaj la plej honesta knabo enla mondo...

– Tamen, ĉu vi atendos min?

– Mi atendos!

– Kion vi faros se li svatos vin?

– Mi malakceptos!

– Kion, se viaj gepatroj altrudos tion al vi?

Ŝi ekrigardis lin rekte en la okulojn. Stanko vidis ŝian decidoplenan rigardon.

– Mi diros al ili ke mi malamas lin!

– Kion, se ili devigos vin? – diris Stanko, okulfiksante ŝin.

– Min neniu povas devigi! – diris ŝi okulfulme. – Se mi estas problemo por miaj gepatroj, tiam...

– Kion tiam?

– Tiam mi finos la vivon per memmortigo!... Tian vivon mi ne bezonas!...

Okuloj ŝiaj ekflamis malame...

– Dankon al vi, Jelica!... Tamen, mi diros al vi: neniu vin devigos, neniu aŭdacos vin devigi!... Diru al via paĉjo ke vi estas koramikino de la hajduko Stanko, kaj tiu, kiu vin tuŝos, neniun proksimulon plu brakumos!... Sed vi... vi estos mia!...Adiaŭ! Adiaŭ! Vi kvietigis mian animon, dankon al vi!... Nun min nenio plu ĝenas... mi povas eĉ kanti!... Adiaŭ! Mi ofte umos ĉirkaŭ Nigra Marĉo!... Donu vian manon!...

Ŝi etendis la manon. Stanko premis ĝin...

Koro lia batis, kvazaŭ volante elsalti el la brusto...

– Adiaŭ, revo mia... Forto mia, fido mia!... Koramikino mia!...

Post tio li fortuniĝis kaj ekkuris skuale... Li volis kaŝi larmojn kiuj ektorentis...

Ŝi, eĉ se volus haltigi siajn larmojn, ne povus tion fari. Ili verŝiĝis pluve. Pro larmoj ŝi apenaŭ kvaronvidis lian blankan ĉemizon malaperanta en arbetejon... Per sia larĝa maniko ŝi viŝadis la okulojn...

La koro tiris ŝin sekvi lin. Ŝi volis alvoki lin, aliĝi al li; kun li vagi tra kvietaj kverkarbejoj, kun li manĝi maldolĉajn glutaĵojn, maldormi super lia dormema kaj laca korpo...

Tamen, la hontosento, hontosento kiun ŝi elsuĉis kune kun la patrina lakto, sufokis ŝiajn dezirojn. Ŝi nur mansvingis kaj elĝemis:

– Knabino mi estas... ne decas tio!...

Tiam ŝi komencis viŝi la larmojn...

– Ne estas bone per larmoj forakompani homon!... Dio donu al li vivon kaj sanon... Ho, Sinjoro!... Vi estu lia amiko!... Vi estu lia interparolanto!...

Tiam ŝi alrigardis la ĉielon.

Stelo traflugis bluan ĉielon, kaj estingiĝis ie, fore... Ŝi elflustris.

– Malantaŭ arbuston, amiko!...

Ŝi estis certa, ke tio estas la stelo de Stanko...

Ankoraŭ longe, longege ŝi rigardis la direkton kien li foriris... Post tio ŝi kun peza ĝemo revenis kaj ekiris en kromdometon. Ŝia patrino staris sur la sojlo de la domo.

– Jenjo, kara, iru vespermanĝi!

– Mi ne povas, panjo, la kapo min doloras...

## 11. KAMELO

Al Stanko ne estis facile disiĝi de Jelica. Kelkajn fojojn li turniĝis kaj vidis ŝin staranta kaj rigardanta malantaŭ lin. Kiam li jam enboskiĝis, li turniĝis ankoraŭ unu fojon, sed ŝi ne estis tie... Li nur ekĝemis kaj klinis la kapon...

La nokto estis sensona, la ĉielo nubomanka, nur steloj trembrilis, la luno glite leviĝis kaj drivis sur la ĉiela bluejo, kiel facila boato sur glata akva supraĵo...

La aero kvietis... Eĉ ne unu folieto balanciĝis sur arbo, eĉ ne unu birdo flirtigis siajn flugilojn; eĉ la noktuojmutis... Griloj ne ĉirpis, la tero ne plu ellasadis varman vaporon... ĉiuj eksilentis, ĉiuj ripozigis la dormemajn okulojn, ĉiuj dormis.

Nur unu knabo en la vilaĝo ne estis dormanta... Li blovis dufluteton, rakontante al la luno kaj steloj pri junulaj sentoj, pri allogita animo; la subtila sono de dufluteto teneris kaj plorĝemis pasiplene, varme kaj forte, kiel nur amo tion povas kaj scias...

Stanko aŭskultis la dufluteton, kaj majgajiĝis... Ĝis la hieraŭa tago ankaŭ li tiel flutis; ankaŭ lia koro fandiĝis delice kaj plezure... Li kvazaŭsentis ke lian hararon dorlotas varma kaj ĉarma mano de Jelica...

Tial li komencis kontempli la pasintecon, la ĵusan pasintecon, kaj ekĝemis...

– Alvenos tago kiam ankaŭ al mi revenos mia vivo!... Ho!... Tiam mi scios vivi!... Sed tio estos kiam la hundaĉo malaperos.

Tiu penso pri Lazaro tuj memorigis lin pri lia devo, kaj pri lia ĵuro. Li rememoris pri kio li ĵuris al Dio, al homoj kaj al si...

Tial li premis la pafilon al la korpo, kaj ekiris tra arbetejo.

Li pripensadis:

– Nun mi iru al Kamelo... Li envojigos min... Li instruos min... Li sendube scios kie ili troviĝas...

Pro tio, anstataŭ iri tra la arbejo, li turniĝis al la rivero Drino. La vojon li sciis, li trairis ĝin sennombrajn fojojn...

Li jam aŭdis ondolirlon kaj bruon.Drino estis rakontanta mirigajn historiojn. Ĝi rakontas mirindaĵojn kaj masakrojn kiujn ĝi vidadis kaj aŭdadis... Multajn malfeliĉulojn ĝi akceptis en sian sinon.Tiu terura murmuro, tio estas ilia vekrio... Ili ĝin aŭdigas al la justa kaj objektiva Dio, tial la haroj de ĉiu mortulo stariĝas de teruro...

Stanko serĉis akvomuelilon, kaj trovis ĝin. Li direktiĝis rekte al ĝi.

La akvomuelilo premiĝis al la bordo, kiel nesto de hirundo. Stanko transiris pontotrabon. Sub li peliĝis ondoj.

Li haltis ĉe la pordo, ekfrapis, sed respondon ne ricevis. Li ekkriis:

– Hej, domestro!

Neniu reagis. Nur ondoj ululis...

– Domestro!

Denove nenio. Stanko komencis per pugno frapi la pordon.

– Domestro!

– Ĉu vi estas freneza! – ektondris voĉo deinterne. – La domo estas domo. Ĝi estas sur tero, ne estas sur akvo!... Sur la akvo staras nur ŝipo kaj akvomuelilo... Mi ne estas domestro sed akvomuelisto...

– Sed kial vi ŝlosis la pordon?... Malfermu la pordon! – diris Stanko.

La ŝlosiltruo klakis, post kio la pordo malfermiĝis.

Stanko enpaŝis.

Meze de la muelilo brulis fajro. Apud la fajro troviĝis linkovrileto kaj malmulte da fojno – tio estis kuŝejo de la akvomuelisto. Apud farunujo staris homo, tute blanka pro muelpolvo. Stanko lin rekonis kaj alpaŝis.

– Bonan vesperon, oĉjo Kamelo!

– Dio aŭdu vin!

La akvomuelisto nomiĝis Gligorio. Nur Dio sciis kial oni lin kromnomis Kamelo; eble ĉar li ĉiutempe iris kliniĝinta pro kio ŝajnis ke li estas iomete ĝiba.

Tio estis stranga homo. Li estis... akvomuelisto. Vivis li sola en sia akvomuelejo, kvankam li havis domon kaj bienon en la vilaĝo. Kun homoj li tre malofte renkontiĝadis; kiam li fojfoje partoprenis renkontiĝojn, li silentis, aŭ, se parolis, li kvazaŭ parolus kun vento...

Pri li oni parolis terurajn historiojn. Onidire li havis ŝipeton. Per tiu ŝipeto li veturigis, plejofte, turkojn, trans Drinon... Li ŝipis nur nokte. Se li vidus ke turko estas riĉa – tiu turko ne atingus la alian bordon. Meze de Drino li batkontrolis kiom firma estas la kapo de la turko, kaj, antaŭ ol la turko rekonciiĝis, Kamelo prenis ĉion kion li trovis ĉe la turko – kaj enakvigis lin... Multaj turkoj, kiuj ekiris el Ŝabaco aŭ el Bosnio, tiamaniere vojeraris, kaj ne sukcesis trovi vojon por reveni hejmen.

Kiam temis pri unuopuloj, li ĉion faris mem.Tamen, se iu bejo veturis kun akompanantaro, lin nepre renkontadis hajdukoj!

Sed kiam oni scivolis pri tio, li ridis, rakontis pri barbfiŝoj kaj ezokoj, pri birdoj kaj skaraboj...Li rakontis kun tia ardo, ridis tiel dolĉe – ke la turkoj kredis lin stultulo kiu nenion scias...

Sed li sciis ĉion. Li sciis la monton, sciis la akvon, sciis la ŝipojn, sciis la hajdukajn travintrejojn kaj tratagejojn; unuvorte, li sciis ĉion.

– Bonvolu diri, oĉjo Kamelo, kie mi povas trovi hajdukojn? – demandis Stanko post saluto.

– Ĉu hajdukojn?

– Jes, hajdukojn!...

– Hm!... hm!... – murmuris Kamelo. – Filĉjo, vi ja scias ke hajdukoj ne troviĝas en la akvomuelejo... La steloj estas sur la ĉielo, la fiŝoj estas en akvo, la hajdukoj estas en monto... Vi ja scias, ĉiu troviĝas sur sia loko... Do, se vi bezonas hajdukojn, serĉu ilin en monto!...

– Tamen, kie mi trovos ilin?

– Kiel mi povas scii?

– Oni diras ke vi scias.

– Oni diras!... Oni diras!... Ĉu mi povas ĉion scii? Nur Dio ĉion scias!... Iru en la monton!...

Stanko mallevis la kapon... La muelŝtono estis faruniganta grajnojn, dum klakilo ekis frapadi... Kamelo alrigardis Stankon subokule.

– Diru, Stanko!

– Kion?

– Ĉu vi vere intencas enmontiĝi?

– Nur en la monton mi povas iri! – diris Stanko levante la ŝultrojn.

– Ĉu vi pri nenio bedaŭras?

– Mi jam akceptis tion.

– Tamen, ĉu vi scias kiu faris ĉion ĉi?

– Mi scias, Lazaro.

– Kaj kiu ankoraŭ?

– Neniu alia.

– Jen, vi tamen ne scias! Ne nur Lazaro partoprenaĉis en tio.

Stanko konsternite alrigardis lin.

– Kiu ankoraŭ? – demandis li.

– He, filĉjo mia!... Diablo partoprenaĉis en tio!... Tio estis majstre pripensita, kaj tre metode plenumita!...

– Sed kiu, je Dio?

– Atendu, mi parolas vorton post vorto; mi ne povas du vortojn elbuŝigi samtempe!... Lo, vi ankoraŭ estas flavbekulo, tial vi ne povas kompreni ĉi tiun majstraĵon!... Mi ja scipovas iomete legi, kvankam mi ne estis en monaĥejo... Jen pri kio temas! La turko ne povas senfare sidi, li devas ion fari!... Tial li

decidis malamikigi la duopon; pro ili malamikiĝos ankaŭ iliaj patroj, kaj pro tiuj – ankaŭ la vilaĝanoj... Ĉu vi komprenas?

Stanko malfermis la buŝon, rondigis la okulojn.

– M-m-mi ne komprenas!

– Mi sciis ke vi ne komprenos kion mi diras!... Bone, vi poste komprenos. Dume sciu jenon.Kiom vi en la monton iras pro Lazaro– tiom vi iras ankaŭ pro Piro kaj Marinko Marinkoviĉo!... Malforgesu tion!...

– Tamen, kiel vi eksciis tion?!

– Birdo diris al mi!... Vento alblovis la novaĵon... Mi ja devas scii ĉion...Vi estas bone informita!...Hajdukojn vi serĉas...Ĉu vi scias kie estas Seka arbusto?

– Mi scias.

– Tien... Senprokraste iru tien!... Vi trovos ilin tie.Iru al ili. Ili atente observos kia vi estas, kontrolos vian ecaron, kaj se vi tion indas, ili vin akceptos, se ne – ili vin foririgos!...Iru nun!...

– Tamen, mi petas, diru al mi... – ekparolis Stanko.

– Mi jam diris! – interrompis lin Kamelo. – Tro multon mi jam diris... Kiu langon ne tenas, mem sin malbenas – multaj perdis la kapon pro sia lango...Nudpieda homo povas iri. Se li pikiĝos, li elprenos la dornon el la piedo, kaj se ne povos elpreni ĝin, la homo surtiros ŝtrumpon por kovri ĝin. Sed se oni dornos la langon... Nu, iru!... Iru!...

Li kaptis Stankon je la ŝultroj, kaj komencis puŝi lin for...

– Do, vi diras: La turko kaj Marinko?

– Ili, duope!

– Kaj li kulpas samkiom Lazaro?

– Kulpas eĉ pli!... Fakte, li organizis ĉion ĉi... Ĉu tio sufiĉas?

– Sufiĉas, dankon al vi!... Adiaŭ!

– Adiaŭ!...

Stanko eliris el la akvomuelilo.

Kamelo sidiĝis sur trunkon, kiu samtempe estis kaj lia seĝo kaj lia kuseno, kovris la kapon per ambaŭ manoj, kaj komencis pripensadi... La fajro estis preskaŭ estingiĝonta, kiam li levis la kapon, kaj diris kvazaŭ por si mem:

– Ili incitis venenan serpenton, ripozantan sub ŝtono!... Eĉ se diablo pardonus al ili, ĉi tiu knabo neniam pardonos!... Li venĝos eĉ al la sepa generacio!...

## 12. MONTAJ REĜOJ

Stanko iris tra arbetejo. Sub liaj piedoj kraketis sekaj branĉetoj, susuris forfalintaj folioj, sed li enpensiĝis... Li miris, miregis pri Piro kaj Marinko... Li pripensadis kaj supozadis, sed ne povis rememori ke li iam ajn ofendis ilin; male, li neniam malbonhumore alrigardis ilin... Li pli miris ol koleris...

– Finfine – diris li – des pli bone! Mi ne senkiale enmontiĝas!... Anstataŭ per unu, mi per tri kapoj ornamos Nigran Marĉon! Mi punvenĝos al ĉiuj samtempe!... Oni rakontos pri mia hajdukado kaj pri mia venĝo! Jen, vere estas bele hajduki!

La hajdukoj mastras pafdistance!... La hajdukoj mem juĝas kaj mem pardonas!...

Li jam ekzaltis. La pensoj lin portis tra montoj kaj alpoj... La bando admiros lin kaj elektos lin hajdukestro!

– Stanko – hajdukestro!... Tio estos tre bone!... Estos bone esti hajdukestro!... Ho, kiel mi venĝos!... Mi unue mortigos Lazaron, poste Piron, kaj fine Marinkon!... Ĉiuj tremos aŭdinte mian nomon... Ĉiuj...

Tiumomente kvazaŭ io eksplodus. Terura voĉo ektondris:

– Halt!...

Tio okazis subite...Stanko ektremis kaj haltis stupore.

– Kiu vi estas? – demandis la voĉo fulmotondre. Stanko konfuziĝis kaj elbalbutis:

– Mi estas... mi estas-s...

– Kiu vi estas?

– Serbo – respondis Stanko per la unua vorto kiu venis en lian kapon.

– De kie vi estas?

– De Nigra Marĉo.

– Kiun vi serĉas ĉi tie?

– Hajdukojn – diris Stanko jam koncentriĝinte.

– Kial vi serĉas ilin?

– Mi volas bandaniĝi.

Malantaŭ arbusto aperis armita homo.

– Venu ĉi tien... Alpaŝu! – diris li ordone. Stanko alpaŝis.

Lunlumo lumigis lian vizaĝon. La hajduko fiksrigardis lin.

– Bone – diris li.

La hajduko turniĝis, metis la manojn sur la buŝon kaj ekbojis kiel hundo.

Iu respondis boje.

Ne pasis multe da tempo, kiam du armitoj aperis malantaŭ arbusto...

– Irigu lin al la hajdukestro! – diris la gardisto. Ili alpaŝis kaj haltis apud Stanko, unu de la dekstra, kaj la alia de la maldekstra flanko.

– Ek! – diris la gardisto.

Ili ekiris...

Stanko estis surprizita. Li ne regis sin, sed moviĝis laŭ la ordono. La duopo iris apud li kiel ombroj...

Ili iris konsiderinde longe, per flankvojoj, ĉirkaŭire... Li memvole obeis.

Finfine li en densa arbara laŭbo ekvidis senflaman fajron kaj ekpensis: ni alvenis... Li ankoraŭ pli konvinkiĝis pri tio, vidinte kelkajn ombrojn moviĝantaj tra nokta sensunejo. La akompanantoj haltis, ankaŭ li haltis kaj ĝentile salutis ilin.

– Dio vin favoru! – diris sibla voĉo. Kiun vi serĉas?

– La hajdukestron Srećkon – respondis Stanko.

– Jen mi. Kial vi serĉas min?

– Mi serĉis vin kaj vian kunularon. Se vi min akceptos, mi volas kune kun vi fronti kaj bonon kaj malbonon.

– Kia malbonaĵo pelas vin en la monton?

– Venĝo.

– Venĝo, kontraŭ kiu?

– Kontraŭ tiuj, kiuj tion meritas. Ricevos bandito laŭ sia merito!... Larmoj ŝuldon ne pagas!

Stanko elrakontis ĉion.

– Kiel vi nomiĝas?

– Stanko Aleksiĉo.

La hajdukestro silentis certan tempon.Post tio li elgrumblis tra la dentoj, kvazaŭ por si mem:

– Vespero lacigas, mateno freŝigas. Kiam taĝiĝos, tiam mi decidos.

Post tio li tuniĝis al la kunularo...

– Jovano! Joĉjo! Prigardu lin ĝis taĝiĝo. Leviĝinte el mallumejo du uloj alpaŝis Stankon.

– Flamigu la fajron, kaj sidiĝu. Vi, se vi volas, vi povas dormi – diris unu el ili al Stanko.

Ekregis plensilento...Aŭdiĝis nur kraketado de fajro kiun Joĉjo disheligis. Bluete purpura flamo lumigis la tutan arbaron, sed Stanko ne povis distingi la vizaĝojn de homoj, dormantaj en mallumejo... Li sidiĝis kaj ekrigardis la sidiĝintan duopon.

Tio estis junaj kaj sanaj homoj.Sano estis eruptanta el ĉiu ilia movo.

Poste li fiksrigardis la fajron. Li rigardis cindrerojn, kahelantajn nigrakverkan braĝon.

Jen, li deziris veni inter hajdukojn, vidi ilin, interparoli kun ili, sed li tamen ne estis kontenta! Li sentis premon en la animo, li estis tiel sentema, ke lin ĝenis ĉio, eĉ ronkado de homo, dormanta malantaŭ lia dorso.

La hajdukoj silentis. Ili interŝanĝis eĉ ne unu vorton, nek kun li, nek inter si. Ili rigardis lin senvorte, sed iel aroge, samkiel negocisto rigardas aĉetutan bruton.

Iliaj rigardoj lin ofendis. Li kuŝiĝis por eviti ilin...

Tiu malplezuriga silento daŭris du longajn horojn.

Abrupte ĉirkaŭ li komenciĝis vigliĝo. El apudaj vilaĝoj aŭdiĝis virkokaj voĉoj; birdoj trile ekĉirpis; freŝa aerfluo ekmovisfoliojn sur arboj, kiuj eksusuris... tra tiuj verdaj folioj li vidis stelojn paliĝantaj.Blanka klara strio estis traboranta la arbaron, iĝante pli kaj pli flamruĝa, kaj fine aperis hela suneto... Miloj da sunradioj trapenetris verdajn foliojn, glimante kaj rebrilante kiel buntaj etŝtonoj en klara rojo...

Stanko levis la kapon kaj krucosignis.

La hajdukoj Jovano kaj Joĉjo leviĝis. Jovano prenis lignan akvujon, dironte al Stanko: – Ek!

Stanko leviĝis kaj ekiris malantaŭ ili, obeema kiel infano.Ili iris tra la arbaro silente...

Finfine ili atingis la cellokon. En densejo, kovrita per kverkaj traboj, troviĝis puto, kiun, verŝajne, la hajdukoj mem fosis.

La duopo demetis la rimenojn, kaj kunligis ilin; per unu rimeno ili ligis la akvujon, mallevis ĝin, kaj plenigis per akvo. Joĉjo verŝis la akvon por ke Jovano kaj Stanko lavu sin, post kio Stanko faris tion por li. Lavinte sin, ili viŝiĝis per siaj dikaj manikoj, turniĝis al la oriento, kaj preĝis al Dio.

Repleniginte la akvujon, ili revenis al la kunularo.

La hajdukoj jam estis leviĝintaj.

La grupo konsistis el proksimume tridek homoj. Ĉiuj estis junaj, krom la hajdukestro, kiu estis grizethara.

Ĉi tiuj vizaĝoj plaĉis al Stanko. La hajdukestro ekplaĉis al li ankoraŭ pli.

La staturo, vizaĝo, konduto de la hajdukestro estis respektovekaj. Tio estis homo serioza, silentema kaj fiera. Stature li estis rekta kiel lanco, la paŝoj memfidaj. Ĉiu movo, ĉiu paŝo lia vidigis forton kaj potencon de liaj muskoloj. Plej dignigaj estis liaj grizetaj kapaj kaj lipaj haroj, sed ankaŭ la prunele nigraj okuloj, fulmantaj sub la ombrode longaj okulharoj.

Al Stanko ŝajnis ke li povus transiri la mondon sekvante ĉi tiun homon!...

Sin lavis la hajdukestro, sin lavis ankaŭ la hajdukoj, kaj kvazaŭ estante en domo, ili turniĝis al la suneliro, kaj preĝis al Dio.

Post la preĝo unu el la hajdukoj al la hajdukestro alportis lignobotelon. Tiu krucsignis, trinketis, kaj transdonis la lignobotelon al la aliaj, por ke ankaŭ ili trinku.

Stanko staris apud kverko, observante ĉion ĉi.

– Venu ĉi tien! – alvokis lin la hajdukestro. Li alproksimiĝis.

– Kiel vi diris ke vi nomiĝas?

– Stanko.

– Jes, jes... Stanko. Do, vi diras, ke vi volas hajdukiĝi?

– Tio estas mia deziro! – diris Stanko.

– Tamen, ĉu vi scias kion signifas esti hajduko?

– De mia frua infanaĝo mi aŭskultis kiam oni kantis pri hajdukoj en akompano de guzloj– respondis Stanko senĝene kaj decidoplene.

– Jes, oni kantas... sed tio estas penoplena vivo... Lo, vi kutimiĝis tagmanĝi, vespermanĝi, satdormi, sed la hajdukoj tion ne povas!... Tre ofte la hajdukoj ne povas satmanĝi; kiom da fojoj hajdukoj havas sendormajn noktojn – tion oni eĉ kalkuli ne povas!

– Ĉion ĉi mi povas! – diris Stanko serioze kaj memfide. – Verdire, mi neniam malsatis, sed se tio estos bezonate, mi malsatos pli bone ol iu ajn!

Al la hajdukestro plaĉis tia memfido.

– Krom tio, la hajduko hajdukon devas gardi kaj defendi. Se lian kamaradon oni vundos, la hajduko ne povas lin lasi, por ke malamikoj lian kapon forhaku, por ke birdoj karnon lian manĝu; li devas la kamaradon sur siaj ŝultroj el la batalejo forporti!

– Juna mi estas, forta mi estas!... Tio por mi ne estos malfacile.

– Krom tio, la hajduko ne plu havas familion. Liaj fratoj estas ĉi tie. Li ne rajtas plu pensi pri siaj verdaj kampoj, pri amindumado kun knabinjoj vilaĝaj!...

Stanko kapneis.

– Pri tio mi devis rezigni!... Ĉiujn karajn kaj amatajn forlasinte, mi venis ĉi tien por serĉi fratecon kaj amon! – diris li.

– Atendu, atendu!... Se oni kaptas hajdukon, oni tortutas lin per plej aĉaj turmentiloj...

– Mi eltenos!

– Oni postulos ke vi denuncu la kunularon kaj helpantojn...

– Mi preferos morti, ol diri ion ajn!...

– La hajduko estas kiel pafpreta pafilo!...

– Samkiel diris Olda Novako, „mi kapablas alkuri kaj forkuri, kaj en terura loko elteni!“

La hajdukoj aŭskultis ĉi tiun interparolon inter Stanko kaj la hajdukestro. Kaj, verdire, la senĝeno, la decidopleno, kaj finfine – Stanko estis ankaŭ fortstatura – ĉio ĉi ekplaĉis al la hajdukoj.

– Ĉu vi estas saltipova? – demandis la hajdukestro.

– Jes, mi estas – diris Stanko memfide. La hajdukestro montris altan ŝtipon proksime de si.

– Nu!– diris li.

– Ĉu senkure? – demandis Stanko.

– Ne, dumkure.

Stanko ekkuris. Kiam li alvenis al la ŝtipo, li kvazaŭ flugilojn ricevus...

– Ho! – ekkriis hajdukoj, kiu ĉion rigardis tre atente.

Stanko kuraĝiĝis. Fiera kiel falko, li ĉirkaŭrigardis, dironte:

– Mi povas ankaŭ senkure!

La hajdukoj kapneis. Stanko alpaŝis la ŝtipon. Li svingigis la brakojn du fojojn, kaj... jam estis sur la alia flanko...

La hajdukoj malfermis la buŝojn, kaj rondigis la okulojn. Se ili ne vidus tion propraokule, ili ne kredus. La ŝtipo estis tre alta.

– Zaverzano, Zaverzano! – aŭdiĝis de ĉiuj flankoj. – Li eĉ vin saltvenkis!

Junulo, malaltkreska, brustoŝvela, kun brilaj okuloj, tre vigla, kiun ĉiuj nomis Zaverzano, apartiĝis de la kunularo, kaj alpaŝis Stankon.

– Ĉu vi kapablas lukti? – demandis li. En liaj okuloj estis videble, ke lia fiero estas ofendita.

– Mi kapablas! – respondis Stanko.

– Venu!...

Ili kaptis unu la alin, kaj komencis lukti, sed Stanko faligis lin senĝene-senpene.

Ĉiuj miris kaj admiris, eĉ la hajdukestro.

Sed Zaverzano ekkoleris. Al li malplaĉis ke iu estas pli bona ol li.

– Vi faligis min, mi konfesas!... Tamen, se vi estas tia kapablulo, surgrimpu ĉi tiun arbuston!

Li montris al trunko rekta kiel sago, kaj tre alta. Ĝis la krono ĝi havis eĉ ne unu branĉeton.

Stanko alpaŝis la arbon, kraĉis sur la manplatojn, kaj komencis grimpi rapide kaj lerte kiel kato. Algrimpinte la kronon, li derompis branĉeton, metis ĝin inter la dentojn, kaj malleviĝis sur la teron...

La hajdukoj ankoraŭ pli admiris la kapablecon kaj lertecon de Stanko.

Ili ŝatis Zaverzanon pro lia lerteco, tial ili ekŝatis ankaŭ Stankon. Eĉ Zaverzano admiris lin...

– Bone – diris li kiam Stanko etendis al li la forrompitan branĉeton – ĉio ĉi estas bone... Tamen, kiom trafe vi celas per pafilo?

– Mi estis la plej bona paflertulo en Nigra Marĉo! – diris Stanko fiere.

– Nu, en Nigra Marĉo. Tie estas facile esti paflertulo; sed kiel vi pafos ĉi tie, en la monto!...

Stanko prenis sian pafilon, altiris ĝin, kaj alrigardis Zaverzanon.

– Mi povas trafi flugantan akcipitron!... Al kio pafi?...

– Depafu la sekbranĉon! – diris Zaverzano, montrante sekbranĉon sur la supro de laarbo kiun Stanko ĵus surgrimpis. – Sed mi volas ke vi trafu branĉobazon!

Stanko levis la pafilon.

Ekregis plensilento...

La pafilo ekŝrikis, kaj la sekbranĉo falis.La hajdukoj alsaltis lin.

– Jen, vere, li trafis ĝuste ĝian bazon!... Zaverzano ekrigardis, kaj etendis la manon al Stanko:

– He, hej, precizulo! Vi ĉion faris pli bone ol mi!...

La hajdukestro alpaŝis, kaj aprobe frapetis la ŝultron de Stanko. Liaj okuloj brilis kontente.

– Laŭ nia kutimo – diris li – mi devus demandi la kunularon: ĉu ili akceptas vin? Tamen, jen, mi ne demandos! Je la nomo de miaj tridek du kamaradoj mi diras: bonvenon!... Joĉjo!... Alportu panon kaj salon!

Joĉjo Ninkoviĉo saltis rapidkrure, enmanigis sakon, elprenis tutan panon kaj lignan salujon, transdononte ĉion al la hajdukestro. La hajdukestro elingigis ponardon, unue krucsignis la panon, kaj detranĉis panpecon. Per la dekstra mano li derompis peceton, trempis ĝin en salon, kaj transdonis al Stanko.

Stanko demetis la ĉapon, krucosignis kaj formanĝis la panpecon.

La hajdukestro enmanigis al li lignobotelon, kaj Stanko ektrinkis el ĝi.

– Nun ni interkisu! – diris la hajdukestro.

Ili interkisis ...

Post tio la hajdukoj komencis alpaŝadi kaj interkisi kun Stanko. Kiam ĉiuj interkisis, la hajdukestro ekkriis per solena voĉo:

– Stanko!... Vi estas nia!

La severaj hajdukaj vizaĝoj abrupte vigliĝis. Stanko nun vidis ke tio estas homoj samaj kiel li, homoj kiuj ŝercas, ridas kaj interparolas.

Tio al li ekplaĉis, kaj li komencis babili. Li sentis ke li estas inter amikoj.Ili ja plejparte estis liaj najbaroj: Nogiĉo el Sovljako, Ĉonjago el Ali-agaa Salaŝo, Latkoviĉo Jovano kaj Ninkoviĉo Joĉjo el Klenjo, Ilijo Zaverzano kaj Stanojlo Surepo el Glogovaco ktp, ktp.

Post interparolado komenciĝis ŝercado, kaj post ŝercado – ludado... Ĉi tiuj montaj lupoj ludis kiel infanoj, kiel malgrandaj katidoj. Iliaj severaj vizaĝoj iĝis serenaj kaj gajaj kiel ĉielo... Se iu ilin vidus nun, tiu povus ĵuri ke neniu el ili eĉ formikon elpelis el la mondo de vivuloj, kvankam ĉiu el ili mortigis ĝis tiam almenaŭ unu homon...

– Zaverzano, Zaverzano! – kriis Jovano.

– Kion vi volas, Plumpĉjo? – reagis Zaverzano.

Latkoviĉo havis grandajn kaj pendformajn orelojn.

– Ek, karulo, rakontu ion!

– Kion?
– Kion vi scias!
– Rakontu, Zaverzano, rakontu! – ektumultis hajdukoj de ĉiuj flankoj.
– Mi ne scias kion rakonti?
– Hi!... Vi ne scias!... Rakontu jam!
– Mi nenion povas rememori!... Jen Surepo, li rakontu! – diris Zaverzano.

Aŭdiĝis ridado, reeĥanta tra la tuta arbaro. Eĉ Surepo distiris la lipojn, ĉar li dum la tuta tago eĉ tri vortojn neniam elbuŝis...

La hajdukoj komencis denove insiste peti lin.

– Bone, mi rakontos! – diris Zaverzno. – Vivis iam gemaljunuloj, kaj ili havis malgrandan, malgrandetan infaneton...

– Kio poste okazis? – demandis Latkoviĉo.
– Nenio.
– Kiel nenio?
– Se la infano estus pli granda, ankaŭ la rakonto estus pli granda! – diris Zaverzano mallonge.
– Rakontu ja, ni petas! – insistis ĉiuj denove.
– Mi nenion saĝan povas rememori, kion mi faru!...
– Tiukaze kantu por ni!

Sammomente antaŭ li aperis guzlo.

– Je Dio, mi ne povas!...
– Tiukaze donu la guzlon al mi! – diris Stanko.
– Ĉu vi scipovas?
– Iomete.

Ili donis la guzlon al li. Li prenis la arĉon, streĉis la kordojn, alĝustigis la guzlokolon, kaj ekmuzikis tirsone...

Fingroj liaj facile flirtis sur kordoj... Sonoj tordiĝis, ektremis super iliaj kapoj. Tamen, kvankam malgaja, la sonoj ne estis animrompaj... Strangaj estas guzlaj sonoj! Ili estas kiel mortanta vundito, kiu agoniante petegas venĝi lin...

Stanko ekkantis. Li kantis pri Jankoviĉo Stojano kaj Gojena Alilo. Stojano skribas epistolon al Alilo:

Ho, Alilo Kladuŝa bastardo!
Vi aĉulo, ĉiefanfaronas
Ke vi venis al mia kastelo,
Mian Anĝan vi tie posedis!
Vi mensogas, fia senhtonulo,
En Kotoro vi neniam estis!
Kun vi tial mi volas dueli,
Por vin venki en kamp Petroviĉa,
Ĉe la fama Jablanaŝa templo,

Ĉe la frida akvo Mukiela,
Ni kornikojn per karno satigu,
Ni la teron per sango ruĝigu,
Ni duelu sub hela ĉielo,
De dimanĉo, ĝis fino de lundo,
Kaj post mardo vekrios patrino:
Patrin mia' aŭ patrino via!...

Ĝuste kiam li kante ekzaltis, ĝuste kiam vigliĝis la koroj hajdukaj, ĝuste kiam ĉiuj streĉis la orelojn – aŭdiĝis bojado...

La hajdukoj eksaltis. La guzlo eksilentis. Ĉiuj prenis siajn pafilon.

Zaverzano respondis boje.

La bojado reaŭdiĝis...

La hajdukestro mallevis la armilon kaj ekridetis.

– Sendube sciigo – diris li.

Ne pasis multe da tempo, kiam elpost arbusto aperis homo.

– Kamelo – diris Joĉjo. – Ĉu li havas novaĵon?

– Certe havas!... Kamelo neniam venas senkiale – diris Joĉjo.

Kamelo ĝentile salutis ilin.

– Kio okazis? – demandis la hajdukestro.

Kamelo nur fingrosignis. La hajdukestro leviĝis kaj alpaŝis lin...

Ili komencis flustri. La okuloj de la hajdukestro ekfulmis.

– Tiel, do.

– Tiel, Sreĉko.

– Bone. Adiaŭ!

Kamelo alpaŝis kaj detranĉis sovaĝan rebbranĉon, kiu volviĝis ĉirkaŭ arbo, kaj foriris malrapidpaŝe. Post li komenciĝis agitiĝo.

La hajdukestro alrigardis la kunularon. Ĉiuj rigardis al li scivoleme...

– Alvoku la gardistojn! – ordonis la hajdukestro. Zaverzano ekgrakis korve... La gardistoj tujtuje alvenis.

– Surepo, Stanko, Ilijo, Jovano, Joĉjo!... Vi iros kun mi... Kaj vi... Nogiĉo... Irigu la aliajn al Komusa Roko, atendu nin tie... Se ĝis morgaŭa tagmezo ni ne estos tie, serĉu nin vivajn aŭ mortajn! Adiaŭ!

– Adiaŭ, estro!...

– Adiaŭ!

La hajdukoj tuj foriris.

– Kien ni iros, estro? – demandis Zaverzano.

– Ni iros al Ĵuravo. Ek!

Ili ekiris ...

## 13. LA UNUA BATALO

La hajdukestro donis al Stanko sian sakon. Ili iris silente... Ĉiu enabismiĝis en proprajn pensojn.

– Al Ĵuravo, do – diris Joĉjo.

– Ĉu eble hodiaŭ okazos bataleto?

– Nu... povas esti.

– Ĉu kontraŭ komercistoj?

– Nu... kontraŭ ili estus facile!... Ĝi okazos kontraŭ bejo. Alveturos Sali-bejo kun eskorto.

– Kiom da ili estos?

– Kamelo diris, ne pli ol dudek.

– Tio estos granda predo... Kion vi opinias, Surepo?

Surepo nur levis la ŝultrojn.

– Hodiaŭ ni vidos kiom Stanko valoras! – dirinte tion, la hajdukestro alrigardis Stankon.

Stanko ekridis febre. Li volis ion diri, sed nur ekridetis... Kvankam li hajdukiĝis, kvankam li sciis ke kiel hajduko li devos verŝi sangon, tamen ĉio ĉi okazis subitege, abrupte... La kvieta, malimpeta, malsovaĝa spirito, kiu ĝis nun mutis en li, komencis barakti... .

Tamen, Stanko sufokis la emociojn. Li dronigis la pensojn, penante tute forgesi kio li iam estis. Stanko sentis honton, ĉar lia sulkiĝinta frunto povis vidigi al liaj novaj kunuloj kiom li timas. Li malvolonte ekridetis kaj diris:

– Ni vidos!

– Je Dio, vi estas bonŝanculo! – diris Zaverzano. – Mi, frato mia, devis atendi tutan monaton ĝis kiam aperis ebleco batali...

– Kaj mi – duonmonaton – diris Joĉjo.

Tiam ili komencis rakonti pri siaj unuaj bataloj. Ili interparolis kviete kaj indiferente, kvazaŭ parolus pri rikoltado aŭ pri sarkado en maizejo.

La brusto de Stanko ŝvelis. Li ne povis satspiri, tiel malvasta iĝis lia pulmo.

Tamen, li penis esti koncentrita kaj kvieta, tial li komencis mense interparoli kun si mem:

„Nu?“ – pensis li. „Ni ne luktos permane!... Mi pafos el arbusto!... Mi bone celos kaj faligos lin!... Celi homon estas same kiel celi leporon: celi, pafi – fal!... Mi ne scias, kial mi antaŭtremas!... La tremo malaperos. Gravas ke la unua interpafo finiĝu, poste estos facile... Bestiĝas la homo...“

La hajdukestro ĉesigis lian meditadon:

– Ni alvenis!

Li levis la kapon. Ĵuravo antaŭ ili tordiĝis kiel aspido; ĝi preskaŭ senakviĝis pro granda sekeco kaj varmego. Super ĝi troviĝis vojo... Ambaŭflanke densis brossimila arbaro..

– Nun ni dislokiĝu – diris la hajdukestro. – Ĉi tiu loko estas perfekta embuskejo... Jen kion ni faros!... Vi, Ilijo, vi staros tie. La turkoj unue pretepasos vin, sed vi atendu... Vi, Jovano, estos apud Ilijo... iomete pli fore... Vi, Surepo, estu tie, proksime de la etponto... Joĉjo, vi estos ĉi tie, kaj mi estos tie. Ni, la kvinopo, estos maldekstre de la vojo. Vi, Stanko, vi estos sola, dekstraflanke... jen la arbusto... tiel!... Kaj vi pafos la unua. Tuj kiam la turko troviĝos sur la ponto, vi pafu!... Se Stanko mistrafos, pafu vi, Surepo, vi lin ne mistrafos!...La turkoj tiam ekkuros antaŭen. Mi kaj Joĉjo renkontos kaj konfuzos ilin, tiam vi sturmu deposte... Se la turkoj komencos retrofuĝi, ilin surprizu vi, Jovano kaj Ilijo, tiam ni sturmos. Ĉu vi komprenis?

– Ni komprenis, ho estro!

– Ankoraŭ ion. Stanko, vi ankoraŭ ne konas la hajdukajn regulojn. Do, kiam vi jam vidos la turkon, kiam vi alcelos lin, vi ne pafu antaŭ ol vi ekkrios: halt!...Ĉu vi memorfiksis!...

– Jes, ho estro.

– Nun... ĉiuj iru sur sian lokon kaj... mutu!...

La hajdukoj dislokiĝis.

– Atentu!... Kiam mi ekkrios: „Sturm“, ĉiuj elzonigu la ponardojn, kaj kuregu sur la vojon!...

– Bone, estro!

Ekregis tomba silento. Stanko aŭskultis grilon apud si... Blankaj papilioj preterfugis tien kaj ĉi tien, falonte sur herbon, kiu verdis ĉe la akva elfluejo...

Ĉi tiu silento, ĉi tiu mistera ĉirpado kvazaŭ ensonĝigus lin. Antaŭ liaj okuloj mozaikis vidaĵoj... Li vidis teruran bildon, siajn konsternitajn gepatrojn, kaj homojn... la popon... la vilaĝestron tenanta la ruĝan saketon...

Tiam super la vidaĵoj aperis la ĉarmega bildo de belknabino... Jelica staris antaŭ li, kvazaŭ viva, fiera... Ŝi rigardas lin senĝene, libere. Tiuj rigardoj kvazaŭ dirus al li: mi kredas al vi!... vi estas honesta homo!... Kaj mi estos via, nur via!... Nur la tombo nin povas disigi, nenio alia.

Li fiksrigardis, gapis... animo lia fandiĝis kun ŝia animo...

Eksonis ĉevalstampfo... Levinte la kapon, li alrigardis... La stampfado estis pli kaj pli proksima; li eĉ aŭdis voĉojn, kvankam la vortojn li ne komprenis...

Subite aperis homo sur ĉevalo. La homo estis rufa, kaj la ĉevalo – ruanflava.

Vidinte rufan homon, Stanko tuj ekflagris. Se tiu havus cent vivojn, Stanko senigus lin de ĉiuj cent.

Li streĉis la ĉanon. Per ungo li ekfrotis silikŝtoneton.

La turko surpontiĝis.

– Halt! – ektondris Stanko.

Lia sonora voĉo eĥis tra la kverkarbejo.

Ektreminte, la turko alrigardis al la flanko de kiu aŭdiĝis la voĉo... Stanko pafis... Kiam la pafilo ektondris, la turko renversiĝis kiel tutplena sako...

Ekregis embaraso...La turkoj ĵetiĝis antaŭen... ... Unua... dua... tria... pafoj... eksonis la voĉo de la hajdukestro:

– Sturm!

Stanko surŝultrigis la pafilon, rapidmove elzonigis ambaŭ pistolojn, kaj ĵetiĝis sur la vojon...

Turko preterkuris lin. Post lia pafo la turko falis. Alia turko ĵetiĝis al li kun elingita ponardo. Stanko pafis ankaŭ al li, kaj la turko renversiĝis desur la ĉevalo... Li kliniĝis, prenis ties ponardon, sed subite kvazaŭ mallumo tegus liajn okuloj... Li vidis antaŭ si nur ombrojn, kiujn li atakadis... Sango lia ŝaŭmis, la karno brulis, muskoloj dancis pro forta fajro... dum li furie fulmis sur la vojo...

Kiu scias kie li haltus, se lin ne rekonsciigus la konata voĉo:

– Ne min!...

Li rekonis Joĉjon. Tiam la nebulo kvazaŭ malaperus desur liaj okuloj. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis siajn kamaradojn. La hajdukestro alpaŝis kaj kaptis lian manon.

– Brave, bravulo! – diris li premante lian manon. Turkoj kuŝis antaŭ li, kaj ĉirkaŭ li. Li alrigardis Zaverzanon super Sali-agao.

– Estro!... Estro!... Bonvolu veni ĉi tien, por vidi tion... Ho, Dio mia, tio estis vere vira – verege vira!... Mi petas, estro, venu vidi!... Se vi ne sciis, ke oni ankaŭ per pafilo povas buĉi, venu ĉi tien!... Venu vidi!

Kaj la hajdukestro, kaj la hajdukoj alpaŝis. La turko estis trafita ĝuste en la gorĝpomon, kiun la kartoĉo dispecigis, pro kio li ŝajnis kvazaŭ buĉita.

– Trafe! – diris la hajdukestro.

– Vire! – laŭdis Zaverzano.

– Mano via indas Konstantinopolon! – diris la silentema Surepo.

– Ĝi ja indas la turkan caron! – ekkriis Zaverzano.

– Ag! – ordonis la hajdukestro.

La hajdukoj alkuris la senvivajn turkojn, komencis ilin turnadi, prenadi monon kaj armilojn. Zaverzano senĉese parolis:

– Jen kiel oni devas celi!... Tamen ankaŭ ni bone batalis... – Atendu! Unu, du... tri... kvar... kvin... ses kaj du: ok, naŭ, dek!... Dek senvivaj turkoj!... Se ankaŭ morgaŭ estus dek, kaj postmorgaŭ dek, tio estus tridek!... Kaj post du jaroj ni liberigus la tutan Bosnion!... Oho!... ĉi tiu agao estis monabunda!... Rigardu la armilojn... purarĝenta fadeno!

– Tio apartenas al Stanko! – diris la hajdukestro. – Tio estu nia donaco al li por ĉi tiu unua batalo!...

– Juste! – diris Surepo.

– Li meritis! – diris Jovano kaj Joĉjo.

– Kiu per pafilo buĉas, tiu meritas tutan paŝaejon! – ekkriis ekzaltita Zaverzano.

– Ĉu vi pretas? – demandis la hajdukestro.

– Jes.

– Do, ek!

– Ĉu la turkojn ni lasos sur la vojo?... Ĉu ni ne forigos ilin? – demandis Joĉjo.

– Maljes! – diris Zaverzano. – Eble vi volas ke ni venigu ankaŭ popon por funebre preĝi!

Ĉiuj ekridis.

– Turkoj ilin forportos – diris la hajdukestro. – Por ni pli bone estos enarbariĝi kiel eble plej rapide.

Kaj ili tujtuje malaperis.

Super la batalejo komencis rondflugi rabobirdoj...

# 14. LA MALBENITA DOMO

Tempo rapidas, pasas belaj tagoj; al iuj ili ŝajnas nur momenteto, al iuj – eterno.

Plej multe tion sentas la gepatroj, ĉar iliaj koroj estas sentoplenaj. Speciale en malfrua aĝo, en la antaŭtomba aĝo, kiam oni ĉiumomente atendas la morton – se tiam sango onia, koro onia vagas tra kverkarbejoj, tremante pro ĉiu susuro, se oni eĉ esperi ne povas ke oni lin revidos – tio estas terura!...Tiam frostiĝas la cerbo, tiam sekiĝas la larmoj... Tiam eĉ la ostmedolo glaciiĝas!...

La povra Alekso!... La povra Petra!...

Ĉi tiuj nesklavigitaj gesklavoj, ĉi tiuj senkulpaj gekulpuloj, ĉi tiuj gemaljunuloj, kies grizan harplektaĵon oni abomenas, ĉi tiuj hontigitaj senpekaj gepekuloj– ĉiun matenon kaj ĉiun vesperon levadis siajn sulkabundajn, sekajn manojn al la ĉielo, preĝante.

Sed la ĉielo fermiĝis!...

Ili preĝis al Dio.

Sed Dio silentis... Eĉ esperon li ne donis al ili.

Ili turniĝis al la homoj.

Sed la homoj malestimis ilin. Malestimis la homoj „la ŝtelistan domon".
Ili nur alvokis malbenon al la domo...

Tamen, vivi oni devas!... Estus peko forpreni propran vivon; tion Dio neniam pardonas.

Tial ili vivis... Kiel?...

Nur koro ilia scias tion, nur animo ilia scias tion !... Tio ne estis dolĉa vivo, sed eternaj turmentoj... Eĉ la turmentado en infero ne povus esti pli terura: vivo ilia estis infero.

Kiel ĝi povus ne esti infero?... Ilia domo ĉiam estis malfermita kaj por hontinduloj, kaj por malbeluloj, en ilia domo ĉiam viglis dolĉa vivo, kanto, festeno; viroj kaj virinoj estis alpaŝantaj ilian sojlon kun respekto; ili estis irantaj al siaj najbaroj, kie ili estis akceptataj plenkore: absolute neniu malamis ilin, kaj ankaŭ ili neniun malamis... Festeno, ĝojo, malfesteno... unuvorte, ĉion ili estis dividantaj kun la homoj, kaj la homoj kun ili...

Sed kio nun okazis?

De la tago, kiam la malbenita saketo estis trovita malantaŭ ilia ĉevalejo en la sterkaĵo – de tiutago ĉiuj turnis al ili la dorsojn. La viroj estis evitantaj Alekson, la virinoj Petran; fakte la homoj ilin ne nur evitis, sed malestimis. Ĉiuj penis ne transiri ilian sojlon – eĉ la hundoj. Neniu plu volis saluti ilin, menciante la nomon de Dio. La bona maljunulo, oĉjo Simo, alvokisto, ankaŭ li, preterirante Alekson, forklinadis la kapon, ŝajnigis ne vidi lin!...

Foje Simo estis preterpasanta ilian domon. Alekso estis en la korto. Ekvidinte Simon, li ekkriis. Sed Simo ŝajnigis sin surda.

– Simo!... Estro!... Simo klinis la kapon, forirante. Alekso ekkriis ankoraŭ pli laŭte.

Simo ŝajnigis tusadon. Tamen, Alekso ne volis cedi. Li senĉese kriis...

– Simo!... Simo!... Simo finfine haltis.

– Do, jen, mi perdos la voĉon alvokante vin!...

– Nu... oni jam malbone aŭdas!... Maljunaĝo! – diris Simo, kaŝante la okulojn...

– Venu, eniru iomete!...

– Je Dio, mi estas tempomanka...

– Ĝis la morto restis multa tempo – provis la povra Alekso ŝerci.

– Nu!... jen... la vilaĝestro irigis min al la popo...

– Tamen, la domo de la popo domo ne troviĝas tiudirekte...

La povra Simo komencis ĵetadi rigardon ĉiudirekten. Estis videble ke li mensogas...

– Unue... nu... mi volis viziti Ljubinkon...

– Bone, bone! – diris Alekso. – Estas klare, ke ĉiuj fuĝas de mia domo!... Iru, Simo, iru!...

Simo eĉ ne scipovis kaŝi sian ĝojon ke li tiel facile liberiĝis de Alekso – li tuj forkuris.

Alekso klinis la kapon, kaj restis stari stupore!...

Poste li alpaŝis manĝotablon, falsidiĝis apud ĝin, kaj kovris la kapon per la manoj. Nigraj pensoj estis ŝirantaj lian animon. Ĉiufoje kiam li rigardis ien, antaŭ li faŭkis malamo kaj malestimo... Eĉ ne unu homo kompatis lin; oni eĉ aŭdi lin ne volis!... Li ja senkulpigus sin. Li ja pruvus ke lia Stanko ne kulpas, almenaŭ ke ne kulpis ĝis la momento, kiam li foriris en la monton...

La suno estis malrapide malleviĝanta... Li leviĝis kaj eniris la domon... Petra kaj bofilinoj estis starantaj apud la fajrejo. La filoj, Stanojo kaj Petro, ion manlaboris en la korto, dum infanetoj, kiuj ne povis kompreni ĉi tiujn egajn turmentojn, estis ludantaj en la ĉambro...

Li proksimiĝis al la fajrejo, prenis ŝtipon, kaj sidiĝis sur sian lokon. Kapo lia bolis pote...

Ekregis silento, la interparolo mortis, nur infanoj ankoraŭ aŭdeblis...

Li silentis, pesante siajn nigrajn pensojn... Jam noktiĝis...

Levinte la kapon, li diris:

– Vespermanĝu, infanoj.

– Ĉu vi ne manĝos, paĉjo! – demandis la bofilino Manjo.

– ... Kion? Jes, jes!... Ni preĝu al Dio, post tio vi manĝmetu.

La maljunulo leviĝis, bruligis kandeleton, kaj komencis preĝi:

– Ho Sinjoro!... Ĉu vi vidas mian malfeliĉon?... Kompatu, ho Sinjoro, la sklavojn kiuj restos post mi, se mi senkonscie ion pekis kontraŭ vi!...

Larmoj lavis lin dum li flustris...

Ili sidiĝis ĉe la rondotablon. Tamen, ĉiuj estis sidiĝantaj pli pro kutimo, ol pro deziro. Dekiam Stanko foriris, neniu kun ĝojo manĝis ion ajn. Alekso kaj Petra manĝis pro ili. Malĝojo ĉirkaŭvolvis la domon kiel aŭtuna nebulo...

Post vespermanĝo ĉiuj foriris enlitiĝi, nur la du maljunaj gemortontoj restis ĉe la fajrejo. Ili ne deziris enlitiĝi. La sonĝo ne plu estis amiko de iliaj maljunaj palpebroj...

Longe ili silentis. Ekstere brizis venteto, kirlante forfalintajn foliojn sur la korto, dum la flamo sur la fajrejo estis estingiĝanta.

– Karulo mia!... Kie vi estas nun? – elĝemis Petra... Ekstere ventas, vi ja eĉ bonan kovrilon ne havas!...

– Silentu, Petra! – diris Alekso.

– Sufiĉe mi silentis!... Koro mia jam ŝtoniĝis!... Ĉu mi povas ne pensi pri mia infano, pri mia koro? Ĉu vi povas tion malpermesi al mi?

– Ne, certe ne...

– Eĉ ne ŝercu pri tio!... Kvindek jarojn mi estas via kunulino. Mi vin obeadis, mi estis via ombro!... Sed nun, se vi malpermesos al mi mencii mian idon – mi kontraŭstaros... mi ne obeos!... Li estas ĉio kion mi havas!... Dio donis al mi ankaŭ aliajn infanojn – vivaj kaj sanaj ili estu! – sed li apartigis Stankon de mi!... Jen, li, la milda, la bona, li nun vagas tra arbaro... li batalas ĉe iu arbusto!... Kiel mi ne ploru!... Mi forploros ambaŭ miajn okulojn!...

Alekso silentis. En la profundo de sia animo ankau li sentis tiun doloron...

– Mi ja scias ke li ne estas ŝtelisto!... Ne estas! Se li prenus unumuran fremdan pajleron, mi forhakigus mian kapon!...

– Tamen, kio do okazis? – elbuŝis Alekso.

– Kio?... kio?... Ekzistas ja malbonuloj?... Ĉu oni ne povis kaŝmeti la monon tien?

– Jes, sed, ve al ni!... Nia domo estas malbenita!... Ĝin abomenas kaj pli bonaj kaj malpli bonaj ol ni!...Eĉ Simo... Simo forkuras de mia domo!... Plorige... Io premis mian gorĝon, mi povas nek morti, nek vivi!...

Ili ambaŭ denove klinis la kapojn...

Larmoj gutis, gutadis – kaj ĉesis. Sekaj, senmovajokuloj rigardis malvarmajn cindrerojn en la fajrejo... Ekstere jam komenciĝis antaŭtago.

Pasis tri malĝojaj kaj malgajaj monatoj. Por Alekso ĉiu tago estis tute sama kiel la antaŭa... Preskaŭ malnormaliĝinta pro malĝojo, li ne plu alparoladis homojn. Li ne iris partopreni renkontiĝojn, ne iris en preĝejon; li evitadis eĉ malgrandajn infanojn.

Jam aŭtuniĝis. La aŭtuno pluvetis... Infano de lia bofilino Manjo malsaniĝis. Tio estis lia la plej juna nepo, hejma dorlotato.

Ili tagnoktis super la infana kuŝejo. La infano en febro deliris nekompreneble. Tri tagnoktojn nek Alekso nek Petra foriĝis de lia kuŝejo. La kvaran matenon la sano de la infano abrupte malboniĝis. Li apenaŭ spiris, kiel museto.

– Ni alvoku la popon ke li legu preĝon – diris Petra.

– Ni alvoku, ni alvoku!... Atendu!... Mi iros!...

Li surŝultrigis kovrilon, kaj direktiĝis al la domo de la popo... La popon li trovis antaŭ la domo, kaj ĝentile salutis ilin.

– Benu, ho patro! – diris li, kaj laŭ kutimo, kliniĝis kisocele al lia mano.

La popo detiris la manon.

– Dio vin benu! Kion vi volas?

La gorĝo de Alekso kunpremuĝis. Li komencis singulti.

– Patro!... nepeto mia malsanas... Nu... tial mi alvenis, por voki vin fari preĝon...

Li apenaŭ elparolis tiujn vortojn... Li misglutis.

– Bone, mi alvenos! – diris la popo seke. Alekso forturniĝis de la popo, kiu eĉ ne haltigis lin, deprimitan, frakasitan, ruinigitan.

Tamen, ĉu ankaŭ la popo?... Ĉu la bona popo Milojo, ĉu ankaŭ li ekmalamis min?... Ĉu ankaŭ lia frunto paŭtas kiam li vidas min?... Ĉu ankaŭ por li estas ĝena mia mio?... Ho, Kreinto kompatema! Vi konas animon mian, vi scias ke mi nenion kulpis!... Kial do vi ĉi tiel turmentas min, ho Sinjoro?... Kial vi ne faras ke ĉesu ĉi tiu mia tombinda vivo?...

Ne pasis multe da tempo, kaj la popo alvenis. Li transpaŝis la sojlon, kaj ĝentile salutis ilin.

– Kiu bezonas la preĝon? – demandis li.

– Jen, en la ĉambro... infano...

La popo eniras ĉambron, demetis la ĉapon, surmetis epitrahelion, komencis fari preĝon...

Dum la preĝo kaj al Alekso, kaj al Petra ekŝajnis ke Sinjoro indulgis ilin. Iliaj varmaj larmoj fluis ĝis la gorĝo, de kie ili, kiel grandaj pluvgutoj, rosumis iliajn vestojn. Al ili ekŝajnis ke ili vidis la vizaĝon de Sinjoro, ke tiu vizaĝoridetis al la infaneto... Ankaŭ la vizaĝo de la infano transformiĝis: sur ĝi la profindaĝuloj vidis signojn de dolĉa vivo, vidis ke Sinjoro forpelas ĝian malsanegon...

La popo eksilentis, etendis la krucon al la infano, kaj kiam la infano ĝin kisis, li demetis la epitrahelion, kaj surkapigis la ĉapon.

Alekso etendis la manon al saketo, kaj elprenis oran dukaton:

– Patro, mi pagu.

Li prezentis la dukaton al lapopo. La popo alrigardis la monon.

– Ĉu tio estis dukato? – diris li.

– Jes.

– La preĝo kostas unu arĝentaĵon.

– Tamen, mi donas al vi dukaton... Via preĝo helpos al li!

– Dio helpos al li! – diris la popo serioze.

– Prenu, ho popo, dankosigne!

La popo kapneis.

– Mi ne havas monerojn– diris malgaje Alekso. La popo redonis al li apunton.

– Mi ne volas ŝuldi al vi – diris la popo.

Alekson glaciigis ĉi tiu senanima parolo, ĉi tiu senemocia rigardo... Tamen, li streĉis sian kompletan forton...

– Sidiĝu, patro!... Alportu, bofilino, iom da brando...

Lia vorto estingiĝis sur la lipoj pro rigardo de la popo.

– Mi ne volas – diris la popo.

La popo elris kaj foriris, eĉ ne turniĝinte...

Alekso restis kiel senmova ŝtono. Li jam povis nek paroli, nek pensi. Tiu tondro detruis kaj diserigis lian forton, frakasis ĉiun lian nervon...

Ili forlasis la malsanulon... En la kapon de Alekso komencis venadi frenezaj pensoj...

Li eliris kaj komencis vagi tra fruktobosko... Lian nigran animon jam neniu povis serenigi.

La fruktarbojn preteriris Ivano... Li ĝin preteriris kiel serboj preteriras la tombejon de turkoj! Estis klare ke Ivano vidis lin; du fojojn Ivano atente alrigardis lin... sed kiam ili estis unu apud la alia, Ivano forturnis la kapon...

Alekso nenion diris al li. Li rigardis malantaŭ Ivanon per rigida rigardo. Kiam Ivano iĝis nevidebla, Alekso ankoraŭ rigardis al la flanko, kien Ivano foriris.

Li rigardis longe, longege... Nebulo jam kovris liajn okulojn, kiam lin surprizis la alvokisto Simo.

– Alekso! – diris li. – La vilaĝestro diris, ke vi alvenu la juĝejon.

– Kial li alvokas min?

– Mi ne scias.Vi ekscios kiam vi alvenos.

Al Alekso ekŝajnis ke Simo lin rigardas per stranga rigardo, kiu sendube signifis: povrulo, mi kompategas vin!...

Alekso pretiĝis kaj foriris en la juĝejon. Kiam li alvenis tien, li vidis ke homoj jam estis kolektiĝintaj. Li ĝentile salutis lin.

– Kion vi faras?

La homoj silentis.

Li turniĝis, vidis malserenajn rigardojn, kaj foriris en angulon...

La tago estis sensuna. Nuboj tavoliĝis, ne leviĝante jam kelkajn tagojn.

La homoj subite ekstaris. Lirla flustro aŭdiĝis. La popo kaj vilaĝestro aperis sur altano.

– Fratoj miaj! – ekparolis la vilaĝestro. – Ĉu al ni denove estas destinite ke ni kompromitiĝu... Denove okazis ŝtelo...

Lirla flustro reaŭdiĝis. Ĉiuj okuloj turniĝis al Alekso, kiu klinis la kapon silentante.

– Jes, fratoj miaj!... Denove oni priŝtelis Ivanon. Ĉi-nokte oni forportis lian porkidon... Kio okazas?... Ĉu vi deziras ke mi forlasu Nigran Marĉon?... Tro longe mi estris, mi ne devas tion fari plu!... Ho!... Jen, mi redonas la regbastonon, donu ĝin al tiu, al kiu vi deziras!

La vilaĝestro forĵetis la bastonon.

Ĉiuj ariĝis ĉirkaŭ li... Ili komencis lin peti, petegi.

– Mi ne volas!... Mi ne volas! Elektu kiun vi volas!

– Ni volas vin!

– Sed mi ne volas!... Ĉu en mia grizaĝo vi tiel ofendu min?

– Ni kaptos la ŝteliston!

– Ni kaptis lin – diris Marinko Marinkoviĉo. Ĉu vi volas ke mi per la fingro montru lin?... Jen.

Marinko subite renversiĝis kiel forhakita trunko.

Sango torentis en la kapon de Alekso. Li ne konsciis kion faris. Tamen, vidinte Marinkon sur la tero, Alekso genupremis lian bruston, kaj eligis la ponardon… buĉonte lin.

Alkurinte, homoj forprenis la ponardon...

– Krimulo!... Hajduko!...

Alekso eĉ ne unu vorton povis elparoli... Io kunpremis lian gorĝon...

– Jen, frato miaj! – ekkantis Marinko. – Mi senkulpa preskaŭ pereis!... Ĉu mi pereu, ĉar mi parolos la veron?...

– Krimulo!... Krimulo? – ektondris de ĉiuj flankoj al Alekso.

Tio rekonsciigis lin... Ĉar la homoj ekimpetis al li, li ĵetiĝis, libere, kiel leono, trapuŝiĝis inter ili, kaj haltis antaŭ la altano.

– Krucumu min! – diris li, kaj disetendis la manojn. – Krucumu min!

Li rigarde hakis ilin... Terura rigardo ekfulmis sub liaj grizaj brovoj...

La homoj haltis...

– Krucumu min! – tondris li. – Hontu, ho grizharuloj! Vi kondamnas homon, eĉ ne aŭdinte lin!... Hontu, ho grizahara pastro!... Ĉu oni kondamnas tiel, senargumente?... Ĉu vi volas mortigi min?... Jen! Ho!... Ducent jaroj pasis dekiam miaj prauloj faris fundamenton de la domo, kiun vi malbenis!... Kaj dum ducent jaroj eĉ ombro de honto ne falis sur nian tegmenton... kio nun okazas?... Kion vi volas?... Mortigu min!...

Neniu ekmoviĝis.

Tiam li, eĉ ne sciante kion faras, forturniĝis de ili.

Ili restis. Eĉ ne unu vorton ili diris. La profundaĝuloj moroze profundiĝis en siajn pensojn. Vere, la domo de Aleksiĉo estis la plej malnova en Nigra Marĉo.

Dume Alekso ventrapide endomiĝis. Alveninte, li falsidiĝis ĉe la fajrejo. Tie li sidis ĝis plena mallumiĝo, sensona kaj senmova.

Tiam li subite turniĝis kaj ekkriis la nomon de la bofilino Manjo.

– Kial vi vokas, ho paĉjo?

– Malplektu mian harplektaĵon!

Ĉiuj kvazaŭ ŝtoniĝus. Petra alpaŝis lin.

– Maljunulo!

Li alrigardis ŝin per sangsimilaj okuloj, sed diris per ŝajnkvieta voĉo:

– Iru, avinjo, alportu la ĉibukon desur la hokpendigilo...

La maljunulo tiun veteron malplektigis la hararon kaj reekfumis...

# LA DUA PARTO:
# VENĜANTO

# 1. ARANEO

Ekstere pluvetis, dumvento malgaje veis tra senfoliaj branĉoj... Dume mallumego inferis. Dum tia nokto eĉ hajdukoj ne paŝas; neniu, kiun malbono ne pelas, forlasas sian tegmenton; eĉ la hundo serĉas ian ajn rifuĝejon, silentas tie, senvoĉas...

Nur unu homo pasumis tra senlumejo. Piedoj liaj glitis sur kota tero, li stumblis kaj faletis, sed hastis por plenumi la ordonon de sia mastro.

Tio estis Marinko. Li rapidis, por plenumi la deziron de Piro, kiu lin jam atendegis en sia ejo.

– Kie vi estas, homo mia! – Ekkriis li, tuj kiam Marinko transpaŝis la sojlon. – Kie vi estas?... Mi atendas vin, jen, jam du horojn...

– Jen mi, kara agao... Mi iomete malfruis – respondis Marinko, ridetante kaj forigante per bastono koton desur la opankoj.

– Ĉu estas malvarme?...

– Ne estas!... Mi ŝvitas, ĉar mi hastis.

– Sidiĝu.

Marinko, laŭ kutimo, sidiĝis sur seĝon tre atente.

– Ĉu la vetero estas malbela? – demandis la turko.

– Malbela. Kiel oni diras, pluvas kaj arboj, kaj ŝtonoj. La mallumego densas. Se iu vangofrapus min, mi ne povus refrapi!... Tie regas absoluta mallumo!...

– Ĉu vi volas tabakon?

La turko demandis pli pro kutimo, ĉar li sciis ke Marinko ĉiutempe deziras tabakon.

Marinko distiris la vizaĝon, kaj ekpalpis sian zonon, serĉante pipon.

Kiam ili ekfumis, la turko alproksimiĝis al li:

– Nu, Maĉjo, ŝajnas ke tiu hundaĉo hodiaŭ volis buĉi vin?

Marinko mansvingis.

– Negrave! Kiam li premis mian gorĝon, mi pensis ke ambaŭ miaj okuloj elsaltos. Li estas forta kiel la morto!... Tamen, hodiaŭ ni ne sukcesis. Li, la

ĉagrenulo, turniĝis al la homoj kaj komencis elokventi... He, ĝuste tiel estis, kara agao; se tio ne estus via volo, ankaŭ mi ekplorus!

– Kion faris la homoj?

– Ili ja komencis malĝoji!... Ili kompatis lin, ĉar li estis ĉi tie inter la unuaj. Mi ja vidis, ke kaj la popo kaj la vilaĝestro forturnis la kapojn por kaŝi larmojn. Tiam Ŝokĉaniĉo, apud mi, diris al Popoviĉo: „Vere, ni pekis, ni ofendis senkulpan kaj senkriman homon!“

– Ha-ha-ha-ha! – ridis la turko. – Kion faris Ivano?

– Li estis kiel pafpreta pafilo!... Li faras, kion oni ordonas...

La turko iomete enpensiĝis.

– Ŝajnas al mi – diris li post mallonga silentado. – ke estus bone nun subteni Alekson. Li estas moroza, malgaja. Eble estus bone, ke mi vizitu lian domon, por lin konsoli, por interparoli kun li?...

– Ne faru tion, agao! Vi ne konas lin. Abomeninda li estas! Pli facile estus vortigi ŝtonon ol lin!... Pli bone estos daŭre subteni Ivanon. Li estas homo respektata kaj estimata. Lazaro iĝis via ombro. Li pretas fordoni la vivon por vi. Ivano ja estas lia patro, la patro amas sian infanon, li ĉion faros por la filo...

La turko leviĝis kaj komencis pensodrone paŝi tra la ejo. Abrupte li haltis kaj turniĝis al Marinko.

– Ĉu vi scias kion mi volas? – diris li.

– Mi scias, kara agao...

– Nu, bone! Diru al mi vian planon!...

– He, jen Nigra Marĉo! Mi konas ĝin kiel propran domon! Kaj la vilaĝestro kaj la popo, ili ĉiuj estas unu animo. Nur mi apartiĝis. Mia animo amis nur vin, la turkojn, pro tio min ĉiuj malamas. Kiam duopo interparolis, kaj vidas ke mi alpaŝas, ili eksilentas. Ili nomias min: flataĉulo, degenerinto, ekskrementulo, turko, kaj... nur Dio scias ĉiujn nomojn per kiuj ili nomis min! Tio min tre suferigis! Se mi volas ion ekscii, nur virinoj kaj infanoj povas helpi min...

La turko komencis malpacienci. Li mansvingis, kaj interrompis lin:

Bone, bone!... Ne rakontu! Mi deziras scii, kia nun estas la situacio. Vian planon!... Diru vian planon!...

– Nun?... bone! De la tago kiam mi priklaĉis Stankon, kiam estis trovita la saketo kiun mi kun Lazaro enfosis, de tiu tago ĉio okazas en la plej dezirinda maniero: ĉiuj malestimas la domon de Alekso.

– Do, ĉu ne estos bone, ke mi al Alekso...

– Ne estos.

– Kial?

– Unue, samkiel mi diris, tio estos senutila, due, homoj jam malsimpatias lin. Se vi lin alvokos, ili komplete malsimaptios lin.

– Mi ja ĝuste tion volas! – diris La turko.

– Tio ne estos bone!

– Kial ne estos?!

– Ne estos! Ne estos! Subtenu Ivanon plue. Al li vi iru, lin vi alvokadu. La unua, kiu eksuspektos lin, estos la popo. Altironte la vilaĝestron kaj ankoraŭ iujn, li komencos agi kontraŭ Ivano. Tamen, ankaŭ Ivano ne estas seninflua, ankaŭ li havas siajn adeptojn... Venos la tago, kiam vi vidos ke Nigra Marĉo disŝiriĝos, unu grupon gvidos la popo, kaj la alian – Ivano. La popo diros al Ivano ke li estas turka flataĉulo, kaj Ivano al la popo – ke li estas helpanto de ŝtelisto.

La koro de la turko ekdancis pro ĝojo. Li jam vidis tiun vivan, realan bildon antaŭ siaj okuloj. La turko ĉirkaŭbrakis Marinkon.

– Mi gratulegas, ruzulo! Vi parolas tre inteligente, kun tia saĝo vi povus paŝai!...

Marinko kisis lian baskon kaj manon.

– Dankon, kara agao! Viajn vortojn mi ŝatas pli ol nenombreblan trezoron. Tamen...

– Kion? Kion vi deziras?... Petu!...

– Mi nenion deziras, sed mi ankoraŭ ne ĉion diris al vi.

– Parolu! – diris la turko.

– Lazaro volas edziĝi.

– Mi scias.

– Kun la filino de Seviĉo.

– Ankaŭ tion mi scias.

– Tiu knabino devas edziniĝi al li!

– Tamen, vi diris al mi ke Lazaro kaj Stanko ĝuste pro ŝi malamikiĝis, ke la kialo estas ke ŝi amas Stankon.

– Nu?

– Ĉu ŝi volos edziniĝi al Lazaro?

– Ĉu oni ŝin demandos? Ĉu oni demandas mortinton ĉu li volas iri en tombejon? Ni devas aranĝi, ke ili geedziĝu! – diris Marinko.

– Sed kial ili devas geedziĝi?

– Ili devas! Ivano jam estas via, tiam ankaŭ Seviĉo estos via. Tio jam estas du potencaj homoj en Nigra Marĉo!... Pli valoros du, ol nur unu. Cetere, Lazaro jam estas via sklavo. Kion vi volas tion li faros; Lazaro ja estas bona hundo, indas esti lia mastro!...

La turko rondigis la okulojn, streĉe rigardante Marinkon.

Marinko dume daŭrigis:

– Jen, tia estas la plano... Ivano kuntiros Popoviĉojn, Seviĉo Beliĉojn, Beliĉoj Ŝokĉaniĉojn... Kaj jen: pli ol duono de Nigra Marĉo estos via... Tiam vi juĝos laŭ propra volo! Vi estos kaj Dio kaj caro!...

– Marinko! Frato mia !... Ho homo!... Diru kion vi deziras!...

– Mi nenion petas, nur vian fratecon! Mi ja deziras, ke la turkoj min konu kaj salutu!...

– Ĉion, kion vi volas Suljo faros por vi!

– Dankon al vi! Tamen... mia plano ankoraŭ ne estas finita!

– Kion vi ankoraŭ intencas?!...

– Kion mi intencas! Multon mi intencas depost la tago kiam mi vidis vin tiel psiksuferan!...Se mi povus... se mi povus...

Io eksusuris sub la fenestro... Kiel se iu ektusus...

Marinko paliĝis, la vorto frostiĝis en lia gorĝo. Ankaŭ Piro staris konsternita, sed li rapide rekonsciiĝis kaj impetis al la pordo.

– Meĉjo! Aso! Ibro!... Rapidu eksteren! Vidu kiu estas tie!...

La knaboj elkuris en mallumon.

Sed la mallumo estis kiel pasto.Ili ĉirkaŭiris la tranoktejon – neniu estis tie.

– Daŭrigu! Daŭrigu! – kriis la turko. – Iu estas tie! Serĉu! Serĉu!

La knaboj pasumis tra senlumejo, sed aŭdiĝis nenio krom vento.

– Ĉu neniu estas tie?

– Neniu! – diris ili.

Piro revenis en la ejon, tirante Marinkon post si. Li volis daŭrigi la komencitan interparolon, volis ankoraŭ delekti la ĝuon, kiu ĉirkaŭpremis lin dum Marinko rakontis, sed – vane! Ĉio estis for, ĉio krevis kiel sapveziko... Al li ŝajnis ke nekonato staras malantaŭ lia dorso... li vidis ties ombron...

Tamen, la interparolo renoviĝis.Sed ĝi nun estis senemocia. Marinko estis pala kiel malvivulo, li parolis timoplene, rigardegis al la fenestro...

– Ne timu, ho homo!

– Mi ne timas!

– Vi ja vidis, neniu estas tie. Nu... kion vi estis dironta?... Kial vi ekkriis: „se mi povus!“

Marinko lin alrigardis per longa, signifoplena rigardo.

– Alifoje, kara agao, alifoje!

– Mi ja volas nun!

– Ne nun! Pli bone alifoje!

– Tamen diru: kiun vi ankoraŭ intencas malamikigi?... Kial vi ektimis? Meĉjo! Alportu tuj al Marinko iom da brando, por ke al la homo revenu lia forto! Jen, fumu!

Bruliginte la pipon, Marinko sorbtrinkis iom da brando.

– Trinku!

– Ne plu, sufiĉas.

– Ne sufiĉas! Trinku, homo!

– Mi ne povas plu!... Sed se vi demandas, mi diros! Al mi ŝajnas, ke ni povos malamikigi la popon kaj la vilaĝestron!

– Kiel?!

– Ne demandu plu! Mi diros nur ĉi tion: mi faros kion vi deziras! Mi certe ne ridindiĝos, eĉ se mi perdos la kapon!... Al mi estas grave, ke vi kredas al mi! Por mi pli grava estas amo via, ol la amo de mia propra filo!...

– Tamen, kiamaniere vi faros tion?

– Se mi diras, ke mi tion faros – tio signifas ke mi faros! Ne zorgu! Mi malamikigos ilin, samkiel vi malamikigis...

Denove io eksusuris. Aŭdiĝis ankaŭ homa piedbruo...

La turko elflugis. Elkuris ankaŭ ĝendarmoj. Ili kuris, pasumis, enrigardis ĉiun flankaĵon – neniu estis tie! La turko insultis, kriis, minacis per ĉiuj sorĉaĵoj.Marinko silentis kun la kapo klinita.

Tiam li leviĝis.

– Kien vi iras? – demandis la turko.

– Hejmen.

– Ĉu tra la senlumejo?

– Mi devas. Se oni vidos min kun vi, ĉio fiaskos. Ni maldevas plu ĉi tiel afable interparoli. Male, vi skoldu min antaŭ la kamparanoj, ili aŭdu tion!... Do nun: bonan nokton?

– Bonan nokton! – diris la turko, revenonte en la ejon...

Marinko per hastaj paŝoj rapidis hejmen.

Li estis malaperanta en arbaron, kiam malantaŭ trunko, proksime de la tranoktejo, leviĝis homo. Manminace, la homo diris:

– El via araneaĵo, ho tarantulo, ni plektos por vi ŝnuron! Iru, iru!...

La homo estis Kamelo.

## 2. JELICA

Ni admiras la homojn el tiu epoko. Al ni ŝajnas malebla tio, kion ili faris. La komenco de ĉi tiu jarcento aperigis kolosojn, kiuj vivas nur en rakontoj... Tiuj homoj miraklojn faradis. Forto, spirito, trovemeco – ilia agado estis konkreta kaj impeta. Foliumu la mondan historion, tiajn homojn vi ne trovos – se vi ne konsideros la mitologion. Eĉ la lingvo kiun ili uzis estis alia. Ĉiu ilia vorto estis proverbo. Nuntempe eĉ ne unu sciencisto parolas tiel, kiel tiam parolis ordinara kamplaboristo. Duonanalfabeta popo iĝis diplomato, ordinara kamplaboristo iĝis vojevodo, brutnegocisteto iĝis geniulo! Kvankam eĉ ne unu el ili krom sian naskolokon vidis pli ol du-tri vilaĝojn!...

Ankaŭ tiuepokaj virinoj estis tute aliaj. Ili ne similis al la patrinoj kaj fratinetoj el antaŭaj epokoj. La tuta generacio kvazaŭ el la ĉielo falus sur la teron. Se iu dezirus trovi kiu edukis tiun generacion – li vane penegus!... Nek antaŭ, nek post tiu epoko oni povas trovi similajn ekzemplojn...

Miraklojn estis farantaj tiuj virinoj! Krom siajn hejmajn laborojn, ili plenumadis ankaŭ ĉiujn virajn laborojn. Ne estis mirige vidi virinon sur batalejo, turnanta mortintojn kaj vunditojn, trinkiganta kaj manĝiganta ilin ... El tiu epoko ekzistas ne nur unu popolrakonto pri inoj kiuj batas turkojn! Jen unu el multaj:

Abruptis turko en la domon de popo Teŝo el Badovinaco. Hejme estis neniu krom la popedzino. La turko estis tro impertinenta, oni ne povis rigardi tion indiferente. Alveninte, li sidiĝis ĉe la fajrejo kaj komencis froti la manojn:

– Ek, ino, faru maizkaĉon! – diris li. Ŝi estis iom kolera, tial ŝi nur alrigardis lin maleme.

– Faru maizkaĉon jam! – ekkriegis li, svingis rajdistan trioblan skurĝon, kaj ekbatis ŝin.

Eksplodis la ino kiel pulvo, fulmigis la okulojn, alkuris la turkon, kaj per ligna pistilo, per kiu ŝi estis ĝis tiam pistanta ajlon – trafis lian verton...La turko renversiĝis. El la enrompita kapo ŝprucissango kaj cerbo. Ŝi alrigardis la sangokovritan pistilon, kaj ĵetis ĝin for.

– Vi malpurigis mian pistilon, hundaĉo turka! – diris ŝi senemocie, kaj foriris plenumi aliajn laborojn...

Tiun rakonton mi menciis kiel ekzemplon de tio, pri kio mi parolas – nun mi daŭrigos mian historion!

Ankaŭ Jelica estis ido de sia epoko. Senruza, sincera, fidela kaj sindona. Ŝi amis Stankon per la granda kaj sankta amo kiu, eĉ post entombiĝo, floras flore,saturante la universon per sia bonodoro...

Ju pli oni mallaŭdis Stankon en ŝia domo, des pli ŝi amis lin. Li estis en ĉiu ŝia penso. Izoliĝinte de ĉiuj, ŝi interparolis kun li kaj tage kaj nokte. Ŝi sciis ke Stanko ne kulpas. Nur ŝi kredis ke li ne kapablus fari la aĉaĵon, pri kiu oni lin kalumniis.

Foje eĉ okazis, ke ŝi provis defendi lin antaŭ la patrino. La patrino konsterniĝis aŭdinte ŝiajn vortojn.

– Kion vi diris, misfeliĉulino?!

– Mi diris: li ne kulpas!

– De kie vi scias tion?

– Mi scias!

– Ĉu vi estas pli saĝa ol via patro kaj ĉiuj aliaj homoj?

– Mi ne estas pli saĝa. Tamen, panjo, estas peko kulpigi senkulpulon!

– Li ja kulpas! Oni ja trovis la saketon kun mono en lia sterkaĵo!

– Tamen, la saketon povis tien iu alia enfosi!

– Nu, kiu povus tian pekon fari?

– Mi scias kiu, panjo.

– Kiu do?

Ŝia vizaĝo iĝis flamruĝa. Al ŝi estus pli facile morti, ol elparoli la nomon de Lazaro. De la tago kiam ŝi adiaŭis Stankon, ŝi malamis Lazaron tiom, kiom Stankon ŝi amis.

– Tiu, kiu sciigis pri tio.

– Ĉu Lazaro?!

Ŝi kapjesis.

– Ho, infano mia!... Kia sensencaĵo!... Krucsignu ...

Jelica mallevis la kapon.Ŝin mirigis propra kuraĝo. Ŝi pensis, ke ŝi tion neniam aŭdacos elbuŝigi, sed jen – ŝi elbuŝigis...

La patrino eksaltis. Rapidmove ŝi prenis la manon de Jelica, kaj severe alrigardis ŝin.

– Kiel vi eksciis?

Jelica silentis.

– De kie vi scias, respondu do?

– Ne demandu min, panjo! Mi ne vidis, sed mi scias ke ĝuste tiel estis!

– Parolu! Parolu, aŭ mi malbenos vin! – ekŝrikis la patrino, kaj metis la manon sur la bruston.Jelica kunigis la manojn:

– Ne malbenu min, patrinjo!Mi scias ke tiu malamis lin!

– Kiu kiun? Ĉu Lazaro Stankon?

– Jes!...

– Sed kial?

– Patrinjo! – trudpetis Jelica. – Ne devigu min diri tion al vi!

– Mi devas scii!

Jelica estis ruĝa kiel fajro. La kromdometo kvazaŭ turniĝus ĉirkaŭ ŝia kapo. Ŝi penoplene elparolis:

– Pro mi!...

La patrino ektremis. Sufiĉis unu momento por ke ŝi komprenu ĉion. Jelica trepidis. Kvazaŭ en febro, ŝi delire diris:

– Nun nenion plu demandu!... Verŝajne nun vi ĉion scias!...

Tiam ŝi forkuris al la lito kaj enŝovis la kapon inter kusenojn.

Krunia konsterniĝis. Ŝi povis atendi ion ajn, sed ne tion. Tamen, la patrina koro estas mola. Eĉ kiam skoldas, ĝi benas. Alpaŝinte la liton, ŝi prenis la manon de Jelica:

– Leviĝu, filnjo! – diris ŝi.

Se ŝi torentigus mallaŭdojn al Jelica, se ŝi malbenus, se ŝi manfrapus Jelican, Jelica tion eltenus; larmoj ne lavangus el ŝiaj okuloj, ne pluvus sur ŝian vizaĝon. Sed ĉi tiu mola patrina voĉo, ĉi tiu njoado emociigis Jelican, ŝia kolero cedis, la koro degelis... Okuloj ŝiaj iĝis vivaj fontoj. Ŝi komencis plorsingulti... koro ŝia sentis plorurĝon... Por sufoki tion, ŝi komencis pli kaj pli profunde mergi la kapon inter la kusenojn.

– Filnjo mia!... Karulino mia!... Ne ploru! Ĉu vi timis ke mi malbenos vin?...Kiel patrino povas malbeni sian idon? Kiu patrino tion povus fari!... Jenjo!... Filnjo!...

La maljunulino komencis fleksiĝi super ŝi.

Jelica, eĉ se volus, nenion povis diri pro torenta plorĝemado.

Tamen, kiam la larmoj forportis la doloron, kiam estingiĝis la torenta lamento, ŝi leviĝis kaj, premante la kapon al la bruston, kaj la manon al la sino de la patrino, ŝi komencis mallaŭte flustri:

– Panjo! – Patrinjo mia!... Ne malbenu min!... Mi estas via infano...

– Mi ne malbenos vin, okuloj miaj!

– Mi ne kulpas, panjo!... Dio permesis tion... Ili ambaŭ estis bonaj al mi. Ili estis plejamikoj, mi parolis kun ambaŭ. Tiu enviis. Mi vidis ke tiu malamas Stankon...Kiam mi interparolas kun Stanko, tiu sagas okule, al mi ŝajnas ke tiu fortrinkus Stankon kiel fajro fortrinkas guton da akvo...Kiam ili, dum Elija tago, vetluktis, mi vidis ke tiu deziris ne renversi, sed mortigi Stankon.

– Do, li pafis al Stanko pro vi?

– Jes, panjo.

– Tamen, kiel vi scias ke la saketo estas submetita?

– Mi ne vidis, panjo, sed mi povas en cent monaĤejoj ĵuri, ke la krimaĵon faris tiu!...Ve, panjo mia! Vi eĉ imagi ne povas, kiom tiu malamas Stankon!...

– Mi komprenas, filnjo, sed ĉio estas vane – Stanko ja hajdukiĝis!

Jelica nenion respondis.

Ili eksilentis. Longe ili silentis. Jelica sentis ke ŝia animo almenaŭ iomete trankviliĝis, ĉar almenaŭ al la patrino ŝi diris tion.

Tamen ŝi ne estas dirinta ĉion. Ŝi ne diris ke ŝi promesis sin al Stanko, nun ŝi hezitis ankaŭ tion diri...

„Mi diru!...“ pensis ŝi. „Mi diru! Ŝi estas bona kiel pano. Kial mi ne diru, ŝi estas mia patrino!... Mi diros al ŝi, ke mi renkontiĝis kun Stanko, ke mi promesis min al li...“

„Ne, ne!... Mi ne povas!... Pro kio mi diru!... Kial mi diru – kiu langon ne tenas, mem sin malbenas....

„Tamen, povas alveni svatantoj... Ili povas svati, la patro povas konsenti... kion mi tiam diru?...“

En ŝia animo bruis tohuvabohuo. Diri aŭ ne diri?... Cent kialoj pelis ŝin ankaŭ tion elbuŝigi, sed ekzistis ankaŭ la hontosento, kiun ŝi kun patrina lakto ensuĉis, kaj ĝi ŝtopis ŝian buŝon...

„Ankaŭ la patrinjo nun silentas!... Kial ŝi absolute nenion demandas? Kial mi ankaŭ tion ne diris al ŝi tuj? Se mi dirus, al mi nun sendube estus pli facile. Ŝi malkonsentus. Ŝi dirus, ke ŝi ne estas preta... Mi tamen diru!...“

Ŝi malfermis la buŝon por diri, sed denove subpremis tiun deziron.

– Filnjo mia, kion fari! Verŝajne tia estas via sorto! – diris Krunia post longeta silento.

– Kia, patrinjo?

– Dio ne volis ke vi iru tien, kien la koro vin tiras.

– Kial, panjo? – diris Jelica, kaj alrigardis la patrinon rekte en la okulojn.

– Kiel kial?! Li ja hajdukiĝis – diris Krunia.

– Negrave!

– Kion vi diris?

La rigardo de la patrino penetris en ŝian animon.

Ŝi ektremis.

– N... n... nenion...

– Vi ja diris: negrave ke li hajdukiĝis...

– Jes, negrave. Li estas honesta homo... Oni lin trudirigis en la monton, ĉar...

Tamen, la rigardo de Krunia glaciigis la vortojn sur ŝiaj lipoj. En ĝi ŝi vidis la plej profundan tenebron, kaj ektremis...

– Kion vi planas? – ekŝrikis Krunia. – Parolu! Ĉu vi volas atendi hajdukon, ĝis kiam li revenos el la monto?... Ĉu vi eble promesis vin al li, misfeliĉulino?...

Sango altorentis la kapon de Jelica.La kapo de patrino staris antaŭ ŝi en ruĝa ringo, simila al tiu, kiun oni pentras ĉirkaŭ la kapo de sanktuloj.

– Parolu! Parolu!... Ĉu vi promesis vin al li, nu?... Ho... malbenita infano! Ĉu vi estas virgulino? Ĉu vi povas rigardi min en la okulojn?... Parolu!... Parolu!...

Tiam ŝi alpaŝis Jelican, rapidmove kaptis ŝiajn ŝultrojn, kaj komencis svinge skui ŝin. Nigra penso bruligis ŝian cerbon. Kiel freneza, ŝi kaptis la gorĝon de Jelica.

– Diru! Ĉu vi povas rigardi min en la okulojn?... Ĉu vi estas virgulino?...

Jelica rektiĝis, alrigardis la patrinon tiel akre, ke tiu tuj forigis la manojn de ŝia kolo.

– Mi povas rigardi en la okulojn kaj vin kaj kiun ajn alian, ĉar mi estas virgulino! Sed mi fianĉiniĝis! Mi promesis min al la hajduko Stanko!

Krunia ŝanceliĝis.

Jelica streĉis sian tutan forton por tion diri. Nun nenio plu povis reteni ŝin.

– Al Dio kaj al li mi promesis, ke mi estos lia, do mi estos lia, panjo! Mi preferas morti en Staraĉo, kiel tiu malfeliĉulino, sed mia mano alian viran manon ne tuŝos! Nun vi ĉion scias!... Malbenu min, mortigu min, aliel ne povas esti!...

Tiuj vortoj, tiuj rigardoj konfirmis ke estos ĝuste tiel, kiel ŝi diris.

Tio jam ne estis Jelica, la humila knabineto, sed ŝtormo, kiun nenio plu povis haltigi.

Krunia ne plu povis stari. Ŝi sidiĝis sur la liteton, sentante ke la mondo turniĝas en ŝia cerbo.

# 3. LEĈJO (LEPORĈJO)

La nordokcidenta parto de Maĉvo estas tute kovrita per marĉoj. Ĝuste ĉe Nigra Marĉo, de la rivero Druno apartiĝas branĉo, kiu nomiĝas Frida Marĉo. Tiu branĉo tuj super Nigra Marĉo nomiĝas Ribnjaĉo. Tie ĝi disfluas kreante malgrandajn, fekundegajn insuletojn. Post la kunfluejo super tiuj insuletoj ĝi nomiĝas Jovaĉo, kaj iom pli fore – Zasavico. Frida Ŝlimejo fojfoje senakviĝas, sed en Zasavico ĉiam troviĝas akvo, multe da akvo. Ĝiaj profundejoj estas teruraj. La homo, rigardanta karekson kaj nufaron sur ĝia supraĵo opinias ke ĝi estas malprofunda; tamen, se oni provas eltiri nufaron kun ties radiko, oni konsterniĝas, vidante ke ĝia tigo longas dek ok spanojn; kaj malgraŭ tio ĝia radiko restas neeltirira, nur la tigo estas disŝirita.

La kamparanoj el Ravnjo, Zasavico, Radenkoviĉo kaj aliaj apudaj vilaĝoj, Zasavicon ne nomas rivero, sed lago. Ili ja pravas. Multajn fojojn senakviĝis kaj ĝia fonto kaj ĝia enfluejo, sed Zasavico restis akvoplena, same kiel ĉiam.

Stranga estas tiea vivantaro. Tie troviĝas ĉiaspecaj akvobirdoj kaj fiŝoj, same kiel en la rivero Savao.

La hajdukoj preferis restadi tie, apud Savao kaj Zasavico. La bordo troviĝis proksime, kaj ili povis, kiam alvenas persekutantoj, fuĝi, kaj tiamaniere savi siajn vivojn. Iliaj tratagejoj havis diversajn nomojn. La tratagejo en la loko kie Drino enfluas Savaon ĝi nomiĝis Paraŝnico... Supre de la vilaĝo Banusaj Kampoj troviĝis alia tratagejo – Viŝkupio, kaj supre de la vilaĝo Radenkoviĉo estis la tria tratagejo – Komusa Roko.

Ĉiuj ĉi lokoj estis surkreskitaj de densa arbaro, krom tio, ĉiuj estis apud akvo, pro kio la akvomuelisto povis ricevigi al ili manĝaĵojn kaj aliajn bezonaĵojn.

Kiam la hajdukestro Srećko revenis kun la kunularo sur Komusan Rokon, lin tie gajege renkontis Nogiĉo.

– Bonvenon, estro!

– Dankon, same al vi!

– Dank al Dio, vi ĉiuj estas vivaj kaj sanaj!

– Jes, dank al dio!
– Mi ĝojigos vin, estro!
– Per kio?
– Per noveveninto.

Ĉiuj estis leviĝintaj por renkonti sian estron, kiam Nogiĉo montris al li homon, kiu staris aparte, apud trunko.

Li verŝajne havis iom pli ol tridek jarojn, estis korpulenta, pli korpulenta ol ĉiuj aliaj hajdukoj, sunbruna, kun admirindaj lipharoj, bela kiel anĝelo. Liaj grandaj nobelecaj okuloj rigardis senĝene kaj sincere, rekte en pupilon.

La hajdukestro alpaŝis lin.

– De kie vi venis? – demandis li.
– El Hercegovino – diris la homo, kaj lia voĉo ektondris tondre.
– Kiam vi transiris ĉi tien?
– Hodiaŭ. Mi transnaĝis Drinon.
– Kiu irigis vin al mi?
– La akvomuelisto.
– Ĉu vi scias lian nomon?
– Mi ne scias. Li nur diris: iru kaj trovu la hajdukestron Sreĉkon. Iru laŭ ĉi tiu vojo, kiam vi trovos lian kunularon, diru al li: Kamelo sendis min.

Li parolis senĝene, senkaŝe. Al la hajdukestro li tuj ekplaĉis.

– Bone, bone... Nu, kiel vi nomiĝas?
– Leĉjo.

La hajdukoj alrigardis unu la alian.

– Ĉu tio estas nomo? – diris preskaŭ laŭte Zaverzano.
– Tio estas mia nomo dekiam mi memoras pri mi – diris Leĉjo kaj alrigardis Zaverzanon.
– Nu, kion vi volas fari? – demandis la hajdukestro.
– Mi venis al vi, do mi faros kion vi ordonos! Vi ja vidas, dank al Dio, ke nun ne estas tempo por plugado kaj fosado. Nuntempe, kiu ne estas timemulo, tiu devas iri en la monton!...
– Kial vi forlasis vian propran hejmon?
– Certe ne pro bonvivo! – lia brusto ekĝemis vente. – Mi fuĝis por savi la vivon... Turkoj senvivigis ĉiujn miajn samhejmanojn – restis nur mia patrino kaj kelkaj infanetoj. Nur ni restis: ili por malfeliĉi, kaj mi por sangverŝi!...
– Ĉu vi scias almenaŭ la nomon de via malamikego? – demandis la hajdukestro.
– Tio estas la turko!... Alian nomon mi ne scias, mi ĝin eĉ ne bezonas scii!... Negrave ĉu li nomiĝas Mujo aŭ Meĉjo, Asano aŭ Alijo – li estas mia malamikego, ĉar li estas turko!... Pro tio mi venis ĉi tien, opiniante ke mi certe estos utila al vi... Mi esperas ke mi ne hontigos min!...

Estis videble ke li ekplaĉis al la hajdukoj. Ili alkriis de ĉiuj flankoj:

– Ni akceptu lin, estro!

– Nun ja Stanko havos parulon– diris Zaverzano.

– Tamen, malfacile estas trovi parulon por Stanko, kiu per pafilo buĉas! – diris Surepo.

Tiuj vortoj de Surepo por Stanko estas karaj, pli ol se oni per guzlo prikantus lin.

– Bone – diris Leĉjo – Dio permesos ke ankaŭ min vi vidos dum batalo!..

– Bone, bravulo, mi akceptas vin! – diris la hajdukestro.

Leĉjo gustumis panon kaj salon, post kio la hajdukoj komencis alpaŝadi kaj interkisadi kun li.

Komenciĝis ŝercoj kaj rakontadoj. Zaverzano rapidis kontentigi la scivolemon de siaj kamaradoj. Li rakontis pri la batalo de Stanko kaj, kvankam tio vere estis bravaĵo, Zaverzano tamen tiom garnis ĝin, ke eĉ al Stanko ŝajnis ke Zaverzano troigas.

– Frato miaj! Ho, homoj! – kriis Zaverzano ekzalte.

– Ankaŭ mi scipovas celpafi!... Ĉiuj ni ja scipovas celpafi, sed tiel... Parolu, Surepo! Parolu ja, aŭ Dio mutigu vin!...

– Vi parolas kiel dek virinoj! – diris Surepo, kaj ĉiuj eksplodis per rido.

Zaverzano kaptis la ŝultron de Stanko.

– Aŭskultu!... Aŭskultu kiel li babilas! Jen, via braveco igos eĉ Surepon paroladi!...

Leĉjo rigardis jen unu, jen la alian. Stanko plaĉis al li de la unua momento. Li admiris fidindan manon kaj akravidajn okulojn... Kune kun la hajdukoj li observis la arĝentaĵojn kaj jataganon, kiun Stanko ricevis, kaj admiris la fajnan ellaboron...

Zaverzano elingigis la jataganon, kaj fiksrigardis la ornamaĵojn, desegnitajn sur ĝi.

– Leĉjo! – diris li.

– Mi auskultas!

– Ĉu vi estas skribokona?

– Jes, kompreneble!... Kial vi demandas?

– Nu, se vi ja estas skribokona, vi povus tralegi ĉi tiujn turkajn literojn. Mi opinias ke ĉi tie estis skribita la nomo de la bejo.

Leĉjo kliniĝis super la jataganon, kaj montrante per la fingro arĝentfadenajn ornamaĵojn, diris:

– Ĉi tion mi ne scipovas tralegi; sed rigardu ĉi tiujn makulojn, ilin mi konas. Tio estis kristana sango. Nun venis tempo, ke ilin forlavu turka sangaĉo!...

– Vere venis tempo, pro dio! – diris Zaverzano svingigante la jataganon ĉirkaŭ si. – Bonbona!... Vidu, Surepo!

Surepo apartiĝis de la kunularo, sidiĝis sur ŝtipon, enpensiĝis, ne plu aŭskultante la interparolojn. Kiam Zaverzano proksimigis al li la jataganon, li levis la kapon, kaj alrigardis ĝin.

– Nu? – demandis li.

– Vidu kiel bona estas la jatagano, jen, svingigu ĝin!...

– Mi neniam vane svingigas! – diris Surepo, kaj denove klinis la kapon.

La hajdukoj ekridis, kaj Zaverzano diris:

– Vi ja ridigas la homojn!... Diru, Stanko!... Per kio vi do ĉarmigis nin?... Postkiam vi venis, eĉ Surepo iĝis petolema!...

Surepo nur kapneis, kiel se volus diri: Bone, bone!... Parolu, ne plu tenu en vi!...

Denove ekbruis ŝercado. Komenciĝis ludoj de bravuloj... Komenciĝis vera voĉĥaoso: vetsaltadis Stanko kaj Leĉjo. Koroj iliaj vigliĝis, ili ne permesis unu al la alia venki. La saltoj estis grandegaj, sed cedi volis nek unu nek la alia...

– Ho homoj... ĉi tio estas neimagebla! – diris Latkoviĉo.

– Je Dio, neimagebla!...

– Ankaŭ mi estis saltivola, tamen... prefere mi ne ridindigu min! – diris Latkoviĉo sidiĝonte.

– Leĉjo! – ekkriis Zaverzano.

– Mi auskultas vin.

– Ek, saltvenku Plumpĉjon!

– Kiun Plumpĉjon? – demandis Leĉjo naive, pro kio ĉiuj ekridis.

– Tiun, la plumporelan, la sidanton.

– Ĉu lia nomo estas Plumpĉjo?

– Tiel la patrino lin karesnomis – diris Zaverzano.

Rido resonis tra arbejo.

– Kia homo, tia la orelo! – diris Latkoviĉo.

– Tamen, ho, umulo, kial vi umas?...

– Mi umas, por ke vi povu ridi...Ĉu mi sukcesis?...

– Sukcesis, sukcesis! – ekkriis la hajdukaro de ĉiuj flankoj.

– Vi ja troviĝas inter ni, Plumpĉjo, por ke miaj ŝercoj estu ankoraŭ pli trafaj.

– Estus pli bone se vi rakontus ion al ni, ol ke vi babilas sensencaĵojn! – diris Latkoviĉo.

– Kial ne? Mi estas tre rakontipreta.

Ili superŝutis lin per aproboj de ĉiuj flankoj: sidiĝinte sur la teron, li komencis rakonti rakonton pri saĝa knabino, kiu havis kurban nazon...

Dum li rakontis, Leĉjo daŭre rigardis Stankon. Lin io tiris al Stanko, kiel se Stanko estus lia propra frato. Li rigardis Stankon longe, kaj ektiris lian manikon.

– Ne koleru, sed mi deziras ion demandi al vi!

– Kion?

– Ĉu vi hieraŭ aliĝis al la hajdukaro?

– Jes, hieraŭ.

– Ĉu vin priklaĉis via kunfrato?

La okuloj de Stanko ekfulmis, liaj vangoj ekflagris tuj kiam li rememoris Lazaron.

– Kiel vi eksciis tion?

– La akvomuelisto tion diris al mi. Li ĉion rakontis: ke vi ne estas kulpa, ke oni kaŝmetis, enfosis la saketon en vian sterkejon...Sed ĉion ĉi, por plenumi la deziron de subestro, faris ĝuste via kunfrato kaj iu Marinko...

– Jes!... Ĝuste tion li diris ankaŭ al mi. Tamen, mi ne scias kiel li ĉion ĉi eksciis!... Eble tio estas kalumnio!... Al mi ŝajnas, ke tiu malmoralulo kulpas pri ĉio...Se Dio ekzistas, mi venĝos al li!...

– La akvomuelisto ankaŭ diris ke viaj patro kaj samhejmanoj tre suferos. Ĉiuj rigardas ilin kiel nigrajn ŝafojn. Ĉiuj evitas vian domon, kiel se en ĝi pesto tempestus...

Sur la animon de Stanko kvazaŭ falus monto... Povraj liaj gepatroj! Granda renomo, bona reputacio de la domo de Aleksiĉo – ĉio estas for!... Kvazaŭ hajlo ĉion forbatus!... Nun ili veas kaj ĝemplendas. Sed neniu sentas ĉagrenon ilian; neniu kredas ke ili estas senkulpaj.

– Ho, Lazaro!... Lazaro!... Dio ne povas ne ekzisti!...

Leĉjon tio emociigis, li alpaŝis kaj kaptinte la brakon de Stanko, diris:

– Frato mia! Ankaŭ al mi oni faris maljustaĵon! Miajn samdomanojn turkoj ekstermis, jen kial mi suferas!... Tamen, neniu priklaĉis mian reputacion...Via aflikto estas pli ĉagreniga: ili volis forpreni kaj vian vivon, kaj vian reputacion...

Tiam, vidante ke Stanko silentas kiel ŝtono, li daŭrigis:

– Dio estu mia atestanto!... Via aflikto estas ankaŭ mia aflikto, ho bravulo!Vi perdis kunfraton – akceptu novan!... Mi estos kaj via kamarado, kaj via frato, kaj... ĉio!... Kiu vin ĉagrenigis, tiu ankaŭ min ĉagrenigis!... Ĉu vi volas ke ni interfratiĝu?...

Li rigardis Stankon per la okuloj plenaj de larmoj kaj brilo.

– La fratecon mi akceptas, sed la venĝo estas mia! – diris Stanko, rigardinte lin kelkan tempon streĉe. – Mi opinias ke ne ekzistas pli granda delico kaj feliĉo ol venĝo!

– Ĉu vi do akceptas la fratecon?!

– Mi akceptas, kunfrato!

Leĉjo kaj Stanko, interpreminte la manojn kaj interkisinte, levis la okulojn al la ĉielo...Ili eĉ ne aŭdis ŝercojn de Zaverzano, kiu ĉiujn montanojn ridigis...

Nokto estis malleviĝanta malrapide kiel morto... La hajdukestro alvokis la kunularon preĝi al Dio.

La ŝercado kaj ridado ĉesis. Ĉiuj leviĝis kaj viciĝis, laŭ la kutimo kaj rango. Stanko alportis al la hajdukestro braĝon sur lignero, post kio la hajdukestro el siaŝultrosako elprenis incensgrajnon, mallevis ĝin sur la ardaĵon, kaj komencis incensi sin kaj la kunularon.

La preĝo estis varma kaj elkora. Neniu kredus ke la piaj homoj estas montaraj hajdukoj; neniu kredus ke ĉiu el ili sian hajdukadon aŭtentikigis per almenaŭ unu mortigo...

# 4. PERSEKUTO

Finpreĝinte, ili lokiĝis por vespermanĝi. La vespermanĝo ne estis tre abunda: fromaĝo, pano kaj kelkaj lardopecoj. Tamen, ili vespermanĝis kun ĝuego, kiel se ili la tutan tagon ŝpatus teron.

Zaverzano ne povis esti kvieta, li komencis ĉikani Leĉjon:

– Tamen, pro Dio, kiamaniere Leĉjo povas esti nomo?

– Sammaniere kiel via nomo – respondis Leĉjo.

– Sed kia estas via familia nomo?

– Migradiĉo.

– Laŭ via familia nomo al mi ŝajnas ke vi ne kreskis en unu loko...

– Ĉu iu ajn el ni maturiĝis en unu loko? – demandis Leĉjo. – Nia sorto ne permesis al ni vivi kviete kaj senimpete, ni ĉiuj devis konstante translokiĝadi, vivi inter ŝtonaroj kaj arbaroj!... Ni ĉiuj estas samparencanoj, ni ĉiuj estas Migradiĉoj!... Kies avo vivis la tutan vivon samloke?... Ek̂, diru!... Nenies!... Antaŭuloj viaj, same kiel mi, fuĝis, por ke almenaŭ intestoj iliaj ne bruu, se la violentaĵojn ili devas toleri!...

Leĉjo parolis bele, elokvente... Ĉiuj rigardis lin plenatente.

– Vi pravas, Leĉjo – diris la hajdukestro.

– Vi pravas, jes!... Se iu ajn asertus ke ne estas tiel, mi dirus al li, ke li parolas malveron! Kara mia frato kaj amiko, Zaverzano, encerbigu tion, kaj ne plu priridu miajn propan kaj familian nomojn.

– Oho! – diris Zaverzano – ŝajnas ke vi koleras?...

– Ho, ne, pro dio! Mi ŝatas ŝercon, samkiel vi kaj la aliaj fratoj. Vi vidos ke ankaŭ mi scipovas ŝerci dum la plej brutala batalo!... Nu, tion mi diris por ke vi sciu ke pri tio oni ne devas ŝerci!...

– Prave! – ekkriis hajdukoj de ĉiuj flankoj, rigardante kun respekto sian novan kamaradon. Zaverzano ekkoleretis.

– Dio kreis ŝercon! – diris li. – Kaj mi, kiu ŝercas pri la viveto, kiu estas la plej grava, kial mi ne ŝercu ankaŭ pri la kromnomo!...Kaj, finfine, diru la veron, Leĉjo, ĉu mi ion malbonan diris pri vi?...

– Nenion. Verdire nenion!...Tamen, mi pensas jenmaniere: ĉiu homo havas sian sanktaĵon; kaj samkiel ne estas bone ridi pri homo kiam li al Dio preĝas, samtiel ne estas bone ridi pri tiu sanktaĵo. Mi havas nenion, krom ĉi tiun serban nomon – ne ridu pri ĝi!...

– Mi ne ridos, frato! Mi nur demandis kiamaniere tio povas esti via bapta nomo, ĉar mi opinias ke vi ne povis esti baptita kiel Leĉjo.Tamen, se tio vin kolerigas, mi neniam plu demandos vin!

La vespermanĝo finiĝis en silento. Eĉ ne unu vorton plu ili diris. Ĉiuj pripensadis la vortojn de Leĉjo, konkudante ke li pravas; eĉ Zaverzano komprenis ke li troigis ŝerce, ke Leĉjo pravis protestante.

La luno desaltis – hajdukoj sidis kaj silentis.

Tiam la hajdukestro diris.

– Nogiĉo! Anstataŭigu la gardistojn, kaj ni kuŝiĝu!...

Pli junaj ĉion plenumas tuj.Nogiĉo eksaltis rapidmove, elektis per la fingromontro kelkajn hajdukojn, kaj senbrue, sensone foriris kun ili en arbaron.

Kiam li revenis, la hajdukestro alrigardis la kunularon.

– Stanko! – diris li – surmetu nemalgrandan lignopecon por ke la fajro ne estingiĝu.Nun, bravuloj, bonan nokton!...

Kaj li malleviĝis sur la teron.

La ordono estis plenumita. La hajdukoj kuŝiĝis unu apud al alia. Leĉjo malleviĝis apud Stanko kaj surmetis la brakon sur lian ŝultron.

Ekregis plensilento...Aŭdiĝis surarba susurado de folioj, kaj cikadaj baladoj; iom pli poste aŭdiĝis ankaŭ ronketado de kelkaj hajdukoj...

Stanko fiksrigardis la ĉielon. Luno, konsiderinde stumpa, leviĝadis malrapide, senĉese. Stanko rigardis ĝin, dum strangaj pensoj okupis lin.

„Feliĉa vi estas, ho luno! – pensis li. – Vi nun ĉion vidas, vi nun ĉion scias... Kial, ho, mi ne estas radio via, ke mi soru en altejon, kaj malleviĝu suben, por vidi la samfamilianojn!“

En lia cerbo ekregis mikskonfuzo. Lia korpo iĝis lunradio, li eksoris rekte super la domon, en kiu li venis en la mondon.

Koro lia angoris dolore. Li vidis ĉe la fajrejo du kadukaspektajn grizajn kapojn, estingantaj ardaĵojn per fluantajlarmoj...Li aŭdis sopirĝemojn iliajn, kiujn nenies oreloj en la vilaĝo priatentis. Neniu ilin alrigardis, neniu afable salutis ilin...

Sed jen! Li ne plu estis radio, denove li estis homo. Liajn okulojn tegis nebulo. Li penis perokule penetri la nebulon, sed ĝi iĝis pli lak pli densa... La nebulo ĉirkauvolvis la profundaĝulojn, kaŝis ilin de rigardo lia. Li volis leviĝi, sed io lin kroĉis al la tero; hida, malvarma manego serpente ringis lian kolon, komencis stringi ĝin...Konscio lia komencis degeli; li nur aŭdis ke io bruas en kaldroneto; li sentis ke fridiĝas liaj brakoj kaj kruruj... kaj froston ĉirkaŭ la koro... kaj... li jam eĉ spiri ne povis ...

Abrupte li eksentis faciliĝon. Penetrinte la nebulon, lunradio rehavigis al li vivon kaj konscion... Kaj jen, varma kaj ĉarma mano, ĝi falis sur lian frunton, varmigonte kaj la koron kaj la forton... Li malfermis la okulojn – super li estis Jelica, bela kiel suna radio, flamruĝa kiel aŭrora rideto... Lin rigardis la belaj okuloj, ridetis la flamruĝa buŝo... „Jenjo!... Ĉu tio estas vi?!“ – diris li. – Ŝi kapjesis. Ŝi metis la manon sur liajn okulojn, kvazaŭ volante kunigi liajn okulharojn. Aŭdiĝis ŝia flustro (li aŭdis tion tre klare): „Dormu!...“

Iu frapis lian lumbon. Stanko rekonsciiĝis kaj ĉirkaŭrigardis.

– Staru! – kriis Surepo, ĉar tio estis li. – Ĉu vi ne aŭdas la korvon grakeganta?...

Stanko vere aŭdis grakadon el arbeja profundo. Li ĉirkaŭrigardis: ĉiuj estis leviĝintaj.

Li saltis. Surdorsiginte tuj la sakon de la hajdukestro, li alpaŝis Surepon.

– Ĉu tio estas vera korvo? – demandis li maltrankvile, ĉar grakado de korvoj konjektigas pri malbono.

– Ne estas.

– Nu, kiu grakas?

– Amiko... Li informas ke oni arigas persekutantojn, ke oni scias kie estas nia tratagejo – diris Joĉjo Ninkoviĉo.

La hajdukestro sidis kaj pripensadis. Abrupte li leviĝis.

– Alrulu tiun trunkon sur la fajron! – ordonis li.

Proksime de ili troviĝis ega trunkego La hajdukoj alkuris, kaj la trunko tujtuje estis sur la fajro.

– Surepo!

– Jes, estro.

– Vizitu ĉiujn vilaĝojn, diru ke la tratagejo de hajdukoj troviĝas sur Komusa Roko.

– Bone.

– Jovano! Joĉjo!...

– Jen ni, estro!

– Iru en Banusan Kampon. Trovu Banovacon kaj diru al li: la sekvan dimanĉon al li alvenos homo kaj alportos miajn salutojn. Li faru tion, kion mi mesaĝos.

– Bone, estro!

– Nogiĉo... Vi restu ĉi tie kaj umu ĉirkau via domo. Kun vi restos Stanko. Vi helpos lin pri ĉio, absolute pri ĉio, ĉu vi komprenas?

– Mi komprenas, estro.

Leĉjo elpaŝis.

– Estro!

– Kion vi volas?

– Lasu ankaŭ min ĉi tie!...

– Kial?

– Mi kaj Stanko fratiĝis: ni diris ke ni mortos unu por la alia. Mi deziras ke ankaŭ mi povu helpi lin!...

Silentinte certan tempon, la hajdukestro diris:

– Bone, restu...

Post tio li turniĝis al Stanko:

– Al vi mi ordonas Lazaron kapti viva, ke mi juĝu lin!... Mortigi lin vi ne rajtas, pri tio vi respondecas per viaj kapoj!... Mi devas vidi tiun friponon, kiu tiel lerte kulpigis senkulpulon pri ŝtelo!...Eĉ ne unu haro sur lia kapo manku!... Nogiĉo! Vi respondecas pri tio!

– Ne zorgu, estro!...

– Se estos danĝere, rapidu al Cero. Se vi ion ajn bezonos, iru al iu el ĉi tiuj homoj: Banovaco en Banusa Kampo, Katiĉo en Glogovaco, Ĉoganjo en Salaŝo, Ivanko en Klenjo, popo Teŝo en Badinovaco, Ilijo Serdano en Pernjavoro. Oni vin ĉie manĝigos kaj trinkigos, krom tio, ĉiu el ili informos vin pri mi kaj pri la kunularo. Se vi bezonos helpon, iru al Kamelo...

Post tio li turniĝis al la kunularo:

– Pretiĝu! – diris li.

– Ni pretas!

– Ek! Adiaŭ, Surepo, Nogiĉo, Stanko, Leĉjo... Adiaŭ!

– Adiaŭ al vi!

Post kelkaj momentoj la hajdukoj malaperis en la monto.

Jovano kaj Joĉjo komencis adiaŭadi.

– Ĉu Vi jam iras? – demandis Leĉjo.

– Ni devas atingi la kunularon... Adiaŭ! Dio permesu ke ni revidiĝu...

– Dio permesu!...

Ili interkisis, rapidmove prenis siajn pafilojn, kaj malaperis en arbetejo.

Stanko enpensiĝis. Al li ŝajnis strange ke la falsan ŝtelon partoprenis Piro kaj Marinko.Li deziregis scii kiel tio okazis, tial li decidis tuj iri al Kamelo, kaj demandi lin pri ĉio.

Nogiĉo kvazaŭ konjektus pri kio pensas Stanko.

– De ĉi tie ni iros al mia hejmo – diris li. – Tie ni kaŝiĝos...

– Tamen, ĉu ne estus pli bone iri al Kamelo? – interrompis lin Stanko.

– Ne, ho bravulo! Tien ni ne povas iri!... Interalie, kial ni iru tien?... Kamelo estas rabobesto. Li neniam trorapidas. Kiom li gardas nin, sin li gardas duoble. La hajdukestro neniam iris al li, li ja mem alvenas por sciigi nin, kiam io estas sciiginda!... Jen Surepo, li diru, ĉu estas tiel?...

– Estas tiel! – diris Surepo.

– Finfine – daŭrigis Nogiĉo – akvomuelejo estas akvomuelejo. Tien ankaŭ neinvititoj alvenas neatendite. Nu, ni iru al mia hejmo, de tie ni mesaĝos al Kamelo ke li venu tien.

Li leviĝis. Stanko povis fari nenion alian, ankaŭ li leviĝis. Koncerne Leĉjon – li estis preta iri kaj en fajron, kaj en akvon kun Stanko. Kiam ili adiaŭis Surepon, Leĉjo diris:

– Kion pri la fajro?

– Mi ne komprenas! – diris Nogiĉo.

– Ĉu ni ne estingos ĝin?

– Ĉu vi ne aŭdis, ke la estro diris ke ni surrulu la trunkegon.Li neniam sekretigas latratagejon, sed nun li intence diris ke la trunkegon oni surrulu, ĉar persekutantoj nin serĉas.Ek'!...

Ili disiris ...

Dum ili interparolis, tra la arbaro moviĝis persekutantoj, kiuj ekiris serĉi ilin. Ilin gvidis Piro sur ĉevalo, kaj Marinko, kiu saltetis apud li.

– Ĉu ili estas malproksime? – demandis la turko.

– Ne, tie estas ilia kaŝejo – diris Marinko. – Mia okulo neniam misvidas!... Vi diris al mi, ke mi devas trovi ilin, jen, mi tion faris!...

Tiam, montrinte per mano al fumo kiu malrapide supreniĝis, li aldiris:

– Ni alvenis!

– Ĉirkaŭu! – ordonis Piro.

La taĉmento ĉirkaŭis la lokon. Malrapide, preskaŭ ne spirante, ili estis proksimiĝantaj al la fajro, kiu jam videblis tra branĉaroj... Kiam ili ekvidas helan flamon, Piro ekkriaĉis:

– Neniu moviĝu! Kapitulacu!

La monto resonis, kaj reaŭdigis lian vortojn.Ili alkuris al la fajro – neniu estis tie...

– Hi! – ekŝrikis la turko, kaj premis sian kapon inter la manoj.

– Mi ĵuras per ambaŭ okuloj, ili estis tie! – ĵurkriis Marinko.

– Sed kie ili estas nun?...

– Eble ili embuskas?! – diris Marinko, kaj preskaŭ malfermis la buŝon pro timo.

Tio ĉiujn rekonsciigis, kaj ili komencis retiriĝi tien, de kie ili alvenis.

# 5. SIMO KATIĈO

La hajdukoj ridis pri la persekutantoj... Kaŝitaj malantaŭ arbusto, ili rigardis kiel la persekutantoj retiriĝas, kiel persekutantoj timtremas pro ĉiu susuro. Se ili povus, ili tutvoĉe ridus... Plej multe ili ridus pri Marinko, kiu hunde flirtis ĉirkaŭ la turko, ĵurante ke li ĝuste tie vidis ilin...

Kiam tiu priridinda taĉmento malaperis en la arbaro, ekiris ankaŭ la hajdukoj.

Stanko enpensiĝis. Li komencis iompostiome ĉion kompreni. Li komencis rememori ĉion, kaj kredi ke la kalumnion grandaparte partoprenis Piro kaj Marinko. Li nur ne povis enkapigi kial ili tiel malamis lin – li ja absolute nenion fifaris kontraŭ ili.

La nokto estis sensona. Resonis nur iliaj paŝoj.

– Dio, kiel bela nokto! – diris Leĉjo.

– Bela! – diris Nogiĉo.

– Multege da ĉi tiaj noktoj mi pasigis sidante!...

– Nun vi eĉ pli da tempo pasigos sidante. Tamen, verdire, vi havos tempon por dormi, la vintro longas...

Ili eksilentis, ĉiuj dronis en siajn pensojn. Sekaj branĉoj kraketis sub iliaj piedoj. Jenjene susuris io, murmure, mistere, kiel se nevidebla mano umus forfalintajn foliojn.

Ili alvenis antaŭ la domon de Nogiĉo. Blanketa fumo volviĝis el tegmentofenestro kaj leviĝis rekte al la ĉielo, kiel pura animo de justulo.

Nogiĉo ekfrapis al la pordo.

La domanaro vekiĝis tuj kiam ili ekkonis lian voĉon. Ili renkontis la hajdukojn gajabunde... La virinoj pretigis vespermanĝon, la hajdukoj satiĝis reĝe, kvankam ili estis vespermanĝintaj sur Komusa Roko.

– Marica! – diris Nogiĉo al la edzino – prenu linkovrilon, sternu ĝin en la tinejo. La virino foriris por fari tion.

– Vi, Joĉjo, iru jam ĉi-nokte al Simo, kaj diru, ke ni atendas lin ĉi tie.

– Ĉu vi longe restos ĉi tie, fraĉjo? – demandis Joĉjo.

– Ni restos kelkajn tagojn. Ni devas ion finfari.
– Hieraŭ ili pretiĝis persekuti vin – diris al li la frato.
– Ni scias tion... sed ili foriris kun mallevitaj kapoj...
– Oni diras ke ili serĉas vin pro la turkoj, kiujn vi mortigis sur Ĵuravo...
– Nu... jes!... Estu tiel, ili persekutu nin!... Tamen, mi opinias ke estos pli bone ke ni dormetu.

La virinoj senŝuigis ilin, lavis iliajn piedojn, post kio la hajdukoj foriris kuŝiĝi.

Rapide ekregis silento. Ĉiuj tujtuje profunde ekdormis...

La aŭroro ĵus ekruĝis, la unuaj kokoj ekkriis kiam Katiĉo kun Joĉjo aperis antaŭ la domo.

– Kie ili estas? – demandis Katiĉo.
– En la tinejo – respondis virinoj.

Ili eksidis apud la fajrejo.

Simo Katiĉo estis brutonegocisto. Li naskiĝis en la vilaĝo Dvoro en Bosnio. Maljusteco kaj malfacileco irigis lin for el lia hejmo; transirinte Drinon li loĝiĝis en la vilaĝo Glogovaco... Tamen, li neniam tion pardonis al la turkoj, eĉ ne unu momenton li konsideris ilin amikoj. Pro tio li forlasis la kvietan kamplaboron, kaj komenciĝis okupiĝi pri negoco. Li iris de vilaĝo al vilaĝo, laŭŝajne komercante, sed fakte li akiradis amikojn kaj ardigadis malaman flamon kontraŭ la turkoj... Ĉiu morta turka kapo lin tre gajigis. Li ĝojis pro ilia malfeliĉo – ĉar nur tiam li estis feliĉa.

La amis la hajdukojn, la idojn de la monto, la ribeluloj, kiuj per siaj pafiloj regigis la justecon, kiuj per akraj jataganoj tribunalis sur la tero... Al ili li donadis ĉion, eĉ trankvilon sian. Sendepende de lia laco, sufiĉis ke oni flustru al lia orelo „vin vokas hajduko – li tuj saltadis kaj kuris interkisi kun li, kvazaŭ kun propra frato.

– Diru bofilino, ĉu ni veku la fraĉjon? – diris Joĉjo.

Marica levis la ŝultrojn.

– Lasu lin, ili dormu iomete – diris Katiĉo – lacaj ili estas.
– Mi iras diri al li – diris Jovo – ĉar li koleros.

Baldaŭ li revenis kaj alvokis Simon iri en la tenejon. Frate interkisiĝinte, ili sidiĝis.

– Mi atendis ke vi alvoku min.
– Ĉu vi sciis? – demandis Nogiĉo.
– Min informis Srečko. Mi gratulegas vin! Kion vi faris sur Ĵuravo – tio estas respektinda.
– Tion faris li! – dirinte tion, Nogiĉo montris al Stanko.
– Do, vi estas Stanko!... Vi estas la filo de Alekso!... Gratulegon, bravulo, serba lakto vin kreskigis!... Bedaŭrinde vi ne vidis tiean tohuvabohuon,

mikskonfuzon. Ĉiuj turbanuloj leviĝis. Mi tuj disendis la homojn por sciigi Stojanon en Noĉajo, la ĉefpopon en Belotiĉo, la popon Teŝon en Badovinco, Jankon, Avramon, popon Raĉjon... ĉiujn... Mi informis ilin ke persekutantoj serĉas vin.

– Ĉu per Kamelo?

– Jes, per li. Li estas la plej konvena por tio!... Li tion povas fari tujtuje.

Post tio li denove turniĝis al Stanko:

– Do, vi estas Stanko, ĉu ne?... Frato mia, tohuvabohuon vi faris! Generacioj al generacioj rakontos pri via bravago kaj, kiam oni mencios vian nomon, oni parolos: tio estas la hajduko kiu per pafilo buĉas!... Vi eĉ ne scias de kia violentulo vi liberigis la mondon!... Mi konas lin bonege!... Se oni sur vojo renkontas lin – ve al oni!... De lia kaprico dependis onia vivo!... Tiu Sali-agao multfoje gajis mortigante homojn. Foje li mortigis solfilon de mia konato, senkiale, por ridi!... Tamen, jen, tio okazis ankaŭ al li!... Jen ulo kiu buĉis lin per pafilo!... Mi rakontis al Stojano, kiu tre ĝojis pro tio. La ĉefpopo Nikolao ĝojis eĉ pli!... Li eĉ ne sciis kion fari pro ĝojo.Ĉu vi scias kion li diris? „Tiu Stanko", diris li, „ne estas malhonestulo!" Mi aŭdis de Kamelo kial vi hajdukiĝis!... Kamelo diras, ke vin oni kalumniis, tute kaj absolute senkulpan!...

Stanko diris nenion. Katiĉo daŭrigis:

– Tio estas intrigo kiun faris Piro, Marinko kaj Lazaro. Kamelo diris: Piro intrigis por malamikigi nigramarĉanojn, Marinko por flati Piron, Lazaro pro la filino de Seviĉo, kiu kun vi umis... Kamelo diras, ke la turko sukcesis realigi sian planon. Ĉiuj nigramarĉanoj malestimas la domon de Alekso... Mi diris al la ĉefpopo Nikolao el Belotiĉo iri al la popo Milojo por korekti la situacion.

– Kion li respondis? – demandis Stanko.

– Li diris, ke foriros.

– Dankon kaj al vi kaj al li!... Tamen, tio ne estas bezonata...

– Kial ne estas bezonata?... – demandis Katiĉo.

– La popo Milojo kaj la vilaĝestro Joĉjo pli bone konas Alekson Aleksiĉon ol la ĉefpopo Smiljaniĉo. Kial la ĉefpopo parolu ion ajn al ili? Alekso Aleksiĉo kreskis kune kun ili en Nigra Marĉo. Se ili povas kredi ke lia domo estas ŝtelista domo – estu tiel!...

Stanko fulmigis la okulojn. Kaj Katiĉo, kaj Nogiĉo, kaj Leĉjo vidis ion glacian en tiu rigardo.

– Tamen... – ekparolis Katiĉo.

– Mastro Simo, ne parolu pri tio!... – interrompis lin Stanko . – Oni longe rakontos pri tio, kion mi faros kun ili!...

Tion li diris kviete, sed tiuj vortoj eksonis terure.

Klininte la kapon, li eksilentis...

Ekregis plensilento...Neniu povis diri ion ajn...Nogiĉo, kiel familiestro, deturnis la interparolon al aliaj aferoj. Li demandis pri ĉiuj konatoj. Katiĉo respondadis mallonge.

– Nu, diru Simo, ĉu estas veraj la onidiroj ke turkoj mortigis iujn homojn tie, apud Beogrado?

– Tio estas vero.

– Kiun ili mortigis?

– Palalijon kaj Stanojon el Zeoko.

– Kial ili faris tion?

– Nur diablo scias. Turkoj alvokis la homojn, garantiante sendanĝeron, sed kiam la homoj alvenis, turkoj senigis ilin je vivo.

– Sed kial la homoj iras tien?

– Temas pri estroj, frato mia! Turkoj alvokis, la homoj pensis ke temas pri ia farendaĵo – kaj iris.Sed tie...

– Vi gardu vian kapojn! – diris Nogiĉo.

– Vane mi gardos la kapon, se tia estas mia sorto!...De la sorto neniu fuĝis!...

– Iuj fuĝis, frato mia, fuĝis!... Ne kredu al iliaj vortoj, ne kredu alilia religio!...Venu, frato mia, al ni!... La monto por ni estas kaj patro kaj patrino!...

– Tio nepre okazos!... Stojano diris ke mi unue devas trovi anstataŭulon. La ĉefpopo diris: mi viva ne okazos en iliaj manoj. Se ili min alvokos, mi elektos la monton!...

– Tio estas saĝe... La samon li diras al ĉiuj estimindaj homoj. Pli bone senkapigi cent turkojn, ol atendi ke ili senkapigu unu kristanon!... Ili estas tre, treege multenombraj, estus bone ke ili malmultnombriĝu iomete!...

– Nu, oni tion jam ne devas paroli, ĉiuj tion komprenas.

– Finfine, ni ne devas toleri ĉion.Ni povas ankaŭ malobei!...

– Ne zorgu!... Tio baldaŭ okazos. Ilijo Serdano el Pernjavoro estos la unua kiu komencos!... Li sendube estos la unua kiu enmontiĝos. Lia domo estas ĉe la vojo, ĝi havas la sorton de ĉevoja arbo: ĉiu ĉaro kiu preterveturas – gratas ĝin.bAntaŭnelonge mi estis en Pernjavoro, mi renkontiĝis kun li, tiam li diris al mi:„Ĉi tio jam ne estas tolerebla! Mi vere ne plu povas toleri ilin; negrave kio poste okazos!... Vi foje aŭdos, ke mi foriris en la monton!...

– Li ne povas plu toleri tion!

– Ĉiuj ni ne povas plu toleri tion! Oni ne povas sentime vespermanĝi pro la turkoj! Ĉiutage ni estas en danĝero, kiel se ni vivus en aspidejo.Alvenas al ni nenihavulo el Bosnio, postulas vespermanĝon, postulas kuŝejon, kaj, je Dio, ankoraŭ ion alian!Junaj familianinoj ne povas esti en la domo. Elĉerpiĝis mia maljuna patrino servante alili.La hundido eĉ demandas, kie estas mia edzino?...Antaŭ dek tagoj tia nenihavulo mortigis infanon en Klenjo – senpune!... Ortodoksa hundido senvivigita – ĉu tio estas grava?Li postulas tranokti

kun oni edzino, sed se oni alrigardas muzulmanedzinon, – oni povas forsaluti la samhejmanojn!... Krome, tio ne estas ĉio, oni manĝigas kaj trinkigas ilin, tamen ili ankaŭ bastonas onin.Ili diras: se mi batis la homon kiu manĝigis min, sekvafoje li min ankoraŭ pli bonguste manĝigos!

– Ĉu vi ĉion ĉi toleras? – diris Leĉjo, kajliaj vangoj iĝis flamruĝaj.

– Ni toleras. Malfacile estas al kampkulturisto disiĝi de la plugilo! Malfacile al li estas forlasi la infanetojn; pli facile estasilin sur la dorso porti, ol aŭskulti ilin suferantaj!...

– Ĉu ĉiam estos tiel? – demandis Leĉjo, dum sango bolis en lia kapo.

– Ĝis kiam iĝos netolereble! – diris Katiĉo. – Tamen, kiam ni leviĝos... tiam la tero ekhojlos sange – kamparanoj tiam ne kvietiĝos!...Ili eĉ al verda herbotigo ne permesos elkreski – ili piedpremos ĝin!

– Kiam tio okazos?

– Kiam?... Tion neniu scias!... Ni rapidas organizi tion, sed tio ne estas orgizebla!... Tio okazos subite, tondre... Kiam tondro ektondras, kiam tondro ekfulmas, tondro detruas ĉion ĝis la radiko!... Tamen, kvankam tio estas terurega, tio tamen baldaŭ okazos!...Almenaŭ mi kredas je tio!...Kaj kiam ŝriko de longa pafilo miksiĝos kun krio infaneta – ve kajal la turkoj kiuj ĉi tiujn kampojn tretas, kaj al la sultano en Istanbulo!...Mi jam diris tion!... Ho, jen!... jam aŭroras!... Mi iras, vespere mi revenos... Adiaŭ... Se vi bezonos min, informu...

Rapide adiaŭinte ĉiujn, li foriris.

La aŭroro jam ruĝis kiam la hajdukoj profundiĝis en siajn pensojn...

# 6. PIRO AGAS

Pasis tri monatoj. Komenciĝis malfruaŭtunaj tagoj. Grizkoloraj nuboj jam ne leviĝadis desur laĉielo; la arboj senfoliiĝis, nur jenjene videblis kelkaj flavajn folietoj, flirtantaj malĝoje kaj solece...

Piro sidis ĉe la fajrejo en la apudvoja tranoktejo. Li profundege enpensiĝis. Lian kapon trafulmadis diversaj pensoj... Li komencis agi laŭ la konsilo de Marinko. Hodiaŭ li invitis Ivanon Maraĵĝiĉon interparoli. Longe li pripensadis kion diri al li, kiel konsili lin... Diversegaj deziroj fruktis en lia animo!... Li preskaŭ ne rimarkis Ivanon, kiam tiu eniris la tranoktejon.

Post intersaluto ili lokiĝis ĉe la fajro. Piro ordonis ke oni alportu brandon. Li iĝis gastige dolĉa: ĉiun lian movon sekvis plaĉiga rideto.

– Nu, kiel vi fartas, kara Ivĉjo?

– Bone, dankon por la demando, agao!

– Kiel fartas viaj samhejmanoj?

– Dank al Dio, ĉiuj fartas bone!

– Kiel fartas la kara Laĉjo?

– Ankaŭ li fartas bone. Li restis tie, hejme, slabante lignon por fari raderojn kaj ĉarbarilojn... Kion li povas fari kiam estas ĉi tia vetero, kiam nenien el la domo eliri oni povas?

Tuj kiam li elbuŝigis la nomon de Lazaro, la turko komencis paroli dolĉe. Lia rigardo brilis tenere, kvazaŭ li amus eĉ la nomon de Lazaro.

– Bona estas via Laĉjo, Dio donu al li sanon!... Mi ne memoras ke dum tuta mia vivo mi renkontis tian knabon!... Videble estas ke li estos familiestro, hejmulo. Kvieta, obeema, respektanta pliaĝulojn... Mi ĵuras je Dio, mi ekamegis tiun knabon!...

La turko sciis kiel oni devas paroli kun gepatroj. Li maleraris esperante ke belaj vortoj altiros Ivanon.

– Tio estas vero, ho agao, ne pro tio, ĉar li estas mia filo!...Mi havas ankaŭ aliajn infanojn, sed ĝuste li estas al mi la plej kara!...Li elstaras... li scias ordoni... jen!...

– Tio videblas, Ivĉjo, frato mia, videblas!... Vi ja scias, kiam mi alvenis, mi ne havis konatojn, mi pasumis tra plugkampoj, tra la vilaĝo, mi iris, plurafoje, eĉ al la rondodancejo, tie mi lin vidis.He, frato, li elstaris inter la gejunuloj!... Vi ne scias, kiel mi lin ekamis!

Ivano estis feliĉega.

– Mi rigardis la aliajn... Diablidoj ili estas!... Jen, la filo de la vilaĝestro... aŭ la filo de Ŝokĉaniĉo... cetere, jen ankaŭ la malfeliĉa Aleksido!...La ŝtelisto, la hajduko! Ĉiuj ili estas samaj, kvazaŭ havus la saman patron. Ne ekzistas en ili la fajrero de familiestra animo, ne... kiel diri... ĉio en ili estas, frato mia, hajdukeca...

– Dankon al vi, kara agao, ke via opinio pri mia Lazaro estas tiel bela... Li eraris pafante al la malfeliĉulo...

– Kion vi diris, homo?... Kiu ja ne pafus se oni forportis tion, kio estas ŝvitlabore akirita?... Mi ne scias kion vi opinias, sed mi (mi ja estas saĝa homo) mi farus la samon, kion faris Lazaro!...

Ivano nur levis la ŝultrojn, sed lia animo estis dankoplena al la turko...La akrevidaj okuloj de Piro tuj rimarkis tion...

– Ĝuste tio konfirmas, ke li estos imitinda familiestro – daŭrigis Piro – vera, fiera familiestro... Marinko tiam rakontis al mi ĉion kio okazis, kaj mi diris al li: do iru, mi petas, trovu kaj venigu Lazaron al mi. Eble li rakontis al vi...

– Jes, li rakontis al mi. Li diris, ke li estis timfrapita, seď vi alparolis lin homece, bele, tial li ploris kiel malgranda infano...

– Ha-ha-ha-ha! – ridis Piro – jes, li ploris. Tamen, mi tion komprenis!... La homon oni ne devas riproĉi, al la homo oni devas konduti bone. Oni unue devas la homon moligi...

Ivano ekgapis al la turko, mirante pri tioma homeco.

Piro, vidinte ke li atingis tion, kion li volis, nur ekridetis kaj diris:

– Tamen, mi aŭdis ke en la vilaĝo cirkulas diversaj onidiroj?

– Negrave, mi petas vin! – diris Ivano. – Oni diras ke li pafis al Stanko pro knabino...

– Absurdaĵo!...

La turko levis la ŝultrojn...

– Mi estis ektiminta. Mi scias, mi aŭdis de virinoj, ke li elektis la ineton de Seviĉo... kaj, je Dio, diversaj pensoj eksvarmis en mia kapo!... Tamen, dank al Dio, ĉio estas bona!...

La turko ĝuste tion atendis.

– Kion vi ĵus diris?! Ĉu li amas la knabinon?

– Mi lin ne demandis, oni tion diris al mi.

– Ŝi ja estas bona knabino.

– Bona.

– Kunigi ilin estus bonfaro! – diris la turko, dum okuloj liaj briligis teneron.

Ivano perdis pensipovon. Li konvinkiĝis ke la turko vere amas lian Lazaron.

– Nu, ni provos...

– Kial provos? Tion fari vi devas!... Se la infanoj amas unu la alian – ili geedziĝu. Ne ekzistas pli granda peko, ol disigi geamantojn!... Vi devas tion fari... Kvankam vi ne faris tion ĉi-aŭtune...

– Negrave – tion mi organizos dum antaŭfasto!... – diris Ivano.

– Min tre interesas ĉu ŝi vere plaĉas al Lazaro! – diris Piro. – Jen kion mi faros! Mi diros al Marinko ke li demandu Lazaron... Neniu tion faros pli bone ol Marinko!... Vi grakas kontraŭ tiu homo, sed, je Dio, li estas vere bona homo. Mi simple diros al li; se Marinko demandos, Lazaro mensogi ne povos!...

– Marinko ne scias, ne scias! Mi demandis lin, sed li ne scias...

– Tiukaze, li demandu Lazaron. Post tio... ni festenegos! – diris Piro, dum okuloj liaj larmiĝis. – Vi ne scias, Ivano, frato mia, kiel estas vivi inter la homoj kiuj ne ŝatas onin!... Hej, mi tre ŝatus havi iun, kiun mi edzigos aŭ edzinigos!... Mi estas sola kaj izola en la mondo. Mi havas neniun krom dion, nur li vidas miajn dezirojn kaj mian koron!... Mi donus ĉion ke ĉi tie la homoj min komprenu!... Mi, kara mia, eĉ al malgranda formiketo ne povas malbonon deziri, des malpli al homo, al dia estaĵo!...

Li klinis la kapon kaj ekĝemis...

Ivano preskaŭ sentis kompaton... Li ekpensis: al Piro vere estas malfacile... Tial li diris:

– Ne riproĉu, kara agao, ne riproĉu! Homoj ni estas, tial ni eraras. Ni simple evitadis vin, pensante: kion fari, fremdulo li estas... Eble al li malplaĉas kiam ni interparolas kun li... Sed nun ne zorgu! Jes, jes, (li laŭtigis la voĉon) mi interparolos kun la homoj, mi diros al ili ke vi estas bonulo... ke vi...

– Ne!... ne faru tion, Maraĵĝiĉo! Mi deziras ke ili mem ekkonsciu mian homecon!

– Lasu tion! Multaj jaroj pasos ĝis kiam ili tion komprenos!... Lasu tion al mi! Ĉar, jen, mi konfesos tion al vi!... Ankaŭ mi mem neniom kredis al vi!... Ni ne kutimiĝis ke vi, la turkoj, ridetas al ni; tial, kiam mi unuafoje vidis ke vi mielas, mi ekpensis: ĉi tiu ne estas bonintenca!... Mi ĵuras je dio!... Sed nun... nun mi parolos alimaniere al ĉiuj.

La koro de Piro dancis pro ĝojo, sed li bridis sin.

– Ni ne parolu pri tio!... Tamen... Lazaro estas tre kara al mi!... Mi volas vidi lin feliĉa kaj gaja – tiam ankaŭ mi estos gaja!... Mi volas ke mi svatu por li la ineton!...

– Mi ne kontraŭstaras. Jam hodiaŭ mi informos Seviĉon – diris Ivano.

– Unue irigu al mi Lazaron, ke mi demandu lin. Mi volas scii ĉu tio estas laŭ lia volo?

– Sendube estas!

– Nu, tiukaze mi volas, ke mi ĝojigu lin!... Mi petas vin, ebligu tion al mi!

– Mi ebligos, kial ne! Mi irigos lin, tuj kiam mi venos hejmen... – diris Ivano, leviĝonte.

– Sidiĝu, sidiĝu!... Kial vi hastas?

– Nenial. Mi opiniis, ke vi estas okupita.

– Mi ne estas okupita. Sidiĝu. Mi sopiras, kara mia, aŭdi normalajn vortojn de homoj... Sidiĝu.

Ivano sidiĝis.

– Mi petas, Ivĉjo, diru sincere, kiu inter vi plej ofte estis kontraŭ mi? – ekparolis la turko okulfiksante Ivanon.

– Nu, verdire preskaŭ ĉiuj! Jen, ankaŭ mi estis kontraŭ vi!

– Mi scias, scias... Tamen, diru, kiu la unua komencis?...

– Nu... kiel diri... mi ne scias... Se mi bone memoras – la popo... Al li vi ne ekplaĉis. Mi memoras, ke li foje diris: „Li estas turko, kaj la turko ne povas esti bonintenca al ni! Mi preferus ke li min salutu turke „.

Piro mordis sian lipon... sed ekridis:

– Ha-ha-ha-ha!... Bona homo, bona popo!... Li mispensis!...

– Tio evidentas – diris Ivano.

– Tamen' mi ne koleras pri li. Salutu lin, diru al li ke mi sciis ke li estas la inicianto, sed' mi ne koleras. Li estas bona homo, vera popo. Al mi ja plaĉas ke li estas ĝuste tia. Ĉar, kiam li ekkonos min, li alimaniere parolos pri mi... Tamen, diru al mi, kion faras la vilaĝestro Joĉjo?

– Kiu?... Ĉu li?... Li pensas pri vi samkion pensas la popo... Ilin du kvazaŭ la sama patrino naskis... ili nenion faras unu sen la alia!... Tamen, ne zorgu!... Mi ĉion diros al ili!...

– Min vere tre ĝojigas ke vi tiom multe zorgas unu pri la alia! Tio estis tre bone. Nur la hundido, Alekso, kiu vin mensogis...

– Mi kompatas Alekson! – diris Ivano. – Kredu, kiam mi vidas lin kun malplektitaj haroj, kun la ĉibuko en la manoj, mi sentas plorurĝon!... Bonega homo li estis!... Pli bone estus se li tiun dronigus, kiam tiu ankoraŭ estis kakaĝa, tiam li ne povus Alekson tiel hontigi kaj kompromiti!...

– Jes, vere, kiel li vivas?

– Ne demandu!... Neniu lin vizitas!Neniu lin salutas, neniu lian saluton akceptas!... Al mi ŝajnas ke li perdis la prudenton...

– Nu, frato mia, li kulpas, ĉar li ne edukis bone siajn samdomanojn!...

– Kion fari? Tia estas lia sorto!... Tamen, je Dio, mi kompatas lin kiel propran fraton!... Multe da salo kaj pano ni kune formanĝis!...pli en lia domo, ol en la mia...

Tiel ili parolis pri la plej diversaj aferoj. Piro interesiĝis, kaj la simplanima Ivano rakontis kaj tion kio estas dirinda, kaj tion kio ne estas dirinda.

Kiam Piro konvinkiĝis ke ĉio kion Marinko al li rakontisestas vero, kiam li komprenis ke ĉiuj ĉi homoj estas simplanimaj, sed fieraj, li komprenis ke lia plano sukcesos.

– Nu, ek, Ivĉjo, frato mia, interparolu kun la homoj. Diru al ili, ke mi ne estas tiel malbona homo, kiel ili pensis.

– Ne zorgu!... Mi nun iros al la popo. Mi ĉion klarigos al li – diris Ivano leviĝonte.

– Vi povas diri al li, ke mi ne koleras kontraŭ li!...

– Tute ne zorgu pri tio, kara agao!... Mian langon ne plektis mia patrino; mi ja scipovas diri kion mi pensas!... Vi vidos ke ni igos kunuloj, ke ni estos bonaj amikoj!... Mi kredigas vin, kiam vi komprenos kiaj homoj estas la nigramarĉanoj – vi neniam ekdeziros forlasi nin.

– Mi preferus morti ĉi tie kun vi!...

– Adiaŭ, kara agao!

Piro etendis al li la manon:

– Adiaŭ, Ivĉjo, frato mia!... Tamen ne forgesu interparoli kun Seviĉo!

– Mi certe ne forgesos!... Jam hodiaŭ mi vizitos lin!...

– Sciu, vi naskigis Laĉjon, sed mi lin amas!

– Dankon al vi! Adiaŭ!

– Adiaŭ al vi!...

Ivano foriris ĝojabunda. Dumvoje li pripensadis la vortojn de Piro. Al li ŝajnis ke malmutas kristanoj, kiuj estas tiel bonanimaj, kiel Piro.

„Jes... mi amikigos lin!... Mi komprenigos al la popo kaj Joĉjo kiel delikata homo Piro estas!...Ni vere kondutis peke kontraŭ li!... Jen kiel li zorgas pri mia Lazaro!...Kaj, vere, Lazaro ja estas knabo eksterordinara!... Li estas dezirinda samhejmano!... Mi – ne! Mi nenikaze pafus al Alekso; sed li, li estas vera viro, pretas mortigi por gardi tion, kio estas lia!...Li pravas, la bravulo!...“

La turko staris sur la sojlo kaj postrigardis Ivanon ĝis la momento kiam tiu enboskiĝis. Post tio li revenis en la ejon, ordonis ke oni alportu al li kafon, kaj, elblovante densajn nubojn da fumo, vidigis al si en la ringoj vidindan bildon...

– Ek, ek, Nigra Marĉo!... – ridetis li. – Tempo pasas, la tempo alportos vin al mi donace!...Okuloj viaj elsaltados pro mia beno!... Mi alportas al vi tian pacon, ke poste eĉ Dio vin ne povos interpacigi... Alvenis lupo al ŝafoj...

## 7. DIVIDIĜO

Ivano endomiĝis. Li estis gaja kaj bonhumora. Ĝojante pro siaj sukcesoj, li komencis ŝerci kun infanoj, kiuj eliris renkonte al li. Li kutime ŝercis elpensante por ili kromnomojn.

– Hej, vi, etulo! Kial vi estas nudpieda, diru?... Kial la patrino ne donis al vi ŝuojn, nu?... Vidu kiel la hirta Hirnjo elektis siajn ŝuojn; Hirnjo jes, kiam ĉesos nazmuki, ŝi estos rigardindaknabino!...

Preteririnte la infanojn, li endomiĝis.

– Kie estas Lazaro? – demandis li sian edzinon Kersmanian.

– Mi ne scias, li estas tie, en la korto.

– Venigu lin!

Baldaŭ alvenis Lazaro. Alrigardinte lin per dolĉa, dorlotema rigardo, Ivano diris:

– Laĉjo, filĉjo!.. Iru tuj al la subestro, li ial alvokis vin.

– Bone, paĉjo.

Lazaro jam turniĝis forironte, sed Ivano haltigis lin.

– Atendetu! – diris li.

Haltinte, Lazaro alrigardis lin.

– Diru, sincere?

– Kion, paĉjo?

– Vi, bubaĉo, vi jam... ĉu?... Ĉu?

Lazaro diris nenion, nur mallevis la kapon, kompreninte la rigardon de la patro.

– Ha-ha-ha-ha!... Jen, do! Edziĝi li volas, sed kaŝas tion de la patro!... Ĉu vi ne scias ke mi tion delonge scias, diru?... Vi ne scias!... Mi ja aŭdis, sed mi ne diros de kiu... Nun, ek, ek!... Ni priparolos tion!...

Lazaro eliris. Koro lia batis pro ĝojo... Se li povus, li flugus tra senfolia pedunkla kverkaro. Al li jam ŝajnis ke ankaŭ la folisenaj arboj ridetas al li.

Pro ĝojo li preskaŭ forgesis preterpase viziti la popon. Li jam estis preteririnta ties domon, sed li revenis, eniras la korton, kaj poste ankaŭ la domon. La popo sidis apud fajro kun la vilaĝestro Joĉjo.

Demetinte la ĉapon, Lazaro kisocele proksimiĝis al iliaj manoj.

– Viva estu, Laĉjo! – diris la popo. – Kial vi alvenis?

– La paĉjo petas vin, se vi ne estas okupata, viziti lin, li ja volas ion gravan diri al vi.

– Bone, Laĉjo, bone.

Lazaro denove kisis iliajn manojn, kaj preskaŭ trote foriris al Piro...

– Jen, nun vi vidas – daŭrigis la popo ilian interparolon kiun Lazaro estis interrompinta– ke estas tiel, kiel mi jam tiam diris al vi... Mi ankaŭ nun memoras Stankon, kvazaŭ li estus antaŭ miaj okuloj!... Ne povas homo tiel eksplodi sen ia ajn kialo. Ĉu vi vidis kiel li dum momento transformiĝis: la infano viriĝis!...

La vilaĝestro silentis.

– Jam tiuvespere diversaj pensoj turmentis min – daŭrigis la popo. – La tutan nokton mi ne povis ekdormi. „Eble ni pekis kontraŭ li? – pensis mi. Tiam mi rememoris ion alian... kiel Alekso konsterniĝis... jen... Tiam mi denove ekpensis: diablo scias!... Se vi vidus Alekson tiun tagon, kiam mi por la infano preĝis!... Ĉu vi scias ke eĉ mi preskaŭ ekploris, mi, kiu neniam fluigas larmojn!... Vere, ne estas facile rigardi maljunaĝan homon ploranta.

– Vi pravas!... Pravas!... Ĉu vi memoras kia li estis je la juĝejo, kiam li volis buĉi Marinkon?...

– Kompreneble, tio vere ne estis tolerebla! Ne estas tio facile!...Li nenion kulpas, ni ja kune pasigis nian junaĝon, kune estis paŝtistoj... neniam, absolute neniam eĉ paneron aliulan tiu homo prenis...

– Tio estas vero... – diris la vilaĝestro. – Tamen, kion fari? Ni ja trovis tion, frato mia, en lia domo... Eĉ se ni volus defendi lin, ni ne sukcesus.

La popo enpensiĝis. Fajro krepitis en la fajrejo...

– Ĉu ni iru alIvano? – demandis li vilaĝestro lin post longeta silento.

– Ni iru. Ni iru kune.

– Ek...

La popo leviĝis, surŝultrigis sian „hartufan kovrilon“, kaj prenis komusbrandon.

– Stoja! – diris li al la popedzino. – Se iu serĉos min, diru ke tiu atendu, sed se estos urĝe, irigu tiun al la domo de Ivano, tie mi estos.

Kaj ili ekiris al la domo de Ivano. Ambaŭ silentis kiel mutuloj...

Preterirante la domon de Alekso, ili vidis lin antaŭ la domo, staranta nudkape; li levis la kapon, observis la ĉielon, dum vento flirtigis liajn grizajn harojn.

La vilaĝestro Joĉjo skuigis malgaje la kapon.

– Estus pli bone se li mortus!

– Estus! – diris la popo. – Ve al li!... Al mi ŝajnas ke li jam perdis la prudenton.

– Kompatindulo! – diris la popo.

Ili preteriris la domon. Korojn iliajn kvazaŭ premegus roko...

Ivano renkontis ilin ridetante.

– Jen, vi kvazaŭ scius ke mi bezonas vin ambaŭ!...

– Nu, ni alvenis! – diris la popo salutante. La hemajnoj, kiuj estis tie, kisocele proksimiĝis al iliaj manoj.

– Bonvolu sidiĝi! – diris Ivano. – Infanoj! Alportu iom da brando.

Ili sidiĝis. Oni alportis kukurbeton kun malvasta kolo.

Nun mi volas rakonti kiel drinkis niaj avoj.

Maĉvo ne estas riĉa je vinberejoj. Vinon oni povis trovi tre malofte, tial oni malofte ĝin drinkis: nur je eŭkaristo kaj viatiko. Tamen, en Maĉvo abundis pomaj kaj prunaj fruktarboj. La maĉva prunbrando kaj pombrando ĉiam estis laŭdataj. Ne ekzistis domo sen tiuj drinkaĵoj. Neniu foriris el aliula domo ne fortrinkinte glason da unu el tiuj du drinkaĵoj.

Pombrandon oni drinkis el botelkukurbo aŭ lignobotelo, depende de tio, kion oni havis – kaj prunbrandon el kukurbeto, kies kolo estas tiel malvasta, ke eĉ unu guto malfacie trafluas. Oni devis suĉi du-tri tutajn minutojn por enbuŝigi unu glutaĵon.

La popo eksuĉis, kaj forglutinte, transdonis ĝin al la vilaĝestro.

– Ho, ĝi estas bona!Bona brando, oni ne povas multe drinki, sed ĝi estas glutenda!...

– Ho-ho-ho!... – ridis Ivano.

– Vi diris la veron, popo, – diris la vilaĝestro, forglutinte – ne estus bone se la kukurbo havus pli larĝan kolon

– Mi ne scias, ĝin mia Lazaro friponfaris. Li faras iste.

– Nu, kion vi nun faras, kara? – demandis la popo, post mallonga silento.

– Kion mi povas fari? – diris Ivano. – Pro la pluvo oni ne povas enkampiĝi. Tial mi sidas ĉi tie kun la infanoj kaj interparolas. Hieraŭ ni umis iom da maizo, kaj hodiaŭ– jen... Mi vizitis la subestron.

– La subestron? – interrompis lin popo.

– Jes, li alvokis min.

– Nu, kial li alvokis vin?

– Senkiale, ni simple interparolis... Cetere, li vere estas bona homo, je dio!... Mi tion ne sciis, sed li vere estas bona homo!

– Ĉu? – diris la popo sulkigante la brovojn.

– Mi ripetas, li interparolis, frato mia, pri ĉiaĵoj, kiel se ne estus turko. Jen, kun mi li parolis kaj pri vi kaj pri Joĉjo...

– Sed kion li parolis? – malvole demandis la popo...

– Li diris: bona estas via popo. Ĉarma homo! Tian popon mi neniam vidis, tian popon mi ne memoras!... Same la vilaĝestro!... Vi ne scias Ivano,

diris li, kiel al mi plaĉas tiuj du homoj.En Nigra Marĉo ĉio estas vere bona nur dank al ili. Saĝaj ili estas, jen!

Dum Ivano parolis, la vilaĝestro alrigardis la popon, kaj vidis ke al li ne plaĉas la vortoj de Ivano. Li estis ion dironta, sed la rigardo de la popo haltigis lin...

La naiva Ivano rakontis ĉion, kion li kun la turko interparolis, kaj, samkiel faras ĉiuj kiuj iun laŭdas, li komencis troigi.La turkon li komencis glori.

– Ĉarma la homo! Miela la homo! Ankaŭ Marinko!Vi ja scias kiom ni grakis kontraŭ Marinko. Sed la turko diras ke Marinko estas vere bona homo. „Marinko estas iomete, diris li, „maldiligenta, sed bona, honesta...“ Jen... li ĉiujn nigramarĉanojn kredas agrablaj homoj... Nur pri Alekso li parolas malbone, Alekso al li ne plaĉas. Li eĉ aŭdi pri Alekso ne volas!...

La popo ne plu povis elteni.

– Diru, Ivano, ĉu pro tio vi min alvokis?

– Nu, mi... Kial ni, frato mia, senkiale evitas tiun homon!... Se li estus tia... se li intrigus, mi estas la unua kiu forturnus la kapon de li!... Sed li estas bona homo!... Jen, li eĉ diris al mi, ke li deziras ke mi edzigu Lazaron!... Mi nur staris ŝtone!... Li diris: „Lazaro estas vera familiestro!... Vi tion ne farus, sed li pretas perei por tio, kio estas lia!...“ Je Dio, li tiel amas Lazaron, ke tio estas nekredebla.

La popo kaj la vilaĝestro diris eĉ ne unu vorton.

– Nu... ĉu vi scias kio estas farinda?

– Kio? – demandis la vilaĝestro.

– Ke vi du repaciĝu kun li.

– Ni neniam kverelis– diris la popo seke.

– Mi scias. Sed li aŭdis...

– Kion li aŭdis?

– Ke vi du fiparolas pri li.

– Kiu tion diris al li?

– Mi ne scias, sed li diris, ke li tre bedaŭras pro tio. Li vin amas kaj deziras havi kun vi amikajn rilatojn...

La popo fiksrigardis Ivanon.

– Ĉu eble vi estas tiu, kiu diris al li ke ni malamas lin? Ivano alrigardis la popon, subite rekonsciiĝinte:

– Kion vi parolas, popo!... Krucsignu!... Ĉu mi povus tion diri al li!...

Ivano mensogis, ĉar lin konsternis la rigardo de la popo.

– Tamen, kiu alia povis tion diri al li? – demandis la popo serioze.

– Kial ĝuste mi? – diris Ivano, perceptante strangan honton, ĉar ĝuste li, samkiel ni jam scias, diris tion al la turko. – Nu... tio ne gravas, li estas bona homo...

– Bona homo, bona homo!... Jes, bona, sed por la liaj, por la turkoj!... Ve al tiu, kiun li amas!... Nu, malforgesu kion mi diros al vi, Ivano!...Ĉiuj nigramarĉanoj, ĉiuj vi, miaj amikoj, amu lin kiom vi volas – mi lin ne amos!... Mi neniam atendas bonon de turko... Eĉ se mi vidus per ĉi tiuj miaj maljunaj okuloj – mi tamen ne kredus! Mi dirus: maljuniĝis miaj okuloj, tial mi misvidas!... Do nun, se vi jam konsentis transdoni la mesaĝon de Piro al mi, transdonu ankaŭ la mian al li!...Adiaŭ!

La popo tremis pro rankoro. Li preferus perdi ion ajn, ol aŭdi ĉi tion...

– Tamen, sidiĝu, popo! Sidiĝu, Joĉjo!... – kriis Ivano, ĉar kaj la popo kaj la vilaĝestro leviĝis forironte.

– Kial ni sidiĝu?... Ni finis la interparolon pro kiu vi invitis nin! – diris la vilaĝestro.

– Mi ne pro tio invitis vin!... Tion mi kromdiris. Mi vin alvokis por priparoli svatadon. Mi volas svati la filinon de Seviĉo por Lazaro... Sidiĝu, homoj!... Ne estu tiel koleremaj!... Mi nenion malbonan volis diri.

Tiumomente subite aperis la alvokisto Simo.

– Popo, oni alvokas vin hejmen por preĝi.

– Bone, mi iras. Adiaŭ, Ivano!

– Sidiĝu iomete, ho homo!

La popo tamen eldomiĝis.

Ivano insistis ke la vilaĝestro restu, sed ankaŭ tiu, malvolante resti kiam la popo foriris, adiaŭis kaj eldomiĝis...

Ivano restis sola. Honto ekregis lin. Nun al li ekŝajnis ke vere estis nehoneste tiel paroli al la turko pri la popo kaj vilaĝestro... Ĝis kiam la popo komencis paroli, li pensis ke li faras gravaĵon... Sed nun, nun ankaŭ al li ĉio ĉi ŝajnis malbela. Tial, kaptinte la harplektaĵon, li ekkrietis:

– Stultulo maljunaĝa! Vi griziĝis, sed vi nenion scias!...

Bonhumoro, bonvolo... ĉio ĉi forpasis... restis io malfacila kiel roko sur la brusto...

La popo kaj vilaĝestro estis irantaj silente. Ili denove vidis Alekson antaŭ la domo, vidis ke laŭlonge de lia malplektita hararo fluas akvo.

La popo, kvazaŭ por si mem, sed tamen sufiĉe laŭte ke ankaŭ la vilaĝestro povu aŭdi – diris:

– Ĉi tiu neniam tion farus. Inter liaj lipoj neniam aŭdiĝussekreto!... Tamen ni faris tion kontraŭ li!...

## 8. OBSTINECO

Strangaj pensoj ekregis Ivanon. Unuflanke honto pro tio, kion li faris, sed aliflanke, jen, la unua promeso kiun li donis al la turko, okazis neplenumebla...

Li ja ne volis trompi la turkon, ne pro timo, sed ĉar al li ekŝajnis, ke por la turko li estas tre grava, kaj li volis ke tiu graveco ne perdiĝu.

Tamen, jen kion ili faris!... Unu vorto de la popo fuŝis ĉion!...

„Kial li estas tia? – pensis Ivano. – Mi pensis ke li estas saĝa homo, sed jen, jen kion li faris!... Se li almenaŭ volus interparoli! Mi dirus al li ke la turko estas homo, kiu vere zorgas pri nia bono, kiu bezonas nian amon – kaj li komprenus ke estas tiel.Tamen kion fari, li eĉ auskulti ne volas kiam oni la turkon mencias!...“

Tial li ekkoleris kontraŭ la popo. Tia homo, kia estas Piro, tre bone agordus kun la popo. Ili duope povus multan bonon fari por Nigra Marĉo... Tamen, se ili du ekkverelos, tio sendube ne estos bone...

„Ho, kial li estas tia! – diris li preskaŭ laŭte. – Ankaŭ la vilaĝestro estas tia! Li algluiĝis al la popo, nun estas pli malfacile paroli kun li, ol kun la popo!... Mi forgesi ne povas lian rigardon, kiam mi provis haltigi lin!...En liaj okuloj mi legis, kvazaŭ li volus diri: Ho, ankaŭ vi aliĝis al la turkoj!“

Tiam li denove ekregis honto. Li komprenis, ke li pekis, sed li sentis bezonon pravigi sin.

„Mi vere interparolis kun la turko, mi vere diris al li, ke la popo kaj vilaĝestro fiparolas pri li, sed tio estis nur interparolo... Finfine, Piro ja estas bona homo...

Li kroĉiĝis al la penso ke la turko estas bona homo... Li kredis, kredegis, ke la turko ne estas malbonintenca... Sed tamen, tamen io bruligis lian animon; ia stranga, malagrabla sento ekregis lin... Se li povus fuĝi de si mem, se li povus kun iu ajn sincere paroli...

Kaj tiam, bonŝance, alvenis Marinko, kiu ekiris el la domo, kaj preterpase vizitis Ivanon. Vizaĝo lia ridetis, ĉar li vidis Ivanon revenanta post vizito al Piro.

– Bonan' tagon, Ivĉjo!

Pro lia alveno Ivano ekĝojis.Li eksaltis desur la seĝo:
– Dio vin favoru!
– Mi eniris preterpasante por vidi kion vi faras...
– Vi tre bone faris, sidiĝu... – diris Ivano... Mi ja sentis solecon.
En ordinaraj cirkonstancoj li kondutus malvarme al Marinko, sed nun li devis interparoli kun kiu ajn. Nur kun Marinko li povis bele paroli pri la turko!
Marinko sidiĝis.
– Diru, kie estas Lazaro? – demandis li.
– Li foriris al la subestro, kiu alvokis lin.
– Bone, bone... Li estas bona homo. Ĉiukaze, Nigra Marĉo pli bonan neniam havis!
– Li estas bona, sed ne ĉiuj opinias tion! – elbabilis Ivano.
Marinko okulfiksis lin.
– Kiu ne opinias tion?
Ivano mansvingis.
– Negrave, forgesu tion!...
Tamen, Ivano eraris, pensante ke li povas ion kaŝi de Marinko. Priflarinte sekreton, tiu homo nefacile rezignas. Li sturmus iun ajn por malkovri la sekreton, eĉ se dum tiuj sturmoj li riskus la vivon...
– Je la sankta kruco, Ivano, kiu ne opinias ke la subestro estas bona? – komencis li insisti, okulfiksante Ivanon tiel, ke eĉ ne unu muskolo sur ties vizaĝo povis nerimarkite ekmoviĝi.
– Negrave, ne pensu pri tio! – rediris Ivano.
– Kial negrave?... Diru, mi petas, al mi?
Ivano silentis. Li denove sentis konsciencriproĉon. Kiam Marinko komprenis, ke Ivano ne volas diri, li decidis aludi.
– Ĉu vi vere ne volas diri?
– Nu... – ekparolis Ivano.
– Vi ne devas!... Mi ja mem scias. Ĉu vi volas ke mi diru al vi?... Tio estas la popo kaj vilaĝestro, ĉu ne?...
Ivano komencis ĵetadi rigardon ĉiudirekte.
– Ĉu ne?
– Nu... jes, ĝuste ili...
– Tamen, kial ili misopinias tion?
– Negrave...
– Ĉu vi aŭdis, Ivano! Tia estas la vivo! Tamen, se la situacio estas tia – mi devas diri, negrave kio okazos!... Kion opinias tiuj homoj?... Se ili volas, frato mia, risku proprajn kapojn, ne la niajn!...Ili malamas la turkojn!... Nu, bone, neniu amas ilin!... Kiu amas ilin, en ties domon turkoj venu!... Ĉu vi pensas ke mi flatas la turkojn pro tio, ĉar mi amas ilin?... Dio donu, ke ili al

Dio estu karaj, samkiom ili estas karaj al mia – tamen, mi devas tiel konduti, frato mia! Mi ne povas batali kontraŭ ili! Ĉar mi tion ne povas, mi almenaŭ povas kariĝi al ili; dorlotema ŝafido du ŝafinojn suĉas!... Sed kion pri Piro?... Piro, frato mia, kvazaŭ ne estus turko!Jen, diru mem!

– Preskaŭvere... – konfirmis Ivano.

– Ĉu li ne kondutis home, homece al ni?

– Jes, tio estas vero, jes!

– Jen, vi interparolis kun li. Ĉu vi konsentas ke li estas plaĉa homo?

– Mi konsentas!...

– Ĉu vi konsentas ke li deziras bonon al ni ĉiuj?

– Jes, al ĉiuj!

– Kvazaŭ li kreskus kune kun ni.

– Ververe!

– Tamen la popo kaj vilaĝestro kontraŭas lin, ĉu ne?

– Jes!...

– Nur al ili li ne plaĉas!... Sed kial?

– Mi ne scias.

– Ve al ni, ĉar ni havas tiajn estrojn! – ekkriis Marinko. – Ve al ni!... Ĉu lia homeco, fraĉjo mia, al ili ne estas sufiĉa! Kiun li atakis? Ĉu en Nigra Marĉo okazis ke turko atakis ies domon aŭ domanon? Ĉu okazis?... Dekiam li estas en Nigra Marĉo – ni agaas. Oni donas al Dio tion, kio apartenas al Dio, oni donas al la imperiestro tion, kio apartenas al la imperiestro, oni donas al la agao dekonon – kaj ĉiuj zorgoj malaperas!...Ĉu ne estas tiel?...

– Estas!...

– Estas, estas!... Nur dank al Piro!... Al tiu Piro, kiun insultas niaj popo kaj vilaĝestro – ili estas senprudentaj, ĉar ili kadukiĝis, stultiĝis!...Tamen, Ivĉjo, frato, ni ne devas al ili obei. Ili pereigos nin ĉiujn!...

Tiam Marinko ekrakontis pri aliaj subestroj, pri malicaĵoj kiujn ili faras, ne nur ili, sed ankaŭ aliaj turkoj en iliaj vilaĝoj. Ĉion ĉi li komparis kun la situacio en Nigra Marĉo, kaj komencis laŭdegi Piron..Post tio li ekparolis pri la kulpo de Lazaro:

– Se ĉi tie estus iu ajn alia turko – ve al via Lazaro!... Ĉiu alia reagus!...Ĉiu alia permesus al Stanko fari ĉion, kion tiu deziras.Ili sendube dirus: „Min tio ne interesas! Estas bone kiam hundaj nekreduloj mortigas unu la alian!...“ Tamen, ĉi tiu tion ne permesis... Ĉu vi scias kion li diris: „Mi ekstermos la fekulojn-ŝtelistojn, ke ili ne fetorigu ĉi tiun bonan vilaĝon!...“ Piro ne povas rigardi sentaŭgulojn. Cetere, vidu kiom li zorgegas pri via Laĉjo! Laĉjo estas infano, sed li venigas Laĉjon al si, instruis kaj konsilis lin konduti bone kaj honeste!...Vi ja eĉ ne scias ĉion!... Tiun tagon, kiam Laĉjo pafis al tiu ŝtelisto, kaj fuĝis en arbaron, Piro alvokis min kaj diris: „Iru, diris li, venigu tiun knabon.

Tiu krimulo mortigos Lazaron, se li Lazaron trovos en arbaro... Tiun tutan nokton mi pasumis tra arbaro, ĝis kiam mi trovis lin. Tiel estis, kara Ivano!... Li estas amiko kaj de vi, kaj de via domo; ne neglektu lian amon!...

Ivano klinis la kapon, kaj enpensiĝis. La vortoj de Marinko restis profunde en lia koro. Li sentis ke ili estas malfalsaj. Li kredis ke la turko estas lia amiko, kiu multan bonon por lia domo faris...

Sed tamen, tamen!... Ĉi tiuj homoj, kun kiuj li kreskis – la bona popo iĝas kruela, tuj kiam oni mencias la turkon. La popo ne povas kun li paciĝi!...

Sed tamen... Piro... Ĉu Marinko ne pravas?... Ĉu Piro por li ne faris pli da bono, ol ĉiuj nigramarĉanoj kune?... Ĉu li nun forturniĝu de Piro, ĉu malakceptu lian amon, kiun Piro tiel tutkore proponas?... Ne, ne, ankaŭ tion li ne povas fari!...

Tial li perpleksiĝis sentante ke senprudentiĝas. Li ne sciis kion elekti!... Unuflanke infanaĝo, juneco, la tuta vivo... aliflanke amikeco, amikeco sincera, plenkora... Nek tion, nek alion li povas forpuŝi. Tio doloras!... Kaj tio kaj la alio enkoriĝis. Eĉ se li volus elŝiri ion, li ne povus tion fari nelezinte la koron...

Marinko rigardis lin. Lia okulo kvazaŭ penetrus en lian koron. Li vidis lukton, teruran lukton... Li staris tie, kiel diablo, por ne permesi al Ivano elekti bonan vojon Kiel kato muson, tiel Marinko rigardis Ivanon, pensante: hezitu, hezitegu, tamen vi estos mia!...

Ivano leviĝis.

– Kien vi iras? – demandis Marinko. Li diris nenion, sed komencis iri tra la ĉambro. Marinko decidis aldoni ankorau kelkajn vortojn.

– Tamen, je Dio – diris li – mi ne komprenas, kiaj amikoj ili estas. Kion ili dezirus? Ĉu al la homo, kiu al vi faris tiom da bono, vi eĉ dankon diri ne povas?... Ho, Dipatro, Dipatro!... Mi, frato mia, tiel ne kondutus! Mi dirus al ili: fratoj ni estas, ni harmonie vivis kaj vivos. Tamen, ĉi tiu homo por mi faris tiom da bono, ke mi ne povas lin forĵeti!...

Ivano abrupte haltis, turniĝis al Marinko kaj ekrigardis al li rekte en la okulojn.

– Tamen, mi promesis al la subestro, ke mi pacigos lin kun ili!... Mi pro honto ne povas la homon en la okulojn rigardi!...

– Vi povas! Vi ja tutkore penis fari tion, sed se ili ne volas – kion vi faru?...

– Tamen mi ne povas rigardi lin en la okulojn! Mi ja diris al li: „Ne pensu pri tio, mi ĉion ordigos!...“ Sed tamen, jen kio okazis – ekĝemis malespere Ivano.

En Marinko ekdancis rabobesto. Lia koro ekbategis pro ĝojo, ĉar aperis tiel bona momento.

– Jen, vi ankoraŭ fantazias! Vi devas al ili obei, pro ili iri kaj en fajron, kaj en akvon, sed ili vin ne volas aŭskulti eĉ kiam temas pri via honoro, pri via

griza harplektaĵo!...Hej, kara Ivano, ve al vi!... Ĝis kiam vi, kara mia, restos freneza?... Ĉu vi opinias ke la duopo iam ajn konsentos ke vi pravas?... Ve al vi!... De nun ili kun vi eĉ kamaradi ne volos!... Vi ne rajtas ŝati tion, kion ili ne ŝatas!...

Ivanon kvazaŭ oni brulvundus per bolanta akvo.Li sentis ke la vortoj de Marinko estas absolute veraj. Li sciis kiom la popo povas malami. Per propraj okuloj li ekvidis profundejon, aperintan inter ili... Tamen li komencis kontraŭstari.

– Kion? – diris li. – Ĉu eblas ke ili tiel kondutos al mi?...

– Ha-ha-ha!... – ekridis Marinko. – Dio mia,̓ vi estas vera infano!... Kara mia, pli verŝajne estas ke ili kamarados kun la ŝtelisto Alekso, ol kun vi. Ili preferos kun li intrigi, ol pensi pri vi!... Ĉu vi ne konas ilin!...

Tio estas vero, verego, Marinko parolis la veron!...

Al li subite kaj la popo kaj la vilaĝestro ekŝajnis fremdaj homoj, homoj rabemaj, avidaj, akaparantaj ĉion nur por si, ne zorgantaj pri io ajn, ol pri si mem kaj pri siaj kapricoj...

Ili ambaŭ komencis malplaĉi al li. Li miris ke li povis ŝati tiajn egoistojn!... Li sentis ke ankaŭ li rajtas fari kion li volas. Kaj li kredis, ke per sia agado li atingos plu dum unu jaro, ol ili de sia estiĝo.Li jam decidis.

– Ĉu vi ja ne scias... – ekparolis Marinko, sed Ivano mansvingis kaj interrompis lin:

– Mi scias!... Vi pravas... Mi estis stultulo!...Sed ili.. ili!...

– Ho!... – diris Marinko subridante.

– Ne ridu! Homoj ni estas, tial ni eraras. De nun, min neniu plu trompos!... Ivano tion ne permesos!

– Vi pravas. Nun vi parolas saĝe.

Ivano venis al angulo, prenis bastonon kiu estis tie apogita, kaj diris:

– Ni iru al Piro.

## 9. SVATADO

La koro de Marinko dancis pro ĝojo. Li klare vidis decidecon sur la vizaĝo de Ivano. Li pripensadis nur kiel kaj kion fari, por ke Ivano neniam plu revenu al siaj malnovaj kamaradoj... Marinko estis preparanta multajn planojn, sed eĉ ne unu ŝajnis al li tute adekvata.

Tamen, Ivano jam estis decidinta. En sia animo li definitive fiksis kio devas esti farata. Li ne povos trovi por si amikon pli bonan ol la homo, kiu estas tiel granda amiko de lia filo...

Ili alvenis antaŭ la apudvojan tranoktejon. Piro estis en la ejo kun Lazaro. Aŭdinte ke Ivano kaj Marinko alvenis, li tuj ĝojplene elkuris antaŭ ilin.

Ho... vi alvenis!... Mi iom sidis ĉi tie kun Laĉjo.

Marinko okulsignis al li... La turko komprenas kaj ekridis.

– Jes... kun Laĉjo, kun la edziĝonto... bone, bone... – subridis Marinko.

– Jes, vere, kun edziĝonto! – diris Piro. – Li estas vera bravulo! Mi ne konas ineton kiu al li povus diri „ne“! – diris Piro, aprobe frapetante la ŝultrojn de Lazaro.

Ivano preskaŭ ekploris pro ĝojo, vidante kiel Piro dorlotas lian Lazaron.

– Nu, sidiĝu, amikoj miaj! – diris Piro, montrante divanon. – Prenu tabakon...

– Tabakon donu al mi, kara agao, Ivano ne tre ŝatas ĝin – diris Marinko gaje ridetante.

– Ĉu vi ne fumas?

– Mi ne tabakumas.

Lazaro pretiĝis foriri.

– Ne, Laĉjo, ne foriru. Ĉi tie nun estas ankaŭ via patro, ni interparolu.

Lazaro klinis la kapon.

– Jen, Ivĉjo. Mi ĵus interparolis kun li, mi demandis lin, ĉu li volas edziĝi.

– Kion do li diris? – demandis Ivano.

– Kion li diru – ridetis la turko – kion vi dirus, se vi estus en lia aĝo?... Li volas edziĝi, jen kion li volas!

Marinko misglutis pro rido kiam Lazaro turniĝis kaj ekrigardis tra fenestreto.

– Ĉu li elektis ineton?...

– Mi estas certa ke li elektis! Ha-ha-ha! – misglutis Marinko.

– Kiun do? – demandis Ivano ŝajnigante ke li ne scias.

– Ho, ĉu vi ne scias kiun? – demandis Piro. – La plej belan ineton en Nigra Marĉo. Ĉu povas ĉi tiel bona knabo ami malbonan knabinon?... Li deziras Jelican, la filinon de Miloŝo.

Ivano ekridetis. Li delonge sciis ke Lazaro amas Jelican.

– Nu, bone, bone – diris li.

– Mi scias, bone, bone... Nu, ĉu okazos svatado? – demandis Piro.

– Ni pripensos. Verŝajne okazos!

– Ne parolu tiel! – serioziĝis Piro. – Diru tuj: jes aŭ ne?... Jen, mi petos Seviĉon doni la knabinon.

– Kial? – serioziĝis Ivano. – Ĉu mi ne povas demandi?... Ĉu mi devas honti?... Ĉu tio estas hontinda...

– Ne estas, vere! – diris Marinko. – Se paroli pri la familio, via familianaro estas pli granda ol la lia; se paroli pri la riĉeco – vi estas pli bonhava ol li!...

– Tio estas vero! – diris Piro.

– Vi estas ankaŭ monhava – aldiris Marinko.

– Do, mi mem iros al li.

– Tio estos bone. Mi nur iomete ŝercis por rapidigi la aferon... Komprenu, la gejunuloj ne ŝatas atendi!... Se temus pri mi kaj pri vi – ni povus iomete atendi, sed...

– Tamen, nun ni nenion povas fari, nun estas fastotagoj – diris Ivano.

– Gravas ke la svatado okazu, ke oni tion sciu! – diris Piro.

– Bone. Mi jam hodiaŭ vizitos Miloŝon...

– Vi tion devas fari!...Ĉu vi ankaŭ min invitos partopreni la svatadon?

– Vin... jes, jes!

– Tie sendube estos kaj la popo kaj la vilaĝestro...

La turko haltis. Li ekrigardis Ivanon, kaj vidinte ke ties frunto faltiĝis, li demandis:

– Kio okazis?

Ivano diris nenion.

– Nu, kio okazis?

– Nenio, kara agao, nenio! – diris Marinko. – Li kvereletis kun la popo kaj vilaĝestro... tamen, negrave...

Marinko denove okulsignis al la turko.

– Kial ili kvereletis?

– Nu... nenial... li parolis al ili pri vi, kaj...

– Kaj?
– Nu... mi ne scias. Jen, li diru al vi...
– Kio do okazis, Ivano?
– Okazis!... Oni ne povas al ili argumenti, ĉar ili ne volas aŭskulti.
– Do, tio okazis pro mi?
Ivano kapjesis.
– Nu, negrave!... Ne riproĉu sin! – diris la turko, laŭŝajne kuraĝigante lin. – Mi tion antaŭsciis!... Tamen, dankon al vi por via admirinda amo, dankon al vi kiel al propra frato... Sed ili... negrave!... Kion mi povas fari?... Mi nur esperas, ke alvenos ankaŭ la tago kiam oni min komprenos!... Samkiel diris la orfo el popolrakonto: mortos ankaŭ mia avnjo, tiam ankaŭ mi satmanĝos platpanon!... Same mi. Alvenos ankaŭ por ili malfeliĉa tago, tiam Piro estos bona por ĉiuj!... Tamen, kion ili vortis, diru?... Kial ili ne volis aŭskulti vin?
– Ili ne volas, frato mia, ĉar vi estas turko!
– Ha-ha-ha-ha!... – komencis ridi Piro. – Bone, bone!... Ĉu nur ili rajtas esti bonaj homoj?... Ni vidos tion!...
– Mi ja tutkore parolis al ili...
– Mi kredas al vi.
– Ĉio estis vane...
– Tute negrave... – diris Piro, ŝajnigante senekscititon, kvankam liajn vangojn estis kovranta ruĝo... – Bone, ni lasu tion... mi scias ke ili min malamas. – Ĉu ne?
– Jes – diris Ivano.
– Ĉu ili tre malamas min?
– Tre.
– Tamen, kaj Dio kaj homoj vidas ke ili min senkiale malamas... Tion vidas ĉiu, al kiu Dio donis du okulojn, por ke li povu vidi...
– Tio estas vero!...
La turko ekridetis kaj diris:
– Ni nun flanklasu tiun interparolon...
– Tamen, vi devas scii ĉion! – diris Ivano.
– Mi scias sufiĉe!... Mi scias ke ili estas miaj malamikoj, ke ili agas kontraŭ mi; mi scias ke vi estas miaamiko. Krome, kredu, mi pli ŝatas vian amon, ol mi timas ilian malamikecon. Tamen, mi... Do, kiam vi interparolos kun Seviĉo?
– Jam hodiaŭ.
– Bone, iru tuj!... Ne hezitu...
– Bone. Mi iras tuj – diris Ivano.
Li leviĝis kaj tuj foriris al la domo de Seviĉo...
Tie oni lin renkontis afable. Miloŝo Seviĉo estis homo bona, mildanima, kvieta. Kiam temis pri vilaĝaj aferoj, li ĉiam estis tie, kie estas saĝaj homoj,

kiaj estas la popo, vilaĝestro kaj aliaj.En sia domo li estis vere bona mastrumanto.Tie li ĉion organizis laŭ propra deziro. En lia domo regis ordo kiel en abelujo. Ĉiuj domanoj sciis kaj plenumadis siajn taskojn –sed li mastris. Li opiniis, ke en lia domo ĉiu lia vorto estas sanktaĵo – kaj tiel estis. Unuvorte: respektinda dommastro de tiu epoko. Kiam Ivano alvenis, Milоŝo ne estis hejme. Li foriris laborcele al Ŝokĉaniĉo. Tamen, ĉiuj domanoj alkuris por priservi la gaston en la plej dezirinda maniero.

Ivano sidiĝis kaj atendis lin. Li ne longe atendis. Miloŝo alvenis preskaŭ tuj post lia alveno.

Post saluto ili sidiĝis kaj ekparolis pri malbona vetero, pri pombrando kaj brandkaldrono. La interparolo daŭris sufiĉe longe. Post tio Ivano ekparolis pri municipaj aferoj. Li menciis la vilaĝestron kaj popon, poste la subestron kaj lian homecon.

– Vi ne scias, Miloŝo mia, kiel bona homo li estas, kvazaŭ li estus naskiĝinta en Nigra Marĉo.

Miloŝo, samkiel mi jam diris – pri similaj aferoj ĉiujn aŭskultis. Li kredis, ke pli saĝaj ol li estas ĉiuj, inter ili ankaŭ Ivano. Tial li kapjesis post ĉio, kion Ivano diris.

Ivano tuj gajiĝis:

„Jen Miloŝo estas – pensis li – korekta homo! Li scias, frato mia, ili premis lin, sed li scias! Kie vi estas nun, popo mia, por aŭdi kiel interparolas saĝa homo!...Li ja ne estas tia, kia vi estas!... „Li estas turko, la turkoj estas niaj malamikoj..." Jen, vidu, Miloŝo estas simpla homo, sed li scias!...Mi devas kun li boparenciĝi, ajnamaniere!..."

– Nu, Miloŝo! – diris li laŭte.

– Kion?

– Mi volas demandi vin ion, kiel homo homon.

– Kion?

– Mi, frato mia, havas edzigindan filon, bravulon!... Ankaŭ via filino estas nuptaĝa. Mi volas proponi ke ni la infanojn geigu!

– Nu... do... – Miloŝo levis la ŝultrojn.

– Tio estos bonago. Finfine, ili ja simpatias unu la alian.

– Mi ne kontraŭstaras... – diris Miloŝo.

– Do, kiam mi alvenu?

– Kiam vi volas.

– Tiukaze mi venos morgaŭ kun svatantoj.

– Bonvenon ajnatempe.

– Ho, mi tre ĝojas!... Vi scias, dank al Dio, ke ni amikas de infanaĝo. Delonge mi pensis pri tio, rigardante kiel la infanoj kreskas!...

– Verŝajne ankaŭ Dio tion volas...

– Jes, volas, volas...

Ili sidis ankoraŭ iom da tempo, post kio Ivano leviĝis kaj foriris hejmen por pretiĝi kaj arigi svatontojn...

Miloŝo venigis la edzinon en la ĉambron, kaj diris al ŝi ke li promisis edzinigi Jelican al Lazaro.

Krunian io tuŝis, ŝi paliĝis.

– Kiam tio okazos?

– Morgaŭ vespere alvenos svatantoj. Pretigu ĉion, kion oni devas pretigi, kaj diru al ŝi...

Krunia elĉambriĝis, pala kiel malvivulo. Ŝi rememoris kion Jelica diris al ŝi pri Stanko...

Ho Dio, kia estas la patrina koro! Kvankam ŝi sciis ke oni devas fari nur kion la familiestro deziras, ke oni devas ŝati ĉion kion li ŝatas – tamen en ŝia animo io ekbolis. Ŝi subite komencis malami kaj Ivanon kaj Lazaron, kaj ilian kompletan domon... Ili al ŝi ekŝajnis homoj el alia mondo... Ŝi jam preskaŭ, same kiel Jelica, kredis ke la ŝtelon ne faris Stanko, ke Lazaro mem enfosis tie la monon...

Jelica estis en la korto. Krunia enkortiĝis, vidis Jelican en lignohakejo, kolektanta brakprenon da ligno, pretiĝanta enporti lignon en la domon.

– Jenjo! – ekkriis ŝi.

– Jes, panjo.

– Nu, forportu la lignon, kaj venu en la kromdomon, kara.

– Mi venos, panjo, venos.

Krunia eniris la kromdomon, kaj komencis ĉirkaurigardi. Post nelonge alvenis ankaŭ Jelica. Vidinte la patrinon pala, ŝi sentis frostotremon.

– Kial vi vokis min, panjo?...

Krunia embarasiĝis.

– Nu... kie estas la ŝpinaĵo, kiun mi antaŭ kelkaj tagoj donis al vi, por ke vi gardu ĝin?

– Jen ĝi, en la kesto, panjo, – diris Jelica mirante. Ŝi ekiris al la kesto por elpreni la ŝpinaĵon.

– Nu... jes, jes!... Mi ja scias!... Lasu, lasu, ne elprenu!

Jelica, vidante kiel la patrino embarasiĝis, alpaŝis ŝin, kaj enrigardis ŝiajn okulojn...

– Patrinjo!... – diris ŝi ektremante. – Vi ion teruran kaŝas de mi!... Kio okazis?

– Vi pravas, filnjo mia, okazis teruraĵo!

– Kio okazis?

Al Krunia estis malfacile diri al ŝi.

– Parolu, patrinjo? Parolu, ne turmentu min!... Ŝi kunmetis la manoj.

– Oni svatas vin! – diris Krunia. La kromdomo komencis turniĝi ĉirkaŭ la kapo de Jelica... Tamen ŝi rapide rekonsciiĝis kaj demandis:

– Ĉu svatas?... Kiu svatas?

– Ivano Maraĵĝiĉo, por Lazaro! La patro konsentis... Al mi li diris ke ni pretiĝu, kaj ke mi sciigu vin pri tio!... Nun vi scias kio okazis... jen ĉio!...

La animon de Jelica kvazaŭ ekregus demono... Ŝi pugnigis ambaŭ manojn, levis la brakojn ŝupren, kaj diris akravoĉe:

– Mi ne volas!...

Krunia ne kredis ke ŝi bone aŭdis. Neeble estas ke la filino diris al ŝi tiujn vortojn: mi ne volas. Tiaĵo neniam okazis en la mondo.

– Kion vi diris, misfeliĉulino?!

– Mi ne volas! – diris Jelica persiste.

En ŝiaj okuloj videblis decidemo, kiu elokventis pli ol iu ajn vorto.

Krunia sidiĝis sur liteton. Ŝi ankoraŭ ne konsciis ĉion; ŝi ne povis konscii tion, kio okazis neatendite, kiel tondro el klara ĉielo.

Ambaŭ eksilentis. Krunia fiksrigardis la lipojn de Jelica, kiuj trepidis pro kolero... Ŝi kvazaŭ rekonsciiĝus, leviĝis, kaptis la manon de Jelica, kaj spirsingulte diris:

– Iru!... Fuĝu!...

– Kial?

– Li mortigos vin!

– Ĉu paĉjo?

– Jes, li!... Fuĝu, misfeliĉulino!

Jelica denove ekrigardis ŝin en la okuloj, kaj diris senkaŝe:

– Mi ne volas!

– Sed... li mortigos vin!

– Negrave!... Ĉu vi pensas ke mi timas la morton?... Ne!... Kial mi timu?... Ĉu vi opinias ke mi bedaŭros la vivon, kiun mi pasigus kun Lazaro? (Ŝi diris senkaŝe: „kun Lazaro".) Ne, patrinjo!... Mi preferas en infero rostiĝi, ol esti edzino de tiu malhomo!

Krunia senvortiĝis.

– Diru al la paĉjo ke li mortigu min! Mi en la ĉielo pripentos lian pekon... Cetere, pli facile Dio pardonos lin, se li min mortigos tuj, ol ke li min mortigadu ĉiutage, sendinte min al tiu malaminda domo!...Konsilu lin, patrino! Ne igu min malbeni la ventron kiu min portis!...

Ŝi daŭre parolis senkaŝe; larmoj ne aperis en ŝiaj okuloj, voĉo ŝia ne ektremis.En ŝiaj okuloj videblis firma decido elteni ion ajn, sed ne edziniĝi kun Lazaro.

Krunia leviĝis desur la liteto, alpaŝis ŝin, kaj kaptis ŝian manon. Ne rigardante ŝin en la okulojn, Krunia ekparolis malespere:

– Tamen, tio devas okazi!... Ĉu vi scias kia estas via patro?... Ĉu vi opinias ke li mensogos?... Se li ion diras – tio estas dirita!... Li vin disskurĝos, se vi kontraŭstaros al li!...Li ja diris al Ivano ke li venu morgaŭ vespere!... Ĉu vi malglorigos nian domon kaj lian promeson?... Ne faru tion, filnjo, mi petegas vin per la lakto per kiu mi nutris vin !... Nu, infano mia, tia estas via sorto!... Ankoraŭ neniu evitis sian sorton!... Se decidas la sorto, helpas nenia forto!... Obeu! Obeu ĉar la patrino petas vin!... Estas peko ne fari kion la patrino petas!... Jenjo!... Filnjo!...

Krunia levis la kapon...Sed ŝin frostigis la rigardo de Jelica. Ŝi eksilentis.

Abrupte kolero plenigis ŝin. Ŝi ekdeziris dispremi Jelican. Severe ŝi alrigardis la filinon.

– Tamen, kial vi ne volas? – demandis ŝi.

– Mi ne volas, ĉar mi ĵuris al aliu! – respondis Jelica kviete.

– Al kiu?

– Al Stanko!...

– Ĵuris al Stanko! – malespere ekkriis Krunia. – Vi ĵuris!... Kiu permesis al vi ĵuri?... Ĉu via promeso estas pli grava ol la promeso de via patro, diru?... Cetere, al kiu vi ĵuris?... Al ŝtelisto!... Kaj...

La okuloj de Jelica ekfulmis. Pro ŝia rigardo la patrina koro ektremis.

– Li ne estas ŝtelisto!

– Sed li estas hajduko!

– Li devis hajdukiĝi!... Li ne povis permesi ke oni ligu lin senkulpan!...Li ne estas ŝtelisto!... Mi ripetas al vi: ne nomu lin ŝtelisto!

– Ĉu vi minacas!

– Mi ne minacas. Sed li ne estas ŝtelisto!... Mi tion al neniu permesas diri!

Krunia levis la manon por frapi ŝin, sed Jelica staris kviete kiel statuo. Ŝi eĉ ne moviĝis... Krunia mallevis la manon, kaj ekscitoplene diris:

– Mi iras ĉion diri al via patro.

Ŝi skuale eliris el la kromdomo... Jelica restis senmova.

Baldaŭ la pordo malfermiĝis. Krunia antaŭenigis la kapon, kaj diris per obtuza voĉo:

– Vin vokas la patro...

Jelica sentis frostotremon. Tamen ŝi ekiris malantaŭ la patrino...

Ju pli ŝi proksimiĝis al la doma sojlo, des pli malgrandaj estis ŝiaj paŝoj. Ŝi sentis, ŝi konjektis, ke tio estas ŝia fino... Ŝi iris senreziste, kiel ŝafo buĉota...

Ŝi eniras la ĉambron de la patro. Tie ŝi sentis la odoron de bazilio malantaŭ traboj. La patro staris apud lito kaj rigardis en la korton. Kiam ŝi eniris, li turniĝis.

– Nu... vi venis! – diris li preskaŭ kviete. Ŝi nenion respondis.

– Do, vi jam aŭdis, venos viaj svatantoj.

Ŝi denove silentis.

– Ivano svatas vin por Lazaro, kaj mi diris ke ili povas veni.

Plensilento...

– Tamen, via patrino diris al mi, ke vi ne volas edziniĝi kun Lazaro.

– Mi ne volas! – diris ŝi rigardante rekte en liajn okulojn.

– Kion vi ĵus diris? Ĉu en mia domo iu ajn povas diri „mi ne volas“, se mi tion volas?... Ĉu vi estas tia?!... Mi tion ne konsilas al vi!... Do, vi edziniĝos kun Lazaro!

– Tamen, paĉjo...

– Eĉ ne unu vorton plu! Foriru!

– Mortigu min!...

– Vi edziniĝos kun Lazaro...

– Mi ne faros tion, eĉ se vi cent fojojn ordonos! – diris ŝi spite.

Miloŝo konsterniĝis. Li estis alkuronta por strangoli ŝin, sed rekonsciiĝis, kaj per dampita voĉo diris:

– Kolektu viajn vestojn, kaj iru for!... Sub mia tegmento ne plu ekzistas loko por vi!...

– Dankon, paĉjo! – diris ŝi, kaj kisocele kliniĝis al lia mano.

– For! Ne fetorigu miajn manojn!...For!...

Ŝi turniĝis kaj eliris el la ĉambro... La onklo Mladeno estis sidanta apud fajro. Ŝi kisis lian manon kaj enkortiĝis. Alpaŝinte la sojlon, ŝi aŭdis vortojn de la patro:

– Mladeno! Iru alIvano Maraĵĝiĉo, kaj mesaĝu ke li ne venu. La svatado ne okazos, ĉar mi ne plu havas filinon...

Stumblante, Jelica alvenis al la pordego, malfermis ĝin kaj eliris el la korto. Malantaŭ ŝi aŭdiĝis neniu vorto...

Granda malgajo premis ŝian koron. La glacia roko sur ŝia koro kvazaŭ komencus degeli...

Larmoj verŝiĝis el ŝiaj okuloj sur la belajn, kompaktajn vangojn... – Kien mi iru nun? – la penso traflugis ŝian kapon.

# 10. BENO DIA

Stanko dormis kaj sonĝis belan sonĝon. Jen, li tenas la manon de Jelica, kiu estas plektinta florkronon el rozoj, metinta ĝin sur sian kapon, kaj ridetanta al li... Neniam ŝi aspektis pli bela. Ĉio ĉirkaŭ ili estis tiel bela, kvazaŭ al la tuta mondo ŝi pruntedonus iom de sia beleco... Abrupte aŭdiĝis pistolpafo. Li rekonsciiĝis.

– Leviĝu! – kriis Nogiĉo. Stanko eksaltis kaj suprenrigardis.

– Kio okazis, kial vi vekas min?

– Kamelo serĉas vin.

– Kion li volas?

– Li volas diri ion al vi.

– Jes, mi serĉas vin. Lupoj ĉirkaŭisŝafidon de ĉiuj flankoj.

– Kiuj lupoj, kiun ŝafidon?

– Vian Jelican oni svatas por Lazaro. Se vi fidas je propra forto – iru kaj malhelpu tion!

– Kiam?

– Morgaŭ vespere.

– Tio ne okazos! – diris Stanko sentante ke liaj muskoloj ektremis.

– Pro tio mi informis vin. Se vi ne estos tie morgaŭ vespere, pro ŝi vi poste ne iru tien. Lazaro volas, Ivano volas, la turko volas!... Ŝi devos aŭ aparteni al Lazaro, aŭ morti!...

– Dum Stanko vivas, ŝi ne apartenos al Lazaro! – diris Stanko kaj leviĝis. – Ĝis la hodiaŭa tago mi obeis al la estro, sed morgaŭ mi ne obeos al li, mi ĵuras je viva dio!...

Li tremis kvazaŭ en febro:

– Kunfrato mia! Ŝi ne apartenos al Lazaro dum ni vivas! – diris Leĉjo kaptinte lian manon.

– Diru, kiel vi tion eksciis? – demandis Nogiĉo Kamelon.

– Ho, kiel!... Mi devas scii! Mi aŭdis!... Ĉion en la tuta mondo, ĉion, kion mia buŝo elparolas, mi aŭ aŭdas aŭ vidas!...Mi ne mensogas, sen grava

devo; sed kiam mi devas, tiam mi mensogas, kaj dormas kviete, sen ia ajn konsciencriproĉo...

– Tamen, diru al ni... kiel?

– Bone.Mi aŭ staras malantaŭ arbusto – kaj vidas, aŭ streĉas la orelojn – kaj aŭdas. Multon interesan mi aŭdis!... La turko estigos porĉiaman kverelon inter la nigramarĉanojn. Kiam komenciĝos sangoverŝo, la turko sur la sango paŝos pacigante la kverelantojn !... Ve al vi, Nigra Marĉo, ĉar en vi vivas ankaŭtiaj homoj, kia estas Marinko Marinkoviĉo!... La turko lin favoras, ĉar Marinko konsilas lin kiamaniere malamikigi la fratojn... Alekson Aleksiĉon li izolis de ĉiuj, Ivanon Maraĵĝiĉon li disigis de la fratoj kaj amikoj. Nun li deziras ankaŭ Miloŝon Seviĉon... Mi opinias ke nurtrafa pafilkuglo feliĉigus la kompatindajn homojn...

– Mi mortigos lin! – interrompis lin Stanko.

– Ne rapidu, ne rapidu, Stanko! Ĉu vi memoras kion diris la estro?...

– Mi memoras. Tamen, la estro ne sciis pri ĉi tiuj doloroj kaj angoroj... Li ne sciis...

– Vi devas plenumi faskon da taskoj en Nigra Marĉo – diris al li Kamelo. – Ĝis kiam vi kvitiĝos kun ĉiuj kiuj kulpis kontraŭ vi – ankoraŭ multe vi kuros, ĝis vi alkuros.!...Ĉu vi scias kio okazas en via domo?... Vi eĉ ne demandis?...

Stanko mallevis la kapon.

– Mi ne aŭdacis! – ekflustris li.

– Ĉu vi vidis komatan abelujon?... Nu, same via domo komatas!... La grizharulon oni devas rehonorigi, tion mi ne devas diri al vi!... Jen, li malplektis la hararon, bruligis la ĉibukon – kaj mutas. Nur al la ĉielo li rigardas... De Dio li nur morton petas.

Stanko elverŝis larmojn.

– Povra mia paĉjo!... Povra mia patrinjo!

– Virinoj veas, sed viroj hontas larmi!... Nu... aŭskultu, Nogiĉo! Nu... ĉu vi aŭdis Nogiĉo?

– Diru!

– Jam hodiaŭ iru en Nigran Marĉon. Iru rekte al la domo de la popo Milojo,diru al li tion, kion vi eksciis de mi. Diru al li ke li gardu la homojn de la turko, de Ivano kaj Marinko. Koncerne Ivanon, estas malfrue ke li rekonsciiĝu – li ne plu ekzistas por nigramarĉanoj!...

Se la popo demandos vin, kiel vi eksciis tion, diru ke vi ĉion aŭdis sub la fenestro de Piro...Nun, adiaŭ! Stanko, ne lasu la ŝafidon iri inter lupojn!...

Post tio Kamelo foriris. La hajdukoj restis kun mallevitaj kapoj...

En la brusto de Stanko io eferveskis.Li ja revidos Jelican!... Ĉu ŝi konsentos edziniĝi kun Lazaro?... Ŝi devas, oni devigos ŝin... Ne, ili ne povos! Li

vidis ŝian akran rigardon, kiu elokventis pli ol ia ajn parolado... Ili ne povos, ne povos!...Tamen, neniam okazis ke knabino kontraŭas sian patron!...

Eksaltinte, Stanko komencis iri tra la tinejo. Li estis tre ekscitita kaj maltrankvila, li ne povis resti en unu loko...

Nogiĉo suĉis el lignobotelo, leviĝis kaj dekroĉis pafilon.

– Mi iras.

– Ankaŭ mi iras kun vi!... – diris Stanko.

– Ne vi!

– Tamen, mi ne povas hodiaŭ resti sidanta ĉi tie!... Pli facile al mi estus sidi sur ardaĵo, ol konstante orelstreĉi por aŭdi vin revenanta!... Mi petas vin... permesu al mi iri kun vi!... Mi ne eniros domojn. Arbetejojn nigramarĉajn mi scias kiel propran domon... Mi petas vin!...

– Bone, estu tiel.

– Ĉu tio signifas ke mi sidos ĉi tie kiel virinaĉo? – demandis Leĉjo.

– Ne, certe ne. Ankaŭ vi iros kun ni... – diris Nogiĉo. – Ekipu vin.

Ili tujtuje prenis armilojn. Ankoraŭfoje glutinte iom da brando, ili ekiris...

– Verdire, amikoj miaj, mi antaŭsentas, ke ni ne iras vane! – diris Leĉjo.

– Ankaŭ mi! – diris Nogiĉo.

Stanko klinis la kapon, silentante. Li estis tre ekscitita. Koro lia batis maltrankvile, kvazaŭ volus salti el lia brusto for... Penso post penso trafulmis lian kapon...

– Kunfrato! – alkriis Leĉjo.

– Diru?

– Kio okazus, se ni nun renkontus vian Lazaron?...

– Kial mian?... Kiom mian, tiom dian!... Cetere, kio okazus, tion nur, nur Dio scias!... Mi ne uzus la pafilon kontraŭ li! Mi per propraj dentoj buĉus lin!...

Okuloj liaj fulmis.

– Estas vero kion oni diras! – ekvortis Nogiĉo. – Se oni iun amas, kaj se tiu dolorigas onian koron, oni tiun malamas pli ol la plej grandan malamikon!...

Stanko denove mallevis la kapon, denove enprofundiĝis en pensojn.

Jelica konstante estis antaŭ liaj okuloj. Delonge li ne vidis ŝin, tamen ŝi en lia fantazio staris kvazaŭ malŝajna... Li vidis, kiel ŝi defendas sin, kiel ŝi kontraŭstaras, timante nek la koleregon de la patro, nek la malbenon de la patrino...

„Ho, knabino mia, – pensis li – kiel mi deziras ĉiun vian vorteton origi!... Tamen mia oro estus nura balaaĵo!...“

– Vi duope iru en Senfundaĵon, atendu min tie! – diris Nogiĉo. – Mi nun iras al la popo...

Li foriris. Stanko kaj Leĉjo restis solaj.

– Diru, kunfrato mia, kie estas Senfundaĵo?

– Tie! – diris Stanko nekoncentrite, manmontrante ties direkton.

– Nu, ĉu ni iru tien?

– Ni iru.

– Mi scias kion vi deziras...

Stanko silentis.

– Vi deziras vidi ŝin, ĉu ne?... Nu, bone, bone! Vi ne devas skuiĝi, mi estas via... Ni vidos ŝin!...

– Ek! – diris Stanko haste.

– Bone, ni iru. Tamen, atentu!

– Ne zorgu! – diris Stanko. Ili direktiĝis al la domo de Seviĉo. Stanko ne iris, sed flugis. Leĉjo, kvankam estis longkrura kaj facila, apenaŭ povis atingi lin.

– Ne rapidu tiel, amiko mia!...Kial vi hastas?

– Simple rapidu!... Mi antaŭsentas ion... Al mi ial ŝajnas ke mi hodiaŭ ion travivos, ion kio min feliĉigas, eĉ kiam mi nur pensas pri tio ...Rapidu, kunfrato mia!

Kvankam ili estis tramalsekaj, kvankam iliaj piedoj glitis sur ŝlima tero, ili tamen hastis...

Ili proksimiĝis al la domo ĝuste en la momento, kiam Jelica eliris el la korto...

– Ĉu tio estas' ŝi? – demandis Leĉjo.

Tamen, la demando estis troa. Sufiĉis unu rigardo ĵetita al Stanko por kompreni tion.

Ekvidinte ŝin, Stanko subite paliĝis... Post tio flamruĝo inundis liajn vangojn, forto lia ektremis... Li nenion respondis al Leĉjo, ĉar li perdis parolkapablon...

– Kien ŝi iras? – demandis Leĉjo.

Stanko staris kiel statuo. Lia rigardo gluiĝis al Jelica.

Abrupte li ekkuregis kiel nizo. Leĉjo ne povis atingi ln... Jam sekvamomente Stanko staris antaŭ Jelica...

Pro surprizo ŝi preskaŭ stimblis vidinte lin.

– Jelica!... Jenjo!...

Ekpreminte ambaŭ ŝiajn manoj, li komencis ilin stringikaj skuadi.

– Kion vi faras ĉi tie?! – demandis ŝi, rekonsciiĝinte post surprizo.

– Mi ne povis rezisti al la deziro, mi venis vin vidi!...

Jelica subite paliĝis. Ŝi vidis homon alpaŝanta ilin.

– Kio okazis? – demandis Stanko.

Ŝi montris per la mano Leĉjon, kiu estis alproksimiĝanta.

– Ne timu! Tio estis mia kamarado, mia kunfrato!...

– Fuĝu!... – flustris Leĉjo. – Iuj homoj iras ĉi tien!...

Dum Jelica turniĝis, la duopo jam kaŝiĝis malantaŭ du arbustoj.

Kelkaj kamparanoj pretepasis, salutis Jelican, kaj iris for.

Stanko alvokis Jelican.
– Kion vi nun faros? Kial vi estas ploranta?
– Mi ne scias kien iri!
– Kial vi ne scias?!
– La patro eldomigis min.
– Eldomigis! Ĉu pro tio ĉar vi ne volis edziniĝi kun Lazaro?
– Pro tio!
Stanko eksaltis pro ĝojo.
– Mi sciis tion!... Vi!... Vi ne edziniĝos kun Lazaro... Se oni proponus al vi mielon kaj kastelon, vi tamen forturnus la kapon!... Mi sciis!... Ĉu vi aŭdis, Jenjo!... Vi estas vera knabino!... Kial mi plendas kontraŭ dio?Li ja donis al mi tion, kion li al neniu donis!... Dankon al vi, ho Sinjoro!...
Li demetis la ĉapon, kaj faris la signon de kruco.
– Diru? – li turniĝis al Jelica. – Ĉu oĉjo Milosô vere forpelis vin?...
– Li forpelis min!... Li diris al Ivano alveni, sed kiam mi diris ke mi ne volas, li min forpelis.
– Mi esperas ke li ne suferigis vin!
– Ne suferigis.
– Nek mallaŭdis?
– Nek mallaŭdis.
– Dankon al li!... Se li tion ne farus, nur Dio scias ĉu mi vidus vin.
– Nu, – diris Leĉjo – kien ŝi nun iros?
– Al mia domo.
– Kion vi diris? – demandis Jelica.
– Vi iros al mia domo, tion vi faros tuj!...
Jelica obeis, kaj ili ekiris.
– Tamen, ĉu ili akceptos min? – demandis ŝi.
– Nur diru ke vin mi sendis...
Alekso sidis ĉe la fajrejo, Petra estis ekscitanta fajron ĉirkaŭ poto, en kiu estis kuirata tagmanĝo, kiam Jelica, transirinte ilian sojlon, diris:
– Dio helpu!
Konsternitaj, surprizitaj, ili ambaŭ turniĝis.
Jelica proksimiĝis al iliaj manoj.
– Vi-vi-viva estu! – singultis la maljunulo... – Kion vi faras ĉi tie?
– Mi alvenis – diris Jelica, kaj mallevis la kapon.
– Jam tri monatojn eĉ hundaĉo ne volas transpaŝi ĉi tiun sojlon...
– Mi alvenis...
– Ĉu Dio sendis vin, por ke mi havu kun kiu interparoli?
Dirinte tion, la maljunulo ekploris. Petra komencis verŝi larmojn tuj kiam ŝi vidis vivan estaĵon transiranta la sojlon.

– Mi alvenis... Mi estas forpelita!... Ĉu vi akceptos min?

– Kia demando!... Venu!... Vu ja estas la unua estaĵo kiu transpaŝis mian sojlon!... Por mi vi estas beno dia!... Dio mem sendis vin!... Venu!... Venu, vi, la unua homo kiu salutis min!

La maljunulo, ŝancelire alpaŝis ŝin, prenis ŝian kapon, kaj komencis kisadi ŝin, dum Petra kaptis ŝiajn ambaŭ manojn, kaj komencis premadi ilin...

– Paĉjo!... Panjo!... – ekkriis Stanko larmoverŝe, kaj enfluginte la domon, komencis kisadi iliajn tremamajn sulkabundajn manoj...

La maljunulo mispaŝis, kaj Petra renversiĝis ĉe la muro...Tio estis troa ĝojo por ili.

## 11. SENVUALIGO

Disiĝinte de Stanko kaj Leĉjo, Nogiĉo turniĝis al la domo de la popo Milojo. Iris li malrapide, pripensante kion diri al la popo.

Li ekvidis la domon de la popo, ekvidis fumon kviete volviĝanta el fumluko. Atente ĉirkaŭrigardante por kontroli ĉu lin neniu vidas, li malaperis malantaŭ la domo.

Alveninte ĝis la pordo, li fiksaŭskultis por vidi ĉu iu estas en la domo.

En la domo estis neniu. Li direktiĝis al ĉambro.

La popo sidis sur seĝeto, apogis la kapon per la manoj, enpensiĝinta.

– Dio helpu! – diris la hajduko malfermante la pordon. La popo rekonsciiĝis, flamruĝo inundis lian vizaĝon pro surprizo...

– Dio vin favoru!

– Mi venis al vi, ho popo, – diris la hajduko per milda voĉo.

– Tamen, kiu vi estas? – diris la popo fiksirgardante lin.

– Ĉu vu ne konas min?

La popo preskaŭ sammomente diris:

– Nogiĉo! Kion vi faras ĉi tie?

– La pastra pordo estas malfermita por ĉiuj! – diris la hajduko, kviete ekzamenante la popon de la kapo ĝis la piedoj.

– Estas... estas... – diris la popo konfuze. – Estas malfermita por ĉiu... kiu petas konsilon... kiu...

– Mi venis ne por peti de vi preĝon kaj konsilon, mi venis por konsili...

Nogiĉo rigardis lin per fiksa kaj kvieta rigardo.

– Konsili, kiun?

– Vin grizulo, vin grizhara pastro!

– Mi ja ne petas konsilon de...

– De hajduko, ĉu ne? Tio ne estas grava. Ankaŭ vi donas konsilojn al tiuj, kiuj vin ne demandas! – dirinte tion, Nogiĉo ekridis.

La popon konfuzis tiu fiksa kaj kvieta rigardo...

– Bone, kion do vi volas?

– Tion oni ne povas diri per du-tri vortoj!... Mi devas iom sidiĝi... ke ni priparolu.

– Nu, bone, sidiĝu!

Nogiĉo apogis la pafilon en fornoangulon, kaj preninte seĝeton sidigis sin vidalvide al la hejmestro.

– Diru, kara popo... Ĉu vi konas la popon el Belotiĉo?

– Mi konas.

– Ĉu vi konas Stojanon Ĉupiĉon?

– Ankaŭ lin mi konas.

– Katiĉon Simon?

– Ankaŭ lin.

– Kiaj homoj ili estas?

– Bonaj, honestaj.

– Nu, mi samopinias. Ankaŭ mi bone konas ilin.

– Kial vi demandas?

– Mi simple demandas. Nur por ekscii, ĉu vi konas ilin... Nu, se vi konas tiuj homojn, mi devas diri al vi, ke ili ĉiuj koleras kontraŭ vi.

– Kial? – demandinte tion, la popo leviĝis.

– Ĉar vi permesis ke la turko umu en via Nigra Marĉo.

– Kiu permesis?

– Vi!

– Sed kion li umas?

– Jen do!... Vi, povrulo, eĉ ne scias tion, kio okazas antaŭ viaj okuloj!... Kiel popo povas ion ne scii?

La popo ekkoleris.

– Ne kulpigu min!

– Mi ne kulpigas vin, kvankam mi povus tion fari. Tiu via mielulo, tiu Piro, deziras porĉiame malamikigi nigramarĉanojn, ĉu vi tion ne scias?...

– Kiel malamikigi porĉiame?

– Jen kiel! Li jam disigis de vi du unuaulojn!... Nun, jen, antaŭ viaj okuloj, li volas tion fari ankaŭ kun la tria!...

– Pri kiu vi parolas?

– Ĉu ne li igis vin misfamigiunu el la plej honestaj homoj, Alekson Aleksiĉon? Nu?...

– Tamen, la filo de Alekso...

– Hontu, kara popo! Ĉu vi volas diri ke la filo de Alekso, Stanko, estas ŝtelisto!... Tiu infano, kara mia, kreskis antaŭ viaj okuloj!...Vi konas lin de lia vindaĝo!... Kaj lin vi kredas ŝtelisto! Kion li ĝis tiam ŝtelis?

– Nenion.

– Kial do li subite iĝis ŝtelisto?

– Tamen, oni trovis la saketon...

– Tion diris al vi tiu serba merdulo, tiu Marinko...Sed ĉu li, la servulo turka, ne povis mem tie, laŭ ordono de la turko, enfosi la monon?...

La popo malfermis la buŝon, rondigis la okulojn...

– Jes, tamen, la rompita kesto, kaj tiam... – ekparolis la popo.

– Ĉu Lazaro ne povis mem disrompi sian keston?... Ĉu vi forgesis ke li tiutage pafis al Stanko?... Li pafis al la homo, li povis mortigi lin, kaj neniu dirus ion ajn kontraŭ li...

La ĉambro turniĝadis ĉirkaŭ la kapo de la popo... Ju pli li pensis, des pli al li ŝajnis kredeblaj la vortojde Nogiĉo...

– Tamen, kiel vi eksciis tion? – demandis la popo, alpaŝintetute proksime al li. – Eble tion rakontis al vi Stanko, li ja, onidire, aliĝis al via kunularo?

– Ne li. Li mem ne sciis tion. Se li scius, li alimaniere kun vi interparolus.

– Sed kiu tion diris al vi?

– Homo, kiu tiunokte, kiam Lazaro pafis al Stanko, vidis Marinkon kaj Lazaron ĉe la turko, kiu aŭskultis ilian interparolon, kiu sciis kio okazos la sekvan tagon, kiu ĉion sciis...

– Sed kial li ne diris?

– Li ne diras. Tamen estu certa, ke li scias ĉiun vorteton kiun oni elbuŝigas en Nigra Marĉo.

– Kamelo! – ekkriis la popo.

– Jes, li!... Li ĉion aŭdis!...

– Atendu, mi petas! – diris la popo, kaj elĉambriĝis. Post malmuta tempo li revenis kaj sidiĝis sur sian lokon.

– Frato mia! – diris li ĝoje. – Kredu aŭ ne, sed mi kredis ke Stanko povas fari ion ajn, sed ŝteli li ne povas.

– Mi vidas kiel vi kredis! – diris Nogiĉo riproĉe.

– Nu, kiam la saketo estis trovita, oni nenion povis diri. Jen, nun alvenos la vilaĝestro Joĉjo. Mi tre deziras ke ankaŭ li aŭdu ĉion, pro tio mi alvokis lin...

– Bone!... Multon vi hodiaŭ ekscios!... Ankaŭ mi tre deziras ke la vilaĝestro alvenu.

Post tiu interparolo aŭdiĝis malfermiĝo de la dompordo, kaj malfermiĝis la pordo de la ĉambro. La vilaĝestro aperis sur la sojlo.

Li ĝentile salutis, alpaŝis al la popo, laŭ la kutimo petis benon, kaj post tio salutis Nogiĉon.

– Ho, kion vi faras ĉi tie? – diris li iom surprize rekoninte Nogiĉon.

– Joĉjo, li jam diris al mi' strangajn aferojn.

La popo Milojo komencis rakonti al la vilaĝestro ĉion, kion Nogiĉo ĵus diris al li.

– Tamen, ĉu tio̓ estas vero? – demandis la vilaĝestro mirante.

– Tio estas vero, kara mia. Ankoraŭ pli malbone estas ke vi tiel hontigis kaj forŝovis tiun honestan homon. Pekon vi faris, ho pekuloj? Ĉu vi ne vidas ke la turko per siaj ungegoj kaptis eĉ Ivanon mem?

– Pri tio vi pravas!– diris unuvoĉe kaj la popo kaj la vilaĝestro.

– Jen, nun li penas kapti ankaŭ Miloŝon Seviĉon. Li mem svatas la filinon de Miloŝo por Lazaro. Li atingis ĉion kion li deziris! Alekson li hontigis, Ivanon kaptis, nun li despote arogantas en Nigra Marĉo, dum vidu sidas nenifare...

– Ni ne sidas nenifare, Nogiĉo! Tamen, frato mia, ni tion ne sciis. Kiu povas scii kio bolas en tiu diabla animo?... Mi, fakte, kune kun Joĉjo, repuŝadis la homojn de li...

– Nu, kion vi faris, mi ne scias, sed mi certe scias, ke vi ĉiuj ĉi tie kverelegos!... Nu, ne permesu tion!... Forlasu Ivanon, li jam apartenas al diablo. Li nun, eĉ se volus, ne povos liberiĝi de la turko! Tial nun vi foriĝu de li. Sed Alekson alvoku!... Li, la povrulo, sopiras homojn kaj interparolon kun ili.

– Ni faros tion, Nogiĉo, ni faros!

– Mi pensis, ke mi devas ĉi tion diri al vi. Nun, adiaŭ! Se vi bezonos min, serĉu min en mia domo; se vi min tie ne trovos, alvoku Kamelon, kaj informiĝu. Li ĉiam scias kie ni estas. Adiaŭ!

Li manpremis kun ili, kaj malrapide, atente kiel kato, atingis arbetejon.

La popo Milojo kaj la vilaĝestro Joĉjo sidis kun mallevitaj kapoj.

– Nu, ĉi tio estas vera miraklo! – diris la popo post longeta silento.

– Miraklo! – diris la vilaĝestro.

– Mi neniam divenus kio okazis, sed nun, ju pli mi pensas, des pli al mi tio ŝajnas vera, mi nur miras ke en mian kapon jam tiam ne venis tiu penso!... Ho, frato mia, kial ni pekis kontraŭ la homo?

– Kion do ni faru nun?

– Nenion... Nun ni devas malkvereli kun li.

– Mi scias, sed kiamaniere?

– Jes, kiamaniere?

Ambaŭ klinis la kapojn. Ili silentis, longe silentis, ĝis kiam la popo diris:

– Ni iru al li!

– Al kiu?

– Al Alekso...

– Al Alekso! – diris la vilaĝestro, mire rigardante la popon. – Sed ni publike forĵetis tiun domon?

– Ni eraris. Ni pereigis la homon, tute kaj absolute senkulpan. Ek!...

– Se vi tiel volas...

Kaj la profundaĝuloj leviĝis.

Stanko estis ĵus transpaŝinta la sojlon de la patra domo, kaj ĝuste en la momento kiam Alekso pro ĝojo glitfalis ĉe la muro, ankaŭ la popo Milojo kaj la vilaĝestro Joĉjo subite transpaŝis la sojlon.

– Bonan matenon!...

Ekvidinte ilin, la domanoj senvortiĝis pro miro. Ankaŭ ili konsterniĝis ekvidinte Stankon, kiu plorante kisadis la manojn de siaj maljunaj gepatroj.

Stanko turniĝis, eksaltis, prenis la pafilon, kiun li estis apoginta al la muro, kaj haltis, pafipreta.

– Haltu! – diris al li Leĉjo. – Ne pafu al pastro!

Stanko kvazaŭ hakus ilin per la okuloj.

– Kion vi volas? – demandis li. La demando estis akra, la rigardo akrega... Ili embarasiĝis.

– Nu, jen... ni venis...

– Mi vidas, sed kial? Ĉu vi venis por min kapti?

– Ne! – diris la popo serioze. – Ni ne alvenis pro vi, sed pro ĉi tiuj maljuneguloj...

La vortoj de la popo rekonsciigis Alekson. Ili falis sur lian animon kiel kvieta pluvo sur sekan teron... La profundaĝulo tuj komencis plori per ĉarmaj larmoj, komencis singulti kiel malgranda infano.

– Kion, ĉu vi volas suferigi ilin pro mi?... – ekkriis Stanko. – Popo!... – voĉo lia iĝis minaca... – Popo!... Vian manon mi kisis sennombrajn fojojn, sed se vi tuŝos iun ajn el ili, vian manon mi forhakos!...

– Ne, filĉjo, – diris la popo kviete kaj malimpete – mia mano leviĝas nur benocele... Kisu!...

Li proksimigis la manon al Stanko.

Stanko fiksrigardis la malnebulajn okulojn, la fonton de amo kaj inklino; lia mano memleviĝis kaj demetis la ĉapon... Li akceptis la manon de la maljunulo, kaj aspergis ĝin per larmoj...

La popo kisis ambaŭ liajn vangojn.

– Homoj ni estas, tial ni eraras. La pekon de nia prapatro ni heredis. Ankaŭ ni pekis kontraŭ vi.Tamen, Sinjoro donis al ni konsciencon, pro tio ni, komprenite ke ni pekis, nun pentas... Ni pekis kontraŭ vi, filo mia, kontraŭ vi, kiu estas tute kaj absolute senkulpa, kaj ankaŭ kontraŭ ĉi tiuj ankoraŭ nefunebrataj maljuneguloj!...

Post tio li alpaŝis al Alekso, tuŝis lian ŝultron, kaj mallaŭte diris:

– Leviĝu.

Alekso leviĝis, rapidmove prenis la manon de la pastro,kaj komencis kisadi ĝin...

– Hej... larmoj miaj!... – plorĝemis li. – Ĉesu flui!... Tro longe vi gutis!... Ĉesu, ke mi povu vidi homojn!...Mi sopiras ilin kiel herbeto sopiras roson!... Ĉesu!...

La maljuna popo ekploris, la vilaĝestro Joĉjo same... Leĉjo pugnigis la manojn, rigardis en angulojn, dum larmoj aspergis lin...

Alekso viŝis la okulojn, alpaŝis Jelican kaj ĉirkaŭbrakis ŝin:

– Ĝojo mia! Feliĉigilo mia!... Vi revenigis mian filon, vi venigis homojn sub mian tegmenton, sub la tegmenton, kiun mi kredis malbenita!... Fortuno mia!

Tiam la maljunulo subite senvortiĝis. Lia rigardo rigidiĝis, fiksiĝis al la pordo...

Ĉiuj turniĝis kaj alrigardis tien. Iu homo foriĝis kaj malaperis inter dikaj kverkaj...

– Kio okazis?... Kiu estis tiu? – demandis ĉiuj. La maljunulo nur elflustris:

– Marinko!

## 12. ROMPIĜO

Mladeno foriris al la domo de Ivano por transdoni la mesaĝon de Miloŝo. Lin oni tie akceptis afablege. Sidiginte lin, oni proponis al li brandon. Virinoj preterdemandis pri la sano de virinoj, dum Ivano malantaŭenŝovis la fezon kun pufo, kaj diris:

– Nu, amiko mia, kion faras mia boamiko Miloŝo?

Malfacile estis, ho Dio, al Mladeno diri tion! Li preferus ke oni forhaku lian dekstran brakon ĝis la ŝultro, ol diri tion, pro kio li venis!... Tamen li ne povis plueprokrasti!

Kapskuante li elmurmuris tra la dentoj:

– Nu... li estas bone...

– Ĉu li atendas gastojn?... Ĉu li pretigas vespermanĝon?...

Mladeno mansvingis neante.

– Kio okazis? ...

– Ne demandu!...

Ĉiuj okuloj turniĝis al li.

– Nu, kio okazis?

– Ne venu!

– Mi ne venu!... Sed, kial?...

– Li ne plu havas filinon.

– Ĉu ŝi forpasis?!... – ekkriis ĉiujkonsternite.

– Estas pli malbone!...

– Kio do?

– Ŝi diris ke ŝi ne volas edziniĝi kun Lazaro. Miloŝo tiam kaptis ŝiajn ŝultroj, kaj forpelis ŝin!...

– Tamen, kial ŝi ne volas? – demandis Ivano, sentante sin hontigita.

– Ŝi diris ke ne volas, nur Dio scias kial!...

La domo turniĝadis ĉirkaŭ la kapo de Ivano. Li sentis kvazaŭ glacia mano kaptus lian koron... Frostotremo trakaptis lin de la kapo ĝis la piedoj.

– Jen, Dio mia! Ĉu ekzistas patro al kiu filino diras ke ŝi ne volas obei al li?... Hontinde!...

Mladeno klinis la kapon, tute mute. Profundanime li sentis, ke Ivano parolas la veron.

– Do, kie estas lia filino?

– Mi ne scias.Kiam li forpelis ŝin, ŝi eliris el la korto, kaj malaperis kiel vaporo. La povra boino Kruna vee veas!...

Lazaro eĉ spiri ne povis. Li sentis kvazaŭ oni senigas lin je vivo... Li komprenis ke, se Jelica nun eskapos, ŝi neniam estos lia... Sed tio maldevas okazi!... Lia vivo estos nigra ruino se ŝi nun eskapos...

Lin komencis skuegi febro... Ne povante plu resti en la domo, li kvazaŭ furioza ekkuregis for.

Li sentis bezonon ĉion konfidi al iu, satplori antaŭ iu...Liaj samhejmanoj ne estas tio, kion li deziris... Nun ankaŭ lia paĉjo ekkoleris... Eĉ se Miloŝo nun proponus al li la filinon, li kraĉus en liajn okulojn...

Tial li ĵetiĝis al la turko. Li stumble iris kaj glitis sur la ŝlimiĝinta tero. Li ne sciis je kio lia la kapo batiĝis...

Li alvenis tien ĝustekiam Piro estis donanta ordonojn al siaj ĝendarmoj.

– Ho, jen Laĉjo?... – Kio okazis? – demandis li mire.

– Mi venis al vi...

– Bone, bone, iru tien, en la ejon, mi tuj venos.

Lazaro eniris la ejon... Post mallonga tempo Piro alvenis.

– Nu, kion vi faras, kara Lazaĉjo?

– Okazis malbonaĵo, sinjoro mia!

– Kio do?

– Nia plano fiaskis!

– Kiel fiaskis?

– Fiaskis. La knabino ne volas...

– Ha-ha-ha!... Se ŝi ne volas, oni trudedzinigu ŝin.

– La patro forpelis ŝin.

– Kie ŝi estas nun?

– Tion neniu scias!... Ŝi malaperis kiel vaporo!...

Piro konsterniĝis... Li kvazaŭ vidus ke nevidebla mano umas kaj malrealigas liajn planojn.

– Tamen, kiel ŝi povas ne voli?

– Ŝi ne volas!

– Sed kion diras Ivano?

– Li nun furioziĝis. Li preskaŭ abomenas Miloŝon. Al mi jam ŝajnas ke, eĉ se Miloŝo nun konsentus – li ne svatos ŝin!...

– Nu, verdire, preskaŭ...

– Preskaŭ kio?

– Li ne bezonas ŝin!

– Li ne benzonas, sed mi bezonas!... Mi ne plu vivos se ŝi estos ies ajn!... Mi preferus ke vi pafu per pistolo al mi, ol ke vi tion diris...

Tiam li komencis verŝi larmojn... La turko komencis karesi lian kapon.

– Ne ploru!... Tio estas hontinde!... Ŝi ja devos esti via, krom se Dio forprenos ŝian vivon!...

– Tamen, kion pri paĉjo?...

– Tion mi ordigos. Mi ja diris: ne zorgu pri tio!... Ni iru tuj al Ivano. Vi ja scias ke li obeas al mi.

La vizaĝo de Lazaro gajiĝis. Li pli timis koleron kaj fieron de la patro, ol malkonsenton de Jelica. Al li ekŝajnis ke ĉio finiĝos bone. Tial li kisis la manon de la turko.

La turko tenerigis sian vizaĝon. Li fiksrigardis Lazaron, kaj diris:

– Laĉjo, Laĉjo!... Vi min infanigas. Rigardante vin, mi vidas mian junecon!... Mi ĉion faros por vi!... Ni iru al via domo...

Ili ekiris ... Pluvgutoj desur nuduĝintaj branĉoj faladis sur iliajn vestaĵojn. Piro konsolis Lazaron:

– Ne zorgu! Se mi ion entreprenas, tio devas realiĝi. Mi deziregas ke tiu knabino estu via... kaj ŝi estos via!...

Kiam ili eniris la domon, tie regis tohuvabohuo. Ivano bruis kaj kriis. Ĉu li, Ivano Maraĵĝiĉo, ĉu li povas esti rifuzato?... Se iu tion hieraŭ dirus al li, al tiu li, kiel al la plej granda malamiko kraĉus en la okulojn!... Sed hodiaŭ, jen, li bonvenigis homon ĉe sia fajrejo, kaj tiu diris al li, rigardante en liajn okulojn: „Knabino ne volas en vian domon, ne volas edziniĝi kun via filo!“

Virinoj en anguloj sidis acidvizaĝe, malstreĉinte la lipojn, preskaŭ plorante... Mladeno estis foririnta.

Piro ĝentile salutis lin.

La gejunuloj tradicie kisocele proksimiĝis al lia mano. Ivano leviĝis kaj resalutis Piron starante...

– Kial vi kriegas? – demandis lin Piro.

– Pli bone ne demandu! Mi preferus morti ol ĝisvivi ĉi tian honton!... Mi, la ĉagrenulo, jam estis pretiĝanta! Mi pensis: nur Dio scias ĉu mi ĝisvivos ankoraŭ iun festenon, tial mi nun gaju kun la bonaj homoj. Sed nun, jen...

– Kio okazis?

– La knabino ne volas.

– Ili voligu ŝin!

– Kiu?

– La patro.

– Kia patro?... Ĉu tio estas patro? Se al mi iu el miaj samdomanojn tion dirus, mi mortigus la dirinton!

– Ne ekscitiĝu... Mi prizorgos ĉion...– diris la turko milde.

– Mi ne bezonas ŝin! Ĉu vi opinias ke mi post ĉi tiu hontigo transpaŝos la sojlon de Miloŝo?...Ho, mia Dio, ne permesu tion!

– Tamen... tio devas okazi.

La okuloj de Ivano ekfulmis.

– Neniam! – diris li.

– Tamen mi diras: tio okazos!

– Mi ne povas!

– Vi povos, povos! Pro la amo al sia infano la patro ĉion povas!...Lo, Laĉjo estas bona infano. Li amas ŝin. Estas peko disigi tiujn, kiuj amas unu la alian!... Kaj... finfine, ĉu vi nur unu fojon faris ion, kion vi ne volis fari?...

Ivano mallevis la kapon. Estis videble ke li batalas kontraŭ si mem... Unuflanke fiero, aliflanke homo kiu nur bonon por li faris, kiu lin petas, petas lin fari ion por Lazaro.

Ĉiuj rigardis kaj atendis respondon de Ivano, sed neniu atendis tiel dezire kiel Lazaro. Liaj okuloj kunfandiĝis kun la vizaĝo de la patro.

Ivano levis la kapon. Lavizaĝo da Lazaro sereniĝis...

– Bone! – diris Ivano. – Ĉi tion mi faras nur pro vi, kara agao!...

Lazaro sentis faciliĝon en la animo; al li ekŝajnis ke Jelica jam estas lia...

– Do, ni iru ĉivespere! – diris la turko.

– Jes, sed la knabino ne estas tie! – diris Ivano.

– Kiel ne estas?

– Mladeno diris al mi ke la patro pelis ŝin for, ke post tio ili ŝin ne vidis...

– Tio estis ŝerco! – diris la turko. – Ŝin oni trovos.

– Ŝin oni ne trovos! – diris Marinko enfluginte la domon kiel furiozulo.

Ĉiuj konsternegiĝis. Ivano ekstaris, kaj Lazaro impetis al li.

– Kial ne?

– Vi ŝin ne plu trovos. Ŝi estas en la domo de Alekso.

Ĉiujn kvazaŭ batus fulmo. Ĉiuj senvortiĝis, aŭdiĝis neniu vorto... La turko unua rekonsciiĝis.

– Kion vi parolas? – diris li kaj akre alrigardis Marinkon.

– La veron, sinjoro. Vi scias ke mi bone vidis.

– Kaj?

– Nun, nenion ni faros.

– Kiel nenion! – ekkrietis Lazaro. – Ni forkaptos ŝin!

– Tion ni ne povos.

– Kial? – demandis ĉiuj.

– Ĉar tie estas Stanko.

Ekregis plensilento...Ĉiuj senmoviĝis. Al Piro ŝajnis, kvazaŭ iu premus lian kolon.

– Ĉu Stanko?!...

– Jes, Stanko kun sia kunularo. La domo estas plena da hajdukoj!... Tie estas ankaŭ la popo kaj la vilaĝestro... La popo benas kaj la hajdukojn kaj la neston hajdukan!...

Piro kaptis la bruston de Marinko kaj komencis skui lin.

– Neeble, kion vi parolas?

– La veron.

– Mi iras forkapti ŝin! – diris Lazaro kaj ekimpetis for.

– Ne moviĝu! – ekkrietis la turko kiel aspido, kaj per rigardo haltigis Lazaron.

Ĉiujn kaptis timo pro la horora rigardo de Piro. Okuloj liaj dum momento sangiĝis, verŝante fajron sur la homojn.

– Neniu moviĝu! Marinko!... Iru malrapide, kaŝiru kaj kontrolu ĉu viaj maljunaj okuloj trompis vin...

– Tamen... – ekparolis Marinko.

– Iru!... Ĉu vi scias kion vi parolas?... Domo dumtage plena da hajdukoj!...Vi estas freneza!...

– Tamen, kara mia...

– Iru!...

Marinko eliris tra la pordo.

– Se tio estas vero, ve al vi, Nigra Marĉo!... – ekĝemis la turko. – Ve al vi, popo Milojo! Via barbo luliĝos sur senfoliaj branĉoj de la plej proksima arbo!... Mi vin pendigos, pri tio oni longe rakontos!...

Terura estis la turko.

Li treniĝis de arbo al arbo, atente kiel kato...Kiam li fine povis vidi tra la malfermita pordo, starante malantaŭ arbo, li konsterniĝis. En la domo estis neniu... Alekso sidis kiel ĉiam kun malplektitaj haroj, nudkapa, kun ĉibuko en la mano. Petra staris ĉe fajrejo fiksrigardante tegmentofenestron...

Marinko komencis froti la okulojn. Tamen, ĉu povas esti ke la okuloj lin trompas?...

Li denove komencis rigardi. Li ŝteliris pli kaj pli proksimen... Se ili eĉ unu vorton elbuŝigus, li aŭdus, tiom proksime li estis!... Tamen li neniun vidis!...

– Ne, tio estas malvero!... – flustris li. – Mi ilin ĉiujn vidis tie: kaj la popon kaj lavilaĝestron, kaj Stankon, kaj ankoraŭ unu hajdukon!... Tio estas malvero!... Ili kaŝiĝis en la domo!...

Nenion vidinte, li tamen decidis konvinki la turkon traserĉi la domon de Alekso.

La turko jam malpaciencis kiam Marinko revenis.

– Nu, kio okazas? – demandis li. Marinko levis la ŝultrojn:

– Kara agao, mi ne mensogis vin!

– Nu, ĉu ili estas tie?

– Nun tie estas neniu... Tamen, ili estis tie!... Ili kaŝiĝis. Mi ĵuras per la kapo, ke ili kaŝiĝis!

– Kie kaŝiĝas?

– En la domo de Alekso, en la konstruaĵo, en la korto, ie ajn, sed ili estas tie!...

– Vi estas stultulo!... Mi ĵus diris al vi, ke vi eraris... Ne stultumu plu, sufiĉas jam.

La turko deziris tiamaniere ĉesigi pluan interparolon pri tiu afero, sed li tre eraris, ĉar Marinko estis kiel nebridebla ĉevalo: se li ion decidas– li ne cedas.

– Tamen, vi devas fari tion por mi: vi devas traserĉi la domon de Alekso!

La turko ekridis.

– Ĉesu jam, mi petas vin!

– Tio ja estos senutile!

– Tamen... mi petas vin!...

– Mi ne volas! – diris la turko.

Marinko decidis devigi lin. Li uzis trukon:

– Do ne faru tion!... Mi petis vin, por vin helpi. Hajdukoj en la vilaĝo, hajdukoj en la kampo, hajdukoj ĉie!... Tute proksime, sed vi ne volas etendi la manon... Mi petas vin!...

La turko silentis.

– Tio estas bonega ŝanco kapti ilin, kara agao! Sufiĉas ke vi etendu la manon – kaj vi premos iliajn kolojn! Pripensu, kara mia, ĉiu kiu alvenos kaj aŭdos kion vi faris, admiros vian kuraĝon kaj vian saĝon!...

Tiu diro estis efekta. Marinko sciis kion li devas diri.

– Bone, mi faros tion!

– Sed tuj! Poste povas esti malfrue!

– Tuj!... Ni faru tion senprokraste!... Ĉu iros ankaŭ vi, Laĉjo?

– Mi iros!

– Ĉu ankaŭ vi, Ivĉjo?

La turko tiel plaĉe alrigardis Ivanon, ke tiu simple devis diri:

– Mi iros!...

Ĉiuj ekiris al la apudvoja tranoktejo.Tie ili rapide ekipis sin. Piro zonis armilojn, dum ĝendarmoj, armitaj milite, estis atendantaj ordonojn.

– Ek! – ordonis la turko.

Kiam ili proksimiĝis al la domo de Alekso, Piro ordonis al ili ĉirkaŭi la domon, dum li kun Ivano, Lazaro kaj Marinko ekiris rekte al la sojlo.

– Nek movon! – ekkriegis li.

Ĉiuj domanojn, kiuj estis plenumantaj iun laboron, turniĝis al li kaj restis senmove...

Alekso sidis kun la kapo klinita, nudkapa, kun malplektitaj haroj. Li nur levis la kapon, sed vidinte kiu estas la gasto, li denove kliniĝis.

– Meĉjo! Ibro!... Asao!... – ekkriis Piro. La ĝendarmoj alkuris.
– Ĉion traserĉu!...
La turkoj disiris en ejojn kaj konstruaĵojn...
– Parolu, maljunulaĉo! – diris Piro al Alekso. Alekso levis la kapon.
– Kiu estis ĉi tie?
– Neniu.
– Vi mensogas! – diris la turko. Alekso nenion respondis.
– Parolu jam...
Alekso silentis.
– Ĉu vi ne scipovas paroli?
Nenia respondo... La turko komencis skui lin.
– Respondu!
– Mi diris al vi! – elbuŝiginte tion, Alekso alrigardis lin per glacia rigardo.
– Mi ja scias, ke ĉi tie estis hajdukoj...
– Do trovu ilin! – dirinte tion, Alekso mansvingis ĉirkaŭ si.
Ĝendarmo revenis el la ĉambro, li ĉion traserĉis, sed nenion trovis.
– Nu, Uso!
– Neniu estas tie.
– Serĉu, serĉu!...
– Ĉi tie estas neniu!... Eble ili estas en la subtegmento...
– Traserĉu la subtegmenton.
Oni alportis ŝtuparon, kaj la turko alsupris. Enrigardinte ĉiun anguleton, li revenis.
– Ĉu neniu?
– Neniu!
Tiumomente revenis ankaŭ tiuj, kiuj traserĉis la konstruaĵojn, kaj sciigis ke ankaŭ tie estas neniu.
– Tamen, ĉu ĉi tie estis la popo? – demandis Piro Alekson.
– Ne estis.
– Sed kie vi kaŝis Jelican de Miloŝo?
– Kiun Jelican!...
– Ne ŝajnigu vin stulta! Jelican de Miloŝo Seviĉo. Ŝi estas ĉi tie. Ŝi fuĝis en vian domon.
– Mi ne vidis ŝin.
La turko ekrigardis lin rekte en la okulojn. Tamen, la okuloj de la maljunulo nenion esprimis.
– Vi mensogas!...
– Ne!... Vi demandas min, mi respondas al vi!... De la tago kiam min via servulo kaj ĉi tiu flavbekulo (li montris Marinkon kaj Lazaron) diskreditis kaj hontigis – mia domo iĝis timigilo eĉ por hundoj Nigramarĉaj!... Neniu de tiam transpaŝis ĉi tiun sojlon, krom vi hodiaŭ!... Kial do mi mensogu vin?...

La turko rigardis jen lin, jen Marinkon.
– Do, neniu estis ĉi tie!
– Neniu.
Piro alpaŝis Marinkon, alrigardis severe en liajn okulojn, kaj diris:
– Vi estas stultulo!
Post tio li turniĝis al la aliaj:
– Ni iru hejmen!...
Li forturniĝis kaj eliris.
Marinko estis kvazaŭ kadavrigita. Absolute ne estas eble ke li eraris, li ja per siaj propraj okuloj vidis la vilaĝestron, kaj la popon, kaj Stankon, kaj la alian hajdukon, kies nomon li ne sciis. Li provis ankoraŭfoje konvinki la turkon ke li vere vidis tiujn homojn en la domo de Alekso.
– Mi petas vin...
– For! – diris Piro sombre...
– Ne pelu min for, kara agao!... Vi scias ke mi mortigos min mem se mi perdos vian favoron!... Mi vin neniam mensogis!... Vi tion ankaŭ nun bone scias!
– Nu, bone, sed kie ili estas?
– Ili estis en la domo!
– Sed kie ili estas?
– Tion mi ne scias... eble ili foriĝis!... Tamen, mi ĵuras per ĉio en la mondo, mi ilin trovos!...
– Ni ja ĉion traserĉis!...
– Ili ne povas esti malproksime.
La turko nur levis la ŝultrojn.
Ili eksilentis. Ĉiu enabismiĝis en proprajn pensojn. Al neniu estis facile sur la animo. Piro serioze enpensiĝis. Ĉio ĉi tio, ĉi tiu interproksimiĝo de la popo kaj vilaĝestro kun Alekso, la persistemo de Jelica, ĉi tiuj miraĝoj de Marinko, ĉio ĉi strange, peze premis lian animon. Li sentis ke disfalas la planoj, kiujn lu dum multaj jaroj konstruis, kvazaŭ ilin detruus nevidebla mano.
Kapo lia komencis malleviĝi sur la bruston...
Ivano, vidinte Alekson, neniel povis kvietiĝi. Li nur nun komprenis kiom tiu homo suferis, kiom li ankoraŭ suferas...Io malvarma absorbis lian tutan forton...
Ankaŭ Lazaro!...Ankaŭ li ne sentis sin tre agrable. La malapero de Jelica, la alveno de Stanko (ĉar li konstante konjektis ke Stanko alvenos, li ankaŭ nun kredis ke Stanko alvenis)... Li rememoris la teruran nokton kiam li tra la monto kuregis... Li rememoris la teruraĵojn, la torporon... kaj eĉ ĉapo lia hirtiĝis...
– Li estas tie!... Li estas tie!... flustris Lazaro nekonscie... – Kion mi, ho Dio, faros, se mi renkontiĝos kun li?... Mi scias ke li min malamas... Fakte, ankaŭ mi malamas lin, estus bone se Dio estus lia amiko samkom lia amiko estas mi!... Tamen, se ni renkontiĝos...

Penso trafulmis lian kapon. Li alproksimiĝis al la turko.
– Mi petas vin! – diris li.
La turko direktis la okulojn al li. Lazaro sentis timtremon pro tiu rigardo.
– Kion vi volas?
– Mi-mi volis... – embarasiĝis Lazaro.
– Kion?
– Peti vin pri io.
– Parolu!
– Permesu al mi kunhavi armilon.
– Kial vi bezonas ĝin?
– Nu... eble mi ekbezonos...
La turko galhumore ekridis.
– Ĉu vi timas Stankon? – diris li mokriproĉe.
– Nu, kara agao, kun urso promenu, sed pafilon prete tenu...
– Ĉu vi do timas Stankon? – diris la turko, kaj alrigardis lin severe.
– Ĝuste pro li mi tion petas
– Do, kunhavu. Sed se vi lin ekvidos, se vi lin renkontos – mortigu lin!... Ĉu vi komprenis: mortigu la hundon!
– Bone – diris Lazaro.
Ĝuste en tiu momento ili alvenis al la domo de Ivano. Ivano invitis la turkon kaj liajn akompanantojn manĝeti, sed Piro kapneis kaj foriris enpensiĝinta. Marinko ekiris kun li, sed la turko revenigis lin.
– Iru kaj atentu!
– Bone, agao.
– Ek, Marinko, trinku iomete! – diris Ivano. – Vi nenion trinkis, nenion manĝis dematene.
– Volonte, Ivĉjo, volonte!... Mi vere estas malsata. Li eniris la domon.
Trinkinte iom da brando kaj matenmanĝinte, li adiaŭis la domanojn... Lazaro eliris malantaŭ li.
– Oĉjo Maĉjo!
– Ho, parencĉjo.
– Diru al mi la veron; ĉu vi vidis Stankon?
– Same kiel vin nun!
– Ĉu ankaŭ ŝi estis en la domo?
– Povra mia Laĉjo !... Mi preferus diri al vi ke ŝi ne estis tie, sed kion fari – jes, ŝiestis!...
La brusto de Lazaro streĉiĝis. Li diris, kvazaŭ por si mem:
– Mi devas mortigi lin!
– Vi devas!...
– Aŭ li min!...

– Estu kiel devas esti!... Ĉar, malforgesu! Se vi ne mortigos lin, li tutcerte mortigos vin!... Koncerne Jelican... nenio okazis!... Ŝi estas via pasinteco!... Adiaŭ!...

Li foriris...

En la domo de Ivano ĉiuj kvazaŭ perdus la kapon... Antaŭsento de granda malfeliĉo ekregis ĉiujn kiuj kapablis pensi...

Frostiĝinta, tramalseka, tuthumida, Piro revenis en la tranoktejon. Tamen la tuta malkvieto de la tago ne estis simila al la malkvieto de lia animo. Animon lian konkeris infero...

Ne estis facile al li! ... Kvankam neniu estas trovita en la domo de Alekso, tamen al li ŝajnis ke tio, kion Marinko vidis, estas vero...Ne eraras Marinko! Lia okulo vidas en la plej densa mallumo...

Tamen – hajdukoj en la vilaĝo! La popo, vilaĝestro kaj ĉiuj estimindaj homoj estas kun ili. Li jam vidis kiel nigramarĉanoj kolektiĝas ĉirkaŭ la domo de Alekso, kiel ilipaciĝas kun li.

Krom tio... al li ŝajnis ke tio okazas pro li, ke iu ŝtelvidis liajn sekretojn, ke iu komprenis ĉion, kio okazis.

Li eniris la ejon por demeti la vestojn... Post tio li ordonis ke oni alportu al li kafon. Tiam, revestiĝinte, li prenis ĉibukon kaj ekfumis...

Trafumrondaĵoj lin kaŝrigardis kapoj de liaj malamikoj. Li vidis vizaĝojn ridetantajn, kvazaŭ volantajn diri: „Vane vi penis, ho turko!..."

Tio lin tiom kolerigis, ke li, saltinte desur la divano kiel ŝafo, komencis pasumi tra la ejo...

Koleregon li ne plu povis elteni. Li pripensadis turmentojn, per kiuj li turmentos tiujn malestimindajn homojn. Mil pensoj interkrucuĝis en la kompatinda kapo... Pensoj nur ekbriladis kiel fulmo, malaperonte jam la sekvan momenton...

Li manfrapis la frunton.

– Tamen, mi devas venki ilin!... Ili devas antaŭ mi genuiĝi, ili devas peti min!...Tio devas okazi! Tamen, kiel?...

Jes, ĝuste tio estis la problemo!... Li volas, animo lia bolas – sed kiel fari tion? ... Ĉiu plano, kiu fulmis tra lia kapo, ŝajnis al li mizera...

– Mi freneziĝos, ho kredo mia! – dirinte tion, li denove, malleviĝis sur la divanon...

„Ne, ne eblas!... Absolute ne eblas!... Tiu popo!... Kiel paŝtisto, kiu gardas sian gregon, tiel li gardas siajn nigramarĉanojn... Li eĉ Ivanon provos revenigi!"

– Vi ne sukcesos, popaĉo! – ekkriegis li abrupte. – Mi ne permesos!... Tiam en lian kapon venis ideo alvoki Miloŝon Seviĉon. Al li ekŝajnis ke tio sukcesos... Li frapis la manplatojn.Ĝendarmo vidigis la kapon tra la pordo.

– Ibro, iru al la domo de Seviĉo, alvoku Miloŝon.

La pordo fermiĝis.

# 13. TERURAJ SONĜOJ

Li eksentis animtrankvilon. Al li ekŝajnis ke tio estas sukcesodona ideo. Li apartigis Ivanon, nun li tion faros ankaŭ kun Miloŝo. Tio estas du estimataj homoj, ili eĉ povus esti vilaĝestroj.

– Ha!... esti vilaĝestroj! Ĝuste, ĝuste!... Mi devigos tiun kadukulon forĵeti la regbastonon. Tio estos tre facile. Post tio mi altrudos al ili Ivanon. Ivano ja estas mia!... Kiel mi diros, tiel li estros la vilaĝon!...

Lia vizaĝo gajiĝis... Io ĉarma kaj varma disfluis tra lia brusto, koro lia ekbatis pli rapide...

– Mi vere malsaĝiĝis! – pensis li. – Kion mi timis?... Ekzistas cent manieroj por interkvereligi nigramarĉanojn... Se mi tamen ne sukcesos, se min malhelpos la vilaĝestro aŭ la popo – mia Asao havas kredindan okulon kaj fidindan manon, li forigos ilin desur mia vojo!... Mi vere estis stultulo!...

Li ordonis alporti ankoraŭ unu kafon, malplenigis la pipon, kaj replenigis ĝin... Fumo komencis tordiĝi super lia kapo... Li komencis sorbtrinki la kafon...

Miloŝon li ne atendis longe. Ibro Miloŝon trovis tuj, ĉar Miloŝo estis hejme.

Oni sciigis al Piro, ke Miloŝo jam alvenis.

– Li venu ĉi tien... – diris Piro per agrabla voĉo...

Miloŝo eniris tute pala kiel malvivulo. Liaj genuoj tremis, la tranoktejo turniĝis ĉirkaŭ li... Samkiel mi jam diris, Miloŝo estis kvieta bienposedanto; neniam li procesis kontraŭ iu ajn, neniam li partoprenis juĝan persekuton.

Piro leviĝis desur la divano, alpaŝis Miloŝon kaj alridetis.

– Bonvenon! – diris li.

– Dankon! – diris Miloŝo, pli pro kutimo resaluti per tiu vorto, ol pro pripenso.

– Sidiĝu, bona homo, sidiĝu!

– Negrave, mi povas stari... – diris Miloŝo, dum dentoj liaj preskaŭ klakis.

– Sidiĝu ja, homo!...

– Bone, mi sidiĝos – dirinte tion, Miloŝo malrapide sidiĝis sur la divanon.

– Kia estas via sano? – demandis Piro.

– Dank al Dio, bona...
– Kiel fartas viaj samhejmanoj?
– Dank al Dio, bone!
– Bone, bone!... Sano, unue sano, poste ĉio alia.
MilOŝo nenion respondis. Lia koro batis tempeste. Se Piro penus fiksaŭskulti, li aŭdus kiel ĝi pulsegas.
– Nu, diru'! – ekvortis la turko.
MilOŝo ektremis.
– Kion?
– Ĉu vi atendas gastojn?... Ĉu vi pretigas vespermanĝon?... Ni, verdire, pretiĝas...
MilOŝo eksentis hontegon. Li preferus kion ajn alian, nur ke Piro ne demandu ĉi tion!... Embarasiĝinte, li komencis galimatii sensencaĵojn:
– Nu... mi atendas... favoran svatadon... mi parolas pri knabinoj... nu... kiam knabinoj edziniĝas...
Li jam neniun vidis antaŭ si. Liajn okulojn kovris mallumo; al li ekŝajnis ke tero malaperas sub liaj piedoj, kvazaŭ li sinkus en senfundejon... Tiam li senkonsciiĝis kaj falis desur la divano...
Piro alkuris. Li kaptis MilOŝon por levi lin. La koro de MilOŝo estis bateganta... Ĉiu muskolo, kiun Piro tuŝis, tremis sub liaj fingroj...
– MilOŝo!... Hej, MilOŝo!... Rekonsciiĝu, homo!...
MilOŝo tamen restis senmova...
Piro alvokis ĝendarmojn. Ili enkuris kaj komencis verŝi malvarman akvonsur MilOŝon.
MilOŝo komencis rekonsciiĝi.Li malrapide leviĝis, komencis froti la frunton, ĉirkaŭgapis...
– Leviĝu! – diris Piro al li.
MilOŝo leviĝis malrapide, sed timo denove ekregis lin...
– Sidiĝu, MilOŝo! – diris Piro al li delikate. – Kio okazas kun vi, homo?... Vi palegas.
– Mi fartas malbone... Mi volas iri hejmen.
– Sidiĝu, ripozu...
Piro ordonis alporti iom da brando, kaj donis ĝin al MilOŝo... La brando refortigis lin.
– Tamen, diru, kio okazis kun vi?
– Mi ne scias.
– Ĉu tio iam ajn okazis al vi?
– Neniam.
– Frato mia! – diris Piro, kaj prenis lian manon... Ĉu vi eble ektimis?... Ne timu! Ankaŭ mi ja estas homo! Mi alvokis vin por diri, ke ankaŭ mi, kun

miaj amikoj, ĉivespere gastos en via domo. Mi aŭdis homojn kiuj diraske vi estas honesta majestulo; mi ja tre ŝatas honestajn majestulojn!...

Ne nur hontosento, sed ankaŭ timtuŝo konfuzis Milośon...Kiel diri al Piro ke la svatado ne okazos?...Neniu saĝa penso venis en lian kapon...

Piro, estante lerta homo, komencis afabli, atendante ke Milośo ekparolu.

Fine Milośo rakontis al la turko ĉion, absolute ĉion: ke Jelica rifuzis edziniĝi kun Lazaro, kaj ke li forpelis ŝin.

– Tamen, kie ŝi estas nun? – demandis Piro. Milośo levis la ŝultrojn.

– Mi aŭdis ke ŝi estas en la domo de Alekso – diris Piro okulfiksantelin.

Milośo tute naive respondis:

– Povas esti.

– Krom tio, poste mi aŭdis ke ŝi tie renkontiĝis kun la ŝtelisto, kun Stanko.

Milośo denove sentis ke li perdas la konscion, li paliĝis kiel malvivulo.

– Mi ne scias – apenaŭ elparolis li.

– Aŭskultu, Milośo! Vi estas honesta homo. Mi vin amas, mi ne malamas vin. Tamen, mi diras al vi: se vi nun senprokraste ne foriros en la domon de Alekso, se vi ne prenos la knabinon – mi nenion garantias al vi!

Okuloj liaj fulmis.

– Bone – diris Milośo, eĉ ne sciante kion parolas. – Mi iras tuj.

– Iru... iru!... Adiaŭ!...

Milośo eliris el la ejo

Piro longe paŝasis, pensante:

– Li timas min. Li trudvenigos ŝin el la domo de Alekso... Li devigos ŝin edziniĝi kun Lazaro...

Tamen li komprenis, klare komprenis, ke lia plano fiaskis. Li sentis ke li ne povos malkvereligi la vilaĝanojn, ke neniu sin turnos al li. Nu, se li ne povas ilin malkvereligi, li povos kvereligi ilin; al li ekŝajnis ke tio en ĉi tiu momentoestos sufiĉe...

Li sidiĝis por ordigi siajn kaosajn pensojn...

– Mi eksigos la vilaĝestron!... Mi devigos lin forĵeti la regbastonon... Tion mi ja faros tuj, senprokraste!... Mi jam scias kiel fari tion!... Al ĉi tiu mi ordonis forkapti la knabinon... kaj li faros tion... Tiam mi ordonos al li edzinigi ŝin kun Lazaro, kaj tio estos plenumita... Ivano estos vilaĝestro, tio altiros al ni ankoraŭ kelkajn vilaĝanojn... – Tio estos bone!... Estos bone!...

Li frapis la manplatojn.

Ĝendarmo vidigis la kapon tra la pordo.

– Iru al la domo de vilaĝestro, diru al li ke li tuj alvenu!

La pordo frapiĝis.

Post duonhoro la vilaĝestro Joĉjo estis antaŭ la turko. Serioza, kvieta, li staris kiel sanktulo.

La okuloj de Piro hakis lin.
– Mi volas demandi vin ion!.
– Bonvolu, sinjoro.
– Kio do okazas en Nigra Marĉo?...
– Pri kio vi parolas, sinjoro?
– Tio estas neimagebla! Vi min demandas!... Ĉu vi ne scias?
– Mi ne scias.
– Kiel vilaĝestro povas ion ne scii?
Joĉjo nenion respondis.
– Kia vilaĝestro vi estas, se vi ne scias kiu pasigas tagnoktojn en Nigra Marĉo?
La turko leviĝis kaj tute proksimiĝis al lia vizaĝo. Kviete renkontinte lian rigardon Joĉjo ankoraŭpli kviete respondis:
– Al mi neniu plendis, nur Dio ja povas ĉion scii!...
Al Piro ekŝajnis ke tion parolas la popo Milojo. Li beste ektempestis:
– Vi estas hajduka helpanto!...
Joĉjo kvazaŭ atendus tion... Tiu atako lin tute ne surprizis. Li denove kviete respondis:
– Mi ne estas!...
– Vi estas!...
– Mi ne estas!...
– Vi estas, mi ja diras tion!
– Nur se mi tion farus pro vi, se tio estus via ordono. Tamen, mi ne estas hajduka helpanto, en Nigra Marĉo ne ekzistas hajdukaj helpantoj!...
Se li parolus eksplodeme, impete, rifuzante kaj baraktante – Piro estus kontenta; sed li estis respondanta mallaŭte, kviete, malrapide, vorton post vorton. Ĝuste tio furioze kolerigis la turkon.
– Vi mensogas! – ekkrietis li. – Kio ja okazis hodiaŭ? Kiu estis en la ŝtelista domo, kune kun la ŝtelisto?...
La vilaĝestro Joĉjo ekpensis: neceso leĝon ne konas!... Tial li mensogis:
– Mi ne scias.
– Vi mensogas!...
– Mi ne mensogas!
– Vi mensogas! – siblis la turko kiel aspido. – Tie estis vi, tie estis la popo!... Mi scias tion... De mi vi tion ne povas kaŝi!... Tamen, jen mia ordono: jam morgaŭ kunvenigu la vilaĝanojn kaj redonu al ili la regbastonon, ĉar vi ne meritas ĝin!... Tion faru, ĉar alikaze, sciu, ke mi ne pardonos tion al vi!
– Mi ne kontraŭstaras... – diris Joĉjo kaj levis la ŝultrojn.
La turko ne plu povis rigardi lin. La kvietaj vortoj, la serena frunto kolerigis lin; eĉ la rigardo de Joĉjo kolerigis lin!... Li forturnis la dorson.

– Vi povas iri.
– Bone! – dirinte tion, Joĉjo ekiris al la pordo.
– Tamen, morgaŭ ne risku vian vivon...
– Bone!...

Kiam la pordo post li fermiĝis, la turko malleviĝis sur la divanon, fakte renversiĝis sur ĝin... Ĉiu hareto sur lia korpo hirtiĝis pro kolero.

„Per afablo oni nenion plu povas fari“, pensis li. „Nun mi agos pli saĝe, pli severe mi kondutos al ili... Du-tri fojojn mi ekkrios, forhakigos unu ne-obeeman kapon – tiam ni vidos kiel ili kondutos!... Ili estos obeemaj kiel junedzino!...“

Tiam li profundiĝis en siajn pensojn. Lia kapo kliniĝis... li kvazaŭ dronus en detruadon kaj bruligadon...

La ĉibuko delonge elfalis el lia mano... Al li ŝajnis ke li jam agas. Ke li detruas, faligas, ke ĉiuj adorkliniĝas antaŭ li, kvazaŭ antaŭ Dio... Animo lia murmuris plezure...

Abrupte eruptis nebula tufeto, kaj el tiu tufeto eliris homo, kiu direktiĝis al li... Li kvazaŭ fiksrigardus tiun homon... La vizaĝo ŝajnis al li konata, sed li ne memoris kie li ĝin vidis.

„Ĉu vi konas min?!...“ –

„Ŝajnas ke ne!“

„Mi vin konas, Piro!“ – dirinte tion la homo alpaŝis, kaptis lian kolon, kaj levis lin kiel plumeton...

Piro baraktis, luktis – sed vane. La terura mano stringis lian kolon samkiel vajco kunpremas tion, kio troviĝas en ĝi... Li perdis ankaŭ la voĉon, manoj liaj paraliziĝis... Li nur rigardis rigide, ne povante fari ian ajn moveton...

Abrupte, la homo ektondris per terura voĉo: „Mi estas Stanko!... Ĉu vi ne konas min, krimulo? Tiu nomo timfrapis lin...

Stanko kvazaŭ mallevus lin sur la teron, kaj komencis senzoniĝi. Ekrigardinte malantaŭ sin, ĉar io eksusuris, li vidis Marinkon, ligitan kiel vindita infano...

Stanko tiam kvazaŭ alpaŝus, prenus Marinkon, levus lin kaj pendigus sur branĉon...Nun vidu – diris Stanko al li – kion mi faros kun via Piro!... Mi ja levis vin iom pli alten, por ke vi pli bone vidu!...“

Tiam Stanko alpaŝis lin, turnis lin sur la dorson, genufleksis sur lian bruston, elingigis ponardon kaj komencis per ĝi karesi la manon... Piro, kvazaŭ, ne povante fari iun ajn movon, fiksirgardis Stankon, kaj el liaj okuloj ektorentis larmoj. – „Kio okazas, Piro? – Kio okazas, ĉu vi ne hontas?Ĉu vi larmas kiel virino?... Vin ne helpus, eĉ se vi naĝus en larmejo!...“ Per la klingo li ekkaresis sian manon... „Ĝi estas ŝtale akra, kvankam vi meritis ke mi vin buĉu per malakra!...“

Tiam Stanko kaptis lian kapon kaj retrotiris ĝin... La klingo ekbrilis super lia kapo, kaj Piro tuj poste sentis ke la akra fero penetras lian gorĝon...

Li ekkriegis plenpulme, kaj renversiĝas desur la divano.

Lia blekado alarmis ĉiujn en la domo. Ili alkuris kiel fulmo, sed li kuŝis kiel paralizita, ne kapabla movi eĉ unu membron...Li nur sentis doloregon sub la gorĝo...

Oni finfine rekonsciigis kaj levis lin, sed la sonĝo tiel forte influis lin, ke li senĉese ĉirkaŭgapis per terurita rigardo, tremante post ia ajn susureto...

La nokto estis malrapide malleviĝanta sur la teron, profunda, mornabunda, malseka tardaŭtuna nokto...Pro ĝi li sentis animan deprimon. Li ordonis ke oni bruligu meĉon kaj sidu kun li en la ĉambro...

Tamen li neniel povis ekdormi. Ĉar, tuj kiam li fermis la okulojn, reaperis la terura vidaĵo, ankoraŭ pli terura ol antaŭe.La sangavida rigardo de Stanko plonĝis en lian animon, algluiĝis, suĉante lian forton kiel hirudo suĉas sangon...

Estis profunda nokto... Ĉio eksilentis, nur grilo konstante kantis sian gajan kanteton... La ĝendarmoj mallevis la kapojn, dormetante.

Ekstere aŭdiĝis paŝoj... Konsternita, li rekonsciiĝis.Al li ekŝajnis ke tiu glacia mano denove kaptis lin je la kapo...Li volis ekkrii, sed ne povis. Ĉiu lia korpero paraliziĝis... Lia kapo kliniĝis.

La pordo malfermiĝis malrapide. Iu eniris la ĉambron tre atente, tiel atente ke neniu ĝendarmo sentis tion...

– Kiu estas tie? – Piro streĉis ĉiujn siajn fortojn.

– Mi, kara agao!

Lumo de la meĉo falis sur lian vizaĝon...

– Ho... tio estas vi, Maĉjo, – diris Piro sentinte faciliĝon, kvazaŭ oni demetus ŝarĝon desur lia animo.

– Mi. Mi venis por informi vin.

– Pri kio?

– Ili estas tie!

– Kiu?...

– Hajdukoj.

– Kie?... – diris Piro timoplene.

– En la domo de Alekso...

Piro diris nenion...

## 14. NOVA VILAĜESTRO

La vilaĝestro Joĉjo senprokraste ekiris al la domo de la popo, ĉar li jam diris al la popo ke tiu atendu lin hejme.

La popo estis tiom malpacienca, ke li ne povis sidi en la domo, tial li eliris sub la pluvon por vidi la vilaĝestron revenanta.

Ekvinidinte lin finfine, la popo ekiris rekonte al li.

– Nu, kio okazas? – demandis li.

– Nenio grava! – diris la vilaĝestro mansvingante.

– Diru ja, kio okazis?

– Nenio. Li volis rompi min. Mi kondutis tiel, kiel vi konsilis. Al mi ŝajnas ke lin tio ankorau pli flamigis...

– Kaj kio okazis?

– Nenio. Li nur diris ke mi jam morgaŭ devas rezigni la estradon.

– Ĉu rezigni?!

– Jes, redoni la regbastonon al la homoj, ĉar „vi ne indas ĝin, diris li."

– Kio poste okazis?

– Poste okazis nenio. Li embarasiĝis kaj ekkoleris...

La popo enpensiĝis. Li tion neniel povis encerbigi... Ankaŭ antaŭ eestis turkoj en Nigra Marĉo, sed ili ne miksis sin en la vilaĝajn aferojn...

– Nu, finfine, estu tiel. Vi redonu al ni la regbastonon, kaj ni denove donos ĝin al vi.

– Ne faru tion! Rezignu! Ĉu vi ne vidas ke li estas nebridebla?... Li ne volas ke mi estru... Nu, bone, mi ja ne devas estri! Finfine, sufiĉe longe mi ja estis vilaĝestro...

– Cetere, vi devas antaŭvidi, Joĉjo, kion li planas!... Ĉu vi scias kiu estos nia vilaĝestro?

– Kiu?

– Ivano... Tio estas vera kiel vorto de profeto!... Mi povas garantii per mia kapo!...

La vilaĝestro nur levis la ŝultrojn.

– Sed kion ni faru nun?

– Nun, nenion, ni ja devas esti singardaj. Ivano altiros homojn al la turko.

– Ni penos ne permesi tion.

– Jen tion ni faros.

La vilaĝestro Joĉjo ekiris hejmen por ordoni al Simo kunvenigi la vilaĝanojn...

Jam la sekvan tagon la profundaĝuloj kolektiĝis apud la juĝejo.

– Fratoj miaj! – ekkriis Joĉjo desur altano. – Mi vin alvokis por diri: dankon por la honoro! Mi ne plu povas esti vilaĝestro. Hejmo, maljuneco, malforteco, finfine, sufiĉe longe mi estis vilaĝestro. Jen, fratoj miaj, mi redonas la regbastonon, donu ĝin al iu inter vin...

Li transdonis la regbastonon.

– Sed kiu povas esti pli bona ol vi? – demandis kelkaj.

– Tamen, kial vi tion faras, Joĉjo?

– Fratoj miaj, mi ne povas plu! Mi opinias ke estas juste ke mi iomete kvietiĝu...

– Nu... – diris iuj – tio estas juste; sed tio ne estas tre granda ŝarĝo, vi jam kutimiĝis...

– Aŭdu, fratoj miaj! – diris la popo. – Pravas kaj vi kaj li. Li pravas pli, ĉar li tion devas fari!... Ne demandu kial; sufiĉe estas, se mi diras ke li devas! Do, prenu ĉi tiun regbastonon, kaj donu ĝin al iu alia.

– Al kiu? – komencis demandadi homoj. Aŭdiĝis voĉĥaoso. Tiam subite el la voĉĥaoso eksonis la voĉo de Marinko.

– Ĉu vi scias, fratoj miaj, kiun ni elektos?

Ĉiuj okuloj turniĝis al li.

– Mi opinias ke plej bone estus elekti Ivanon Maraĵĝiĉon. La homo estas honesta, bona, bonhava... jen ĉio! Mi opinias ke li estas elektinda...

La vilaĝestro kaj la popo nur alrigardis unu la alian.

– Kial ne?

– Ivano estas inda!...

– Kompreneble li estas inda!... Ĉiuj ni estas bonaj homoj... Sed li estas elturniĝema en ĉiaj cirkonstancoj... – kriis Marinko. – Ĉu vi konsentas, fratoj miaj?

– Ni konsentas! Ni konsentas!

– Tamen mi preferus ke restu Joĉjo! – diris Petro Ŝokĉaniĉo. – Mi ne diras ke Ivano ne indas, sed Joĉjo pli kompetentas pri tiaj aferoj. Tamen, se li ne volas, estu Ivano... Ĉu ni konsentas?

– Ni konsentas!

– Do, Ivano, prenu!

Li prenis la regbastonon, kiun Joĉjo donis al li, kaj enmanigis ĝin al Ivano...

Leviĝinte sur altanon, Ivano interkisis kun Joĉjo. La popo diris:
– Ivano, jeĵuru ke vi honeste kaj majeste plenumados la taskojn de vilaĝestro.
Post tio li demetis desur la ŝultro avensakon, en kiu troviĝis liaj libroj kaj kruco, demetis la ĉapon, kaj surmetis epitrahelion sur la kolon.
Ĉiuj demetis la ĉapojn. Ivano krucsignis kaj kisis la krucon. Post tio li komencis ripetadi post la popo sekvajn vortojn:
– Mi, Ivano Maraĵĝiĉo, ĵuras je la nomo de la viva Dio, kaj je ĉio, kio al mi estas la plej kara kaj la plej sankta,ke mi mian devon plenumados honeste kaj majeste; kiel mi agos, tiel Dio helpu min! Amen.
Post tio li denove kisis la krucon.
– Ivano! – diris la popo. – Nun vi estas vilaĝestro. Kiel servisto de la dia altaro, mi volas admoni vin, ke estas terura la voto per kiu vi hodiaŭ ĵuris antaŭ la Dio kaj antaŭ ni. Vi scias kia estas via devo, tial respektu ĝin, ĉar respektante ĝin, vi respektos ankaŭ Sinjoron mem. Neniumomente vi rajtas forgesi ĉi tiujn homojn kaj ilian bonon, ĉar se vi votrompos, vi perdos ankaŭ vian animon. Kiu unu fojon la animon perdas, tiu ĝin neniam plu reakiras. Ne ekzistas trezoro, per kiu oni povas aĉeti animan pacon.
Ivano sentis svarmotikladon pro ĉi tiuj timigaj vortoj de la popo; li sentis grandan pezon de la nova tasko sur sia animo...
– Popo! – diris li. – Mi faros ĉion, kion mi povas, kion mi scias.
– Nu, estu benita...
Tiam komenciĝis interkisado... Post tio la homoj komencis disiri al siaj domoj.
Akaŭ la popo kaj Joĉjo ekiris hejmen. Ivano alkriis:
– Atendu, ankaŭ mi iras kun vi. Ili ekiris.
– Tamen mi deziras demandi vin: kial vi forturnas de mi la kapon?
– Kiu?
– Vi ambaŭ.
– Ni ne forturnas.
– Mi ja vidas tion, popo!... Tion oni kaŝi ne povas!... – Mi ne scias kial vi tiel kondutas... Mi ja aŭdis, ke vi eĉ estis en la domo de Alekso.
– Jes, ni estis tie.
– Kaj vi tie sidis kun tiu lia ŝtelisto!...
– Li ne estas ŝtelisto! – diris la popo serioze.
Ivano alrigardis lin.
– Kion vi diris, popo, kion?
– Mi diris ke li ne estas ŝtelisto!
– Sed kiu tiukaze ŝtelis mian monon?
– Vi ekscios.

– Tamen, mi volas scii nun! – dirinte tion. Ivano haltis antaŭ la popo.

– Nun tio ne estas pruvebla.

– Kial?

– Ĉar vi malnormaliĝis!

– Kion vi parolas, ho popo?!

– Jes, vi malnormaliĝis! Vi vidas nur tion, kion Piro volas ke vi vidu!... Baldaŭ vi, same kiel Marinko, informados la turkon pri ĉiu vorteto, kiun oni al vi diras!... Kiamaniere li stultigis vin, tion mi ne scias!...

– Tamen, popo…

– Ne tamenu!... Vi ja hodiaŭ estis elektita kiel vilaĝestro laŭ lia volo. Li hieraŭ minacis al Joĉjo, ke li mortigos lin, se Joĉjo hodiaŭ ne rezignos la postenon de vilaĝestro... Tial Joĉjo rezignis, kaj vin estrigis Marinko Marinkoviĉo!...

La popo denove fiksrigardis la okulojn de Ivano; fiksirgardis tiel, ke Ivano sentis kiom malgranda li estas laŭ la opinio de la popo.

– Ĝuste pro tio mi diris al vi la kelkajn vorton post la voto. Vi estas serbo. Se vi servos la turkon – vi votrompos. Do, atentu!... Ĉar, kiam la konscienco komencos ronĝi, helpi povos nek Piro, nektuta grego da turkoj!... Nun vi ĉion scias. Al kiu vi volas rakonti – al tiu rakontu! Mi ne miksiĝos en viajn aferojn – krom se vi penos igi iun nigramarĉanon flataĉulo de Piro. Tion mi ne permesos al vi!... Kaj nun... Adiaŭ!

Tiam ambaŭ turnis al li la dorson, kaj foriris.

Ivano malfermis la buŝon kaj rondigis la okulojn...

Kiam ili malaperis, li ekiris hejmen malrapidpaŝe, profunde enpensiĝinta. Timtremo kaptis lin pro la vortoj de la popo...

## 15. DUPATROJ

Miloŝo tre ektimis. Pro la terura ordono de Piro, li eĉ unu momenton ne povis esti kvieta. Li iris kiel freneza. En la profundo de sia animo li sentis ke Jelica estas prava... Li forpelis ŝin el ŝia propra domo. Ŝi, do, rajtis transpaŝi iun ajn sojlon, kie oni ŝin akceptas...

Kiel nun li iru en la domon de Alekso?... Li jam ofendis ŝin, li turnis al ŝi la dorson. Kion diros liaj najbaroj, kion diros Ivano?...

Tamen... li devas iri!... Kun la turko oni ŝerci ne povas. Kion li ordonas – tion oni devas fari, se oni ne deziras havi problemojn.

Li endomiĝis, eniris la ĉambron, kaj komencis rigardi tien kaj ĉi tien, kiel freneza. Post tio li alvokis la fraton kaj edzinon.

Kiam ili alvenis, li timoplene komencis rakonti kio okazis kaj kion li devas fari... Li priskribis al ili la situacion multe pli malbona, ĉar ĝi al li ŝajnis tia. Mladeno kaj Kruna mallevis la kapojn.

– Kion do ni faros? – demandis li.

Ambaŭ restis senvortaj.

– Kiu iros en tiun domon?

– Kompreneble vi, fraĉjo, – diris Mladeno.

– Hi!... Kiamaniere?

Kruna komencis verŝi larmojn... Ŝi, same kiel ĉiu patrino, pensis nur pri sia infano.

– Sed kion vi faros, kiam vi foriros tien? – demandis ŝi.

– Mi venigos ŝin.

– Kion vi faros, se ili ne donos ŝin?

– Mi forkaptos ŝin!

– Kion vi faros, se vi ne povos? Se ili estos pli fortaj?

Miloŝo denove komencis rigardi tien-reen... Abrupte li komencis krii.

– Mi forkaptos ŝin!... Se ŝi tamen ne volos iri, mi mortigos ŝin! Mi ŝin naskiĝigis, mi rajtas...

– Sed kial vi forpelis ŝin el la domo? – demandis plorante Kruna. – Kial vi ĉi tie ne devigis ŝin?

Miloŝo vidis ke li nenion povas respondi. La edzino riproĉis lin pro tio, pro kio li jam riproĉis sin mem.

– Nu... ion oni devas fari!... Kiu aŭdacos renkontiĝi kun la turko?... Frato mia, li havas nek koron nek animon!... Mi ne scias kion fari!

– Eble ni demandu la popon?

– Jes, tio estas bona propono!... Iru, iru tuj, Mladeno!... Diru al la popo, ke mi petis lin alveni.

Mladeno forkuris kiel vento.

Ili du restis solaj. Larmoj fluis sur la vizaĝo de Kruna, malsekigante ŝian gorĝon...

– Kial vi tion faris? Vi scias ke mi neniam riproĉis vin, sed nun mi devas: koro min doloras! – plorĝemis ŝi.

– Mi estis kolera!... Kaj ŝi, obstinulino, samkiel vi scias, foriris!... Sed nun... jen!...

Ambaŭ eksilentis...

Mladeno revenis kun la popo. La popo alrigardis ambaŭ, kaj diris:

– Kion vi volas de mi?

– Popo!... frato!... Vi estas kvazaŭ mia patro, diru: kion mi faru nun?

Kaj li komencis rakonti.

Mansvinginte la popo interrompis lin.

– Mi scias ĉion! – diris li. – Ŝi mem ĉion diris al mi... Mi estis en la domo de Alekso tiun matenon, kiam Stanko ŝin venigis... Do, diru ĉion sincere.

Dirinte ke la turko alvokis lin, Miloŝo rakontis, kion la turko al li ordonis.

– Jes, jes!... La turko volas!... Li deziras edzinigadi niajn filinojn, edzigadi niajn filojn!...Ne nur tion li deziros!... Li ekdeziros ankaŭ niajn kapojn!... Kaj ili falados kiel putrantaj piroj!... Do, kion vi faros?

– Mi ne scias. Mi alvokis vin, por vin demandi!... Konsilu min, mi petas vin kiel dion!...

– Ĉu mi konsilu vin?... Kiamaniere?... Se ŝi estus mia filino, mi dirus al Piro: mi ŝin ne donos al tiu, al kiu vi volas! Tion dirus mi, sed vi...

– Mi petas vin, ho popo!...

– Ne interrompu min... Vi tion ne aŭdacas diri!... Vi pensas ke multe pli facile estas iri en la domon de Alekso, mankapti Jelican, venigi ŝin, kaj doni ŝin al Lazaro. Ĉu ne?

– Mi vere rezonis tiel.

– Jen, mi sciis tion! Do, nun aŭdu kion mi diros al vi! Tion vi ne povos fari.

– Kial?

– Ĉar vi ne povos! Ĉu vi scias ke Stanko estas hajduko?

– Mi scias. Sed mi lin vangofrapos!

– Oho!... Jen bravulo!... Vi ne aŭdacas kontraŭstari la rasleman Piron, sed vi volas vangofrapi la montan reĝon!...

– Mi memoras kiam li estis etulo. Sennombrajn fojoj li kisis mian manon.

– Tio estas vero!... Sed li jam ne estas tiu Stanko. Li estis hajduko, montbesteto, kiu per pafilo vin sengorĝigos, samkiel li faris al Sali-agao! Do, kara mia, bonvolu iri al la domo de Alekso, kaj aranĝu la aferon kun li..

– Kion vi parolas, ho popo!...

– Aŭskultu min! Vi ne pentos!... Iru kaj aranĝu la aferon kun Alekso! Aranĝu la aferon, kaj interpaciĝu kun li!... Subtenu lin, li estas honesta homo!

– Ĉu Alekso?

– Alekso... Ĉiuj kiun la turkoj malamas estas honestaj homoj, ili malamas nin, ĉar ni estas serboj. La turkoj ne amas serbojn!... La ŝtelon organizis la turko, la subestro – kaj tiuflataĉulo Marinko...

– Vi pravas, ho popo! – diris Kruna. – Vi pravas, tio estas vero!... Ankaŭ Jenjo tion diris al mi. Mi vidis en ŝiaj okuloj ke ŝi parolas la veron!... „Patrinjo, diris ŝi, Stanko ne estas ŝtelisto!“

– Li vere ne estas! Mi jam diris ke ni ĉiuj tiam maljuste kondutis al tiu brava junulo kaj al lia familio.

Milošo restis senparola.

– Kial vi silentas?

Milošon oni facile povis hezitigi. Li neniam havis propran opinion pri la vilaĝo kaj vilaĝanoj. Samkiel ni jam scias, li ĉiujn aŭskultis, de ĉiuj akceptadis konsilojn. Ĝuste tial li nun maltrankviliĝis.

– Tamen, popo, – diris li – kiamaniere mi tion faru nun? Mi pekis kontraŭ Alekso... Foje li salutis min, sed mi forturnis la kapon.

– Ĉu tion faris nur vi?... Multaj el ni pekis kontraŭ li! – diris la popo.

– Ho frato!... Vi ja ne scias kiel mi nun fartas...

Tamen la vortoj de la popo influis lin. Li tuj forgesis kion li promesis al la turko.

– Bone, mi iras! Venu ankaŭ vi kun mi, ho popo!

– Sed kial vi ne iru sola?

– Mi opinias ke estos pli bone se vi estu kun mi! Mi ne scias kion diri al li...

Ili ekiris ... Dumvoje Milošo detale rakontis kion la subestro diris al li.

Kiam ili venis al la pordego, la popo ekkriis. Unu el la bofilinoj eliris, malfermis la pordegon, kaj invitis ilin en la domon.

Serene lumis la frunto de Alekso. Li ĵetis la ĉibukon, plektis la harojn, ridetis per kvieta rideto.

Kaj Petra, kaj la samhejmanoj, ĉiuj viglis kaj gajis...Ĉar, jen, denove komenciĝis la iamaj tagoj, la tagoj plenaj de feliĉo kaj interparolado!... Jen, homoj transiras la sojlon, kvakamili pensis ke homa piedo neniam plu transapaŝos ĝin.

– Eniru, eniru! – diras Alekso.

– Dio helpu!

– Dio vin aŭdu!

La gejunuloj kisocele proksimiĝis al la manoj de la gastoj. Kiam ili sidiĝis, kaj kiam oni alportis lignobotelon kun brando, Alekso diris:

– Nu, kiel vi fartas, Miĉjo?... Mi dankas dion ke mi vidas vin!

– Dank al Dio, bone!

– Kiel fartas viaj samhejmanoj?

– Kiuj estas tie – tiuj bone fartas. Tamen, ne ĉiuj miaj samhejmanoj estas tie...

Alekso ridetis.

– Unu mia ŝafido perdis la vojon, kaj venis en vian gregon... – diris Milોŝo – tial mi venis trovi ĝin...

– Ĉi tie ĝi estis! – diris la popo.

– Nu... kie ĝi estas?

– Alekso! – diris la popo. – Diru ke oni venigu Jelican.

Alekso alrigardis la bofilinon Manjan, kiu forsaltetis kiel rapidkrura kapreolo ...

– Diru al mi la veron – diris Alekso al Miloŝo – kion vi intencas fari kun la knabino?

– Irigi ŝin hejmen.

Alekso saltis.

– Tion vi ne faros! – diris li, kaj lia okulo ekfulmis.

– Kiu havas rajton disponi pri mia infano? – diris Miloŝo.

– Vi... Sed nur dum ŝi estis en via domo!... Nun tiun rajton havas nur mi!... Kaj se vi provos trudtreni ŝin – vi restos sen kapo!...

– Mi ja estas patro.

– Ankaŭ mi patras.

– Mi scias, scias... Sed mi estas ŝia familiestro!...

– Kial vi forpelis vian infanon?... – interrompis lin Alekso. – Mi ja estas ŝia protektanto kaj defendanto!... Ŝi sub mia tegmento serĉis kaj trovis Stankon.

– Kion do vi volas?

– Mi ŝin svatas por mia filo.

– Por kiu?

– Por Stanko.

– Sed li estas hajduko!

– Ĉu nur unu hajduko estas edziĝinto?

– Mi scias, tamen...

– Malforgesu, Miĉjo, ĉi tion! La hajdukoj ne estas la plej malbonaj homoj. La homoj, kiuj enmontiĝis, ili estas ŝtalhomoj, ili estas aŭdaculoj, kiuj ne povis toleri maljustecon...

La popo aŭskultis ilian interparolon. Tiam li diris al ili:

– Aŭskultu, Miloŝo! Vi, frato mia, havas svataĝan filinon.Ŝin svatas du svatantoj. Unu svatanton via infano malakceptis, la alia manenmane venigis ŝin en sian domon. Tiamaniere Dio mem determinis ŝian sorton...

– Mi scias, ho popo, sed kiel ŝi restu en lia domo...

Alekso ekkriis:

– Mi ja ne donos ŝin, malforgesu tion!... Ŝi por mi estas ĉio! Dank al ŝi mia domo reviviĝis!... De kiam ŝi sojlon mian transpaŝis, de tiam ankaŭ homoj komencis en mian domon venadi!... Mi ŝin ne donos!

Okuloj liaj fulme fulmis.

– Aŭskultu, Miloŝo, donu la knabinon!...

– Nu... bone! – diris Miloŝo.

– Ĉu vi donas? – ekkriis Alekso.

– Mi donas.

Alekso alkuris kaj ĉirkaŭbrakis lin. La maljunulo ekploris pro ĝojo...

Komenciĝis interkisado... Ĉiuj senescepte eklarmis pro ĝojo.

– Kiu diras ke Dio estas kolerulo? Kiun li forgesis? Tio ne estis vero.Mi vidas lin!... Li benas mian domon!... Vivos la posteuloj de Aleksiĉoj longe, longege!... Longatempe ili vivos!... Ili estos homoj, enviindaj homoj!... Mi kvazaŭ vidus ilin per miaj maljunaj okuloj!...

La profundaĝulo levis la kapon, voĉo lia sonis solene.

Malfermiĝis la malantaŭa pordo de la domo; en la domon enpaŝis Nogiĉo, tenante la manon de Jelica. Li alpaŝis Miloŝon, frapetis lian ŝultron, kaj diris al Jelica:

– Bofratino, jen vi nun havas du patrojn! Kisu la manojn de ambaŭ...

## 16. LA UNUA RENKONTIĜO

En Nigra Marĉo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo oni faris ĉion eblan por kapti la hajdukojn, sed vane!... Penaĉis kaj Lazaro kaj Marinko – senrezulte. Ili plurfoje trovis la hajdukojn, aŭdis ke la hajdukoj troviĝas en iu loko, informis pri tio Piron, persekutigis ilin. Sed kiam ili venis al tiu loko, neniu estis tie...

La tuta vintro pasis dum tia kurado. Ho dio!... Ege ŝanĝiĝis Nigra Marĉo!

Mankas tie fido kaj rido. Se du interparolantajn homojn alpaŝas tria, ili eksilentas...

Ivano estas vilaĝestro, sed homoj lin rigardas pli misvole ol ĝendarmojn de la subestro. Lia Lazaro tute ignoras la domon. Ĉiun tagon senescepte li troviĝas apud la turko, tie li kune kun Marinko kaj Piro malesperas.

Sed kion faras Piro?...

Piro havas inkubsonĝojn. De tiu tago li tiel ektimegis Stankon, ke post ĉiu mencio de ties nomo, li iĝas pala kiel malvivulo... Ĉiun nokton iu devas sidi kun li, por ke li ne timu...

Tamen, gratulindaj estas Nigramarĉanoj!

Malnovaj rilatoj estis konservitaj. La popo kaj Joĉjo venkis. Neniu plu apartiĝis de siaj fratoj. Eĉ Miloŝo Seviĉo iĝis alia...

Tio maldolĉigis la vivon al Piro.

Oni jam festis printempon. Agrable estis sidi vespere antaŭ la apudvoja tranoktejo. La ĉielo stele helis... El apudaj ŝlimejoj kvake elanis ranoj. Piro, nenion pensante, kontemplis tiun muzikon, restante en tiu stato, ĝis kiam oni lin alvokis dormi.

Iun vesperon li sidis interparolante kun Ivano. Ilia interparolo estis terure malserena.

– Nu, kara Ivano, vilaĝestro mia, kion do ni faru? – diris Piro.

Ivano levis la ŝultrojn.

– Mi ja ne scias.

– Ĉu vin vere ĉiuj forlasis?

– Ĉiuj.

– Ĉu pro mi?

Ivano silentis.

– Nu?

– Tio ne estas via kulpo.

– Kredu, ho bona homo, ke mia karaktero estas milda!... Mi ne scias pro kio mi ne mortigis tiun hundon, la popon!... Ĉion ĉi li faris!...Nu, estu tiel!... Li okazos sub mian manon!... Mi senhaŭtigos lin vivan, kiel virkapron!...

– Vi prave parolas! – diris Ivano. – Mi ja asertas ke ĝuste li estas via la plej granda malamikego!... Sed tie estas ankaŭ la alia, Alekso! Je Dio, se vi ne juĝos lin, tion faros mi!... Vi eĉ ne scias kiel li spitas al mi!... Lazaro jam elteni plu ne povas, seď mi lin kvietigis...

– Mi aŭdis ke la hunda ido antaŭnelonge denove estis tie... – diris Piro, kaj iĝis anserhaŭteca.

– Li venas, sed kiel ombro. Venas sed tuj malaperas. Mi embuskis la tutan nokton proksime de la domo, sed vane... Tamen, li venis hejmen, Lazaro vidis lin.

– Mi ne scias kion fari!... . diris Piro.

Ili enpensiĝis... Post longeta silento la turko denove diris:

– Mi devas fari ion. Morgaŭ mi sendos Laĉjon en Ŝabacon, li forportu mian mesaĝon: ili sendu al mi kelkajn janiĉarojn, por ke mi persekutu la hajdukojn!...

– Dio vin benu!

– Eble tiel ni kaptos ĉiujn.

– Sendube.

– Do, venigu Laĉjon.

– Mi venigos, venigos, mi faros tion!

Jam la sekvan tagon Ivano frumatene ekipis Lazaron ... Lazaro ekrajdis verdkoloran ĉevalon, sub la zono li havis pistolojn kaj jataganojn, kaj sur la ŝultro fusilon.

Li alvenis antaŭ la tranoktejon, deĉevaliĝiskaj eniris, ligintela ĉevalon al arbo.

Li estis enpaŝanta, kiam malantaŭ la tranoktejo aperis Kamelo, ekridetis, fingrominacis kaj enboskiĝis...

Elkrepuskiĝis bela tago. Oriento ruĝiĝis kiam Lazaro adiaŭis Piron, kiu eliris por lin elakompani.

– Nu, ek,revenu kun bonaj novaĵoj.

– Mi tion pleje deziras! – diris Lazaro.

– Nu, bonan vojaĝon!

– Dankon!... Dio permesu!...

La ĉevalo komencis saltetadi sub li. Li lasis ĝin, poste komencis ĝin rapidige sproneti.

La mateno estis plezurveka. Freŝajn verdajn foliojn penetradis sunaj radioj; najtingalo vetkantis kun aliaj birdetoj, kiuj per siaj sonoj salutadis la sunon... Aero, milda sed freŝa, ŝveligis lian bruston.

Li enprofundiĝis en siajn pensojn.

Tiel bela tago. Tiel ĉarma estis ĉio ĉirkaŭ li, sed en lia animo regis infero... Li, la malfeliĉulo, malgraŭ ĉio ankoraŭ amis Jelican, amis ŝin per la terura ama ardo, kiu povus cindrigi ĉion kiel flamo...

Ĉio estas tie, sed ŝi tamen ne estas lia. Ŝi ja ne estas lia nur tial, ĉar Stanko ankoraŭ vivas...

Animo lia sopiris trovi Stankon.

„Ho, se mi vidus lin!... – pensis li. – Se mi vidus lin, li ne vidus la sekvan tagon!... Mi mortigus lin tujtuje!... Tiufoje mi mistrafis, sed nun mi ne mistrafus!“

Pensoj liaj forflugis malproksimen, malproksimen al la nuboj kiuj arbustas sur la blua ĉielo, kiel malgrandaj ŝafidoj sur verda kampo...

Liaj pensoj disflugis!... Li pensis pri si, pri mortigo de Stanko, pri Jelica, pri Piro... pri ĉio... Poste lia penso malaperis en senfinejo...Li provis sekvi ĝin, sed malfruis...

Tiam lin ekregis stranga malbonhumoro. Li sentis indiferenton al ĉio... Nenio lin interesis... Lin bruligis sunradio, sed al li tio estis negrava...

Lazaro eksentis demoraliziĝon. La vojo al li ekŝajnis tre longa. Li sentis, ke lin la lumbo doloras pro longa sidado sur selo... Li haltis por ke la ĉevalo ripozu, kaj por aktivigi siajn krurojn...

Li ekiris piede. Abrupte leporo transiris lian vojo...

Li ektremis. En lia kapo aperis penso, kiun li laŭte vortigis:

– Malbonaĵo.

Subite li eksentis malvarmon pro la densa arbetejo... Post tio lin kaptis timo.

„Tiu hundo povas embuski kie ajn!“ – ekpensis li.

Io glacia trapenetris lian tutan korpon... „Facile estas al li!... Li troviĝas malantaŭ arbusto. Li povas pafceli – kaj estos la fino al mia latino... Sufiĉas ke li premu la ĉanon!...“

Li komencis tremi. Preskaŭ ĉiu arbostumpo timigis lin.

Tiam li komencis peli la ĉevalon por rajdi pli rapide...

Subite mano aperis malantaŭ kverko; tio okazis ĝuste en la momento, kiam li estis tuj apud la kverko. Tiu mano kaptis la bridon de la ĉevalo.

– Halt! – eksonis voĉo.

Malantaŭ arbusto vidiĝis homo.

Fajreroj aperis antaŭ la okuloj de Lazaro. Tio estis Stanko.

– Suben!

– Suben!... – ektondris Stanko denove.

Ne konsciante kion faras, Lazaro etendis la manon al la zono, eltiris pistolon kaj ekpafis...

Stanko ŝanceliĝis kaj lasis la bridon.

La ĉevalo ekkuris, ne al Ŝabaco, sed malantaŭen. Lazaro ĝin ne haltigis. Fakte, li eĉ ne povis haltigi ĝin, ĉar li senkonsciiĝis. Li sciis nenion, nek pri si, nek pri tio kion li faris.

Kiam la ĉevalo alportis lin antaŭ la tranoktejon, kiam oni lin deseligis, kaj trinkigis al li brandon, li diris:

– Al mi ŝajnas ke nun mi ne misis. Nun li estas mortigita.

– Kiu? – demandis Piro.

– Stanko.

– Ĉu vi mortigis lin?!

– Mi.

– Kie?

– Tuj apud Belotiĉo...

Tiun vesperon li malsaniĝis, kaj ne ellitiĝis ses semajnojn.

## 17. UMADO

Ankaŭ Ivano ne plu povis elteni. Tiun vesperon li decidis persekuti Alekson. Li ordonis ke oni alkonduku lin en la juĝejon.

– Nu, diru!

– Kion? – demandis lin Alekso, rigardante kvazaŭ kompatus lin.

– Tiuj ŝtelistoj ankaŭ nuntempe venas en vian domon.

– Kiuj ŝtelistoj? – demandis Alekso, fiksrigardante lin, ne donante al li ebleconmalstreĉiĝi.

– Via filo.

– Mia filo ne estas ŝtelisto. Ĉiuj nigramarĉanoj scias ke via filo la monon ŝtelis kaj enfosis tie.

– Hajdukaĉo!

– Pli bone esti hajduko ol turka flataĉulo!

– Kiu estas flataĉulo?

– Vi!... Mi ja ripetas, for de mi! – dirinte tion Alekso eliris el la juĝejo, ne atentante kriadon de Ivano.

Tio estis la unua atako de Ivano kontraŭ Alekso. Poste tio ripetiĝadis preskaŭ ĉiun tagon...

Tamen, Alekso tute ne timis Ivanon. Antaŭ Ivano li estis kuraĝa, kiel se parolus kun la alvokisto Simo.

Ivanon tio incitis. Tio incitis lin des pli, ĉar Lazaro ne mortpafis Stankon. Al li jam ŝajnis ke ĉio estus tute alia, se Stanko ne estus viva...

Krom tio, li timis. Tage, nokte, ĉiutempe li konjektis ke okazos malfeliĉo, malfeliĉo por li kaj por lia domo...

„Li ja estas hajduko – pensis Ivano. – Li povas ataki kie li volas kaj kiam li volas. Li havas nek dion nek animon. Oni povas provi kion ajn, sed lin oni kapti ne povas..." Kaj portempe li ĉesis okupiĝi pri Alekso.

Piro demandis lin:

– Diru, ĉu ni rigardos kiel tiu Alekso nuptofestas? Kion vi faras?

– Eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata!

– Kiam?

– Baldaŭ!

Li prokrastadis sian reagon de tago al tago, hezitante. Sed okazis io, kio tute ŝanĝis la situacion.

Tio estiĝis antaŭ la tago de Triunuo. Alekso estis revenanta hejmen post laboro, kaj proksimiĝinte al sia korto, li ekvidis Lazaron umanta ĉirkaŭ la domo.

La frunto de Alekso sulkiĝis tuj kiam li vidis Lazaron, sed li malrapidigis la paŝojn, kaj proksimiĝis por vidi kion serĉas tiu knabo.

La pordo estis nefermita. Ĉe la fajrejo laboris Jelica, al kiu Lazaro gapis tiel, ke li eĉ ne aŭdis la paŝojn de Alekso.

Alekso rigardis lin per rigardo stranga, samtempe frakasa kaj karesa.

– Kion vi faras tie?

Lazaro aŭdis nur tondrojn en la oreloj.

– Hola, homo!

Lazaro ne respondis.

– Vi volas vidi kiu troviĝas en la domo de Aleksiĉo, ĉu?... Kial do vi silentas?... Kial vi nenion diras? Diru do!...

Lazaro estis ion dironta, sed la vorto svenis sur liaj lipoj.

– Se vi ĝuste pro tio venis, iru ĉi tien! Preninte la manon de Lazaro, Alekso irigis lin en la korton. Lazaro iris kiel infano. Kiam ili alpaŝis la sojlon, li haltis.

– Eniru, eniru! Ĉi tio estas la domo de oĉjo Alekso. Ĉu vi malmulte da fojoj ĉi tie ludis?... Eniru, eniru! Jen, ĉi tie estas ankaŭ la onjo Petra, via „oklinjo“. Ĉu vi forgesis kiel vi nomis ŝin?...

Lazaro kvazaŭ ŝtoniĝus. Ĉi tiuj mildaj vortoj, la stranga rigardo! Ĉu eblas ke tio estas la patro de Stanko? Tamen, ĉio memorigis lin pri la bela kunvivo de tiuj du domoj. Tio kvazaŭ estus hieraŭ... Hieraŭ tiu domo estis samkiel la lia...

– Eniru, eniru! – parolis la maljunulo. Li nekonscie ekkaptis la ĉapon kaj kisocele proksimiĝis al la mano, sed Alekso ekflagris kaj elŝiris la manon.

– For, al vi mi ne permesos kisi ĉi tiun manon!... For! Foriru!... Ne, iru ĉi tien...

Rapidmove preninte la manon de Lazaro, li provis entiri lin en la domon. Lazaro komencis kontraŭstari kaj barakti.

– Lasu min? Mi ne volas!...

– Vi volos!...

Ĝuste kiam Alekso altiris lin ĝis la sojlon, el ĉambro eliris Stanko.

Lazaro senmoviĝis... Li preskaŭ blindiĝis, mispaŝis kaj apogis sin al pordofosto. Stanko direktis pistolon al li, sed Alekso kaptis lian manon.

– Ĉu sur sia sojlo?! – demandis li akratone. Stanko mallevis la pistolon, ĉar la rigardo de la patro estis stranga.

– Li ja pafis al mi!

– Poste vi pagigos la ŝuldon, sed ne nun, ĉar mi alvokis lin ĉi tien... Mia vorto ankaŭ por vi devas esti sanktaĵo!...

Lazaro apenaŭ rekonsciiĝis. Nun li komprenis ke li troviĝas en aspidejo... Sed li kvazaŭ ŝtoniĝus, eĉ unu movon li ne povis fari...

Stanko rigardis lin per harstariga rigardo. Onidire ekzistas aspidoj kiuj per sia rigardo senmovigas la homon.Tia estis la rigardo de Stanko.

Lazaro kvazaŭ revidus ĉion, eĉ la teruran nokton, kiam li fuĝis pafinte al Stanko. Li tremis kiel aŭtuna folio.

Stanko alpaŝis al li.

– Iru! – diris li. – Iru, ni ankoraŭ renkontiĝos!... Ĉar mia paĉjo alvokis vin, hodiaŭ mi nenion faros kontrau vi.

Lazaro forturniĝis kaj foriris el la korto.

Li eĉ ne vidis kie li iras. La okuloj trepidis en lia kapo, dum la povra cerbo doloris, kvazaŭ iu ĝin umus. Li eĉ ne sciis kiamaniere li venis al sia domo. Li ekvidis nur la konsternitan vizaĝon de la patro.

– Kio okazis? – demandis lin Ivano. – Kial vi tiel aspektas?

Lazaro kapsignis kaj renversiĝis sur la sojlon.

Kiam li rekonsciiĝis, estis nokto. Antaŭ liaj okuloj kvazaŭ ĉio estus okazanta ĝuste nun.Li fermadis la okulojn por ne plu vidi la rigardon de Stanko, sed tiam Stanko ŝajnis al li ankoraŭ pli terura.

– Paĉjo!... Savu min!

– Kio okazis? Kio okazis al vi?

– Li...

– Kiu?

– Stanko...

– Kie?...

Lazaro montris per la mano la domon de Alekso.

– Nun mi kaptos lin! – diris Ivano per terura voĉo. – Nun li ne fuĝos.

Li ekiris. Tamen, Lazaro, saltinte el la kuŝejo, kaptis lin je la ŝultroj.

– Ne iru!... – N.. ne iru!... Li mortigos vin!

– Ĉu min? Ne!

– Ne iru!... Li' preskaŭ mortigis min!!... Se tie ne estus oĉjo Alekso, vi ne havus filon!...

Terura penso ekregis Ivanon. Vere, kion li farus, se oni mortigus lian Lazaron?...

– Ho... ĉi-vespere tio estos finita!

Tamen, Lazaro kaptegis lin plenforte. Liaj manoj eniĝis en la maljunajn, sed ankoraŭ fortajn muskolojn de la patro.

– Vi ne iros!... Mi petas vin, ne iru!... Morgaŭ, postmorgaŭ... Iru kiam vi volas, sed ne hodiaŭ!...

Li ĉirkaŭbrakis la kolon de la patro... Ivano rezignis sian intencon, nur por kvietigi lin.

– Bone! – diris li. – Sed morgaŭ mi kvitiĝos kun la maljunulaĉo!... Ek, kuŝiĝu...

Lazaro surlitiĝis, sed ne volis forlasi la manojn de la patro.

Tagiĝis. Ivano jam frumatene ekiris al Piro. Tie li trovis Marinkon, rakontantan ion al li. Ivano ĝentile salutis ilin.

– Dio vin favoru! – diris la subestro. – Aŭskultu kion Maĉjo rakontas. Sidiĝu.

– Mi sidiĝos! – voĉis Ivano. – Kion li rakontas?... Piro alrigardis lin riproĉe.

– Hej, kara Ivano!... Mi opiniis ke vi taŭgos,tial mi vin estrigis. Sed kio nun okazas?... Nun en Nigra Marĉo ekloĝis hajdukoj, ili tie sinjoras... Ĉu vi scias, kara mia, ke Stanko ankaŭ ĉi-nokte estis hejme?

– Mi scias!– diris Ivano.

– Vi scias!

– Mi scias. Lazaro diris al mi!

Tiam li rakontis ĉion, kio okazis al Lazaro.

– Kion vi nun intencas?

– Mi venis por demandi vin.

La turko enpensiĝis. Li saĝumis. saĝumadis, sed ĉio kion li pripensis al li mem ŝajnis infaneca Li estis certa nur pri tio, ke la hajdukon ili ne povos kapti.Ĉar nigramarĉanoj, jam multaj el ili, kredas la hajdukojn homoj kiuj kunportas feliĉon... Finfine li turniĝis al Marinko:

– Kion vi opinias, Maĉjo?

– Mi opinias ke ni devas premi la kadukulon!...Ni devas lin dirigi kie estas la hajduka tratagejo!

– Kion poste?

– Poste ni devas sendi informon al la urbo, ke ili pretigu soldataron, por ke ni mortbatu la hajdukojn.

– Tamen, ĉu li diros?

– Sufiĉas ke vi lin metu en la forgeskelon sub la tranoktejo, poste lasu lin al mi...

La turko enpensiĝis. Al li ekŝajnis saĝa la konsilo de Marinko.

– Bone! – diris li. – Mi venigos lin.

– Venigu lin, venigu! – diris Ivano. – Li rakontos eĉ kiam li mordis la mampinton de sia patrino!... Mi garantias tion al vi!

Li frapis la manplatojn, post kio ĝendarmo aperis ĉe la pordo.

– Iru, Meĉjo, alvoku Alekson Aleksiĉon.

Kiam Meĉjo foriris, li turniĝis al Ivano kaj Marinko.

– Ĉu vi estas certaj?

– Mi estas certa! – diris Marinko, dum satana rideto ekdancis sur liaj lipoj.

– Nu, jen!... Mi volis homece, sed tio ne eblis. Nun mi transdonas lin al vi du. Kion vi diros, kion vi faros – tio estos dirita kaj farita. Mi nur flanke staros kaj rigardos...

– Bone, bone! – diris ambaŭ.

Marinko tiam aldiris:

– Vi vidos ĉu mi ankoraŭ indas!

Ili ne longe atendis. Meĉjo revenis kaj venigis Alekson. Alekso eniras la ejon, iom pala, sed kvieta kaj decidoplena.

– Vortu, aĉulo, – diris la turko. – Vi malkaŝe antaŭ la okuloj de ĉiuj homoj helpas la hajdukojn!

Rigardante rekte en liajn okulojn, Alekso diris:

– Mi ne helpas.

– Kial vi mensogas – ekparolis Ivano ektremante – via filo regule ĉiunokte venas en vian domon!

– Mia filo venas en sian domon.

– Ho... viaj samdomanoj estas ŝtelistoj, ĉu ne?

– Miaj samdomanoj estas miaj filoj, ili ne estas ŝtelistoj! – dirinte tion Alekso alrigardis Ivanon per tia rigardo, ke la hararo de Ivano hirtiĝis.

Marinko ekridis.

– Kia patro! – diris li. – Nu... se oni ne plu scias kio estas honto – tio al oni jam estas negrava!...

– Vi estas ekzempla senhontulo– diris Alekso tujtuje.

La turko aŭskultis tiun interparolon, mirante pri la kuraĝo de Alekso.

– Kial mi estas senhontulo? – demandis Marinko, tro proksimiĝante al lia vizaĝo.

– Se vi estus hontipova, vi nun nomiĝus Mujo aŭ Alijo, ne malpurigante la serban nomon.

Marinko turniĝis al la subestro:

– Jen, sinjoro!... Ĉu vi aŭdis kion parolas tiu senhontulo?...

– Ne enmiksu lin! – diris Alekso. – Mi ĉi tion parolas al vi. Li estas turko, tamen li estas pli homeca ol vi!...

Piro ekpensis:

– Li bone defendas sin... Bedaŭrinde!

– Nu... vi flatas!... – diris Ivano malice.

– Al kiu? Jen Piro, li diru kiam kaj kiu ĝis nun flatis al li?... Pri tio okupiĝas vi kaj Marinko!... Mi de la turko nenion petas!

– Ĉu eĉ ne indulgon? – dirinte tion, Piro leviĝis.

– Indulgas nur dio!... Vi ne povas eĉ unu mian blankan haron nigrigi, vi ja nenimaniere povas min helpi. Vi helpu al tiuj du homoj!...

Piron kolerigis ĉi tiu akra respondo.

– Ĉu vi ne scias, ulo, kion mi povas? – ekkrietis li.

– Se Dio tion volas – vi povas nenion!...

– Meĉjo! Asao!... Ibro!...

La ĝendarmoj aperis sur la sojlo.

– Fortrenu ĉi tiun kadukan hundidon en la kelon. Alekso estis kvieta kiam ili alpaŝis, li nur diris:

– Ne trenu min. Mi iros mem.

Li ĵetis akran rigardon al ĉiuj... Tiu rigardo estis multsignifa. Ĝi parolis pli ol alcelita pafilo. Li eliris el la ejo kviete, kvazaŭ el sia ĉambro.

## 18. MARTIRO

Ili malfermis malsekan keleton. Elinterne ilin frapis fiodoro de mucido kaj malseko. Alekson oni puŝis, kaj li faletis sur ŝtuparo... Li faris du-tri paŝojn, sed liaj piedoj, anstataŭ tuŝi malmolan plankon, eniĝis en koton...La pordo fermiĝis malantaŭ li, post kio li restis en densa tenebro...

Li revenis sur la ŝtuparon, krucsignis kaj levis la okuloj supren:

– Ho Sinjoro! – diris li. – Estu mia amiko. Donu al mi forton, donu al mi saĝon ke mi traelportu ĉion ĝis la morto!...

Tiam li sidiĝis kaj kovris la kapon per la manoj.

Nigraj pensoj venkis lin. Lin oni subite venigis el lia domo, tial li nenion sukcesis ordoni; li ne diris al ili kion fari se Stanko venos hejmen...

– Nun ili embuskos kaj kaptos lin... Jes, jes... Tion ili faros... Kiam ili lin kaptos, tio estos fino. Ili transdonos lin al torturistoj... Senanimaj estas la turkoj... Teruraj estos la torturoj...

Antaŭ liaj okuloj aperis horora, terura bildo: Stankon oni senokuligas, en la okulkavojn oni verŝas oleon, enmetas meĉojn, kaj bruligas ilin por havi lumon dum vespermanĝo...

Ĉio en li malvarmiĝis. Li sentis ke eĉ ostocerbo lia glaciiĝas... Li saltis, ektremis, kaj komencis paŝi... Lia kapo batis trabon, ŝultro batis muron, la piedoj denove komencis droni en koton...

Li rekonsciiĝis...

– Kien ili min enfermis? – demandis li sin laŭte...

Tiam li komencis palpi ĉirkaŭ si. Tio estis malvasta keleto, en kiu oni povis nek rektiĝi nek turniĝi... Desur malsekaj muroj gutis akvo... Videblis neniu lumradieto. Kverkaĵo, fermanta tiun ejaĉon estis simpla, sed ekstere ĝi estis fermita per riglilo...

Terure!... Li denove sidiĝis sur la ŝtuparon...

Li sentis froston kaj soifon. Gorĝo lia sekiĝis, sed li eĉ akvon ne ricevis. Li komencis frapadi la pordon.

– Kion vi volas? – demandis voĉo deekstere.

– Donu al mi akvon!

Respondon li ne ricevis... Li opiniis ke la gardisto foriris informi la subestron pri tio... Tamen nenio okazis... Pasis multe da tempo, multege... eternego...neniu venis por diri al li eĉ unu vorton, des malpli por doni akvon...

Oni ĉiam deziregas tion, kion oni ne havas! Tamen, li kunpremis la koron.

– Vi ne sukcesos, ho turko!... Vi eĉ ne unu vorteton eltrudos!... Mi malsekigos la gorĝon per mia propra salivo, sed mi eĉ ne unu vorton diros al vi!...

Li sidiĝis, armita per nova forto...

Tamen, tempo estis pasanta. Al li ŝajnis, ke pasis multaj tagoj kaj noktoj, sed lia pordo ne malfermiĝis...

Li sentis malsaton kaj soifon. Lia gorĝo sekiĝis... Tamen, li ankoraŭ estis konscia, ankoraŭ potenca kaj furioza... Li ne volis krii kaj peti indulgon... Foje al li ekŝajnis ke li aŭdis la riglilon malfermiĝanta... Li rekonsciiĝis, eksaltis... Se oni permesus al li enspiri nur iomete da freŝa aero, ekspiri libere, li ja denove estus forta, li denove fortiĝus...

Sed tio estis iluzio.

Poste al li ekŝajnis ke aŭdiĝas gratado en la muro antaŭ li. Io gratas kiel muso. Li transiris la ŝlimon kaj komencis fiksaŭskulti. Jes, io gratas!... Sed gratas atente, malrapide...

Li aŭskultis tiun voĉon, tiun gratadon, kvazaŭ Dio sendus interparolon al lia soleca animo... Ĉiam, kiam li tion aŭskultis, li sentis nek malsaton nek soifon...

Pasis longa tempo ĝis kiam la pordo malfermiĝis. Alimpetis freŝa aero, alblovante sian sanon. La kompatinda Alekso sentis ke li perdas konscion. Okulojn liajn blindigis brile blanka tago... Li svenis.

– Ho Alekso!... Ho Alekso! – alkriis nekonato. Li malfermis la okuloj, kaj vidis super si ridetantan Marinkon.

– Ho Alekso, frato! La subestro tute forgesis vin. Kiam mi alvenis hodiaŭ, kiam mi demandis, ili diris al mi ke ili tute forgesis pri vi!... Ĉu vi estas malsata?...

– Jes!... – elflustris la povrulo.

– Nun mi alportos al vi iom da manĝaĵo...

– Ankaŭ akvon... akvon... – flustris Alekso.

– Bone, bone...

La pordo fermiĝis. Alekso atendis. Ĉiu tempero al li ŝajnis eterno...

La pordo denove malfermiĝis. Sur la sojlo aperis Marinko, portante poton, lignan kuleron kaj pecon da pano.

– Jen via tagmanĝo! – diris li. – Mi kuiris por vi iom da fazeolo kun fiŝo. Mi scias ke vi tion ŝatas.

Li metis la manĝaĵon antaŭ Alekson.

Alekso avide kaptis la poton. Fiŝa bonodoro ektiklis lian nazon.

Marinko lasis lin kviete manĝi, nur la satana rideto viglis ĉirkaŭ liaj lipoj.

– Ĉu bona? – demandis li.

– Bona!... Tamen, tre sala.

– Seka fiŝo... nu, negrave...

Alekso manĝis.

– Diru, Alekso!

– Kion?

– Diru al mi, mi petas vin, pri via Stanko. Ĉu mi iam ajn iun pereigis?...

Alekso silentis.

– Mi amas lin, kvazaŭ mi dorlotus lin sur mia brusto. Li estas bona infano!... Oni povas diri kion oni volas, sed pli bona knabo ol li en Nigra Marĉo ne ekzistas... Verdire, li iom pekis... kion fari?... Ankaŭ sanktuloj pekas...

La okuloj de Alekso ekfulmis.

– Stanko ne pekis! – diris li akratone.

– Li pekis– diris Marinko.

– Vi mensogas!... Kurbe sidu, sed veron fidu!...

Marinko distiris la lipojn. Io ekfulmis en lia kapo.

– Ĉu vi volas, ke mi diru al vi la veran veron? Via Stanko ne kulpas. Li ŝtelis samkiel vi ŝtelis! – dirinte tion, li serioze alrigardis Alekson.

– Vi ja diris...

– Mi jesdiris, sed li ne kulpas!... Mi ja devis diri!

– Devis, ĉu?...Sed kiu devigis vin?...

– Ekzistas homo kiu povas devigi.

– Ĉu la turko?

– Li...

– Sed kial?

– Mi ne scias... Ankaŭ nun mi ne scias...

– Donu al mi iom da akvo! – diris Alekso.

– Mi donos, sed vi devas ion diri al mi.

– Kion?

– Kie estas Stanko kaj lia kunularo?

Alekso faligis la kuleron en la poton, kaj alrigardis Marinkon per harstariga rigardo. Marinko rigardis retke al liaj pupiloj.

– Diru... diru!

– Tion vi neniam ekscios!

– Mi ekscios!

– Mi ripetas, vi ne ekscios!

– Ha-ha-ha!... – ekridis Marinko. – Nu, bone!... Se mi ne eskcios, mi ne eksciu!... Redonu la poton!

Forpreninte la poton el la manoj de Alekso, li ekiris.

– Ĉu vi donos al mi akvon?

– Mi donos, kiam vi diros kie estas Stanko! – diris Marinko, kaj fermis la pordon.

La gorĝo de Alekso brulis pro la sala fiŝo kaj fazeolo. Kvazaŭ iu enverŝus braĝon.

Abrupte lin ekregis forta fajro, ĝiplenigis lian kapon, vejnoj liaj sur ĝi ekŝvelis, sango komencis torenti abrupte, furioze.

Li sentis soifon, teruran soifon... Menso lia komencis nebuliĝi, li renversiĝis desur laŝtuparo en la ŝlimon...

– Akvon!... Akvon! – blekis li.

– Ĉu vi diros? – demandis Marinko deekstere.

– Mi ne diros!

Abrupte ekregis silento...

Alekso eksaltis furie kaj komencis krii:

– Turmentu min!... Mortigu min!... Tranĉu pecon post peco de mia karno – mi ne diros!... Fiuloj!... Fiuloj!...

Li komencis treti kaj stamfi la koton... Per la mano li frapis la malsekan muron... Sentinte ke la mano estas malseka, li proksimigis ĝin al siaj sekaj lipoj kaj malsekigis ilin.

Post tio li komencis kolekti humidaĵon desur la muro... Guton post guto li prenadis per la mano, kaj desur la manoj prenadis ilin per la lipoj.

Sed tio ankoraŭ pli incitis lian soifon... Li kvazaŭ sentus en si grandegan fajrejon kiun li devas estingi...Li komencis tiri sian hararon, ŝiri la vestojn sur si... Post tio li kuŝiĝis en koton kaj komencis ruliĝi...

Li sentis ke la koto malvarmigas lian ardan korpon... Tiam li eksentis ke io malvarma lantas sur lia haŭto... Al li ankaŭ ekŝajnis ke la tegmento super li disfalas kaj rompiĝas...

Tiam li ekvidas ĉielon nubkovritan, malluman... Li kvazaŭvidus impetan pluvon, aspergantan lian vizaĝon... Gutoj fluis en lian gorĝon... Tiuj gutoj malsoifigis lin, malvarmigis lin, sufiĉe, sed li jam ne povis ekmoviĝi... Dume la gutoj estis enverŝiĝantaj, komence malrapide, gutpostgute, kaj poste torente... Li jam sentis ke la akvo sufokas lin. Li volis liberiĝi, sed ne povis... Li penis barakti, sed eĉ ne unu lia muskolo ekmoviĝis...

Li senkonsciiĝis...

# 19. KOMENCIĜAS VENĜO

En la momento kiam Alekso esti sĵetita en la forgeskelon, kiam Piro kun Ivano kaj Marinko revenis en sian ejon, el arbareto ĉe la tranoktejo eliĝis la kapo de Kamelo...

Li manminacis, kaj post tio ŝtelire enarbariĝis.

Li koleris cerbere.

„Jen, ili volas pereigi homon tute kaj absolute senkulpan!... Seď ili ne povos... Dio estas nia malnova amiko!...“

Haste li direktiĝis al la vilaĝo. Li iris al la domo de la popo.

„Unue mi sciigos la popon, poste mi trovos Stankon...“

Survoje li renkontis la popon.

– Kien vi iras?

– Al vi.

– Kio okazis? – diris la popo konsternite, vidante kiel Kamelo mienas.

– Malbonaĵo... Ili ĵetis Alekson en karceron, en la forgeskelon sub la tranoktejo...

– Kiam?

– Ĵus!... Mi iras de tie. Terurajn turmentojn ili pretigas por li... Mi aŭdis kion ili parolis... Marinko turmentos lin...

– Kion ni faru?

– Mi informas vin, por ke vi sciu, vi interkonsentu kun la homoj kion ni devas fari... Ĉar, kio hodiaŭ okazis al li, morgaŭ okazos al vi... al Joĉjo... al aliaj homoj... Nun mi iras al Stanko.

– Kie li nun estas?

– Ili ĉiuj estas en Podino... Tie estas ankaŭ la hajdukestro. Ili alvenis antaŭ kelkaj tagoj. Mi iras diri, ke ni ne povas plu toleri...Kiam mi tion diros al ili, mi iros al Katiĉo, Stojano, ĉefpopo Nikolao... Mi al ĉiuj diros, ke ilia interflustrado estas vana – se ili ion intencas, ili tion komencu tuj!...Adiaŭ, popo!

Li forturniĝis, kaj direktiĝis al Podino...

Li iris salte. Ŝvito fluis sur lia vizaĝo... Elfore li aŭdis la obtuzan lirlon de Drino, al kiu li estis proksimiĝanta. Subite li haltis kaj ekgrakis.

El arbetejo oni respondis. Li faris nur kelkajn paŝojn kiam antaŭ li aperis homo.

– Ĉu tio estas vi, Kamelo?

– Mi, Jovano. Ĉu la estro estas ĉi tie?

– Jes, estas...

Kamelo direktiĝis al li.

La hajdukestro kun la kunularo sidis sur verda herbo, Kamelo vidis ke lia grakado interrompis belan ŝercon de Zaverzano. Vidinte lin, ĉiuj leviĝis.

– Dio helpu vin! – diris Kamelo.

– Vin helpu dio! – ektondris de ĉiuj flankoj.

– Kio okazis? – demandis la hajdukestro, vidinte lian malgajan vizaĝon.

– Malbonaĵo.

– Kia malbonaĵo?! – ekscitiĝis ĉiuj.

– Malbonaĵo, Stanko! Vian patron oni ĵus ĵetis en forgeskelon.

Tio estis dirita neatendite.Stanko proksimiĝis al li, sed mispaŝis, ĉar antaŭ li kvazaŭ noktiĝus... Li estis ion dironta, sed lia lango kvazaŭ rigidiĝus...

– Kion? Kial! – ektumultis ĉiuj.Kamelo rakontis ĉion, de la komenco ĝis la fino.

– Kia estas tiu forgeskelo? – demandis la hajdukestro.

– Mi unu fojon ĝin ŝtelvidis! – diris Kamelo. – Ĝi estas tia afliktejo, ke eĉ aspidoj fuĝas de tie...

– Estro! – diris Surepo – ni savu la homon!

– Jes, jes, ni savu lin! – aŭdiĝis krioj de ĉiuj flankoj. – Ni iru ĉiuj!...

– Ne ĉiuj!... Ili ne indas ke mi sendu kontraŭ ili mian tutan taĉmenton!... Diru, Kamelo, kiom da ĝendarmojn havas la turko?

– Dek.

– Dek kaj du dekdu... dekkvar... bone! – kalkulis la hajdukestro. – Tiukaze iru Surepo... Ilijo... Stanko... Leĉjo... Jovano kaj Joĉjo... Tio estos sufiĉe...

– Sufiĉe! – eĥis Stanko. – Mi mem sufiĉas por tio! Mi buĉos ilin kiel ŝafidojn!...

– Ne rapidu, Stanko, ne rapidu! – diris la hajdukestro. – Vi forgesis kiaj friponoj ili estas!... Se tio estus bravuloj, mi sendus vin kaj ankoraŭ duopon, sed ili estas friponoj... Surepo! Venu ĉi tien...

Kiam Surepo alpaŝis, la hajdukestro komencis malrapide ordonadi kion li devas fari:

– Unue iru al la popo, kaj kun li akordigu ĉion...

Kamelo kaj Zaverzano ĉion atente pririgardu, ĉar ne devas resti iu ajn kiu poste rakontos kio okazis... Neniu el ili povu diri kiu estis tie!... Vi povas ilin

mortbati, aŭ povas venigi ilin al mi– por mi estas tutegale!... Kion vi faros – tio estos farita...

– Bone, estro!

– Zorgu pri Stanko! – Li estas impeta!... Ne permesu ke li eraru!...

– Bone.

– Pretigu vin! – ekkriis la hajdukestro. Tujtuje ĉiuj estis pretaj.

– Kamelo!

– Bonvolu, Srečko.

– Transdonu saluton al la popo... kaj... atentu...

– Ne zorgu... Adiaŭ!

– Adiaŭ! – diris la hajdukestro. – Ni renkontiĝos ĉi tie.

Ili surŝultrigis longajn pafilojn, kaj ekiris. Zaverzano umis...

– Stanko! – diris li. – Mi estas kontentega, ĉar la estro ankaŭ min elektis!... Vi ne scias kiel mi ĝojas, ĉar mi finfinepropraokule vidos tiun vian Piron!...

Stanko silentis. Cent demonoj furiozis en li. Al li ŝajnis, ke ili ne paŝas, sed lantas, tial li iris antaŭ ĉiuj aliaj.

– Stanko! – alkriis Surepo.

– Diru!

– Ne rapidu.

– Nu!... Facile estas al vi!... Vi povas, se vi deziras, eĉ dormeti, sed mi ne povas! Se Dio donus al mi flugilojn, mi forflugus tien!...Ĉar tie estis mia patro, li tie kuŝas senkrima kaj puranima!... Eble tiuj senanimuloj turmentas lin per ĉiaspecaj turmentoj! Mi devas rapidi!...

– Ne parolu tiel!...

– Ne profundigu miajn suferojn. En mi la sango bolas furiozige... Mi nenion vidas pro pensostreĉo... Se vi volas, rapidu; se vi ne volas, mi rapidos sola!...

– Ni ja ekiris kune! Ne zorgu!... Vian patron ni liberigos! – diris Surepo.

Kiam ili alvenis al Staraĉo, Surepo ordonis ke ili haltu. Tiam li irigis Kamelon flanken, kaj ili komencis interparoli. Post tio Kamelo foriris.

– Diru, Surepo, kion ni atendas ĉi tie? – demandis Zaverzano.

– Tion, kion ni bezonas – respondis Surepo.

– Bone. Sed ni bezonas multon.

Surepo nur levis la ŝultrojn. Al Stanko ŝajnis ke diablo lin vivan senhaŭtigas. Li ne povis kompreni tiun atendadon. Furioza kiel rabia hundo, li nur kolere rigardis ĉiujn, kiuj eĉ ne unu vorteton diris al li.

Nokto kovris la teron. Tio estis nokto sensona, somera, nokto sen lunlumo.El arbetejo aŭdiĝis birda kanteto; venteto flustris inter folioj kiel malgranda ŝtelisto...

Ĉirkaŭ Stanko la tero kvazaŭ turniĝus. Li jam ne povis plu elteni. Li ekkrietis kaj ĵetis al Surepo kolerajn vortojn:

– Vi sidiĝu... vi povas, sed mi iras!

– Vi ne iros!...

– Kiu malpermesos tion?

– Via ĵurpromeso... Vi ĵurisje pano kaj salo ke vi obeos la ordonojn de superulo.

– Tamen...

– La estro sciis kion li ordonas.Vi povas nur fuŝi nian taskon!... Kiam homo ion faras, li devas tion fari saĝe... Poste estos vane penti... Sidiĝu!

Stanko sidiĝis.

Post certa tempo alvenis Kamelo. Surepo ekiris renkonte al li.

– Diru!

– Estas bone. Ili estas tie, ĉe la subestro.

– Ĉu ĉiuj?

– Krom Lazaro.

– Kion faras la popo?

– Li esperas. Li pretigis ĉion pretigindan. Turniĝinte al la kunularo, Surepo preskaŭ flustre diris:

– Ek!

Al Stanko ŝajnis kvazaŭ oni demetus ŝarĝon desur lia animo... La hajdukoj jam estis pretaj.

Do, atentu!... Ĉiuj atentu!... Ilijo! Vi aliros el densejo kun Kamelo kaj Joĉjo; Stanko, Leĉjo kaj Joĉjo iros kun mi. Sed malrapide... Alveninte antaŭ la tranoktejon, haltu. Neniu faru ion ajn, antaŭ ol mi ordonos.

Ili ekiris ...

En la ejo de Piro brulis meĉo. Piro estis tre ekscitita. Denove li havis la strangajn sonĝojn... Ĝuste pro tio li invitis Ivanon kaj Marinkon sidi kun li.

Ĉiuj estis kvazaŭ en duondormo. La ĝendarmoj dormis en la apudvoja tranoktejo, ĉe fajrejo.Ekstere brizis venteto pelante sekajn foliojn...

La okulharoj de Piro falis, kiel se monteto ilin premegus. Li komforte kuŝiĝis kaj ekdormis...

Tuj kiam li endormiĝis, li sonĝe vidis Stankon kun taĉmento, staranta sur la sojlo, ŝtoniganta lin per harstariga rigardo... Piro volis ekkriegi, sed li perdis parolkapablon...

Stanko kun Surepo, Leĉjo kaj Jovano estis sur la sojlo... La turko ekfrotis la okulojn. Li pensis ke li sonĝas, sed tio estis horora maldormo.

– Nek movon! – tondris Stanko, dum okuloj liaj flagris fulme.

– Ĉu vi ligis ĉiujn en la domo? – demandis Surepo.

– Ne zorgu pri ili! – respondis Zaverzano. – Tiuj turkoj estas diligentaj!... Jen, ili mem ligas unu la alian!...

Li ekridis plengorĝe.

Tiu rido terure resonis en la animo de Piro.

Stanko eniris la ĉambron kun elingigita jatagano en la mano. Akre alrigardinte la turkon, li ektondris:

– Ligu vin!

Eĉ ne sciante kion li faras, la turko komencis senzoniĝi.

Ivano kaj Marinko staris kiel ŝtoniĝintaj. Alrigardinte Marinkon, Stanko diris al li:

– Helpu al via Piro, ligu lin!...

Marinko obeeme, kiel junedzino, alpaŝis kaj komencis ligadi Piron.

– Streĉu pli forte!

Marinko faris tion.

– Kruelu! – ekkrietis Stanko.

Marinko batis per sia genuo interŝultron de Piro. La interŝultro konkaviĝis, dum la brusto antaŭeniĝis... La zono eniĝis en la muskolojn de Piro.La turko estis blua kiel indigo.

– Bone!... Kaj nun, la mastron Ivanon....

Marinko alpaŝis kaj streĉligis ankaŭ Ivanon, same kiel Piron.

Kiam tio estis finita, Stanko, alpaŝinte la turkon, turnis lin kiel ŝtipon, ĝuste tiel, kiel tiu iam sonĝis. Post tio li kliniĝis super Piron.

– Diru, ho turko, kie estas mia patro?

Io en la brusto de Piro ekknaris. Li estis ion dironta, sed ne povis. Stanko eksvingis la jataganon.

– Kie li estas, respondu!

– En la kelo... – elĝemis Piro.

Surepo ekkriis:

– Iru en la kelon, elirigu Alekson!

Zaverzano kaj Joĉjo saltis kiel cervoj... Malferminte la kelon, ili vidis Alekson kuŝanta meze de la ŝlimo. Manoj liaj estis sangokovritaj, la vesto disŝirita, inter la fingroj, gluecaj pro koto, videblis liaj grizaj harbukloj...

Ili elportis lin. La maljunulo kuŝis senmove. Zaverzano kliniĝis super lin.

– Kia estas lia stato? – demandis Joĉjo.

– Li ankoraŭ spiras!...

Tiumomente Stanko elkuris el la tranoktejo.

– Kie li estas, kie li estas?

– Ĉi tie! – diris Zaverzano.

Stanko falis sur la profundaĝulon.Li kisadis lian ŝrumpiĝintan, ŝlimkovritan vizaĝon kaj manojn.

Alekso estis reakiranta la konscion.

– Akvon... – flustris li.

La hajdukoj ekkuris por alporti akvon. Surepo diris al Joĉjo:

– Venu kaj prigardu ilin!...

Li alpaŝis, prenis botelkukurbon, kaj komencis aspergi Alekson per akvo... Post tio li klinis la botelkukurbon al liaj bruligitaj lipoj, kaj gutigis kelkajn akverojn...

Vivo plezurige verŝiĝis tra la forto de Alekso. Li apogiĝis sur la manojn, sed ankoraŭ estis senforta.

– Akvon!... – Akvon!...

– Ni ne povas doni al li multe da akvo, tio mortigus lin! – dirinte tion, Surepo gutigis ankoraŭ kelkajn akverojn sur liajn sekajn lipojn...

Post tio li turniĝis. al Zaverzano.

– Forportu Alekson! – diris li.

Aŭroris. La malkreskanta duonluno ĵus aperis kaj direktis siajn kornetojn al la tero. Freŝeco ŝprucis vekante ĉiujn vivulojn...

La hajdukoj estis haste malproksimiĝantaj. El kelkaj pafiloj ili faris brankardon, sur kiun ili portis Alekson. Stanko iris apud la patro, rigardante kaj observante per avida rigardo ĉiun lian movon...

La freŝeco konsiderinde vivigis Alekson. Ekpetinte ke oni lin mallevu, Alekso demandis akvon...

Surepo donis akvon, sed nur unu glutaĵon.

– Ne turmentu min!... Mi forbrulos!

Surepo nenion respondis, sed ne permesis al li plu trinki.

Zaverzano suprenrigardis:

– Ho Sinjoro, kiel bela tago!... Tamen, la ĉasado estis ankoraŭ pli bela. Jen, Surepo, la estron pli ĝojigos la kalva kukurbo (li montris la kapon de Piro) ol se ni alportus oron kaj trezoron.

– Pri Stanko mi eĉ paroli ne devas!...

Surepo svingigis la kapon aprobe.

– Hodiaŭ estas mia tago! – diris Stanko, dum okuloj liaj fulmis kontente. – Bedaŭrinde, mi ne trovis ankaŭ tiun!... – Al li, ĝuste al li mi devas revenĝi!... Li ne devas morti kiel la homoj mortas!... Unue li devas senti timegon!...

Li alpaŝis la kaptitojn, kiujn pelis Leĉjo.

– Nu, Ivano Maraĵĝiĉo! – diris li galhumore. – Kion vi nun diras?... Jen via Piro, jen via Marinko... Diru al ili, ke ili persekutigu nin! Ĉu eblas ke vi kompromitiĝis en via grizaĝo?... Hontinde!...

Ivano mallevis la kapon. Nur nun li komprenis kioman pekon li faris; nur nun li tutplene sentis kiom malamata li igis sin!...Li eĉ ne unu vorton povis elparoli. Li ne estis malĝoja pro sia griza kapo, li jam satvivis, sed li malĝojis pro la infanetoj, kiuj tute kaj absolute senkulpaj prosuferos liajn pekojn.Strečinte ĉiujn siajn fortojn, li diris:

– Stanko!... Dio vin pardonu kiam vi mortigos min!...Sed... ne venĝu!... Tiuj, kiuj estas tie – ili kulpas pri nenio...

– Ĉu tiu estis kulpa, diru? – demandinte tion, Stanko montris al Alekso.

– Dio decidos!

– Tamen, antaŭ ol vi aperos antaŭ Dio, mi volas vin demandi... – ekkriinte tion, Stanko komencis trepidi. – Mi volas paroli kun vi nun!...Malforgesu kion mi diros al vi, Ivano! Eĉ se mi povus la plej terurajn vortojn diri al vi dum via lasta vivmomento, tio tamen estos tro malmulte kompare kun la peko, kiun vi faris!

Ivano eksilentis. Li kvazaŭ vidus antaŭ si furiozan linkon. La okuloj de Stanko fulme flamis...

Aŭroro pli kaj pli pli konkeris la mondon.La suno penetris tra densaj folioj. Jam sentiĝis la varmo de ĝiaj radioj.

Ili abrupte haltis. Zaverzano ekbojis. Responde aŭdiĝis rebojado. Tiam kelkaj armitaj hajdukoj eliris renkonte al ili.

– Ho... vi kaptis ilin! – diris Nogiĉo.

– Jes, ni kaptis ilin! – respondis Zaverzano. – Negrave kiom furiozaj estis ĉi tiuj hundidoj, ili falis en nian kaptilon, eĉ unu vorton ili ne sukcesis diri!...

– Ek, ek, la estro atendas.

Ili alvenis. La estro kaj la kunularo salutis ilin gaje. Leĉjo ligis la triopon al sveltgracila frakseno, dum Alekson oni alportis al la trunko sur kiu sidis la hajdukestro.

Sreĉko kliniĝis super Alekso.

– Ĉu vi estas viva, ho frato? – demandis li.

– Jes, mi estas viva... Akvon!...

Sreĉko eltiris sian lignobotelon.

– Jen, trinku!... Ĉi tio vin fortigos...

Alekso enbuŝigis du-tri gluton el la lignobotelo...

– Ĉu vi povas leviĝi?

– Mi provos...

Stanko alkuris kaj subtenis lin... Terure aspektis la lackonsumita vizaĝo de Alekso...

– Loku lin ĉi tie, apud mi... – diris la hajdukestro.

Ili sidigis Alekson sur la trunkon... Tiam Alekso, apogita sur la hajdukestron, alrigardis la tri malfeliĉulojn...

– Nun rakontu ĉion kio okazis. Parolu vi, Ilijo!

Zaverzano komencis rakonti, dronante en detaloj. Kiam li finis, la hajdukestro diris:

– Mi kontentas! Ĉio okazis bone!... Kion nun?... Kion ni faru nun?...

– Ni senvivigu ilin! – diris Stanko.
– Ni juĝu ilin! – diris Surepo.
– Ni juĝu ilin! – ektumultis ĉiuj.
– Leporĉjo – diris la hajdukestro. – Malligu kaj alkonduku ilin ĉi tien...
La pli junaj ĉion plenumas tuj. La hajdukoj ariĝis ĉirkaŭ la hajdukestro, laŭla kutimo kaj estreco.
Leĉjo alkondukis la ligitojn.
– Ho turko! – diris la hajdukestro. – Vi estas ĉi tie antaŭ la tribunalo de venĝantoj... Ni scias kion vi faris. Vin oni igis estro de Nigra Marĉo, ĉu ne?
Piro silentis.
– Ne silentu! – diris la hajdukestro. – Vin oni igis estro de tiuj homoj. Esti estro de vilaĝo, estas same kiel esti estro de hejmo. Ĉu jes!...
– Sed kion mi kulpis? – demandis Piro.
– Vi kvereligadis la homojn.
– Ne mi.
– Jes vi!...
– Nun mi estas en viaj manoj – vi povas min devigi konfesi, sed mi ne faris tion. Ĉiuj evitadis min. Nur ĉi tiu Marinko kaj ĉi tiu Ivano kondutis homece al mi. Mi en ĉi tiu Nigra Marĉo sopiris homojn kaj belajn vortojn... Ĉiuj min rigardis maleme... Tuj kiam mi diris iun vorton, ili mallevadis la kapojn... Kion malbonan mi povis fari?... Diru, Ivano!... Diru, Marinko!
La hajdukoj silentis. Ivano kaj Marinko same.
– Mi estis martiro! – daŭrigis Piro. – Se mi malsaniĝus, neniu vilaĝano helpus min!... Mi estas orfo de et-aĝo, mi memoras nek la patron, nek la patrinon. Kaj vi diras... ke mi kvereligis!... Kiu kun kiu malamikiĝis?...
Denove ĉiuj silentis. Piro kuraĝiĝis. Li ekkredis ke li ilin plorigos, tial li daŭrigis:
– Dio ankaŭ min kreis, same kiel la aliajn, same kiel vin. Ankaŭ mi estas homo kiu havas koron...Ĉu mi ne havas siajn veindaĵojn, ĉu mi ne havas larmojn, ĉu mi ne bezonas homon, al kiu mi povus plendi kaj plori?... Diru!... Ĉu ne veindaĵoj vin devigis foriri en la monton?... Ĉu vi ne faris tion pro kordoloroj?... Se estas tiel, diru kial do mi kulpas? Mi estus neniulo, se estus tiel. Sed ne estas tiel. Tio estas vero!...
– Kamelo! Venu ĉi tien! – diris la hajdukestro.
Kamelo alpaŝis.
– Ĉu vi aŭdis, kion la turko diris?
– Mi aŭdis, sed la turko mensogas!...
Piro ekrigardis lin konsternegita, dum Marinko kaj Ivano subite paliĝis kiel vakso.
– Li estas freneza... Li babilas sensencaĵojn! – diris Piro.

– Ha-ha-ha! – ekridis Kamelo. – Jes, via ĉiopovo lernigis mi babili sensencaĵojn, sed mi ne estas freneza! Mi ne estas freneza ankaŭ tial, ĉar depost via alveno mi ĉiun vian paŝon sekvis. Eĉ kiam vi preĝe kliniĝis, mia okulo vidis vin!...

Tiam li komencis rakonti ĉion, kion ni jam scias. Ĉiun interkonsenton kun Marinko, Ivano kaj Lazaro, ĉiun vorteton, ĉiun intencon ilian...

La turko komencis genutremi. Li konsterniĝis aŭdinte ke ĉi tiu homo scias ĉion, ĉiun, eĉ la plej malgrandan penson lian...

Kamelo parolis elokvente, senkaŝe.La hajdukoj malfermis la buŝon, mire, konsternitaj!...

– Tia estas la vero, ho turko! – Kamelo finparolis sian akuzon. – Tia estas la vero! Cetere, ĉu vi volas scii kiu malebligis ĉiujn viajn intencojn?... Mi, ho turko! Mi kaj la popo, kiu kiel aglo flugpendis super Nigra Marĉo, ne permesante al la homoj fali en viajn kaptilojn!... Nu, diru ke ne estas tiel!...

La turko renversiĝis kiel fulmotrafita.

Post la rakonto de Kamelo estis klare ke la ĉefaj kulpuloj estas Piro kaj Marinko. Tamen, Ivano estis armilo en iliaj senindulgaj manoj... Li senvole falis en kaptilon, el kiu li poste ne povis elŝiriĝi...

La hajdukestro enpensiĝis, la hajdukoj silentis.

– Fratoj miaj! – diris Srećko post longeta meditado... Ĉi vi deziras ke la turko kaj Marinko estu mortigitaj?

– Ni deziras!... – ektondris de ĉiuj flankoj.

– Sed tuj! – aldiris Stanko.

– Jes, tuj... Plej multajn malbonaĵojn ili faris kontaŭ vi, al vi mi ilin donas!... Prenu duopon-triopon, irigu ilin tien, en la arbaron...

– Kion pri Maraĵĝiĉo!

– Ankaŭ lin ni juĝos.

– Ĉu sen mi? – demandis Stanko.

– Ni atendos vin.

Stanko alvokis Leĉjon kaj Zaverzanon.

– Irigu ĉi tiujn du turkojn! – diris li kun febra ĝojo. Okuloj liaj fulmis kate...

Nek Piro nek Marinko povis iri. Tamen Zaverzano trovis solvon.

– Lo, Stanko! – diris li. – Ĉar ĉi tiuj ne povas iri, ni senvivigu ilin ĉi tie.

La ellasilo sur lia pafilo ekklakis.

Tiu neforta sono de ellasilo resonis terure. Marinko kaj Piro ektimis kaj alsaltis.

– Ni iros! – diris ili ambaŭ unuvoĉe.

– Ho... vi iros!... – ekridis Zaverzano. – Nu, bone. Mi volis konduti homece: se vi ne povas, ni vin ne turmentu. Tamen, se vi povas, tiukaze... ni iru...

Ek, Maĉjo, kara mia, ek malrapide... Nun vi povas ne zorgi. En infero estas multe da turkoj, vi povos satflati...

Ili ekiris... Tra densaj folioj penetradis sunradioj. Miloj daskarabetoj moviĝetis sur la tero, preterflugante iliajn kapojn.

La animo de Stanko bolis. Li pripensadis turmentojn. Por li estis grave devigi ilin senti kion ili perdas, senti la kompletan hororon de morto. Li spirsingultis pro torentaj deziroj...

Tamen, por Zaverzano ĉio estis kialo por ŝerci.

– Vidu, mastro Piro, kiel bele la suno sunas. Vane!... Dio donas tion, kin li volas! Jen, ĉi tiu skarabeto!... Vidu kiel ĝi lantas. Tamen ĝi estas pli feliĉa ol la homo. Kian utilon vi nun havas pro via sinjoreco. Nenian!...Vi agonias pro timo pensante pri tio, kio okazos al vi post kelkaj momentoj... Ni ja kutimiĝis al tio, tial por ni tio estas tutegale... Kiam nin neniu persekutas, kiam nin neniu embuskas, ni enuegas.

Kaj Marinko kaj Piro silentis... Nur sur iliaj vizaĝoj videblis, ke ili paliĝas, ruĝiĝas kaj bluiĝas...

Zaverzano sentis ion pezan sur la animo. Li preskaŭ ekhontis, ĉar li babilas tiel kun la homoj, super kies kapo staras morto.

Tiam ekregis silento. Aŭdiĝis nur sekaj branĉoj, kraketantaj sub iliaj piedoj.

Abrupte levinte la kapon, Stanko diris:

– Halt!...

Lia voĉo resonis tra la arbejo. Ĝi frostigis la ostmedolon de Piro kaj Marinko. Genutreme ili sidiĝis.

– Jen ĉi tie. Jen la kverko! Tien ni la turkiĝinton levos...

Marinko sentis ke li perdas prudenton. Piro revidis sian sonĝon. Al li ekŝajnis ke en la sonĝo li ĝuste ĉi tiun arbon vidis. Li volis ekpeti, ke ili iru for de ĉi tie, sed li perdis parolkapablon...

– Ek, Zaverzano!... Ek, kunfrato mia!... Agu!

Ili alproksimiĝis.

– Ne tiel!... Ni unue Marinkon pendigos, poste mi kun la turko kvitiĝos.

Li ekkaptis unue Marinkon, malligis liajn manojn, maŝigis rimenon, kajmetis ĝin sur lian kolon.

– Bone!... Nun, leviĝu!...

Lia terura rigardo starigis Marinkon. Li gapis jen al Stanko, jen al Zaverzano. Stanko lin irigis al la kverko. La krono de la kverko estis ne tre alta...

– Ek, Zaverzano!... Tamen ne! Mi suprengrimpos!... Tion mi devas fari propramane. Dio min mortigus, se mi permesus ke iu alia faru tion!...

Li surgrimpis la arbon, kaj subentiris elektitan branĉon. Du-tri fojojn li saltetis por kontroli ĉu ĝi estas sufiĉe forta, kaj ekkriis:

– Alkonduku lin pli proksimen!

Marinko abrupte rekonsciiĝis. Vidinte kio lin atendas, li komencis barakti. Tamen la fortaj muskoloj de Leĉjo stringis lin.

Li komencis barakti...

– Iru jam ĉi tien!... – dirinte tion Zaverzano kaptegis lin korpomeze, kaj proksimigis lin al la arbo.

Marinko kriaĉis per plena voĉo.

– Nu!... Kial vi kriaĉas? – diris Stanko. – Dum vi detruadis mian hejmon, turmentis la povran maljunulon, vi ridis, vi miskredulo, kial nun vi kriaĉas?... Kial vi kriaĉas?

– Al li ne plaĉas la arbo! – diris Zaverzano. – Negrave, kaptu la rimenon!...

Li alĵetis al Stanko la alian finaĵon de la rimeno.

– Levetu lin iom! – diris Stanko.

Leĉjo, estante alta, levis Marinkon ĝis la branĉo. Stanko ligis la rimenon al la branĉo...

– Nun lasu lin!... – diris Stanko.

Leĉjo faris tion. Marinko ekbaraktis du-tri fojojn, okuloj liaj kvazaŭ elsaltus, la lango elfalis el la buŝo. Stanko alrigardis Piron.

– Ĉu vi vidis, ho turko?

Piro ne povis paroli.

– Nu, nun estas via vico. Via Maĉjo devas vidi kio kun vi okazos!– dirinte tion li descendis de la arbo.

– Ĉu ni ankaŭ lin pendumos? – demandis Zaverzano.

– Lin ne. Lin ni buĉos. Li alpaŝis, altiris la kapon de Piro, kaj malingisla jataganon. Alrigardinte Marinkon, li diris:

– Rigardu, Marinko!... Jen kion mi faras kun Piro!

Li enigis la jataganon en ties gorĝon... Sanga ŝpruco ektorentis... La klingo eniĝis ankoraŭ pli profunde...

Post tio Stanko forpuŝis la kapon de la turko.Viŝinte la klingon je lia vestaĵo, Stanko remetis ĝin en la ingon...

Tiam li levis la kapon kaj demetis la ĉapon.

– Ho Sinjoro!... Dankon al vi por ĉi tiu bela donaco!... Tamen, ho Sinjoro, permesu al mi kompletigi mian venĝon!... Ĉi tio estas nur komenco...

Li surkapigis la ĉapon, kaj turniĝis al la kamaradoj:

– Nun ni juĝu Ivanon!...

# 20. VENĜANTOJ

La hajdukoj silentis senvorte kiam ili alvenis.

– Ĉu finite? – demandis la hajdukestro.

– Finite– diris Stanko.

– Tiukaze sidiĝu.

Ili sidiĝis.

– Nu, Stanko, infano mia, – diris la hajdukestro – la ĉefajn kulpulojn ni donis al vi...

– Sed ne ili estas la ĉefaj! – diris Stanko. – Ĉiuj estas la ĉefaj!...

– Vi estas kolera, tial vi pensas tiel – diris kviete la hajdukestro – sed ni opinias maltiel.

– Kial maltiel? – ekkriinte tion, Stanko saltis, dum okuloj liaj flagris. – Mi esperas ke vi ne diros, ke Maraĵĝiĉo ne kulpas?

– Mi ne diros.Tamen mi asertas, ke li ne estas kulpa same kiel la duopo.

– Li estas ankoraŭ pli kulpa! Li helpis ĉiel, kiel li povis. Li kvereligadis homojn... Li kompromitis ĉie la martiron, mian patron!... Mi deziras ke li estu mortigita!...

– Ne rapidu, ho junulo! Via sango estas impeta! Aŭskultu pli aĝajn homojn!... Ĉi tie estas mi, ĉi tie estas Nogiĉo, Surepo, Kamelo kaj multaj aliaj homoj! Estos sufiĉe ke Ivano revenu en la vilaĝon, ke ĉiuj per la fingro montru al li, kiel al turkaflataĉulo...

Muskuloj de Stanko ektremis.

– Postulu de mi ankaŭ demeti la ĉapon, peti de li pardonon!...

– Vi scias ke vi mi tion ne postulos de vi. Sed ne estas decene aŭskulti kion oni al vi diras!...

– Ĉu tiomaj kondamnindaĵoj kiujn li faris...

– Li suferos pro tio. Ĉu io povas esti pli malbona, ol kiam honestaj homoj forturnas la dorsojn al oni?... Tio estas pli malbona ol la morto... – Ĉu ne, fratoj miaj?

– Tio estas vero!

– Do, estu tiel, kiel mi diris.

Stanko sentis kvazaŭ oni vangofrapus lin. Li opiniis, ke neniu havas pli ol li rajton juĝi Ivanon. Tial li ekstaris antaŭ la hajdukestro, alrigardis lin malafable, kaj diris:

– Mi tion ne akceptas!

– Tiukaze vi ne estas nia kamarado! – diris la hajdukestro al li akratone.

– Do, mi ne estas!... Sed mi nun juĝos lin! – diris Stanko kaj elprenis pistolon.

La nigra okulo de Srečko ekfulmis, kaj haltigis lian manon.

– Se Srečko ion diris, tio estas dirita!...Metu la pistolon sub la zonon, kaj foriru!... Kiam vi komencos fari ion, kion vi volas, tio estas via afero, sed se vi ion faros je mia nomo... mi mortigos vin!...

La hajdukoj alsaltis Stankon...

– Bone, estro! Ĝis la hodiaŭa tago mi obeis vin, sed de la hodiaŭa tago mi obeos min mem. Mi respektas vian vorton, ĉar mi respektas vian salon kaj vian panon...

Li metis la pistolon sub la zonon, kaj turniĝis al la kunularo...

– Fratoj miaj! Dankon por la salo kaj pano!... Se inter vi iu estas kolera venĝanto, tiu iru kun mi.Mi batalos ĝis kiam mi ekstermos ĉiujn.

Jovano kaj Joĉjo alpaŝis al li.

– Kion, ĉu ankaŭ vi? – demandis hajdukoj.

– Jes!...

Zaverzano komencis grati la nukon, kaj ankaŭ li alpaŝis al Stanko.

– Ĉu ankaŭ vi? Zaverzano?!

– Jes... Mi ŝatas tohuvabohuojn...

– Estro!... Kion vi faros? – demandis Nogiĉo.

– Kiu volas iri – tiu iru!... Mi postulas obeemon! Se ankaŭ vi ne konsentas kun mi – iru!...

– Mi konsentas kun vi... Tamen, Stanko...

– Mi cent fojojn pripensas, sed unu fojon agas! – diris kviete la hajdukestro. – Mi scias, kial mi lasas Ivanon viva...

– Kial do vi donacas al li la vivon? – demandis Stanko galhumore.

– Vi estas junulo. Via koro estas impeta. Vi vidas nur ĝis la nazpinto. Se vi kondutos laŭ kordeziro, vi faros pli da malbono, ol da bono...

Kamelo reagis:

– Aŭskultu, Stanko! Srečko scias kion li faras. Ĉio kion li faris estis saĝa, mi asertas tion!

La lipoj de Stanko tremis.

– Ho, Dio mia!... Ĉu mi freneziĝis, kio okazas? – blekis li. – Ĉu ni permesu vivi al tiu malhomo, kiu faris tiomajn malbonaĵojn. Adiaŭ, estro!... Dankon

por via patra zorgo!... Dankon por la pano kaj salo!... Tamen... mi ne pensas kiel vi!... Ĉi tie vi estas estro. Ĉi tiu homo estas ĉi tie sub via egido – hodiaŭ li ne perdos la kapon... Tamen morgaŭ, postmorgaŭ, ĝis mia lasta spiro – li estos mia!... Adiaŭ!...

Demetinte la ĉapon, li proksimiĝis al la mano de Srečko.

– Pardonu, mi ofendis vin, kvankam vi por mi estas sama, kiel mia patro, tial min mortigus via ununura malbona penso! Pardonu!

– Estu benita! Vi povus gvidi taĉmenton, sed vi estas impeta, impetega!...

– Mi ĵuris al Dio, ho estro.

Ili interkisis.

– Fratoj miaj! – li turniĝis al la hajdukoj. – Adiaŭ al tiuj, kiuj restas! Adiaŭ!...

Post tio li alpaŝis la patron, kaj kisante lian manon, diris tra larmoj:

– Paĉjo! Transdonu saluton al la patrino!... Faru kiel Dio vin instruas, sed mi ne vidos mian tegmenton, ĝis kiam mi ne realigos mian ĵuron. Adiaŭ!...

Preterpasante Ivanon, li alrigardis lin malafablege, pro kio Ivano sentis ke liaj genuoj tremas.

– Ve al via domo, Ivano Maraĵĝiĉo!...

La hajdukoj adiaŭis Zaverzanon, Jovanon kaj Joĉjon. Zaverzano pravigis sin antaŭ la kamaradoj.

– Kion fari, tamen, diablo scias tion, mi ŝatas Stankon! Mi ŝatas lin, ĉar li ne kvietas... Li nur cerbumas kiun kaj kiamaniere senkapigi.Ankaŭ mi bestiĝis, mi deziras agi!...Krom tio, ankaŭ mi havas miajn ŝuldojn,nun, kiam mi havas tiel bonajn kamaradojn, mi povos ĉion kvitigi... Adiaŭ, Surepo! Via foresto min plej multe malĝojigos; al mi mankos via parolado!...

Rido resonis. Surepo nur levis la maldekstran brovon, kaj distiris la lipojn...

– Zaverzano, Zaverzano – diris li.

– Adiaŭ, ek!... Dio helpu vin!...

Ili interkisis, interbrakumis, kvazaŭ ili estus kreskintaj en la sama sino.

– Dio helpos, espereble, ke ni denove kuniĝu!... – ekkriis hajdukoj.

– Dio helpos!... – diris Stanko. – Tuj kiam la tera justeco interpacigos la ĉielon kaj lateron, ni alvenos! Nun – adiaŭ!

Zaverzano kantetis...

„Kiam monta arbaro ekverdos,
Kiam tero herbos kaj ekfloros.
Kiam ŝafoj iĝos rostiĝindaj...“

Strečinte la rimenojn ili foriĝis. Abunda arbetejo ilin rapide kaŝis de iliaj kamaradoj...

La hajdukoj suspiris profunde, mallevis la kapojn.

– Kvazaŭ forirus miaj samfamilianoj! – diris Nogiĉo...

La aliaj silentis senvorte... Nur venteto malkviete flustris tra verdaj folioj... La suno ardis eĉ tra folia densejo. La bluo ĉiela preskaŭ paliĝis pro ĝia brilo... Elfore estis penetranta ondobruo de lasenfina Drino.

La hajdukoj iris silente. Eĉ la interparolema Zaverzano enmemiĝis.

Abrupte Joĉjo demandis :

– Sed kien ni iros nun?

– Ni iru en Paraŝnicon – diris Stanko. – Paraŝnico taŭgas por hajdukoj, kiel lulilo taŭgas por infaneto. Finfine, tie estas ankaŭ kaj Nigra Marĉo kaj Raĉo... Ni ĉiam povos vidi ĉiun turkan bandon.

– Ni sidiĝu iomete – diris Latkoviĉo. – Estos bone priparoli ĉion, kion ni faros. Ĉar, same kiel Stanko volas kvitiĝi, ankaŭ mi volas pagigi mian ŝuldon.

– Vere – diris Stanko, sidiĝante en densan ombron – mi ankoraŭ ne scias kial vi ĉiuj enmontiĝis.

– Neniu enmontiĝas pro belaj rakontoj el trans la montoj – diris Latkoviĉo. – Al mi estas malfacile rakonti, tial parolu Joĉjo.

Sed Joĉjo klinis la kapon.

– Jen pri kio temas! – diris Zaverzano. – En ilia vilaĝo subestro estis iu Ibro. Joĉjo havis nuptaĝan fratinon, ankaŭ Jovano estis edziĝaĝa, iliaj domoj estis najbaraj... Ili estis kune de infanaĝo, kaj ili ekamis unu la alian.Jovano, do, volis edziĝi kun Spasenija, la fratino de Joĉjo. Tamen, oklazis malbono! La turko foje vidis la knabinon, kaj ordonis al siaj ĝendarmoj kapti kaj trudvenigi ŝin al li... Kio poste okazis, tion ne indas paroli... vi jam scias...

La okuloj de Stankon ekfulmis. Teruraj pensoj aperis en lia kapo.

– Sed kio okazis kun la turko? – ekŝrikis li.

– Li fuĝis en la urbon. De tiam lin neniu vidis, li malaperis kiel vaporo! – diris Zaverzano.

– Mi irus en la urbon! – diris Stanko.

– Ankaŭ ni volis, sed tion ne permesis la estro... Pro tio ni hodiaŭ unuiĝis kun vi. Prenu kaj niajn manoj kaj niajn kapojn!... Gvidu nin kien vi volas, sed ni venĝu, ni venĝu ankaŭ ŝin!... – diris Joĉjo.

– Sed kio kun ŝi okazis? Diru ja, kio okazis? – demandis Stanko.

– Nu! – diris Zaverzano. – Ŝi pendumis sin...

Stanko eksaltis:

– Fratoj miaj! – diris li. – Ni venĝos! Ve kaj al kristanoj kaj al nekristanoj malpuranimaj! Ho Sinjoro, ho Kreinto! Donu al mi povon plenumi mian promeson!...

– Kion pri vi, Zaverzano, kia malbonaĵo vin devigis veni en la monton?

– Mi... mi ekiris simple tiel, por kunesti!... Mi ne povis sidi senfare kaj enui koŝmare. Mi decidis iri ĉi tien, inter la homojn, mi kredis ke tiel estos pli bone!...Kaj vere, ĉi tiel estas pli bone! Antaŭe mi rigardis kiel turkoj batas,

mortigas kaj trudprenas – nun kaj serboj kaj turkoj rigardas kiel Zaverzano riparas la situacion, kvazaŭ cent jarojn li tiun metion lernus!...

– Parolulo nia! Cent fojojn vi mian zorgon dispelis!... – dirinte tion Laktoviĉo ĉirkaŭbrakis lin.

– Tio ne gravas, Plumpĉjo!... Pli bone estus ke ni elektu hajdukestron.

– Kial elekti! – diris Joĉjo. – Jen Stanko.

– Tamen, mi ne scias...

– Se vi ne scias, ni ĉiuj interkonsentos! – interrompis lin Zaverzano. – Ankaŭ Srećkone sciis ĉion, kiam li venis en la monton!... Ne sciis!... Tamen... problemoj instruis lin.

– Ĝuste! – diris Jovano kaj Joĉjo.

– Bone, tiukaze mi akceptas.

– Nun sufiĉas! Ne provu instrui nin, ni ja scias kion ni faras! – diris denove Zaverzano.

– Mi eĉ ne intencis. Mi volis irigi nin al Paraŝnico...

– Ni iru.

– Ho, estro! – diris Zaverzano al Stanko. – Vi ja vidas ke ni estas malmultenombraj... Sed mi ĵuras antaŭ Dio ke multaj turkaj patrinoj pro ni eklamentos!

– Mi same! – diris Stanko, kaj ekis paŝi...

Tra la arbaro resonis krakado de sekaj branĉoj...

# 21. PARAŜNICO

Nuntempe oni ne povus rekoni la iaman Paraŝnicon. Nuntempe tie estas plugkampoj kaj gresejoj, grenriĉaj kiel biblia Egipto; tamen, iam tieestis densa arbaro.En tiu oportuna loko, ĝuste kie Drino enflus Savaon, ĉiam nestiĝis hajdukoj la ribelantoj. Tie por ili estis bonega loko, ĉar ĉiun turkon kiu veturis en Bosnion aŭ el Bosnio, ili povis rimarki.

Kiam eksplodis la ribelo, Leĉjo Migradiĉo, konata sub la nomo „Nuda filo Leĉjo Taĉmentestro", tie havis sian konstantan restadejon kun siaj „nuduloj". Tie aperis kompleta kvartalo, pro kio longatempe, ankaŭ nun, maljunaj homoj Paraŝnicon nomas „eturbo".

Pri la nomo Paraŝnico ekzistas legendeto. Vivis iam unu eghomo, kiu ekamis sian propran fratinon, kaj volis edziĝi kun ŝi.

Ĉar tion oni kredis peko, kaj tion oni ne povis permesi, oni diris al la eghomo ke al li estos permesite edziĝi kun la fratino, se li elfosos fluejon, por ke akvo el Drino povos flui en Savaon. Li konsentis kaj komencis fosi. Sed subite malleviĝis tiel densa nebulo, ke li ne vidis kie li fosas, tial li fosis zigzage; en kelkaj lokoj li mem kunigadis. Vidante ke liaj penoj estas vanaj, li rezigniskaj la fosadon, kaj la fratinon. Ĝis la nuntempo tie troviĝas valetoj, kiuj similas al akva fluejo, sed nur parte, ĉar ili ne estis trafositaj ĝis Savao.

Estis antaŭtago kiam Stanko kun la kunularo alvenis en Paraŝnicon. De la akvejo brizis freŝa venteto, malvarmigante iliajn varmegajn fruntojn, kaj sekigante ŝviton.

– Ripozu!– diris Stanko.

La hajdukoj haltis. Li diris al ili senŝnurigi la sakojn.

– Ĉi tie ni restados. Rigardante al Drino kaj Savao. Ni atentos ke neniu pasu nerimarkite. Nun ni manĝetu.

Joĉjo prenis el la sako panon kaj iom da laktaĵo, post kio ili sidiĝis.

– Verdire, mi estas pli soifa ol malsata – diris Zaverzano. – Nu, mi devas subeniri al labordo por elfosi fonton.

Kiam ili finmanĝis, li krucsignis, leviĝis, kaj preninte kukurbon, foriris al bordo. Ne pasis multe da tempo, kiam li revenis portante akvon.

– Ĝi estas malvarma kiel glacia glacio. Mi ja tuj trovis fonton, eĉ tri fosmovojn mi ne devis fari.

La hajdukoj sattrinkis la malvarman akvon, post kio ili surkubutiĝis, kaj ĉiu dronis en proprajn pensoj.

La nokto estis malleviĝanta malrapide kiel morto. Krepusko konturigis objektojn en malproksimo. Iompostiome antaŭ iliaj okuloj restis nur blanka akvostrio... La ĉielo stele helis, venteto blovetis kaj susuris tra verdaj folioj, dum ie malproksime, malproksimege aŭdiĝis bojado de hundoj...

La hajdukoj endormiĝis, nur Stanko ne povis dormi. Li observis la ĉielajn lumilojn, kiuj flugpendis en la blua aero super li, ili flugpendis kaj palpebrumis malgajete, kiel orfo kies okulharojn sturmas sonĝo. Tiuj steloj kvazaŭ volus multon diri al li, sed ili estis senvortaj, almenaŭ por li ili estis senvortaj.

Li ekstaris, demetis la ĉapon, kaj komencis preĝi al dio:

– Ho Sinjoro, Kreinto nia, – flustris li – ĉu mi agis juste kaj ĝuste?... Vi, ho Sinjoro, instruu min plenumi justecon vian!...

Li denove suprenrigardis.

La steloj blinkis kviete, malvigle... Li sentis ion pezan sur la animo. Iu voĉo flustris al li:

– Vi ne rajtas plenumadi tion, kio estas dia devo! Li donas la vivon, li forprenas ĝin...

Tamen, alia voĉo ektondris:

– Mi estas justo dia! Ne estas bela ĉio, kio estas justa; dion fidu, sed senfare ne sidu!...

Tiu tondrado sufokis la flustron. Tio lin iomete serenigis. Li preskaŭ laŭte parolis kun si:

– Mi estis homo bona, kvieta, honesta...Sed ili ĉion faris por min mortigi, por malhonorigi min mortan, por malhonorigi mian domon, kaj ĉiujn miajn, ĝis la sepa generacio... Mi ne permesos tion!... Dio donis al mi ĉion kio mi estas; kial li donis tion, se li sciis ke tio estas malbona!...

Tiam li komencis iri tien-reen. Venteto estis malvarmiganta lian ardan kapon...

Tamen, ĝensento premis lian korpon, gorĝo lia sekiĝis...Li prenis kukurbon, elverŝis akvon el ĝi, direktiĝis al la fonto por lavi sin kaj trinki...

Veninte al la fonto, li lavis sin kaj sattrinkis, sentante ke la malvarma akvo efikas gajige...

Sidiĝinte ĉe la verda apudborda elfluejo, li ekzaltiĝis... Akvo murmure lirlis sub liaj piedoj, ĝojigante animon lian. Li apogis sin sur la kubuton, fiksrigardante la blankecon...

La luno aperis kaj prilumis la surfacon de akvo. Li duonvidis dancadon de ondoj en akvokirloj... Ĉio ĉi ekplaĉis al li. Jen, same bolis ankaŭ animo lia... Ĉi tiuj ondoj, subhelpataj de la aliaj, iĝas furiozaj kaj torentaj, ili detruas kaj faligas ĉion kio estas antaŭ ili... Ĉu tio estas ilia volo? Ne estas! Ilin instigas pli forta potenco...

– Same estas ankaŭ ĉe mi... Se mi povus kviete kuŝi en mia nesto, mi neniun tuŝus, samkiel tion faris nek mia avo nek mia patro... Tamen, ili elpremis min el mia nesto, tial mi, per mia forto, detruas kaj faligas ĉion antaŭ mi, ĉion kion mi povas, same kiel tiu ondo!...

Tiam li sentis kvazaŭ forfalus ŝarĝo de lia animo. Li sentis, ke li rajtas sammezure venĝi al ĉiuj, kiuj tion meritis.

Denove li suprenrigardis, denove li vidis vibrantajn stelojn; sed al li ekŝajnis, ke ili nun rigardas lin pli klare, ke ili ne plu palpebrumas...

– Mi ja mortigus min, se mi ne mortigus Lazaron!... Ankaŭ Ivanon!... Mi ne scias, sed ĉi tiuj estas niaj infanoj, ili ja diras: „Oni devas pardoni lin!..." Kiun?... Ĉu la krimulon?... Per via pardono vi rajtigas lin ankaŭ poste fari mlabonon!... „Ne, ne!... Dio pardonu, sed homo venĝu!...

La akvo lirlis. Li dronis en siajn sentojn, kiuj lin lulile lulis– li ekdormis...

Larĝa, granda ebenejo sterniĝis antaŭ li, sed tiun ebenejon plenŝtopis turkoj...Tie estas nur kelkaj hajdukoj – kontraŭ tiel granda forto. Ili perokule demandas unu la alian: kion fari? Stanko alrigardis kaj vidis Lazaron inter al la turkoj... Sentante ke en li ĉio bolas, li diris al la kunularo: „Ek!... Se vi ne volas, mi iras sola!"... Li ĵetiĝis tien... Li turniĝis en la sonĝo, kaj vidis ke post li kuregas Leĉjo, Zaverzano, Jovano, Joĉjo, Surepo, ĉiuj... „Ni mortbatu ilin!" – krias Leĉjo. „Ni faru tohuvabohuon!" diras Zaverzano... Jovano kaj Joĉjo kune tenas palison, ili levis ĝin alte, por ke oni bone vidu razitan kapon. „Nun ni estas kontentaj, eĉ se ni ambaŭ kapojn perdos, ĉar ni lin sur la paliso vidis!" – diras ambaŭ unuvoĉe, ridetante... Lazaro en sonĝo rigardis al li, komencis fuĝi, sed Stanko kaptis lin, tiris en la kampon, antaŭ la turkoj fortranĉis lian kapon, kaj tri fojojn ruligis ĝin...Post tio komenciĝis batalo, terura, sanga... Aŭduĝis nur la voĉo de Zaverzano, krianta al Surepo: – Diru almenaŭ unu vorton!... Parolu, ne mutu!... Vidu kian tohuvabohuon mi faras!"

Abrupte Stanko eksentis ke akra ponardo entranĉis lin.Li ĵetiĝis, dispremis turkon antaŭ si, sed senfortiĝis, kaj en la sonĝo senkonsciiĝis ... Kiam li iomete rekonsciiĝis, li sentis malsekan manon sur sia frunto, suprenrigardis kaj vidis Jelican, belan kiel lunlumo, en blanka vestaĵo, verŝantan larmojn super li... „Ĉu vi estas viva, mastro mia?" – demandis ŝi per sia sonora voĉo. Li estis respondonta, sed ekknalis pafilo... Li rekonsciiĝis...

Li aŭdis interparolon...

Eksaltinte, li ekkuris al la kunularo. Renkonte al li hastis Joĉjo.

– Kio okazis? – demandis li.

– Nia kunularo grandiĝas, ho estro.

– Kiu venis?

– Surepo, Leĉjo, Nogiĉo, Krajĉino... jen ili, ili serĉas vin.

Lia koro ekdancis. Li rapide alpaŝis.

– Jen li! – kriis Zaverzano. – Mi ja sciis ke Surepo min certe trovos!

– Bonvenon! – diris Stanko.

– Bontrovon!

Ili komencis interkisi.

– Kial vi alvenis?

– Ni alvenis laŭ interkonsento. Morgaŭ ankoraŭ dudeko ĉi tie aperos – diris Nogiĉo. – La estro dividis la kunularon: duonon li forkondukis, kaj duonon irigis ĉi tien, al vi. Pluraj taĉmentoj estos bezonataj... Serbio ekribelis, nur tie oni batas turkojn. Li kun la taĉmento foriris en Jadaron, tie turkojn li atendos.

Stanko ĵetis la ĉapon supren.

– Ho Sinjoro!... Dankon por via donaco!... Nogiĉo!... Jen al vi la taĉmento!... Irigu nin tien, kien via animo ekdeziros...

– Ho... ne!... La estro diris: Stanko estas bona, li estu hajdukestro!

– Ĝuste! – diris Surepo.

– Bone, tiukaze mi akceptas. Tamen, vi scias ke mi deziras venĝi!... Mi devas venĝi!... Ĉar, fratoj miaj, al mi ŝajnas ke min Dio mortigus, se mi Lazaron lasus viva!...

Neniu respondis post tiuj liaj vortoj.

– Ĉu vi konsentas?

– Ni konsentas?

– Ho, en ĝusta momento! – diris li.

Aŭroris. La oriento komencis ruĝi... La hajdukoj malleviĝis sur la rosoriĉan herbon.

– Ĉu vi lacas? – demandis Stanko.

– Ni ne lacas.

– Pro kio ili lacus? – diris Zaverzano. – Ĉu ili akvomuelilon trenis?...

Flamruĝo en la oriento ekspansiis pli kaj pli; iompostiome oni povis distingi ankaŭ objektojn; el vilaĝoj aŭdiĝis virkoka kanto, pepo birda ekbolis, resonante tra lakverkarbejo...

Leĉjo leviĝis fiksrigardante bosniajn montojn...

– Kio okazas!... Kial vi enpensiĝis, kunfrato mia? – demandis Stanko.

– Negrave, kunfrato...Kiu ne fiksrigardus la landon kiu lin vartis!... Al mi ŝajnas ke mi rigardas mian disfositan naskodomon. Se mi iam ajn ekhavos

bienon, mi loĝos ĉi tie!...Ĉi tie mia okulo vidas ĉion... Kaj... kaj ankoraŭ... mi neniam ĉesos memori ke mi devas venĝi!... Ĉu tiu loko nomiĝas Paraŝnico?

– Jes, Paraŝnico.

– Bela loko. Ĉi tie mia animo sentas senzorgon...

– Ek, dormu iomete – diris Stanko al la alvenintoj. – Dum vi dormas, ni pretigos tagmanĝaĵon. Jovano, Joĉjo! Iru kaj trovu ŝafidon...

La pli junaj ĉion plenumas tuj. Ili surŝultrigis pafilojn kaj foriris.

– Nu, mi volas pri io paroli kun vi... – diris Nogiĉo. – Mi havas por vi mesaĝon de la estro.

– Kian mesaĝon?

– Tion mi povas diri nur kvarokule.

– Tiukaze venu ĉi tien.

Ili apartiĝis de la kunularo.

Nogiĉo tiam rakontis al li detale pri la ribelo en Ŝumadio kaj Valjeva distrikto; li ankaŭ diris ke ankaŭ la plej konataj homoj en Maĉvo, la negocisto Ĉupiĉo el Noĉajo, la ĉefpopo Smiljaniĉo el Belotiĉo, Katiĉo el Glogovaco, Ilijo Serdano el Pernjavoro kaj ankoraŭ multaj, multaj hodiaŭ interkonsentis ribeligi ankaŭ ĉi tiun regionon.

– La estro min alvokis – daŭrigis Nogiĉo – li dividis la kunularon; nin, Maĉvanojn, li sendis al vi, kaj la alian duonon li forkondukis en ilian regionon por tie lanĉi ribelon. „Transdonu saluton – diris li – al Stanko; ankaŭ li faru la samon; li gardu Drinon, ĉar turkaj bandoj ĉiutage senescepte transiras Drinon, invadas kaj buĉadas! Morgaŭ vespere li iru al Katiĉo – (do-ĉivespere) – tie li trovos ĉiujn niajn homojn, tie li kun ili faru pluajn planojn." Tio estas saluto por vi de la estro.

– Sed kien li foriris? – demandis Stanko.

– Li foriris en la Sokolskan distrikton, por tie fari la samon.

– Bone. Ĉi-vespere ni iros kune al Katiĉo. Mi venigos ankaŭ la kunfraton Leĉjon kaj Surepon. Kiel ni interkonsentos, tiel ni faros.

Kiam li revenis, la kunularo jam dormis. Zaverzano bruligis fajron kaj pretigis rostostangojn por ŝafidoj.

– Jen, do – diris li vidinte Stankon kaj Nogiĉon – mi ne ŝatas sidi senfara.

– Estas bone – diris Stanko. – Tamen, Nogiĉo, ankaŭ vi iom kuŝiĝu ĝis kiam la rostaĵo estos preta.

Nogiĉo malleviĝis apud la kamaradoj kaj ekdormis kiel ŝtono. Zaverzano babilis:

– Vere, Stanko... pardonu... mi volis diri: estro... mi estas tre, tre feliĉa ĉar niaj kamaradoj alvenis. Al mi ŝajnas ke mi estas plej feliĉa ĉar venis Surepo! La vera diablo!... Li tiel ŝercas, ke oni povas krevi pro rido!... Samkiel vi scias, li bonege rakontas, sed kiam li tion volas – li povas elbuŝigi eĉ ne unu vorton dum tuta semajno...

Tamen, Stanko ne aŭskultis lin. Io alia premis lian bruston. Sreĉko komisiis al li grandan zorgon; ĉu li povos fari ĉion, ĉu li povos realigi la esperojn kiujn oni metis sur li?

Krom tio, lian animon premis ankoraŭ io. Li kvazaŭ atendus ion, al li ŝajnis ke la hodiaŭa tago ne pasos kviete; kvazaŭ okazus io, kiu profunde tuŝos lian vivon...

Abrupte li aŭdis grakadon. Li rekonsciiĝis. Vekiĝis ankaŭ Zaverzano. La grakado reaŭdiĝis.

– Respondu! – diris li al Zaverzano.

Zaverzano ekgrakis. La hajdukoj rekonsciiĝis el dormo.

– Kio okazas?

– Iu serĉas nin – diris Stanko.

Tiam ekregis silento. Minutoj ŝajnis eterno. La koro de Stanko bategis...

Arbusto disiĝis, kaj aperis la kapo de Kamelo.

– Ĉu vi estas tie? – demandis li.

– Jes, ni estas tie – diris Stanko tremvoĉe. – Kio bona okazis?

– Mi ne dirus ke okazis io bona...

## 22. BATALETO

Li kaptis la manon de Stanko, kaj forkondukis lin flanken.

– Kio okazis, pro dio?!

– Vi pravis hieraŭ. La hundaĉon, Ivanon, ni devis mortigi!

– Kion li denove faris? – diris Stanko.

Li pretiĝis aŭdi malbonegajn novaĵojn.

– Ankoraŭ nenion, kaj se Dio helpos, vi ne permesos al li fari tion!

– Diru do jam!

– Kiam Srećko liberigis lin hieraŭ, li leviĝis kaj foriris hejmen. Mi malrapide alŝteliĝis kaj sekvis lin. Antaŭ la tranoktejo lin atendis Lazaro, kiu hieraŭ ne estis hejme, ĉar li estis foririnta en komerckvartalon, de kie li ĵus revenis kaj ekiris serĉi Ivanon. Ili opiniis ke ilin neniu rigardas, ĉar Lazaro estis sola, tial ili, sentante plorutĝon, post certa tempo ekiris hejmen. Mi malrapide sekvis ilin. Jam noktiĝis. Mi enŝteliĝis en la korton, kaj haltis sub fenestro... Ili parolis pri multaj aferoj, sed la plej koleriga estas jeno.Ĉi-matene Lazaro foriris en la urbon por venigi soldataron, ke ili ataku vian domon.Domon vian ili bruligos, ĉiujn domanojn senescepte mortigos. La samon ili intencas fari ankaŭ kun la domoj de la popo kaj Joĉjo... Kiam mi vidis ke Lazaro surĉevaliĝis, mi ekiris ĉi tien; mi sciis ke vi estas ĉi tie. Stanko tremegis kvazaŭ en febro.

– Eĉ se ili kaj la turkoj havus cent vivojn – ĉi-foje venos fino al ilia latino!...

Post tio li fortuniĝis de Kamelo...

Tiumomente antaŭ li aperis Jovano kaj Joĉjo. Ambaŭ havis sur la dorso po unu ŝafidon.

– Lasu la ŝafidojn! – diris ordone Stanko.

– Kial?

– Lasu!... Unue ni devas buĉi lupojn!...

Jovano kaj Joĉjo lasis la ŝafidojn. La hajdukoj konsternegiĝis, ĉar Stanko aspektis terure.

– Ekipu sin! – diris li.

Ĉiuj tujtuje estis pretaj.

– Kamelo! – alkriis Stanko.

Tamen, Kamelo jam estis malaperinta.
– Li ne estas tie! – diris Nogiĉo.
– Do, ek!
– Kien?
– En Nigran Marĉon...
Li prenis la pafilon kun ornamita kolbo, kontrolis la ellasilon, kaj ekiris; la hajdukoj sekvis lin...
La suno aperis, granda, brila kaj purpura. Demetinte la ĉapon, Zaverzano faris la signon de kruco:
– Ho Dio, helpu nin! – diris li. Ĉiuj faris same.
– Ĝuste tian estron mi ŝatas – diris Zaverzano – kiu ne lacertumas. Hieraŭ li estriĝis, jam hodiaŭ li bataligos nin!... Kiaj hajdukoj ni estas, se violentulojne ekveos pro ni?... Diru', ho estro!
– Kion?... – demandis Stanko kunpremante la lipojn, por ke la kunularo ne vidu kiel ili tremdancas.
– Kies gastoj ni estos?
– Nin gastigos niaj malnovaj amikoj.
– Ĉu vin sopiras vidi Ivano Maraĵĝiĉo?
– Jes, li mem!...
– Nu, ĉi tio estos bela surprizo por li!
La hajdukoj ekridis.
– Mi tre deziras hodiaŭ aktivi, aŭ almenaŭ aktiveti!...
– Ni aktivos!
– Dankon al la kara dio!...Mi esperis ke ni uzos la pafilojn tiun vesperon, kiam ni liberigis vian patron; sed mi vane esperis! Tie ne estis vera turkoj, sed iuj oldulinoj!... Mi ŝercediris al ili: „Ligu unu la alian!“, kaj ili, verŝajne ili ne kutimas ŝerci, demetis la zonojn, komencis ligadi la brakojn unu al la alia! Ĉio ja estis simpla, sennpena.Sed la duopon kaptis vi, denove, vi sola... Mi jam pensis ke mia pafilo rustiĝos!...
Ili jam alvenis Senfundejon. Stanko okulis la lokon, kie li duonfalis kiam Lazaro pafis al li. Li kvazaŭ vidus la tutan okazaĵon; koro lia komencis saltetadi, sopirante venĝon...
Kamelo aperis el densejo.
– Halt! – ekkriis li.
La hajdukoj haltis.
– Vi atendu ĉi tie, sed Stanko iru kun mi.
Stanko ordonis al Nogiĉo atendi tie kun la kunularo aŭ lin, aŭ Kamelon, kaj ekiris kun Kamelo.
– Kien?
– Al la domo de la popo. Tie estas ĉiuj; ankaŭ via patro estas tie. Ili iom timis, ĉar ili pensis ke mi ne povos trovi vin. Nun ili ne zorgas...

Ili ĉirkaŭiris la domon, kaj eniris tra la korta pordo.

Tie vere estis ĉiuj. Kaj la popo Milojo, kaj Simo Katiĉo, kaj la vilaĝestro Joĉjo Juriŝiĉo, Seviĉo, Ŝokĉaniĉo, kaj multaj aliaj.

Ĝentile salutinte ilin, Stanko kisocele proksimiĝis al iliaj manoj.Ĉiuj interkisis kun li.

– Kion vi faras? – demandis li.

– Ni atendas turkojn... Estas tre bone ke Kamelo trovis vin! – diris la popo. – Al mi ial ŝajnas ke hodiaŭ ĉi tie komenciĝos bataleto...

– Dio volu tion!... – diris Katiĉo.

– Vin ni alvokis por interkonsiliĝi. Ĉu estas pli bone atendi turkojn ĉi tie, aŭ antaŭhaltigi ilin?

– Por mi estas tutegale – diris Stanko.

– Mi opinias ke estas pli bone antaŭhaltigi ilin – diris la popo Milojo. – Pli oportune estas embuski ĉe ŝoseo.

– Ĉu vi havas armilojn? – demandis Stanko.

– Ni havas pli da armiloj, ol ni bezonas.

– Tiukaze, Kamelo, iru kaj informu Nogiĉon, ke ni atendas lin ĉe Ĵuravo...

Kiam Kamelo foriris, li turniĝis al la aliaj...

– Ĵuravo allogas min – daŭrigis li – depost mia unua batalo... Tiu loko estas tre konvena!... Sed kion oni faras hejme, paĉjo?

Stanko turniĝis al la patro.

– En la domo estas neniu. Mi ĉiujn evakuis en la domon de la boamiko Miloŝo.

Stanko kuntiris la brovojn.

– Kial vi faris tion? – demandis li.

– Nia domo fajros flame.

– Ne la nia, sed la domo de Ivano! – elsiblis Stanko, dum okuloj liaj fulmis.

– Mi ja ne sciis! – levis la ŝultrojn Alekso. – Mi ne volis riski, pli bone estis evakui ilin!... Tamen, nun, tostu...

Li etendis lignobotelon al Stanko.

Stanko krucsignis, tostis, trinketiskaj transdonis la lignobotelon, por ke ankaŭ la aliaj trinku.

– Ĉu la hundaĉo foriris frue? – demandis Stanko.

– Kamelo diris ke li foriris ĉirkaŭ noktomezo.

– Kion faras la maljunulaĉo?...

– Li estas tie, hejme... Li ŝajnigas ke li nenion scias – diris Alekso.

– Do, ek! Ni iros tra la arbaro – diris Stanko.

Ĉiuj leviĝis. La popo Milojo dekroĉis pafilon, kiu pendis sur ligna hokpendigilo, kaj krucsignis.

– Ho Sinjoro!... Estu nia amiko! Vi vidas niajn ĉagrenojn, tial vi estu milda patro kaj helpu niajn nefortajn manojn!... Kvartcent jarojn Serbio naskadis

sklavojn kaj servulojn. Eĉ se ion pekis niaj prauloj, vi indulgu, pardonu almenaŭ ĉi tiun generacion, kiu ekribelis kontraŭ ekzekutistoj!...Vi permesis ke ni estu sub jugo... permesu ankaŭ ke ni demetu la jugon per niaj nefortaj manoj!...

Ĉiuj en la ĉambro faris la sanktan signon...La vizaĝo de la popo abrupte transformiĝis. Kisinte la pafilon, li ekkriis:

– Fratoj miaj! Koro mia diras ke Dio estas kun ni! Brave, fratoj miaj, brave ni savu nian idaron, ke ne estingiĝu la nomo serba! Brave, fratoj miaj, ni savula honoron, la sanktajn domojn niajn, la hejmanojn niajn, ni ne permesu ke nian puran serban sangon makulu la sangomalpura kaj malamika!Brave, ho infanoj diaj, ni gardu la sanktan altaron dian!Brave, ho fratoj miaj, ni brave pereu aŭ venku!... Ek!...

La koroj trembatis, la okuloj ekbrilis. La pastro paŝis junule, staturo lia estis rekta kiel lanco.

Kiam ili eliris el la domo, li diris al Stanko:

– Antaŭen, filo mia!... Gvidu nin! Dio diras al mi, ke li vin elektis por komenci ĉi tiun sanktan agadon!

Stanko sentis ion edifan en sia animo. Li sentis sin kaj forta kaj kapabla gvidi la malmildegan batalon. Li alproksimiĝis al la pastro, kaj demetinte la ĉapon, diris:

– Tiukaze, ho popo, benu min!

– Beno kaj dia kaj mia, kaj larmoj de funebrantaj gepatroj kaj malfeliĉuloj akompanu vian bravagon!...

Stanko kisis lian manon, surkapigis la ĉapon, kaj per voĉo plena da fortokaj memfido diris:

– Tiukaze, sekvu min!...

Ĉiujn plenigis espero; ĉiuj sentis ke al tiu knabo, kiu ankoraŭ kisas iliajn manojn, Dio donis forton, bezonatan por komenci la liberigan agadon; tial ĉiuj, tutplene absorbitaj per memfido, ekiris post li...

Ĉe Ĵuravo la kunularo atendis ilin. Tie estis ariĝintaj ĉiuj, kiuj apartiĝis de la hajdukestroSreĉko. Estis tie ankaŭ vilaĝanoj el apudaj vilaĝoj: Sovaljko, Bogatiĉo, Klenjo, Ali-agaa Farmbieno kaj Banusaj Kampoj. En la taĉmento estis pli ol kvindek homoj, kaj junulon kaj nejunuloj. Ĉiuj renkontis Stankon kaj la kunularon starante.

Stanko interkisis kun ĉiuj. Ĉiuj okuloj estis brilaj, ĉiuj fruntoj estisfieraj; sur ĉiuj vizaĝoj videblis ke la animo estas hardita...

Stanko sentis ion majestan en sia animo. Li kvazaŭ sentus superan inspiron. Okulo lia iste esploris la ombroriĉajn lokojn, kie li planis organizi embuskejojn..

Li dislokis embuskontojn serioze, senhezite, kvazaŭ pri tio li pensis tagnokte. Profundaĝuloj admiris la dispozicion kaj liajn saĝajn ordonojn. Turniĝinte al Alekso la popo Milojo diris:

– Bonega kaptilo: eĉ se estus milo da ili, eĉ heroldo ne restos viva!...

Ĉiuj larmis pro ĝojo... Alekso jam mil fojojn benis la filon pro kies agoj li tiel multe suferis.

– Sed kie estas Kamelo? – demandis Stanko Nogiĉon.

– Nur Dio scias! – diris Nogiĉo.

– Verŝajne li interpepas kun birdoj – ŝercis Zaverzano. – Mi povas ĵuri ke li ne alvenos sen novaĵo...

Stanko al ĉiuj ordonis kion fari. Por si li elektis la plej danĝeran lokon, sed kun li estis: Nogiĉo, Surepo, Zaverzano, Leĉjo, Jovano kaj Joĉjo... Tio estis fidindaj manoj kaj okuloj. Ili batas subite, tondre...

La bruego transformiĝis en voĉĥaoson, la voĉĥaoso en plensilenton. Ĉiuj dronis enatendadon kaj en proprajn pensojn.

Aŭdiĝis kiel folioj bruetas, kiel lirlas Ĵuravo; aŭdiĝis eĉ zumo abeleta... La suno rostis...

Sur ŝoseo aperis homo.

– Kamelo! – ekkriis ĉiuj.

– Kie estas la estro? – demandis Kamelo.

Stanko eliris sur la ŝoseon.

– Ili iras – diris Kamelo. – Lazaro gvidas ilin.

La koro de Stanko ekdancis. Li ekkriis:

– Atentu!...

Al Kamelo li diris:

– Kaŝiĝu ĉi tien.

– Ne zorgu! – dirinte tion, Kamelo malaperis en arbdensejo. Ĉiuj senmoviĝis... Vento estis klinanta longajn herbojn.

Tiam tero ektondris... Iras armeo. Iompostiome oni povis distingi ankaŭ klakbruon de ĉevaloj. Ĝi estis pli kaj pli proksima...

Sur la ŝoseo aperis turkoj. Joĉjo ektremis...

– Ibro! – diris li al Jovano.

– Silentu! – diris Stanko, sed koro lia ekbategis kiam li vidis Lazaron.

La turkoj rajdis senzorge. Ili estis for de la penso ke tie troviĝas embusko. Tiam ili aperis meze de la embusko...

Kvazaŭ tero ekkrakegus... La unua salvo tondre trafis la turkojn. Ili haltis stupore...

Stanko rekonsciiĝis. Kvazaŭ oni flustrus al li, kion li devas fari... Tute ne pensinte ĝis tiam pri tia ordono, li ekkriis, kaj voĉo lia resonis tra la arbejo:

– La ponardojn!...

La arbustaro reviviĝis. La turkoj kvazaŭ perdus spirtiĉeeston, ili kvazaŭ ŝtoniĝus. La ribelantoj altiradis ilin desur la ĉevaloj, buĉis ilin kiel ŝafidojn...

Joĉjo alkuris al Ibro; Jovano sekvis lin kiel ombro.

– Haltu, perfortulo...

Ili deĉevaligis lin.

La turko tute ne kapablis moviĝi. Ili atakis lin, ponardante liajn brakoj kaj krurojn.

Stanko enkuris inter la turkojn, renversante ilin...

Post unu momento la ŝoseo iĝis buĉejo... Kapoj ruliĝis sur la ŝoseo kiel kukurboj, kies stolonoj sekiĝis... Vekrioj eĥis tra la arbejo... La hajdukoj vadis tra flakoj de koaguluĝinta sango...

Ĉio ĉi estis okazanta tiel rapide, ke al ĉiuj ŝajnis ke pasis nur unu momento.

La turkoj rekonciiĝis, sed malfrue... Ili komencis fuĝi, transsaltante la kadavrojn de siaj kamaradoj... La ribelantoj mortigadis ilin per pafiloj...

Stanko rigardadis tien kaj ĉi tien. Liaj okuloj serĉis iun, sed tiu ne estis inter la kadavroj. Li vidis Jovanon kaj Joĉjon brakumantaj unu la alian, ili surponardigis fortranĉitan kapon, kaj ridis. Tio estis la kapo de Ibro.

– Ho, estro! – diris Joĉjo. – De nun mi celebros la hodiaŭan tagon.

– Ankaŭ mi – diris Jovano.

– Ĉu Lazaro forkuris? – demandis Stanko.

– Evidente.

– Li ne povos forkuri! – diris Stanko, dum liaj lipoj tremis. – Kunfrato! Surepo! Zaverzano!... Ek, sekvu min!...

– Ĉu ni ne iros? – demandis Jovano kaj Joĉjo.

– Tio estus tro multe!

– Neniam estas tro multe da kunuloj! – ekkriis Joĉjo.

– Tiukaze... mi ne malpermesos!...

La popo Milojo alpaŝis.

– Kien vi iras sen ni? Kun kiu ni iros?

– Jen Nogiĉo kaj Katiĉo, ili gvidu vin. Mi ankoraŭ ne plenumis mian devon... Vi iru, je la nomo de Dio, kaj ribeligu la homojn en ĉiuj vilaĝoj...

– Sed kion vi faros? Ĉu vi ne iros kun ni?

– Mi estas venĝanto. La voto bruligas mian animon!... Ankaŭ mia sovaĝa koro postulas venĝon!...

Apartiĝinte de la ribelantoj, la hajdukoj alpaŝis Stankon.

– Ni volas kun vi!... – ekkriis ili.

– Bone!... Katiĉo!... Kunprenu la fratojn... Trovu la ĉefpopon Smiljaniĉon, mastron Stojanon el Noĉajo, ribeligu tie la popolon. Kiam vi ekbezonos helpoj – ni estos pretaj; Kamelo nin trovos!... Nun – adiaŭ!...

Tiam, kisinte la manojn de la patro kaj popo, li malaperis en bosko kun la kunularo.

## 23. TIMEMULO

Nokto estis malleviĝinta tre rapide, ĉar nuboj de okcidento tegis la ĉielon. Jenjene ekbrilis kaj forbruis fulmo: ŝtormego estis pretiĝanta.

Ivano estis tre ekscitita. Cent fojojn li elkuris sur la ŝoseon, staris tie, fiksaŭskultis; li eĉ nelonge kuŝiĝis sur la teron, por aŭdi ĉevalan klakbruon... Tamen, same kiel antaŭ tio – li aŭdis nenion. Post tio li revenadis hejmen plena da malbonhumoro, bruskante kaj kriante al samdomanoj, al virinoj, eĉ al la gajaj infanetojn...

Tamen, en la domo li ne povis esti kvieta, tial li eliris en fruktarbejon, kaj de tie kun rigardo plena da malico okulis la domon de Alekso:

– Jen, venis fino al via latino, fripono maljunaĉa! – parolis li tra la dentoj. – Jam ĉi-nokte ruĝa virkoko aperos sur via tegmento... Vi ĉiuj forbrulos kiel musoj. Se iu volos eliri, pafilo revenigos tiun en la flamon!... Post tio, morgaŭ frumatene, mi trovos ankaŭ la neston hajdukan!... Ĉiujn, absolute ĉiujn mi ekstermos, la kapon de tiu hundaĉo mi propramane forhakos!...

Li estis sentanta hororan malamon... Li ne sciis kiel tiu malamo aperis, sed ĝi estas tie, ĝi bolas en lia brusto kiel lakto sur fajro...

Tamen, jam noktiĝis, sed Lazaro ne venis.

Li komencis senti timon. Kio povis okazi al Lazaro? Ĉu li vere ekiris el Ŝabaco? Eble la turkoj ne ekiris hodiaŭ?... Tamen, kial li ne alvenis, kial li almenaŭ ne sendis iun ajn mesaĝon?...

Eble li jam ĉi-matene ie renkontiĝis kun Stanko?...

Koro lia hide ekbategis. Lin plenigis malbona antaŭsento. Ĝis tiam li pensis pri ĉio alia, sed nun li pensis nur pri Lazaro...

– Eble ili renkontiĝis, eble li pereis! – ekpensis Ivano. Tiu terura penso disŝiris lian koron kiel kotontukon. Timtremo trakaptis lin, de la kapo ĝis la piedoj.

– Ho, tio ne povis okazi! – ekkriis li.

Tiam li ekkuris el la domo.

Komenciĝis ŝtormego... Fulmoj skurĝis la nigran ĉielon kiel ardaj ŝnuroj, dum tondrado eĥis tra la arbejo... Timo plenigis Ivanon. La vetero enverŝis ankoraŭ pli teruran antaŭsenton en lian animon.

Paŝante nudkapa antaŭ la domo, li fiksaŭskultis. Post ĉiu susuro li ektremis kaj fiksaŭskultis... Tamen, neniu estis tie.

– Jen, mi estas kulpa, mi, fiĉevalo maljunaĉa! Kial mi sendis la infanon plenumi tian taskon?... Mi mem devis foriri, lin mi devis lasi hejme!... Jes, sed mi volis mastri! Se oni havas fajroprenilon – kial oni brulvundu la manojn?!... Jen kio okazis!!... – Nun mi gapu!...

Komenciĝis pluvo. Grandaj falantaj gutoj aspergis lian grizan hararon... Pli instinkte ol sentante bezonon kaŝiĝi de la pluvo, li eniris la domon.

La domanaro estis staranta senvorte ĉirkaŭ la fajrejo. Neniun alrigardinte, li sidiĝis sur sian lokon.

Regis silento. Kvazaŭ neniu spirus. Aŭdiĝis tondrado kaj pluvgutoj, kiu frapadis la lignan tegmenton.

Abrupte ekblovis ŝtormego, timiga kiel se tio estus la mondofino...

Subite malfermiĝis ambaŭ pordoj de la domo; vento kurbigis la flamon en la fajrejo. Ĉiuj ektremis kaj konsterniĝis... Tra la pordo emerĝis tuboj de pafiloj.

Tio daŭris unu momenton, post kio sur la sojlo aperis Stanko. Okuloj liaj fulme flagris, dum satana rideto dancis sur liaj lipoj.

– Jen kie vi estas, maljuna vulpaĉo, en via kavo! – diris li per voĉo resonanta kiel tondrado.

Ivano ekstaris kaj rigidiĝis.

Unu momenton ĉiuj restis ŝtoniĝintaj, sed post tio lavirinoj kaj infanoj komencis kriĉi kaj vekrii.

Poste ĉiuj eksilentis...

– Mi meditis – diris Stanko alpaŝante al Ivano – kiamaniere mortigi vin... Sed mi ne povus decidi sen via konsilo!... Ĉi-vespere, en fruktarbejo, vi diris ke vi cindrigos la domon de mia patro. Nu, bone – mi alportis ĝin al vi!... Vi diris: „Ĉiuj forbrulu kiel musoj!...“ Nu, bone – nun vi tion spertos!...

La genuoj de Ivano ektremis; li falegis sur la teron.

– Ne faru tion, je la nomo de dio! – ekkriis li...

Stanko laŭte ekridis:

– Ho Dio, vi vere frenezas, Ivano!... Ĉu mi, mi Stanko Aleksiĉo, pardonu al vi?... Ĉu mi pardonu al vi ankaŭ la forgeskelon de Piro!... Vane vi tentas, mi ne konsentos!

– Tamen...

– Silentu! – ekkriegis Stanko. – Tamen, jen, mi ne estos tia, kia vi estas. Jen, rigardu!...

Post tio li turniĝis al la domanaro.

– Arigu la infanojn, kaj iru for! Foriru kien vi volas!... Hastu!...

Ĉiuj obeis senproteste... Post unu momento la domo restis malplena. Stanko turniĝis al Ivano.

– Jen, mi estas pli bonkora ol vi! Kontraŭ mi kulpis nek la aliaj viaj filoj, nek la inoj, nek infanoj. Kontraŭ mi kulpis vi kaj via Lazaro... Vin mi koler-regalos!...

Aŭdinte la nomon de Lazaro, Ivano rekonsciiĝis.

– Sed kie estas Lazaro?

– Ĉar mi ne havas ŝafojn, ankaŭ hundon mi ne gardas! Vi mem scias kien vi lin sendis.

Ivano antaŭ li genufleksis kaj kunmetis la manojn:

– Kiel dion mi petas vin, diru, ĉu vi mortigis lin?

– Ankoraŭ ne, sed mi mortigos lin!... Mi mortigos lin, samkiel mi nun mortigos ankaŭ vin!...

Ivano ĉirkaubrakis liajn genuojn. Li verŝis larmojn, verŝis ilin kiel infano.

– Stanko!... Infano mia!... Filo mia!... Mi ŝercis kun vi kiam vi estis infano!... Mi vin malgrandan lulis sur miaj genuoj!... Mi vin... mi vin ankaŭ nuntempe amas kiel mian infanon!... Ne faru tion!... Ne peku kontraŭ mortonto kaj kontraŭ sia la plej bona amiko!... Jen, mi oĉjo Ivano, petas vin, kiel ĉiopovan dion!... Pardonu!...

Stanko sentis naŭzon. Ĉi tiu homo iam estis fiera... Li opiniis, ke Ivano estas bravulo, bienestro, ke li scias nur ordonadi... Sed nun, vidante lin tiel klinita, larmojn verŝanta, tordiĝanta kiel vermo antaŭ liaj piedoj... nun ĉio malaperis... Li planis venĝi al krimulo, sed nun li vidis timemulon. Li forturnis la kapon, kaj kraĉis...

– Ĉu vi ne hontas?... Vi eĉ pafkuglon ne meritis!... Tiam li ekkriis:

– Zaverzano!... Ek!...

Post tio li turniĝis kaj eliris. Ivano genuire sekvis lin. Li kisis la piedojn kaj la lokojn kie Stanko staris.

– Stanko!... Filo mia!...

– Ne nomu min tiel!... Mi ja ne estas via filo! – ekflagris Stanko.

– Sed mi amas vin!... Mi vin nomas tiel pro amo!...

– Kia amo?... Mi malpermesas al vi uzi eĉ mian propran nomon – ĉar, mi ĵuras per la Dio kaj animo, ankaŭ tiun nomon mi komencos amalami!...

Densa fumo ektorentis en la domon...

Kiam Ivano tion rimarkis, li ekkriegis, kiel se oni lin senhaŭtigus...

– Ĉu vi volas bruligi min?!

– Tion mi jam faris!... Rigardu!... Vidu kiel flamo penetras tra la ŝindo!...

Ivano estis brakumonta liajn genuojn, sed Stanko per rigardo haltigis lin.

– Se vi ekmoviĝos, se vi eĉ la kapon vidigos ekstere, tridek pafkugloj diserigos vian kapon... Kaj tiam mi vin denove en la flamon ĵetos!...

Fumo estis pli kaj pli densa. Ruĝa flamo penetris tra ligna tegmento, post kio komenciĝis krakado kaj knalado.

Retiriĝinte kelkajn paŝojn, Stanko haltis sur la sojlo... Li ĵetis rigardon al la tegmento, kie ŝtormo estis kurbiganta la flamon, kurbiganta ĝin ĉiuflanken, pro kio la flamo bruligis ankaŭ alian konstruaĵon, kiu troviĝis proksime al la domo...

La situacio de Ivano estis horora. Li ne kuraĝis ekkuri al la pafiloj. Rigardante al la malfermita pordo li vidis la terurajn homojn starantaj antaŭ li kun pafpretaj pafiloj, senvortaj kaj senemociaj kiel morto... Li ne aŭdacis ekmoviĝi...

La domo pleniĝis de fumo, kiu komencis sufoki lin... Li ekkuregis al la pordo, sed la forta mano de Leĉjo reĵetis lin kiel saketon... Li komencis peti, petegi; li petis ke oni permesu al li almenaŭ peti pardonon de Stanko... Li konfesis sian kulpon, li estis konfesanta ĉion, ĉion, kvankam neniu demandis lin pri io ajn ...

La flamo konkeris la tutan domon. Eĉ se oni verŝusputoplenon sur la domon – tio domon ne savus. Ivano estis sufokiĝanta, singultanta, tusanta; finfine li senfortiĝis, genuoj liaj ektremis... Li sentis ke li estas svenonta.

– Lasu min! – li ekkriĉis kaj ekkuregis.

Tamen la forta mano de Leĉjo denove reĵetis lin.

– Fermu la pordon kaj atentu! – ordonis Stanko...

Ili faris tion.Post kelkaj momentoj el la domo ektorentis densa, nigra fumo... Pli kaj pli blanka, ĝi fine transformiĝis en flamon, kiu kovris ankaŭ la murojn.

La hajdukoj formoviĝis... Jam post kelkaj momentoj la finbrulinta tegmento enfalis la domon.

Suprenlevinte la kapon, Stanko diris:

– Ho Sinjoro!... Vi estas Dio, vi indulgu!... Mi estas homo – mi venĝas! Ankoraŭ unu staras sur la kruroj, tiu ankoraŭ estas viva... Ho Dio, helpu min ankaŭ kun li kvitiĝi!...

Post tio li turniĝis al la hajdukoj...

– Ek, fratoj miaj!

Post tio li ekiris antaŭ ili.

## 24. KORO KONTENTAS

Lazaro sukcesis fuĝi dum la batalo sur Ĵuravo. Kelkaj atakintoj ekkuregis post li, aŭdiĝis ankaŭ kelkaj pafiloj, sed neniu pafkuglo tuŝis lin. Li fidis al la rapideco de sia verdĉevalo – kaj ne eraris: la ĉevalo savis lin eĉ de akra sabro.

Atinginte arbetejon, li daŭrigis la rajdadon. Li kliniĝis sur ĉevalo, por kebranĉo ne hoku kaj faligu lin... La ĉevalo lin portis...

Antaŭ liaj okuloj senĉese hantis la fiera figuro de Stanko; en liaj oreloj ankoraŭ zumis la tondrosimila ekkrio: „Ponardojn!...“ Li ne povis rekonsciiĝi...

Ankaŭ antaŭe li timis Stankon, sed nun eĉ memoro pri la nomo de Stanko paralizis lin. Li antaŭsentis grandan malfeliĉon, ke li baldaŭ restos sen la kapo... Li sentis malvarman, akran feron sub sia gorĝo, tial li volis fuĝi de ĉio ĉi...

Jes, li li volis, sed la ĉevaleto ne plu povis. La nobla besto estis ŝaŭmkovrita, ĝiaj lumboj terure ŝveliĝis... Vane akra piedingo sangigis ĝiajn lumbojn – la ĉevalo jam ne povis moviĝi.

– Ĉu ankaŭ vi perfidis min, ĉevalĉjo?... – diris malgaje Lazaro, haltigis ĝin, kaj deĉevaliĝis...

La ĉevalo alrigardis lin ĉagrene. Al Lazaro ekŝajnis ke li vidis larmon en ĝiaj okuloj, tial li ekkaresis ĝian frunton kaj kolon.

– Ĉu vi kompatas vian nutranton?... Mi bredis vin de infanaĝo!...

Puŝinte la gvidrimenojn sub antaŭselon, li kuŝiĝis sur la teron por fiksaŭskulti.

La tero bruegis... Tiu bruego resonis en lia animo.

Tiam li rekonsciiĝis.

– Ili estas malproksime! – diris li. – Tamen, kiu povas fuĝi de hajdukoj?... Kiu konas iliajn vojojn?... Kien mi nun iru?... Ĉu mi iru hejmen?... Jes, plej bone estus iri hejmen...

Li preskaŭ decidis.

Sed tiam lian kapon trafluis penso:

– Ne, ne! Tie Stanko vin sendubepli facile trovos!...

Li ektremis pro tiu penso.

– Mi ne iros hejmen!... Mi vagos tra la arbaro... Mi facile povas hejmen foriri, kiam la tohuvabohuo kvietiĝos... Mi iros kaŝe. Mi esperas ke ĉi tia situacio ne restos eterne!... Kiam la turkoj leviĝos, ili dispelos ilin kiel paserojn...

Tiu penso lin konsolis, kaj li iomete kvietiĝis. Sidiĝinte sur herbon, li meditis, sed liaj pensoj estis senordaj: ili flugis de unu al alia afero,, kiel buntaj papilioj...

Folioj susuris facile super li... Li etendiĝis surherbe, aŭskultante kiel la ĉevalo ronĝas; kaj tio dormemigis lin.

Li ekdormis...

Dome (?) homo sekvis hufosignojn de lia ĉevalo... Alveninte kaj vidinte Lazaron dormanta, li nur kapneis:

– Ve al vi, ho Lazaro!... Vi en arbaron de hajdukoj volas fuĝi!...

Turninte la kapon, li ĉirkaŭrugardis kaj kaŝiĝis en sekbranĉejon...

Tio estis Kamelo. Nur li vidis kiam Lazaro forfuĝis. Tiam li komencis sekvi Lazaron. Li kuregis komence rapide kiel ĉevalo, sed kompreninte ke li ne povas kuri ĉevalrapide, li haltis.

– Mi vere estas stultulo! – diris li. – Jen hufosignoj! Mi trovos lin – eĉ se li fuĝos en la ĉielon!...

Post tio li ekiris malrapide...

Malantaŭ la sekbranĉejo li ekvidis Lazaron... Juna, sana, li povis esti digna kaj fiera, sed jen, li iĝis perfidulo.

– Ĉu mi mortigu lin?... – pripensadis Kamelo. – Ho, ne!... Tion Stanko neniam pardonus al mi!... Sufiĉas ke mi atentu ke Lazaro ne malaperu... Nur unu aferon mi ne permesos al li! Mi ne permesos ke li foriru al la turkoj... Ĉar se li ekiros tien, mi ĵuras per la nomo de Kristo, mi mortigos lin!...

Tagmezo jam estis pasinta, kiam Lazaro vekiĝis. Li dormis firme, eĉ ne unu fojon turniĝinte...

Li leviĝis kaj eksidis... La dormo lin sufiĉe refreŝigis. Li pripensadis kien iri.

– Ĉi tie mi ne estas sekura! – parolis li preskaŭ laŭte. – De ĉi tie mi devas foriri, ĉar ankaŭ li povas uzi ĉi tiun vojon!... Mi iru ien for... pli proksime al Savao...

Tiam li leviĝis... Li alpaŝis la ĉevalon, surmetis la bridrimenon, kiun la ĉevalo mem demetis desur la kapo, ĉar la mastro tion forgesis, kaptis la gvidrimenojn, kaj irigis la ĉevalon malrapide tra la arbaro.

Tuj kiam li iomete foriĝis, Kamelo leviĝis el sia embusko. Li ekgratis sian postorelon.

– Nu bone, mi sekvos vin – diris li – por ke vi ne estu sola.

Li ekiris malantaŭ Lazaro malrapide kiel kato, treniĝante de unu al alia arbusto...

Pasis kelkaj tagoj depost la batalo... Stanko estis en Paraŝnico. Lia kunularo ĉiutage kreskis... Ĉiu novulo rakontis ke la homoj leviĝas, forlasas la domojn

kaj plugilojn, iras aŭ al Ĉupiĉo, aŭ al Katiĉo, aŭ al la ĉefpopo Smiljaniĉo, aŭ al Ilijo Serdano...

La turkoj tamen silentis. Neniu alvenis el Ŝabaco, neniu alvenis el Bosnio, kvazaŭ ili ne tre funebris siajn pereintajn fratojn. Zaverzano ŝercis:

– Tiuj, kiujn ni senvivigis. sendube ne estis tre valoraj!... Kion vi opinias, Surepo?

Surepo nur levis la ŝultrojn.

– Aŭ ili ĉiuj estis senhejmuloj, pro kio la turkoj pensas: estas eĉ bone ke ni liberiĝis de ili!...

La hajdukoj ekridis.

– Estus bone se ni ĉiun tagon mortbatus tiom da ulaĉoj! – diris Nogiĉo.

– Vi ja volus ekstermi la turkan genton!... Kiamaniere vi tion faros, ili ĉiuj havas almenaŭ kvin edzinojn!... Se ĉiu el ili naskos unu filon, turkoj jam nenombreblos!... Se mi batas, mi volas bati nur paŝaoj, vezirojn, aŭ almenaŭ bejojn!... Tiam oni havas ankaŭ utilon; ne vane oni malpurigas la manojn. Jen nun, nenion ni havigis.. Antaŭ kelkaj tagoj mi renversis dekon da ili, sed – nenion mi havigis!... – diris Zaverzano kaj montris la signon de nenihavo...

– Vi pensas nur pri poŝmono! – diris Latkoviĉo.

– Kaj vi, kion vi volas, Plumpĉjo?... Vi ĝojegas, ĉar vi surpikis la turkan kukurbon sur ponardon!...

– Mi ja pro tio venis en la monton!... Por mi nun morti estas kiel trinki glutaĵon da brando!... Mi jam venĝis al li.

Stanko alpaŝis la kunularon.

– Oni havigu ŝafidon... Morgaŭ estas Tago antaŭ Petra fasto – diris li.

– Ho, mi ja forgesis! – diris Zaverzano.

Li leviĝis kaj kun Jovano kaj Joĉjo foriris trovi ŝafidojn.

Tago antaŭ Petra fasto en la 1806a jaro estis dimanĉo, la 27an de majo. La tago estis bela, varma; venteto zefiris. La hajdukoj okupiĝis pri bakaĵoj...

Abrupte aperis Kamelo.

Stanko sidis sur trunko interparolante kun Nogiĉo. Ekvidinte Kamelon, li tuj saltis.

– Ĉu vi min serĉas?

– Vin! – diris Kamelo ekridetonte.

– Ĉu vi havas bonan novaĵon?

– Vi aŭdos.

Li forkondukis Stankon flanken...

Kiam Stanko revenis al la hajdukaro, liaj okuloj brilis.

– Nogiĉo! – diris li.

– Jen mi.

– Zorgu pri la homoj. Mi foriros, sed mi tuj revenos. Se mi ne alvenos ĝis kiam vi manĝmetos la ŝafidojn, vi tagmanĝu. Iom da viando lasu por mi, ke ankaŭ mi manĝetu.

– Tamen, kien vi iras, ho estro?...

– Mi iras plenumi mian devon.

– Ĉu iru ankoraŭ iu el ni?...

– Mi ne bezonas tion! Mian devon plenumos mi sola... Adiaŭ!

– Adiaŭ al vi!...

Stanko haste prenis la pafilon kun ornamita kolbo, zonis kartoĉbendon, kaj enboskiĝis.

Koro lia batadis tempeste, abrupte; ĝi puŝadis lin agi pli rapide. Li sentis flugilojn sur la piedoj: li ne iris, sed flugis...

– Ho, ĉu Dio ankaŭ tion destinis al mi!... Mi estas freneza pro ĝojo!...

Li hastis tiom, kiom li povis.

– Sur lia herbejo mi lin trovos – tion diris al mi Kamelo. – Tie li estas!... Li ripozigas la ĉevalon; li volas por ĝi falĉi iom da herbo, poste li iros rekte al Ŝabaco por denove venigi turkojn!... Nun mi ĵuras, ho Lazaro! Se mia okulo hodiaŭ vin vidos – vi neniam plu vidos kalvan verton!... Mi vin ne plu lasos viva!...

Ju pli li proksimiĝis al la loko, kiun Kamelo indikis, des pli lin travibrigis tremado!...

Stanko finfine alvenis... Li ekvidis Lazaron falĉantam kvankam estis la sankta dimanĉo... La pafilon li pendigis sur pirarbon, la pistolojn kaj ponardon li metis en ombron.

Tremante, Stanko traŝoviĝis tra densejo, kaj atingis la pirarbon. Alveninte, li per tremanta mano dekroĉis la pafilon...

Li atendis kelkajn momentojn, post kio li rekonsciiĝis kaj kvietiĝis...

Li pripensadis kaŝita malantaŭ la trunko. Li deziris ke Lazaro sentu la hororegon antaŭ la morto, ke li suferu pro okazonta venĝo...

Stanko denove etendis la pafilon – lia mano estis kvieta. Elirinte sur la herbejon, li observis Lazaron falĉanta...

Tiam li ekkriis:

– Ho Lazaro Maraĵĝiĉo!

Voĉo lia resonis, la kverkarbejo resendis liajn vortojn.

Lazaro turniĝis kaj senmoviĝis.

Stanko tute proksimiĝis al Lazaro. Li haltis kaj alrigardis rekte en ties okulojn.

– Kion do ni faru nun? – demandis li. Lazaro mutiĝis. La rigardo de Stanko ŝtonigis lin. Stanko ekvolis ludi kun li kiel kato kun muso.

– Nu, plejamiko, kial vi ne respondas?... – Kio okazas kun vi? Kial vi ŝtoniĝis?... Kial vi timas min? Ni kune kreskis... Ni el sama ujo sorbtrinkis;

ni kiel fratoj zorgis unu pri la alia... Diru almenaŭ pro kio vi tiel ekmalamis min?... Jes, diru!

Lazaro iomete rekonsciiĝis. Li aŭdis ĉi tiujn kvietajn vortojn... Li atendis tondron, sed ĉio estis kvieta. Li ekpensis ke li trompos Stankon, ke li povos mensogi lin... Li alrugardis la okulojn de Stanko bonkore, eĉ larmoj aperis sur lia vizaĝo.

– Nu... oni malamikigis nin!... – diris Lazaro.

– Malamikigis!

– Jes!... Tiu Marinko, animo lia paradizon ne vidu!... Li estas kulpa pri ĉio. Li kaj la turkaĉo!... Piro!...

– Ĉu! Sed kiel?...

– Kiel? – Ne demandu!... Mi amis Jelican. Sed kiam mi vidis ke ŝi vin amas – mi preskaŭ freneziĝis!... Tiu Marinko – kvazaŭ diablo ĵetis lin antaŭ min, komencis paroli al mi sensencaĵojn... kaj mi malnormaliĝis!... Mi pentis, sed estis malfrue... Mi volis serĉi vin, sed mi ne kuraĝis!... Poste... diablo forportis ĉion...

Stanko kapneis kaj diris:

– Ho, frato mia!... Kio poste okazis?

– Poste... poste ni komencis fari malbonaĵojn ambaŭflanke. Oĉjo Alekso kaj paĉjo unuflanke, sed ankaŭ min ekregis diablo...

– Do, vi tute ne estas kulpa?

– Mi ĵuras per miaj okuloj, mi ne estas kulpa!

– Sed kial vi almenaŭ ne sendis al mi mesaĝon, ke mi sciu?...

– Mi ne sciis kiamaniere fari tion!

– Nu... tio sonas kiel vero! ... Tamen, tiufoje, kiam mi haltigis vin, kial vi ne diris al mi tion?

– Mi timis!

– Nu, ĉio ĉi ne estas bona!... Jen kio okazis post tioma amo!... Povra oĉjo Ivano... Ĉu vi aŭdis kio okazis kun li?

Lazaro komencis verŝi larmojn.

Stanko komencis sovaĝe ridi. Lazaron, kiu jam komencis senstreĉiĝi, tiu rido mirtimigis. Li alrigardis Stankon.

– Tia estas la sorto de ĉiuj perfiduloj! – ektondris Stanko, dum okuloj liaj ekfulmis. – Tia devas esti la sorto de ĉiuj, kiuj gvidas nekristanojn kontraŭ kristanoj! Ankaŭ via mortkondamno estas preta, ho, Lazaro Maraĵĝiĉo!...

Lazaro time rigidiĝis.

– Ne faru tion, mi petas...

– Mutu! Ĉu vi pensis ke mi indulgis vin?... Ĉu vi pensis ke vi povas trompi min?... Ĉi tiu tempero por mi estas pli grava ol mil jaroj da vivo!... Via nuna tordiĝo antaŭ mi, tio estas pago por miaj dormomankaj noktoj, sed nun – nun vi pagos ankaŭ por viaj fiagoj!...

Tiam li demetis la pafilon de Lazaro, kiun li estis pendiginta sur la maldekstran ŝultron, flankenmetinte sian pafilon.

– For!... – diris li, kaj Lazaro retropaŝis kelkajn paŝojn. – Haltu! Tuj haltu!...

Lazaro rigidiĝis kiel statuo.

– Nun, kiam vi estos tie, salutu vian paĉjon, Marinkon, kaj ankaŭ la belan agaon Piron!... Diru al ili, ke mi irigis vin al ili!

La ellasilo ekklakis... Ŝvito aperis sur la haŭto de Lazaro...,

– Mi ĵuris antaŭ via patro kaj honestaj maljunuloj ke vian kapon mi tri fojojn ruligos!... Jen, mi tion faros nun!... – Halt!...

Li etendis la pafilon kaj ektiris la ĉanon... Lazaro renversiĝis.

Stanko alproksimiĝis. La pafaĵo trafis la maldekstran submamon de Lazaro.

Stanko premis per la piedo la lian bruston. Sangofluo elŝprucis...

Stanko eltiris la ponardon, fortranĉis lian kapon, ĵetis ĝin, kaj ĝi desaltis kelkajn fojojn... Li faris tion ankoraŭ du fojojn, tiam la armilojn de Lazaro li lasis apud la senkapigita korpo...

Rapidmove preninte sian pafilon desur la tero, li ekkriis:

– Ho dio!... dankon al vi!... Kaj nun – la turkoj, ve al vi!...

Tiam li ekkantis:

Iras Stanko tra bosko kantante;
Lazar restis sur kampo kuŝante;
Lazar restis sur kampo grandega,
Lin bekpikas korvoj kaj kriagloj...

## 25. BATALO EN FARMBIENO

Li revenis ĝustatempe. La ŝafidojn oni jam manĝmetis. La kunularo lin atendis kaj salutis. Ekrigardinte lin rekte en la okulojn, Zaverzano diris:

– Vi estas gaja, ho estro!

– Dio gajigis min!... Hodiaŭ mi demetis la ŝarĝon de mia animo.

– Do, vi mortigis Lazaron!

– Mi mortigis lin! Dankon al Sinjoro por lia donaco!... Mi ne kantis de la tago kiam mi aliĝis al vi, ĝis la hodiaŭa tago, sed hodiaŭ mi kantis tutkore!...

– Rakontu ja kiel vi moritgis lin! – aŭdiĝis krioj de ĉiuj flankoj.

– Mi rakontos!... Tio estos mia la plej kara rakonto kiun mi ĝis nun rakontis!...

Ili ĉiuj sidiĝis en la saman ombron, post kio li rakontis la tutan okazaĵon... La hajdukoj aŭskultis kun la plej granda atento... Fojfoje ili interrompadis la rakonton per ekkrioj.

– Oho-ho!

Kiam la rakonto estis finita, Zaverzano diris;

– Mi gratulegas vin! Ĉion vidigas ankaŭ viaj manoj, ili estas sangokovritaj.

– Verŝu akvon, ke mi lavu la manojn, post tio ni tagmanĝos! – diris Stanko.

Preninte kukurbon, Zaverzano surverŝis liajn manojn...

Ĉiuj tagmanĝis ĝue. Stanko estis gaja kiel neniam antaŭe. Lia gajeco ĝojigis ĉiujn. Zaverzano konstruadis tiajn ŝercojn, ke oni devis fuĝi...

Surteriĝis serena, sensona nokto. Stanko sterniĝis sur verdan herbon, rigardis ĉielon, sentante faciliĝon en la animo... Li endormiĝis kiel infano. Li dormis trankvile, kviete kaj senzorge, kvazaŭ li finkonstruus templon.

Elkrepuskiĝis serena kaj bela tago. La hajdukoj sidis purigante la armilojn. Stanko interparolis kun Surepo... Jam tute tagiĝis...

Abrupte aŭdiĝis pafila pafado, ne proksime, sed ie fore.

Ĉiuj eksaltis.

– Kio okazas? – demandis Stanko. Vidinte ke ĉiuj interŝanĝas demandoplenajn rigardojn, li diris al Zaverzano:

– Surgrimpu la poplon por vidi kio okazas.

Zaverzano supriĝis kiel kato sur arbotrunkon. Pasis kelkaj momentoj en plena silento.

– Batalo! – diris li.

– Kie? – demandis Stanko.

– Ĉirkaŭ la farmbieno de Ali-agao.

– Kia batalo?

– Inter la niaj kaj turkoj.

– Oho!... Do, la ribelantoj amasiĝis.

– Je Dio, tio estas serioza batalo.

– Malsuprengrimu.

Tiumomente subite aperis Kamelo.

– Nu, kio estas? – demandis Stanko lin.

– Rapidu... Ili batalas. Turkoj atakis el Badovinaco, transiris Sablobordon, forkaptis brutojn el Glogovaco kaj Sovljako, ekpelis ilin en Bosnion. Mi tion tuj sciigis al Ĉupiĉo, kiu estis ĉe Eriĉo en Metkoviĉo, post kio li tuj ekkuris, kaj... jen kio okazas... Mi venis por ankaŭ vin sciigi!... Rapidu!...

Stanko prenis la pafilon kun ornamita kolbo, kaj ekkriis:

– Ek!

Ĉiuj tujtuje estis pretaj, kaj ekiris.

Stanko pripensadis kiun lokon estus plej bone uzi por ataki. Li deziris ke lian atakon oni prikantu. Li punis la punindulon, li venĝis, nun li deziris iom da gloro...

Li ekiris al Podinoj.

– Diru, Kamelo! – elbuŝigis li. – Kiom da turkoj estas tie?

– Je Dio, multe. Ili havas ankaŭ tranĉeon; ĝin ili fosis ĉi-nokte...

– Ĉu ili estas pli multenombraj ol la niaj?

– Jes, estas..

– Halt! – diris li al la kunularo.

Post tio li sugrimpis kverkon, desur kiu estis videbla la batalo... Atente observinte la sutuacion, li ekridetis kaj descendis desur la arbo.

– Ek,' nun! – diris li kaj ekiris haste.

Aŭdiĝis paŝoj kaj klakado de kartoĉbendoj...

Inter arbotrunkoj jam estis videbla la maldensejo kiu nomiĝis Farmbiena kampo... Fumo ĉirkaŭvolvis la kampon, sed la okuloj de la hajdukoj eĉ tra ĝia denso povis vidi ombrojn, kurantaj tien kaj ĉi tien...

– Ĉu ni eku, ho estro? – demandis Zaverzano.

– Ne... Nur post mi!...

Li venigis ilin al la fino de densejo, kiu lange penetris en la kampon. Tie li rapide organizis embuskejojn, kaj komencis observi la batalon...

Liaj okuloj alkutimiĝis rigardi en mallumo. Li vidis batalon, teruran, senesperan. La turkoj estis retiriĝantaj, sed paŝon post paŝo. Ili iris returne al la tranĉeo, kiun ili konstruis tiunokte.

Stanko pripensadis: ĉu ataki tuj, aŭ ankoraŭ atendi?... Li ne dubis pri venko, sed li deziris venkon perfektan, venkon post kiu restos eĉ ne heroldo, kiu forkuros por rakonti al la turkoj pri la malvenko.

Abrupte io eksplodis... Ektorentis blanka fumo, post kio aŭdiĝis knalo. Tio okazis en la tranĉeo.

– Kio okazas? – demandis hajdukoj.

– La niaj bruligis turkan pafaĵprovizon! – diris Nogiĉo.

– Jes, jes!... Rigardu! – ekkriis hajdukoj. Komenciĝis tohuvabohuo. La malrapida retiriĝo transformiĝis en fuĝadon. Anstataŭ retiriĝi suden, al Badovinco, la turkoj kuris rekte okcidenten, al Drino, hastante kiel eble pli rapide atingi Bosnion.

Ĉi tiu tohuvabohuo kaj fuĝado estis ĝuste tio, kion Stanko atendis. Li plengorĝe ekridis, kaj diris per plena voĉo:

– Dio estas nia plejamiko!... Li ĉion plej bone organizis!...

Turniĝinte al la kunularo, li diris ordone...

– Kvietu!... Neniu ekpafu antaŭ mia pafilo! Ĉiuj atente rigardu!... Post la pafaro eltiru la ponardojn. Estus peko malŝpari pulvon sen bezono. – Nun ĉiuj iru sur sian lokon kaj... mutu!...

La turkoj fuĝis ne ĉirkaŭrigardante, dum serboj postkuris ilin. La hajdukoj jam povis vidi la timoplenajn vizaĝojn de turkoj. Stanko permesis ke ili ankoraŭ pli proksimiĝu. Li alcelis kaj ekpafis al unu el la turkoj... Sekvis pafaro...

La turkoj haltis stupore... La hajdukoj elsaltus kun elingitaj ponardoj, kiel lupoj!... Komenciĝis vekriado kaj ŝrikado... Stanko trapenetris turkajn vicojn, faligante fuĝantojn ĉirkaŭ si samkiel lerta falĉisto faligas verdan herbon...

Ankaŭ la serboj haltis surprizitaj...

Dume la hajdukoj plenumadis sian planon... Kadavroj turkaj faladis ĉirkaŭ ili kiel putraj piroj. Stanko kuris ĉiuflanken. Lia jatagano fulmis sub liaj suprenvolvitaj manikoj...

– Ne permesu!... – ekkriis iu.

Turko sur bona hufulo trakuris, dispremante kadavrojn de siaj fratoj. Lin persekutis Stojano Ĉupiĉo mem, sed la turko atingis vepraron kaj malaperis en densejo.

La restintaj turkoj disfuĝis diversflanken. La hajdukoj ekkuregis post, mortigante ĉiujn senescepte...

Sur la batalkampo restis nur serboj. La batalo estis finita...

Ĉupiĉo alrajdis sur sia nigra ĉevalo.

– Kies taĉmento estis tio? – demandis Ĉupiĉo.

– Mia! – respondis Stanko fiere. Ĉupiĉo deĉevaliĝis.

– Venu, bravulo, ni interkisu!... Gratulon al vi kaj al la serbino kiu vin mamnutris! Kaj dankon por ĉi tia heroeco! Eĉ se vi hieraŭ domon mian bruligus, patron mian mortigus – hodiaŭ mi ĉion ĉi al vi pardonus!

Ili interkisis.

Serboj ariĝis de ĉiuj flankoj: Stanko ekvidis la patron, popon Milojon, Katiĉon. Li alkuris al iliaj manoj...

Alekso verŝis larmojn torente... Ili interkisis kvazaŭ ne estus sur batalejo, sed en edziĝfestejo...

Rekonsciiĝinte iomete, Stanko turniĝis al la kunularo:

– Ĉu ankoraŭ iu inter vi devas redoni ŝuldon? Ĉu ankoraŭ iu devas venĝi? Ĉiuj silentis...

– Tiukaze, fratoj miaj, ni havas ankoraŭ unu teruregan malamikon!... Al tiu malamiko ne venĝados de hodiaŭ! Ĝis hodiaŭ ni venĝadis nin, sed de hodiaŭ ni venĝados la senfortulojn kaj neplenkreskulojn!... Ĉu vi konsentas?

– Ni konsentas! – ektondris la hajdukoj.

– Se vi konsentas, aŭdu kion mi diros!... De hodiaŭ ne plu ekzistas hajdukestro kaj hajdukoj, de hodiaŭ ni estos ribelintaj sklavoj, demetantaj la jugon! Krevu la kalva verto!... Ni devas ekstermi ilian genton, samkiel ili volis ekstermi la nian!...

– Ni devas, devas!

– Tiukaze, fratoj miaj, ni aliĝu al niaj fratoj!... Ni intermiksiĝu kun ili!

La hajdukoj tuj intermiksiĝis kun la ribelantoj.

– Stojano! – Stanko turniĝis al Ĉupiĉo – ĉu vi akceptas nin?...

Stojano nur ĉirkaŭbrakis lin...

Sur la sanga batalejo komenciĝis festeno resonanta ĝis la ĉielo.. Gaja kantado eĥis tra la boskoj kaj arbejoj, kiuj dum jarcentoj nur veojn sonigis... Ankaŭ la onduma Drino eklirlis pli gaje... Ĝiaj ondoj lirligis la historion pri tio, kiel ekribelis sklavoj kontraŭ tiranoj, leviĝis tiel, kiel herbo dum printempo el tero kreskas. Samkiel verdan herbon neniu povas haltigi – tiel ankaŭ la popolamason neniu povis kvietigi. Ĉar ili ribelis aŭ por perei, aŭ por ekspiri la sanktan aeron de libereco!...

# LA TRIA PARTO:
# SENMORTULO

## 1. RIBELO

Venis fino al la turkia latino. Akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras. La unua ribelpafo resonis en ĉiuj regionoj Maĉvaj, post tio ĉiuj, kiuj estis almenaŭ iom kuraĝaj, prenis armilon.

Tamen, ĉu vi scias kion signifas, kiam kamplaboristo forlasas sian plugilon, kiam kamplaboristo prenas armilon?... Tio signifas: batalo pri la vivo kaj morto, batalo senespera, eterna... La kamplaboristo ne plu revenas al la plugilo, lia mano ne plu prenas plugan tenilon, li eĉ ne sonĝas plu pri sia antaŭavivo. Ankaŭ Viŝnjiĉo, la glora poeto, versanta pri nia ribelo, versis tiuokaze, post la batalo Miŝara, veron, kiu restos eterna. Korvobirdo krias al Kulin-edzino:

> Ne alvenos Kulin-kapitano,
> Li ne venos, lin vi ne atendu,
>
> Ne' atendu, kaj ne plu esperu;
>
> Nutru filon kaj lin soldatigu –
> Ĉar la serboj ne plu estas sklavoj!...

Oni ne plu povis rekoni ĉi tiujn pacemajn homojn. Rigardoj iliaj iĝis fulmoj, la vortoj iĝis tondroj. Kiu esploras tiun epokon, kiu aŭdis la interparolojn de tiamaj bataluloj, tiukonvinkiĝos, ke en tiu epoko oni parolis specialan lingvon, ke regis eksterordinara homunuiĝo. Ĉiu elbuŝigita frazo estis sencohava. Min pardonu la historio, pardonu la gloraj Nemanjiĉoj, sed ĉi tiun epokon, la epokon de la 1804a ĝis la 1813a jaroj mi nomas plej heroa epoko... Dank al tiu epoko ni povas kun fiero rigardi en la okulojn de la mondo. Tiu epoko donis al ni heroojn, kiaj ekzistas nur en mitologio... Nin ne povas mirigi Termopiloj, ĉar ni havis niajn Termopilojn en nia antaŭnelonga pasinteco. Ĉiun, eĉ la plej gloran ekzemplon historian, ni povas rigardi kun fiero, ĉar ni havis kelkajn samajn en nia historio...

Oni pardonu min, ĉar mi, por pli bone priskribi ĉion, diros kelkajn vortojn defendante Maĉvanojn, por, unuflanke, refuti tion, kion iuj niaj historiistoj,

malgraŭ la volo de Dio, volis altrudi al tiuj gloraj batalantoj-martiroj, kaj aliflanke, por esprimi mian respekton al ili.

Samkiel mi jam komence diris, Maĉvo estas ebenejo kiu etendiĝas de Vidojevico ĝis la rivero Savao, do laŭlonge de la rivero Drino, kiu estas limo inter Bosnio kaj Serbio.

Drino estas furioza, bruakaj ondanta, sed negranda. Negrandaj taĉmentoj turkaj, same kiel unuopuloj, laŭlonge de la tuta bordo havis siajn ŝipojn kaj ŝipglitejojn: kie oni volis, tie oni povis veni el Bosnio en Serbion.

Tiamaniere Maĉvo iĝis areno de kapricoj. Kiu volis, tiu povis tie umi. Se temus nur pri umado, oni povus tion elteni; sed tie okazadis tiel sangaj eventoj, ke ilin eĉ ni, la plej proksimaj posteuloj de tiuj martiroj, jam kredas fabeloj...

Tiamaniere oni suferis kaj penegis. Ĉiu tago estis tute sama kiel la antaŭa... Nenies vivo estis sekura, ĉiu povis ajnamomente perdi eĉ la malmultan havaĵon kiun akiris. Oni vivis timante, paraliziĝis pro ĉiu sono...

Se tio iun tedis, tiu iris en la monton. Pafilo ekpafis, sed ĝia resono pli timigis ol kuraĝigis... Tiam oni ne timis pri sia vivo; la koroj ŝiriĝis kiel ĉifonoj, larmoj ŝtoniĝadis kiam oni vidis infanetojn starantaj sur aspidejo...

Pafilo ekpafis en Ŝumadio, la unua ekpafis en la Valjeva distrikto... Ĝi resonis kaj ĉirkaŭ ĝi komencis ariĝadi homoj, unu post la alia. Ekribelis ĉiuj – nur Maĉvo silentis...

Ĉu ni rajtas tiun silenton en tiaj cirkonstancoj nomi timemo? Mi demandas: ĉu ni tion rajtas?... Ne. Ĉar se tio estas timemo, kiel oni devas nomi nian nuntempan sintenon: kiam ĉi tie regas baptita serbo, kiam ni havas gazetaron, kiu ĉiun bagatelaĵon priskribas, kiam estas liberaj kaj vortoj, kaj tribunaloj, kaj ĉio? Kiel do nia sinteno devas nomiĝi?...

Ni ne kondamnu, do, se ni en la koro ne havas tiom da kuraĝo, kiom ili havis en la kalkano. Ni demetu la ĉapojn antaŭ la fierindaĵo de nia historio, ni riverencu antaŭ ili...

Subite taĉmentoj komencis ĝermi, kvazau el tero. Stojano Ĉupiĉo iĝis estro de ĉiuj. Iĝinte vojevodo, li komencis elektadi superulojn, kiuj defenos la Drinan landlimon.

Sur Miŝaro jam en la 1806a jaro, kun la ribelantoj troviĝis ankaŭ maĉvanoj. Tie ili luktis kiel leonoj. Vekrioj kaj lamentkanto de la Kulina edzino, tio estas vekrioj de Bosnio, kiu en tiu batalo perdis siajn la plej bonajn kaj la plej valorajn filojn...

Post Miŝara batalo ili revenis hejmen kaj komencis taĉmente gerili. Katiĉo iĝis milestro, kiu gvidis homojn, gardantajn la landlimon. Leĉjo komencis arigi sub sian flagon ĉiujn, kiuj havis „neniun sian krom dion nian“, por kiuj „morti estas same kiel fortrinki glason da brando“. Li lokiĝis en Paraŝnico, kie oni konstruis kabanojn, en kiuj siestis „la nudaj filoj“, kiu al la

turkoj ŝajnis pli teruraj, ol la plej bone ekipita armeo imperiestra La ĉefpopo Smiljaniĉo gerilis laŭ propra volo. Li estis bravulo, kia nur unu fojon en jarcento naskiĝas. Li kredis ke la turko boŝnjako, aŭ, kiel li nomis ilin: turkaĉa boŝnjako, nenion povas kontraŭ li fari.

– Se min pereigos mano de turkaĉa boŝnjako, ne enterigu min!... Ĵetu min en...

Tiuj liaj vortoj kuraĝigis ĉiujn. Ĉiuj, kiuj estis kun li, kredis ke estos kiel li parolas...

Ilijo Serdano organizis gardistojn, por haltigi turkojn, kiuj ĉe Leŝnico transiradis Drinon...

La popojn kaj multajn aliajn mi eĉ ne mencios.. Mi mencios nur la homojn, kies bravaĵoj povas iĝi parto de mitologio. Kvankam ĉiu unuopulo meritis, ke la historio lin famigu!...

Tiuj taĉmentoj krozis tra Maĉvo. Ili ŝirmis nefortulojn. La aliaj revenadis hejmen, por organizi, aŭ por plenumigi farendaĵojn.

Preskaŭ ĉiun tagon diversloke okazadis bataletoj. La ribelintoj ne povis kvieti. Se turkoj ne alvenadis mem. la ribelintoj serĉis ilin. Katiĉo almenaŭ du fojojn semajne kun siaj ĝendarmoj transiradis Drinon, por trovi turkojn en ilia nesto. Ili komencadis bataletojn, defiis turkojn, allogis ilin transiri Drinon, kaj tie pereigis ilin. Tie lin je ĉiu tempo helpadis Leĉjo kun siaj „nuduloj“ ... Eĉ ne unu paŝo de maĉva tero restis nesurverŝita per sango kaj nekovrita per ostoj...

Kion oni faris kun tiuj, kiuj estis malfortaj kaj neplenkreskaj?...

Ĉiuloke, kie la turka invado estis forta, fakte, kien granda turka invadotorentis, tie la domoj kaj kabanoj restis malplenaj. La popolon vojevodoj kaj taĉmentestroj elmigrigis en la nordekcidentan regionon de Maĉvo, proksime de la rivero Savao, por ke oni povu ilin, se okazos ia malfeliĉo, aŭ pereigo, per boatoj transporti aliflanken de la rivero Savao, kaj evakui al la serbaj fratoj en Sremo...

La lokoj kie troviĝis aregoj de maljunuloj, senpovaj maljunuloj, virinoj kaj neplenkreskaj infanoj nomiĝis rifuĝejoj. Kompletaj vilaĝoj troviĝis en tiuj rifuĝejoj. La ribelantoj havigadis manĝaĵojn, sed ĉio alia dependis de la volo de Dio.

Vilaĝanoj el senvojaj vilaĝoj tute ne iris en rifuĝejojn. En tiaj vilaĝoj daŭris familiara vivo, ne tute sama kiel antaŭ la ribelo, sed la domanaro tie estis kaŝita sub sia tegementodum la fiepoko.

Tamen, bataloj daŭris ĉiutage. Grandaj konfliktoj ne okazadis, sed regule aperadis iu turka bando, kiujn la ribelantoj haltigadis kaj pereigadis. Siajn mortintojn serboj entombigadis, sed la turkojn ili lasadis, por ke ilinformanĝu rabobirdoj.

La plugiloj komencis rustiĝi, sed ankoraŭ pli brilis longaj pafiloj, kiuj por ĉi tiuj multjarcentaj sklavoj estis kbazaŭgepatroj...

La evento ekĝermis, kreskis, ekburĝonis, plenfloris, embriiĝis, kaj – maturiĝis...Nun alvenis ĝusta tempo por ribelo,same kiel al la knabinoj alvenas la ĝusta aĝo por edziniĝo. Sed kiam alvenis ĝusta tempo, tiam la kompatindulo iĝis bravulo. La timo forvaporiĝis el la koroj – komenciĝis la epoko por venĝo. Alvenis la momento por venĝi la sangon, verŝitan en Kosovo.

„Ekĝermis rajao, kiel herbo el la tero."

## 2. HEJMO, HO HEJMO

Komenciĝis nokto. La kampoj odoris pulve... La ribelantoj retiriĝis en densejojn, sub arbojn, por ke dum dormo ilin ne skurĝu nokta malvarmo.

Stanko troviĝis apud la patro.

Ekzistas momentoj, kiam eĉ ĝojo ŝtonigas la homon. La homo senvortiĝas, kiel dum la plej granda malfeliĉo. Simile estis ankaŭ kun Alekso. Jam kelkajn tagojn li ne estis mastro de sia saĝo... Ĉiu tempero malkaŝadis al li novan fonton de feliĉo... Li eĉ ne sciis kio fakte okazas...

Lia Stanko! Ĉu eblas ke tio estas lia Stanko? Ĉu li estas patro de tiu juna grandegulo, al kiu direktiĝas ĉiuj okuloj?... Ĉu li estas patro de tiu tondrulo, kies okulo tranĉas kiel akra sabro, sed samtempe rigardas tiel nobele, fiere?!...

Sed kiam Stanko kisocele proksimiĝis al lia mano, li konfuziĝis; li preskaŭ detiris ĝin pro timo kaj pro honto ĉar tia bravulo proksimiĝas al lia mano!...

Same estis nun. Stanko sidis ĉe li, sed li sentis ke koro lia maltrankviliĝas... Dum lia filo interparolas kun la popo, li ne povas sataŭskulti la saĝajn vortojn, kiuj elflugas, kiel petolaj papilioj desur liaj lipoj... Ankaŭ la popon li ne povis satrigardi, fikse aŭskultante la interparolon de Stanko, kiu parolis kvazaŭ estus centjara grizharulo!...

– Mi suferis, ho mia popo, suferegis!... Eĉ se pro miaj pekoj, animo mia estos en infero turmentata, mi opinias ke pli grandaj suferoj ekzisti ne povas!... Tagnokta timo... Ĉiufoje kiam mi rememoris miajn samdomanojn, kiujn vi ĉiuj forĵetis, kiam mi rememoris ke ili estas sklavoj nesklavigitaj, senkulpaj kaj senriproĉaj; kiam mi rememoris ke la vera kulpinto senzorge promenas en Nigra Marĉo – mi sentis agitiĝon en la ventro!... Al mi ŝajnis ke la manĝaĵo de la patrino protestas en mi, malbenas min!... Mi sentis iliajn larmojn sur mia korpo, ili bruligis min kiel viva braĝo!...

– Silentu, filĉjo, silentu! – diris al li la popo.

– Nun mi povas silenti!... Kvankam kvar vivojn mi forprenis, mi povas silenti, ĉar mia animo estas kvieta, mia koro estas kontenta... Mi kredas ke mi estas peka, sed mi estus eĉ pli granda pekinto, se mi ne venĝus!...

– Tio estas peko – diris la maljuna pastro. – Sed tamen – kiu scias!... En la sankta libro estas skribite: „Ne forprenu alies vivon, ĉar vi ne kapablas unu blankan haron igi nigra“. Kaj tio estas vero!... Kion oni ne kapablas al iu doni, tion oni ne rajtas de oni forpreni!... Jen, filĉjo, tio estas instruo ĉiela. Tiel oni povas konduti tie, en la ĉielo; sed ĉi tie, sur la tero... ĉi tie tio ne eblas!... Ni ja estas kreitaj aliaj. Kaj jen, mi, la peka servisto de la altaro dia, mi diras al vi: tio, kion vi faris ne estas bona, sed estas justa!... Niaj prauloj ja diris; kio estas justa, tio estas ĝusta!...

Stanko prenis lian sulkoplenan manon, kaj kisis ĝin.

– Dankon al vi, ho popo! – diris li. – Mi ja ne povis ne fari tion!... Mi konstruis tegmenteton super la kapo – li volis bruligi ĝin! Mi edukis posteularon, helpontojn en mia maljunaĝo, anstataŭontojn de mia kadukiĝonta korpo, kandelportontojn, al kiu la akiraĵojn kaj patronfeston mi postlasos – sed oni volis sklavigi kaj mortigi ilin!... Ĉu mi povis ne forigi ĉi-mondajn violentaĵojn?...

– Tio estas vero, ho popo! – ekkriis oni de ĉiuj flankoj.

– Mi, kiel pastro, ĉi tion ne rajtas paroli al vi!... Mia tasko estas paroli al vi pri amo, – daŭrigis la popo, ekscitiĝante pli kaj pli – sed kiel vi kaj mi povas ami tiun, kiu cindrigas nian kompletan akiraĵojn, kiu per akrajataganoj diserigas nian idaron!... Se Dio ne donus al ni kuraĝon kajsaĝon, ĉio ĉi povus okazi!... Tamen, nun... Sinjoro pardonu nin!... Stanko, filo mia!... Kvankam diaj leĝoj diras ke vi estas pekulo, la tera justeco kaj ni, pekaj homoj, diras al vi: „Kiu ne venĝas, tiu ne preĝas!...“

– Tio estas vero! Tioestas vero!

– Jes. tio estas vero! – daŭrigis denove la popo, saltleviĝinte, dum okuloj liaj brulis. – Alie ja ne povas esti!... Ĉar, kiel, tiukaze, nomiĝus ĉi tiu nia ribelo? Ni ribelas: aŭ por perei, aŭ por liberiĝi; ni ribelas por mortigi, por formortigi tiujn, kiuj mortigadis nin; ni ribelas por liberiĝi, por povi esti homoj, por povi sentime vivi sub sia tegemento, kuŝi sur sia kuŝejo, por povi sen timo brakumi kaj kisi sian idon, ne timante ke la malgranda, blonda kapeto estos fortranĉita per ponardo turka; ni ribelis por povi esti tio, kion Dio volis, kreante la unuan homon – veraj homoj!... Kaj tiam, cent fojojn benata estu la ribelo!... Kaj benata estu ankaŭ vi Stanko, filo mia!... Ĉiujn pekojn viajn transprenu mia maljuna animo!...

Levinte la manon la maljuna pastro alrigardis la stelan ĉielon:

– Ho Sinjoro! – ekkriis li. – Vi, kiu donis la vivon eĉ al la plej malgranda vermo, benu ĉi tiun agadon nian!... Ni ne agresas, ni defendas nin!

Ĉiuj staris nudkapaj ĉirkaŭ la grizhara popo.

La brusto de Stanko ŝvelis... Kaj la popo benis lin!... Eĉ ĝis tiam li ne sentis bezonon dormi kaj ripozi, sed nun tiu neceso plene malaperis. Li kisocele alproksimiĝis al Alekso, prenis lian manon kaj aspergis ĝin per larmoj:

– Paĉjo!... Mi sentas ke Dio pardonis min!... Pardonu ankaŭ vi pro ĉiuj viaj turmentoj kaj malfeliĉoj!...

Tamen, ĉu ekzistas patroj kiu malamas sian infanon? Ĉu ie ajn, sub ĉi tiu dia kovrilo ekzistas tia monstro?...

Kompreneble li delonge pardonis. Li pro ĉi tiu ĝojo jam estis forgesinta siajn turmentojn...

La aŭroro eklumis, flamruĝa kaj brila. Eĉ ne unu nubeto kaŝis brilan suneton. Granda lumo ellasis siajn brilajn radion, kiuj lumigis la kampon,aspergitan per roso...

– Ĉupiĉo! – diris Stanko. – Vi estas nia vojevodo. Tial mi, kiel via subulo, petas vin: lasu min viziti la domon!... Mi sopiras mian tegmenton, miajn samdomanojn!... Mi forirus nur por kisi mian sojlon!...

– Iru, Stanko!... Jen, ankaŭ Alekso povas kun vi ekiri...

Venteto flustrigis verdajn foliojn, branĉoj knaletis sub la piedoj, birdetoj kantis, salutante helan tagon, dum en la arbaro aŭdiĝis brumurmuro de Drinaj ondoj...

La penso ke li sentime transpaŝos sian sojlon gajigis Stankon. Krome, li vidos la domanaron: patrinon, fratojn, bofratinojn, infanetojn... Kaj Jelican... tiun kuraĝan, belan knabinon!... Koro lia batis pro ĝojo...

– Rememoru, paĉjo!... Ĝuste je Elitago, antaŭ ses jaroj!... Kiaj turmentoj estis tio!...

Same kiel en la fabelo, en kiu du fiŝoj estis rostataj sur la sama braĝo. Unu el ili diris: „Mi fartas malbone", la alia replikis: „Mi fartas ankoraŭ pli malbone!" same estis kun Alekso. Alekso kredis ke Stanko suferegis, sed tamen ne povis suferi tiom, kiom li suferis.

– Filĉjo mia, tio vere estis turmentoj!... Multon trasuferis mi kaj via povra patrino!... Ĉiu tago elkrepuskiĝis pli nigra kaj malgaja ol la antaŭa!... Kaj... nenie fino estis videbla!... La homoj fuĝis de ni, kvazaŭ ni estus kontaĝaj. Multajn fojojn mi deziris ĉesigi ĉi tiun mizeran vivon!... Vi ekscios, se Dio volos, ankaŭ vi ekscios, kiaj estas la patraj turmentoj; sed tion, kion mi trasuferis, mi ne deziras eĉ al la plej granda malamiko!...

Tiam li komencis rakonti dronante en detaloj... Stanko iris apud li kun la kapo klinita, aŭskultante pri turmentoj kaj suferoj, pri kiaj li neniam antaŭe aŭdis.

– Sed tamen, mi dankas al dio!... Kiam li donas – li vere donas!... Lia mano estas ĉiam plena, lia donaco estas la plej dolĉa! – dirinte tion Alekso, levis la ĉapon, kaj krucsignis. – Nun jen, tuj kiam ni purigos nian landon de turkoj, mi vin edzigos!... Mi volas sperti ankaŭ tiun ĝojon dum mia vivo... Tamen, jen, vi pri ŝi eĉ ne demandas!...

Li alrigardis Stankon subokule.

Sed tiu bravulo, kiu faris tiom da miraĵoj, kiu tiom da fojoj preskaŭ mortis – nun ne kuraĝis rigardi la patron en la okulojn. Li sentis ke flamo lekas liajn vangojn. Se Alekso volus, li povus aŭdi kiel la koro de Stanko trembatas... Tamen, Alekso tion ne aŭskultis, li komencis laŭdi Jelican:

– Gratulon al ŝia patrino. Ŝi estas knabino-bravulino!... Ĉu vi scias, filo, kiam vi ŝin trans la sojlon venigis, al mi ekŝajnis ke suno en mia hejmo aperis!... Benata estu ŝia mano: ĉio, kion ŝi tuŝas, tio progresas!...

La maljunulo entuziasmiĝis laŭdante Jelican... Pri ŝi li parolis ĉion la plej belan.

Sed la pensoj de Stanko foriĝis malproksimen, tre malproksimen... Li rememoris ĉiujn bagatelaĵojn kiuj koncernis Jelican... Li revokis en la menso la rikolton... Jelica estis kun li dum tutvilaĝa helplaboro al Ŝokĉaniĉoj, ili rikoltis unu apud la alia... Ŝi kantis la kanton:

Knab finfalĉis tridekkaj tri garbojn,
Sed knabino tridekǩaj kvar garbojn,

Li penegis per la tuta forto, por ke ŝi ne devancu lin. Ili falĉe falĉis de tagmanĝo ĝis vesperkrepusko, sed neniu sukcesis devanci. Ŝvito bolis, sed ili tion ne priatentis...

Subite disŝiriĝis la ligtenilo sub la gorĝo de Jelica... La ĉirkaŭkolo forfalis, kaj ĝuste ĉe la malsupro de la kolo li ekvidis belgrajnon, kiu belis sur la malmagra knabina gorĝo...

– Kio estas ĉi tio? – demandinte tion, li tuŝis per la fingro la belgrajnon.

Ŝi roziĝis, ĉar zefiro ekblovetis, kaj ankoraŭ pli nudigis la subkolon, pro kio Stanko jam povis vidi ankaŭ la rondaĵojn de ŝia brusto... Kiel freneza, ŝi eksaltis kaj forfuĝis...

Tamen, Stanko tion malforgesis. Multajn fojojn dum sendormaj noktoj li pensis pri tiu belgrajno kaj brusto, sed nun ĉio ĉi aperis antaŭ liaj okuloj tiel vive kaj klare, kvazaŭ li vidus Jelican antaŭ si.

Li ne aŭskultis la patron. Lin plenigis ĝuo, kiu disfluis tra tuta lia korpo... Por li Jelica estis la tuta ĉi-monda feliĉo!... Jelica estu lia, alvenu la momento kiam li povos kisi la belgrajnon, karesi la bruston – negrave se post tri tagoj lin bekos agloj kaj korvoj!...

Proksimiĝo al la vilaĝejo abundigis liajn memorojn.. Ĉiu pado, ĉiu arbusteto estis memoro el lia pasinteco... La kverko, kiu tiel impete disetendis sian kronon, foje estis ilia ŝirmejo kontraŭ pluvo. Sur ĉi tiu pado ili multajn fojojn interparolis... Malantaŭ tiu arbusto ŝi foje alkriis, kiam li estis tie pasanta, montrante al li la unuan ŝafidon, kiun ili longe, longege kune karesis. Kiel ĉarme ŝi tiam alrigardis lin.

– Ĉu ankaŭ vi ŝatas ŝafidojn?

– Jes, mi ŝatas.

– Mi, se mi ne hontus, mi ludus kun ĝi taĝnokte!...

Rigardu, mi petas vin, kiel belaj estas ĝiaj okuloj!... Vidu la blankan floron sur ĝia frunto! Kaj... ĝi rigardas, iel, kiel infano!...

– Vere...

– Mia panjo ĉiam ridas pri mi, sed ne riproĉas min... Mi al ĉiu donas nomon... Kaj mi neniam permesas ke oni buĉu ŝafidojn!... Ĉiuj kaŝas, kiam ili planas buĉi, sed mi poste ploras, ploregas... Mi ne memoras kion mi faris en infanaĝo, sed de kiam mi scias pri mi, mi ne gustumis ŝafidaĵon...

Ili alvenis antaŭ la apudvojan tranoktejon. Ĝi estis malplena. Nenie iu ajn homo, eĉ ne unu fumofasko leviĝas el fumluko.

– Senhomejo! – diris Alekso.

Tiuj vortoj vekis Stankon el lia revado. Li ĵetis rigardon al la domegaĉo, kaj kuntiris la brovojn.

– Dio donu ke ĉiuj turkaj domoj kantu ĉi tiel! – diris Alekso. – Ĉu vi vidis kie ili min enfermis?

– Mi vidis.

– Ni vizitu la enfermejon!...

– Ne faru tion, paĉjo... Almenaŭ hodiaŭ ne faru tion, ĉar hodiaŭ estas mia unua gaja tago post ses jaroj, tial mi deziras ke ĉi tiun ĝojon nenio turbulu!... Lasu por morgaŭ... postmorgaŭ... laŭ via volo... Sed hodiaŭ ne faru tion!...

– Bone, se vi tion deziras... Tiukaze, ni iru hejmen.

– Jes, ni iru hejmen!...

Tamen, la vido de tiu malbenita domo, kaj tiuj kelkaj vortoj, kiujn li interŝanĝis kun la patro, interrompis liajn belajn revojn. En lia memoro, krom la bela figuro de Jelica, komencis aperadi ankaŭ la malamataj figuroj: Piro, Marinko, Ivano kaj Lazaro... Antaŭ liaj okuloj aperis la terura nokto kiam li savis la patron... Lian animon naŭzis la timego de Piro kaj Marinko... Li kvazaŭ sentus iliajn malvarmajn kadavrojn sub siaj fingroj... Tiam li turnis la kapon al alia flanko, por fuĝi de tiu aĉa bildo...

Tamen, sur la alia flanko staris Ivano kaj Lazaro... Ivanon ĉirkaŭis blanka fumo, Ivano petis, petegis lasi lin viva, petis lin kiel dion... Lazaro genutremis... vizaĝo lia palis kaj bluis, la lipoj malheliĝis...

– Ho – diris Stanko– tio estas tre aĉa!

– Kio estas aĉa? – demandis la patro.

– Tio... kiam oni ion faras, sed poste, kiam oni devas por tio pagi, oni tiam kurbigas sian spinon grusimile!...

– Ĉu vi parolas pri Lazaro?...

– Kaj pri Lazaro, kaj pri Ivano, kaj pri tiuj du aĉuloj!... Mi preferus tragluti pafkuglon ol humilpeti!...

– Ankaŭ mi! – diris Alekso fiere. – Se alvenus la momento, kiam mi devas iun peti pri la vivo, mi rezignus la vivon!... Sed ili... ĉu ili kondutis kiel malkuraĝuloj?...

– Aĉuloj!... Bedaŭrinde Dio donis al ili homan eksteraĵon!... Mi, paĉjo, ŝatas bravulojn, eĉ se ili estas miaj malamikegoj! Kaj jen, mi ĵuras per Dio, mi ripetas: se mi iam ajn renkontos bravulon, se mi vundos lin – mi lin sur dorson mian metos kaj forportos, ke agloj kaj korvoj ne bekpiku lin!

– Jes!... La bravulon oni devas... Estus peke lasi lian korpon neenterigita...

– Sed ili!... – Stanko kraĉis kaj mansvingis. – Ili estas malbonodoraj cimoj, kiuj atakas el mallumo. Sed kiam oni renkontiĝas nur duope, ili tordĝas kiel vermoj!... Mi opiniis, ke almenaŭ Lazaro ne estas tia!... Mi opiniis ke li estas bravulo; kredu, paĉjo, mi ĵuras per miajunaĝo, se li estus tia, mi enterigus lin kiel homon, mi eĉ la popon petus legi promortan preĝon!... Tamen, li ne estis tia!... Nun mi nur bedaŭras ke mi kune kun tia aĉulo kreskis kaj maturiĝis, ke mi tiel longe kun li kamaradis, ke li eĉ estis mia plejamiko!... Mi bedaŭras pro ĉiu afablaĵo, pro ĉiu bela vorto, kiun mi iam ajn diris al li!... Eĉ pri morta Lazaro mi hontas!...

Alekso kapjesis. Al li ŝajnis, ke pro malbonagoj oni povis puni ilin nur tiel, kiel tion faris Stanko...

Ili jam estis proksime de la domo. Kiam Stanko ekvidis kiel kviete tordiĝas blanka fumo el la tegmento, kiel ĝi rekte ĉielenas – lia koro komencis dancetadi.... Dum momento forvaporiĝis la aĉa, kaj kreiĝis bela, hejma bildo...

– Stanko, filĉjo mia!... Stanko, okuloj miaj!... – ekkantis Petra kroĉiĝante al la kolo de la filo, kisante lin...

Ili kisis, brakumis unu la alian...

La malgrandaj infanetoj jam pendis sur lia talio, kriante:

– Onĉjo!... Oĉjo!...

Li kisadis ĉiujn.. La koro dancegis en lia brusto... Krome, ankaŭ Jelica estis tie!

– Halt! – dirinte tion, li deĵetis la ĉapon desur la kapo. Mi devas ankoraŭ ion saluti!...

Li alpaŝis la doman sojlon, genufleksis, krucosignis kaj kisis ĝin.

– Ho, nesto mia!... Hi, ĝojo mia! Paĉjo! Panjo! Fratoj!... Ĉiuj!... Ankaŭ vi, Jelica, ankaŭ vi infanoj!... Venu ĉi tien!

Kiam ĉiuj alvenis, li leviĝis kaj alrigardinte ilin, diris:

– Vi aŭdis mian ĵuron. Do, mi plenumis ĝin, mi ĝin brave plenumis! Nun aŭdu alian! La brila suno bruligu miajn okulojn, se mi ne pereos gardante kaj defendante ĉi tiun neston, kiu al mi en ĉi tiu momento donis tiom da ĝojo, kiom nur Dio al justuloj en paradizo donas!... Nun ni iru en la domon!...

Ĉiuj endomiĝis.

## 3. BATALO SUR MIŜARO

Tamen, en tiu epoko neniu povis sidi kviete sub sia tegemento. Ĉu vi iam ajn provis tuŝi plenplenan vesponeston?... Se vi tion faris, vi vidis vesposvarmon fluganta al viaj okuloj. Tio okazis ankaŭ kun turkoj. La ribelantoj tuŝis ilian superecon, ilian forton. Ĉu eblas ke la aĉaj subuloj aŭdacis levi la manon kontraŭ sia mastro?...

Tiam leviĝis la potenco, kiu subtaksis la malgrandajn taĉmentojn, kiuj eĉ ne havis sufiĉe da pafaĵprovizo.

Tiel komenciĝis la batalo, kiu daŭris multan tagojn. Ne estis mirinde vidi kadavron sur vojo. La kadavrojn oni jam ne atentis. Mortigi turkon iĝis ordinara afero, samkiel normale estis matene preni gluton da brando el lignobotelo...

Kiel mi jam diris, Ĉupiĉo faris bonan dispozicion. Serdano Ilijo organizis gardantarojn, malebligantajn turkan invadon de la enfluejo de Jadaro en Drinon, kaj ĝis Badovinaco. Simo Katiĉo gardis la teritorion de Badovinaco ĝis la enfluejo de Drino en Savaon; la enfluejon de Drino gardis la harstariga bravulo Leĉjo Migradiĉo, la kunfrato de Stanko.

Ĉirkaŭ li ariĝis la tuta kunularo de Stanko, sed ili jam ne nomis lin hajdukestro, sed taĉmentestro (kapitano).

Li lokiĝis en Paraŝnico. Tie, disvolvinte la standardon de libereco, li alvokis ĉiujn venĝantojn, kaj lia taĉmento konstante kreskis. Multaj rezistuloj el la jugita serba lando alvenis sub lian standardon. Jen kiel li akceptadis novajn kunulojn:

– De kie vi estas?

La novulo diras.

– Kiel vi nomiĝas?

La novulo ankaŭ tion diras.

– Pro kio vi forlasis vian naskodomon?

– Pro violentaĵo. Turkoj senvivigis ĉiujn miajn samhejmanojn, la domon ili bruligis.

– Kiu estis via malamiko?

– Ĉiu kiu turbanon surhavas kaj adorkliniĝas al Mahometo.
– Ĉu vi venis al mi?
– Al vi, ho estro.
– Ĉu vi povas elteni ĉiajn suferojn kaj malfacilaĵojn?
– Mi ne scias kion mi farus, se mi vivus sen suferoj!
– Ĉu vi povas celi per pafilo?
– Same kiel bati per la pugno.
– Ĉu vi scias naĝi!...
– Kiel anaso!
– Ĉu vi povas subnaĝi?
– Kiel fiŝo!
– Ĉu vi pretas perei?
– Ajnamomente, kiam la kara Dio tion ekdeziros!... Sen lia volomorti mi ne povas, sed mortigi mi povas!...
– Tiukaze mi akceptas vin!...

Jen, nur tiaj homoj estis akceptataj en la taĉmenton de Leĉjo. Homojn, kiuj ne havis ĉiujn ĉi ecojn, Leĉjo irigis al la vojevodo Ĉupiĉo, por ke tiu transdonu lin al iu alia, sed en sian taĉmenton li tiajn homojn ne akceptis....

Iun vesperon ĉiuj sidis ĉirkaŭ fajro... Leĉjo plengorĝe ridis pro ŝercoj de Zaverzano, kiam inter ili subite aperis Kamelo. Vidinte lin, ĉiuj eksaltis. Li nur ektiris la manikon de Leĉjo... Ili interflustris, post kio Leĉjo turniĝis al sia kunularo:

– Nu, kiu estas bravulo?
– Mi!... Mi!... Mi! – ektumultis ĉiuj.
– Mi bezonas subakvistojn!
– Ni ĉiuj estas subakvistoj! – diris Zaverzano.
– Tiukaze... Jen vi – okopo!... Alnaĝu la turkajn ŝalupojn, kiuj troviĝas sur la alia flanko... Vi, Kamelo, diris, ke vi havas la ilojn?
– Jen ili! – diris Kamelo, demetante blankan lintolan sakon desur la dorso. – Ok boriloj. Pli da boriloj mi ne povis trovi!
– Sufiĉe! – dirinte tion, Leĉjo prenis la borilojn, kaj disdonis ilin al la okopo. – Prenu! Ĉiuj prenu po unu. Nun enakviĝu, kaj kaŝiĝu tie, ĝis kiam la ŝalupojestos ligitaj. Tuj kiam ili estos ligitaj, ĉiuj proksimiĝu al unu el ili, kaj traboru ilin per la boriloj.

Zaverzano dolĉe ekridis.

– Kiel bonanima homo, Dio mia! Jen, nun li volas ankaŭ fiŝojn satigi!... Kiu elkovis la ideon?
– Kamelo – diris Leĉjo.
– Nu, li vere estas ideoriĉa!... Tiu ideo valoras turkan imperion!...

Kamelo nur kapsvingis, post kio Leĉjo daŭrigis:

– Hastu!... Mi, kun la aliaj kunuloj atendos ilin sur la bordo!...

– Ek! – diris Zaverzano, demetante siajn vestaĵojn.

La samon faris ankaŭ la aliaj, kaj restinte duonnudaj, ili prenis la borilojn... Zaverzano suprenlevis la borilon:

– Dio donis vin al kampkulturisto, nun vi estas ilo ankaŭ de batalanto!... Mi gratulegas vin, Kamelo!... – Post tio li kun la kunuloj malaperis en vepraro!...

Surteriĝis malluma nokto... Nuboj viglis sur la ĉielo kiel brunaj lupoj. Jenjene bruliĝis fulmo...

Turkoj estis pretiĝantaj por transriveriĝo. Tie estis ne pli ol unu taĉmento... Ili interparolis mallaŭte, kviete, sciante ke tie gerilas la taĉmentestro Leĉjo, kies nomo tre rapide iĝis timigilo...

– Ĉu ni komencu, homoj?

– Ek, ni komencu.

– Sed malrapide... Se ni atingos la bordon kaj arbetejon, ni ne plu devos zorgi...

La turkoj estis proksimiĝantaj al la bordo.

– Nu, Asao, vi havas eksterordinarajn okulojn: kaŭriĝu kaj vidu ĉi iu troviĝas sur la bordo?...

Asao kaŭriĝis kaj komencis observi. Li leviĝis jam post kelkaj sekundoj:

– Neniu arbeto moviĝas, ni povas sentime ekiri.

Ili komencis malligi la ŝalupojn. Akvo ululis furioze. Kiam oni proksimigis al ĝi la kapon, ŝajnis ke oni aŭdas malproksimajn sonorilojn.

Nur la rivero sonis, ĉio alia estis kvieta kvazaŭ en tombo... Ia mistereco vualis la naturon.

– Sed kio estas tio? – demandis Asao, fiksirgardante akvon... – Kiel fiŝo! Jen ega siluro subnaĝas!... Granda kiel homo!...

– Ne estas bone ke vi vidas fiŝojn... – diris maljuna turko. – Eble estos bone ĉi tie tranokti, kaj morgaŭ malligi la ŝalupojn.

– Sed kie stas via kuraĝo, ho avĉjo!... – ekkriis kelkaj turkoj.

– Mi opinias ke estus pli saĝe fari kion mi diris! – replikis la maljunulo.

– Ni iru!... – Ni iru!... ekkriis kelkaj.

– Vere, estus bone tranokti ĉi tie, veron diras la avĉjo! – ekkriis aliaj...

– Nu, homoj, mi antaŭsentas malbonon!

– Vi ĉiam estis defetulo! Restu, kaj revenu al via edzino – sed ni iros! – diris al li unu el la turkoj.

Tiam ili komencis eniradi la ŝalupojn.

– Ĉi tiel estas pli bone – diris la turko, kiu riproĉis la avĉjon. – Se ni ĉinokte transriveriĝos kaj atingos la arbetejon – mi pri nenio plu devos zorgi! Ni certe transriveriĝos. Nenie videblas iu ajn!... Ŝajnas ke neniu nin atendas tie!... Post tio ni tra arbetejo alvenos Ŝabacon. Kiam ni venos en la urbon, oni tie konsideros nin bravuloj!...

Ili senŝnurigis la ŝalupojn, kaj akvo kunportis ilin... Terure aspektas dum tenebra nokto tiuj Drinaj ŝalupoj, ĉar ili navigas oblikve, pro kio ili aspektas kiel hidaj birdegaĉoj kun etenditaj flugiloj...

Armitaj per longaj pafiloj, la turkoj interparolis malrapide kaj mallaŭte... Ili ofte ĵetadis rigardojn al la dekstra bordo, pretaj rebati atakon.

Ili eĉ supozi ne povis kie troviĝas danĝero...

Abrupte la avĉjo ekkriis:

– Kio okazas?

– Kio? – ekkriis turkoj de ĉiuj flankoj.

– Akvo enŝprucas!...

Kaj vere, je kelkaj lokoj en la ŝalupo aperis bolantaj akvaj fontoj. Post nelonge akvo kovris la subaĵon, kaj oni jam povis rimarki ke la ŝalupo sinkas...

Tiam aŭdiĝis krioj ankaŭ el aliaj ŝalupoj:

– Ĉe ni okazas la samo!

Ekregis timo... La turkoj ŝtoniĝis. Neniu sciis kion fari...

Tio daŭris kelkajn minutojn. Dume akvo torentis pli kaj pli. Ĝi delonge kovris la genuojn...

Abrupte la ŝalupoj komencis turniĝadi, ĉar ili enfalis vorticojn, la terurajn drinajn akvokirlojn... Iu ekkriis:

– Ni nun pereos!... Saltu en la akvon!...

Unu turko saltis, sed malaperis en senfundejo. Li ne plu aperis... Saltis la dua – okazis same...

La turkoj ŝtoniĝis. Ŝalupoj estis sinkantaj, sed ili ne kuraĝis ĵeti sin en la sinon de la drako kiu muĝegis...

– Ho ve! – ekkriegis la avĉjo, malaperonte en ondoj.

– Kio okazis!? – demandis turko timoplene. – Al mi ekŝajnis ke lin iu entiris.

En alia ŝalupo ekkriegis aliaj turkoj...

Tra aero komencis reeĥi ŝrikoj kaj veoj. Ĉio ĉi strange intermiksiĝis kun muĝado de ondoj... La nudaj filoj jam ensaltis ŝalupojn, kaj de tie ili ĵetadis kaj puŝadis turkojn unu post la alia en vorticojn...

Post momento akvo traglutis kaj ŝalupojn kaj varojn, nur la nudaj filoj ne pereis. Ili elnaĝis sur la bordon.

Antaŭ ili aperis Leĉjo.

– Ĉu finite? – demandis li.

– Jes! – respondis Zaverzano. – Kaj la ŝalupoj kaj la turkoj!... Drino nin helpis, alian helpon ni ne bezonas!... Min ĝi tiom ekamis, ke kelkajn fojojn ĝi volis ankaŭ min sur la fundon altiri!... Du fojojn ĝi min fortege ensuĉis: mi staris kiel maizplanto ŝrumpinta pro sekeco!...

– Ĉu tio okazis en akvokirloj? – demandis Leĉjo.

– Jes, en akvokirloj.

– Tio estas bone... Nun ni retiriĝu en la vepraron – diris la taĉmentestro.

Ili estis ekirintaj, kiam Stanko aperis inter ili.

– Kunfrato, – diris li al Leĉjo – mi devas kun vi interparoli. Ĉupiĉo sendis al vi saluton.

Ili apartiĝis de la taĉmento.

– Turkoj premegas de ĉiuj flankoj... Iuj transiris sur Sablobordo, iuj ĉe Leŝnico, kaj iuj sur Podino. La armeo estas grandega. Ĉupiĉo sendis min irigi vin al Belotiĉo, kie vi renkontiĝos kun ili!

– Bone! – diris Leĉjo.

– Tio ne estas ĉio, kunfrato mia!

– Diru, kunfraĉjo! – Leĉjo rigardis lin demande.

– Ĉi tio estas mia propra peto: prenu min en vian taĉmenton!...

Leĉjo kunigis la brakojn ĉirkaŭ lia kolo.

– Estu estro, kunfraĉjo!

– Mi ne volas tion! Ĉu vi, kiu tiomajn miraĵojn faris, ne indas esti estro? Finfine, la estreco estas malgravaĵo!... Se estos bezonate, ni facile interkonsentos; finfine, viaj homoj vin jam konas...

– Tiukaze, kunfrato, bonvenon!

Leĉjo ordonis ke oni ekiru...

Eksiblis la nigra tero sub grandega ŝarĝo... Turkaj taĉmentoj ĝermis de ĉiuj flankoj, kiel fungoj. En la urbo Ŝabaco kaj sur kampoj ĉirkaŭ Ŝabaco, tumultis armeo... Leviĝis soldataro por neniigi liberecon; leviĝis la imperiestro el Istanbulo por distreti la mizerulojn, siajn ĝishieraŭajn sklavojn...

Dum la lastaj tagoj de julio, kaj dum la unuaj tagoj de aŭgusto en la 1806a jaro, pafiloj konstante pafadis... Tie oni ne povis enspiri puran aeron pro pulva fumo kaj polvo, kiun enaerigis hufoj de ĉevalo...

Oni batalis, luktis ĉiuloke; viviĝis densejoj kaj arbustoj; malantaŭ ĉiu dornejo pafadis pafiloj...

Unuflanke la estro, ĉefgvidanto Karaĝorĝo, kun la vojevodoj: Lukao Lazareviĉo, Stojano Ĉupiĉo, Miloŝo Poceraco, Jakovo Nenadoviĉo, Cincaro-Janko, Cincaro-Marko, Janko Katiĉo el Rogaĉo kaj kun multaj aliaj... Aliflanke Sulejmano-paŝao, kiun oni kromnomis Kulinno-kapitano, kun bosniaj bravuloj: Mehmedo-kapitano el Zvorniko, Sinano-paŝao Hercegoviano, Mulao Sarajevano, Beŝireviĉo Asao kaj aliaj.

Karaĝorĝo havis malmulte da batalantoj kompare kun la turka armeo. Kontraŭ la turkojn li venigis nur 15.000 ribelantojn kune kun rajdantaro. Aliflanke Sulejmano, aŭ Kulinno, gvidis armeojn, konsistantajn el pli ol 50.000 homoj.

Ili ĉiuj senescepteestis turkiĝintoj, bravuloj, fratoj, ĉar ilia patrina lingvo estis laserba lingvo!...

Karaĝorĝo en la kampo Miŝara elfosis tranĉeon, sur la ebenejo sur la Miŝara montetsupro. En la tranĉeon li lokis parton de infanterio, sed ĉiujn aliajn li dismetis en tieajn densejojn. La soldataro kiu estis en la tranĉeo ne batalis; tio estis la ĉefa trupo; bataletojn kontraŭ la turkoj komencadis negrandaj taĉmentetoj.

En mardo, la 31an de julio, ĝuste dum sunsubiro, oni venigis al Karaĝorĝo turkon kiu mem alvenis. Karaĝorĝo estis interparolanta kun Lukao, Jakovo kaj Ĉupiĉo, kiam oni informis lin pri tio.

– Venigu al mi la turkon! – ordonis li. Tuj kiam oni venigis lin al la Estro, Ĉupiĉo kunmetis la manojn:

– Kamelo! – ekkriis li.

– Jes, tio estas mi, Stojano.

– De kie vi alvenis?!

– El la urbo.

– Ĉu vi konas lin? – demandis Karaĝorĝo Ĉupiĉon.

– Tute kaj absolute! Lin konas ĉiuj Maĉvanoj!... Li multajn turkinojn plorigis!...

– Nu...nu... Kion do vi faris ĉe la turkoj? – demandis lin Estro.

– Mi volis ekscii kion ili intencas.

– Ĉu vi eksciis?

– Jes, mi eksciis... Morgaŭ frumatene Kulino irigos la kompletan armeon kontraŭ vi. Li atakos laŭ ĉi tiu ŝoseo, ĉar li intencas penetri ĝis Beogrado... Armeo lia estas granda, sed tio ne estas grava!... Nia armeo ne estas tiom granda, ni ne havas ankaŭ tiom da armilo, sed ni havas korojn!... Mi jam vidis ke kelkaj homoj dispelis tutan taĉmenton.

– Do morgaŭ, ĉu?

– Morgaŭ frumatene...

– Nu...nu... iru, ripozu...

– Mi neniam lacas.

– Sed vi certe malsatas... Iru, iom intermanĝu, kaj... nu...nu... demetu la turkan vestaĵon...

– Tion mi mem volis! – dirinte tion, Kamelo foriris al homamaso por trovi glutaĵon da brando kaj iom da pano.

– Tiukaze ni interkonsentu kion ni faru – diris Karaĝorĝo.

Ili komencis plani batalan dispozicion. Ili decidis konfidi la rajdantaron al Lukao Lazareviĉo. Li okupos la maldekstran alon de la batala areno, kaj kaŝos la rajdantaron en densajn arbustarojn. Aŭdinte la signon el tranĉeo – la trian pafon de kanono, li sturme atakos de tiu flanko la turkojn kaj penetros iliajn vicojn... Janko Katiĉo irigos sian trupon supren, al Orido, kie li atendos la turkan armeon. Jakovo Nenadoviĉo okupos la vojon al Dubravo, kie

nuntempe troviĝas ŝoseo, gvidanta el Ŝabaco al Valjevo. Stojano Ĉupiĉo kaj Miloŝo Stojiĉeviĉo bataldispozicios Maĉvanojn kaj Poceranojn, kiuj devas malebligi retiriĝon de Turkoj al Ŝabaco...

– Nu...nu... ĉu ni akordiĝis? – demandis Estro.

– Jes, ni akoridĝis – diris la vojevodoj.

– Nun ĉiuj iru al siaj taĉmentanoj.

Post tio ili disiris.

Tagiĝis la unua de aŭgusto. De frumateno aŭdiĝis timbaloj, muzikado kaj trumpetoj. La turkoj estis pretiĝantaj por ekiro.

La ĉelon ornamis nuboj... De Drino estis leviĝanta nemalgranda densa nubo. En aero ekregis silento... Ĉio silentiĝis, oni povis vidi nur kiel vento jenjene klinas sekajn velkintajn herbojn sur la kampo...

Tamen, la tero muĝis pro armea marŝado... Apoginta la orelon sur la teron, oni povis klare distingi ĉevalstampfon.

Homoj kiuj troviĝis en la tranĉeo interparolis:

– Tio, kio ĝis hodiaŭ okazadis, estas nenio – diris unu.

– Mi opinias, ke nur nun okazos vera batalo!...

– Bone, okazu la batalo! – diris unu ŝercemulo. – Ĉi tie ni sidas kiel maljunulinoj!... Cetere, ĉi tiuj turkoj ne aspektas kiel veraj turkoj!... Oni pafas al ili, kaj ili tuj rapide malaperas, fuĝas en la urbon!... Estas facili ataki tiajn timemulojn!...

– Al mi ŝajnis ke ankaŭ hodiaŭ tie troviĝos timemuloj!... Aŭskultu la bruegon!

Kaj vere,labruego estis proksimiĝanta pli kaj pli... Oni jam povis klare distingi la klakbruon de hufoj.

Elsaltinte sur defendmuron, Karaĝorĝo komencis rigardi.

Tiumomente aperis la soldataro. Muzikado, timbaloj kaj kriaĉado tondris en la ĉielo super Miŝaro.

La unuaj vicoj iris senzorge, surŝultrinte la pafilojn kiel palisojn...

Karaĝorĝo promenis kviete en la tranĉeo. Eĉ ne unu muskolo sur lia vizaĝo ekmoviĝis. Li rigardis la armeon proksimiĝanta...

Tiam li turniĝis al kanonisto.

– Atentu! – diris li. – Kaj vi – li turniĝis al la batalontoj – ne pafu ĝis kiam la kanono ne ektondros! Sed trafe celpafu!... Estus peko vane uzi pafkuglojn!... Nu...nu... la pafkuglo hodiaŭ estas pli valora ol la kapo!...

La unuaj turkaj vicoj jam alvenis proksime al la digoj tranĉeaj. Karaĝorĝo ensaltis la tranĉeon, alpaŝis la kanonon, ekrigardis al celilo, kaj diris senemocie, kvazaŭ elparolante la nomon de dio:

– Paf!

La kanonisto proksimigis meĉon, kaj la ĉerizligna kanono ekhurlis...

Li eĉ ne sukcesis elspiri, kiam aŭdiĝis salvo...

Fendiĝis la turka armeo, sed nur dum momento... Falis tuta arbaro, sed tio estissame kiel se oni per bastono akvon batis – jam post unu momento oni ne scias, kie oni batis; samtiel la turkoj plenigis lamalplenajn lokojn. La kanonisto jam denove pretigis la kanonon. Karaĝorĝo alpaŝis kaj denove alrigardis la celilon.

– Bonege! – diris li. – Paf!...

Tiam denove ekhurlis la kanono, denove ektondris salvo, denove malordiĝis kaj fendiĝis turkaj vicoj...

Nun ankaŭ turkoj ekpafis. Pafkugloj ekkantis sian mortigan kanton...

Karaĝorĝo diris:

– Ne pafu!... Nur kiam la kanono ektondros, tiam salvu!...

Tamen, la turkoj estis rapidege proksimiĝantaj... Oni jam povis distingi iliajn vizaĝojn.

Kiam Karaĝorĝo ordonis, la kanono ektondris ankaŭ la trian fojon... La tondrado ekeĥis, kaj li alrigardis la densan arbustaron maldekstre...

Abrupte io ekbruegis... ektintis sabroj, kvazaŭ laŭ ĉiela ordono; la turkaj pafiloj eksilentis. La armeo haltis kaj turniĝis... Inter la soldataro aŭdiĝis:

– Ni estas ĉirkaŭitaj! Ili ĉiujn nin mortigos kiel musojn!

Sur ĉiuj vizaĝoj ĉiziĝis timo... La akrevidaj okuloj de Karaĝorĝo tuj rimarkis tion...Li atendis tiun momenton. Saltinte sur la defenddigon li eltiris jataganon, kaj ekkriis:

– La jataganojn!...

Ilipenetris la turkaron kiel rabiaj linkoj. Konfuzitaj, timoplenaj, la turkoj ne kapablis fari eĉ unu manmovon...

Unu el la batalantoj rakontis kaj priskribis al mi tiun momenton ĉi tiel: kiu havis jataganon, tiu falĉis kiel akra falĉilo; kiu ne havis ĝin, tiu buĉis per sia ponardo. Mi vidis knabon, li eĉ deksep jarojn ne havis, etan, malgrandan, kiu havante nek ponardon nek jataganon, prenis razilon, kaptis turkegon, kiu povus porti lin per la dentoj, retrotiris lian kapon, kaj raspis per la razilo...

La malvenko estis evidenta. La turkoj, rekonsciiĝinte, jam ne pensis pri batalo kaj defendo, sed pri fuĝo... Ili ĵetiĝis diversflanken... La ribelantoj ili mortigadis ankaŭ per malplenaj pafiloj, uzataj kiel palisoj... Tie, ĝuste sur Miŝaro, pereis Sulejmano, Kulino...

Li luktis kontraŭ Lukao... Ambaŭ elzonigis pistolegojn, sed ambaŭ pistolegoj misfunkciis. Ili elingigis la sabrojn, sed Kulinno rompis la sabron de Lukao ĉe sabringo... Kiam Lukao komprenis ke li pereos, li saltis desur la ĉevalo, kaj forkuris en densejon. Turkoj ariĝis ĉirkaŭ riĉa ekipaĵo de la ĉevalo, dum Kulinno ekkuris post Lukao. Tamen, la knaboj de Lukao renkontis lin per pafilkugloj, kaj li tuj falis.

La turka armeo diseriĝis... La vojevodoj eksaltis persekute... Turkoj fuĝis diversflanken, iuj eĉ al Savao direktiĝis, sed la persekutantoj ankaŭ tien sekvis ilin...

# 4. „HO, PACON“

Stanko alvenis hejmen ĝuste antaŭ la tago de Ĉieliro de Dipatrino. Ĉiuj domanoj senescepte ekkuris el la domo por renkonti lin.

– Ĉu vi estas viva?

– Jes, dank al dio! Kaj vi?

– Ĉio estas bone, dank al dio!

La domanoj komencis saluti lin. Ĉi tiun fojon li salutis ankaŭ Jelican...

La knabinon kovris flamruĝo. Ŝi klinis la kapon, mallevis la okulojn al la tero, pro kio bone videblis la ombro de longaj okulharoj, kiu falis sur ŝiajn flamruĝajn vangojn.

Stanko forgesis lasi ŝian manon. Li kvazaŭ estus en paradizo, tenante ŝian manon en la sia.

Alekso kaj Petra tion rimarkis kaj ekridetis. Alekso diris preskaŭŝerce:

– Nu, bone... bone!... Tamen lasu ŝian manon.

Jelica, kiel brulvundita, elŝiris la manon, kaj forkuris en la domon! Sed Stanko restis senmove, kvazaŭ ŝtoniĝinta pro honto...

– Ho, ho, ho... bone, bone!... Nun ni iru en la domon!... Mi bone vidas, kion vi bezonas! – diris Alekso kaj aprobe frapetis la ŝultroj de Stanko.

Ili ekiris en la domon.

– Hieraŭ vespere ni atendis vin! – diris al li la patro. – Ĉi tie estis ankaŭ la popo!... Kamelo alvenis kaj diris ke vi estas viva kaj sana, sed je Dio, ni tre timis!

Ili lokiĝis ĉirkaŭ la fajrejo. Petra okulfiksis lian viran vizaĝon, ŝi ne povis satrigardi lin.

– Rakontu, kiel estis tie! – diris Alekso.

– Atendu ke mi unue satrigardu lin! – diris Petra riproĉe.

– Ho, satrigardi!... Kvazaŭ oni povus lin rigardi kaj esti sata!... Jen, vi rigardu lin, dume li rakontu!...

Stanko komencis detale, detalege rakonti pri la Miŝara batalo.

Ĝuste kiam li rakontis plej interesajn momentojn, alvenis la popo kun Joĉjo Juriŝiĉo. Ili ĝentile salutis ĉiujn.

– Jen, ni sidiĝis, kaj Stanko rakontas al ni – diris Alekso. – Vere furioza estis la batalo, ho Dio mia!... Tie oni, kara mia, pereadis heroe.

– Jes, heroe! – konfirmis Stanko.

Li devis denove sidiĝi, kaj al la popo rakonti ĉion, de la komenco ĝis la fino. Ĉiuj aŭskultis lian viglan rakonton kun la plej granda atento.

– Sed kio okazis kun Lukao? – demandis la popo Milojo. – Ĉu li pereis?

– Kiu?... Ĉu la vojevodo Lukao?... Ne tiel facile li pereos! – diris Stanko. – Ankoraŭ multajn turkojn li senvivigos!

– Sed kiamaniere li restis viva, kiam la turkoj ĉirkaŭis li de ĉiuj flankoj?

– Jen kiel!... Kiam Kulinno rompis lian sabron, kiam li vidis ke li pereos, li altiris la gvidrimenojn de la ĉevalo, revenigis ĝin kelkajn paŝojn; tiam li el la zono eltiris pafilstangon kaj ekkuregis. Li atingis Kulinnon, frapegis per la stango lian nazon, pro kio Kulinnon tute kovris sango.

– Ho! – ĉiuj manfrapis.

– Turkoj ariĝis ĉirkaŭ la estro, nur unu impetis rekte al Lukao. Lukao renkontis lin sur ĉevalo, eltiris piedon el botrimenoj, kaj kiam la turko tute proksimiĝis Lukao batis per lapiedo la supran parton de lia brustosto... La turko renversiĝis, veante, post kio Lukao saltis desur la ĉevalo kaj forkuris en arbustaron.

– Bravulo! – diris ekzalte la popo Milojo.

– Mi poste ne estis tie – daŭrigis Stanko – sed mi aŭdis, tia onidiro disvastiĝis, ke la vojevodo Lukao pereis... Mi vidis Ĉupiĉon ekploranta... Oniaserte ankaŭ la vojevodo Ĝorĝo eklarmis!... Oni lin jam priploris. Sed ne!... Tiu homo antaŭ vespero eliris el arbustaro, envolvita kiel muzulmanino, kaj venis rekte al la vojevodo Ĝorĝo...

– Tamen, kial li envolviĝis? – demandis Jovo Juriŝiĉo.

– Ĉar lin multloketrapafis turkaj kugloj!... Li havis dek tri vundojn!

– Ĉu dek tri?!

– Jes, dek tri, tamen, li restis viva! La vojevodo Ĝorĝo sendis lin sur la Oraŝacan riverinsulon, ke li tie saniĝu! Li sendube saniĝos...

Ili faris al Stanko multegajn demandojn pri aliaj unuopuloj, kaj Stanko pri ĉio rakontis... La interparolo daŭregis ĝis la tagmanĝtempo.

Tiam oni pretigis manĝotablon. La popo kaj Joĉjo leviĝis iri hejmen.

– Ni tagmanĝu! – diris Alekso.

– Ne hodiaŭ. Hodiaŭ estas ankaŭ nia festo – diris la popo.

– Ni venos morgaŭ – aldiris Joĉjo ridetante.

– Bone, tiukaze – ĝis morgaŭ! – diris Alekso.

Vidinte iliajn rigardojn kaj ridetojn, Stanko demandis sin mense: kial ili tiel ridetas?...

Elakompaninte la duopon, ĉiuj lokiĝis ĉe la manĝotablo.

Estis preskaŭ nokto kiam Stanko leviĝis de la manĝotablo, kaj ekiris viziti la ĝardenon. Alveninte al brutejo, li vidis Jelican melkanta bovinojn. Li alpaŝis ŝin.

– Ĉu vi melkas?

– Kial ne? – diris ŝi, dum flamruĝo aspergis ŝian vizaĝon.

– Mi ne riproĉas vin, sed... dankon al vi!

Jelica nenion respondis. Ŝi penegis forigi bovidon.

– Ĉu mi tenu ĝin? – demandis Stanko, nur por komencigi interparolon.

– Tenu! – diris ŝi.

La alpaŝis, kaptis la bovidon je oreloj kaj ekkaŭris antaŭ ŝi. Jelica komencis melki, dum Stanko fiksrigardis ŝin... Multegajn batalojn li partoprenis, sed estis pli facile komenci batalojn, ol komenci interparolon kun Jelica... Lia lango kvazaŭ nodiĝus!...

– Kion do vi faras? – demandis li, nur por diri ion ajn.

– Jen!

– Ĉu mi („vi“ ?) sentis Stankomankon?

Ŝi nur alrigardis lin per siaj grandaj okuloj, kvazaŭ volante diri: kial vi demandas stultaĵojn?

– Vi mankis al mi, kiel patrino al infano!...

Ŝi melkis... Laktaj ŝprucaĵoj vipis la melkujon...

– Kio okazis?!...

– Ĉu vi demandas min? – diris ŝi.

– Jes, vin!... Tiom da jaroj ni ne povis satbabili, sed kiam mi demandas, vi estas vortoŝpara!

– Kion mi diru?

– Nu... do... – diris li bonhumoriĝinte – ĉu mi mankis al vi?

– Nu, kial vi demandas tion?!... Ĉu vi ne scias?!...

– Nu... mi scias, sed al mi mankas interparolo kun vi!... Mi sopiras aŭdi tion el via buŝon!... Vi scias kiom longe mi tion ne aŭdis!... Ses jarojn vi estis mia revo... Mi mense vidis nur vin... tial mi tre... tre volas aŭdi tion el via buŝo!... Ĉu mi mankis al vi?

– Jes!...

– Ĉu tre?...

– Kiel roso al herbotigo! – diris ŝi, dum flamruĝo aspergis ŝian vizaĝon... – Se mi vin ne amus, mi ne transpaŝus vian sojlon!... Vi scias kion en la vilaĝo oni opinias pri fuĝintaj knabinoj. Mi eĉ fuĝintino iĝis, nur por esti via!... Al mi via tegmento estas pli kara ol la mia!.. Mi donus, ŝajnas al mi, la domon en kiu mi naskiĝis, por nur unu anguleto en via domo!...

Dum Stanko aŭskultis, animo lia ekzaltiĝis.

– Ĉu en la domo oni bone kondutis al vi?

– Kiel propraj familianoj!... Pli bone ol la propraj familianoj!... De paĉjo ĝis la plej malgranda infano en la domo, ĉiuj zorgas pri mi!... Ĉion, kion mi ne havis en mia domo– mi trovis ĉi tie!... Lasu la bovidon!...

Li lasis la bovidon!... Ŝi prenis la melkujon kaj ekportis ĝin en la domon, dum Stanko iris apud ŝi preskaŭebria kaj ekzaltita...

Noktiĝis... Sur la ĉielo videblis eĉ ne unu nubeto; la ĉielan bluejon surŝutis steloj, kiel verdan herbon printempa roso.

Stanko apartiĝis de la domanoj, kaj foriris en fruktarbejon, por tie atendi Jelican.

Post ĉiu susureto li ektremis, esperatendante... Finfine en la domo ĉio kvietiĝis...

Jelica aljenis... Li rimarkis ŝin el malproksimo, kaj ekiris renkonte al ŝi.

– Jen, pro dio!... – diris li malpacience.

– Mi devis atendi ke ĉiuj kuŝiĝu...

– Mi ja ne koleras kontraŭ vi; kontraŭ ili mi koleras!... Pli bone estus ke ni sidiĝu...

Tiam, preninte ŝian manon, li forkondukis ŝin malproksime en fruktarbejon, kie ili sidiĝis... La herbo estis jam rosoriĉa, sed ili ne atentis tion.

– Ĉu vi scias – diris Stanko – de kiam ni ne interparolis ĉi tiel?... Mi sopiras aŭdi viajn vortojn! Diru ankoraŭfoje, ke mi mankis al vi!...

Tiam, preninte ŝiajn manojn, li fiksrigardis ŝiajn okulojn kaj vizaĝon...

En ĉi tiu sensona nokto, en ĉi tiu plena silento, sola kun tiu, kiu al ŝi estis pli kara ol la propraj okuloj, Jelica sentis ke sango impetis en ŝian kapon...

Tial ŝi nenion scipovis respondi.

– Diru, mi petas!... Kial vi nenion diras?

Tiam li proksimiĝis al ŝi ankoraŭ pli, kaj ĉitkaŭprenis ŝian talion per sia forta, vira brako...

Kaj knabino jam ne povis regi sin... Senintence ŝi forpuŝis lian manon, forpuŝis ĝin preskaŭ furioze...

– Kio okazis? – demandis Stanko ŝin.

Ŝi eksaltis:

– Nenion... ne tuŝu min!

– Ĉu mi vin neniam brakumis?!

– Brakumis... tamen... nur nun ne faru tion!... Ne faru tion, mi petas vin kiel dion!

– Tamen, kial?

– Mi ne scipovas klarigi!... Sed al mi ŝajnas, ke mi perdos memregon se vi tuŝos min!

Ŝi tuta tremis kiel folieto. Se Stanko estus pli koncentrita, li aŭdus kiel batas ŝia koro... Tamen, ankaŭ li soris en sian ĉielon, avida kaj sopira, kaj renkontinte tian obstaklon,– li ekkoleris.

– Bone! – dirinte tion, li klinis la kapon.

Ekregis tomba silento... Eĉ venteto ne susuris; nur la senvortaj vidantoj dormeme palpebrumis...

Jelica tiam eksentis doloron en la animo. Laŭ la voĉo de Stanko ŝi konjektis, ke al li tio ne plaĉas... Ŝi vere bedaŭris, ke li ekkoleris.

– Kio okazis? – demandis ŝi, proksimiĝinte al Stanko.

Stanko sentis plorurĝon...

– Vi koleras... Sed vi ne pravas! Mi neniel volis aflikti vin!...

Ŝi silentis certan tempon, sed ricevinte nenian respondon, ŝi denove diris:

– Vi ne pravas!... Ne koleru!...

– Ĉu mi eĉ brakumi vin ne rajtas? – elmurmuris li tra la dentoj.

– Vi rajtas... sed ne faru tion nun!... Ne faru tion, mi petas vin per tio, kio al vi estas la plej sankta!... Mi neniam amis vin pli ol nun, mi ja sentas morturĝon, kiam mi vidas vin tiel kolera!... Ankaŭ antaŭe via brako estis sur mia ŝultro, ĝi ringis mian talion, sed ĉi tian mirsenton mi neniam ĝis nun spertis!... Mi sentas, ke mia koro elflugos el la brusto, tuj kiam vi min tuŝos... Mi freneziĝos, sciu, mi freneziĝos!... Sed ne rigardu min tiel riproĉe!... Mi nur vin amis, nur vin!... Mi neglektis mian propran sojlon, akceptis malbenon kaj de la paĉjo, kaj de la panjo, pensante: kun vi mi estos pli feliĉa, eĉ se malbenita ol... kun tiu – benita!...

Tiam ŝi komencis verŝi larmojn... Kiam ŝi komencis plorsuspiri, Stanko sentis kompaton... Li prenis ŝian manon, altiris ĝin al si, ŝi kroĉiĝis al lia ŝultro, kaj per larmoj aspergis arĝentajn fadenojn sur lia rajdista survesto...

Sentinte ŝian kapon sur sia ŝultro, Stanko forgesis ĉion... Ringinte per la brakoj ŝian talion, li komencis kisadi ŝian sunbrunan hararon kaj larmoplenajn okulojn...

Ĝuo disfluis tra lia korpo. La knabino en lia sino iĝis pli kaj pli kvieta; la terura plorurĝo cedis, la kisemo renaskiĝis...

Li rekonsciiĝis...

– Kion ni faras?! – diris ŝi terurplene.

– Ne timu!... Morgaŭ ankaŭ niaj gepatroj ĉi tion benos!... Kiuj amas, tiuj interkisas! – diris Stanko korkonkere, tenante ŝin en sia sino...

Kiam la suno krepuskis, en la korto de Milоŝo Seviĉo aŭdiĝis gastoj. La popo Milojo kaj Joĉjo Juriŝiĉo ekiris kun Alekso por reguligi liajn rilatojn kun Miloŝo.

Malantaŭ ĉiuj iris Stanko, majesta kiel pino, fiera kiel falko. La domanaro hastis renkonti ilin, unu post la alia ili kisocele alpaŝadis la manojn de profundaĝuloj.

Miloŝo sur la sojlo renkontis ilin nudkapa.

– Bonan vesperon!

– Dio faru ĝin bona!

– Ĉu vi kun ĝojo atendas gastojn? – demandis la popo Milojo.

– La bonajn – ĉiam!

Li invitis ilin en la domon.

En la ĉambro de familiestro la manĝotablo estis preta, sed sur ĝi estis nenio krom lignaj salujoj kun salo.

Ĉiuj lokiĝis kaj ekparolis pri la ribelo, ĉar nur pri tio oni povis paroli tiu-epoke. Ili rakontis diversajn historiojn pri heroaĵoj, la interparolo estis tiom interesa, ke ĝi longegiĝis...

Estis jam malfrue, kiam la popo rememoris.

– Tamen, Miloŝo, ni ja venis al vi!...

– Pro kiu bona kialo?

– Mi opinias ke vi mem divenos!... Tamen, se vi ne povas diveni, mi diros al vi!... Ni venis por vin – li montris al Alekso – amikigi kaj parencigi!... Se Dio volus tion, se ni estus iom pli saĝaj – ĉio ĉi okazus pli bonorde!... Tamen nun, okazis kio okazis!...

– Mi ne kontraŭstaras, ho popo!

– Tiukaze, diru kion vi deziras? – demandis Alekso.

– Tion, kion vi donas! – respondis Miloŝo.

– Nu, bone – diris Alekso. – Pri tio oni ne povas disputi!

Tiam li komencis malligi monsaketon.

Li mallevis dek dukatojn sur la manĝotablon.

– Ĉu tio sufiĉas por la domo?

– Sufiĉas!

– Kion vi ankoraŭ deziras?!...

– Mi venigu la samhejmanojn!... – diris Miloŝo. Tiam Alekso pagis iom al ĉiu samdomano. Kiam ĉio estis preta, la popo diris:

– Nun interkisu!

Post kio komenciĝis interkisado. Alekso interkisis kun ĉiuj en la domo, dum Stanko kisadis la manojn de plejaĝuloj; kun la aliaj samdomanoj ankaŭ li interkisis.

Kiam ankaŭ tio estis finita, Miloŝo diris:

– Surtabligu, ho infanoj, vespermanĝon!...

Jam post unu momento la maĝotablo estis plenplena da manĝaĵoj. Ekstere aŭdiĝis sinsekvaj pistolaj pafoj.

– Ho, se Dio volus alie!... – diris Miloŝo, ekĝeme.

– Ni estas kulpaj! – diris la popo Milojo. – Nin diablo erarigis, tial ni ekkredis al tiu mensogulo!... Tamen,' nun, kio estis, tio estis!...

– Estis, sed ne reestu! – diris Alekso. – Kion mi trasuferis – tio apartenas al pasinteco. Tio forportis kelkajn jarojn de mia vivo... Nu, finfine, mi jam sufiĉe vivis!... Mi vidis sufiĉe da bono kaj malbono. Kion mi ankoraŭ povas atendi?... Dio nin savu!

– Savu!
– Nu, kiam vi planas nuptofesti?... – demandis Milośo.
– Mi proponas ne prokrasti. Nun ne estas tempo por atendi! – diris Alekso.
– Vere, ne estas! – diris ankaŭ aliaj.
– Ni organizu ĉion la duan dimanĉon... La popo Milojo ilin geedzigu...
– Nu, bone!
– Ĉu ni interkonsentis?
– Jes, ni interkonsentis?
Estis profunda nokto kiam ili revenis hejmen...

## 5. EDZIĜFESTO

Stranga tempo, vere stranga! Dum unuflanke pafiloj bruegis, sango verŝiĝis torente, aliflanke, jen, oni edziĝfestenas!...

Ĉio okazas, kvazaŭ estus la plej kvieta epoko!... La domanaro ĝojas kaj gajas!... Oni pretigas dekorriĉan lignobotelon, kun pendantaj ĉenoj de taleroj kaj arĝentmoneroj, unu el la domanoj prenas ĝin, metas en avensakon, kaj portas de unu al alia invitito!...

Oni alvokis baptopatron. Nuptestro iĝis Jovo Juriŝiĉo. Nuptoeskortanton Stanko mem elektis jam en la monto. Li ja ne vane fratiĝis kun Leĉjo Migradiĉo!...

Alekso gajis, Petra gajis, la domanaro same. Bofratinoj petolis kun la gaja Jelica, kiu, mizerulino, fuĝis de masonaĵo al masonaĵo por eviti la petoladon!...

Stanko treege enuis. Li preferus ĉion ĉi fini rapidege, hajdukece... Pro tio li iĝis malpacienca. Li ne povis sidi kviete!... Li kuregis jen tien, jen alien, sed ĉie, kien li venis, li vidis la samon: ĉio malrapidis!...

Iun matenon la patro rigardis lin, kaj ekridis:

– Diru, ja, kio okazas?... Stanko ne sciis kion respondi.

– Kial vi pasumas tien-reen?... Vi ne povas trankviliĝi!...

– Nu... ne... – balbutis Stanko, dezirante forsilenti.

– Ho, ne!... Ĉu vi opinias ke mi blindas!... Tamen ankaŭ tio finiĝos!... Unu-du tagoj ne gravas, se oni atendis ses jarojn! – diris Alekso, ridetante kajrigardante lin rekte en la okulojn...

Ne povante elteni tiun rigardon, Stanko forkuris. Li aŭdis laŭtan ridon de la patro post si, kvankam li volis fuĝi ĝuste de ĝi... Tio lin kolerigis. Kial la patro ĉikanas lin?... Kaj, finfine, ĉu tio ja estas hontinda? Jelica kreskis kune kun li – neniu iam ajn ĉikanis ilin pro tio!... Multe da fojoj ili ludis nuptofeston kiam ili estis infanoj, neniu eĉ kapon alturnis pro tio!... Kio nun okazas?!...

Li ekkoleris kontraŭ la samhejmanoj, de la patro ĝis la bofratino Manjo.

„Tamen, je Dio, jes! – pensis li. – Kial ili priridas tion!... Cetere, se tio estas pririndinda, kial ankaŭ ili edziĝis kaj edziniĝis?..."

Poste li komencis koleri kontraŭ si. Tamen, kial li koleras ĉar ili ĉikanas?... Li amas Jelican. Pro ŝi li foriris en la monton; pro ŝi li tiom da homoj senigis je la vivo; tion scias kaj Dio kaj homoj... kio do nun okazas kun li?... Kial li hontas?...

Li kuregis tra la monto, sciante nek kien li iras, nek kion li faras...

La tagon antaŭ la edziĝfesto la samhejmanoj de Alekso hastegis. Kien ajn oni rigardas, ĉiuj laboras, haste agadas. Alekso alpaŝadis jen tiun, jen alian domanon, atentigante ke oni nenion forgesu. Petra umis inter la virinoj, ankaŭ ŝi ordonadis kaj komandis.

La suno estas falanta okcidenten; vespera venteto iomete fridis; sed tion ne sentis la laborantoj, kiujn la laboro varmigadis...

Stanko oftofte rigardis al la pordego. Li atendis kelkajn siajn malnovajn kamaradojn el Paraŝnico, kiuj promesis helpi al li plenumi diversajn laborojn kaj pretigi bakaĵojn.

– Ĉu ili ankoraŭ ne alvenis? – demandis Alekso.

– Al mi ŝajnas ke ili alvenas...

Vere, ĉe la pordego aperis Surepo, Zaverzano, Jovano kaj Joĉjo.

– Bonan vesperon! – ekkriis ili.

– Dio igu ĝin bona!

– Kie estas mia kunfrato? – demandis Stanko.

– Ankaŭ li baldaŭ venos. Li atendas Ivankon el Sarajevo.

– El Sarajevo, ĉu?

– Jes!... Li foriris aĉeti donacojn... Vi ne scias kiel brava estas tiu Ivanko... Brava kiel leono... Fidinda, neinfluebla – ĉien li penetras kiel aleno!... Je dio!...

– Ne uzu la nomon de dio!... Kiun vi laŭdas, tiu validas! – diris Stanko.

Oni alvokis ilin sidiĝi ĉe la malalta manĝotablo, kian tiutempe preskaŭ ĉiu domo havis. La virinoj alvenis por intersaluti, post kio oni alportis brandon „por ke la laborantoj kuraĝiĝu" – tiel diris Alekso.

Ĉiuj glutis brandon kelkajn fojojn. Surepo diris:

– Ek, ni eklaboru!...

– Nu... ĉivespere oni ne devas multe labori! – diris Alekso. – Ni ĉion jam finis mem. Tamen, morgaŭ... morgaŭ ni sidos en laboro ĝis super la oreloj!

– Bone! – diris la venintoj.

– Infano mia!... Alportu ankoraŭ iom da brando! – kriis Alekso.

Manjo tuj alportis al ili replenigitan lignobotelon.

La brando efikis parolige. Ektorentis rakontoj kaj ŝercoj. Kompreneble, kiam temis pri ŝercoj, Zaverzano estis ĉampiono. Li rakontis ĉiun historieton el la komuna vivo kun Stanko. Lia vigla rakonto, kaj serena ŝerco, bonhumorigis ĉiujn. Eĉ Surepo rakontis kial li hajdukiĝis... Kiam li finrakontis kiel li mortigis impostiston kiu kolektis fromaĝan kaj laktokreman imposton, ĉar li ekkaresis lian edzinion, Zaverzano diris al li:

– Ho, vi ja estas vera virinamanto!... Kvankam vi tion kaŝis!
– Nu, vi ĉion inversigas! – bruskis Surepo.
Senĉese torentis rido kaj ŝercoj.
– Homoj, ni ja vespermanĝu! – diris Alekso.
– Mi atendas la kunfraton! – diris Stanko.
– Pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte! Jen li! – diris Zaverzano.
Antaŭ la domo subite aperis Leĉjo kun kelkaj kamaradoj. Li ornamiĝis, kvazaŭ antaŭ altaron iros li. Verda dolmano sur li kovris la genuojn; sur la dolmano arĝentis plataĵetoj kun origitaj butonoj... Lian zonon ringis Sarajeva armilzono, brodita per arĝentaĵ fadenoj, Malantaŭ la zono videblis areĝentmoneroj: globoj brulis kiel lunlumo; inter ilin nestiĝis blanktenila pistolo kun tenilo el elefantosto, kaj inter la oreloj irizis verda smeraldo... Longa maldika pafilo en la mano havis pli ol tridek arĝentajn platetojn – la pafilkapo estis kadrita per arĝentaj fadenoj.
Li, belega kaj fiera, haltis kaj ekkriis:
– Bonan vesperon!...
Ĉiuj eksaltis kaj resalutis al la bravulo, kiu kun ĉiuj intersalutis, menciante la nomon de Dio,kiel se li venus el fremdlando.
Tuj post tio ili sidiĝis ĉe la manĝotablo, kiu post momento iĝis plena dafrandaĵoj, kiujn domanoj komencis alporti kaj surtabligi.
Oni interparolis pri la milito kaj pri bataloj kontraŭ turkoj, kiuj okazadis ĉiutage. Tio daŭris ĝis profunda nokto, kiam ili finfine disiris dormi...
La nokto ĵus komencis tagiĝi, kiam Zaverzano saltis kaj ekpafis per la pistolo.
– Leviĝu jam, ho festantoj! – ekkriis li per la tuta forto.
La hejmanoj rekonsciiĝis el dormo, leviĝis kaj forkuris al la puto por lavi sin. Leviĝis kaj plejaĝuloj kaj gastoj. Manjo, alpaŝinte ilin kun akvo kaj viŝtuko, verŝis akvon sur iliajn manojn.
– Laŭ la frumateno ŝajnas ke la tago estos neordinare bela! – diris Alekso.
Kaj vere! Tiu blueco de la blanka tago iĝadis pli kaj pli ruĝa, ĝis fine ne eklumis la arda suno, disverŝante radiojn, kiuj trembrilis sur dika roso... La aero estis freŝa, ĝi saturis la forton...
Ili lokiĝis ĉe malalta manĝotablo, post kio domanoj alportis al ili boligitan brandon.
– Ek, Surepo, – diris Zaverzano trinkinte brandon – ni komencu labori!
– Ek! – diris Surepo.
– Nu, familiestro! Ordonadu!
Ili foriris en la korton, atendante buĉotan virbovon.
Najbaroj komencis venadi. Ili estis alpaŝantaj la manĝotablon intersalutante... Stanko eluzis ilian alvenon por enkuri la domon...

La korto estis pli kaj pli plena. Loĝantoj de najbaraj domoĵ venadis por helpi.

Jam tute tagiĝis. Komencis rulbrui kaleŝoj. Alvenis la fianĉokunulo el Sovljako. Ĉiuj, de Alekso ĝis la plej juna domano, ekkuris por saluti la fianĉokunulon...

Iom post tio alvenis ankaŭ la nuptestro, Jovo Juriŝiĉo... Ankaŭ lin oni same renkontis...

Ĉiuj lokiĝis ĉe malalta manĝotablo antaŭ la domo, apud kiu sidis ĉiam pli da elektitaj invititoj.

Stanko foriris ekipi sin. Li havis veran vestindaĵojn. Kiam li aperis el la kromdomo por intersaluti kun la fianĉokunulo, nuptestro kaj aliaj festantoj, oni ne povis rigardi lin pro multega brilo de arĝentfadenoj kaj arĝentaĵoj. Digne li aspektas, tial li ankoraŭ pli dignas.

Post la intersaluto, la nuptestro kaj fianĉokunulo formoviĝis, kaj sidigis lin inter sin. Leĉjo ekiris en la kromdomon kun donacoj de nuptoeskortanto.

Komenciĝis tagmanĝo. Oni manĝis nuptmaniere – per la manoj. La gejunuloj tute ne sidiĝas ĉe la manĝotablo, ili manĝetis senside... Pafoj tondris unu post la alia...

Kiam estis alportita rostaĵo, Leĉjo elirigis Jelican kun vualita vizaĝo. Ŝi levis la vualon, kaj oni povis vidi ke ŝian sanan vizaĝon aspergas rufa flamruĝo. Leĉjo gvidis ŝin de nupteskortanto al nuptestro, kaj al la aliaj. Ŝi kisadis la manojn de ĉiuj plenaĝuloj; la malpliaĝulojn ŝi kisadis en la vizaĝon. Tiam ili ambaŭ komencis priservi la edziĝgastojn.

Kiam la tagmanĝo estis finita, la nuptestro ordonis ke oni pretiĝu...

Rapidmovaj junuloj saltis de la manĝotablo, kaj komencis jungi kaj bridi la bonajn ĉevalojn. Pafilo post pafilo pafadis; kun la pafado miksiĝis ĉevalaj blekoj...

– Ĉu ĉio pretas? – ekkriis la nuptestro.

– Pretas! – respondis oni.

– Ek!

La ĉevaloj kaj festantoj estis ornamitaj per floroj. Pli ol kvardek rajdantoj ekkuregis al la pordego kaj haltis antaŭ la festantoj.

– Ho, je la nomo de dio! – diris la nuptestro.

Tiam ĉiuj ekiris...

## 6. ORDINARA EVENTO

Ili ĵus eliris el la preĝejo, haltis iomete por atendi la popon, kiam inter ilisubite aperis Kamelo. Vidinte lin Alekso tuj ektremis, ĉar li sciis ke Kamelo ne venas senkiale. Tamen, dezirante tion kaŝi de la festantoj, li alpaŝis al Kamelo gaje, ridetante.

– Dank al Dio, ankaŭ vi alvenis!... Mi jam ne esperis vidi vin!... Kvankam mi bedaŭrus tion!...

– Nu, jen, mi alvenis!... Feliĉiga estu via festeno!... Dio donu, ke vi ankaŭ nepon vidu!...

– Dankon!... Ankaŭ vi, Dio tion donu, baldaŭ organizu samtian festenon!...

Alekso parolis tiel, kvankam li senĉese volis diri: ne, vi ne venis senkiale!...

– Ĉu vi venis por ion sciigi? – demandis lin la nuptestro.

– Kion mi povas sciigi: mi ja alvenis partopreni la edziĝfeston de Stanko!... Kie estas la lignobotelo?...

Oni tuj donis al li la lignobotelon. Li krucsignis kaj alrigardis al la ĉielo:

– Dio donu, ke tio estu feliĉiga kaj longedaŭra!...

Tiam li eksuĉis la brandon.

La popo aperis sur la sojlo de preĝejo. La homoj leviĝis.

– Sidiĝu, sidiĝu!... – diris li. – Ho, jen Kamelo!

– Jes, patro, mi alvenis! – Benu!... – diris Kamelo demetante la ĉapon kaj proksimiĝante al lia mano.

– Dio vin benu!... Ĉu ankaŭ vi venis al la edziĝfesto?

– Foje ankaŭ tio okazas! – dirinte tion, Kamelo ekridis.

Stanko, Leĉjo kaj aliaj intersalutis kun li. Li nur ekflustris al Leĉjo:

– Ni poste interparolos.

Post tio li komencis ŝerci. Vidiante lin gaja kaj parolema, Alekso malstreĉiĝis. Li komencis babileti kaj interparoli kun la festantoj... La pasema maltrankvilo malaperis kiel ombro, ĉiuj bonhumoriĝis...

– Pretiĝu! – diris li.

La gejunuloj denove ekkuregis al la ĉevaloj kaj kaleŝoj. Tujtuje ĉio estis preta por sidiĝo.

Kamelo proksimiĝis al Leĉjo:

– Katiĉo salutis vin.

Ĉu Katiĉo?

– Jes. Li diris ke ĉi-nokte, malfrue, vi kun la kunularo venu al Sablobordo...

– Kio okazas?

– Bonaĵo!

– Nu... Vi scias...

– Mi ja alportis tiun novaĵon. Noktomeze preterpasos kapimpostisto, ni devas lin embuski!... Vi gajnos eĉ pli ol bezonas!... – diris li ridetante.

– Ĉu ankaŭ Katiĉo estos tie?

– Mi ne scias. Li diris ke vi estu tie.

– Bone.

– Ŝajnigu ke viu nenion scias, ne malbonigu la festenon!

– Ek!... Sidu!... – ekkriis la nuptestro.

Leĉjo forkuris al la junedzino kaj sidiĝis kun ŝi en la kaleŝon de la nuptokunulo. Stanko sidiĝis kun la nuptestro. Tie oni lasis ankaŭ lokon por la popo.

– Trovu lokon por Kamelo!... – ekkriis la nuptestro.

– Jen!... Jen!... Venu ĉi tien!... – aŭdiĝis krioj de ĉiuj flankoj.

Kamelo surgrimpis la plej proksiman kaleŝon.

– Ĉu ĉiuj sidiĝis?

– Jes, ĉiuj.

– Ek! – ordonis la nuptestro.

Hejme ilin denove atendis manĝaĵplena tablo. Oni denove manĝis kaj trinkis... Denove pafadis pafilo post pafilo.

Jam komenciĝis sunsubiro. Leĉjo nur interŝanĝis rigardon kun Kamelo.

– Ĉu estas tempo?

– Estas!...

Leĉjo alvokis Stankon.

– Kunfrato!... – diris li. – Mi foriras!

– Kial?

– Katiĉo mesaĝis ke ĉi-vespere mi devas transiri Drinon.Tamen... tion diru al neniu!... Mi foriros sola, kaj miaj homos foriros poste...

– Bone – diris Stanko.

Leĉjo sidis ankoraŭ iom da tempo, poste leviĝis kaj komencis intersaluti.

– Sidiĝu, adoptito mia, kien vi iras? – demandis Alekso.

– Mi devas iri al la kunularo, adoptinto mia!... Nu, ĉio bonas, estas gaje, kaj... ĉio, sed mi devas mian kunularon viziti!...

La popo Milojo ekkriis:

– Ne haltigu lin, Alekso! Li scias kion li faras!

– Adiaŭ, fratoj miaj!

– Adiaŭ al vi!...

Leĉjo foriris...

La festeno daŭris. Oni trinkis, oni kantis, pafadis kaj dancis. La nokto estis sinkanta malrapide. Profundaĝuloj, preskaŭebriaj, postulis guzliston. Aŭdiĝis krioj de ĉiuj flankoj:

– Zaverzano!... Zaverzano!...

Oni ekiris serĉi lin. Tamen, oni trovis nek Zaverzanon, nek iun ajn kamaradon de Leĉjo; eĉ Kamelo estis malaperinta.

Festenantoj alrigardis unu la alian.Io glacia saturis iliajn animojn.

– Tamen, kien ili foriris? – demandis Alekso.

– Ni ne scias! – respondis samhejmanoj.

– Sed kiam ili foriris? – demandis la nuptestro.

– Ni ne scias. Ni opiniis ke ili estas inter la festenantoj.

Li komencis rakonti historiojn. Tamen, la festenado ĉesis. Aŭdiĝis nek kantoj, nek pafoj. Ŝajnis ke ĉiuj ariĝis por interkonsenti pri io.

La popo leviĝis de la manĝotablo kaj alvokis Stankon.

– Ĉu ĉi-nokte okazos batalo? – demandis li. – Vi tion scias. Mi vidis, kiam Leĉjo ion flustris al vi.

– Okazos, ho popo, sed trans Drino...Tamen, mi petas vin diru tion al neniu!...

La popo revenis al la manĝotablo. Ili interparolis, sed dum ĉiu interparolo estis menciata Leĉjo kaj lia kunularo... La fruntoj malsereniĝis, ĉiuj pli kaj pli profundiĝis en proprajn pensojn. Finfine la popo Milojo diris:

– Ni disiru, ho homoj!... Ni ja sufiĉe gajis!... Finfine, tia estas nia epoko!... Nuntempe ekzistas homoj, kiuj eĉ unu buŝplenon ne povas finmanĝi, tamen ili vivas! Ni iru!

La homoj komencis leviĝadi.

– Tamen, sidiĝu! – kriis Alekso.

– Dankon!... Nun ne estas tempo festeni. Ni plenumis tion, kion Dio volis. La infanoj estu vivaj kaj sanaj! Cetere, ni eĉ tro multe gajis, se oni scias en kiu epoko ni vivas!...Bonan nokton!...

Ili komencis adiaŭi... La fianĉokunulo kaj nuptestro ordonis ke oni pretigu la ĉaron.

– Ĉu vi ne tranoktos? – demandis Alekso kaj Petra.

– Ne, ni ne tranoktos!... – diris Joĉjo. – Veron diris la popo: nun ĉiuj devas esti en sia domo, kun siaj domanoj!...

– Ĉu vi venos morgaŭ?

– Ne pensu pri tio!...Se Dio volos ke ni travivu ĉi tiujn tagojn, ni facile povos denove gaji. Bonan nokton!

Ĉiuj komencis disiri. La domanaro ilin forakompanis. Ĉiuj mallevis la kapojn...

Alekso eniris la domon. Apud fajrejo estis sidantaj kelkaj najbaroj kaj la alvokisto Simo.

– Ĉu vi trinkas?...

– Nu... iomete...

– Tamen, ĉu neniu el vi vidis kiam ili foriris?

– Neniu!...

– Sukceson al ili!... La Dio estu ilia amiko!... Manjo!...Venigu Stankon!

La maljunulo foriris en sian ĉambron...

La najbaroj kaj Simo leviĝis. Vane oni penis haltigi ilin – neniu volis resti.

Estis profunda nokto kiam la domanaro restis sola... Virinoj estis ordigantaj la domon. Petra diris al ili kuŝiĝi. Tiumomente Stanko eliris el la ĉambro de la patro.

– Ĉu vi kuŝiĝos, filĉjo?

– Mi kuŝiĝos, patrinjo...

– Iru... iru...

Ekregis plensilento...Kvazaŭ en tombo. Steloj vibris, kvazaŭ baraktante por forflugi desur la ĉiela tegaĵo.

Abrupte en malproksimo aŭdiĝis pafiloj... Stanko, sidante antaŭ kromdomo, fiksaŭskultis...

– Kial... ĝuste hodiaŭ! – flustris li. – Kial ĝuste hodiaŭ tio devis okazi!... Kiam ni, la povruloj, vivos senzorge?... Kiam ni povos gaji kaj festeni senzorge?... Ho, Sinjoro!... Ĉu vi iam ajn donos al ni almenaŭ unu senzorgan tagon?!

Pafiloj denove pafis, la steloj denove blinkis... Neniu respondis...

Stanko profunde ekĝemis, kaj eniris la kromdomon...

Jen, tia estis lia edziĝa tago.

# 7. LUCERNO ESTINGIĜAS

Tago post tago pasis... Alekso kaj Petra jam ne povis priservi sin mem... Kun maljuneco alvenis ankaŭ malsano. Ili malsanis tuj kiam la plej eta vento zefiris.

Jelica ŝvebis ĉirkaŭ ili. Amema, varmkora, ŝi senĉese dispeladis la melankolion de la maljunaj gepatroj, kiuj benadis ŝin...

Alekso tamen sentis ke li velkas... Se li iris, li tuj komencis spiregi; kiam li ion komencis fari, li laciĝis.

Foje, dum venteta tago, li el fruktarbejo, kie li nutris porkidojn, revenis violkolora kiel indigo.

– Kio okazis? – demandis Petra, vidante lin ŝanĝiĝinta. Li proksimiĝis al la fajrejo kaj komencis dentoklaki.

– Frost!

– Ĉu vi volas kuŝiĝi?

– Atendu ke mi iom varmiĝu...

Tamen li sentis pli kaj pli grandan froston... Li nur kapneis, kaj diris:

– Oni ne povas varmiĝi, kiam frosto venas el la koro!... Mi iru kuŝiĝi.

Li leviĝis, sed la maljunaj kruroj komencis tremi...

– Hej, Alekso mia! – diris li al si mem, kaj ekridis senvole. – Eĉ la krurojn ne plu obeas al vi! Venu, Jenjo, ido mia, subtenu min!...

Alkurinte, Jelica kaptis lin per la brako.

– Ek, paĉjo, kuŝiĝu!

– Mi ĝuste tion volis... Iu el la domanoj iru al la popo!...Mi bezonas lin!...

Ili enkondukis lin en la ĉambron. Jelica kuŝigis lin en la liton, kaj kovris lin per lanaj kaj buntaj linaj kovriloj. Petra sidiĝis ĉe lia kapo, fiksrigardante lin per la larmoplenaj okuloj. Li alrigardis ŝin, kaj ekridis:

– Kio okazas, avinjo? Kio okazis al vi, frenezulinjo mia?!... Vi ne bezonas min en ĉi tia stato!... Vi ja vidas, kara, ke sub ĉi tiu povra haŭto nur ostoj restis!...

Ŝi silentis. Li etendis la brakon, kaj kaptis ŝian manon. Li rigardis ŝin, kaj komencis ridi.

– Vi ja vere freneziĝis! Mi ja ne mortos!... Mi iomete frostotremas, sed vi tuj ekploris, timigis miajn infanojn!... Silentu, tio estas hontinda!... Eĉ se mi mortos, tio ne gravas! Mi vivis sufiĉe. Dank al Dio, ni ambaŭ vivis bele!... Ni postlasos posteularon, ili ĉiuj estas kiel oraj pomoj. Ni edzigis ilin, ni havas neparon, ni satkantis, ni satridis!... Nun... la morto! Negrave! Ĉu tio estas inda ploron?Aŭ vi pensas, ke vi por ĉiam restos ĉi tie, sur la tero? Tio ja maleblas, bela mia anjo!... Vi trovos min sur la ĉielo, antaŭ ol mi sukcesos tie nestiĝi!... Mi nur ĉirkaŭrigardos, kaj mia avino estos antaŭ mi!...

– Vi ŝercas! – singultis Petra.

– Ho, jen vi!... Vi eĉ diros, ke al vi estas pli malfacile ol al mi... Ho, Dio mia!... Ĉu vi estas normala, ino ina!... Kial mi ne ridu!... Mi satlaboris, eĉ pli ol volis!... Mi plenigis, kune kun vi, la tutan domon per samdomanoj, ĉiuj estas sanaj kaj gajaj, estimataj kaj famaj; ĉiuj homoj, la tuta vilaĝo scias, ke mi restis ĉasta!...Cetere, Dio volis ke mi estu sana ĝis la mortmomento!... Kion mi povus plu fari ĉi tie?... Ĉu mi ĝisvivu, ke oni min portadu tien-reen, ĉirkaŭ la fajrejo? Ne penu, avino, ĉio estas vana!...Diru: dank al dio!... Povis okazi alio, mi kiel hundo povis krevi en tiu forgeskelo, en la ŝlimo, suferanta kaj turmentata!... Sed la bona Dio, jen, ĉion aranĝis en dezirinda maniero!... Jen, mi tenas ĉi tiun fidelan manon, kiu dum la tuta vivo estis mia apogilo, kaj kies apogilo mi estis... Mi aŭskultas zumadon en la domo, kvazaŭ en abelejo, sciante ke ili ĉiuj estas sango de mia sango!... Ridetu, forviŝu la larmojn, ekkantu!... Ni satvivis en bono kaj amo!... Mi disiĝas de vi, sed ne por longa tempo!... Vi min serĉos, ĉar vi ne povas sen mi!... Ĉi tio ja estas same, kiel kiam mi veturas en Ŝabacon!...

La pordo malfermiĝis, en la ĉambron eniris la popo kun Joĉjo Juriŝiĉo.

– Nu... Jen, la popo diru al vi!... Li estas homo, kiu sanktajn librojn legas...

– Sed kio ja okazas kun vi? – demandis la popo zorgoplene, proksimiĝinte por manpremi...

– Fakte, nenio!... Mi ne povas diri ke min io doloras, ĉar min nenio doloras!... Mi iom dorlotiĝis pro bona vivo, tial ĉiuj miaj korperoj dorlotiĝis!... Mi devas peti la krurojn iri, makzelojn maĉi, ĉar dentojn mi ne havas, kaj la okulonrigardi...Tial mi alvokis vin por interŝanĝi ankoraŭ kelkajn vortojn. Dankon kaj al vi, kaj al Joĉjo!...

– Joĉjo estis ĉe mi, kiam via knabo alvenis.

– Tre bone!... Sidiĝu!... Dume vi, mia bona avinjo, alportu ion por drinki.

– Nebezonate! – diris ambaŭ.

– Kial, nebezonate?La viva homo ĉiam tion bezonas. Kiam oni fermas la okulojn, sufiĉas unu brandoglaso!... Alportu, alportu!

Petra foriris.

– Mi alvokis vin, ho popo, por morti kiel kristano!... Estus peke vivi sepdek ses jarojn, vivi dolĉe kaj bone, sed morti sen la sanktago!

– Do, estas bone ke mi kunportis..

– Nu... vi antaŭsciis!

Kiam temas pri maljuna homo, oni ĉiam devas esti preta!... – diris la popo serioze.

– Tio estas vero, ho patro!

– Joĉjo, lasu nin iomete solaj! – diris la popo.

Kiam Joĉjo eliris el la ĉambro, la popo demetis avensakon desur la ŝultro, elprenis siajn librojn kaj hostion, kiuj troviĝis aparte en viŝtuko. Li petis iom da vino, kaj oni alportis ĝin.

– Ĉu vi povas leviĝeti?

– Mi povas, ho popo, mi povas! – dirinte tion, Alekso leviĝis sur la kuŝejo.

La popo demetis la ĉapon, prenis epitrahelion, krucosignis, kisis kaj surmetis ĝin; post tio, malferminte la libron, li komencis legi.Traleginte preĝon, li demandis Alekson pri la pekoj.

– Jes, mi estas peka, ho patro!... – Konscie – nekonscie, mi sendube estas peka, ĉar mi paŝas sur la peka tero. Mi preĝas al Sinjoro, por ke li pardonu min!...

Farinte pekliberigan preĝon, la popo komuniis lin.

– Nun... mi kvazaŭ naskiĝus! – diris Alekso, serena kaj gaja.

La popo remetis siajn librojn en la avensakon.

– Ĉu Joĉjo povas eniri? – demandis Alekso. Anstataŭ respondi, la popo alvokis Joĉjon eniri la la ĉambron.

– Joĉjo, frato mia, ĉu mi faris ion ĉagrenigan kontraŭ vi? – demandis Alekso.

– Mi faris kontraŭ vi, sed vi kontraŭ mi faris nenion!... – diris Joĉjo.

– Vi deziris justecon!... Koncerne tion, tion mi pardonas!... Pardonu ankaŭ vi al mi.

– Dio pardonu nin ĉiujn...

Ili interkisis.

Petra eniris la ĉambron.

– Nu, venu ĉi tien!... Kun vi mi dum la tuta vivo divididis kaj malbonon kaj bonon!... Se mi iam ajn ĉagrenigis vin – pardonu, ankaŭ al vi mi ĉion pardonas, kaj dankon al vi!... Venu ke ni interkisu!...

Ili interkisis.

– Tamen, ne ploru!... – diris li, vidante larmojn en ŝiaj okuloj. – Ne faru tion!... Jen, la homoj diru al vi: ĉu ie ajn oni vivis pli bone ol ni, ĉu ie ajn ekzistas ĉi tiel feliĉaj gepatroj, kiuj havas nur sanajn kaj gajajn naskitojn kaj kreskintojn!... – Ne kolerigu dion!...

– Mi venigos la samhejmanojn!... – diris Joĉjo.

– Kial?... La infanoj okupiĝu pri siaj aferoj.

– Ĉu vi nenion diros al ili?... – demandis Petra.

– Kion mi povas diri al ili?... Ili ĉiuj estas honestaj kaj diligentaj. Neniu el ili iam ajn faris ion nekonsilindan!... Ili ĉiuj harmonie laboros kaj konkordos!... Catere... kial vi ariĝis ĉi tie!... Mi ankoraŭ ne mortos!... – dirinte tion, li ekridis. – Estus pli bone se vi alportus al la homoj iom da brando!

– Jen, mi alportis. Ĉu vi volas iomete?...

– Kompreneble, mi volas!... Ĉu ekzistas iu ajn kiu ne volas brandon?... Donu ke mi tostu!...

Kiam ŝi donis lignobotelon, li krucsignis kaj diris:

– Dio savu, ho popo!... – li eksuĉis.

– Por la saviĝo de Kristo!... – diris la popo, prenante la lignobotelon. Li tostis al Joĉjo, post kio ili metis la lignobotelon antaŭ sin.

– Ĉu Stanko estas hejme? – demandis la popo.

– Ne estas... Lo, dank al Dio, li estas en Paraŝnico. Li alvenas, restas kelkajn tagojn, kaj denove foriras. Mi ĉiam antaŭscias kiam li foriros. Antaŭ ol foriri, li mallevas la kapon, faltas la frunton, eksilentis... Li kutimiĝis al la monto, sub tegmento li vivi ne povas...

– Ĉu vi mesaĝis ke li venu? – demandis Joĉjo.

– Jes, ni mesaĝis – diris Petra.

– Kial vi faris tion? – diris Alekso.

– Sensenca demando!... – diris Petra. – Vi ja malsanas. Li devas troviĝi ĉi tie!...

– Por vidi mian morton... Kvazaŭ li ĝuste tion sopirus!... Tamen... li venu, se vi vere opinias ke tio estos bone!... Mi opinias ke li estas pli bezonata tie, kie oni bezonas viran manon.

La pordo malfermiĝis, kaj Stanko impetis en la ĉambron.

– Paĉjo!... – diris li, demetante la ĉapon, kaj kisocele proksimiĝis al la mano de la patro. – Ĉu vi estas viva?...

– Jes, mi estas viva, filo mia.

– Dank al dio!...Dankon al li, ĉar li permesis ke mi trovu vin viva!... Pardonu kaj benu...

Alekso volis ion diri, sed misglutis.. Du brilaj larmoj kuniĝis sub lia mentono, falis sur la trememan manon. Li prenis la kapon de Stanko, altiris ĝin al si, kaj kisis ĝin kelkajn fojojn...

La popo, kvankam li tre malofte larmis, komencis plori – pri Joĉjo kaj Petra eĉ paroli ne indas!...

Manviŝinte la okulojn, Alekso diris:

– Nu – verdire: la vivo estas kara!... Eĉ se ĝi estas la plej suferiga, tamen oni malvolonte disiĝas de ĝi!... Malgraŭ tio, jen, oni devas tion fari!... Ho, Petra!... Alvoku la infanojn... ĉiujn alvoku!... Mi volas adiaŭi ilin!... Mi volas ilin satkisi kaj satkaresi tiom, kiom mi povas...

Petra eliris el la ĉambro, kaj baldaŭ ĉiuj atakis la kuŝejon de la maljunulo... Li kisadis ĉiujn: kaj la filojn, kaj la bofilinojn, kaj la neparon... La filon de Stanko – Milojon, li metis sur la sinon, sed la ostoj estis maljunaj – la tremaj manoj senfortiĝis... Ili jam nenion plu povus teni... Alrigardinte Jelican, li diris:

– Forportu lin, bofilino!...

Post tio li malleviĝis sur la kuŝejon, kaj eksilentis, spirante mallonge kaj malkontinue.

La popo ordonis ke la inoj, krom Petra, kaj infanoj, eliru el la ĉambro, kion ili faris...

Ekregis plensilento. La maljunulo turniĝis al la muro, silentante... Pasis sufiĉe longa tompo en tiu silento. La popo leviĝis.

– Mi iras iomete al mia domo, sed mi rapide revenos – diris li. Li estis ekirinta al la pordo kiam Alekso mansvingis.

– Ankoraŭ iomete... – elflustris Alekso.

Lia vizaĝo estis flava kiel vakso. La popo haltis... La okuloj de la malsanulo rigardis lin streĉe... Al la popo ekŝajnis ke ili rigidiĝas kaj vitriĝas. Li ĵetis rigardon al la brusto, kiu apenaŭ leviĝadis. Li alproksimiĝis kaj vidis ke la suba lipo bluiĝas kaj sinkas...

– Alportu kandelon!... – diris li duonkonscie.

Ĉiuj ekhastis. Aŭdiĝis lamentkanto. En la okuloj de la malsanulo io ekfulmis, sed nur dum momento – kaj estingiĝis... Oni bruligis kandelon, rapide puŝis ĝin en lian manon, kaj la pala flamo de vakskandelo lumigis la pian, ridetantan vizaĝon.

– Li forpasis!... – diris lapopo, kaj demetis la ĉapon. – La martiro forpasis sen sufero, kiel ĉiu justuloj.

Leviĝis lamentkanto. Virinon elflugis en la korton por diskonigi tion al la vilaĝanoj.

– Hej, la povra Alekso! – diris Joĉjo.

– Senbrue vivis, senbrue mortis, samkiel lucerno brulas kaj estingiĝas!... Dio indulgu lin...

Dio indulgu lin!...

Najbaroj komencis venadi, kaj pretigis ĉion por lavi la forpasinton...

La popo kaj Joĉjo eliris for... Nokto estis malrapide descedanta...

## 8. PEZNUBA ĈIELO

Oni entombigis Alekson. La funebraĵon ĉeestis multe da homoj. La povra Petra tuj post la reveno de la tombejo ŝoviĝis enfornoangulon... Ŝia animo bezonis silenton kaj larmojn. Ŝi tutkore ploris pri sia malnova vivkunulo. Ŝi ne povis ne plori!... Ĉiu ŝia rigardo falis sur iun memoron... Tie ili vivis, tie ili laboris...

Tamen, la domo devis vivi. Domo sen estro ja ne povas esti...

Tial, kiam finiĝis la naŭtaga funebra manĝo, ĉiuj kolektiĝis en la ĉambro de la familiestro.

– Panjo, – diris Stanko – hodiaŭ ni devas elekti estron. Ni ne volis fari tion sen vi. Diru, kiun ni elektu?

La maljunulino silentis.

– Mi opinias ke la estro estu Stanko! Li estas la plej konata inter la homoj! – diris Kerstivojo.

– Estu tiel!

– Mi samopinias! – diris Petra. – Li estas, verdire, la plej juna, tamen li estas la plej konata kaj la plej fama...

– Tamen, mi malsamopinias, patrinjo!... – diris Stanko. – Mi dekutimiĝis de la domo kaj plugilo! Mi estas montano, patrinjo!... La domo bezonas familiestron, ne hajdukon... Ĉu vi ne aŭdas kiel pafiloj bruegas; ĉu vi ne sentas kiel sango odoras ĉie, ke ĉiu herbeto estas sangumita?!... Tien mi iras, kie sango elverŝiĝas, kie pulvo odoras, min ĉi tie sufokos doma fumo!... Mi proponas ke la familiestro estu Kerstivojo, li estas la plej aĝa!...

– Tamen, ĉu vi denove forlasos la patrinon! – ekkriis Petra.

– Mi devas, patrinjo!... Mi devas pro la sklavoj, kiuj estas apartigitaj de siaj patrinoj!... Mi vidis plurajn katenitajn sklavkolonojn: ĉiuj estis junaj, kiel guto rosa. Ilin turkoj apartigis de la patrinoj, por ilin ponardi aŭ torturi!... Mi ja ĵuris per Dio kaj amo de miaj gepatroj, kaj per mia infana amo, ke mi, dum mi vivas, liberigadossklavojn de la turkoj, mi liberigados ilin, por ke ili povu reveni al siaj patrinoj!

La maljunulino stariĝis. Ŝi tremis kiel folieto.

– Iru, filo mia!... Dio benu ĉiun paŝon vian! Mi, via patrino, preĝos al Dio kaj por vi, kaj por ili!

Tiam ŝi komencis lin kisadi kaj surverŝi per larmoj.

– Ĉu ni interkonsentis ke Kerstivojo estu la familiestro? – demandis Stanko.

– Jes, ni interkonsentis! – respondis ĉiuj.

– Tiukaze, Kerstivojo, frato mia, ni konfidas al vi nian maljunan patrinon kaj la infanetojn!... Mi en la domo resti ne povas! Nubiĝis la ĉielo super la kompatinda Serbio. Ĉiu vira mano nuntempe devas brakumi pafilon... Ne estas facile, fratoj miaj, militi kontraŭ la plejimperiestro!... Nin la malamikoj ĉirkaŭis de ĉiuj flankoj. Sur Kamenico pereis heroe Sinĝeliĉo, pereis tiel heroe, ke eĉ Dio envias lin; Deligrado baldaŭ estos en la manoj de turkoj; Karaĝorĝo batalas sur Senico, sed vane kaj li kaj Velko batalas; nin atakis la plejŝtato... Mi devas jam hodiaŭ veni en Loznicon. Loznicon atakis turkoj... Se Dio volos ke tiujn turkojn ni venkos, se mi revenos sana kaj elana, tiam ĉio estos alia... Do, Kerstivojo, atentu!... Se okazos turka atako, prenu la samhejmanojn kaj ĉion, kion vi povas porti, rifuĝu al Komusa Trabo, al Radenkoviĉo. Tie la arbaro estas densa, krom tio, la rivero Savao estas proksime, vi povos ĝin transpasi.

Interkisinte kun la fratoj, li kisocele proksimiĝis al la mano de la patrino.

– Benu min, patrinjo!... Larmoj inundis la vizaĝon de Petra. Ŝi prenis lian manon kaj premis ĝin sur siajn sulkabundajn vangojn...

– Ho, virmano! Defendanto de senfortuloj, fiero de la patrino!... Iru, filo mia!... La patrino ploras, sed benas vin!... Iru, bravulo mia!... Iru, defendu tiujn, kiuj defendi sin ne povas!... Ankaŭ ili havas siajn patrinojn, kiuj pri ili veĝemas!... Iru, filo mia, iru!...

Ŝi kisis ŝian manon kaj elĉambriĝis.

Antaŭ la domo, tenante blankan, lintolan sakon, staris Jelica. Kiam li ekvidis ŝin, li sentis svarmotikladon.

Li diris al ŝi eĉ ne unu vorton, sed preterpasis ŝin. Tio estis signo ke ŝi akompanu lin. Tiam ŝi metis la sakon sur la ŝultron, kaj ekiris post li.

Ili iris silente. Kiam ili estis malproksime de la pordego, li haltis. Li turniĝis kaj atendis ke ŝi alpaŝu. Tiam li prenis ŝian manon, kiu tremis.

– Kio okazis?!... Kial vi tremas? – demandis li.

– Mi ne scias... – diris ŝi.

Li fiksrigardis ŝin. Neniam ŝi ŝajnis al li pli bela ol nun, heligita per la matenaj radioj sunaj... Lia koro ekbategis pro doloro.

– Ni estas tre malbonŝancaj! – diris li. Ŝi nenion respondis... Tamen li vidis ke tremdancas ŝiaj purpuraj lipetoj.

– Dio ne volas!... Ĉu vi scias, ho, Jelica, kiel mi sopiras vin!... Miaj vangoj ekflagras tuj kiam mi vidas vin!... Mi ja eĉ ne havis tempon karesi vin!... Mi

sopiras viajn okulojn, ho, Jenjo, vian brakumon, vian amemon!... Al mi ŝajnas ke mi eĉ mortos sopirante vin...

Ŝi komencis verŝi larmojn...

– Mi ja same sopiras, sed ni ne povas batali kontraŭ Dio kaj sorto!...

– Tamen, kunpremu la koron, haltigu la larmoj. Ĉar min larmoj akompanas dum mia tuta vivo!... Mi sopiras vidi ne larmojn, sed ridetantan buŝon kaj amemon!...

Ŝi viŝis la okulojn, kaj ekridetis.

– Tiel, feliĉo mia! – diris Stanko, kaj ĉirkaŭbrakis ŝin. – Ridu, ke mi vidu vian rideton kiam mi solas, kaj kiam mi partoprenas la plej teruran batalon!... Ĉu vi scias kiom ĝi min gajigas?... Nu, aŭskultu min, deziro mia!... Zorgu pri ido nia, pri nia Milojo!... Gardu lin kontraŭ ĉiu malbono!... Kaj flegu mian patrinon. Ŝi bezonas vian flegadon kaj amemon... Kion vi faros por ŝi, tion vi faris por mi!... Ĉu vi faros tion?

– Jes, mi faros tion! – ŝi ridetis. Tiam li kisis ŝiajn purpurajn lipojn.

– Kiam vi min tiel rigardas, mi sentas min beata!... Mi kvazaŭ vidus kaj dion kaj anĝelojn diajn!... Bone!... Aŭskultu min atente!... Kaj aŭskultu la patrinon... Mi alportos al vi donacojn kiuj okulojn viajn ekzaltos! Kion surhavas paŝaedzinoj, tion vi surhavos!...

– Nenion mi bezonas, gravas nur ke vi venu!... Vi estas mia la plej bela kaj la plej granda donaco!... Mi povas sanktpromesi al Dio, ke alian deziron krom ĉi tiun, mi ne havos!... Ĉion kion vi volas ke mi faru, mi faros. Ĉu mi ne ĉiam faris ĉion, kion vi diris?

– Vi faris, sed...

– Sed, kion?

– Tamen, nun estas alia situacio!... Almenaŭ al mi ŝajnas ke estas alia situacio!... Antaŭe ĉi tie estis ankaŭ paĉjo... Ankaŭ la patrineto estis pli vigla. Almenaŭ pri la domo mi tute ne zorgis!... Cetere, ankaŭ la turkoj timis... Ĉio estis alia... Sed nun...

Sed nun...

– Ĉu vi ne vidas ke ili atakas jam multan tagojn... Ne ekzistas loko sur Drino kiu ne estas ilia pasejo... De frumateno ĝis plena mallumiĝo daŭras sangaj bataloj!... Ni mortigas ilin, sed ju pli ni ilin disbatas, des pli da novaj soldatoj alvenas!... Ili aperas kiel herbo el la tero!

Jelica ektremis.

– Ne tremu, ne timu!... Ni batalos ĝis nia aŭ ilia pereo! La nigra tero eklamentos sub la ŝarĝo de mortintoj, pro veo ina eĉ Dio ŝtopos siajn orelojn!... Ve al la turka patrino, ve al la turka franjo ĉie, kie estos mi kun mia kunfrato!...

Jelica mallevis la kapon.

– Ne mallevu la kapon, edzino mia! Tia estas la epoko en kiu ni vivas. Ne nur viroj, sed ankaŭ virinoj devas esti bravaj!... Nun ne batalas bravulo kontraŭ bravulo, sed malamiko kontraŭ malamiko!... Pro tio mi diris ĉi tion al vi! Tial mi diris al vi, ke vi gardu la filon, flegu la patrinon! Ĉar mi opinias, ke vi havas heroan koron!...

– Mi ne havas! – diris Jelica. – Mi ne havas, sed mi havos ĝin, same kiel vi, ĉar mi vin rigardos!... Mi havos heroan koron!... Mi estas edzino de Stanko Aleksiĉo! Se mi ne kapablos mortigi, mi kapablos perei!... Adiaŭ, mastro mia! Bonŝancan foriron, kaj ankoraŭ pli bonŝancan alvenon!

Tiam ŝi kisocele proksimiĝis al la mano de Stanko. Kisinte lian manon, ŝi helpis lin surdorsigi la sakon...

Stankon kvazaŭ iu puŝus antaŭen... Li nur etendis la manon al ŝi, kaj diris.

– Adiaŭ!...

Post tio li foriris tra arbejo...

Stanko iris tra arbaro strange bonhumora. La virino, kiu scias tiel ami, nun sentigis al li novan ardon, donis al li novan penson... El ŝiaj okuloj li kvazaŭ legus: vi pensas pri mi, pri mia amo, forgesante tiomajn afliktitajn patrinojn kaj fratinetojn, forgesante alies amatinojn!... Ni ne ricevos amon kaj karesojn, ĝis kiam ni ne povos kanti unugorĝe!... Iru, defendu neplenkre-skulojn, ĉar Dio vin povigis kaj kapabligis, mi ja fieros, ĉar mi estis amatino de la bravulo, kiun guzloj prikantis...

Io leviĝadis kaj malleviĝas en lia brusto; li sentis en sia animo ion sanktan, ion similan al la odoro de bruligita mirho... Li turniĝis ankoraŭfoje, kaj vidis ŝin staranta kaj rigardanta post lin, staranta fiere kaj rekte, kiel maljuna kverko, kiu dum jarcentoj repuŝadis ventojn kaj ŝtormojn, restante fiksa kaj ankoraŭ pli firma, ol estis en sia junaĝo...

Tiam li sentis en la animo respekton al tiu virino.

Ŝi ja forlasas sian ĝojon por ke aliaj povu ĉirkaŭpreni sian idon, por ke aliaj povu bruligi kviete la patronfestan kandelon sub sia tegemento!...

Li turniĝis ankoraŭfoje, sed ŝin li ne plu vidis tie, ŝi jam estis foririnta. Tiam li, kun profunda ĝemo ekiris antaŭen. Li memoris la unuajn tagojn de sia amo; li rememoris la nigran disiĝon kiam, pro la aroganteco de Lazaro, li devis foriri en la monton...

Tiel li dronis en la pasintecon... Li eĉ ne rimarkis, kiam li alvenis en Paraŝnicon. Kiam li alvenis tien, li trovis la kamaradojn pretiĝantaj.

– Diohelpe, kien vi iras?

– Nin atendas malproksima vojaĝo? – diris Leĉjo.

– Kien do?

– En Loznicon.

– Grandega armeo atakis. Ĉiu kiu povas porti pafilon devas iri tien! – diris Zaverzano.

– Ĉu vi ekiras tuj?

– Tuj!...

– Ĉu tio eblas, kunfrato mia? – demandis Stanko riproĉe. – Ĉu vi forirus sen via kunfrato?

– Mi sciigus vin, se tio iel ajn estus eble, kunfrato, sed nun mi ne povis!... Mi scias kial vi foriris...

Leĉjo tiam mallevis la kapon, ne fininte la frazon.

– Li forpasis – diris Stanko.

– Ĉu forpasis?!

– Jes, Dio indulgu lin!... Eble tiel estas pli bone!... Kiu scias kiajn malbonaĵojn li devus travivi, se li ne forpasus!...

– Al kiu vi lasis la domon?

– Kerstivojo estas tie... Sed verŝajne la domo ne estos bezonata. Mi diris al li kien li, atakokaze, devas foririgi la samdomanojn ...

– Ĉu ni iru laŭlonge de Drino? – demandis Nogiĉo Leĉjon.

– Nur ĝis Badovinaco. Sed de Badovinaco ni iros trans la Cara kampo kaj Nova Vilaĝo al la eturbo (Leŝnico) – ordonis Leĉjo.

Ili ekiris.

Ili hastis. Stanko iris apud Leĉjo kun la kapo klinita. La tago estis bela. La suno agrable varmis. Flavaj, velkintaj folioj sinkadis kiel flokoj desur arboj. Jenjene kelkaj paruoj ekflirtis, kaj malgaje ekpepis... La tero nudiĝis, jenjene videblas kelkaj tufoj de seka kaj velka herbo... Aŭtuno, vera aŭtuno, plena kaj de malĝojo kaj de beleco; se homo ĉirkaŭrigardis, malgajo volvis lian koron, lin travibrigis frido, kiel tordiĝanta serpento...

Zaverzano komencigis interparolon:

– Mi opinias ke ĉiu el ni devas havi almenaŭ dek edzinojn!... Se duono el ili naskus virojn, tio estus kvin bravuloj!... La turkoj estas, frato mia, saĝaj!...

– Priplorinda estas ilia saĝo! – kontraŭstaris Ivanko. – Ho, pli valoras unu serbo ol dek turkoj!... Jen, mi atakos dudekon da ili!...

– Jen! Ivanko diras la veron! – kriis Jovano kaj Joĉjo.

– Ne temas ja pri tio, kiom da turkoj oni atakos, mi nur volis diri, ke estus pli bone se Dio volus ke ni estu pli multenombraj!... – krias Zaverzano.

– Ni estas sufiĉe multenombraj!... – krias ĉiuj.

– Ni ja ne timas turkojn!... – diris iuj.

– Ankaŭ mi ne timas!... Se Dio donus al ili kaj dentojn kaj kornojn – min ili ne timigus!...

Rido eĥiĝis de ĉiuj flankoj:

– Dio donis al li gajan karakteron – diris Stanko ridetante.

– Tio ja egalvaloras lian bravecon... Tamen, ĉu ne estus bone, ke ni iom ripozu? – diris Leĉjo.

– Se vi tiel volas...

Leĉjo ekkriis:

– Ripozu!...

La taĉmento haltis.

– Ĉu vi lacas?

– Maljes.

Stanko alrigardis iliajn serenajn vizaĝojn, ekridetis kaj diris al Leĉjo:

– Kunfrato! Nuboj tegas la sunon, sed ĝiaj radioj penetras eĉ nubojn. Dum Serbio havas ĉi tiajn filojn – ve al la imperiestro en Istanbulo... Mi ne zorgas!... Ni venkos!

– Mi pensas same! – diris Leĉjo. Tiam ili sidiĝis por ripozi...

# 9. FATALA BATALO

– „Kiu senokuligis vin?“

– „La frato“.

– „La bato de frato estas sen kompato“.

Nenio pli trafe karakterizas nian fatalan batalon dum la unua ribelo, ol ĉi tiu popola popolmaksimo.

Li turka imperio povis sendi la tutan Azion kontraŭ Serbio, sed ĝi ne povus damaĝi Serbion tiel, kiel ĝi sukcesis, sendante kontraŭ Serbio Bosnion kaj Hercegovinon.

Du fratoj, al kiuj oni altrudis du religiojn, estis unu por la alia la plej granda ekzekutisto. Nun oni ne pensis nur pri venko. Oni strebis malamikojn neniigi, ekstermi, disflugigi kiel ŝtormo disflugigas grenventumaĵon, ke eĉ spuro ne restu de la malamiko!

De la tago, kiam en la okcidenta kaj nordokcidenta partoj de Serbio ekpafis la unua ribela pafilo, de tiu tago, samkiel mi jam diris, eĉ ne unu tago estis kvieta!... Anstataŭ la benata plugilo, la teron plugis turka (pli precize – frata) blunderbuzo... Unu taĉmento estis disbatita, aperas alia; unu armeon oni haltigis, alvenis ankoraŭ du!... Oni ĵus eksciis pri unu vadejo, kie ili transiras la riveron, sed oni jam informis pri aliaj du vadejoj!...

Tio estis batalo inter la ĉielo kaj tero, batalo sen ripozo kaj ĉeso. Cent fojojn disbatitaj, turkiĝintoj atakis ankaŭ la cent unuan fojon.

Tiu, tiel diri, necedemo– ĝi estas karakteriza por la bataloj en tiu epoko!...

Terura potenco atakis Loznicon. La povra Drineja vojevodo, Anto Bogiĉeviĉo, enfermiĝis en tranĉeon kun siaj 1200 bravuloj. Kion povis li, sola, kun malmultenombraj ribeluloj, fari kontraŭ tiel granda armeo?!

Kion li povis fari, krom peti helpon de la fratoj!...

La fratoj respondis. Ili amasiĝis de ĉiuj flankoj, por ankoraŭfoje halitigi la turkan armeon.

Inter la unuaj alvenis Leĉjo kun siaj bravuloj... Anto lin atendis kiel dian senditon.

– Dank al dio!... Dio ankoraŭ estas nia amiko!... Kion pri Stojano?... Kion pri Simo?... Ĉu ili ne venos?...

– Ili venos, ne zorgu! Mi opinias ke ili venos tuj post ni!...

– Mi sciigis kaj Lukaon, kaj Jakovon, kaj Estron!... Ilia armeo estas grandega!... Kiam taĝiĝos, rigardu el la tranĉeo, kaj se vi vidos finon de la soldataro, faru kun mi tion, kion vi volas!...

– Do, ili estas multenombraj!

– Multenombraj!... Kiel sablo en la maro!... Jam ses tagojn ili atakas, sed mi repuŝas ilin... Mi gardas kaj min kaj la homojn. Oftofte ili elvokas al duelo... Inter ili estas Mujago el Srebrenico. Li ĝenas min ĉiun matenon kaj vesperon!... Li alvenas preskaŭ ĝis la tranĉeo, grimacas kaj elvokas al duelo. Mi gardas la homojn, ne permesas, kaj li blasfemas ĉion senescepte.

Muskuloj de Stanko ektremis.

– Morgaŭ mi duelos kun li!

La vojevodo ĉirkaŭbrakis lin...

– Dankon al vi, bravulo! Mujago vere estas terura, sed okuloj viaj ankoraŭ pli terure fulmas!...

Post tio li turniĝis al Leĉjo:

– Ordonu al la homoj – diris li – ke ili iomete ripozu. Neniu scias ĉu ni morgaŭ ripozos!... Mi organizis gardantaron...

La aŭtuna nokto estis serena, senluna... La ĉielon kovris vibrantaj steloj, palpebrumantaj, kvazaŭ volus endormigi ĉiujn...

La homoj kuŝiĝis unu apud al alia... Ekregis silento, la tomba silento, premanta pli ol la plej granda ŝarĝo, de kiu oni tre volonte fuĝus, se oni povus... Fojfoje la noktan kvieton perturbas paŝo de gardisto, kiu iras, kvazau instinkte, kaj oscedas, rigardante al steloj...

Kvankam estis laca, kvankam al li ŝajnis, ke li ekdormos tuj kiam malleviĝos sur la teron, Stanko denove ne povas ensonĝiĝi... Lia sonĝo dispolviĝis. Li komencis pensi pri la pasinteco, kontempli la estontecon...

Kiom da esperoj ili havis, kiam li kontraŭ la turkoj ekribelis, sed kio nun okazas?... Kie nun estas la serenaj, ridoplenaj tagoj, kiam ili sopire atendis batalon kontraŭ la turkoj?... Verdire, nun ili ĉiun tagon malpacas, tensio jam iĝis normala...

Tiam li komencis pensi pri si...

Li estis eksterordinare bonŝanca. Multajn bataloj li partoprenis, sed restis sana kaj elana. Nek varma pafaĵo, nek akra ponardo tuŝis lian korpon...

„Ĉu min trafas plumbaĵo? – meditis li. – Ne, ne trafas!!... Jen, tiom da bataloj!... Cetere, ankaŭ Lazaro! Du fojojn li pafis al mi, sed vane!... La unuan fojon li trafis mian ĉapon, la duan fojon – ponardon... Kvankam Lazaro estas fama paflertulo!...“

Tiu penso faris lin kvazaŭebria. Li komencis vere kredi, ke pafaĵo lin ne povas trafi.

„Hej, se Dio donus pli da ĉi tiaj, kiujn pafaĵo ne povas trafi, ni povus sturmi la turkaron kiel lupoj ŝafidojn!...“

Tiu penso iĝis kulmino de liaj deziroj. Ĉion alian li forĵetis. Li memoris nek la domon, nek la maljunan patrinon, nek Jelican!... Tio, nur tio!...

Tiu penso levis lian animon ĉielen. Ĝi kvazaŭ ebriigus, ekzaltuslin... Per siaj okuloj li rigardis tohuvabohuon kiun faras lia akra sabro...

Jen, li traflugas la turkan hordon, faligante kaj renversante kiel akra falĉilo maturan tritikon, dum apud li – liaj malnovaj kamaradoj, Leĉjo, Surepo, Krajĉino, Zaverzano, Nogiĉo, Jovano kaj Joĉjo kriaskvazaŭ vinon drinkante, falĉas kiel morto...

Abrupte, kvazaŭ ĉielo krevus, io ekkrakis.

Stanko rekonsciiĝis kaj krucsignis.

– Leviĝu, kunfrato, jen li! – krias Leĉjo.

– Kiu? – demandis Stanko duondorme.

– Mujago!... Aŭskultu kiel li blasfemas!...

– Vi estas virinoj!... Ĉu vi ne havas viron pretan dueli kontraŭ mi?... Fi!... Hontinde!... Mi venos al vi por ĉiujn vangofrapi! – aŭdiĝis sub la tranĉeo.

Stanko alsupris la defendmuron, kaj alrigardis. Hida homego, kun razita superfrunto, kun nudigita, vila brusto, suprenvolvitaj manikoj, estis sidanta sur novalo, defiante. Okuloj liaj estis sangaj, feroce rigardantaj la tranĉeon.

– Kion vi volas, ho turko? Ĉu vin tedis via vivo?

– Venu ĉi tien, virinaĉo!... Duelu!... Mi eĉ ne alrajdis sur ĉevalo, sed venis perpiede! Se neniu el vi aperos, mi alvenos por vin per mia manplato dispeli...

Stanko ekridis, kaj la turko komencis kraĉi...

Stanko descendis desur la defendmuro, prenis akvon, lavis sin kaj krucsignis. Li prenis la pafilon, ekfrotetis la silikŝtoneton per la ungo, kontrolis la sparkilon kaj ekiris.

– Ĉu vi volas ĉevalon, bravulo? – demandis lin Bogiĉeviĉo. – Mi povas doni al vi mian rajdĉevalon...

– Mi ne bezonas ĝin! Mi kaj Mujago batalos surpiede!... Se la kara Dio tion volos, mi revenos kun la kapo de Mujago!...

Tiam li eliris el la tranĉeo...

Ĉiuj haltis senspire, rigardante kiel moviĝas lia svelta figuro. La brava koro de Zaverzano ne povas elteni, li saltis sur la defendmuron de la tranĉeo, alrigardis suben, kaj ekkriis:

– Ho, turko!

– Kion vi volas? – reagis Mujago.

– Ĉi vi adiaŭis viajn amikojn?

– Kial?

– Ili neniam plu vidos vin. La homo kiu iras al vi, fortranĉos vian kapon kiel kukurbeton!

– Ne boju!

– Bojis via panjo naskante vin... Mahometaĉo turka!...

La turko ekkrietis kaj eksaltis... Tiumomente Stanko aperis antaŭ li. Liaj okuloj la turkon kvazaŭ hakus kaj alforĝus al la loko kie li troviĝis, kiam la voĉo de Stanko tondre resonis tra la kampo:

– Haltu, ho turko!...

La rigardo de Stanko estis tiom terura, ke Mujago konfuziĝis... En la unua momento Mujago nenion scipovis diri.

– Kial vi kriaĉas kiel azeno? – demandis li akre.

La turko rapide rekonsciiĝis kaj komencis retiriĝi.

– Venu ĉi tien por batali duele!... – diris li, dum liaj lipoj komencis tremi.

Stanko direktis la pafilon al li.

– Halt!... Ne moviĝu!... Kial vi venis ĉi tien?...

Li serpentrapide alkuris, kaptis la kolon de Mujago, kaj premis la kapon al la tero. Per la dekstra mano li eligis la blanktenilan ponardon, kaj sekvamomente enigis la akranklingon en la dikan kolon de Mujago. Sammomente ekŝrikis seskanala pafilo el la turka hordo...

Stanko nur kurbiĝis, sed lia maldekstra mano levis supren la kapon de Mujago... Subite la ponardo elfalis el lia mano... Li komencis ŝanceliĝi, seď la kapon ne ellasis...

Tra la tranĉeo fulmrapide traflugis la vorto:

– Li pereis!...

Kiel rabiaj harpioj la nuduloj saltis sur la defendmuron... Surepo kaj Zaverzano jam estis apud Stanko, kaj subtenis lin.

– Kio okazis? Ĉu vi estas vundita?

– Jes.

Tiam erupciis pafila tondrado. Ili ne povis aŭdi unu la alian. Surepo levis Stankon sur sian larĝan ŝultron kiel infanon, dum Zaverzano prenis la ponardon, kiu restis enpikita apud li...

– Kie estas la kapo? – ekkriegis li. Ĉirkaŭrigardinte, li vidis la kapon en la manoj de Stanko.

– Kunportu, kunportu ĝin!... Rapidu, Surepo!... Ho, kia batalo!...

Kaj vere, komenciĝis granda batalo. La turkoj ne povis facile elteni la stultan pereon de Mujago, dum serboj deziris puni la turkojn pro la vundo de Stanko.

Furiozegis ambaŭ ...

Mallumiĝis tero kaj ĉielo.

La mallumon ne alsendis Dio,

Sed pafilaj plumbo kaj pulvnubo!

Surepo enportis Stankon en la tranĉeon...

– Kio okazis, kunfrato mia? Ĉu ili mortigis vin?

– Ne, ili vundis min... Al mi ŝajnas ke mia dekstra brako estas disrompita...

– Ĉu tio estas la kapo de Mujago? – demandis Leĉjo, prenonte la kapon el la manoj de Stanko.

– Jes, de Mujago.

– Surpalisigu ĝin! – ordonis Leĉjo.

Ivanko kaptis ĝin, kaj jam sekvamomente la kapo de Mujago rikanis al la turkoj.

Surepo kaj Zaverzano umis ĉirkaŭ Stanko. Surepo estis metanta tindron sur la vundon, sed sangadon li ne povas ĉesigi.

– Atendu! – diris Zaverzano.

Per tranĉileto li komencis raspi sian zonrimenon, kaj la raspaĵon metis sur la vundon...

Tio helpis.

Ili malligis silkan tukon desur la kolo de Stanko, kaj bandaĝis la vundon.

– Bone!... Nun estas bone!... Ĉi-vespere ni lin forportos al via anjo Stoja. Ŝi cikatrigas la vundojn pli bone ol iu ajn!... Multe da fojoj ŝi min resanigis! – diris Zaverzano al Surepo.

– Mi scias, sed al mi ŝajnas ke ankaŭ la osto estas frakasita! – diris Leĉjo.

– Ankaŭ tion ŝi kuracas!... Ŝiaj herboj sanigas ĉiun korpovundon!... Ne zorgu ! – diris Zaverzano memfide ...

– Formovu la kunfraton, dume ni organizos suprizatakon kontraŭ la turkoj! – diris Leĉjo. – Ĉu vi konsentas, vojevodo?...

– Estu kiel vi diras, taĉmentestro! – diris Bogiĉeviĉo.

Stankon oni forigis en angulon de la tranĉeo. Alrigardinte siajn nudajn filojn, Leĉjo elingigis sabron. Malferminte la pordon de la tranĉeo, li ekkriis:

– Sekvu min, bravuloj!

Tiel komenciĝis buĉado... Kapoj forfaladis kiel kukurboj, kun malfermitaj buŝoj... Fusilpafoj ĉesis ... Aŭdiĝis nur tintado de malvarma ŝtalo, kaj veoj de vunditoj, kiuj resonis en la ĉielo.

La batalo estis malespera, sed la imperio estis pli forta, oni ne povis kontraŭ ĝi rezisti. Mortigitojn anstataŭadis vivantoj, kiuj estis senvortaj kaj senmovaj, atendante ke al ili okazu la samo kio okazis al iliaj kamaradoj, kies korpojn oni senindulge tretis...

Kiel lupoj penetradis la bravuloj de Leĉjo tra vivaj muroj.

– Brave, antaŭen, Surepo! – kriis Zaverzano. – Ni devas venĝi Stankon!... Li ja estis nia estro...

Surepo nur levis la brovoj, li falĉis, falĉadis.

Zaverzano sturmadis senindulge la plej densajn vicojn de la turkoj... Dum unu-du momentoj li malaperis, sed oni tuj denove vidis lin kiel aleno penetrantan, kiel sageto traflugantan kaj kriantan:

– Tiel, Plumpĉjo!... Gratulegon, Joĉjo!... Malcedu, Nogiĉo, hajduko malnova!... Klabu, klabu, Ivanko!... Malĉesigu la tohuvabohuon!... Mi ŝatas nur tohuvabohuon!...

Kaj li denove malaperis...

La turka armeo kreskis kiel fermentaĵo. La ĉielo falis sur la teron, iĝis apenaŭ videble.

Zaverzano denove malaperis. Eksilentis lia kuraĝiganta kaj ridiganta voĉo...

Tio ĉiujn strange tuŝis... Leĉjo komencis ĉirkaŭrigardi... Surepo eksentis timon... Nogiĉo, Jovano, Joĉjo, Ivanko... ĉiuj ektremis.

– Zaverzano! – ekkriis Surepo.

Sed neniu respondis.

Abrupte ĉiuj furioziĝis. Tio jam ne estis homoj sed rabiaj harpioj... Tio ja ne estis ŝerco!... Zaverzano estis animo de la nuduloj... Neniu plu pensis pri sia vivo...

Ili trarompis la turkajn ondojn, ili trarompis kaj tratranĉis la densajn vicojn, samkiel la onduma Drino tratranĉas ŝoseojn kaj digojn kiuj troviĝas sur ĝia vojo... La turkoj komencis abrupte kaj ĥaose retiriĝi. Vane la estroj per elingigitaj sabroj pelis ilin en balaton – ili preferis perei desamgenta sabro, ol morti sub terura rigardo hajduka... Ili fuĝekuris rapidkrure.

– Zaverzano!... Zaverzano!...

Sed neniu respondis.

– Ĉu li estas kaptita?... – demandis Ivanko.

– Se tio okazis, mi pelos ilin ĝis Mekko! – ŝrikis Leĉjo.

– Jen li! – diris Latkoviĉo.

Zaverzano kuŝis tute sangumita kaj polvokovrita. El granda vundo sur lia frunto ŝprucis sango. Latkoviĉo kliniĝis super lin.

– Ĉu li estas morta?... – demandis nuduloj.

– Ne estas... Li spiras...

– Dank al dio!...Portu lin en la tranĉeon! – ordonis Leĉjo.

Latkoviĉo volis preni lin, sed Surepo alkuris kaj forpuŝis lin... Fajro brilis en liaj teruraj okuloj...

– Mi portos lin!... Li estas mia!...

Tiam li levis Zaverzanon sur la brakojnkiel infanon, kaj ekportis lin al la tranĉeo... Li eĉ ne rimarkis kiam, sed li sentis ke du varmaj fluoj malsekigas liajn vangojn... Ekploris la rabia harpio pro sia kamarado...

La turkoj komplete retiriĝis... La vojevodo Anto, vidante ke ili denove komencas ariĝadi, alkriis al Leĉjo:

– Revenu en la tranĉeon!... Se ili denove nin atakos, ni defendos nin; tamen, mi pensas ke ili ne atakos, ili transiros Drinon!...

Leĉjo obeis al la vojevodo, kaj retiriĝis kun siaj hajdukoj en la tranĉeon...

Tiun nokton Surepo ekiris kun Stanko kaj Zaverzano al Komusa Trabo porkuracigi ilin...

## 10. RIFUĜKAMPO

La kadukuloj kaj neplenkreskuloj forlasis siajn kvietajn hejmojn, kaj kaŝiĝis en arbejon, en monton... Nur tie estis sekurejo! La ĉielo estas alta, sur la tero marŝas malamikoj. La arbaro antaŭe defendis la liberecon, nun ĝi gardis ankaŭ neplenkreskulojn!

Komusa Trabo estis rifuĝejo. En tiu densa, arbara tutaĵo serba orfaro serĉis ŝirmejon de la rankora, malhoma invado, mortiganta maljunulojn kaj kvaroniganta senfortajninfanetojn...

Pli ol cent familioj troviĝis sur tiu loko, kie ĉiuj vivis unuanime...

Nenio tiel proksimigas la homojn kiel malbonaĵo. Tiam internaj malamikoj ne ekzistas... Tie estas nur unu animo kaj unu koro. Ĉiuj tion sentas, ĉiuj ploras... Tie estas grizhara profundaĝulo avĉjo, tie estas grizhara maljunulino avnjo. Frumatene ĉiuj kisocele alkuras iliajn manojn... Ĉiuj okuloj gapas al la ĉielo, ĉiuj flustras la saman preĝon:

– Ho dio! Savgardu nin!...

Estis triste rigardi ilin!... Ĉiu kunportis tion, kion povis porti: iu manĝaĵon, iu malfastaĵon, iu laktaĵon, iu robeton, iu linkovrileton...Ĉion kion ili havis, ili dividis kun la aliaj...

Ĉar la noktoj jam estis konsiderinde malvarmaj, la maljunuloj prizorgis la infanetojn.

Ili faradis kabanetojn kaj fosis subterejojn. Virinoj helpadis ilin dum tiu laboro tre fervore. Ili faligadis arbojn,faradis kavojn elfosante nigran teron... La maljuna Terĉago, kiu estis siaspeca rifuĝejestro, kriadis:

– Tiel, infanoj, tiel!... Mi gratulegas vin!... El kiu domo vi estas, bofilnjo? – demandis li Jelican, kiu iris, senlace portante grandegan foston.

– Mi estas el la domo de Aleksiĉo! – respondis Jelica.

– Ĉu vi estas la edzino de Stanko?

– Jes, mi estas.

– Estu viva kaj sana! Bono bonon altiras! Li estas bona, ankaŭ lia edzino estas bona!...

Jelica ruĝiĝis kaj daŭrigis sian laboron.

Unuflanke infanoj ŝuŝas, aliflanke senfortuloj suspiras...

Jelica oftofte kuris por vidi Petran... Petra malsanis, sed ne pro morbo; videblis ke jaroj kaj zorgo foruzis ŝian iaman forton, tial ŝi nun estis velkanta kaj degelanta kiel neĝo sub printempa suno...

– Kion vi faras, patrinjo?

– Nenion, filnjo!... Faru vian laboron, ne zorgu pri mi!... Jen... mi la infanojn iomete amuzos...

Ŝi alpaŝis infanetojn:

– Venu al la avnjo!...

La tagoj estis pasantaj en laboro. Antaŭ vespero oni disdonadis iom da vespermanĝo, post kio ĉiuj kuŝiĝadis sur la nigran teron...

Noktiĝis... Nenio plu aŭdiĝis, krom grilo, mistere kantanta sian kanton, kiu en ĉi tiuj cirkonstancoj ankoraŭ pli melankoliigis la animon...

Jelica dormis firme post la laciga tago. Abrupte Petra levis la kapon, kaj komencis veki ŝin...

– Jenjo!... Filnjo!...

Jelica malfermis la okulojn, kaj duondorme demandis:

– Ĉu vi krias, patrinjo?

– Jes, kara mia.

– Ĉu vi estas soifa? – Ĉu vi sentas malvarmon? – demandis Jelica, kaj komencis demetadi sian kovrilon por kovri ŝin.

– Ne, filnjo!...

– Ĉu vi fartas malbone? – diris Jelica, kaj komencis leviĝi.

– Sidiĝu, ido mia!... Ne... Mi havis koŝmaran sonĝon!...

La koro de Jelica glaciiĝis. Abrupte antaŭ ŝiaj okuloj preterflugis kaj kampoj, kaj arbaroj kaj batalejoj. Ŝia voĉo tremis kiam ŝi demandis:

– Ĉu vi eble sonĝis lin?

– Jes, lin.

– Kaj?

– Fakte, mi ne sonĝis lin, sed Surepon. Li alvenis, metis la manon sur mian ŝultron, kaj diris: vi dormas senzorge, sed via filo kuŝas vundita!... Mi tuj vekiĝis...

Tiumomente aŭdiĝis piedbatado, kiel se iu irus. Jelica eksaltis kaj vidis homojn portantaj iun sur brankardo.

Ŝi kvazaŭ ŝtoniĝus.

– Kio okazas!... Kiu estas tiu?... – demandis Petra. Jelica nenion scipovis diri... Tiumomente la homoj alvenis. Unu el ili apartiĝis kaj alpaŝis Jelican.

– Kion vi faras, Jenjo? Ĉu mia patrino estas viva?...

Tio estis Stanko.

Jelica sentisformikadon, dum Petra, kiu provis leviĝi, nur refalis, sentante timrigidiĝon.

– Mi estas viva, filĉjo mia!... Venu ĉi tien, por ke la patrino vidu vin!...

Stanko kisocele proksimiĝis al ŝia mano.

Ekvidinte la bandaĝitan brakon, la patrino ekkrietis:

– Kio okazis?!

– Nenio grava, patrinjo, mi estas vundita!...

La rifuĝantaro komencis vekiĝadi. Surepo foriris serĉi sian avinon Stojan, por ke ŝi kuracu la vunditojn...

– Sed kiu estas sur la portilo?...

– Zaverzano... Li estas grave vundita – diris Stanko.

– Ĉu li ankoraŭ estas viva?

– Jes, li estas viva!...

Tiumomente alvenis Surepo kun la avino Stoja.

– Ĉi tien, avinjo, ĉi tien! Ĉi tie estas la vunditoj. La avino alpaŝis la portilon. Ŝi iris kurbakorpe, apogante sin sur bastonon.

– Mankas lumo! – diris ŝi.

Surepo etendis la manon, kaj el armilzono eltiris grandan vakskandelan diskon. Li alkuris al la fajro, bruligis la kandelon kaj proksimigis ĝin al la vundito.

Zaverzano malfermis la okulojn kaj ĉirkaŭrigardis. Stoja kliniĝis super Zaverzanon.

– Kie vi estas vundita?...

– Ĉie, avinjo mia.

– Tiukaze... Ĉu li estas bandaĝita?

– Estas! – diris Surepo.

– Li restu bandaĝita ĝis morgaŭ!... Mi ne vidas!... Tamen, forigu lin de la nokta malvarmo...

– Jen, tie estas kabano...

Ankaŭ Zaverzanon oni forportis en la kabanon...

– Nu, Stanko, ankaŭ vi ripozu! – diris Surepo.

– Mi vere estas laca! Veron vi diris... Ni renkontiĝos, sed mi devas iom ripozi...

Tamen, nek Petra nek Jelica volis lin forlasi. Leviĝinte kun lankovriloj kaj kusenoj, ili en la nova kabano ordigis por la vunditoj kuŝejojn, kiajn ili en sia vivo ne havis...

La patrino de Stanko kun bofilinoj flegis la vunditojn. Senpovecon ŝi ne plu sentis. Ŝi rigardis la maljunan Stojan, legante ordonojn en ŝiaj okuloj.

– Ho, kiel ardaj estas iliaj kapoj! Ek, malsekigu tukaĵojn...

Jam sekvan momenton sur la kapoj de la vunditoj aperis malsekigitaj vuŝtukoj. Ili jam ekdormis.

Surepo ĉirkaŭrigardis kaj, vidante homojn, kiuj alportis Zaverzanon starantaj, diris al ili :

– Iru, dormu!

– Ankaŭ vi iomete ripozu – diris al li la maljuna Stoja.

– Mi ne estas laca. Mi sidos ĉe ili... Sed vi... silentegu!... Ili dormu!...

Li tion diris kaj eksilentis. Lia rigardo estis direktita al la vunditoj...

Tiam ĉiuj eksilentis kiel ŝtonoj... Aŭdiĝis nur grilo...

Tamen, la vetero ne plu estis favora. Tuj post noktomezo de Drino ekblovis malvarma vento... Sur la ĉielo komencis ruliĝi grizaj nuboj... Jenjene estis videblaj kelkaj brilaj steloj, penplene klopodantaj trabrili, sed la nubo kaptis ilin kiel araneo kaptas muŝon...

Antaŭ mateniĝo komenciĝis pluvo, la terura eta pluvo, kiu penetras tra haŭto ĝis la ostoj, pro kiu eĉ la animofrostiĝas...

La frostiĝanta orfaro komencis plori. Ĉiuj subite komencis peni trovi ŝirmejon. La rifuĝantaro reviviĝis, ili reviviĝis pro kriado de etaj infanoj. La maljunuloj leviĝis bruligi fajron por varmigi la orfaron kaj siajn frostiĝintajn korojn.

Strange resonadis ŝrikado tiun nokton. Kvazaŭ oni aŭdus malgrandajn birdidojn en nesto, malsatajn kaj frostiĝantajn,alvokantajn sian patrinon... Maljunuloj huis.

– Ho Dio, ho Sinjoro!... Kial vi ne daŭrigis la belan veteron!...

– Se ĝi daŭrus ankoraŭ kelkajn tagojn, ĝis kiam ni kabanojn konstruus, aŭ almenaŭ subterejojn elfosus!...

– Jen infera mizero... Jen la povra Staka... ŝi mortas! – diris unu el maljunulinoj.

– Nu, ŝi ja satvivis!... Tamen, jen Perao, la solfilo de Ĵivana, li mortas!... – respondis iu.

– Mi vere ne scias kia malfeliĉo estas pli granda, ĉu tio, aŭ naskado!... Jen, tie ino naskas!... – diris iu virino.

Kaj tio daŭris!... Ĉielo anhelis vee kaj lamente. Maljunulo diris:

– Jen, ankaŭ Dio – Dio pardonu min – unuiĝis kun la turkoj kontraŭ ni!...

Tiu voĉbruo vekis la vunditojn. Stanko malfermis la okulojn kaj suprenrigardis.Li vidis la larmomakulitajn patrinon, edzinon kaj bofratinojn, starantaj super iliaj kuŝejoj... Li ankaŭ vidis la deprimitan vizaĝon de la ŝtoniĝinta Surepo.

– Kio okazas?... Kial veas tiuj homoj?...

– Silentu! – diris al li Surepo. – Dio faras kion devas!...

Stanko komencis leviĝi, sed Surepo retenis lin...

– Ne leviĝu!... Vi neniel povas helpi!... Ekstere pluvas, sed la kompantinduloj estas nudkapaj kaj nudpiedaj sub la ĉielo!... Kuŝiĝu!...

La kapo de Stanko sinkis!... Li silentis kelkajn momentojn, kaj diris:
– Tamen, kial ĉi tie estas tiom da linkovriloj kaj lankovriloj?... Portu ilin tien!...
Per la sana mano li komencis deĵetadi la kovrilojn...
– Tio ne helpas kiam la koro frostiĝis! – diris dolorĝeme Surepo.
– Ho!... Kial mi ne pereis! – diris Stanko, kaj falis sur la kuŝejon...
Ektremis la koro patrina, puŝante ŝin jen antaŭen, jen malantaŭen... Terura estis la deziro de Stanko, tiom terura ke frostiĝis vekrio sur ŝiaj lipoj.
Li rekonsciiĝis kaj vidis ŝian vizaĝon. Li vidis Jelican staranta kiel turmentata sanktulo. Du larmeroj ekgutis el liaj okuloj, kaj li elflustris:
– Pardonu!... Nun mi ne pensas pri miaj vundoj!... Ĉi tio estas pli malbona!...
Sed kiam aŭroro ekoris, li ekkriis:
– Surepo!
– Kio okazis?
– Faru!
– Kion?
– Ĉion, kio estas farebla! Prenu ŝpaton kaj hakilon!... Ĝis la mallumo ĉi tiuj homoj devas havi ian ajn tegmenton!...
– Bone, Stanko! – diris Surepo, kaj eliriis el la kabano...
Ekstere aŭdiĝis lia voĉo, resonanta ordone.
– Vi – ĉi tien! Alportu branĉojn... Ek, vi, iru kaj alveturigu pajlon!... Kial vi pigras?! Ek, ek, juninjo!... Bone, tio estas bone!... Estas bone!... Venigu la orfaron ĉi tien!... Venu ankaŭ vi, avinjo!... Ĉu vi tie finis?... Estas bone!... Venigu la kvar naskontinojn! Kion, ankoraŭ du? Venigu ankaŭ tiujn du!... Bone!...
Tagiĝis. Surepo hastis ĉiuflanken, ordonante kaj helpante. Ĉiuj laboris unuanime, sub liarigora kontrolo...
Dum li kontrolis la laboron, la maljuna Stoja lavis kaj bandaĝis la vundojn de la vunditoj.
– Stoja, franjo!... – flustris Petra. – Ĉu li resaniĝos?
– Lia osto estas nur rompita – ĝi ne estas frakasita... Li resaniĝos!... Junaj estas la muskoloj, ankaŭ la osto estas juna, ne zorgu!... Cetere, ankaŭ la alia estas bone. Multe da sango elfluis, sed' la vundoj ne estas teruraj. Ne zorgu!... Kun dia helpo ĉio estos bone!...
– Sed ĉu vi alĝustigis la oston?
– Jes... mi alĝustigis. Mi ankaŭ strečis la bandaĝon!.... Malzorgu!...
Denove resonis lamentkanto:
– Kio okazis? – demandis Stanko.
Jelica eliris por vidi. Post nelonge ŝi revenis.
– Iuj infanoj mortis... – diris ŝi malgaje.

– Mizera povrularo! – diris Stanko. – Ĝis kiam, ho Dio, vi turmentos nin!... Venigu Surepon!

Jelica denove eliris. Ne pasis multe da tempo kiam ŝi revenis kun Surepo.

– Ĉu ĉi tiuj homoj havas manĝaĵon?

– Ili havas malmulte!... Pro tio mi ordonis ke kelkaj niaj homoj iru en Radenkoviĉon, kelkaj en Banusan Kampon, kaj kelkaj en Zasavicon, ili el grenejoj alportu manĝaĵon. Ĉi tie proksime troviĝas du akvomueliloj, tie ni ĉion muelos. Mi ankaŭ ordonis ke ili alpelu brutojn.

– Bone vi faris!

– Ĝuste nun mi faras kelkajn grandajn bakujojn por fari panon.

– Tio estas bone.

– Mi ankaŭ ordonos ke oni alveturigu kaldronojn, por ke oni povu ankaŭ kuiri ion...

– Nenion vi forgesis!

– Ankoraŭ multon oni devas fari ĉi tie!... Mi devas konstrui ankaŭ porfarunan trabkabanon...

– Ĉu ĉiuj estas evakuitaj?

– Ankoraŭ ne. Tamen, ĉiujn infanetojn kaj malsanulojn mi evakuis!... La laboroj ankoraŭ ne estas finitaj...

Stanko sentis faciliĝon. Li dankoplene alrigardis Surepon, kaj diris, kvazau por si mem:

– Se mi almenaŭ povus kviete malsani!

– Sed kion vi faras? – demandis Surepo Zaverzanon, kiu kuŝis kun la okuloj malfermitaj.

– Mi aŭskultas kiel saĝe vi ordonas! – Dankon al vi!...

Pasas kelkaj tagoj. En la rifuĝejo jam regis ordo, ĉar Surepo kun kelkaj siaj homoj organizis ĉiujn farendaĵojn. Nun neniu plu estis sen tegmento kaj manĝaĵo...

Tamen, la malbela vetero trotedis. Eta pluvo kaj malvarma vento kontinuis... La aero estis peza kaj humidplena.

Ĉiumatene aperis unu-du mortaj korpoj; ĉiuaŭrore aŭdiĝis nova lamentkanto... Terura kolika malsano falĉis kiel akra falĉilo kaj maljunulojn kaj junulojn...

Tamen, la stato de la du vunditoj pliboniĝis. La febro jam mildiĝis, la sana sango kaj junaj korpoj rapidigis resaniĝon... La sano de Zaverzano boniĝis pli rapide ol la sano de Stanko, ĉar liaj vundoj estis pli facilaj. Tamen, ankaŭ la stato de Stanko ne estis malbona...

La maljuna Stoja plenumadis sian devon zorgoplene. Ŝi komprenis kiom valoras ŝia scio, tial ŝi sentis sin pli grava.

– Stoja, franjo!... Ĉu lia stato boniĝas? – demandis la patrino de Stanko ĉiufoje kiam Stoja estis malbandaĝanta la vundon.

– Jes, ĝi boniĝas – diras Stoja serioze. – Juna la sango, sana la karno... Li resaniĝos pli rapide ol ni eĉ pensi povis. Atendu nur ke mi surmetu la purigan balzamon...

– Li ne restos kripla, ĉu ne?

– Ne restos! Jen, vidu, kiel li movas la fingrojn...

Jelica kun timo kaj tremo rigardis la vunditon... Kvankam ŝi multajn fojojn sentis bezonon laŭte ekvei, tamen ŝia denaska hontosento, hontosento el ŝia la plej frua infanaĝo, ne permesis al ŝi vidigi siajn sentojn kaj emociojn. Ŝia koro forte ekbategis, ŝia sango alfluis en ŝiajn vangojn ĉiufoje kiam ŝi aŭdis la voĉon de Stanko, sed ŝi ĉiufoje ĝustatempe retenis sin, por ne malkaŝi la doloron de sia animo...

Nur unu demando premis la animojn de la vunditoj. Stanko ĉiam, tuj kiam malfermis la okulojn, demandis la patrinon aŭ Jelican: ĉu alvenis ia ajn informo pri lia kunfrato?... Kiam li aŭdis, ke nenia informo alvenis, li fermis la okulojn, kaj eksilentis.

Tiel pasis, unu post la alia, ok matenoj. Zaverzano fartis bone. Li povis sola eliri el la kabaneto, povis sola rigardi super sin, al la griza, nubkovrita ĉielo... Stanko, kvankam fartis pli bone, ankoraŭ ne povis eliri, ĉar la maljuna Stoja ne permesis al li moviĝi...

La naŭan matenon en la rifuĝejo aperis Kamelo... Miriga forto starigis Stankon. Per stuporaj okuloj li rigardis Kamelon, ne kuraĝante demandi lin kio okazis...

La saĝa okulo de Kamelo rimarkis tion, kaj kvietige diris:

– Ne zorgu! Estas bone.

– Ĉu bone?

– Pli dezirinde ne povas esti! Jam antaŭ tri tagoj la turkoj, kiuj restis vivaj, transiris la riveron, ĉar multe da ili restis en la kampo, sur nia flanko de la rivero...

La okuloj de Stankon ekfulmis ĝoje. Zaverzano kaj Surepo haltis kaj disetendis la brakojn, kvazaŭ dezirus iun ĉirkaupremi.

– Dank al Dio, ankaŭ ni estis multnombraj... Alvenis Ĝorĝo, kaj Lukao, kaj Stojano, kaj Jakovo... Ni senvivigis multajn, multegajn!... Mi opinias ke dum longa tempo ili ne ekdeziros transiri Drinon!... Tieokazis terura tohuvabohuo, kiun oni eĉ priskribi ne povas!...

Tiam Kamelo komencis rakonti pri la batalo, pri la alveno de vojevodoj kaj Gvidanto, pri la heroeco de Karaĝorĝo, pri tio ke li mem celis kaj pafis per kanonoj...

Ĉiuj malfermis la buŝon aŭskultante la rakonton de Kamelo. La okuloj de vunditoj brilis kontente. Ili ne plu sentis la vundojn, kvazaŭ la vundoj ne troviĝus sur iliaj korpoj...

La maljuna Stoja diris:

– Stanko, karulo, kuŝiĝu jam.

– Ne, avinjo, mi petas vin! Vi ne scias ke ĉi tio min pli efike kuracas ol viaj balzamoj!... Do, vi diras, ke vi ĉiujn dispelis? – demandis li denove Kamelon.

– Ĉiujn.

– Do en Maĉvo eĉ ne unu turka orelo troviĝas?

– Ne troviĝas. Jes, Stojano ankaŭ diris, ke li revenigos la homojn el la rifuĝejoj hejmen...

– Ho, Dio, dankon al vi!... Ĉu revenis ankaŭ mia kunfrato?

– Hodiaŭ li revenos. Ĉi-vespere li estos en Paraŝnico... Li sendis salutojn al vi, al ĉiuj.

– Ĉu salutis?... Dankon al li!

– Kaj tuj, morgaŭ, li venos al Komusa Trabo por viziti vin...

Virinoj proponis al Kamelo brandon. Li iomete trinkis, kaj leviĝis.

– Kien vi iras?

– Mi trairos iomete la rifuĝejon, eble mi trovos iun mian parencon.

– Ili estas tie! – diris Surepo.

– Ĉu ĉiuj?

– Ĉiuj.

– Ĉu ili sanas?

– Dank al Dio, jes!

Kamelo sidiĝis, dirinte:

– Tiukaze mi vizitos ilin poste. Plej grave estas ke Dio donis, ke ili havu vivon kaj sanon!...

– Ĉu okazis batalo la sekvan tagon post nia foriro? – demandis Surepo.

– Okazis batalego! – diris li.

Tiam li komencis rakonti, dronante en detaloj; li ja sciis ĉiujn detalojn, ĉar nenio eskapis de lia rigardo. Li rakontis dolĉe, bele, kiel homo kiu ĉion rigardis propraokule...

Ili glutis lian rakonton senspire...

Tiel pasis la tago, kvazaŭ oni ŝtelus ĝin... Jam malleviĝis malhela nokto, ankoraŭ pli obskura, pli terurapro la nubego kaj vento...

Tamen la vunditoj ekdormis tiel ĝue kaj tiel kviete, kvazaŭ en iliaj domoj ĉiuj kantus kontente...

La noktan silentonperturbis nur kelkaj pezaj vespiroj, kiuj eltordiĝis el la brusto de malfeliĉa patrino...

## 11. IOM DA SERENO

Pasis kelkaj tagoj. La vunditoj fartis multe pli bone. Leĉjo, Nogiĉo kaj aliaj venadis en Paraŝnicon tre ofte por viziti ilin, kaj por interparoli. Nur Surepo ne foriradis de ili. Li decidis kuracigi ilin sendepende de la cirkonstancoj. La maljuna Stoja nur faradis balzamojn, dum Petra, Jelica kaj la samhejmanoj el la domo de Stanko ŝvebis ĉirkaŭ la vunditoj...

Dume en Maĉvo regis kvieto. La turkoj kvazaŭ tre laciĝius, ili kvazaŭ ne plu deziris dueli kaj akiri batalan gloron...

Foje, kiam Leĉjo alvenis, Stanko demandis lin:

– Nu, kion vi nun faras?

– Fakte, nenion!...

– Kiel nenion?

– Jen tiel. Ni lacertumas la tutan longan tagon. La turkoj malaperis kiel vaporo!... Katiĉo iele-iome faras tohuvabohuon, kiel tion nomas Zaverzano, li transiras Drinon, surprizas tributistojn, forprenas ilian monon; tio estas ĉio.

– Tamen, la turkoj ne reagas, ĉu?

– Ne reagas. Ivanko antaŭnelonge iris en Sarajevon. „En nenies, diris li, kapon tie venas ideo ataki nin.“ Finfine, la vintro proksimiĝas...

– Ĝuste pro tio mi volis proponi ion! Kial la homoj ne revenu al siaj domoj?

– Jes, kunfrato, tio estus bone!... Ĉi tiel, je Dio, tre suferige estas vivi sen tegmento kaj pano...

– Ankaŭ mi opinias ke ili povas reveni – diris Surepo.

– Ni priparolu tion kun la vojevodo! – diris Leĉjo.

– Bone, priparolu!

Tamen, homoj eĉ ne atendis ke oni tion diru al ili. Unu post la alia, familioj foriradis, kaj nigraj fumaperturoj de domoj denove komencis fumiĝi...

Ankaŭ Stanko decidis iri hejmen. Li fartis tiel bone, ke povis leviĝadi kaj eliradi. La vundo cikatriĝis sub balzamoj, li fartis tre bone, manĝis kaj dormis dolĉe, la febro tute malaperis.

Zaverzano estis sana. Verdire, li estis iom pala, sed serena kaj gaja, same kiel antaŭe. Tutan longan tagon li ŝercis kun Surepo, kiu estis ĝoja, ĉar ilia saniĝo bone progresis, tial li akceptadis ĉiujn ŝercojn...

Iun matenon li diris al Stanko:

– Mi volas ion diri al vi.

– Kion? – demandis Stanko.

– La restado ĉi tie, frato mia, tedis al mi. Mi deziras iri en Paraŝnicon.

– Sed kion pri mi? – diris Stanko. – Ĉu mi restu sola?

– Vi ne estas sola!... Jen...

Tamen, Stanko interrompis lin mansvinge.

– Mi scias kion vi deziras diri!... Tamen, ĉu mi estas homo kiu povas spirĝemi kaj plori kun virinoj?... Ĉu mi ne bezonas viran kuneston kaj interparolon?... Se okazas batalo – mi batalas; se oni nenifaras, ĉu ankaŭ mi ne rajtas nenifari?...

Surepo enmiksiĝis...

– Stanko parolas la veron!... Mi mortigus min, se mi devus kuŝi, se min nur virinoj flegus!... Ni ne povas lin nun lasi!... Tamen, ion alian ni povas fari.

– Kion? – demandis Zaverzano.

– Ni iru al la domo de Stanko. Tie estos pli bone kaj al li, kaj al ni.

– Mi samopinias – diris Stanko. – Ankaŭ min tedis ĉio ĉi... Mi preferus elteni eĉ tri vundojn, sed ne suferi ĉi tie, en ĉi tiu malfeliĉejo!...

Ĉiuj deziris reveni hejmen.

Antaŭ ol suferi, oni ne scias kiom grava estas propra tegmento... Sed kiam mizero forŝiras la homon de la tegmento, kiam li post tio revenas – nur tiam li sentas ties gravecon...

La tegmento estas kara, malnova konato, amike vin salutas la alta firsto kaj la fumtubo kun markezo. Al vi tiam ŝajnas ke ili ridetis al vi, ke ili estas vivaj, ke ankaŭ ili verŝas ĝojlarmojn ĉar vi revenis!...

La povra Petra!... Malsana, malsanega, forgesinte siajn dolorojn kaj sian senpovon starante super la kuŝejo de sia kara vundito, ŝi streĉis sian tutan forton, trompante kaj sin, kaj aliajn per sia sano kaj per sia eltenemo...

Tamen, kiam ŝi enpaŝis sian hejmon, kiun ŝi starigis kun sia forpasinta vivamiko, vidante la masonaĵojn kaj masonaĵetojn, siajn angulojn kaj anguletojn, siajn infanojn vivaj ĉirkaŭ si – ŝi senfortiĝis. La forto, la senespera forto kiun ekhavas mortanto dum la lasta vivhoro, luktante kontraŭla morto– forlasis ŝin...

Ŝi eksentis senpovon en ĉiu arterio, en ĉiu osteto... Ŝiaj palpebroj estis falantaj, la nigra tero estis altiranta ŝin...

Kaj ŝi falis, falis kiel guto.

Ĉiuj ĉirkaŭis ŝian kuŝejon, surverŝante ŝin per larmoj.

La maljunulino fermis la okulojn, ŝi spiris malkontinue... Tamen la konscio ne forlasis ŝin, tio estis videbla en ŝia rigardo, kiam ŝi malfermis la okulojn.

– Ho, Kreinto, kiom bona vi estas! Ĉar vi verdiktis, ke mi mortu sub mia tegemento!...

Tiam ŝi eksilentis kaj fermis la okulojn. Ŝi spiris malfacile kaj interrompe. Ĉiuj estis starantaj ĉirkaŭ ŝi, senvortaj kiel tomboj...

Ŝi denove malfermis la okulojn:

– Oni diras ke la beno de patrino egalas la benon de Dio. Mi vin ĉiujn benas! – flustris ŝi. – Mi benas la plugistojn, ĉar ili estas nutrantoj; mi benas la batalantojn, ĉar ili estas defendantoj!... Estu benataj, infanoj miaj! Por mi ĝojo estas flegi kaj nutri vin, sed vi pardonu la patrinon, ĉar la patrino pekas nur pro amo...

Tiam ŝi turnis la kapon al la muro. Ŝi silentis kelkajn momentojn, kaj komencis paroli ekzalte:

– Ĉu vi estas tie, ho sanktulo?... Jen, mi estas preta aperi antaŭ Dio mem!... Svingu la akran ponardon vian, plenumu la volon de dio!...

Post tio ŝi leviĝetis sur la manojn, kiuj tremis pro senpovo... Okuloj ŝiaj larĝe malfermiĝis kaj rigidiĝis, la manoj sinkis, post kio ankaŭ ŝia korpo falis sur kuŝejon.

– Kandelon! – ekkriis Kerstivojo.

Jelica donis al li bruligitan vakskandelon, kiun li metis en la manojn de la patrino... Tamen, la animo jam estis forlasinta la kadukan korpon en kiu ĝi kuŝis...

Tiam aŭdiĝis lamentkanto...

La dekan tagon post ŝia entombigo Stanko estis tiom refortiĝinta, ke li jam povis zoni armilojn kaj foriri al sia kunfrato.

Ju pliproksime al Paraŝnico li estis, des pli li sentis ke lia koro forte batas. Tio estis serioza afero, ho frato mia, delonge li ne vidis sian kunularon, delonge li ne uzis ŝercon bravulan.

Oni lin atendis kiel vojevodon. Tio estis la unua tago de patronfesto. Ĉiuj senescepte deziris proksimiĝi kaj interkisi kun Stanko. Stanko interkisis kun ĉiuj.

– Ĉu ĉio estas bona?

– Bona.

– Dank al Dio, bona!

Stanko alrigardis la kabanojn: ili kvazaŭ estus el fromaĝo faritaj.

– Ho, vi jam faris ĉi tie hejmojn!

– Jes, ni faris hejmojn, je dio! – diris Leĉjo.

– Kiu konstruis ĉi tiujn belaĵojn?

– Vojko kaj Petronio!... Nu... ili tion faris iste!...

– Gratulon al ili!

Komenciĝis festeno. Oni manĝis kaj drinkis kiom volis kaj povis. Inter la kunularo nur Stanko estis iom malgajeta.

– Kio okazis, Stanko? – demandis Zaverzano tre ĝoja kaj gaja. – Kial vi estas silentema, frato mia?...

– Lasu Stankon kvieta! – diris Leĉjo. – Vi scias ke li perdis patrinon.

– Ĉu li perdis patrinon?... Ankaŭ mi ja perdis patrinon!... Multaj el ni perdis la patrinon, kion fari?... Ĉu ni devas ĉiuj plori?...

Tiam li ekstaris, vidante ke Leĉjo volas silentigi lin.

– Atendu ke mi diru, poste parolu!... Jen Stanko, li decidu, li diru ĉu mi parolos la veron!... Lia patrino, Dio indulgu ŝin, havis belan vivon. Neniu el ni ĝisvivos ŝian maljunaĝon!... Ŝi akiris hejmon, edukis posteularon, postlasis bravulojn, kiuj patronfestan kandelon tenos, ŝi mortis en la brakoj de siaj infanoj, flegata kaj prizorgata!... Kion oni povas pli deziri?... Ĉu la morto povas esti pli bela, se la morto entute povas esti bela?... Diru vi, Stanko!...

– Vi pravas! – diris Stanko.

– Sed kia estos la fino de Stanko?... Kia estos la fino de ĉiuj ni? Ĉu ĉirkaŭ ni estos iu, kiu povos nin prizorgi kaj priservi?... Hej, fratoj miaj!... Mi estas eble freneza, sed ĉi tie, en animo mia, mi sentas ke estas saĝe, tiondiri al vi!... Aŭskultu min, por poste ne penti! Kiu scias kio povas okazi la sekvan tagon, aŭ la sekvan nokton! Nun ni verŝas drinkaĵon, sed post unu-du momentoj ni eble verŝos ankaŭ nian propran sangon!... Antaŭ Dio mi ĵuras, ke ni ĝin verŝos same entuziasme!... Pro tio mi volas ke ni ĉiuj estu gajaj!... Ĉar gajaj momentoj tre malmultas!... Super ni la ĉielo estas nubkovrita, sed mi vidas nur iom da sereneco!... Kvankam mi ŝatas serenecon!... Stanko, ĉu vi ŝatas serenecon?

– Jes, mi ŝatas, Zaverzano! Vi pravas! Ĉiu momento por ni povas esti la lasta. Pli rapide mi trovos miajn gepatrojn, ol ili trovos min! Fratoj!... Ni gaju! – diris Stanko, ĝojsente.

Tiam komenciĝis kantado kaj festenado...

Zaverzano, demetinte la ĉapon, kriis:

– Dum unuflanke oni veas, ni kantas! Tamen bravulo ne estas virino!... Virino veu, sed bravulo drinku, kantu, batalu kaj pereu!...

– Ho! Ho!... – resonis tra la arbejo.

## 12. 1813a JARO

Tiel estis pasantaj iliaj tagoj. Tio estis la tagoj, kiam la bravuloj ripozis, nur fojfoje kaj jenjene okazadis bataletoj, por ne forgesi en kia epoko ili vivis.

Foje Stanko kun Leĉjo venis antaŭ kabanon. Ĉirkaŭ ili estis vigla vivo, ĉar oni ŝercis kaj ridis kiom volis kaj povis. Ankaŭ Leĉjo estis bonhumora. Nur Stanko jam kelkajn tagojn iris kun la kapo mallevita.

– Diru, kio okazas kun vi, kunfrato? – demandis lin Leĉjo.

– Mi ne scias – diris li – tamen, mia koro kunpremiĝas, kvazaŭ mi estus iun entombiganta!

– Vortigu la sentojn, amiko!

– Mi volis, sed tio ne eblas!

– Kial?

– Mi ne scipovas klarigi!... Sed al mi ŝajnas, ke min ĉi tiu malgajo plenigis tiun tagon, kiam miaŭskultis la vekriojn kaj ŝrikojn!... Ĉu vi scias, kunfrato mia, ke de tiu tempo mi ne povas kviete dormi!... Tuj kiam mi fermas la okulojn, mi aŭdas vekriojn, mi vidas kurbiĝintajn maljunulojn, kaj maljunulinojn ĉirkaŭprenantaj infanetojn kiel kovkokino kokidojn!... En sonĝo mi rigardas la zorgoplenajn fruntojn, kiuj levas la okulojn al la ĉielo, sur la sulkiĝintaj vizaĝoj mi vidas ke ili preĝas, ne atendante savon, nek de Dio, nek de la ĉielo!...

– Ne parolu tiel, kunfrato! – mansvingis Leĉjo.

– Mi ne parolus tiel, se min ne premus tiu malfeliĉo!... Sciu, mi ploregus, se mi ne hontus plori!... Vi ja scias ke mi ne estas homo kiu verŝas larmojn!... Vi vidis min vire kureganta en la plej densajn vicojn turkajn!... Ĉu vi scias ke mi preferus la plej furiozan batalon, ol vidi kiel oni vivas en rifuĝkampo!...

– Tamen, kion ni povas fari nun?

– Jen, pro tio mi nun mallevas la kapon!...

– Vi ja scias ke edziĝfesto sen viando ne povas esti! Kiam ribelas ĉiu herbeto, samkiel ni ekribelis kontraŭ la turkoj, tiam homo ne rajtas retrorigardi. Vi scias la rakonton, kiam oni diris al homo: iru, sed ne retrorigardu, por ne ŝtoniĝi!...

– Mi scias.

– Do, ne retrorigardu. Se vi havas aliajn zorgojn, ni pripensu kion fari, sed tion forgesu – diris Leĉjo.

– Mi havas.

– Kion?

– Mi deziras, ke niaj homoj ankaŭ en rifuĝejoj konstruu ĉi tiajn kabanojn, por ke la nesklavigitaj sklavoj povu almenaŭ kaŝiĝi dum fiepoko.

– Nu, tio ja estas saĝaj vortoj. Tion ni faros nun, tuj!

Tiam li leviĝis kaj ekkriis:

– Vojko!

Vojko ekzaltis, aŭskultante la rakonton de Zaverzano, sed rekonsciiĝis tuj kiam li aŭdis la voĉon de Leĉjo.

– Mi auskultas vin, estro.

– Elektu tiom da kunuloj, kiom vi bezonas, kaj iru al Komusa Trabo. Mi deziras ke vi konstruu tiajn kabanojn, kiajn ni havas ĉi tie.

Surepo leviĝis:

– Atendu, Leĉjo! – diris li.

– Kial!...

– Ne faru kabanojn!... Kabanoj videblas. Estas bone ke ni havas kabanojn ĉi tie! Ni ja ĝojus se turkoj venus viziti nin. Sed tie estos nur maljunuloj kaj senpovuloj, tial mi opinias ke pli bone estas fari subterejojn...

– Kion vi opinias, kunfrato? – demandis Leĉjo Stankon.

– Jes, li pravas...

– Jes, jes, subterejojn!... Eble la subterejo ne estas bona kiel kabano, sed en ĉi tiu epoko tio estos pli saĝe ol konstrui kabanon – diris Zaverzano.

– Do, subterejojn! – diris Leĉjo.

– Tie ĉio estas preta. Ni devos nur pli bone kovri ilin. Vojko tion sendube pli bone faros! – diris Surepo.

– Mi faros, ne zorgu! – diris Vojko.

– Do, prenu tiom da kunuloj, kiom vi volas, kaj iru.

Vojko elektis dekopon, kaj kun ili ekiris al Komusa Trabo...

Tamen, la serenaj tagoj ne daŭris longe. Sur la serba horizonto amasiĝis nigraj nuboj, el kiuj brilis fajraj fulmoj, bruantaj, kvazaŭ volante neniigi ĉiujn senescepte...

Alvenadis sciigo post sciigo, ĉiam pli nigra, ĉiam pli terura. Ĝojigaj novaĵoj ne plu venadis... Mallevis la kapojn la nudaj filoj, kvazaŭ akra falĉilo de morto atingus ilin. Eĉ Zaverzano ne plu ridis. Malaperis la gajaj ŝercoj kiel petolaj papilioj – ĉio malaperis, ĉion traglutis nigra antaŭsento...

Leĉjo kaj Stanko tre malofte venadis en Paraŝnicon. Ili kuregis de Ĉupiĉo al Smiljaniĉo, de Smiljaniĉo al Serdano, de Serdano al Katiĉo. Oni ne parolis per laŭta voĉo, sed flustre. Ĉiuj fruntoj estis paŭtaj.

Ĉupiĉo, kiel vojevodo, ordonis al vilaĝestroj kaŝi la infanetojn en rifuĝejojn. Tiam Komusa Trabo denove reviviĝis.

Samtempe senhomiĝis la belaj vilaĝoj. La malgrandaj kabanoj estis starantaj malserene, kvazaŭ vivaj homoj en ili neniam troviĝis...

Estis interkonsentite ke estu farita tranĉeo sur Sablobordo, ĉe la vadejo kiun turkoj plej ofte uzis.

Ĉupiĉo arigis la taĉmentojn, elfosis tranĉeon; Leĉjo la samon faris en Paraŝnico. Tamen, al Ĉupiĉo ŝajnis ke tio estas nesufiĉe, ke tiuj lokoj estas malkonvenaj.

Pro tio dum la sekva kunveno li tion diris.

– Kion do ni faru? – demandis ĉiuj.

Tiam ĉiuj enpensiĝis.

Post mallonga silentado Ĉupiĉo diris:

– Jen kion mi opinis... Ili transiros Drinon, ĉar ili estas multenombraj – samkiel diris Kamelo. Tamen, ili ne aŭdacos ataki tra arbaroj, ili ne foriros for de la akvo: do, ili atakos apud Drino kaj Savao... Leĉjo renkontos ilin sur Paraŝnico, sed liaj kunuloj ne povos ilin haltigi, ili penetros plu... Ha! Nun mi scias!... Ni fosu tranĉeon en la montgorĝo inter Savao kaj Zasavico, tie ni atendos ilin!...

Tiu ideo ekplaĉis al ĉiuj. Ĉupiĉo iomete gajiĝis.

– Mi prifosos la kompletan montgorĝon de Savao ĝis Zasavico, tio estos nia tranĉeo. Mi jam sciigis Ĝorĝon, kiu ordonis ke al ni helpe venu Jakovo kun valjevanoj, kaj Miloŝo kun rudnikanoj. Tie, sur Ravnjo, ni portempe haltigos la turkojn ĝis kiam Molero kun Drinejanoj alvenos helpocele. Tiam ni eksturmos. Molero atakos deflanke... Tiam la turkaj patrinoj ekploros!...

La vortoj glate fluis el la buŝo de Ĉupiĉo. Li parolis tiel konvinke, ke al ĉiuj ekŝajnis ke aliel ne povas esti. Tio ĉiujn ilin varmigis.

– Ĉu vi sciigis Moleron? – demandis Smiljaniĉo.

– Jam hieraŭ al li foriris Kamelo.

– Sed kiam alvenos Jakovo kaj Miloŝo?

– Post tri-kvar tagoj ili estos ĉi tie.

– Mi volas ion diri! – ekvortis Katiĉo.

– Diru do! – ekkriis oni de ĉiuj flankoj.

– Mi tute ne fosus la tranĉeon sur Paraŝnico!...Mi tuj irus al Ravnjo! Stojano parolas veron dirante ke ili ne aŭdacos ataki laŭ ŝoseoj, ke ili atakos apud la akvo. Tamen, diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas! Ankaŭ ili povas tion rememori. Tamen, kiam turkaj gvatistoj vidos ke Paraŝnico estas malplena – vi ja estu certaj, ke ili unue tien foriros – tiam ili ĉiuj evitegos vojojn kaj arbetejojn... Forlasi Paraŝnicon signifas tuj irigi la turkojn al Ravnjo.

– Vi prudente parolas! – diris Ĉupiĉo. – Do, ni ĝuste tiel faros... Ho, ĉefpopo! – turniĝis Smiljaniĉo al la ĉefpopo. – Unu el viaj homoj iru atendi Jakovon kaj Miloŝon, li venigu ilin al Ravnjo...

– Bone.

Post tio ili disiris disdoni la ordonojn...

# 13. RAVNJO

Neniu scias kial ĝi ricevis tiun nomon. Tamen oni certe scias ke en la 1813a jaro Ravnjo ne estis vilaĝo. Ĝi havis nek kabanojn nek loĝantojn, krom se oni tiel nomas la domaĉetojn kaj kelkajn familiestrojn el apudaj vilaĝoj, kiuj tie havis siajn abelejojn... Ravnjo iĝis loĝata poste, ĝin loĝigis Bosnianoj...

Ĝi troviĝas en la norda parto de Maĉvo, inter du akvoj. Unuflanke ĝin superakvas Savao, aliflanke Zasavico. Kiam printempe akvo ŝvelas, Ravnjo komplete troviĝas en akvo...

Do, en tiu montgorĝo laŭ la plano de Ĉupiĉo, oni komencis fosi tranĉeon, gigantan tranĉeon, kiu etendiĝis de Zasavico ĝis Savao.

Ĉupiĉo estis pretiĝanta por batalo pri la vivo kaj morto. Tiu loko estis tia, ke ĝin oninenimaniere ne povis konkeri; se oni tamen sukcesus trudpenetri, tiam la venkitoj sendube mortus sub akraj sabroj kaj pafkugloj, aŭ en la ondoj de Savao aŭ Zasavico...

La fosado rapidege progresis. La benataj manetoj transturnadis la nutrantan teron, konstruadis fortikaĵon, kiu gardos iliajn vivojn...

Tiel ili faris tranĉean fortikaĵon, tranĉeon kiu eĉ en la nuna tempo ekzistas, kiu ankoraŭlonge kaj multe al ĉiu sentipova koro rakontos pri bravagoj kaj sinofero...

Ili faris pordegon, enbatis akrajn palisojn por haltigi turkan rajdantaron. Eĉ ne unu bagatelaĵon ili forgesis, kiel bona familiestro, pretiganta vintroprovizon...

Tiel lokitaj kaj sendanĝeraj, ili kontente rigardis tion, kion faris iliaj manoj.

– Ĉi tio ne estas tranĉeo, ĉi tio estas fortikaĵo! – diris Katiĉo.

– Kion mi planis, tion mi faris – diris fiere Ĉupiĉo. – Restis ankoraŭ havigi nutraĵojn ... Nur tio min zorgigas.

Tiam li ordonis al Leĉjo dissendi nudajn filojn diversflanken por havigi kiel eble pli da nutraĵoj..

Ĉio estis okazanta laŭ lia plano. Eĉ ombro de malbona antaŭsento ne ekzistis. La koroj trembatis post ĉiu ekpenso pri baldaŭa batalo.

La unuan aŭ la duan tagon post Pantelejtago alvenis Jakovo Nenadoviĉo kun valjevanoj, kaj post lia alveno jam la sekvan tagon venis Miloŝo Obrenoviĉo kun rudnikanoj. La okuloj ne povis satrigardi la bravajn bravulojn kiuj kovris la montgorĝon inter Savao kaj Zasavico.

La vojevodoj estis kontentaj, la armeanoj estis gajaj. Ĉiuj atendis, ĉiuj esperis senduban venkon. Ĉupiĉo eksplikis sian planon al la vojevodoj, kiuj aprobis ĝin. Ĉiuj senpacience atendis ke turkoj aperu.

Okazis ankaŭ tiu tago.

Tio estis dum la antaŭfasta tago. La ĉielo nubiĝis, la nuboj estis sieĝantaj de ĉiuj flankoj... Aerfluo, plena de freŝeco, gajigadis la varmegajn korpojn de batalantoj...

En vesperkrepusko emerĝis homo en turka vesto.

– Kamelo!... Kamelo! – ekkriis oni de ĉiuj flankoj. – Kian novaĵon vi alportas?

– Kie estas Ĉupiĉo? – demandis Kamelo.

– Li estas en la tranĉeo kun la vojevodoj.

– Mi iras al li.

Ne atentante konstantan demandadon de scivoluloj, li direktiĝis rekte al la tranĉeo. La unua kiu lin ekvidis estis Miloŝo.

– Ho, jen!... Kion ĉi tie faras turko?

Ĉupiĉo alrigardis kaj ekridis:

– Tio ne estas turko. Tio estis Kamelo, vi aŭdis pri li.

– Jes, mi eksciis... Do, tio estas li, ĉu?

– Jes, tio estas li.

Tiumomente Kamelo alvenis, krucigis la brakojn, kaj riverencis.

– Do, vi alvenis! – diris Ĉupiĉo.

– Jes, mi alvenis.

– De kie vi venis?

– El Beljino

– Ĉu turkoj ekiris?

– Mi opinias ke ili jam transiris Drinon.

– Ĉu ili estas multaj?

– Multegaj!... Ili asertas ke ili havas cent mil soldatojn.

La vojevodoj ektremetis.

– Ĉu vi povis vidi kiuflanken ili iros?

– Ili volis iri tra Badovinaco kaj Klenjo al Bogatiĉo, kaj rekte en Ŝabacon. Sed ilin konfuzis la malplena Paraŝnico... Hieraŭ vespere ili decidis iri apud akvo.

– Kiu gvidas ilin?

– La veziro Derendelijo.

– Do, vi pensas ke ili venos ĉi tien?

– Ili tion diris.
– Ĉu vi estas laca?
– Ne, mi ne estas laca.
– Ĉu vi estas malsata?
– Ne, mi ne estas malsata.
– Ĉu vi deziras glutaĵon da brando?
– Tion mi povas.
Ĉupiĉo donis brandon al li, kaj Kamelo ĝue ektrinkis.
– Nun iru, ripozu – diris Ĉupiĉo. – Tamen, eĉ ne unu vorton diru pri la turka armeo.
Kamelo malproksimiĝis...
La rakonto de Kamelo konsiderinde zorgigis la vojevodojn. Post lia foriro ili mallevis la kapojn.
Ĉupiĉo diris, kvazaŭ parolante por si mem:
– Multenombraj!... Cent mil... multe!
– Tamen, ĉu vere estas tiom da ili? – diris Jakovo. – Povas esti ke li troigas.
– Eble li vere troigas, ĉu ne? – diris Miloŝo.
– Estu kio estos!... Ni devas batali ĝis la lasta. Ili alvenas por nin ekstermi!...
– Jes, por nin ekstermi! – diris Jakovo. – Verŝajne ili atakos de ĉiuj flankoj sammomente...
La vojevodoj denove enpensiĝis.
Fariĝis nokto, senbrua kaj senluma. La ĉielo estis plenplena da nuboj, inter kiuj jenjene kaŝrigardis kelkaj brilaj steloj. El altejo fojfoje aŭdiĝis tondrado, la okcidento fulmis.
Batalantoj interparolis:
– Pluvos.
– Ti estos bone!
– Vere, veron vi diras, por ke ni almenaŭ iomete malvarmiĝu!
– Gravas ke ĉio ne finiĝu malbone!... Ĉar kiam la nuboj amasiĝas, tio povas longe daŭri...
– Kaj?
– Kaj?! Pensu pri la pafiloj, pensu pri la pulvo! Se ĝi malsekiĝos, kio tiam okazos? Ĉu ni tiam kun palisoj atakos la turkojn?
– Ne pluvos, ĉu ne? – konsolis sin iu en la alia fino de la tranĉeo. – Ni ne estas tiel grandaj pekuloj...
– Ne parolaĉu!... Ni dormu!...
Unu post la alia, ĉiuj eksilentis...
Sed dormi ili ne povis. Aliajpensoj obsedis ĉi tiujn bravulojn... Tie, en la arbaroj kaj en kverkarbejoj ili lasis la infanetojn kaj gepatrojn. Malfacile estas

kiam oni rememoras ke la proksimuloj vivas sen tegmento, sen glutaĵo, kiam oni ne scias kie ili estas, kiel ili fartas...

Ĉi tiu nigra nokto per sia talaro envolvis ankaŭ ĉiujn nigrajn pensojn... Malgajo ekregis en la interkrutejo, kies muroj estis du akvoj: unu, bruetanta kaj flustrantakiel ŝtelisto, kaj la alia, silentanta kiel mortinto – sed ambaŭ murojn tegis nubkovrita ĉielo...

## 14. INVADO

La sekvan matenon elkrepuskiĝis pluvo. La homoj gluiĝis unu al la alia, zorgante ke la pulvo kaj armiloj ne malsekiĝu. Sur la ĉielo kuregis grizaj nuboj, dum konsiderinde frida vento devigis ilin bruligi fajrojn...

– Ni vere estas misŝanculoj, eble eĉ komencos neĝi!... – diris valjevano.

– Ĉio estu laŭ la volo de dio!... – respondis al li rudnikano. – Se ne temus pri la pafiloj kaj pulvo, mi preferus ĉi tiun nevarmon!...

La vojevodoj eliris el siaj tendoj, kaj trairis homamason, por vidi kaj saluti batalontojn.

– Ĉu vi malsekiĝis!...

– Iomete, sed tio estas tolerebla! – respondadis demanditoj.

Leĉjo, sidanta kun siaj nuduloj apud fajro, komencis interparolon.

– Estus tre bone, se ili atakus antaŭ ol iĝos varmo.

– Vere estas aĉe batali dum varmego! – diris Zaverzano, al kiu revenis lia gajeco.

– Se vi dum varmego sabras turkon, se el ties taŭra kolo sangofluo ekŝprucos kaj surverŝas vin, vi poste tutan tagon malbonodoros je Mahometo!... Kiam estas nevarme, oni povas ili draŝi, kiel fazeolon!... Kiam la batalo estas finita, oni povas sin lavi kiel post draŝado, deĵeti la sterkaĵon, kaj dormi senzorge!... Ĉu ne,Kamelo?

Kamelo sidis iom fore de la fajro, dronante en profundajn pensojn. La demando de Zaverzano rekonsciigis lin dum momento el la pensoj, kaj li, kvankam ne scias pri kio Zaverzano parolis, respondis senpripense:

– Ĝuste!

– Nu, kio estas ĝusta?... – ekridis Zaverzano.

– Tio, kion vi parolas.

– Sed kion mi parolis?...

Kamelo ekkoleris, vidante ke ĉiuj ridas.

– Nur anseroj povas vin kompreni!... Nur nenifaruloj povas vinaŭskulti!... Vi klakas kiel mia klakilo, sed mi mi povus ekdormi aŭskultante viajn historiojn!...

Zaverzano ridis per plena voĉo.

– Mi vidis sur lia vizaĝo, ke li nenion aŭskultas!... Sed kion diri pri Surepo? Jen, li aŭskultas ĉion, ĉu ne, Surepo?

– Kamelo preskaŭ pravas!... Vi tro babilaĉas!...

– Multajn babilulojn mi jam silentigis!

– Ricevas bandito laŭ sia merito! – diris Surepo minacante al li per fingro.

– Vere, tio estas justa!... Se mi pereos morgaŭ, mi scios ke tio ne estis vane!...

– Tio estas vero!... – konfesis Surepo. – Tio vere ne estis vane!... Finfine, daŭrigu la babiladon, vi pravas!

Subite ĉiuj agitiĝis. Ĉiuj komencis ariĝi en la mezo de la tranĉeo, kie troviĝis la vojevodoj... Leĉjo forkuris tien.

Oniflustro disvastiĝis.

– La turkoj iras!...

Dispozicio jam estis preta. La unuan vicon okupis la homoj de Ĉupiĉo. Valjevanoj kaj Rudnikanoj restis malantaŭe, kiel helptrupo. La vojevodoj estis sur siaj lokoj.

Ekregis plensilento kvazaŭ en tombo.

Kaj vere, aŭdiĝis bruado el malproksimejo, venanta el Viŝkupio.

– Surepo! Okazos tohuvabohuo!... – flustris Zaverzano.

Surepo nur kapjesis.

– Hodiaŭ ankaŭ Kamelo kuraĝos!... Kion vi diros, Kamelo?

Sed respondon li ne ricevis. Kamelo estis malaperinta.

– Ho, kiel li fuĝas de pulvo, kiel monta rabobesteto!... – ekridis Zaverzano.

– Neniam riproĉu lin!... Li estas sispeca bravulo!... – diris Leĉjo serioze. – Pli malfacile estas plenumi lian laboron ol la nian!... Multfoje ni vojerarus, se li ne estus kun ni!... Multaj veindaĵoj okazus, se li ne helpus nin eviti ilin!... Estas vera bravaĵo, Zaverzano, iri en turkejon kaj ekscii kion ili intencas!... Bravulo kiel ni povas esti ĉiu, havanta koron en la brusto, sed fari tion, kion faras Kamelo, ne povas ĉiu!... Tia, kiel li, oni devas naskiĝi!...

– Nu, se mi ion malbelan diris, pardonu!... Mi nenion malbonan volis diri!...

La bruado estis pli kaj pli proksima... La akraj oreloj de bataluloj jam distingis klakbruon de ĉevalaj hufoj... Ju pli ĝi proksimiĝis, des pli terura ĝi estis.

La bataluloj staris palaj kaj senvortaj.

Tiam subite ekeĥis muzikiloj kaj trumpetoj, iliajn sonojn la kvieta Savao englutis kaj forportis malproksime, malproksimege...

– Ili alvenis!...

– Estu pretaj!... – ektondris Ĉupiĉo. – Sed pafu nur en korpojn!...

Malligiĝis la vindaĵoj sur sparkiloj, oni ĉion kontrolis, ĉion alĝustigis...

La turkoj aperis. Ili iris senzorge, kvazaŭ al edziĝfesto.

– Atendu!... – diris Ĉupiĉo. – Kiam ili alproksimiĝos, tiam pafu!... Nun ĉiu elektu trafoton!...

La turkoj estis pli kaj pli proksime. Oni jam povis distingi iliajn vizaĝojn. Ĉupiĉo ekkriis:

– Paf!

Erupciis tondrado kvazaŭ el ĉielo. Turkaj vicoj fendiĝis... Unuloke estis videbla homo kiu falas, aliloke ĉevalo, baŭmanta kaj faliganta samtempe du turkojn...

La pafiloj estis denove ŝargitaj...

Tamen, la turkoj retiriĝis, kaj tiamaniere foriĝis el la zono de la fajra saluto...

La tago finiĝis, ĉion vualis nokto... La turkoj ne ripetis la provon; ili eĉ ne aperis... Aŭdeblis nek muziko nek timbalo; sonis nur hakiloj, faligantaj arbaron.

Ĉupiĉo kun vojevodoj alvokis la estrojn antaŭ sian tendon, kaj ordonis ĉie starigi fortajn gardantarojn, starigi ilineĉ apud la akvo, por ke la turkoj ne ĉirkaŭiru ilin. Kiam la estroj foriris por plenumi lian ordonon, Ĉupiĉo turniĝis al Jakovo kaj Miloŝo:

– Nu, kion vi opinias?

– Al mi tio ŝajnas stranga!... – diris Jakovo.

– Laŭ mi nenio strangas! – diris Miloŝo. – Mi simple opinias, ke ili ne sciis ke ni estas ĉi tie, pro kio ili iris senzorge. Tamen, kiam ilin renkontis pafaro, ili retiriĝis por pripensi.

– Verŝajne! – diris Ĉupiĉo.

Li alvokis ilin en la tendon por konsiliĝi.

Dume la estroj plenumis la ordonon de Ĉupiĉo, kaj starigis gardantarojn. Laŭlonge de la rivero Leĉjo starigis siajn nudulojn, homojn, kiuj nokte vidis same kiel tage...

La aliaj kuŝiĝis por ripozi...

Tio vere estas stranga! Kiu partoprenis iun ajn batalon, tiu scias kiel post batalo oni dolĉe dormas. Tiam oni ne zorgas pri kuŝejo, sufiĉe estas nur malleviĝi sur la nigran teron, negrave ĉu ĝi estas seka, frosta, aŭ eĉ ŝlima...

Malgraŭ ke tio ne estis batalo, ne estis eĉ bataleto, tamen ĉiuj ekdormis ŝtonan dormon. Malhela nokto tegis ĉion per sia talaro, kiel per lankovrilo, nur gardantaroj kaj vojevodoj maldormis.

Ivanko estis inter la grandantaro apud Zasavico, proksime de la tranĉeo. Liaj junulaj, akrevidaj okuloj fikse rigardis, per nenion preteratenti...

Sed ĉio estis sensona kaj kvieta... Nur karekso susuris, kvazaŭ flustrante...

La oreloj de Ivanko rapide kutimiĝis al ĉi tiu susuro, dum li en tenebro rigardis por nenion preterlasi...

La glacia, tomba silento premis lin kiel roko. Liaj okulharoj iĝis pezaj, sed la knabo saltis kaj komencis iri laŭlonge de la bordo por forpeli la dormurĝon.

Subite al li ekŝajnis ke iu naĝas... Li alrigardis, sed vidis nenion en la kareksejo; streĉinte la orelojn, li konvinkiĝiske iu vere naĝas...

Li denove fiksrigardis la mallumejon, kaj streĉis la ĉanon...

Li aŭdis kiel akvo malrapide, tre malrapide plaŭdas sur la bordon.

– Tio estas ondo– konkludis li.

Tiam li denove komencis fiksrigardi... En la kareksejo li rimarkis kapon. Li volis levi la pafilon – ĉio estu finita kaj glatigita! Tamen, vidante nur unu kapon,li subpremis tiun deziron.

– Kial pafi?... Lin mi eĉ sen pafilo likvidos!...

Pro tio li flankeniris malantaŭ arbusteton, kreskantan ĉe la bordo, kaj observis de tie.

La kapo estis proksimiĝantsa pli kaj pli, facile, nerimarkeble, apenaŭ lulante kareksojn...

Ĉe la bordo la kapo leviĝis. Ivano malfermis la buŝon kaj rondigis la okulojn.

Tio estis Kamelo.

Elirinte sur la bordon, li tuj direktiĝis al la arbusto, malantaŭ kiu troviĝis Ivanko. Ĉi tiu ekstaris antaŭ li.

– De kie vi alvenis? – demandis Ivanko.

– De la turkoj. Mi devas vidi la vojevodojn. Ĉu vi rimarkis min?

– Jes, mi rimarkis vin. Mi jam volis pafi al vi!

– Ha-ha-ha! – ekridis Kamelo. – Tio ne glorigus vin...

Preteririnte Ivankon, li direktiĝis al la tendo de Ĉupiĉo.

La vojevodoj ankoraŭ ne dormis. Ili triope sidis, pripensante kion fari. Kiam Kamelo eniris, ĉiuj eksaltis.

– De kie vi alvenis?... Kial vi estas tiel malseka? – demandis Ĉupiĉo.

– Mi alvenis de la turkoj.

– Ĉu de la turkoj?! – demandis ĉiuj mire.

– Jes, rekte el la turka bivako. Mi longe naĝis en Zasavico, kaj venis por sciigi vin kio okazas ĉe la turkoj.

La vojevodoj eksaltis.

– Kio okazas?

– Hontindaĵo! Niaj unuaj pafkugloj konfuzegis ilin. Ĉiuj volis diskuri dis-dise. La paŝaoj penplene kvietigis ilin. Ili iris senĝene, senzorge; nenion ili atendis, pro tio, kiam vi surŝutis pafkuglojn, ili paraliziĝis. Ili diris... „Eĉ ne unu pafilo krakis vane!...“

– Kion faris iliaj vojevodoj? – demandis Miloŝo.

– Ĉiuj perdis sinregon, eĉ la veziro. Se li ne hontus, se li ne havus malagrablan senton, li revenus.

– Sed kion ili nun faras, ĉu ili kvietiĝis? – demandis Ĉupiĉo.

– Ŝajnas ke jes. Tamen, la veziro ordonis, ke ili dismetu fortajn gardantarojn, por ke soldatoj ne fuĝu...

– Dankon, Kamelo! – diris Ĉupiĉo. – Dankon por tiu bona novaĵo!... Iru, ripozu. Aŭ, ankoraŭ pli bone!... Atendu tie!...

Kamelo eliris antaŭ la tendon por atendi ordonojn, dum la vojevodoj altabliĝis.

– Mi – diris Ĉupiĉo – sendos mesaĝon al Molero, ke li alvenu tiel rapide kiel eble!...

– Tre bone – diris Jakovo.

– Tamen,mi ne irigus Kamelon – aldiris Miloŝo.

– Kial? – demandis ambaŭ.

– Ĉar ni bezonas lin ĉi tie. Kiuj el niaj homoj povus kaj scius ĉi tiel lerte ŝtelobservi la turkojn?...

– Pri tio vi pravas!

– Tamen, pripensu kaj diru kiun alian ni povas sendi.

Ĉupiĉo iomete enpensiĝis. Post mallonga silentado, li elbuŝigis:

– Mi havas multe da fidindaj homoj.

– Mi scias – diris Jakovo – sed ni bezonas homon,kiu konas ĉiujn irejojn kaj kaŝejojn.

– Ĉu ekzistas pli taŭgaj ol la homoj de Leĉjo? Kial ne sendi Nogiĉon?

– Jes, li povas. Mi konas lin! – diris Jakovo. – Li estas kapabla kiel akra sabro.

Alvokinte Kamelon, Stojano ordonis al li iomete ripozi, kaj irigi Nogiĉon al li.

Kamelo foriris. Jam post kelkaj momentoj Nogiĉo alvenis.

– Nogiĉo! – diris Stojano. – Dankon al via patrino ke ŝi naskis vin, ĉar vi nun povas helpi al ni. De la rapideco de viaj kruroj nun multo dependas!

– Mi pretas, Stojano!

– Ĉu vi povas garantii ke vi alportis leteron al Petaro Molero?

– Mi garantias!

– Ĉu vi povas garantii, ke vi trovos lin, sendepende de tio, kie li troviĝas?

– Mi trovos lin!

– Bone! Tiukaze atenduiomete!...

Stojano tiam sidiĝis kaj skribis leteron al Molero. La vojevodoj silentis... Kiam la letero estis finita, li donis ĝin al Nogiĉo:

– Jen, portu ĝin! Enmanigu al li, kaj restu tie por helpi lin, se tio estos bezonata.

– Bone, Stojano.

– Nun iru, iru tuj.

– Adiaŭ!

– Adiaŭ al vi!...

Kiam Nogiĉo eliris, Stojano suprenrigardis:

– Diu volu ke Molero ĝustatempe ricevu la leteron! Mi skribis al li de kiu flanko ataki la turkojn. Se li tion faros, eĉ se estos tri cent mil da ili – ili pereos!... Kadavroj poluos kaj Savaon kaj Zasavicon!

Ĉiuj sentis ke pezaĵo malaperas en iliaj animoj. Li triopo rigardis la estontecon memfide.

– En mian tranĉeon ili ne povos penetri, eĉ se estus du fojojn pli da ili! – diris Ĉupiĉo. – Mi ne timas ankaŭ iiajn atakojn de Savao kaj Zasavico!... Se iu falis en kaptilon, tio estas ili!...

Turniĝinte, li alrigardis la duopon...

– La gardantaroj estas fortaj. Ilin povas preteri nur muŝoj kaj formikoj... Se vi estas lacaj – ripozu... Morgaŭ estosnova tago, alia kaj energia!

Jakovo kaj Miloŝo adiaŭis, kaj foriris en siajn tendojn.

Pluvo denove torentis, ĝiaj gutoj, frapante konstante tendajn tolojn, dormigis la vojevodojn...

# 15. KRUELA BATALO

Estiĝistago pluveca, humidplena; la ĉielo estis plenkovrita de brunegrizaj nuboj, amasiĝantaj kaj verŝetantaj etan pluvon...

La homoj ariĝis ĉirkaŭ fajro, varmiĝante kaj sekiĝante samtempe. Pro granda malseko kaj malvarmumo preskaŭ ĉiuj parolis raŭke, iliaj palpebroj estisŝvelaĉaj, la okuloj sangoruĝaj.

– Homoj! Se la pluvo daŭros ankoraŭ du tagojn, la pulvo iĝos neuzebla! – diris unu el ili.

– La pluvo certe daŭros!

– Mi dormis en la tranĉeo, sed akvo min vekis!

– Ankaŭ min! Ĝi kvazaŭ verŝiĝus sub min!...

– Ho frato! Kiu antaŭ tri tagoj dirus, ke la vetero iĝos ĉi tiel malvarma? – diris rudnikano.

Tiam abrupte aŭdiĝis pafiloj. Gardistoj, kiuj staris antaŭ la tranĉeo, komencis retiriĝi.

La kampadejo agitiĝis. Ĉiuj kaptis pafilojn. La vojevodoj ordigis siajn homojn, kaj ordonis pretiĝi por batalo...

La gardistoj tute retiriĝis en la tranĉeon.

– Ĉu ili ekiris? – demandis la vojevodoj.

– Jes, ekiris. Ĉiuj ekiris ĉi tien. Aŭskultu kiel tero bruegas! – diris gardistoj.

Kaj vere, aŭdiĝis bruego, kvazaŭ venanta el la profundo de la tero.

Vidante la palajn vizaĝojn, Ĉupiĉo ekridis:

– Kompatindaj turkoj! – diris li. – Ili pensas ke ili povas per sia nombreco timigi nin!... Ĉiam same! Miŝaro... Loznico... Fine ili fuĝis... Estas vero kion oni diras:

„Ne venkigas la brilaj armiloj,
Sed venkigas koro en bravulo.“

Tiam li komencis kuraĝigisiajn homojn...Tio vere helpis. La vortoj iĝis pli viglaj, la okuloj pli helaj, la vizaĝoj pli serenaj...

Videbliĝis la unuaj malamikaj vicoj...

Ĉupiĉo jam komprenis ke tiun tagon okazos batalo!... Li atendis kruelan batalon, sciante ke la turkoj tutforte penos penetri en la tranĉeon... Lia koro batadis. Facila tremado absorbis lin tutan. Se li estus sola, li permesus al siaj dentoj klaki, klakadi, sed nun... li kunpremis lamakzelojn, kaj trude ridigis la mienon...

Ĉio estis preta. Atendante ordonon, la batalantoj jam direktis siajn rigardojn al celotoj. La kanonisto staris apud la kanono kun bruligita meĉo, atendante ordonon proksimigi ĝin al la bruligtruo.

– Bravu, fratoj miaj! – kriis Ĉupiĉo. – Ne rapidu! Tro rapida akcelo ne kondukas al celo!... Ne, ili ne povos facile eniri nian fortikaĵon, ĉar ĉi tio ne estas tranĉeo, tio estas fortikaĵo!... Atent!...

La turkoj estis pli kaj pli proksimaj.

– Paf! – ordonis li al la kanonisto.

La kanono ekhurlis, ĉenkugloj disfalĉis turkajn vicojn...

Aŭdiĝis pafaro. Pafado ariskiel belonoj. Leviĝis fuma nubo. Ekbruegis, ektondris, ekmurmuris bruo en oreloj, ekviglis muskoloj, ekbrulis karno sur korpoj...

Tio estis terura lukto. La turkoj sturmis furioze, sed ili ĉiufoje estis repuŝitaj... Sur la kampo antaŭ la tranĉeo sterniĝis kadavro apud kadavro.Tra pafila tondrado aŭdiĝis veplendoj de vunditoj...

La turkoj retiriĝis. Ekregis plensilento.

– Tiel mi agas!... – diris Ĉupiĉo. – Nun, vojevodo Jakovo, viaj homoj okupu la unuajn vicojn.

Jakovo ordonis:

– Por pafi kiel eble pli rapide, la homoj, kiuj troviĝas malantaŭe plenugu la pafilojn!...

– Tre bone! – diris kaj Jakovo kaj Miloŝo... La pafiloj estis denove ŝargitaj. Ĉiu celisto havis kvar-kvin pafilkuglojn...

– Kia estas situacio inter la turkoj? – diris iu. – Ĉu ili forkuris?

– Ne. Nun ili rekolektiĝas. Nun ili atakos furioze, sed tio ne gravas!... Gravas ke vi bone celu!... Nun, kvietu!...

Ĉiujeksilentis. Regis plensilento, kvazaŭ en tombo. Aŭdiĝis susuro de surarbaj sekfolioj...

Tiam aŭdiĝis bruego, bruego terura...

– Tio estas kavalerianoj! – diris Ĉupiĉo.

Li ne eraris. Atakis kavalerio turka... Terura estas ilia kavalerio. Ĉiuj estis sur hufuloj, ĉiuj suprenvolvis la manikoj, ĉiuj tenis akran cimitaron en la mano, ĉiuj estis bravuloj aŭdacaj kaj mallacaj, kun okuloj kaj rigardoj ardaj.

Ili kuregas al la tranĉeo kiel furiozaj. Hufulaj blekoj ŝiris la ĉielon.

– Atentu!... – ordonis Ĉupiĉo. La kanonisto denove proksimigis la meĉon.

– Paf!

Tuj kiam la kanono fintondris, denove ŝutiĝis pafilkugloj. Denove surdiĝis la oreloj, denove mallumo tegis la okulojn, denove komenciĝis batalo kruela, batalo inter la ĉielo kaj tero...

Horon post horo senhalte daŭris la batalo. La kavalerianoj kuratakis. Du fojojn ili altranĉeiĝis, sed pro tio ili perdis multajn bravulojn. Kiu al la tranĉeo proksimiĝis, tiu neniam plu vidis sian Bosnion, ne brakumis sian patrinon kaj fratinon, ne kisis sian edzinon.

Ĉevaloj kaj kavalerianoj kuŝis kiel renversitaj kolonoj aŭ elterigitaj ŝtipoj.

Vekrioj de vunditoj kaj blekoj de ĉevaloj superbruis la tondradon de pafiloj. Tio estis masakro akra. Neniu el la tranĉeanoj vidis sur unu loko tiom de mortintoj kaj vunditoj...

La turkoj denove retiriĝis.

La vojevodoj gaje iris tra la armeo; ili ŝultrofrapetis ĉiun unuopulon, alkriante:

– Mi gratulegas vin!...

La batalantojn plenigis bataldezirego. Ili nun pretis ekkuregi el la tranĉeo, ĵetiĝi inter la turkojn, sed la estroj ne permesis tion.

– Ne, ne!... En ĉi tiu tranĉeo ni estas tondroj, se ni elirus el ĝi, ni iĝus aŭ tomboj aŭ ombroj!... – parolis Ĉupiĉo. – Ni restu ĉi tie!... Da turkoj estas multe, ni ja estas malmultenombraj kompare kun ili. Eĉ se estus ankoraŭ malpli da ni, ĉi tie ni tamen estus pli fortaj!... Eĉ se la turkoj irigus kontraŭ nin ne Bosnion, sed Azion – ni ĉiujn ĉi tie iompostiome disrompus, samkiel bonaj dentoj nuksan ŝelon rompas!... Pli bone estos, ke vi la pafilojn detale purigu!...

– Veron li diras!... Estas tiel!... – ekkriis oni de ĉiuj flankoj.

Tiam ĉiuj komencis purigi la armilojn...

Tion ili faris rapide, ĉar la turkoj ĉiun momenton povis ataki. La batalo estis intensa, pro tio la pafiloj konsiderinde varmdifektiĝis...

Tamen, la turkoj kvazaŭ hezitis ataki...

Renkontiĝinte meze de la tranĉeo la vojevodoj interparolis:

– Kion vi pensas, ĉu ili atakos? – demandis Ĉupiĉo.

– Ne!... – diris Miloŝo. – Ili ne plu povos!...

– Mi opinias ke ili atakos!... – diris Jakovo.

– Ne, ili ne atakos!... – asertis Miloŝo.

– Mi konas la turkojn!... Ili ŝatas problemojn!...

– Problemoj al ili neniam sufiĉas...

Tamen, kvankam ili pensis ke la turkojn ili disdraŝis, ili faris ĉion, per ke nenio surpriza okazu. La armeo estis batalpreta, la kanonoj – ŝargitaj, la ĉanoj streĉitaj. Ili estis pretaj por io ajn, ili atendis atakprovon.

La vojevodoj trairis siajn armeojn por kuraĝigi la soldatojn. Tamen, ili rapide komprenis, ke tio absolute ne estis bezonata.Ĉiuj estis bestiĝintaj, batalsopiraj, ĉiuj atentis ajnan susureton, ĉiuj okuloj brulis febrafajre...

Ĉe la pordego de la tranĉeo troviĝis Leĉjo kun siaj nuduloj. Zaverzano estis babilanta kiam Ĉupiĉo aperis inter ili.

– Kion vi faras, bonaj homoj?...

– Ni atendas, vojevodo!... – diris Leĉjo.

– Mi opinias, ke la batalo por ili estis tre doloriga...

– Estis... Rigardu laĥaoson antaŭ tranĉeo – montris Leĉjo.

– Mi vidas.

– Nu, aŭskultu, vojevodo.

– Diru, taĉmentestro?

– Mi volas peti vin pri io...

– Parolu! Al tia bravulo mi nenion povas rifuzi.

– Tiukaze, permesu al mi meze de la sekva batalo kun miaj homoj elflugi el la tranĉeo.

– Ĉu elflugi?...

– Jes!...

Ĉupiĉo iomete enpensiĝis. Li ja havis tre malmulte da homoj. Permesi al Leĉjo kaj al liaj homoj iri kontraŭ pafiloj, kiuj facile povis mortigi ilin – tion li ne volis fari.

Leĉjo vidis ke li hezitas.

– Vojevodo!... – diris li. – Mi neniam partoprenis batalon ne uzante la ponardon!... Ĉi tion mi tute ne konsideras batalo!...

– Ĝuste, tio estas vero!... Leĉjo veron vortas!... – ekkriis la nuduloj.

Ĉupiĉo mansvingis.

– Nu bone... Dio helpu vin!...

– Dankon, vojevodo!

– Dankon!... Dankon!... – ehiĝis ĉirkaŭ li. Tiumomente ektondris la tero. Aŭdiĝis krioj de ĉiuj flankoj:

– La turkoj alvenas!...

Ĉupiĉo foriris en la tranĉeon por kuraĝigi la homojn. Jakovo kaj Milоŝo faris la samon.

Finfine la turkoj videbliĝis, sed tio estis homa ĝangalo, tio ruliĝis kiel grandega dronigonta ondo...

Sed ilin renkontis pafaro fusila kaj kanona...

Tiam denove ĉion tegis mallumo, denove orelrompe reeĥis arbejoj, denove leviĝis ŝrikoj kaj veploroj... La vojevodoj tra la tranĉeo flugis bravige...

Sed la turkoj sturmadis; ilia kavalerio atingis la antaŭtranĉeon. Tio ne plu estis senspera atako, tio estis ataka batalo. Homoj faladis kiel piroj desur arbo, aliaj homoj ilin tretis, kvazaŭ ili ne estus el karno kaj ostoj...

Meze de la plej impeta batalo, meze de la plej granda lukto, Leĉjo alrigardis Stankon, kies okuloj flagris ekscite:

– Ĉu nun, kunfraĉjo? – demandis lin.

– Delonge mi pensas pri tio!... – diris Stanko, kaj elingigis sian blanktenilan sabron.

Alvokinte la kunularon, Leĉjo malfermis la pordegon de la tranĉeo.

Ili impetis kiel fieraj falkoj. Jam sekvamomente ili malaperis en turkaj vicoj.

Ankaŭ ĝis tiam verŝiĝis sango, sed nun ĝi verŝegiĝis. Inter al la turkoj komenciĝis embaraso. Ili ne plu povis regi sin... Ĉiuj, kiuj sturmis la tranĉeon, falis paftrafitaj... Nun neniu pensis kiel ataki, sed kiel savi sin!...

Iliaj vicoj disrompiĝis, ili disdegeleis kiel neĝo sub radioj de printempa suno; ili dissplitiĝis. Iuj diskuris al Zasavico, iuj al Savao, sed ĉiuj aliaj fuĝis malantaŭen, kure kajrapidkrure.

Jam neniu povis haltigi la disfuĝantan kaj timoplenan armeon... Eĉ la estroj ektimis, eĉ la estroj penis savi siajn vivojn...

La nuduloj kuregis malantaŭ ili kiel frenezaj. Meze de la luktejo aŭdiĝis la voĉo de Zaverzano:

– Vivu tohuvabohuo!... Ni ne bedaŭru, la vivoj estas malmultekostaj!... Hodiaŭ pli valoras unu apro ol unu turko!

La kampo antaŭ la tranĉeo restis malplena. La pafado ĉesis.

Leĉjo ekkriis:

– Halt!...

– Kial? – demandis Zaverzano.

– Revenu.

– Mi opinias...

– Sufiĉas jam! – diris Leĉjo.

– Bone, vi pravas – ekridis Zaverzano – Ni bezonas ilin vivaj por daŭrigi la laboron morgaŭ!

Ĉiuj ekridis.

– Ni revenu en la tranĉeon!...

Kiam ili revenis, oni renkontis ilin kun ĝojo. La vojevodoj interkisis kun ili. Ĉupiĉo premegis ĉiujn al sia brusto.

– Mi ne vane diris: ĝis kiam mi havas Leĉjon kaj liajn nudajn filojn, mi povus senzorge eĉ Istanbulon ataki!... Mi ja diris al vi, ke la turkoj nenion povas kontraŭ ni!... Eĉ se venus duoble pli da ili, neniu restus viva! – kriis Ĉupiĉo.

Fumo estis leviĝanta al la nubkovrita ĉielo, kiu pluvetis; noktiĝis tuj kiam la fumo disiĝis.

La estroj starigis gardantarojn. La vojevodoj retiriĝis en siajn tendojn.

– Ĝis kiam ĉi tio daŭros? – ekpensis Ĉupiĉo enirinte la tendon.

Ĵetiĝinte sur kuŝejon, li elflustris:

– Gravas nur ke Dio haltigu ĉi tiun pluvon!... Ne temas pri ni, sed la pafaĵprovizo malsekiĝos se la pluvo daŭros!...

Al li respondis nur etaj gutoj, kiuj ŝteliste frapetis la tendon, kvazaŭ flustrante...

# 16. TERURO

La pluvo ne ĉesis. Grandaj ŝlimkavoj aperis en la tranĉeo kaj ĉirkaŭ ĝi. La batalantoj ne povis la tutan nokton ekdormi, translokiĝante de unu al alia loko.

Komenciĝis tago, malserena kiel frunto de mortanto. La vojevodoj, malgraŭ la brilaj venkoj, eksilentis. Ĉiuj konjektis ion teruran, neatenditan.

Kaj tio okazis... Tra la kampadejo disvastiĝis onidiro ke la pulvo malsekiĝis, ke eĉ ne unu kartoĉo restis seka. Oni interflustris unu al la alia tiujn vortojn. Pro tiu onidiro ĉiuj sentis haŭtan formikitokladon, la haŭto de ĉiuj hirtiĝis...

La vojevodoj estis palaj kiel malvivuloj. Ili mem antaŭsentis tiun katastrofon. Ili renkontiĝis en la tendo de Ĉupiĉo, rigardante unu la alian maltrankvile.

– Kion ni faru nun? – demandis Miloŝo.

– Ni devas havigi pulvon – respondis Ĉupiĉo.

– Kie?...

– Ni sendu homojn en Mitrovicon. Eble ili trovos tie pulvon.

– Do... vi ne scias certe ke oni tie trovos ĝin...

– Mi ne scias.

– Tio estos katastrofo! – diris Jakovo.

– Se estas tiel, mi foririgos miajn homojn! – diris Miloŝo akre.

– Kien?

– Ĉiu iru al sia hejmo!... Mi ne atendos la armeegon sen pafaĵprovizo.

Ĉupiĉo tordis la manojn.

– Kion fari? – kriis li kaptante sian kapon.

– Kion fari? Se la turkoj ekscios ke ni ne havas pafaĵprovizon, ni ĉiuj pereos!... Tamen... sendu homojn kiel eble pli rapide alporti pulvon.

Ĉupiĉo meditis kiun sendi. Li ordonis ke oni venigu Leĉjon.

– Jen mi, vojevodo! – diris Leĉjo enirante la tendon.

– Venigu Surepon.

Leĉjo eliris el la tendo, kaj post nelonge revenis kun Surepo.

– Stanojlo!

– Mi auskultas vin, vojevodo!... – respondis Surepo.

– Mi bezonas homon, kiu kapablas morti, eĉ ne unu vorton dirinte.

– Mi pretas, vojevodo.

– Iru en Sreman Mitrovicon.

– Bone.

– Ni bezonas pulvon. Trovu kie vi povas, kaj kiel eble pli multe... Jen mono.

Li ĵetis antaŭ Surepon plenan saketon da dukatoj.

Preninte la monon, Surepo foriris. ne retrorigardante tra interkrutejo, rekte al la vilaĝo Zasavico.

– Leĉjo. Venigu la estrojn...

Post kelkaj momentoj ĉiuj estis tie. Jakovo kaj Miloŝo sidis zorgoplene, dum Stojano paŝadis tien kaj ĉi tien.

Kiam ĉiuj eniris kaj haltis, Stojano diris:

– Ni ne plu havas pulvon... Kion fari?

Ĉiuj mallevis la kapojn.Ekregis plensilento. Leĉjo diris:

– Ĉu ni ne havas eĉ unu kartoĉon?

– En mia tendo estas iom, ĝi ne malsekiĝis. Neuzebla estas ĉio ĉio, kio estis en sapeoj. La inundanta akvo penetris sapeojn.

– Sufiĉas tio, kion ni havas.

– Kiel sufiĉas? – demandis Miloŝo. – Ni eĉ unu pafkuglon ne havas por ĉiu pafilo.

– Ni kuregos kontraŭ ili kun sabroj! – diris Leĉjo flamokule.

– Rezignu pri bubaĵoj – diris Miloŝo. – Vi kondutas kvazaŭ tio estus taĉmento, kiun vi povas trapenetri! Armeo tio estas, vera armeo!...

– Ankaŭ armeon ni renkontis plurajn fojojn!

– Tio estas vero, seď ni havis pafaĵprovizon.

– Surepo alportos pafaĵprovizon.

– Li alportos, sed kion fari, se la turkoj ĝis tiam ekscios, ke ni ĝin ne havas?... Ili povas ataki kiel hieraŭ, tiam ili mem vidos?... Ne parolu bubaĵojn, Leporĉjo!...

– Sed kion vi proponas? – demandis Leĉjo.

– Mi, fratoj miaj, opinias ke ni devas retiriĝi.

Miloŝo alrigardis ĉiujn.

Leĉjo eksplodis:

– Kion, ĉu ni retiriĝu?!

– Mi parolas kiel saĝa homo! – diris Miloŝo – Ĉi tie ni ĉiuj pereos, tio helpos al neniu. La turkoj estas pli fortaj ol ni. Ili havas ĉion bezonatan: kaj pafilojn, kaj kanonojn, kaj pafaĵprovizon, kaj manĝaĵon. Al ni nun preskaŭ ĉio mankas.

– Preskaŭ, la veron li diras... – tiuj vortoj apartiĝis el la voĉĥaoso.

– Sed Serbio bezonas nin!... Se ni ne venkos ĉi tie, ni venkos en alia loko! Se ili subpremos nin hodiaŭ – ni subpremos ilin morgaŭ...

Li denove alrigardis ĉiujn.

– Vi pravas! – diris kelkaj, sed aliaj ankoraŭ estis hezitantaj.

Ĉupiĉo enmiksiĝis:

– Ne estas tute tiel, Miloŝo! Mi ne opinias, ke estus bone forlasi la tranĉeon.

– Frato mia, mi ja ne estas virŝafo, atendanta ke turko buĉu min!

– Ankaŭ ni ne estas virŝafoj! – ekflagris Ĉupiĉo. – Mi arigis la homojn por interkonsenti, ne por mokaĉi!

– Nu, bone– diris Miloŝo – konvinku nin ke indas resti! Caru!...

– Mi sendis homojn alporti pulvon.

– Sendis! Tamen, ĉu ili trovos sufiĉe da pulvo?... Kion ni faru, se la turkoj decidos ĝuste nun ataki!...

– Ili estas kvazaŭ ensorĉitaj! En iliajn kapojn tiu ideo ne venos...

– Tio estas tre dubinda! – abruptis Miloŝo. – Mi ne pensas tiel, kiam mi batalas kontraŭ la turkoj!... Nu, faru kiel vi volas – mi kaj miaj homoj foriros!... Mi bezonas ilin ankaŭ por estontaj bataloj.

Tiam li leviĝis, alrigardis siajn homojn, kaj diris:

– Kiu volas, tiu sekvu min!

Li eliris el la tendo, sekvata de liaj homoj.

Stojano tremis pro agitiĝo, sed li sentis ke Miloŝo parolis la veron. Li, kiu kapablis parolvenki eĉ la plej elokventan homon, nun ne povis diri ion ajn; li sentis, ke li parolas sensencaĵojn, ke li parolas tion, kion la saĝa homo ne devas paroli, precipe en ĉi tiu situacio, kiam tiomaj vivoj dependas...

Li alrigardis Jakovon... Ankaŭ Jakovo estis hezitanta... La estroj ial rigardis al la tero. Neniu, krom Leĉjo, povis diri ion ajn.

Leĉjo tiam eksplodis:

– Iru! – diris li. – Iru ĉiuj! Mi ne iros!... Mi restos ĉi tie kun miaj nudaj filoj!... Mi el Ravnjo faros Kosovon!...

Li denove alrigardis ĉiujn. Okuloj liaj flagris per nobla kaj brava ardo...

Tiumomente inter ilin enrapidis Kamelo, tuthumida, kvazaŭ venanta el trempejo. Lia vizaĝo estis pala, kiel se morto metus sian stampilon sur ĝin; okuloj liaj rigardis terurplene.

Ĉiuj kvazaŭ ŝtoniĝus vidinte lin tia. Ĉupiĉo apenaŭ rekonsciiĝis. Li alpaŝis kaj kaptis la ŝultron de Kamelo:

– Kio okazis, je la nomo de dio!

– Ĉu tio estas vero? – diris Kamelo.

– Kio?

– Vi ne havas pafaĵprovizon.

– Ni ne havas, sed Surepo foriris en Mitrovicon por havigi ĝin.

– Malfrue! – ekkriis Kamelo.

– Kial malfrue?!

– Malfrue!... La turkoj jam scias ke vi ne havas pafaĵprovizon. Ilin sciigis iu de la alia riverflanko... iu kapitano. Kvankam ili jam pretiĝis forfuĝi... La timo tiel ekregis inter ili, ĝi tiom obsedis ilin de la momento kiam Leĉjo impetis inter ilin, ke ili timis eĉ ordinaran susuron!... Mia animo kriis: dankon al vi, Sinjoro, por via donaco!...

– Kion ili faras nun?... – demandis Ĉupiĉo kun sangruĝaj okuloj.

– Nun...ili rabiiĝis!... Nun ili pretiĝas sturmi... Mi penplene sukcesis eliĝi, por sciigi ĉi tion!... Faru kion vi povas!...

Stojano alrigardis Jakovon kaj la estrojn:

– Kion ni faru? – demandis li per harstariga voĉo.

Jakovo ekstaris.

– Stojano, frato mia! – diris li. – Singardeman Dio gardas!... Vi scias ke mi pretas batali ĝis pereo, sed per kio mi nun batalu?... Estus pli bone ke ni retiriĝu!...

– Estus pli bone!... Estus pli bone!... – ektondris de ĉiuj flankoj. Stojano vidis ke eĉ liaj homoj samopinias. Kun vizaĝo nigra kiel tero, li elĝemis:

– Ĉu vi tion opinias?

– Jes ni tion opinias!

– Mi ne opinias tion! – ektondris Leĉjo. – Mi ne foriĝos de ĉi tie, ĝis kiam ili min tutan distranĉos en mil pecojn!

– Tamen, kion vi povas fari sola? – diris Jakovo.

– Vojevodo!... Kion mi povas, pri tio oni aŭdos!... Se vi decidis foriĝi – foriĝu tiel rapide, kiel eble!... Iru!... Vi havas viajn domojn, viajn edzinojn kaj infanetojn – mi havas nenion, krom deziron venĝi al la turkoj!... Kaj mi venĝos al ili!... Ankaŭ ĝis nun mia mano fortranĉis multajn turkajn kapojn, sed hodiaŭ – se diablo atakigos ilin – hodiaŭ mi faros tohuvabohuon, pri kiu oni rakontos, ĝis kiam ekzistos almenaŭ unu serbo!... Iru, do, foriĝu!... Adiaŭ!...

Tiam li eliris furioze el la tendo, kaj foriris inter siajn nudulojn...

En la tendo regis silento kvazaŭ en tombo. En ĉiesoreloj sonoris la vortoj de Leĉjo... Ĉupiĉo la unua rekonsciiĝis.

– Ĉu ni interkonsentis? – demandis li.

– Jes, ni interkonsentis! – ekkriis ĉiuj.

– Do, iru tien, inter la homojn, kaj senhaste organizu ĉion... Se iu volas transpasi la riveron, tiu prenu unu folion de nufaro en la buŝon, kaj turniĝu dorsosuben – la akvo transportos lin.

La estroj eliris por ordoni retiriĝon. Ĉupiĉo denove alvokis Leĉjon.

– Venu bravulido! – diris li, dum larmoj aperis en liaj okuloj. – Benita estu la serba lakto per kiu la patrino nutris vin... Tamen, Leĉjo, frato mia, pripensu! Ĉu ne estus pli bone, ke ankaŭ vi retiriĝu?...

Leĉjo eksplodis:

– Ne parolu tion al mi. – Mi vin amis kaj respektis kiel propran patron... Ne parolu tiel, ĉar mi komencos malami vin!... Kion mi faru ĉi tie?... Kion mi atendas?... Kaj kion mi povas atendi de la turkoj, se mi restos viva?... Ĉu mi, kiel virino, permesu ke ili miajn brakojn ligu, kaj poste forhaku mian kapon?... Neniam, vojevodo!

– Vi povas transpasi Savaon.

– Mi foje transiris Drinon, kaj trovis kunularon, venĝantan la kompatindajn sklavojn!... Se mi hodiaŭ transirus Savaon, min tie devus nutri iu mizerulo, ne, tion mi ne volas!... Finfine, mi neniam povis vivi kviete!... Tago sen lukto por mi ne estas bela... al mi tiam ŝajnas kvazaŭ mi ne vivus!... Ne parolu al mi tiel, vojevodo!

– Tamen...

Leĉjo mansvingis:

– Finite!... Mi kaj mia kunularo, miaj nudaj filoj, ni restos ĉi tie, ni restos ĉi tie por perei! Ni jam interkonsentis kaj jeĵuris!... Neniu plu povos ŝanĝigi nian decidon!...

– Kion pri pafaĵprovizo? – demandis Ĉupiĉo.

– Iom ni havas!... Kiam ni ĉion foruzos, ni elzonigos la rabiajn aspidojn, ekkuregos inter la turkojn, kaj okazu kion Dio volas!

– Ankaŭ mi havas iom da uzebla pafaĵprovizo!... – diris Ĉupiĉo.

Li montris al Leĉjo du barelojn da pulvo, kiuj troviĝis en angulo de la tendo.

La frunto de Leĉjo sereniĝis.

– Dankon al vi por tio!... Se nun atakus du fojojn pli granda turka armeo – kvar horojn ili ne povos penetri la tranĉeon. Donu al mi la manon, vojevodo, ke mi kisu ĝin!

– Ni interkisu, bravulo!... Ni adiaŭu kaj benu unu la alian!... Mi estas certa, ke ĉi tie, sur la tero, ni neiam plu vidos unu la alian!... Cetere, mi ja estas estro. Eble mi iam faris ion afliktigan kontraŭ vi... Pardonu!...

– Ankaŭ vi pardonu min, kaj Dio al vi pardonu ĉion! – diris Leĉjo interkisante kun Ĉupiĉo.

Ili ambaŭ eliris el la tendo.

Terure estis vidi kiel malpleniĝas la malgranda fortikaĵo... Ĉiuj foriradis abrupte, rapide, atendante nek kamaradon nek amikon. Sur ĉiu vizaĝo respeguliĝis timo kaj teruro...

Larmoj inundis la vizaĝon de Ĉupiĉo.

„Kion mi ĝisvivis?!... Kial, Sinjoro, vi hieraŭ ne senvivigis min!“ – pensis li en si.

Leĉjo ankoraŭfoje etendis al li la manon:

– Adiaŭ, vojevodo!

– Adiaŭ, bravulo!...

Leĉjo foriris en la tranĉeon por ordoni ke oni transportu la pafaĵprovizon el la tendo... Ĉupiĉo staris, senvorta kaj senespera, rigardante kiel disiras la kunularo kiun li estris, la armeo,kiu ĝis hieraŭ estis lia gloro, sed hodiaŭ?... Hodiaŭ...

Li ne aŭdacis finplekti la penson... Li ekkuregis por fuĝi de ĝi...

Tiam li saltis en Savaon!... Kiam li aperis sur akvan surfacon, li aŭdis teron brueganta.

– Jen, la turkoj iras! – ekpensis li.

Kaj eknaĝis...

## 17. TITANOJ

Leĉjo revenis en la tranĉeon. Tie oni lin renkontis gaje. Zaverzano ne sciis, kion li faras pro ĝojo, li nur bedaŭris ke Surepo ne estas tie.

– Tamen, li alvenos, espereble... – diris li.

Ankaŭ la koro de Stanko vibregis. Kiam Leĉjo alvenis, li diris:

– Mi atendegas!... Ĉu vi aŭdas la bruegon? Jen, ili iras... Delonge ni ne partoprenis jesbatalon. Tutatempe iu estras, decidas kiam ni povas ataki la malamikegojn, kaj kiam ni remetos la blanktenilan sabron en la ingon!... Ĉi tio min, kunfrato mia, memorigas pri la feliĉa tempo, kiam ni reĝis en niaj boskoj!...

– Ni interkonsentu kaj interkonsiliĝu, fratoj miaj! – ekkriis Leĉjo.

Ĉiuj ariĝis ĉirkaŭ li.

– Mi jam estis dirinta, kaj ankaŭ nun mi diras: ni batalos kontraŭ la turkoj ĝis kiam la lasta inter ni estos viva. Tio ne estas devigo, kiu volas vivi, tiu foriru!...

Ĉiuj silentis.

– Ĉu vi ĉiuj restas? – demandis li.

– Ĉiuj!

La voĉo de Leĉjo subite iĝis pli milda.

– Tiukaze, fratoj miaj... – diris li – ni adiaŭu unu la alian!... Homoj ni estas, eble ni pekis unu al la alia. Eble iu, senvole, ion afliktigan faris al iu el ni... Laŭ la kutimo, fratoj miaj, eĉ se nenion similan ni faris, ni fratece brakumu kaj adiaŭu unu la alian!... Granda armeo iras kontraŭ ni, nun estas nia antaŭmorto!...

Laŭtiginte la voĉon li ekkriis:

– Ankoraŭ unu fojon mi diras: al kiu la vivo estas kara, kiu havas por kiu vivi, tiu iru!...

Ĉiuj silentis. Zaverzano turniĝis kaj alrigardis Kamelon, apogitan al la muro de tranĉeo.

– Almenaŭ vi, Kamelo iru, neniu alia tion volas!...

– Tamen, kial mi iru? – demandis Kamelo. – Ĉu via kunularo hontas pri mi?...

– Neniukaze!... – audiĝis krioj de ĉiuj flankoj.

– Mi pensis... – komencis Zaverzano serioze.

– Min ne interesas kion vi pensis... Ĉu vi kredis ke mi opinias ke la pulvomalbonodoras, diru?...

– Pardonu, Kamelo!... Mi tiel opiniis!... Tamen...

– Dio pardonu vin!... Mi pardonas kaj petas ke oni ankaŭ min pardonu!... Ankaŭ mi estos kun vi!... Mia tasko estas plenumita, nun mi povas nur perei brave kun bravuloj – se vi min akceptas!...

Leĉjo ĉirkaŭbrakis lin.

– Tamen, kial vi min rigardas tiel?... Mi parolas al vi puran veron!... Mi plenumis mian taskon... Al ku mi nun iru?... Al kiu mi povus rakonti pri la turkaj fiagoj?... Kiun mi povus voki defendi la malriĉularon?... Neniun plu!... Ĉiuj, kiuj havas koron kuraĝan – estas ĉi tie!... Al vi mi lamentis kaj plendis, kun vi mi volas perei!... Mi scias kaj fusili kaj sabri, ne nur kuri kaj flustri!...

Leĉjo, Stanko, Zaverzano, Jovano, Joĉjo... ĉiuj interbrakumis kaj interkisis kun Kamelo... Ĉi tiu homo kvazaŭ havigus al ili novan vivon kaj novan forton. Ĉiuj koroj ekbatis pli vigle...

Tiumomente la suno dispelis la nubojn, ĝiaj brilaj radioj eklumis...

Leĉjo levis la manon:

– Fratoj miaj! Dio nin aŭskultas!... Li aŭdis nin!... Rigardu!... Li sendas al ni sian filon, la brilan suneton, por gajigi kaj prilumi nin... Dankon al vi, patro ĉiela! – diris li, demetante la ĉapon. – Dankon al vi, ĉar vi sendas al ni vian favoron en ĉi tiu horo...

Abrupte io eksplodis... Ĉiuj eksaltis... La kampon antaŭ la tranĉeo ŝtopis turkaro...

– Kvietu, bravuloj!... Celu nur la karnon!... Ĉiu plumbaĵo kunportu morton al tiuj, kiuj ĵuris ekstermi genton nian!...

Dum li tion parolis, la titanoj, kiuj bravege volis rigardi al la morto rekte en la okulojn – malkoncentriĝis en la tranĉeo...

– Paf!

Ĉiuj ekfajris...

Tiam komenciĝis batalo mita, kaj neaŭdita, kaj nevidita. Kuraĝiĝintaj, la turkoj sturmis plenforte, sed estis repuŝitaj...

Io stranga plenigis Stankon dum ĉi tiu batalo. Li ŝargadis la pafilon, celadis kaj pafadis en karnon, sed liaj pensoj estis tute aliloke.

Antaŭ liaj okuloj ŝvebis bildo de bela virino, tenanta infaneton en la brakoj... Ho, kiom li deziregis vidi tiujn estulojn!... Kiom li sopiris ĉirkaŭpreni ilin!...

Ili ambaŭ ridetis al li. Tiu bildo estis tiom kara, tiom klara, ke li vidis nenion alian, krom ilin. La tondradon, kiu skuis la ĉielon, supersonis karesvortoj, alflugantaj desur iliaj lipoj...

Li estis ŝarganta sian pafilon, li pafadis, li trafadis per ĉiupafkuglo, sed li tion estis faranta kvazaŭ tajlante lignerojn...

Apud li, dekstraflanke staris Leĉjo, fiera kiel Dio, kaj maldekstraflanke – Zaverzano, kiu babilaĉis kiel pasero kun Kamelo. Preninte ladboteleton, kiusur rimeno pendis sur lia ŝultro, li diris al Kamelo:

– Ek, ni drinku por enterigo de la turko sur la verda ĉevalo, kiu malantaŭenŝovis la turbanon, pro kio lia verto brilas kiel kupra bakpleto, kaj ankaŭ... de la bela, nigrahara turko apud li.

– Ek! – diris Kamelo.

– Nu... diablo ilin forportu!

– Forportu!

Li glutis el la ladbotelo, kaj pafcelis al la duopo... Pafiloj ektondris, kaj la duopo renversiĝis desur la ĉevalo.

– Bone! – diris Kamelo.

– Ĝuste pri tio mi ŝatas pafi kontraŭ rajdantoj, ĉar ili falas ridinde! – diris Zaverzano ridante. – Nun, la duopon apud ili. Kiu estas la turko en arĝenta kudraĵo?...

– Vidajiĉo el Beljino!... – diris Kamelo.

– Ho... lin, kaj tiun apud li.

Denove pafo, kaj denove krioj de ĝojo.

Jovano kaj Joĉjo sidis kvazaŭ apud kaldrono – ili ne elektis... Al ili estis negrave kontraŭ kiu ili pafos, gravis nur ke tio estu turko...

Du horojn senĉese daŭris la terura batalo, sed la turkoj devis retiriĝi, ĉar pereis multaj bejoj kaj armeestroj...

Vidante ke la turkoj retiriĝas, Leĉjo ekridis, kaj diris al Stanko.

– Mi ĵuras per la Dio kaj animo, kunfrato, ŝajnas ke ni superos ilin!

Stanko reakiris la konscion, kaj diris, mem ne sciante kion parolas:

– Finite...

Al li malplaĉis ke la batalo ĉesis, ĉar la tutan tempon dum ili batalis, li estis en sia mondo; sed nun li devis respondadi al la demandoj, aŭdiĝintaj de diversaj flankoj...

Zaverzano alrigardis laŭ la fluo de Savao.

– Kion vi rigardas, Zaverzano? – demandis Latkoviĉo.

– Mi atendas Surepon! Ho, se li estus kun ni, ni farus veran tohuvabohuon!... Diru, Kamelo, ĉu vi akceptus ankaŭ lin kiel nian kompanon?

– Jes, mi akceptus! – diris Kamelo ridetante.

– Tiaj negocistoj neniam ekzistis.

– Pri kio li negocas? – demandis oni de ĉiuj flankoj.

– Atentu! – ekkriis Leĉjo.

Ĉiuj alrigardis... La turka kavalerio galope direktiĝis rekte al la tranĉeo...

Abrupte ĉiuj kuŝiĝis sur la nigran teron, post kio ekregis plensilento. Aŭdiĝis nur hufbruo, skuanta la teron, kaj tintado de ellasiloj sur pafiloj...

Nenio estas pli multekosta, kaj nenio estas pli malmultekosta, ol la kapo homa. Eĉ pirojn forskuante, oni estas pli indulgema, ol dum batalo... Homoj faladis kiel garbaro; post ĉiu pafo unu vivo finiĝis... Tra la tohuvabohuo eĥis plendkantado kaj bleko de ĉevaloj. La brila suno, kiu ĵus eklumis, vualiĝis per malhela kovrilo, tra kiu brilaj radioj ne povis penetri...

Tamen oni daŭre luktis. La estroj de la turkoj kun elingigitaj sabroj bataligis siajn soldatojn... La tranĉeanoj estis pli kaj pli ekzaltitaj...

Stanko kuregis tien kaj ĉi tien, batalante. Leĉjo, rekta kiel pino, senĉese kantis pro ĝojo ĉar lia neforta taĉmenteto estigis tian tohuvabohuon. Zaverzano ŝercis kaj pri vivantoj kaj pri mortintoj. Ivanko diris al li:

– Estas peke mokridi mortinton!...

– Ankaŭ ni estas mortontoj! – kromdemandis Zaverzano, kaj ne atendante respondon, iris de unu al la alia.

Kamelo sidis kviete, pafante. Eĉ ne unu lia muskolo ektremis. Li estis senemocia, kvazaŭ prilaboranta ŝtonon en sia akvomuelejo...

Tri fojojn la turkoj kuratakis, tri fojojn ili repuŝis la turkojn... Laŭte ridis Zaverzano, vidinte ke fleksiĝas iliaj vicoj.

– Leĉjo!... Ŝajnas ke ni forĵetos ilin en Bosnion!...

Nur Dio scias kion farus ĉi tiuj malmultenombraj bravuloj, se pulvo sufiĉus; sed la pulvo jam estis foruzita.

La turkoj ĝuste tiumomente kuratakis la kvaran fojon.

– Ni ne plu havas pulvon!... Ni kurataku! – kriis Zaverzano.

Ili preskaŭ decidis fari tion, sed Kamelo leviĝis kaj diris:

– Ne.

– Sed kion ni faru? – demandis ĉiuj.

– Ni kuratakos!... Sed unue ni faru ion alian. Kelkaj el vi sekvu min...

– Kion li nun planas? – demandis Stanko Leĉjon.

– Sendube ion saĝan – diris Leĉjo.

Li ordonis al kelkaj taĉmentanoj iri kun Kamelo.

– Ne permesu al ili tuj penetri!... – diris Kamelo.

Kamelo foriris. Post certa tempo ili revenis. Ĉiu el ili portis du abelkorbojn en la manoj...

Laŭta rido salutis ilin.

Kamelo rapidmove prenis abelkorbon kaj haltis tuj ĉe la defendmuro.

– Lasu la turkojn proksimiĝi! – diris li mallaŭte.

Post kelkaj momentoj la tranĉeanoj eksilentis. La turkoj kriegis kuratake... Iliaj ĉevaloj baŭmis por ensalti la tranĉeon.

Tiumomente kelkaj abelkorboj falis inter ilin.

Tiam komenciĝis nova tohuvabohuo... La koleriĝintaj abeloj plenumis sian farendaĵon. Ili pelis kaj ĉevalojn kaj bravulojn en ondojn Savaan kaj Zasavican.

Farinte tion, Kamelo alrigardis Leĉjon, kaj diris:

– Nun vi povas malfermi la pordegon...

– Mi tuj faros tion!... Nu, fratoj miaj, ni ankoraŭfoje benu unu la alian! – diris Leĉjo.

Ili interkisis kvazaŭ irante al edziĝfesto.

– Mi parolas al miaj fratoj, al bravuloj... Ĉu ni pereu?

– Ĝis la lasta! – ekkriis ĉiuj.

– Do – jen!...

Li malfermis la pordegon, kaj ili kun elingitaj sabroj ĵetiĝis inter la turkojn... Ili malaperis en la turkaj vicoj... Aŭdiĝis nur alkriado:

– Ha!... Ne permesu!... Kaptu tiun ulon!... Adiaŭ, fratoj... venĝu min!...

Ili renkontiĝadis dum la kruela batalo.

– Brave, Kamelo! – kriadis Zaverzano. – Vidu kiel Stanko tohuvabohuas!... Rigardu kion faras Leĉjo! Hej, povra Plumpĉjo, ĉu vi jam pereis?... Atendu almenaŭ ke mi venĝu vin!...

Li frapegis la turkon kiu forsabris la kapon de Plumpĉjo, sed dedorsa bato renversis ankaŭ lin!... Eksilentis la buŝo, kiu gajigadis la kunularon...

– Pereis Zaverzano! – ekkriis Stanko al Leĉjo. – Sturmu tien!

Tiam li penetris la plej densajn vicojn. De tie li revenis kun rompita sabro...

La kunularo konstante malgrandiĝadis. Restis deko da ili, sed sen armiloj. Ili luktis per pafiloj kiel per palisoj. Malesperege Stanko alrigardis la ĉielon. Lia rigardo falis sur stakigitaĵojn, per kiuj ili transiradis Savaon kelkajn tagojn antaŭ la batalo. Subita penso trafulmis lian kapon.

– Kunfrato! Jen niaj armiloj!...

Jam sekvamomente ĉiu el ili tenis unu lignoŝtipon en la manoj...

Ili unuanime faris ankoraŭ unu sturmon. Ankoraŭfoje disŝpruciĝis cerboj, post kio ekregis silento...

Kaj la turkoj trapenetris Ravnjon...

Muĝas Savao, kaj ĝia murmuro rakontas rakontojn pri bravuloj... Silentas Zasavico kiel maljuna pekulo, el kiu oni ne povas eĉ unu vorteton elŝiri; ĝiaj vaneloj, same kiel ĝiaj fiŝoj – senvortas. Tamen ekzistas io, kio ŝanĝas la historion, kio superas la plej brilajn ekzemplojn, kio elstaras inter ĉiuj aliaj, same kiel Termopiloj. Tio estas la tranĉeo sur Ravnjo. Kiel grizhara profundaĝulo, ĝin surkreskis dornaĵoj kaj trudherboj; tamen ĝi ankoraŭ estas fiera, ĝi ankoraŭ skrapas la ĉielon...

# POSTPAROLO (Alvoko al la legantoj)

Historiaj romanoj estas specifika kaj interesa ĝenro en Belarta Literaturo, kiu povas havi amantojn aŭ ne, sed unu, ni povas diri precise, ili neniun lasos indiferentaj.

Oni diras, ke , se vi volas ekkoni, kompreni la animon de iu popolo, lando, vi devas legi historiajn romanojn de la nacia verkisto.

Traduki similajn romanojn estas pli malfacile ol aliajn literaturajn verkojn, ĉar transdoni ĉiujn sentojn de la herooj, spiriton de la epoko, de nacia diverseco, ne estas facila tasko.

La tradukisto devas transdoni kaj devigi leganton travivi kun la herooj eventojn, kiuj tre gravas por la popolo, batalanta por sia libereco, por ekzisto, por paca vivo al siaj idoj.

Kiam vi legos la romanon de Janko Veselinoviĉ «Hajduko Stanko», vi konvinkos, ke tradukistoj J. Zarkoviĉo kaj J. Novakovo inde plenumis la taskon.

Legante la romanon Esperantlingve, aperas la sento, ke ni plene travivas la tempon, kiam serba popolo suprenigis la kapon en sia malegala , sed justa batalo kontraŭ agresantoj.

La romano, kiel oni diras, legeblas laŭ unu spiro.

Ĉiuj tradukitaj priskriboj ne lacigas , sed helpas imagi kaj regionojn de la lando, kaj homojn, kaj ĉion, sen kio ĝenerale ne eblas vivo, ni parolas pri vera, fidela amo, amikeco, kiujn ne timigas morto.

Samtempe ni legas pri perfiduloj, kiuj ne mankis en ĉiuj popoloj, sed nigraj agoj ĉiam malvenkas.

Plezure ni legas tradukitajn kantojn de hajdukoj, la kantoj, kiuj esprimas sentojn de la herooj, de ribelantoj.

Memorindaj pensoj en frazoj dum legado, restas en memoro, kiel, ekzemple: „Li estis unu el homoj, kiu kreis nian popolan saĝon, niajn proverbojn…“.

Ankaŭ, sekvaj strofoj el la romano povas esti gvidmelodio de la verko:

„Kiam kamplaboristo forlasas sian plugilon, kiam kamplaboristo prenas armilon?... Tio signifas: batalo pri la vivo kaj morto, batalo senespera, eterna…“.

Kaj ĉiu leganto komprenas, ke agresantoj, kiuj longaj jardekoj, eĉ jarcentoj, regas tiun aŭ alian popolon, frue aŭ malfrue malgajnos, eĉ se ne fizike, sed morale, ĉar vivi en malamo flanke de liberema, patriota popolo, por kiu ne estas dilemo ĉu „vivo aŭ libero", ne povas daŭri senfine.

Dialogoj inter la herooj estas kompreneblaj, sentoplenaj.

Ŝajnas, ke la leganto ankaŭ partoprenas interparolon, tiel vive „sonas" alparoloj de la herooj.

Esperantlingva traduko de la romano „Hajduko Stanko" ankoraŭ foje vekis la penson, ke, legante iun libron, ni ofte estas dankemaj al la aŭtoro (kio estas nature), sed ne ĉiam al tradukistoj, kiuj havas malfacilan taskon atingi la korojn de la legantoj, traduki „testamenton" de la aŭtoro kaj peni rakonti, ke historiaj verkoj estas atestiloj de dankema memoro en ĉiuj tempoj de la vivo de diversaj popoloj.

Kaj fine, deziro al ĉuj legantoj – konatiĝo kun serba literaturo (se ĝis nun ne faris tion) ni povas komenci de historia romano „Hajduko Stanko", romano, kiu vere indas esti en trezorejo de la amataj historiaj romanoj.

Rita Mkrtchyan

# NOTOJ

**Anto Bogiĉeviĉo** – (serbe: Antonije – Anta Bogićević, 1758–1813), serba vojevodo, batalis kun siaj taĉmentoj kontraŭ la turkaj fortoj en Loznico, la 28-an de Julio 1809., kiam la turkoj post la longa kaj sangoplena batalo, estis malvenkitaj kaj forpelitaj en Bosnion.

**Badovinaco** (serbe: Badovinci) – vilaĝo en Maĉvo

**Belotiĉo** (serbe: Belotić) – vilaĝo en Maĉvo

**Beljino** – (serbe: Bijeljina) urbo en la orienta Bosnio kaj Hercegovino

**Bogatiĉo** (serbe: Bogatić) – apuda urbo de Ŝabaco

**Cero** – montaro en la okcidenta Serbio

**Ĉibuko** (tur.) – speco de longa pipo

**Deligrad** – urbeto en regiono de la urbo Niŝ en la suda Serbio.

**„Ekĝermis rajao“** (esp. rajao, serbe: raja – venas de la turka vorto „râya“ kiu signifas neislaman loĝantaron en la, far turkoj, okupitaj teritorioj; do la sintgamo „ekĝermis rajao“ signifus „leviĝis la subjugitan popolon serban“

**Eliatago** – la tago de sankta profeto Elio; prifestata 2-an de aŭgusto (20-an de julio laŭ la malnova kalendaro, tn. Juliana kalendaro)

**Glogovaco** (serbe: Glogovac) – vilaĝo en Maĉvo

**„Gloraj Nemanjiĉoj“** – la serba mezepoka dinastio; fondintoj de la serba mezepoka reĝlando.

**Gojena Alilo** – turka bejo el la bosnia urbeto Kladuŝa kiu, laŭ la legendo, forŝtelis la edzinon de Jankoviĉo Stojano

**Jadaro** – rivero en Maĉvo

**Jakovo Nenadoviĉo** – (serbe: Jakov Nenadović, 1765 – 1836, serba vojevodo, poste la unua prezidanto de la serba registaro en la liberigita Serbio (1806–1811) kaj ministro pri internaj aferoj (1811–1813)

**Janko Katiĉo** – ( serbe: Janko Katić, 17?? – 1806), serba vojevodo, unu el la ĉefaj organizintoj de la Unua serba kontraŭturka leviĝo, la unua asistinto al Karaĝorĝo

**Jankoviĉo Stojano** – mezepoka serba heroo, protektinto de la sklavigita serba popolo dum la turka regado. Prikantita en la serba buŝa popola poezio.

**Ĵuravo** (serbe: Žurava) – rivero en Maĉva regiono

**Karaĝorĝo** – Ĝorĝo Petroviĉo (serbe: Đorđe Petrović, 1778–1818), la gvidanto de la Unua serba kontraŭturka leviĝo (1804–1813)

**Katiĉo** – (Simo Katić, 1783–1833, serba vojevodo, unu el la gvidantoj de la Unua serba kontraŭturka leviĝo

**Krunia** (serbe: Kruna) – virina serba nomo; ĉi tie: la nomo de la patrino de Jelica

**Kulin-kapitano** – Mahometo Kulinoviĉo ( serbe: Mehmed Kulenović 1776–1806) turka bejo, kapitano de la Bosnia ejalato; dum la granda batalo sur la kampo de Miŝaro (1806) estis mortigita de serbaj kontraŭturkaj ribeluloj.

**Leŝnico** (serbe: Lešnica) vilaĝo en Maĉvo, apud urbeto Loznica

**Loznica** – urbo en la okcidenta Serbio apud la rivero Drina

**Lukao Lazareviĉo –** (serbe: Luka Lazarević, 1774–1852; serba vojevodo, unu el la gvidantoj dum la Unua serba kontraŭturka leviĝo

**Maĉvo** – regiono de la okcidenta Serbio

**Metkoviĉo** (serbe: Metković) – vilaĝo en Maĉvo

**Miloŝo kun rudnikanoj** – temas pri Miloŝo Obrenoviĉo (serbe: Miloš Obrenović, 1780–1860), vojevodo serba el regiono de la montaro Rudnik; tial: „kun rudnikanoj"

**Miloŝo Stojiĉeviĉo** – ( serbe: Miloš Stojićević-Pocerac, 1776–1811, serba vojevodo)

**Miluteno Nemanjiĉo (**Milutin Nemanjić, 1253–1321) – la serba mezepoka reĝo de 1282. ĝis 1381. Konstante atakinte Bizancon, plilarĝigis la serban teritorion konkerinte kaj anektinte multajn bizancajn regionojn inkluzive la hodiaŭan nordan Albanion

**Miŝaro** – ebenaĵo en la serba regiono nomita – Maĉvo.

**Molero kun Drinejanoj** – temas pri Petro Nikolajeviĉo Molero (serbe: Petar Nikolajević Moler, 1775–1816), serba vojevodo, kaj pri liaj taĉmentoj troviĝintaj tiutempe ĉirkaŭ la rivero Drino; tial: „kun Drinejanoj".

**Noĉajo** (serbe: Noćaj) – vilaĝo en Maĉvo

**Orido, Dubravo** – vilaĝoj en Maĉvo

**Pantelejtago** – tago de sankta Pantelejmono, prifestata en la ortodoksa Eklezio la 9an de Aŭgusto (la 27an de Julio laŭ la malnova, juliana kalendaro kiu ankoraŭ hodiaŭ agnoskas la Serba Ortodoksa Eklezio)

**Paraŝnico** (serbe: Parašnica – nun grenejo, tiutempe densa arbaro en Maĉvo

**Pernjavoro** (serbe: Prnjavor) – vilaĝo en Maĉvo

**Poceranoj** – loĝantoj en regiono sub la montaro Cero ( serbe: Cer)

**Podinoj** (serbe: Podine) – vilaĝo en Maĉvo
**Raĉo kaj Ŝabaco** – urboj en Serbio
**Sinĝeliĉo** – (serbe: Stevan Sinđelić, 1770–1809), serba vojevodo, dum la Unua serba kontraŭturka ribelo pereis heroece en monto Ĉegaro apud vilaĝo Kamenica.
**Sovljako** (serbe: Sovljak) – vilaĝo en Maĉvo
**Srema Mitrovico** – serbe: Sremska Mitrovica; urbo en regiono nomita Sremio (serbe: Srem)
**Stojano Ĉupiĉo** – (serbe: Stojan Čupić, la historia persono; serba vojevodo, heroo de la Unua serba kontraŭturka leviĝo (1804–1813)
**Sulejman paŝao** – temas pri Sulejmano paŝao Skopljak (17??–1815); li estis ĉefgvidanto de la turkaj fortoj kontraŭ la serbaj ribelantoj. Malvenkita sur la kampo Miŝaro, li panike forfuĝis al Bosnio kune kun siaj taĉmentoj. Post la disfalo de la Unua serba leviĝo (1813) li fariĝis la unua beograda veziro.
La verkisto tute mise lin nomis Kulin-kapitano (Mahometo Kulinoviĉo) kiu pereis 1806., dum la batalo sur la kampo Miŝaro.
**Ŝumadio** (serbe: Šumadija) – parto de orienta Serbio; la nomo ricevita pro la iama abundego de densega arbaro; la nomo venas de la serblingva „šuma“ („arbaro“); en Esperanto povus do esti tradukita kiel „Arbarejo“
**Valjeva distrikto** – distrikto de la urbo Valjevo, situanta en la okcidenta Serbio.
**Velko** – Veljko Petroviĉo (serbe: Veljko Petrović, 1780–1813), serba vojevodo, havis grandan rolon dum la Unua serba kontraŭtuka ribelo; pereis heroece en kampo Ravnje en 1813
**Vidojevico** (serbe: Vidojevac) – vilaĝeto en Maĉvo
**Veziro Derendelija** – temas pri Ali-paŝao Derendelija (guvernero de Bosnio ekde 1813 ĝis 1815) kiu, laŭ la ordono de la turka Granda Veziro Hurŝid-paŝao, kun siaj multnobraj taĉmentoj transiris la riveron Drino kaj en la loko Ravnjo venkis la serbajn ribelulojn. Tiel definitive finiĝis la Unua serba kontraŭturka leviĝo.
**Viŝnjiĉo** (serbe: Filip Višnjić, 1767–1834) – la blinda poeto, per guzloj kantinta serbaj eposaj kantoj, prikantis la grandan batalon sur la kampo de Miŝaro en 1806.

Preparis Zlatoje Martinov

CIP – Каталогизација у публикацији
Народна библиотека Србије, Београд

821.163.41-31

VESELINOVIĆ, Janko, 1862–1905
Hajduko Stanko / Janko Veselinoviĉo ; [tradukis Jovano Zarkoviĉo, Ĵivanko Novakovo]. – Beogrado : Удружење научних и стручних преводилаца Србије, 2024 ([Београд] : Службени гласник). – 329 str. ; 24 cm

Nasl. izvornika: Хајдук Станко /Јанко Веселиновић. - Tiraž 50. - Str. 5–6: Antaŭparolo / Zlatoje Martinov. – Str. 325–326: Postparolo : (alvoko al la legantoj) / Rita Mkrtchyan. – Notoj: str. 327–329.

ISBN 978-86-917873-4-9

COBISS.SR-ID 154797577

осн. 1960.

**Удружење научних и стручних преводилаца Србије**
**Репрезентативно удружење у култури**

www.prevodi.rs

ISBN 978-86-917873-4-9

9 788691 787349